

LITERATURA MONDO

Dua periodo — Sesa jaro

1936

ENHAVO

1. STUDIOJ KAJ SKIZOJ

Belmont, Leo: Parolado ĉe la malferma kunsido de Universala Kongreso — — — — —	125
Dresen, Helmi: Pasis la kongreso — — — — —	124
D. Viktorov-Cehoviĉ: En Rusujo oni konstruas gran- dan kinourbon — — — — —	83
Fersil: Bestaferoj — — — — — 52, 84,	129
Novakampo: Meditado supre de montpinto — — — — —	158
Orden, M. van: Verkoj kaj verkistoj (Bellamy kaj Bellanismo) — — — — —	77
Serene — — — — — 48, 83,	142
Sz. F.: Verkoj kaj verkistoj (Swift kaj Andersen)	53
Sz. F.: Verkoj kaj verkistoj (La vivo de Dostojevskij)	134
Sz. F.: De lando al lando — — — — —	82
Sz. F.: Kosmetikaj zorgoj en la biblia epoko — — — — —	55
Verda, Georgo: Wien, 1936 — — — — —	117

2. NOVELOJ

Andersson, Hjalmar: Sia elekto — — — — —	76
Anghel, D.: La robo de l' avino (T. Morariu) — — — — —	151
Babits, Mihály: La anĝelo (Lali Blond) — — — — —	15
Baudelaire: Tri pecetoj (Marc Pujot) — — — — —	111
Bates, H. E.: Senkulpeco (Alec Venture) — — — — —	80
Duvernois, Henri: Sortoturno (L. Létinois) — — — — —	101
Enba: La kursgvidanto kaj la kursanino — — — — —	105
Földi, Mihály: Vid-al-vide (F. Szilágyi) — — — — —	126
Franzmann: Pasporto — — — — —	22
Gallit, August: Lumaj noktoj (H. Seppik) — — — — —	33
Gung-Si, Ma: La lupoj de mezmontaro (Venlo Fon)	33
Hasse, Z.: La nomtabuleto (F. Szilágyi) — — — — —	74
Istrati, Panait: La jalujo (Henri Vatré) — — — — —	152
Jan Jian: Frateto (Venlo Fon) — — — — —	107
Korczak, Janusz: Infaneto (H. Weinstein) — — — — —	18, 50
Kuprin A.: Feliĉo (V. Marganidze) — — — — —	165
London, Jack: Leopard-dresisto rakontas (G. Saville)	79
Maitinsky, Klara: Familia katastrofo — — — — —	13
Maurois, André: Junulino en la neĝo (R. Bernard)	56
Neratov: Amo (Estera Szyndelman) — — — — —	30
Newell, L. N.: La juro de piulo — — — — —	65
Newell, L. N.: La svatanto — — — — —	66
Newell, L. N.: Ekzilito — — — — —	136
Roda Roda: La ŝtona gasto (L. Weleminsky) — — — — —	93
Roseti, R.: La projekto — — — — —	21
Schreiber, Roy I.: Ne tiel freneza — — — — —	130
Szilágyi, F.: La granda aventuro — — — — —	44
Supervielle, Jules: La azeno kaj la bovo de la kripo (L. Létinois) — — — — —	145
Wallquist, Einar: Kristina (Hj. Dahllén) — — — — —	153

3. POEMOJ.

Adamson, Hendrik: Lunlumo — — — — —	72
Adamson, Hendrik: Sendorme — — — — —	7
Adams, Vilmar: Idilio (Hilda Dresen) — — — — —	104

Annuzio, Gabriele, D': El »Kanto Nova« (K. Ka- locsay) — — — — —	159
Annunzio, Gabriele, D': La kombilo (K. Kalocsay)	162
Annunzio, Gabriele, D': La neĝo (K. Kalocsay) — — — — —	167
Annunzio, Gabriele, D': La vulturo de l' suno (K. Kalocsay) — — — — —	162
Annunzio, Gabriele, D': Tagmezo (K. Kalocsay) — — — — —	161
Baudelaire, Ch.: La bela ŝipo (K. Kalocsay) — — — — —	4
Baudelaire, Ch.: La fontano (K. Kalocsay) — — — — —	4
Baudelaire, Ch.: La gigantino (K. Kalocsay) — — — — —	4
Baudelaire, Ch.: La vojaĝo (K. Kalocsay kaj Lali Blond) — — — — —	70
Baudelaire, Ch.: La fendita sonorilo (Lali Blond)	150
Blond, Lali: Aŭskultado — — — — —	127
Blond, Lali: La aŭtuna vento — — — — —	121
Blond, Lali: Vespera sonorilo — — — — —	127
Gautier, Théophile: La arto (K. Kalocsay) — — — — —	36
Gullberg, Hjalmar: Enciklopedio de Dioj (Magda Carlsson) — — — — —	75
Grillparzer: Respondo (J. Weleminsky) — — — — —	94
Grün, Anastazio: La epitafo (J. Weleminsky) — — — — —	94
Halm, F.: Kio estas amo? (J. Weleminsky) — — — — —	94
Händel: Messiah (K. Kalocsay) — — — — —	133
Hervé: Mam'zelle Nitouche (K. Kalocsay) — — — — —	133
Jacobsen, J. P.: Pagate estas (Magda Carlsson) — — — — —	98
Jesenin, Sergej: Bovino (Hilda Dresen) — — — — —	156
Jesenin, Sergej: De l' naskiĝo... (Hilda Dresen) — — — — —	156
Jesenin, Sergej: Ho acer frostrema (Hilda Dresen)	157
Jesenin, Sergej: Mi en valo iras... (Hilda Dresen)	156
Jesenin, Sergej: Mola neĝo... (Hilda Dresen) — — — — —	156
Jesenin, Sergej: Ni nun iros... (Hilda Dresen) — — — — —	157
Jesenin, Sergej: Tero kara... (Hilda Dresen) — — — — —	156
Jeysejeva, Ludmila: Aŭtunvespero — — — — —	54
Kay, Alex: Temponeto — — — — —	7
Lafontaine: La lupoj kaj la ŝafo (Juliette Baudin)	38
Leino, Eino: Elegio (L. I. L.) — — — — —	46
Leino, Eino: Konsolo (L. I. L.) — — — — —	47
Leino, Eino: La Tricoteuse (L. I. L.) — — — — —	46
Leino, Eino: Libera viro (L. I. L.) — — — — —	47
Leino, Eino: Polusstelo (L. I. L.) — — — — —	84
Leino, Eino: Somervespera vento (L. I. L.) — — — — —	47
Löwenhielm, Harriet: Al la malgranda frat'... (Mag- da Carlsson) — — — — —	147
Maura, G. E.: Letero el Hispanio — — — — —	118
Medici, Lorenzo de l': Kiel bela la junago! (K. Kalocsay) — — — — —	108
Michelangelo: Soneto (Lali Blond) — — — — —	101
Nerman, Ture: Karinjo (Magda Carlsson) — — — — —	149
Puŝkin, A. S.: Poemo (A. Lavrov) — — — — —	57
Regnier, Henri de: Alvoko (Lali Blond) — — — — —	12
Regnier, Henri de: Sperteoco (Lali Blond) — — — — —	155
Regnier, Henri de: Somerkrepusko... (Lali Blond)	155
Rimbaud, Arthur: Sensacio (Lali Blond) — — — — —	150
Rostand, Edmond: Balado de duelo (E. Mihalski) — — — — —	83
Samain, Albert: Kor' mia estas bela... (Lali Blond)	155

Seidl, I. G.: La majstro kaj Lia verko (J. Wele-	
mysky) — — — — —	94
— Senrinoj (T. Nakamura) — — — — —	100
Strauss, Johann: »Ce la bela blua Danubo« (K. Ka-	
lacsay) — — — — —	120
Swietoszewski, R.: Nur ami... — — — — —	10
Swietoszewski, R.: Kanto de l' aglo — — — — —	10
Swietoszewski, R.: Poeto — — — — —	10
Szilágyi, Fr.: Eble — — — — —	7
Tuwim, Juljan: Epistolo sentimentalá (Leo Belmont)	34
Under, Marie: Sorparbo (Hilda Dresen) — — — — —	111
Villon: El la granda Testamento (G. Waringhien)	66
Villon: Balado pri la damoj de pasinto — — — — —	67
Wanselow, Karl: La alia vorto — — — — —	2
Wanselow, Karl: Reva veturo — — — — —	2
Wanselow, Karl: Somerve pero — — — — —	2
Wanselow, Karl: Elkora diro — — — — —	128
Wanselow, Karl: La fiero — — — — —	128
Wanselow, Karl: La manko — — — — —	128
Wanselow, Karl: Nina — — — — —	128
Wanselow, Karl: Renkonto — — — — —	128
Wanselow, Karl: Vagi, ho vagi — — — — —	128
Wagner: Al la vespera stelo (K. Kalocsay) — — — — —	133
Wyatt, Sir Thomas: Al sia liuto (L. N. Newell) — — — — —	41
Zee, Sa'nt Jules: Atituna meditado — — — — —	16
Zee, Saint Jules: Folioj falas — — — — —	16

4. OBSERVO

Allen, Hervey: Antonio Adverso (F. W. V.) — — — — —	112
Agricola, G.: Maimonido — — — — —	25
Berling, Gösta: Sur la scenejo (Sveda Int. Gaz.-s.)	61
Bleier, V.: Ce Jolán Földes — — — — —	139
Bleier, V.: La nacia teatro en Budapest — — — — —	143
Chesterton † (A. S.) — — — — —	113
Dudekjara »Dada«, La (G. B.) — — — — —	86
Du vivoj de Hugh Walpole, La (A. A.) — — — — —	28
Edeno ankaŭ nun ekzistas, La (F. Sz.) — — — — —	90
Eta reĝo, La (G. B.) — — — — —	59
Evans, Caradoc: La satiristo de l' propra lando (V.)	88
Giraudoux, Jean: La guerre de Troie n'aura pas lieu	85
Gorkij (A. M.) — — — — —	112
Gulbransson, Trygve: Kaj eterne kantas la arbaroj	
(F. W. V.) — — — — —	92
Hamsun, K.: La cirklo fermiĝas (M. H.) — — — — —	167
Hemmer, Jarl: La matendonaco (F. W. V.) — — — — —	141
Interesa sveda literatura konkurso (Sveda Int. Gaz.-s.)	61
Jagow, D-ro Kurt: Queen Viktoria (F. W. V.) — — — — —	164
Jubileo de Andreo Cseh — — — — —	141
Jubileo de F. Tuglas (D.) — — — — —	90
Latzko, Andreas: Lafayette (E. Lucka—F. W. V.)	164
Legofruktoj (Tradukoj, F. W. V.) — — — — —	166
Leino, Eino (L. I. L.) — — — — —	61
Leteroj de Katherine Mansfield, La (V. H.) — — — — —	114
Literaturo kiel negoco — — — — —	140
Maeterlinck, Maurice: Vor dem grossen Schweigen	
(F. W. V.) — — — — —	27
Mann, Klaus: Simphonie Pathetique (F. W. V.) — — — — —	144
Mayer, Theodor Heinrich: Mono — mono (F. W. V.)	89
Meissinger, Karl, August: La aventurulo de Dio — — — — —	143
Murdanta kino, La (G. L.) — — — — —	60
Nova direkto en la filmarto (F. W. V.) — — — — —	143
Nova libro de André Gide (B. G.) — — — — —	29
Nova societo de belaj artoj, La — — — — —	61
Nunaj tempoj (G. V.) — — — — —	85
Pariza teatro (G. A.) — — — — —	87
Pirandello, Luigi: Oni ne scias kiel — — — — —	31
Procesoj de Wilde (G. B.—L. Sp.) — — — — —	114
Romano de Bernhard Kellermann (F. W. V.) — — — — —	26

Romanov de la radiumo, La (M.) — — — — —	88
Romano de Wilhelm Schmitdbonn (F. W. V.) — — — — —	91
Shaw: La milionulino — — — — —	28
Seabrook, William B.: Vojoj en la ĝangalo (B. B.)	167
Sortons Hugo de la Cave (V.) — — — — —	86
Srednogorski: La bulgara nacia teatro — — — — —	163
Srednogorski: La muzikeco de la itala lingvo — — — — —	168
Strangajoj pri la rideto (F. W. V.) — — — — —	116
Tranum, John: Vivo inter ĉielo kaj tero (F. W. V.)	27
Ungár, Imre (Hido) — — — — —	92
Viro de sia tempo (F. W. V.) — — — — —	115
Wiiralt, Eduard (Hido) — — — — —	89
Wurn, Ernst: La aglino (F. W. V.) — — — — —	166

5. TEATRAJOJ

Holberg, Ludwig: Vojaĝo de Sganarello al Filozof-	
ujo (T. H. Bonnevie kaj M. Muribo) — — — — —	160
Thomson, L.: Multe pli la amo — — — — —	1

6. MUZIKNOTOJ

Bellman, C. M.: Flirtas haga papilio (E. Malmgren)	91
Hervé, N.: »Mam'zelle Nitouche« — — — — —	62
Händel, G.: Messiah — — — — —	63
Wagner, R.: Al la vespera stelo — — — — —	63
Vernilando, vi belega. Popolkanto. (G. Löfvenmark)	90

7. DIVERSAJOJ

Jubileo de J. Sapiro — — — — —	64
Krucvortenigmo — — — — —	31, 32, 64
Nekrologo de Miĥaelo Arabeno — — — — —	64
Nekrologo de Artur Domènech Mas — — — — —	92
Nekrologo de M. J. Wessel (Joh. Hartog) — — — — —	31
Tradukkonkurso — — — — —	62, 144

8. BILDOJ

Amsterdam: St. Nikolao preĝejo — — — — —	11
Amsterdam: Reĝa palaco — — — — —	20
Amsterdam: Turo de suda preĝejo — — — — —	5
Bacher: Duobla portreto — — — — —	103
Buti, István: Desegnaĵo de neinstruita kamparana	
artisto — — — — —	123
Barsay, Jenő: Laborista knabino — — — — —	37
Corinth: La poeto Herbert Eulenberg — — — — —	113
Corinth: Tirola pejzaĝo — — — — —	95
Czobel, Béla: Stratoparto — — — — —	35
Csorba, Géza: Hunna pafarkisto — — — — —	58
Degas: Dancistino — — — — —	99
Diener-Dénes, Rezső: Muta naturo — — — — —	43
Dordrecht: Granda preĝejo — — — — —	3
Farkas, István: Strato en periferio — — — — —	49
Foto de Cseh, Andreo — — — — —	141
Gadányi, Jenő: Kompozicio — — — — —	51
Hago: Palaco de l' paco — — — — —	9
Haller: Abesina knabo — — — — —	109
Hanak: La lasta homo — — — — —	106
Kokoschka: La pentristo Carl Moll — — — — —	110
Kolig: La familio de la pentristo — — — — —	97
Medgyessy, Ferenc: Malĝoja virino — — — — —	39
Nagy, István: Montetoj de Erdély — — — — —	45
Pasteur-masko de Paul Muni — — — — —	131
Vidaĵo el provinco Zeeland — — — — —	17
Wiiralt, E.: La foto de la artisto — — — — —	89
Wiiralt, E.: Fumanto — — — — —	73
Wiiralt, E.: Infankapoj — — — — —	81
Wiiralt, E.: Infero — — — — —	87
Wiiralt, E.: Maljunulo kun kato — — — — —	75
Wiiralt, E.: Predikanto — — — — —	69

LINGVO-LIBRO

Blond, Lali: Revuo de revuoj	— — — —	10/III
Du viroj en boato (Robo)	— — — —	13/III
Du viroj en boato (y)	— — — —	13/III
Fersil: Revuo de revuoj	— — — —	13/II
Kamaryt, Stan: Prezidento—prezidanto	— — — —	17/III
Lecoultre, Jean: La semajno de la libro	— — — —	1/III
Pick, M. Alice: Pionireco	— — — —	5/I
Pick, M. Alice: Takto	— — — —	3/I
Pick, M. Alice: Tono	— — — —	16/II
Pick, M. Alice: Verda stelo kaj verda ŝtelo	— — — —	7/I
Pri la »Plena Gramatiko« Bailey, William	— 9/I,	2/III
Pri la »Plena Gramatiko« Belmont, Leo	— —	6/I
Pri la »Plena Gramatiko« Inglada, Vincente	3/II,	3/III
Pri la »Plena Gramatiko« Zamenhof, Lidia	—	2/I
(Je la fino de ĉiu artikolo la respondo de Kalocsay)		
Sciĝi kaj koni (y)	— — — —	19/II
Szilágyi, F.: Ellerni	— — — —	1/I
Szilágyi, F.: La literaturo hazardo	— — — —	1/II
Trifolio: Norda intervjuo	— — — —	12/III

RECENZOJ

Belmont, Leo: Jak nauczyć się esperanta? (E. Wiesenfeld)	— — — —	19/III
Den, Petro: Kiel fariĝi kreanto rapide kaj facile (Prof. d-ro F. Erdey)	— — — —	18/III
D. Dalmau: Ilustrita lernolibro de Esperanto (L. Dreher)	— — — —	18/III
Du noveloj de Jiri Sumin kaj R. Svobodova (A. K.)	— — — —	16/II

Emba: Maria kaj la grupo (L. Halka)	— — —	16/III
Jarlibro de Esperanto-movado	— — —	19/III
Juna vivo, La (P. B.)	— — —	14/I
Meye, Richard: La longa vojo (F. Sz.)	— — —	15/I
Mozaiko. Legolibreto por komencantoj kaj progresantoj (Jozefo Mihalik)	— — —	16/I
Munthe, Axel: Romano de San Michele (G. Waringhien)	— — —	15/II
Nordenstreng, Rolf: La homaj rasoj de la mondo (F. Szilágyi)	— — —	15/I
Privat, Edmund: Interpopola konduto (G. Waringhien)	— — —	15/I
Rembrandt: La magiisto (Parvus Piscis)	— — —	17/II
Rilke, Rainer Maria: Leteroj al juna poeto (Kurzens N.)	— — —	18/II
Rochefoucauld, La: Maksimoj (H. Boucon)	— — —	13/I
Rollet de l' Isle, M.: Malsimplaj formoj de la verbo (Kalocsay)	— — —	17/III
Rollet de l' Isle, M.: Skribado kaj prononcado de la personaj kaj lokaj nomoj (Kalocsay)	— — —	18/III
Sinclair, Upton: Petrolo (John Atkins)	— — —	15/III
Sinha, L.: Hinda rigardas Svedlandon (F. Szilágyi)	— — —	17/II
Szilágyi, Ferenc: Dr. Szilágyi s' kurs i esperanto (Jozefo Mihalik)	— — —	16/I
Wiesenfeld E.: Verkoj de FeZ (Belmont L.)	— — —	11/I

Etaj recenzoj 15/I, 16/I, 18/II, 19/II, 20/II
 Prospektoj 18/II, 19/II, 19/III, 20/III
 Recenzotaj libroj 16/I, 20/II

Multe pli la amo

Komedio en tri aktoj

— L. Tjomsen, Melbourne —

Okazas en la nuntempo. La komedio havas nur unu scenejon. Estas la salono, bone sed ne lukse meblita, en pensio en Arnhem, Nederlando, kies fenestroj rigardas sur la parkon kie situas la Cseh Instituto en Esperanto-Domo. Akto Unua okazas ĉirkaŭ la sesa horo p.m. Akto Dua iom pli malfruhore post kvin semajnoj, kaj Akto Tria en la sekvanta antaŭtagmezo.

Personaro:

Sinjorino Gretchen (Greca), Loĝejmastrino.
Hans, Drinkema Lernanto de la Cseh-Metodo.
Johano, Trinkema Lernanto de la Cseh-Metodo.
Ivano, Nova Lernanto de la Cseh-Metodo.
Francis, Cseh-Metoda Instruanto, Diplomita.
Julia, Poetino el Hungaruj.
Zefira, filistra fraŭlino el Londono.

AKTO I.

Envenas Sinjorino Greca por ordigi la salonon. Bruego ekstere. Ŝi eliras, kiam envenas Hans. Kolizieto. Hans havas pakaĵon, ankaŭ kelkajn botelojn da biero, kiujn li preskaŭ faligas antaŭ ol meti ilin sur la tablo (dekstre). Li estas nun sobra. Li faligas la sakon, kaj rapide surhokigas siajn surtuton kaj ĉapelon sur oportuna hoko.

HANS: Ĉu Johano jam alvenis? Ne! Kompreneble ne. Li marŝis. Li estas skoto kaj rifuzis partopagi por la fiakro. Li diris, ke li sin trejnás por la Esperantaj ludoj. Fiaforo! Mi scias, ke li marŝis post bel-eta fraŭlino. Ni fortrinku botelon antaŭ ol li venos. (Malstopas botelon.)

GRECA (kurete prenas trinkpotojn el ŝranko): Nur kondiĉe, ke vi min ne ebruigos. Mi konas vin, Sinjoro Hans.

(Ili trinkas, senvorte sin salutante. Bruego ekstere.)
HANS: Jen li venas. Eltrinku kaj replenigu la potojn.

(Ili faras, ree plenigas la potojn kaj retrinkas.)
(Envenas Johano. Havas pakaĵon kaj sakon da golf-klaboj.)

JOHANO: Mi spasmas por trinko. Ĉu vi forigis la tuton?

HANS: La botelo malplenas.

JOHANO: Malstopu alian. (Faligas pakaĵon, surhokigas surtuton kaj ĉapelon.)
(Hans malstopas botelon kaj elverŝas. Ili ĉiuj trinkas.)

GRECA: Alia loĝanto alvenos hodiaŭ nokte.

HANS: Ĉu ŝi lernas la Cseh-metodon?

GRECA: Mi ne scias. Sed agu ĝentile kontraŭ li, alie mi pagigos vin pli ol plezurige.

HANS: Bone, Greca. Nur trinku je lia bonsano, kaj ĉio iros bone. (Replenigas ĉiujn potojn.) Jen, trinku.

(Li kaj Johano trinkas.)

JOHANO: Trinku, Greca, je la novevenonto.

GRECA: Ne, ne, ne, mi sufiĉe trinkis. Mi devas prepari la vespermangon por Greco, la edzo. (Formarŝas iom ŝanceligante, sed decide reklinias al la pordo. Eliras, portante alte la poton.)

HANS: Kien vi iris por via ferio, Johano?

JOHANO: Skotlandon. Mi golfludis, kaj la lastan tagon mi faris la lastan truon per tri batoj.

HANS: Ĉu iu vin vidis?

JOHANO: Ne insultu. Ĉu ne, ĉi tiu klubo estas bonkvalita.

HANS (ne alrigardante): Kaj kio pri ĉi tio? (Elpoŝigas poŝkarton kaj montras.) Ĉu ŝi ne estas bonkvalita?

JOHANO: Hallo-o-o! Kie vi ŝin renkontis?

HANS: En Londono.

JOHANO: Londono. Sed mi kredis, ke la anglinoj estas tiel — eh, tiel — tiel alie.

HANS: Ho tute ne, tio ne estas, post kiam oni — post kiam oni —

JOHANO: Post kiam oni —

HANS: Ho, vi scias, post kiam oni penetras ilian surfacon, vi komprenas. (Hans remetas la karton en la poŝon.)

HANS: Nu, alia afero, ĉu vi aranĝis kun ŝi revidon por hodiaŭ nokte?

JOHANO: Jes, mi vidis ŝin, aŭ pli vere, mi vidigis min al ŝi. Mi absolute ŝvitis portante ĉi tiun pakaĵon kaj la klubojn, sed mi tamen paroligis ŝin, kaj eksciis ke ankaŭ ŝia kunulino estos hejme.

HANS: Bone, kaj nun ankaŭ mi havos renkonton.

JOHANO: Ne tiel rapide. Mi aranĝis por ŝi kaj mi — kaj ke vi renkontos ŝian kunulinon.

HANS: Tute ne, fripono. Mi volas ŝin.

JOHANO: Nu, ni permesu, ke la fraŭlinoj mem elektu.

HANS: Bone. Mi scias, kiun ŝi elektos. Ni eliru.

JOHANO: Bone, mi estas preta. (Bruego ekstere.)

HANS: Tamen, atendu momente. Nova loĝanto venas. Ni atendu por vidi, ĉu li indas nian atenton.
(Eniras Greca sekvate de Ivano portanta pakaĵon.)

GRECA (senhalte parolante): Jen Sinjoro Ivano. Jen la du Sinjoroj, Hans kaj Johano. Ili uzos la salonon kune kun vi. Jen estas via ĉambro. (Ŝi indikas pordon dekstre.)

IVANO: Bonan vesperon. (Zorge metas la pakaĵon planken, apud la tablo, metas surtuton kaj ĉapelon sur la pakaĵon.)

JOHANO (bonvenige): Kiel vi sanas, Ivano?

HANS (malzorge flirtante la manon): Hallo.

GRECA: Ne zorgu pri li. Ili ĉiam eliras por vespermanĝi. Sed se vi volas, mi tuj preparos por vi.

IVANO: Ne, dankon. Ankaŭ mi mangos ekstere.

JOHANO: Trinku bieron kun mi.

IVANO: Dankon. Mi terure soifas post la marvojaĝo el Londono.

(Hans elverŝas kaj ili ĉiuj trinkas.)

GRECA: Sinjoro Ivano, ĉi tiuj sinjoroj lernas la Cseh-metodon. Ĉu ankaŭ vi?

IVANO: Bone, ankaŭ mi lernas, aŭ esperas ĝin lerni.

GRECA: Mi ĉiam preferas, ke miaj loĝantoj estu Cseh-metoduloj.

IVANO: Vi estas tre ĝentila.

GRECA: Johano jam lernas ĝin de kvin jaroj, kaj Hans de naŭ jaroj. Se li nur ne drinkus tiom, eble li finus la kurson post dudek jaroj.

HANS (genuefleksante): Mi dankas, moŝtino mia.

POĤMOJ

— Karl Wanselov —

Reva veturo

Tra blua mar' vin portu la veturo
De mia blanka vento-ŝvela velo.
La direktilon turnu la deziro
Al sorĉa malproksim' kaj aventuro.
Al feliĉige nekonata celo,
Al bordoj, kiujn serĉas la sopiro.

Malantaŭ ni perdiĝas foraj mondoj,
Kaj via belo kuŝas antaŭ mi.
Flor' admirinda. Nur la blankaj mevoj
Nin akompanas kaj murmuraj ondoj
Kaj la sopira, fluge ĉirkaŭ ni
Kunveturanta ar' de niaj revoj.
La nokto venas. Sur velur-ĉielo
Kovrantaj nin per senfinega spaco,
Dum jam laciĝas nia vel-flugilo,
Ekfloras pli kaj pli la oraj steloj.

Ripozas forgesita nun, pro laco
Glitinte el la man', la direktilo.
Sed la okuloj ĉiam plu senlime,
La celon atendente, la beatan,
Penetras tra la noktualaj muroj,
Serĉante malproksime — malproksime —
La landon feliĉige nekonatan
De rev-misteroj kaj de aventuroj.

La alia vorto

Ni amas nin kun arda kiom riĉo
Sed ĉu vi scias, kiam de ni floke
Forflugos eble tiu ĉi feliĉo?
Ho ve, ni nin ne konas reciproke!

Kiel facile sur la voj' de l' sorto
Du homojn malkompreno trafi povas!
Ilin disigas ofte unu vorto,
Se oni ĝuste ne la ĝustan trovas.

Estigas dubo kaj rompiĝas kredo,
Unu kun ĉagrenita kor' foriras,
Lin revokante kun karesa cedo
Alian vorton la alia diras,

Sed ĉar malhelpas jam la malproksimo
Ĝin aŭdi en la muĝa vivo-ondo
Restadas ambaŭ dise en doloroj,
Vunditaj en la fundo de l' animo. —
Kaj eble povus esti ambaŭ koroj
Kune la plej feliĉaj en la mondo.

Somer-vespero

Vespera ruĝo naĝas sur la parko,
Nubrozaj grandaj, plenaj kaj abundaj
Pendadas lume sub ĉiela arko.

Kun la okuloj miraj kaj profunda
Regine staras vi en floraj maroj.
Sin lulas floroj ĉirkaŭ viaj haroj
Kaj kisas vin.

Malantaŭ la ĝardenoj
Atendas kaŝe la velura ondo
De l' nokt' somera jam kun stelaj ĉenoj
Por songa forgesigo de la mondo.
Venu, por ke mi portu vin ravite
Per forta brak' al revo kaj ebri!
Mi amas vin! Skuiĝas ventnovite
La rozoj, ekpaligas pli kaj pli
La brulkolor' de l' vespernubaj lumoj.
Venu, ke arde de sopiro ruĝa
Ni dronu en feliĉo mondrifuĝa
De nenombritaj kisoj kaj brakumoj!

IVANO: Sed oni kredigis min, ke la kurso daŭros nur dum kvin semajnoj.

GRECA: Tio, mi kredas, nur estas propagando. Sed ĉi tie oni pasigas pli longan tempon. Eble estas pro la vetero ĉi-tiea. Kelkaj ŝajne malsukcesas pro manko de la akuzativo, kaj aliaj ne scias precize, kiel akordigi la adjektivon. Sed kiel mia bona Greco kutimas diri, kial zorgi pri eta erareto kiam — — —

HANS: Jes, jes, jes, Sinjorino Greca. Jen ĉio por la momento.

GRECA (okulumante lin): Ĉu vi volas rigardi la kalojn sur miaj piedoj? (Hans iras por elverŝi bieron.)

JOHANO: Ne, tute ne. (Al Hans.) Cesigu viajn ŝercojn. (Al Greca.) Se vi uzis la medikamenton, kiun mi donis al vi, devas ne ekzisti plu la kaloj.

GRECA (malkontente): Nu bone. Mia edzo diris, ke la barelo da biero venos morgaŭ. Bonan vesperon al vi ĉiuj. Kaj se vi volas ion ajn, vi ĉiam povas sonorigi. Kaj Sinjoro Francis jam revenis post ferio el Parizo kaj Londono kaj nun estas en sia ĉambro. Li uzas la litĉambro, Sinjoro Ivano, sur la supra etaĝo. Kaj kiel mia bona Greco, kutimas diri — — —

JOHANO: Jes, jes, Sinjorino Greca. Jen estas tute ĉio por la momento, por la momento. Dankon. Dankon. Dankon. (Je la tria »Dankon« ŝi malkontente estas kvazaŭ — puŝita al la pordo, kaj eliras.)

HANS (al Ivano): Johano kaj mi havas rendevuon. Vi ne povas akompani nin, ĉu ne. (Daŭrigante seminterrompe.) Mi tiel pensis. Nu, Johano ni estos malfruaj, se ni ne tuj eliros.

(Ili prenas surtuton kaj ĉapelon, krias »Bonan nokton«, kaj tuj eliras.)

IVANO (sola): Nu, mi elpakos miajn aĵojn kaj poste min amuzos kiel eble plej bone.

(Eniras Francis.)

FRANCIS: Ho, pardonu. Eble vi estas la nova gasto en la domo. Mi estas Francis — — —

IVANO: Ho jes, vi okupas la ĉambro ĉisupre. Sinjorino Greca informis min. Ĉu ankaŭ vi uzas la salondon?

FRANCIS: Jes, kiam mi estas hejme, kio ne estas ofte. Se al vi plaĉas, ni sidigu apud la fajro kaj babila.

(Ili sidas apud la fajro.)

IVANO: Ĉu vi vojaĝas multe?

FRANCIS: Jes, mi vojaĝas de tempo al tempo. Mi instruas Cseh-metode, kaj sekve mi vojaĝas en multajn landojn por instrui. Oni ne devas scii la lingvon de la instruatoj. Sed mi ne volas momente paroli pri tio. Mi havas leteron de via patrino, kiun mi tre bone konis antaŭ multaj jaroj.

IVANO: Cu vere. Mirinde, ke ŝi nenion diris al mi pri vi, antaŭ ol mi foriris el Londono.

FRANCIS: Eble ŝi preferis, ke nia renkontiĝo estu surprizo. Mi estis la unua, kiu instruis al ŝi Esperanton.

IVANO: Kaj sekve, vi estas la kaŭzo ke mi devos studi la Cseh-metodon dum mi ne scias kiom da jaroj ĉi tie?

FRANCIS: Liberigite de bruo, biero kaj fraŭlinoj, vi tre certe finos vian kurson en semajnoj. Sed pri tio ni nun ne parolu. Diru al mi, kiel sanas via patrino kaj, ankaŭ, ŝia kaj mi kredas, via amikino, Zefira.

IVANO: Ili ambaŭ bonfartis, kiam mi forvojaĝis. Kiel mirinde devas esti traveturi, kiel vi, tiom multajn landojn. Kaj mi tute ne povas rekonsciigi post la novaĵo, ke vi konas mian familion.

FRANCIS: Via patrino ofte parolis al mi pri vi kaj ankaŭ pri Zefira.

IVANO: Jes, ni estas kvazaŭ gefratoj, Zefira kaj mi. Ni kune trinkis de la sama bankuvo. Tio estas, mi estis kvarjara kaj ŝi estis dujara kiam la vartistino **banis** nin kune. Ni kune maturiĝis, kaj kredeble la

patrino havas pri ni romantikajn revojn. Mi supozas, ke, kiel en aliaj aferoj, mi sekvos la patrinan volon.

FRANCIS: Bona knabo. Tamen, en la vivo, kiel diris la geniulo, Goethe, estas 'Multe la Dev', senfine pli la Amo. Kaj li estas prava. Nur la amo vere valoras. Sed mi havas nun laboron. Poste ni filozofos pri la vivo, kiam ni havos tempon je nia dispono.

IVANO: Jes, certe estos tre interese.

FRANCIS: Kaj nun, amiko Ivano, mi foriras.

(Eniras Greca kun taso da teo sur pleto.)

GRECA: Jen taso da teo por vi, Sinjoro Ivano.

IVANO: Ho, dankon. Mi trinkos ĝin tuj.

FRANCIS: Nu, ĝis revido, amiko Ivano.

IVANO: Ĝis revido Francis. (Francis eliras.)

GRECA: Kaj nun, Sinjoro Ivano, bonvolu sidiĝi al via teo.

IVANO: Dankon. Nenion pli mi volas, Sinjorino Greca.

GRECA: Certe ne estus ĝeno al mi prepari iom da manĝaĵo por vi, se...

IVANO: Dankon, sed ne ĝenu vin.

GRECA: Ho, tute ne estus ĝeno, Sinjoro. Mi bedaŭrus, se vi tiel pensus. Kaj la vetero nuntempe ŝajnas pli bona ol antaŭe. Kaj kiel diris Sinjoro Johano, devas ne esti kalo sur mia piedo, post kiam mi uzis la medikamenton, kiun li donacis al mi. (Demetas la pantoflojn de unu piedo, kaj montras la haŭton tra truo apud la kalkanumo.) Kaj mi mem rigardis, kaj kiel vi mem povas vidi (ŝi montras, sed li ne volas vidi kaj iom naŭziĝas) la kalo jam malaperis, kio estas mir-



Dordrecht

Granda preĝejo

Poemoj de Ch. Baudelaire

— K. Kalocsay —

La fontano

Ferma, amatino lacaspekta
L' okulojn lacajn, restu plu,
senmove, en la poz' neglekta,
kie surprizis vin la ĝu'.
Fontano, babilanta korte
tag-nokte, kun senĉesa klam',
l' ekstazon nutras nun dolévorte,
en kiun mergis min la am'.

La garb' ŝutanta strebe
mil florojn for,
kiujn ornamas Febe
per multkolor'
disfalas pluve, ŝvebe
en larĝa plor'.

Same, animo via, arde
de l' flum' bruliga de l' plezur'.
sieĝas fluge, haste, harde
ravitan vaston de l' lazur'.
Poste refalas ĝi sen vivo
en trista tajdo de langvor'.
kiu descendas sur deklivo
sekreta ĝis en mia kor'.

La garb' ŝutanta strebe
mil florojn for,
kiujn ornamas Febe
per multkolor'
disfalas pluve, ŝvebe
en larĝa plor'.

Ho vi, la nokt' vin igas ĉarma!
En via sin', ho dolĉa sent':
aŭskulti pri l' baseno larma,
pri la eterna plorlament'!
Lum', akvoj zumaj, nokto bona,
tremanta bosko-panoram',
jen via pura tristo splena
estas spegul' de mia am'.

La garb' ŝutanta strebe
mil florojn for,
kiujn ornamas Febe
per multkolor'
disfalas pluve, ŝvebe
en larĝa plor'.

La bela ŝipo

Mi nun al vi rakontu, ensorĉantin' tenera,
ĉiujn diversajn belojn de via jun' fiera;
mi pentru vin en belo pura,
kie aliancas aĝoj infana kaj matura.

Marsante, vi l' aeron per larĝa jup' balaas,
kiel se bela ŝipo la maran ondon traas,
velar-sarĝita, sin lulanta
laŭ ritmo milde-mola kaj pigra kaj tre lanta.

Sur via larĝa kolo, sur rondaj ŝultroj blankaj
jen pavas via kapo kun ĉarmoj dolĉe-strangaj.

En pas' trankvila, triumf-festa
vi iras vian vojon, ho infanin' majesta.

Mi nun al vi rakontu, ensorĉantin' tenera,
ĉiujn diversajn belojn de via jun' fiera,
mi pentru vin en belo pura,
kie aliancas aĝoj infana kaj matura.

La brust' antaŭenprancas kun streĉ' de l' silko ŝvela:
via triumfa brusto, ĉi tiu ŝranko bela,
sur kies helaj pordoj alaj
la lumo alrokotiĝas kiel sur ŝildoj stalaj.

Provokaj ŝildoj, kiujn du rozaj punktoj armas!
Ŝrank' de sekretoj dolĉaj! ĝi per bonajoj ĉarmas,
plena de vin', parfum', likvoroj,
de kiuj ekdeliras la cerboj kaj la koroj!

Marsante, vi l' aeron per larĝa jup' balaas,
kiel se bela ŝipo la maran ondon traas,
velar-sarĝita, sin lulanta
laŭ ritmo milde-mola kaj pigra kaj tre lanta.

La noblaj gamboj, sub la falbalo, ĝin batante,
turmentas la obskurajn dezirojn, agitante:
du sorĉistinoj, kiuj bate
en vaz' profunda kirlas sorĉetrinkon nigran fate.

La brakoj, kiuj ludus kun la herkuloj etaj,
rivalas la boaojn brilantajn, fermi pretaj,
obstine fermi en fervoro,
kvazaŭ por enpremegi l' amaton al la koro.

Sur via larĝa kolo, sur rondaj ŝultroj blankaj,
jen pavas via kapo kun ĉarmoj dolĉe-strangaj.
En pas' trankvila, triumf-festa
vi iras vian vojon, ho infanin' majesta.

La gigantino

Dum la Natur' koncipis tag-tage en la sino
infanojn monstre grandajn en sia verv' erupta,
mi estus volinta vivi ĉe juna gigantino
kiel ĉe reĝidinaj piedoj kat' volupta.

Kaj vidi, ke ŝi floras kaj korpe kaj anime,
ke ŝi libere kreskas en ludoj plej sovaĝaj,
diveni sombrajn flamojn de ŝia koro, glime
brilantajn en humidaj nebuloj okul-naĝaj.

Vagadi laŭdezire tra l' formoj grandiozaj,
grimpi al krut' de ŝiaj genuoj, la kolosaj,
kaj en somer' kelkfoje, sub la sufokaj flamoj

de l' sun', se ŝi sterniĝas lac-pigre tra l' kamparo,
sengene endormiĝi sub ŝiaj ombraj mamoj,
kiel kabano paca piede de montaro.

indaĵo. Kaj kiel mia bona Greco, tio estas, mia edzo, kutimas diri al mi, estas...

IVANO: Dankon, Sinjorino Greca, jen estas ĉio. Cio, mi diris.

(Greca kviete remetas la pantoflon kaj iras.)
(Ivano, sola, ektrinkas la teon kaj ankoraŭ trinketante aliras al la fajro.)

IVANO (murmurante): »Multe la Dev', senfine pli la Amo«. Nu en kiu libro de Goethe ĝi troviĝas? (Aperas Julia en la porkkrado: ŝi haltas tute surprizite, kaj Ivano demetas la tason sur la kamenbreton.)

JULIA: Pardonon. Mi atendis trovi amikon ĉi tie.

IVANO: Mi esperas, ke mi povos troviĝi inter via amikaro. Mi estas Ivano kaj ĵus ekloĝis ĉi tie.

JULIA: Dankon, Sinjoro Ivano. Mi estas Julia.

IVANO: Kiu estas, kiun vi volis trovi, se vi permesas?

JULIA: Sinjoron Francis.

IVANO: Li ĵus foriris. Ĉu vi havas ion por li?

JULIA: Jes, mi volas lasi por li kelkajn librojn, kiujn li pruntedonis al mi.

IVANO: Komprenoble, vi povas lasi ilin; mi certigas, ke li ricevos ilin senmanke.

JULIA: Vi estas afabla. Nu, mi lasos la librojn kaj tuj foriros. (Ŝi proponas la librojn al li — li ne prenas.)

IVANO (reiras iomete al la fajro): Restu apud la fajro iomete. Estas malvarme, ĉu ne, ekstere? Kiajn librojn ŝatas nia reciproka amiko, Francis. (Li prenas la librojn, sed samtempe preskaŭ ŝovas ŝin gentile en brakseĝon apud la fajro.) Li citis ion el Goethe, ĵus antaŭ ol li foriris. Sidigu, mi petas.

JULIA: (sidigante iom proteste, kaj surprizvoĉe): Eble estas ĉi tie ĝuste la libro, kiun li plej ofte ŝatas preparoli. (Kiam Ivano rigardas la titolojn) Jes, jen la Kaloĉaja traduko de Romaj Elegioj kaj la Taglibro.

IVANO: La vortoj estis, »Multe la Dev', senfine pli la Amo«.

JULIA (leviĝas, kaj prenas la libron serĉeme): Ho, mi scias, Jen en la fino de la Taglibro — mi tre ŝatas ilin — (kun kapoj tre proksimaj ili enrigardas) Vidu — — —

IVANO (prenas la libron kaj legas malrapide): (Julia residiĝas.)

Ni ofte stumblas dum la viv-vojaĝo,
Tamen, du povoj havas nur potencon
Pri l' hominstinkt', en farsa vivo-dramo:
Multe la Dev', senfine pli la Amo!

Ĉu vi ŝatas la poezion?

JULIA: Multege. Vi vidas, mi estas hungarino kaj iomete poetino mem, aŭ, pli vere, mi nun studas por pliglatigi mian stilon en la esperanta lingvo.

IVANO: Do, vi jam verkis poemojn en la hungara lingvo.

JULIA: Ho jes. En la gepatra lingvo mi jam verkis kaj eldonis volumeton.

IVANO: Mi esperas, ke vi tradukos ilin por mi.

JULIA: Mi apenaŭ konas vin, Sinjoro Ivano. Mi volas diri, ke miaj hungaraj versoj ne estas taŭgaj por la traduko, tio estas, ili temas pri hejmeĉaj aferoj, kiel patra amo kaj la patrino amo, kaj la sopiroj de tute naiva persono.

IVANO: Nu, komprenoble, kiam ni pli profunde konatiĝos, tiam...

JULIA: Ho ne, eĉ ne tiam... Sinjoro, jam malfruas, mi devas tuj foriri... (Stariĝas agite.)

IVANO: Nu, ni tre certe reenkoniĝos, ĉu ne?

JULIA: Jes, mi supozas, ke jes. Tio estas, se...

IVANO: Sed kiam? Ni arangu nun. Mi ankoraŭ ne manĝis — ni nun iru al kafejo, aŭ ĉu mi ne povus vin viziti.

JULIA: Mi mem jam manĝis, tio estas, estas neeble. Mi loĝas kun anglino, kiu studas la nederlandan lingvon, ĉar ŝi intencas edziniĝi al nederlanda oficisto.

IVANO: Nu, mi nun akompanos vin ĝis via hejmo kaj tiam survoje ni povos preparoli...

(Bruego ekstere.)

JULIA: Mi devas iri — iu venas. Sinjoro Ivano, estas neeble, tamen... mi ja volas renkonti vin kiel amikon de Francis. Sed nun iu venas. Sinjoro Ivano, mi tuj telefonos al vi. Tre proksime estas telefonejo. Jes mi tuj telefonos. Ĝis revido.

IVANO: Bone, jes, telefonu tuj. Mi atendos.

(Hans kaj Johano staras en la porkkrado.)

HANS: Pardonu min (paŝas flanken).

JOHANO: Pardonu min (paŝas flanken).

JULIA: Bonan vesperon. (Ŝi eliras.)

(Ivano fermas la pordon kaj staras kun sia dorso kontraŭ ĝi, kun iom batalema aspekto.)

HANS kaj JOHANO (kvazaŭ reciproke unu al la alia): Ŝi telefonos! He! He!

HANS: De kiam vi konas Julia-n, la hungaran poetinon?

JOHANO: Ĉiuj ĉi tie konas ŝin.

IVANO (paŝante antaŭen, siblante): Bestoj!

HANS: Ŝi estas virmalamanto. Neniu povas ŝin impresi.

IVANO: Bonan nokton. Mi devas elpaki miajn aĵojn.

HANS: Bone! Cio same al mi. Ni gardos la telefonon kaj raportos la alvokon, se efektive ŝi telefonos.



Amsterdam

Turo de suda preĝejo

IVANO (sidas): Ho, ne gravas pri la aĵoj. Mi el-pakos poste.

(Ili ĉiuj sidas dise, egaldistance de la telefono kaj atendas en silento.)

HANS: Nu, kion ni faros, Johano.

IVANO: Evidente via «rendevuo» havis mallongan sekvencon.

HANS: Ho ne tre mallongan, mi vetas, ĉar la aranĝanto, Johano, aŭdos pri ĝi dum sufiĉe longa tempo.

IVANO: Ho, ĉu io ĝin fuŝis, do?

JOHANO: Mi diras, ke mi tute bone aranĝis la aferon. Mi ne komprenas kiel povis fuŝi...

HANS (malsatege): Vi tute bone aranĝis, ho!

(Eniras Sinjorino Greca. — Silento.)

GRECA: Ha! — Jen mi havas vin ĉiujn por la vespermanĝo, mi povas certigi. Kial vi ĉiuj sidas tiel silentemaj. Nu diru ion.

HANS: Ba!

GRECA: Sinjoro Hans! Kion vi diris?

HANS: Mi diris: ba! Demandu Johanon.

(Telefono sonoras. — Ĉiuj eksaltas, sed Greca kaptas la aŭdilon iom triumfe antaŭ ol la aliaj povas.)

GRECA (ĉe telefono): Hallo... Ja estas la logdomo de Sinjoro Greco... Eble jes kaj eble ne... Mi devas esti zorgema pri virinoj kiuj uzas ĉi tiun telefonon... Kion... Mi diris, eble jes kaj eble ne... Ne certe ne... Kiel diris mia bona edzo lastan nokton, estas skandalo, ke tiaj virinoj uzas la telefonon, por kiaj aferoj, oni tute ne scias... kaj mi diris al li, ke mi tute konsentas... Kion vi volas... ho mi komprenas, vi ne volas mian edzon, sed nur Sinjoron Johano... kial vi ne diris tion pli frue...

(Hans kaptas la aŭdilon.)

HANS: Jen Johano parolas... ho jes... ho bedaŭrege, ke mi malkomprenis pri la loko... jes, jes, mi nun komprenas, kion vi diras... dua strato dekstre, unu maldekstre... tria domo de la stratangulo... Jes kompreneble... mi estas azeno por tiel erarvagi... jes, jes, ni venas... ho nur morgaŭ... (vi nun estas tro okupitaj... nu ĉu neeble?... absolute ne... Nu do morgaŭ vespere... (Rependigas la aŭdilon.)

JOHANO: Kium vi nomis azeno?

HANS: Nenio gravas. Ĉio estos al vi pardonita — morgaŭ. Vi nur iris al malprava adreso.

JOHANO: Nu bone, sed plu vi ne parolu en mia nomo.

GRECA: Nu, ĉu estas vespermanĝo por tri? Jes, nu bone, kio estas, tio estas. Kiel diris mia bona edzo, Greco, la lastan jaudon...

JOHANO: Sinjorino Greca, tio estas ĉio dumtempe, dumtempe. (Greca marŝas malrapide al la pordo. La telefono sonoras. Ivano facile gajnas la aŭdilon.)

IVANO (ĉe telefono): Hallo... jes, estas Ivano... Jes, stratangulo... jes mi rimarkis ĝin, kiam mi preterpasis hodiaŭ vespere survoje de la vagonaro. Mi venas tuj. Ĝis! (Rependigas la aŭdilon, prenas la ĉapelon kaj surtuton.) Vespermanĝon por nur du, Greca. (Eliras Ivano.)

(Hans kaj Johano okulumas unu la alian.)

Fino de Akto I.

Kurteno.

AKTO II.

Scenejo kiel en Akto I.

IVANO sidas ĉe tablo, skribas. Jus eniris Johano.

JOHANO: Hej, Ivano, ĉu vi eliris denove la lastan

nokton? Vi estas mirindaĵo. Kiel vi povas ankaŭ studi la aferojn ĉe la Instituto, mi ne komprenas. Kia energio!

IVANO: Mi ne estas tiel feliĉa, kiel vi supozas. Antaŭ kvin semajnoj, kiam mi alvenis, la vivo ŝajnis al mi tute simpla afero. Oni simple venas ĉi tien, faras sian devon, agas laŭ la volo de la patrino kaj ĉio estas bona. Subite ĉio tute fuŝigas. Mi farigis samtempe tre ege feliĉa, kaj treege mala.

JOHANO: Kio okazis? Ĉu vi kaj Julia malamikiĝis?

IVANO: Ŝi estas mirinda, Johano. Ŝi estas angelo. Ne, mi neniam malpacas. Sed la vero estas, ke mi enamigis antaŭe kun alia fraŭlino, kaj diablo scias, kiel ŝi agos, kiam ŝi eltrovos la aferon.

JOHANO: Enamigi kun du fraŭlinoj je unu kaj sama fojo! Kiel interese! Kiel tio sentigas, Ivano?

IVANO: Serioze, ĝi ne sentigas bone. Efektive, mi neniam amis Zefiran. Mi nur maturiĝis kune kun ŝi kaj ŝi kun mi, sed cetera ni vivis tute malsame, ĉar ŝi ĉirkaŭrondis en dancoj kaj tiel plu kun kelke da viroj kaj flirte amindumadis. Sed mi neniam konis alian virinon krom ŝi kaj krom la patrino, ĝis mi renkontis Julian. Nun ĉio estas fuŝita.

JOHANO: Ĉu Julia scias pri Zefira?

IVANO: Ne.

JOHANO: Ĉu ne? Hej, Ivano, vi estas lerta!

IVANO: Lerta? Ŝajnas al mi, ke mi devos esti lerta, kiam Zefira vizitos nin por la festkunveno hodiaŭ nokte. Ŝi ekflaros ĉion.

JOHANO: Ĉu Zefira havas kolereman temperamenton?

IVANO: Ŝi havas ja!

JOHANO: Devas esti interese. Ĉu ili devos renkontiĝi?

IVANO: Diable ne! Kiel eble plej multe mi volas malhelpi ian ajn kontakton inter Julia kaj Zefira. Nu, Johano, vi ĉiam estis bona knabo. (Hans bruege enblovos.) Kaj ankaŭ Hans estas bona knabo, vi ambaŭ estas bonaj knaboj, kaj mi volas, ke...

HANS: Hallo, bonuloj, kion vi konspiras pri mi? Kion mi aŭdis pri mi mem?

JOHANO: Subaŭskultantoj neniam aŭdas pri ŝi bonajon!

HANS: La reguloj ĉiam havas esceptojn, kaj jen unu. Mi aŭdis tute bone, ke mi estas bona knabo. Bona Ivano, de kiam mi estas tia? Informu min, de kiam mi falis el la stato de malboneco.

JOHANO: Serioziĝu, Hans, ĉar temas pri serioza afero. Ivano ĵus klarigis al mi, ke li ne volas, ke Julia renkontu Zefiran.

HANS (detektiverioze): Ha, Zefira, kompreneble, estas la nomo de la alia amatino. Sed ĉu ŝi ne loĝas en Londono?

JOHANO: Kompreneble, sed ŝi nun vojaĝas alilanden!

HANS: La kara angliano. Kaj ĉu ni renkontos ŝin?

IVANO: Bedaŭrinde, jes. Tio estas, bedaŭrinde ŝi venos ĉi tien por ĉeesti la feston hodiaŭ nokte.

HANS: Sed kial bedaŭri tion feliĉan okazon? Mi povas certigi vin, ke ĉi tio estas eksterordinare bonŝanca! Aŭskultu! Antaŭ du jaroj mi enamigis al du fraŭlinoj samtempe, kaj malkaŝe aranĝis, ke ili renkontu unu la alian. Jen vi havas. Mi lasis min en iliaj manoj por decidi, al kiu el ili mi vere apartenas. Ili interkonsiligis, kaj jen, mi estas ankoraŭ libera homo!

JOHANO: Ne blagu pri viaj seksamaferoj.

IVANO: Dankon, Hans, por via subtila konsilo.

Tempsoneto

— Alex Kay —

Frostkapa mi jam estas kaj senfebra.
Ne povas min infekti la miasmaj
de la nuntempaj modaj entuziasmoj:
tro klara estas mia vid' funebra.

Ne estas sav' por ĉi homar' tenebra.
Kurac' heroo, piaj kataplasmaj
ĝin same ne sanigos el la spasmoj
kiuj ĝin portos al perejo nepra.

Forfalos ni en reciproka ĉaso
per kuglo kaj per bombo kaj per gaso,
damnitaj kaj ne indaj al vivĝuo.

Kaj post la trabalao de l' detruo,
el la ruinoj prenos freŝa raso
la brikojn por la nova mondkonstruo.

Tamen, mi supozas, ke vi, en via afero, amis nek unu nek alian. Mi ja amas Julian kun sincera amo, kaj ankaŭ estimas Zefiran kiel virinon al mi destinitan de la bankuvo, tio estas, de la plej junaj jaroj, pro familiaj kialoj.

HANS: Tial eĉ pli necesas, ke la damoj renkontiĝu. Vi scias, ke la virina intuicio liveras pli da saĝeco ol cento da filozofoj.

IVANO: Ne, mi dankas, Hans, sed via kaj mia vidpunkto malsamas. Promesu al mi ke vi faros nenion por malglatigi la aferojn por mi. Mi konas Zefiran, kaj cetere Julia ne estus egala al ŝia trablova maniero.

JOHANO: Kompreneble, Hans promesas. Li nenion faros kaj mi ĵuras pri tio.

HANS: Ĉio bona kun mi. Tamen, mi vetas, ke mi estas prava.

JOHANO: Prava! Hu, kion vi farus, se ambaŭ el la viaj amatinoj akceptus vin?

HANS: Ho, oni ĉiam povus iri al Utah por monmoniĝi, kiel ankaŭ iri al botelo por iom da biero. (Iras flanken al ŝranko.)

JOHANO: Ne necesas al vi iri al Utah, kaj la biero jam forestas.

HANS: (mokseriozege): Kio? Neniom da biero! Mirinde, kiel la biero forvaporas en ĉi tiu domo. Mi certe ne trinkas multe.

JOHANO (amerike): Ho jes!

(Bruego; eniras Greca kun Zefira.)

GRECA: Jen estas sinjorino por vidi vin, Sinjoro Ivano. (Eliras Greca.)

IVANO: Zefira!

ZEFIRA (kurante al li): Ivano! (Haltetas momente kaj tiam sin ĵetas enbraken kaj kisas lin pasie.)

IVANO (ne kisinte ŝin): Jen miaj amikoj.

ZEFIRA (surprizite, sed ne embarasite): Oh!

IVANO: Jen Johano kaj jen, kompreneble, Hans, kiu ĵus bedaŭris la foreston de biero, kiam vi envenis.

ZEFIRA: Mi ĝojas vin renkonti, samideanoj, kaj permesu al mi kondolenci pri la stato de la bierbotelo, kiun mi vidas, aŭ vidis, kun leviganta sento de soifo estingota.

HANS (ageme): Nu, do, ĉu vi ŝatas la bieron? Kompreneble! Mi havas en la sekreta ŝranko. Permesu, ke mi oferu al vi glason aŭ du el la plej bona, el mia privata provizo. (Rapidigas eligas botelojn kaj glasojn el ŝranko.)

ZEFIRA: Ivano, karulo, mi ŝatas viajn amikojn. Ili estas guste kiel vi ilin priskribis.

(Dume Hans englasigas bieron.)

IVANO: Tio estas bonega.

HANS: Kaj jen nun, ni trinku kune je la baldaŭa kunligo de feliĉaj geamantoj. (Ĉiuj trinkas.)

ZEFIRA: Kaj ĉu ni ĉiuj iros kune al la festo hodiaŭ nokte?

HANS: Trinku ankaŭ je la festo. (Ĉiuj trinkas.)

IVANO: Mi bedaŭras, Zefira, mi ne povas iri al la festo. Mi malsanetas, — mi havas kapdoloron.

ZEFIRA: Kia bedaŭro, Ivano. Tamen, ne gravas. Mi ĝojas resti kun vi kaj vin prizorgi. (Demetas la surtuton kaj malkovras belan balvestaĵon.)

IVANO: Ho, tute ne. Mi baldaŭ resaniĝos. Sed mi ne ŝatas la festojn — vere ne.

ZEFIRA: Sed mi venis tute el Londono nur por iri al la festo kun vi. Ivano, ĉu vi ŝanĝiĝis al mi iel?

IVANO: Zefira, ne estu tiel malsaĝa. Kompreneble, ne.

ZEFIRA: Eble mi ne estas tiel malsaĝa.

(Bruego, eniras Greca sekvatte de Julia balvestita.)

GRECA: Jen sinjorino por vidi Sinjoron Hans. (Eliras Greca.)

HANS: Hallo, Julia.

JULIA: Mi ricevis vian mesaĝon, Sinjoro Hans, ke vi havas apartan informon por mi de Sinjoro Francis. Sed, pardonu min... mi esperas, ke mi ne altrudas...

ZEFIRA: Ho ne!

IVANO: Permesu — Julia, jen estas Zefira el Londono.

Eble

— F. Sallágyi —

Nur kruco pendas sur la nuda mur',
sur kruda bret' la flam' bruletas nur.

Sur kruda breto tremas stebkandel',
tamburas supre pluv', kiel muef'.

Ce l' seka ost' de l' viv', de l' vivsopiro
kubute sonĝas laca-laca viro.

Nur kruco pendas sur la nuda mur',
Sur kruda bret' la flam' bruletas nur.

Animĉambrato! Luktas, luktas febre
kandelo orfa de l' eterna »Eble.«

Sendorme

— Hendrik Adamson —

Ploras pluv', gargaras koto,
ĉirkaŭvagas la enu'
kun la luna perlamoto
en la internuba tru'.

Kvazaŭ granda, granda konko
malfermiĝas en marfund',
ekaŭdiĝas venta ronko,
kovras ĉion nub-abund'.

Trempis jam la nokt-sepio
ĉion, dronis ĉiu form'.

Ah, vi, tede tede trio:

pluv', mallumo kaj sendorm'.

ZEFIRA: Bonan vesperon. Ivano ne pri-kribis vin inter siaj geamikoj ĉi tie. Fakte laŭ liaj priskriboj liaj amikoj ne estis geaj.

JULIA: Mi esperas, ke vi ne malŝatas min pro tio, ke...

ZEFIRA: Ho ne.

JULIA (al Hans): Kio estas la informo, Hans?

ZEFIRA (al Julia, subite amike): Ho, kaj (vi konas ankaŭ Sinjoron Francis? Bonege! Do ni ĉiuj estas amikoj.

HANS: Kompreneble. Tio estas tre feliĉiga.

ZEFIRA: Kaj kio estas la informo?

IVANO: Eble estas privata afero, Zefira.

ZEFIRA (fajre): Ne ordonu al mi.

HANS: Trankviliĝu, mi petas. Tute ne estas privata. Francis sciĝis al mi, ke en Londono li edziĝis kaj nun iras al Samoa en la Sud-Pacifika Oceano, kompreneble, mi supozas, por Cseh-metode instrui la samoanojn.

ZEFIRA: Sinjoro Francis iras al Samoa! Ne-eble! Tamen, li ĉiam estis strangulo...

JULIA: Mi dankas vin, Hans. Kaj al kiu Francis edziĝis.

HANS: Mi tute ne scias. Pri tiu grava fakto Francis forĝesis menci.

JULIA (gaje): Tute Fraĉje. La frenezulo. Oni povus pensi, ke li forĝesis ankaŭ sian junedzinon.

ZEFIRA: Kia bonega ŝerco. Bone, Julia. Kion vi faras ĉi tie? Cu ankaŭ vi Cseh-metodas?

JULIA: Ho ne. Mi estas poetino.

ZEFIRA: Poetino. (Deklamante) Skribas pri la brovoj de la amatino:, ĉu? Ha. Ha. Nu, rigardu la tondrajn brovojn de mia Ivano. Ili poemas mem pri liaj pensoj. Kio estas al vi Ivano? Ho, mi bedaŭras la kapdoloro. Ĉu estas terure malbone, Ivano, karulo?

IVANO (malsukcese provante sensulkigi la brovojn): Ho ne, ho ne, ne terure malbone. Nur kapdoloreto.

JULIA: Ho, ĉu pro tio vi ĝis nun ne vestis vin por la festo?

IVANO: Pardonu min, sed mi ne iros al la festo.

JULIA: Ne iros al la festo! Ho, kia bedaŭro por via amikino el London, por Zefira.

ZEFIRA: Hu, Ivano ŝatas malkontentigi homojn, ĉu ne Ivano? Mi venis aeroplane por kun li danci, sed ne gravas. Baldaŭ mi trovos danckunulon. He, Julia, ĉu vi ne venos kun mi? Jes, kompreneble. Se nur vi konsentos.

JULIA: Ho, sed ĉu estus bone?

ZEFIRA: Nu, mi certe ne restos ĉi tie por flegi la malsanetan kapon de sinjoreto, kiu evidente ne bonhumoras. Aŭ eble vi, Julia, preferus lin flegi? Ĉu ne, nu, vi preferus...

IVANO: Zefira, vi estas terura.

ZEFIRA: Kial terura? Kaj mi vetas, ke Julia ne volas vin flegi. Venu, Julia, ĉu vi akompanos min al la festo?

JULIA: Mi tre ĝojus, Zefira, sed jam Hans promesis akompani min al la festo.

HANS (surprizite, sed tuj aplombe): Mi, ho, jes, kompreneble!

ZEFIRA (subite al Johano): Vi estas ŝilentulo, Sinjoro. Kiel oni nomas vin. Ho jes, mi rememoras, Johano. Mi ŝatas ĝin nomon.

JOHANO (iom konfuzite): Carmita, tute.

ZEFIRA: Dankon. Mi ĉiam preferas esti sen-

ceremonia. Inter amikoj la ceremonio estas ridinda, ĉu ne? Cu ni estas ĉiuj pretaj?

HANS: Ĉu ni ne finu la bieron, antaŭ ol ni foriras. Jes, ĝi aŭ putriĝos aŭ forvaporo, se ni lasos ĝin kun Ivano. (Plenigas glasojn.) Ankaŭ vi trinkos, Ivano.

IVANO: Ne... dankon. (Sed li prenas glason de Hans.)

HANS: Je la festo, mi salutas. Geamikoj nun kunvenintaj, antaŭ ol ni foriros...

ZEFIRA: Se vi volas fari paroladon, vi devas esti prezidanto. Mi voĉdonas, ke... (gaje) Ivano estu la prezidanto.

IVANO: Estas senencaĵo. Mi ne prezidos.

ZEFIRA: Kiel konsentemaj ni estas! Kia feliĉa rondo vi estas — ĉio en akordo — kion iu proponas, ĉu alia faras. Sed eble estas la kapdoloro.

IVANO: Nu, mi havas kapdoloron. Tamen, ĉar estas necese havigi paĉon, mi konsentas prezidi. Mi nun invitas al Sinjoro Hans preni la parolon, por fest-paroli.

HANS: Tro multe da pridiskuto. Mi forĝesis, kion mi volis diri. Ni ĉiuj trinku. (Ĉiuj trinkas.)

IVANO (pli afable): Nu, Hans, faru vian eblon.

HANS (li deklamas la vortoj ofte fluas torento, kun haltetoj por pliigi la sarkasman kotopon signifon): Sinjoro Prezidanto kaj geamikoj kunvenintaj! Hodiaŭ nokte ni festas, ĉar morgaŭ ni disĝigos. Hodiaŭ ni finis la Cseh-metodan studadon, morgaŭ ni scios nian sorton. Se ni ĉiuj ricevos diplomon, ni tuj disĝigos. Johano portos la Cseh-metodon al Ameriko, mi al Ĉinujo, kaj — kaj nia ŝatata prezidanto, Ivano, ĉirkaŭvojaĝos en Eŭropo. Sed disĝitaj, ni restos ligitaj en la kara memoro, ligitaj de komuna celo. Per la Cseh-metodo Johano helpos al la usonanoj komprenigi sin al la angloj, kaj en Ĉinujo, se mi evitos la banditojn, mi komprenigos unu revolucian generalon al alia revolucia generalo, pere de la Cseh-metodo. Ivano restos en Eŭropo. (Paŭzeto.) Se mi konsideras la naciojn de Eŭropo, mi dankas Dion, ke mi iros inter la banditojn. La afablaj, pacamaj kaj kortuŝitaj banditoj estas kvazaŭ infanoj kompare al la mildaj ŝafoj de Kristo en Eŭropo. (Paŭzeto.) En ĉi tiu kavo de leonoj Ivano iros kun la Cseh-metodo. Kaj ĉu ni povas havi pli bonan reprezentanton? (Tondre:) Ne, milfoje ne! Jen ni havas decideman homon. Jen, ni havas homon, kiu, antaŭ du enigmoj (paŭzeto) elektos aŭ unu aŭ la alian. Sed ni ne diru plu. Nur ĉi tion. Ke en Eŭropo oni faras bonan bieron. Kie la biero estas bona, tie estas espero. Mi prenos kun mi kelkajn barelojn al Ĉinujo por trinki la banditojn. Dumtempe, geamikoj, replenigu viajn glasojn kaj trinku je la sukceso de la Cseh-metodo, ke ili esperantigu la mondon en nia propra generacio. (Ĉiuj trinkas.)

JOHANO: Venu, Zefira, alie ni malfruos. (Ili iras al la pordo.)

HANS: Pripensu bone la enigmojn, Ivano.

IVANO (subvoĉe): Hundo. (Hans kaj Julia iras al la pordo.)

ZEFIRA (revenante antaŭ Ivano): Ĉu mi estas, do, enigma al vi. Nu, morgaŭ mi komprenigos min. Gis revido.

HANS, JOHANO kaj JULIA (nun preterirante la sojlon): Gis revido.

(La trio eliras.)

IVANO: Gis revido.

ZEFIRA (sin turnante en la pordokrado): Ivano, ĉu vi ne havas ion por diri al mi?

IVANO: Gis revido, Zefira.

ZEFIRA (kun eta ridi): Ĝis reveno, Ivano. (Eliras.)

(Ivano, sola, malrapide sidigas.)

Kurteno.

Fino de Akto II.

AKTO III.

(Scenejo kiel en Aktoj I kaj II. Estas la sekvanta mateno. Johano kaj Hans ĵus finis matenmanĝon.)
(Eniras Greca.)

GRECA: Matenon.

HANS: Kie estas Ivano?

GRECA: Li iris al Londono.

JOHANO: Kiam? Li estas subtitolo.

GRECA: Lastan nokton. Nelonge post vi li iris al la festo.

JOHANO: Bedaŭre, ke mi ne adiaŭis lin. Ankaŭ mi foriros hodiaŭ.

HANS: Ankaŭ mi. Surprize estas al mi, ke Ivano forkuris tiamaniere. Evidente, du virinoj samtempe...

GRECA: Sinjoro Hans, ne parolu tiel antaŭ mi. Kio eble estis saŭco por vi, ne estas por li. Kaj ŝparu ankaŭ viajn bedaŭrojn, Sinjoroj, ĉar nia amiko flugis aeroplane, kaj revenos ĉi-matene en sama maniero.

HANS: Hm. Prave, li estas persono plena de subiteco.

GRECA: Kaj ĉu vi aŭskultis la radion lastnokte? Ne? Do, por vi mi havas novaĵojn, por vi gajigajn sed ja ne por mi, ĉar mi perdos vian ĉeeston.

HANS: Ho ne, mi ne kredas tion, Greca. Ni ne povos forlasi vin por longa tempo. Johano foriros por kelkaj semajnoj, sed li revenos. Li absolute ne povus lasi la karan Grecan ĉi-maniere...

GRECA: Ne decas, ke vi parolu tiel al mi, jam edziniĝinta virino. Sed vi, Sinjoro Hans, ĉiam estas la sama. Mi diras al vi, ke vi ĉiuj foriros, kiel estas tute prave kaj nature.

JOHANO: Klarigu, kara Greca, kio estas la novaĵo. Ni estis tre okupitaj lastnokte ĉe la festo. Ni aŭdis

nenion. Ĉu mi gajnis diplomon? Ĉu oni por ĉiam rifuzis ĝin al Hans? Aŭ ĉu ni ambaŭ estas rifuzitaj...?

HANS (mokscivolege): Parolu, Greca! Ne tenu nin plu, longe en ĉi tiu netolerebla malcerteco. Tre certe, mi malsukcesis, sed diru, ke Johano, almenaŭ Johano, gajnis la rajtigilon ekiri la mondon por instrui la Cseh-metodon de poluso al poluso. Nur parolu, Greca.

GRECA (anoncante grandan surprizon): Vi ambaŭ sukcesis.

HANS: Neeble! (Sidigas.) Ho, nun mi devos labori. Anstataŭ pasigi la plezurajn horojn ĉi tie je patra elspezo, mi devos persviti la ĉiutagan panon en fremdaj landoj, enŝvitigi esperanton en la ostokapojn kaj unuvorte min ĝeni diversmaniere... ho!

GRECA: Kaj ne tro malfrue, junulo. Tro longe vi drinkis kaj mallaboremis ĉi tie. Ĉetere, iom da genaĵo ne multe malutilos al vi. Kaj, mi ne diris ĉion, Sinjoro Hans unue vojaĝos por propaganda serio de Cseh-metodaj kursoj en Brazilo, kaj estas kondiĉo, ke survoje al Sud-Ameriko, li trastudu la uzadon de la akuzativo.

HANS: La akuzativo! Kiel terure! Mi ĉiam malamis ĝin.

GRECA: Kaj Sinjoro Johano, li unue propagandos en Ĉinujo.

JOHANO: Mia fato estas sigelita. Mi edziĝos al Miss Ĉinujo.

GRECA: Eble Miss Ĉinujo havos alian fiŝon?

JOHANO: Ne forgesu informi nin pri Ivano. Kiel li sukcesis?

GRECA: Mi ne scias. Sinjoro Greca tiam volis aŭdi la sportajn aferojn.

HANS: Ha! Mi havas ideon.

JOHANO: Malofta afero, nu?

HANS: Mi scias, kial Ivano iris al Londono.

JOHANO: Kiel vi scias?

HANS: Sendube estas sekreta amafero. En Londono estas la tria.

JOHANO: La tria kio?

HANS: La tria amafero.



Hayo. Palaco de V' Paco

POEMOJ

— R. Swietoszewski —

Nur ami . . .

Moto: „Nur ami kaj diri la vortojn de l' amo“
(Maria Baŝkirceva)

Nur ami kaj diri la vortojn de l' amo!
Nur ami kaj esti amata!
Nur diri kaj aŭdi la vortojn el flamo,
Car koro je flamo malsata.
Nur diri kaj aŭdi la vortojn karesajn,
Subtilajn, velurajn, muzikajn,
La vortojn preĝantajn, silentajn, promesajn,
Sekretajn, misterajn, mistikajn.
Nur ami kaj diri la vortojn aromajn,
Kolorajn, delirajn, pasiajn,
La vortojn sentplenajn, elkorajn, nehomajn,
Dorlotajn, mielajn, radiajn;
La vortojn ĝisnune diritajn nenie,
Plenplenajn de rava enfazo,
Igantajn sin senti beate, ebric,
En ia fabela ekstazo.
Nur ami kaj pri sia amo ripeti,
Kaj pri tuta mondo forgesi,
Nur ami — kaj plue nenion jam peti,
Nur ami — kaj tion konfesi!
Nur ami! la amon ensorbi, enspiri,
Nur amon inspiro kaj senti,
Oferti la amon kaj amon altiri,
Oferti sin mem, sakramenti.
Car ĉio alia sur ter' kaj ĉielo —
Sensenca stultaĵo kaj vano,
Malvero, mensogo, fiaĵo, malbelo,
Fikcio kaj fatamorgano!
Krom amo nenio valoron posedas,
La vivo sen am' estas morto;
Nur am' unusola la koron obsedas,
Car amo — feliĉo kaj forto.
Do — ami kaj sole pri Amo paroli!
Do — ami kaj, tion konfesi!
Nur ardi kaj fajri, kaj bruli, kaj boli,
Nur ami kaj . . . kisi, karesi!

[Ci-supra versaĵo estis premiita per la »Natura Floro« en la XV-aj Internaciaj Floraj Ludoj, okazintaj en Vendrell 4. VI. 1933.]

Poeto

Mi estas arkpafisto, miaj sagoj
Terenfaligas malproksimajn stelojn,
Mi rabas la trezorojn el ĉielo,
Devigas diojn mi al tributpago.

Mi estas ja miraklofara mago:
Mi povas ĉion transformi en belon,
La mondon ensortigi en fabelon,
La novan kosmon krei el imagoj.
Sur florbrodita, bluturkisa fono
Staras en suno, meze de l' tutmondo,
Mia brilanta, ŝormita trono.

Dolĉe karesas min mildaj kantondoj . . .
Ĉe mi pafarko, sagoj, kvieto . . .
Mi estas reĝo de l' reĝoj — poeto!

Kanto de l' aglo

Mi estas aglo! kaj nenia
Sklavigos min insida forto:
Liberas restos mi ĝis morto,
Malgraŭ la frapoj de la sorto.
Mi estas aglo — birdo dia!
Mi estas aglo! Jen sur roko
Troviĝas mia reĝa nesto,
Kiel la signo, la atesto
De la kurajo, de l' majesto —
Neatingebla ŝtona loko.
Mi estas aglo! En aero
Mi ŝvebas for de l' tera bruo.
Meze de l' fulmoj kaj la bluo,
Kaj vivas sola sen enuo
Kun miaj ĝojoj kaj suferoj.
Mi amas nur senliman spacon,
Nur montojn, nubojn, ventmurmuron:
Mi — fil' libera de l' Naturo,
Kiu dissemas nur teruron
Kaj malestimas vanan pacon.
Mi — malhumila, mi — fiera,
Mi — sensinjora, sendependa,
Mi — senamika, sed senplenda,
Mi — enviinda kaj legenda,
Mi — alimonda, alisfera!
Kaj mia reĝa apanaĝo
Estas senfunda ĉi ĉielo.
Najbaras min la sun' kaj steloj,
Limigas min naturfabeloj,
Nur malrealo kaj mirajo.
Mi estas aglo! mia forto
De l' dia pov' estas simbolo,
Ne konas barojn mia volo,
Cirkaŭos ĉiam aŭreolo
Min aglon — aglon ĝis la morto! . . .

GRECA: Mi rifuzas permesi, ke miaj oreloj vin aŭdu. Ĉiam vi metas fiaferon en la konversacion.

(Bruego. — Eniras Zefira.)

ZEFIRA: Pardonu min, Sinjorino Greca, sed ĉi estas vere, ke Ivano flugiris al Londono.

GRECA: Jes, certe jes.

ZEFIRA: Ho, kion li pensos pri mi? Kial mi ne parolis tuj?

HANS: Ha, li eltrovos sekretan amaferon!

ZEFIRA: Ha! Ha! Ha! Prava Hans. La kara

Hans ĉiam estas tiel absolute prava.

HANS: Ĉu vi sciis, ke li havas trian en Londono?

ZEFIRA (surprizite): Trian? Neeble.

GRECA: Ho ne zorgu pri li. Li havas amaferojn sur la cerbo. Sinjoro Ivano refugos al Arnheim ĉi-matene, kaj eble revenos en iu ajn momento. (Eliras.)

ZEFIRA: Tio estas bona. Mi volis adiaŭi lin, antaŭ ol li foriros al Budapeŝto.

CIUJ: Ĉu li iros al Budapeŝto?

ZEFIRA: Kompreneble. Mi aŭdis la radion lasta-

nokte, kaj ke Ivano honore gajnis la diplomon de la Cseh-Instituto kaj tuj komencos propagandan vojaĝon en Hungarujo.

ZEFIRA: Sajnas, ke Hungarujo estus tro forta por mi.

HANS: Estos interesa loko por li. Nu, mi devos enpaki la akuzativojn kaj ek por Rio de Janeiro.

ZEFIRA (kante): Jen Ha s Ruliĝas Al Rio e.
(Parole) Sed mi ja preferus veli al la sudaj maroj.

HANS: Kial al la sudaj maroj? Ha! Mi flaras ion.

ZEFIRA: Kiu estas aŭ estos en la sudaj maroj?

HANS: Mi flaras ion.

ZEFIRA: Eble estas la biero de la lasta.

JOHANO: Komprenable Francis.

HANS: Sed Francis jam edziĝis kaj mielmonatas inter la samoanoj. Felica homo. (Iom ekstravagance) Haj, Zefira, ĉu vi konsentas mielmonati kun mi en Rio. Vere, mi nun edziĝproponas al vi. Ĉu vi akceptas min?

ZEFIRA (neserioze): Ho mia Hans. Kiel mi atendis ĉi tiun momenton. Kun mia tuta vivo mi akceptas la oferaĵon. Mia koro.

HANS (kiel fuĝanto): Pripensu la aferon dum kvaronhoro, mia kara. Dume, mi enpakos la akuzativojn kaj tiel plu. (Eliras Hans.)

JOHANO: Efektive, Zefira, ĉu vi estas sincera pri Hans? (Si kapneas.) Se vi volas ŝanĝi la opinionon, mi volas preni edzinon al Sanghajo.

ZEFIRA: Kies edzinon vi volas preni, Johano? Sincere, kara Johano, estas nur unu sola viro, kiun mi volas kiel edzon.

JOHANO: Evidente, tiu ne estas mi. Nu bone, fraŭle mi enpakigos la miajn kaj kviete forvojaĝos. Gis revido. (Eliras Johano.)

(Tuj eniras Greca kun taso da teo.)

GRECA: Jen, Fraŭlino Zefira, dum vi atendas la revenon de Ivano el Londono, eble vi ŝatos tason da teo. Kiel diris mia Greco, tio estas, mia edzo, lastan nokton, taso da teo...

ZEFIRA: Dankon por la taso da teo, sed ne parolu. Alie mi kriĉos. (Prenas la teon kaj ektrinketas.)

(Estas sonoro.)

GRECA: Estas la telefono. Ne, ĝi ja estas la stratpordo. (Eniras Julia, komence ne ekvidas Zefiran.)

JULIA: Ho Greca, ĉu Ivano jam estas for? (Vidas Zefiran.) Pardonu nun, mi...

GRECA: Jes, Fraŭlino. Sendube vi atendas lin. ZEFIRA: Jen venas Julia la poetino kun poemo sur la lipoj.

GRECA: Mi enportos alian tason da teo. (Eliras.)

ZEFIRA: Ĉu vere vi amas Ivanon? Jes, kompreneble, mi vidas, ke vi amas lin. Nu bone. Se li amas vin kaj ne min, li estu la via. Mi ne ŝatas la proprajn de alia.

JULIA: Treege malfacile mi povas kompreni vin, Zefira.

ZEFIRA: Mi estas al vi amika. Sed kial Ivano ne rajtas elekti inter ni? Se li estas vere viro en la vera senco, li scios, kiun li amas.

JULIA: Sed al vi li sentas sin ligita.

ZEFIRA: Kaj se li estas viro, li rompos ĉi tiun ligitecon.

JULIA: Facile eble por vi, Zefira, sed Ivano estas viro, kiu honoras sian promesitan vorton.

ZEFIRA: Dankon por la komparo, Julia, sed vi

min ne ofendas. Konsentite, ke mi kaj Ivano eble sentas malsame pri la romplebleco. Sed mi ne permesos, ke Ivano ŝangu nur pro facilanimeco.

JULIA: Vi permesas al vi opinii, ke Ivano nur ludas kun mi?

ZEFIRA: Mi pli bone konas lin ol tiel pensi. Sed ĉu li efektive konas sin? Mi certigas, ke ne. Se li rompas kun mi fianĉe, li poste rompos kun vi.

JULIA: Vi ne konas lin kiel mi konas lin.

ZEFIRA: Mi konas lin, kiel li diris, el la bankuvo. Ivano neniam konis sian propran naturon. Li ĉiam marŝis sur rozpasejo laŭ la gvido de lia patrino, bonega virino. Jam tridekjara, li apenaŭ iam faris por si gravan decidon. Je la unua ekflugo el la hejma nesto, li enamigis al la unuerenkontita virino, tio estas, al vi mem. Mi ne kritikas lian elekton, tamen vi estas la unuerenkontita. Romantike, sendube, sed ne tute la fundajo por ĉiama kunvivado, kio estas la edzeco.

JULIA: Terure mi sentas min, Zefira. Kion vi diras, tio efikas min, kvazaŭ vi estas diablino, kiu volas detrui mian amon. Sed vi ne povas, Zefira, ĉar mi vidas en Ivano pli ol vi iam vidis.

ZEFIRA: Kaj ni supozu, ke Ivano kviete forlasos min kaj kun vi edziĝas, ĉu lia konscienco restos trankvila? Mi konas lin ĝisfunde. Kiam ni lin renkontis lastnokte, li estis kvazaŭ en la infero.

JULIA: Mi komencas vidi, kion vi volas al mi komprenigi.

ZEFIRA: Jes, nu, daŭrigu.

JULIA: Vi volas diri, ke kun mi Ivano ne estos felica. Ke kun mi li sian vivon fortranĉos de sia propra fundajo konsistanta plejparte el lia patrino kaj vi, kaj sendube de rondo de geamikoj, kiujn mi ne konas.

ZEFIRA: Forta viro povas ĉi tion forgesi, se lia animstato estas trankvila. Kaj se mi tion permesos, Ivano edzinigos vin, kaj fidelos al vi ĝismorte. Sed ĉu esti felica en la vera senco, ĉu maturiĝi al plena homo? Pri tio mi dubas. Ne, mi ne dubas, mi estas certa, ke li ne estos vere felica, kaj ne vere maturigos.

JULIA: Zefira, mi komencas kompreni, ke vi amas Ivanon. Kiam mi unue renkontis lin, ni tuj amikiĝis. Ni neniam estis geamantoj. Mi helpis lin, mi estis por li kiel distro kontraŭ la nostalgio. Proksimeco helpas al la असiento. Kaj tiel estis inter ni. Nur kiam vi venis lastnokte, mi komprenis, kiel multe mi amas lin... sed mi vidas, ke ne povas esti. Mi devas rezigni... Li revenu al sia propra rondo, al kiu li kutimiĝis, kun kiu li maturigos, kaj fariĝos, kiel vi diras, plena homo, por fari sian devon en la vivo.



Amsterdam

St-Nikolao preĝejo

Alvoko

— Genri de Rognier —

ZEFIRA: Ĉu vi amas lin tiel, ke vi povas perdi lin...?

JULIA: Jes, tiel estas.

ZEFIRA: Pripensu bone, Julia. Mi avertas vin, ke mi ne kredas, ke vera amo tiel facile rezignas.

JULIA: Se mi rezignos, ĉu rezignos ankaŭ vi, ke li povu mem elekti inter ni?

ZEFIRA: Mi ne rezignas.

JULIA: Nek mi. Kaj mi diras al vi, ke mi volus, ke mi neniam estu vin aŭskultanta. Vi nur ridas je mi. Vi estas cinika, filistra junulino, kaj inter vi kaj mi povas esti nur milito. Ivano e'ktu inter ni.

(Eniras Greca kun taso da teo.)

GRECA: Jen teo por du.

JULIA: Trinku ĝin mem. (Fulmrapide foriras.)

ZEFIRA (petege): Julia, Julia, ne foriru tiel... Ho, kial ĉu volas malkompreni.

GRECA: Mi esperas, ke vi kaj ŝi ne malamikiĝis.

ZEFIRA: Ho ne, ni nur militas pri Ivano. Ĉio estas permesebla en la amo kaj en la milito, tiel oni diras. Mi savas lin el falsa situacio.

GRECA: Vi scias, Fraŭlino Zefira, mi ne multe ŝatas tiun junulinon. Mia edzo, la kara Greco, diras, ke la poezio estas malsaĝaĵo...

ZEFIRA: Kaj Julia estas poeto, ĉu ne?

GRECA: Si poemas kaj poemas kun Ivano ĝis naŭzo. Nu, ĉu mi forprenu la tason...

(Eniras Hans.)

HANS: Ne, donu ĝin al mi. (Prenas la tason kaj trinkas.)

(Greca eliras.)

HANS: Hallo, Zefira. Ĉu vi ne ŝanĝis la opinionon? Ĉu vi venos kun mi al Rio? Mi volas edzinon.

ZEFIRA: Kvazaŭ por la vojaĝo? Ne, Hans, mi ne povas. Tamen, se vi volas edzinon, kial ne demandi Julian. Ne ĉio estas en ordo inter ŝi kaj Ivano, kaj eble ŝi decidus favore al vi, se vi agos tuj.

HANS: Ĉu vi ŝercas pri Julia kaj Ivano?

ZEFIRA: Mi absolute ne ŝercas.

HANS: Nu, mi revidos vin antaŭ ol forvojaĝi. Dumtempe, ĝis la revido. (Hans salte eliras.)
(Zefira, sola, sidigas momente kaj ordigas la vizaĝon antaŭ speguleto el la mansaketo.)

(Eniras kviete Francis.)

FRANCIS: Zefira.

ZEFIRA: Francis. (Ili tuj enbrakigas unu la alian kaj kisas pasie.)

ZEFIRA: Vi venis. Ĉu vi ankoraŭ amas min.

FRANCIS (ridete): Mi ne kisas vin alie. (Ili ree kisas.)

ZEFIRA: Sed mi estas virino. Ĉiam mi volas demandi kaj demandi, ĉu vi amas min, nur por aŭdi, kiel vi iel ŝanĝas la respondon.

FRANCIS: Malsaĝulino. (Iras denove kisi ŝin, sed ŝi evitas.)

ZEFIRA: Ne plua kizado nun. Mi demandas, ĉu vi iros al Samoa, aŭ ĉu ni iros al Rusujo.

FRANCIS: Al Rusujo, jes, jes, kaj jes. Nur esti kun vi, ni iru ĝis la mondfino.

ZEFIRA: Francis, mi ŝanĝis la opinionon pri Rusujo. Mi preferos iri kun vi al Samoa. Mi nur volis provi vin, ĉu vi min amas.

FRANCIS: Konfesu, nu, ke vi venis al Arnhem nur por informi Ivanon pri nia geedziĝo. Ĉu via konscienco riproĉis vin?

ZEFIRO: Tute ne. Sed mi volis faciligi la konsciencon de la kara Ivano. Sendube mi fuŝis la aferon

Ke l' nokto estu dolĉa, necesas, ke la rozoj de la ĝardeno, kiu ĝis al la dom' odoras, tra la fenestr' aperta al ĉi odoro-dozoj parfumu mole l' ombron, kie nin mut' favoras.

Ke l' nokto estu bela, necesas la silento de la kampar' obskura kaj de l' ĉiel' stelplena. Kaj ke ni ambaŭ aŭdu en muto kaj atento niajn pensojn rediritajn per voĉo vorto-sena.

Ke l' nokto estu bela, kaj dolĉa kaj di-forta, ne estos ja sufiĉaj silento kaj la floroj, nek la ĝardeno nokta, nek la rozar' eskorta, nek tero, kiu dormas sen paŝoj kaj rumoroj.

Ĉar sole vi kapablas, bela Amo, se vi l' korojn favoras, kiujn ĝuo brulstampis per sigelo, sekrete pridonaci ĉi perfektajn horojn per grava, kaj profunda, kaj plej supera Belo.

El la fraca: *Lali Blond.*

iomete. Sed, la kara Ivano, sensperta knabo, ankoraŭ sentas sin ligita.

FRANCIS: Kaj certe vi jam informis lin.

ZEFIRA: Ho ne. Li estis malfacila. Li ne povis esti tute honesta al mi, kaj sekve li ne povis esti tute en ordo kun Julia. Ŝi nun imagas, ke mi estas ŝia mal-amiko, kiun ŝi almitas tra la korpo de Ivano.

FRANCIS: Sed, Zefira, ĉu vi ne kaŭzis al ŝi doloron. Julia ne estas kiel vi, iom hardita de la mondo.

ZEFIRA: Jes, vi estas prava, Francis. Tamen, ankaŭ mi estas prava. Mi vetas, ke Hans revenigos ŝin ĉi tien.

(Bruego. — Eniras Ivano.)

IVANO (seriozege): Zefira, vi ludis kun mi. Mi ĵus eksciis de la patrino, ke vi estas la edzino de viro, kies nomon ŝi ne scias. Kiel vi povis tiel trompi min? Kial vi ne informis min? Kaj nun Julia estas for. Ŝi ĵus forlasis sian loĝejon en aŭto, por iri al la flugejo kaj de tie aeroplani al Budapeŝt. Kial vi ne informis min, kial mi ne scius, ke mi estas libera?

ZEFIRA: Tio estus tro facila por vi, Ivano. Vi amis Julian, sed vi ne informis min, ke mi sciu, ke mi estas libera. Kaj ankaŭ, kiel mi sciu, ke tio ne estas nur pasanta amafero, kiu forblavigos. Nun vi povas, se vi volas, repreni la falsan paŝon kaj resti fraŭlo.

IVANO: Kiu estas la viro, hundaĉo, al kiu vi vin edzinigis?

FRANCIS: Estas mi, kara Ivano. Mi amis Zefiran dum longa tempo, sed vojaĝis por ŝin iel forgesi. Antaŭ kelkaj semajnoj ŝi konfidis al mi, ke plu ŝi ne amas vin, kaj ke, efektive, ŝia amo ĉiam estis nur bankaŭto, kaj ke mi tuj deklaris mian amon. Ni sekrete tuj geedziĝis, sekrete nur pro romantikeco. Pro la trompo, pardonu min, mi petas. Amo kaj devo ŝajne kontraŭiris, kaj la amo gajnis.

ZEFIRA: Pardonu min, Ivano, ankaŭ mi petas. Sed la afero urĝas. Hans ŝercas edzinon, kaj li iris por edziĝproponi al Julia kaj eble en sia nuna animo ŝi akceptos lin kiel elirovojn kaj foriros kun li al Brazilio.

IVANO: Mi batos al li la nazon, impertinentulo. Li sin proponas al ĉu virino renkontita, nur kun la celo...

(Bruego, eniras Hans tirante post si Julian.)

Familia katastrofo

— Klara Malfinsky —

Vaska jam estis tedata de la vilaĝo vivo, ekdeziris transloĝigi al Moskvo.

Car tiu ĉi urbo estas — kiel ĉiu scias — kultura centro, kaj Vaska (ankaŭ tion ĉiu scias) estas kulturhomo. Li, ekzemple, tre ŝatas la muzikon, precipe se tiu aperas en la sonoj de harmoniko, kaj li tre ŝatas ankaŭ altflugajn filozofiaĵojn apud glaseto da «vodka», en societo de similaj kulturhomoj.

Tamen Moskvo ne nur pro sia kulturo estis bezonata al Vaska.

Verdire, ne nur li estis tedata de la vilaĝo, sed ankaŭ la vilaĝo estis tedata de li. Car Vaska ŝatis la kulturon, sed la laboron ne. Pro tio, en regulaj intertempoj li ricevis kaj perdis postenojn, ĝis kiam tute disvastiĝis lia misfamo kaj li ne trovis plu laboron.

La afero iĝis serioza, ĉar, malgraŭ sia juneco, li, krom si mem, devis zorgi ankaŭ pri edzino kaj infano.

Pro tio, Vaska ege elcerbumis, kien iri, kaj la rezulto estis Moskvo. Tie vivas la plej multaj homoj, do plej granda espero estas ne rimarkiĝi. Vaska ja estis modestulo kaj ne volonte tiris la atenton al sia malgrava persono.

Li skribis al Moskvo leteron al konata oficejo, kaj proponis sian helpon por «konstrui tie ŝa socialismon».

Car la famo de Vaska ankoraŭ ne atingis la centron, kaj tie oni ĝenerale konstante bezonis konstruajn laboristojn, venis favora respondo.

Ne nur laboron sed eĉ ĉambron oni certigis al li en barako.

Vaska do pakis siajn aĵojn (ili ne estis multaj) pakis la edzinon kaj infanon, pakis la amatan harmonikon kaj transloĝiĝis.

Ĝis tio estas ĉio en ordo. La malfeliĉo komenciĝis nur kiam lia edzino, Klavka, ekamikigis kun la najbarinoj.

En la barako loĝis senescepte konstrulaboristoj kun siaj familioj, kaj Klavka devis tro baldaŭ atskulti diversajn onidirojn pri la malzorga kaj maldiligenta laboro de ŝia edzo.

Vere al tio ŝi sufiĉe alkutimiĝis jam hejme. Nur tiam estis ankoraŭ konsole, ke ĉiu scias: Vaska estas malbona laboristo, sed tre bone li ludas harmonikon, kaj ĝenerale estas tre kultura homo.

JULIA (al Ivano): Diru al mi la veron, Ivano. Diru, ke vi ne trompis min. Hans diras, ke vi jam edziĝis al Zefira.

IVANO: Hans estas, kiel ĉiam, terura malsaĝulo. Zefira kaj Francis estas mielmonatuloj, kiuj iros, oni supozas, kune al Samoa.

JULIA: Ĉu vere? Ho mi ne komprenas. (Sidigas subite.)

(Telefono sonoras. Hans respondas. Dum lia parolo, Ivano senbrue aperas por klarigi ion kaj certigi Julian.)

HANS (ĉe telefono): Jes, estas... Ĉu estas vi, Johano (laŭte al ĉiuj) Estas Johano... Ho, vi havas novaĵon... ho... hoho... Vi tion diras... Kaj vi estas mia amiko... Ĉi tio kostas al vi kare, kunulo... jes, almenaŭ du botelojn de la plej bona biero... hej atendu momenton... Francis kaj Zefira geedziĝis kaj iras al Samoa. Kio? Jes, ĝojkrioj kaj aliaj sonoj de ega gajejo. Kio?... Ho, Ivano kaj Julia? Ivano estas stultulo... Vidos vin poste. Ĝis... (Rependiĝas la aŭd-

Sed ĉi tie la laboristoj havis propran blovarkestron kaj literaturan angulon, kie Vaska eĉ ne rimarkiĝis.

Sufiĉu diri, ke Klavka komencis, pro la societo de la najbarinoj, ne rigardi plu sian edzon kvazaŭ diom.

Proporcie al tio, ŝi komencis iam — iam eklevi sian kapon, tro malfermi la buŝon, kaj agi, kvazaŭ ankaŭ ŝi estus homo.

Vaska unue rimarkis la ŝanĝigon, kiam Klavka anstataŭ kunligi sian kaptukon sub la mentono — kiel ŝi kutimis en la vilaĝo, — ekligis ĝin malantaŭe, sur la nuko.

Poste daŭrigis la afero per tio, ke kiam la edzo vespere hejmenvenis malsate, anstataŭ tagmanĝo li trovis paperejon: «mi iris en kunvenon de la patrinoj» aŭ «hodiaŭ mi estas sendita por kontroli la purecon de la laborista manĝejo» ktp.

Unue Vaska toleris kaj per diversaj rimedoj klopodis rekonduki la edzinon sur la ĝustan vojon.

Sed foje, kiam li denove devis enlitiĝi sen tagmanĝo kaj sen edzino, lin ekkaptis kolero. Apenaŭ li povis ĝisatendi, ke ekaŭdiĝu la krakado de ŝlosilo en la seruro; tiam li eksaltis el la lito, starigis apud la pordo, kaj kiam la edzino envenis kun serena vizaĝo de senpeka infano, — Vaska ekkaptis ŝin ĉe la brako kaj levis la manon.

Sed antaŭ ol li sukcesis bati, la virino repuŝis lin ĝis la muro kaj komencis tiom brui, kriaci, ke Vaska simple perdis la voĉon pro la subita surprizo.

Klavka, kiu hejme ĉiam tiel silente kaj timeme akceptis liajn edzajn batojn, kvazaŭ esprimojn de vireca forto! Nun, tute freneziginte ŝi furiozas kaj eĉ minacas lin per plendo al la juĝejo.

Precipe tiu ĉi lasta influis lin treege, ĉar Vaska ja ne estis tute sen peketoj. Li ne kuragiĝis tuŝi la edzinon, nur la manon lin ŝvingadis minace kaj timige.

— Vi, vi aĉulino! Vi volas kun mi ekbatali? Per unu fingro mi povus vin disŝmiri kiel vermon! Felice al vi, ke mi ne volas per via tuŝo malpurigi la manon. Sed mi vin punos! De la hodiaŭa tago ni ne estas geedzoj. Mi ne vivos plu kun tia malkulturulino! Ni vidu, kiel vi povos vin vivteni sen mi!

— Bone! Ni vidos! Mi ne malsatmortos! Tiam

ilon.) Nu, ĉu vi scias... tiu malbenita hundo Johano sin proponis al la sekretariino de iu esperanta klubo kaj ŝi akceptis lin. Kaj estis mi, kiu unue konatigis ilin. Malpura hundaĉo! Kio estas la devo?

ZEFIRA: Konsilo por vi! Iru al Utah! Mormonigo.

HANS: Mi scias pli bonan. Ni ĉiuj iru por in-formi Grecan. Si donos tason da teo. (Flustre) Venu, Zefira kaj Francis. Ni lasu ilin al la devo.

(La trio ŝtele foriras.)

(Ivano kaj Julia starigas.)

IVANO (prenante ŝian manon): Permesu, ke mi klarigu...

JULIA: Tion faru, se vi sentas, ke estas devo.

IVANO (prenante ŝin al si): Devo nun for, la amo gajnis. Multe la dev', senfine pli la Amo. Kaj tiel estu inter ni, dum ni vivas. (Ili kisas.)

Kurteno.

da bonaĵoj, kiom mi ricevis de vi, ĉiam mi povos akiri al mi.

Sed eldiri la eksedziĝon estis pli facile, ol ĝin plenumi.

Pri la oficialaĵoj ne estis multaj malfacilaĵoj, ĉar ili ja ne estis registritaj. Pli malfacile estis pri la fakto mem.

Vaska kaj Klavka posedis nur unu malgrandan ĉambreton, kaj pro la granda loĝejkrizo nenian esperon ili havis ricevi alian. Krom tio, eĉ lito eĉ ili estis nur unu.

Tio diversajn naskis komplikajojn. Unue, neniu el ili povis eĉ pensi pri tio, preni al si alian vivkunulon. Precipe al Vaska tio estis malagraba, ĉar mankis, kiu lavus, riparus vestaĵojn kaj kuirus por li.

Iun tagon, kiam Klavka malfrupesere hejmenvenis, ŝi kunfrapis la manojn pro la miro. Kion ŝi vidis?

Vaska staris apud la granda lavujo, kaj ambicie lavis siajn vestaĵojn.

— Hehehe! Bone estas al vi! Estis oportune, ĉu ne, ekspluati la edzinon por tiaj aferoj? Kaj gravmie-nade diradi: la virinoj vivas kiel la fiŝoj en la akvo, neniom ili laboras.

— Virinaĉo! fermu vian buŝon! — interrompis memestime Vaska.

— Fermu vi! Al viroj ja ne decas multa parolo. Plie agado! Mi nūras nur ke vi ne hontas elekti al vi ĝuste tian laborkampon, kia tute ne konvenas al la vira fiereco.

Vaska vere estis pli lerta en la agado ol per la buŝo. Sed bati fremdan virinon ne permesas ja la moralo.

Alifoje denove kun kudrilo en la mano surprizis lin la terura homino kaj la mokoĵoj denove ne mankis.

Ŝi, kontraŭe, vivis bone. Enskribigis kiel kuirista lernantino en la fabrika manĝejo. Tie ŝi nutraĉis sin bone, dum Vaska, manke de hejma kuiristino, vivis el seka pano kaj salita fiŝo. Pro sia malbona laborkonduto li ne kuraĝis iri en la manĝejon inter la kamaradojn.

Iun vesperon, kiam Vaska ĝuste enploris siajn ĝemojn en la sonojn de la harmoniko, venas la virino kiel uragano. Kun ŝi alportas la infanon, kium ŝi kutime restigadis, dum tempo de sia laboro, en la infanhejmo.

La knabeto ne respektis la muzikon kaj faris tian bruon, ke Vaska ne nur la delikatajn sonojn de la harmoniko ne komprenis, sed eĉ sian propran voĉon.

— Diablo prenu! Kial kriacas tiu infano?

— Kriacas, nu certe kriacas! Ĉar nenion ĝi ricevis manĝi.

— Kial do vi ne suĉigas ĝin?

— Suĉigu vi, se al vi ne plaĉas. Ja nun estas egaleco inter viroj kaj virinoj. Unu tagon vi, alian mi! Laŭvice!

Vaska gape malfermis la okulojn.

— Virinaĉo! Vi tute frenezigiĝis!

— Mi frenezigiĝis? Sed, pri la alimentoj, kiu forgesis, he? Se vi jam estas tiom sentaŭga, ke eĉ infanon vi ne povas nutri, almenaŭ vi devas al mi pagi alimentojn. Sed nepre!

— Kial mi pagu alimentojn? Al vi ja neniom kostas la infano.

— Kaj ĉu mia lakto estas senpaga? Iru al la marĉandejo kaj interesiĝu, kiom prenas la laktistinoj por iliaj blankaj akvetoj. La mia almenaŭ ne estas falsita.

Vaska ekĝemis kaj ĉion konsentis, alimentojn, pagojn, helpon, nur estu silento.

Sed plenumi sian vorton jam estis pli malfacile.

Vaska ricevis tre malmulte da mono en la manon. Unue, ĉar li tre ofte restis hejme per la preteksto kaj ne iris labori: »Hodiaŭ mia dento doloras« »Morgaŭ estos la entombiĝo de mia plej kara onklino« ktp. Certe li neniam povis dokumenti siajn mensogojn kaj oni senpardone forprenadis el lia salajro la nelaboritajn tagojn.

Li, entute, ne ricevis multon kaj, krom tio, ofte oni ankaŭ mompunadis lin pro lia malzorga laboro.

Sed tio finiĝis nun. Vaska decidis fariĝi la unua inter la laboristoj por montri al tiu ĉi malbenita virinaĉo, kian edzon ŝi perdis.

La unuan tagon li jam ricevis laŭdon de la majstro kaj, eĉ salajrotago, plenan salajron. Je la sama vespero Vaska, kun fiera gesto, jetis sur la tablon la alimentojn.

Post unu monato Vaskan oni faris gvidanto de laborbrigado, kaj duobligis lian salajron.

Li ankaŭ duobligis la alimentojn.

— Mi volas, ke vi nutru pli bone la infanon!

Kaj intence tiel li malfermis la monujon, ke Klavka vidu, kiom kuŝas tie ankoraŭ bankbi'etoj.

Tamen, Klavka silentis.

Iun vesperon, Vaska alportis kun si misteran pakajeton. La edzino ne estis hejme. Li ankoraŭfoje traplezuris la rigardadon de la aĵoj. Nova paro da elegantaj brunaj ŝuoj, kaj bela, lana vestaĵo. Kiel premion oni donacis ilin al li en la fabriko. Al tio ankoraŭ belajn gamaŝojn, silkan ŝtrumpojn kaj novan ĉapon li aĉetis el propra mono.

Sekvis ĝuste ripoztago. Ili ambaŭ intencis ĝin pasigi en la klubo.

Klavka prenis sian novan plisigitan jupon, silkajn ŝtrumpojn, helajn ŝuojn, silkan bluzon kaj per ruĝa tuko gracie ŝi ligis la kapon. Poste ŝi sidigis per nutri la infanon.

Nun estis la momento, kiam neniam ŝi povis foriri kaj devis nepre rigardi la mirindaĵon.

Vaska kun patosa gesto eliris sian kofron el sub la lito kaj kun suferiga malrapideco komencis sin vesti.

Kiam li, kombita, kravatita, ekstaris antaŭ la spegulo, li konvinkigis, ke al li same ne eblas kontraŭstari, kiel al la juna inĝeniero Jegorov.

Klavka silentis, kvazaŭ neniam ŝi rimarkus kaj finfine li ne povis sin reteni de la demando:

— Bona kostumo, ĉu ne? Eĉ por edziĝo ĝi taŭgus?

— Ĉu vi volas edziĝi — demadis Klavka iomete ektimigiĝinte.

— Nu, kial do ne? Enue finfine vivi ĉiam sola.

Post du tagoj kiam Vaska malfrue vespere hejmen venis, granda malordo lin atendis en la ĉambro. Lia edzino kun granda rapideco jetadis aĵojn en diversajn kofrojn kaj skatolojn. Siaj okuloj estis ruĝaj; siaj vangoj, ŝvelintaj.

— Kion vi faras ĉi tie?

— Mi pakas miajn aĵojn. Mi foriros.

— Kien vi volas foriri?

— Mi ricevis ĉambron en tiu nova domo.

La koro de Vaska kunpremiĝis. Ankaŭ en la gorgo sufokis lin io.

— Ĉu... ĉu... ĉu vere foriri vi volas?

— Nu certe! Vi ja volas edziĝi!

Vaska simple nenion povis respondi.

LA ANĜELO

— Mihály Babits —

La Tero estis ankoraŭ dezerta kaj malplena, la jaroj enombrite ruligadis en la granda universo. Azazel staris sur la supro de bruna terfaldo. Ĉi tie apenaŭ vidigis plantoj de proksime, nur ŝlimo, ĉie ŝlimo. Ankaŭ la hararo de Azazel estis ŝlima, kaj liajflugiloj kvazaŭ kuŝigintaj en la koto. Kaj vere, tra arbaro li stumpletis, antaŭ ol li venis sur tiun ĉi dezerton; branĉo kroĉkaptis lianflugilon kaj, kiam li elŝiris sin, li falis. Kun siaj malevoluintaj, stumpigintajflugiloj, kun siaj piedoj nekutimigintaj al irado, la giganta anĝelo estis sur la tero eĉ multe pli mallerta ol la homoj.

Nun, en ĉi tiu pluvo, en malbelaj, malpuraj gutoj fluis la koto, de lia hararo al la frunto kaj de laflugiloj sur la blankan vestaĵon. Lia frunto estis ankoraŭ la granda, larĝa, alten levata anĝelfrunto, sed ho Dio, ĝi estis falta kaj jam ne brilis plu. Ankaŭ lia vestaĵo estis jam nur nome blanka: ĝi estis malpura kaj ĉifita, malsupre eĉ ŝirita. Ĝis genuo nude malsekiĝis liaj grandaj tendenaj kruroj: turmentitajn, tuberaĵin fingrojn dividis la rimenoj de la sandalo.

Li rigardis la ĉielon. De longaj tagoj kaj noktoj falegis la monotona pluvego, ĝi iĝis griza maro, ne estis transvidebla la inundinta fluo. La anĝelo horore pensis pri la nedivenebla intenco de Dio.

Li rigardis la ĉielon. Ho, se ankoraŭ unufoje li povus, kiel iam, flugi supren, trans la nubojn, en la puran kaj senfinan malplenen! Ho, se ankoraŭ unufoje li povus iĝi nura animo kaj libere li povus divastiĝi en la ĉio! Li malamis ĉi tiun mallertan, maku-litan korpon, kiun li survestis, de kiu nun jam li ne povas liberigi. Ĉar lin kreis la Sinjoro ne por tio, ke li stumpletu ĉi tie en la koto.

Venis en lian kapon, kun kia volupto li survestis jam ĉi tiun maltaŭgan korpon. Ĉiu movo, mil etaĵ kaj nekontroleblaj sentoj de la muskoloj, ĉiu tuŝo, la ĉiama tuŝo kaj frotado de la vestaĵo sur la haŭto, la premo de la tero sub la plandoj, la pezo de la humo sur la okuloj, se aero frapetis lian vizaĝon, la sekreta feliĉo de la spirado: ĉio estis nova plezuro por li, nova aventuro, malkovro. Tien-reen li promeniĝis la manon, nur por ke li sentu la batadon de l'aero sur liaj poroj, kun la lango li esploradis en sia buŝo, kaj ĉiun sian denton li palpadis aparte, amuzis lin, ke tenante lian fingron antaŭ lumo li vidas ĝin duoble. Ĉar ĉiuj liaj proprajoj estis freŝaj, li estis kiel la knabo: kaj same li ĝuis tiun ĉi korpan eston. Kiom li ŝanĝiĝis de tiam! Ĉiuj ĉi etaj sentoj nun estas por li tedaj kaj ĝenaj, kvazaŭ samtiom da katenoj.

En tiaj pensoj staris tie la anĝelo Azazel suferanta pro l'korpo. Kaj kvazaŭ jam de eterne li staris samloke: tiel li sentis nun la mallongajn minutojn, li, kiu sammomente kroĉiĝis kun la eterna Tempo kaj kies

ĉiam vivo facile traflugis miljarojn. Kio estis tiam unu jarmilo? Nun li jam sentis: la turmento de l'korpo estas la turmento de l'atendado, por kiu la tempo etendiĝas en la senfinon kiel serpento; ĉiam celo, ĉiam volo, ĉiu minuto estas nur provizora, ĉiu minuto atendas la sekvantan; nenie unu trankvila, vera momento, en kiu l'animo povus sin anki, por ke ĝi povu libere eksalti al siaj hejmaj altoj...

— Selah! Selah! Arfaksad!

La anĝelo faris funelon el la manoj kaj vokis la pramistojn. Kiel malsekiĝintaj birdoj, blindaĵ de pluvo, frapigis liaj vortoj al la ŝlim-montetoj. Eĉ lia voĉo ne plu estis la malnova anĝelvoĉo!

Kaj kiel falegis la pluvo! Monotone, malrapide, ne fin-konjekteble. Azazel sentis malsekiĝi la vestaĵon, peziĝi laflugilojn pro l'akvo. Senfina amaro kaj kolero lin trakuris, ke li devas atendi! Varma sangondo frapis en lian vizaĝon. Li plandfrapis; obtuze frapis lia granda piedo sur la moliginta tero.

— Arfaksad! ... Selah! ... Malbenitoj! ...

Estis profunda silento, nur la milkorda harpo de l'pluvego sonis en la senfina spaco kaj de malproksime aŭdiĝis ploranta blekego de ia nekonata grandega besto. La anĝelo ekiris malsupren al la kota rivero, sur la vojo, kiun li iradis dum malĝajaj varmaj vesperoj kun la filino de homo; kaj poste jam sola, serĉante liberon en la solo (sed ankaŭ tiam, ve, flirtanta kul-kolono gluiĝis al li, iris kun li, kun mil koleraĵ pimoj incitis, lian korpon, ĝenis liajn pensojn... tiam kuloj, nun la pluvogutoj...). Li iris, iris malsupren al la bordo, li pensis pri siaj filoj, al kiuj li klopodis iri.

Kaj subite eĉ la kurbigo etendiĝis antaŭ li la tuta panoramo. Kie jam estas ĉi tie la pramistoj? Eĉ spuro ne vidigis de l'kabano, la griza maro kovris la tutan horizonton; Arfaksad kaj Selah neniam plu venos antaŭ lin kiel morozaj, senharaj hundoj, humile, kun la mallerta ŝovelilo... Inundo! inundo! Kunpreniĝis la koro de Azazel, ĉar li havis ankoraŭ angelan koron, li tuŝiĝis de ĉiu homa malfeliĉo. Li restis staranta eĉ la bordo kaj senvoĉe rigardis la vibrantajn kaj saltantajn cirklojn, kiujn la pluvego faris sur la senfina rivero. Ho ve! kio estas la intenco de l'Ĉielo?

Strangformaj grandaj malhelaj birdoj flugis malalte super la akvo. Ili forviŝiĝis trans la kadro de l'pluvo. Pli malproksime, grandega krokodilspeca estaĵo grimpis supren en la ŝlimo. Dezerta pejzaĝo ĝi estis jam tute! Azazel pensis pri siaj filoj. Li jam preskaŭ vidis la senmezurajn flugantajn drakojn, la pigrajn, grandajn rostrulojn, la grandegan dentegon, la pendantan haŭton: kiuj ĉi tie eknestos; kontraŭ kiuj liaj filoj devos ekdati. Fiera li imagis en batalo siajn filojn, la gigantojn...

La pluvego nur punktetis la akvojn; senkonsole

— Sed... sed... vi, Klavka... la infanon vi volas kompreni?

— Nu certe! Kion mi faru? — ŝi respondis kolere kaj daŭrigis la pakadon.

— Sed... sed... vi, Klavka... mi tre bedaŭras la infanon.

— Kaj min vi ne bedaŭras, ĉu ne! Vi aĉulo! Mi ne estis sufiĉe bona edzino al vi! — ŝi kriis.

— Mi ja bedaŭras ankaŭ vin.

— Nu jes! Bedaŭras! Kaj volas denove edziĝi.

— Sed Klavka, vi min ne komprenas. Ĉu vi scias, kiun mi volas edziĝi? Mi volas vin... vin edzinigi.

Kaj li premis tian sonornan kison sur la miregan rondan vizaĝon de Klavka, ke la najbarino en la alia ĉambro, ekŝaŭdinte la strangan sonon, rapide kuris en la kuirejon. Ŝi pensis, ke la kato depuŝis poton de la tablo.

La postan tagon Vaska kaj Klavka, ĉiu en sia nova eleganta vestaĵo, ekiris geedziĝi.

Sed ĉifoje ĉe la matrikulejo.

etendiĝis la granda, griza maro; sed Azazel ne emis reiri. Li pensis pri sia edzino, pri *la filino de homo*... pri ŝiaj etanimaj riproĉoj, kapricoj, kun kiuj ŝi atendas lin hejme, en la granda grizo. Ĉu li reiru? Ho, kiel aĉa estas ĉi tiu vivo! Estas belaj la filinoj de homo, iliaj okuloj estas mildaj, kiel krepusko de planedo, sur iliaj lipoj logas la ruĝo de l' vivo.

Sed ilia animo estas nana kaj egoista. Ne la animo estas granda en ili, sed la vivo... parto el la vivo de Dio, kiun Li spiris en Evan en la sesa tago... fajrero el la eterna, varma, vegeta vivo... Tiu ĉi vivologis la anĝelojn, kiam la filoj de Dio vidis la filinojn de l' homo, ke ili estas belaj kaj prenis al si edzinojn el inter tiuj, kiujn ili ŝatis... Tiu ĉi vivo logis ankaŭ lin — ĉar la anĝeloj ne havas vivon, ĉar ili estas puraj animoj: kaj ili ekdeziris la varman, korpan vivon. Kaj ili prenis al si korpou kaj edzinojn...

Azazel forĝesis sian vojon, la pluvegon, la malaperintajn pramistojn... Li pensis pri la beleco de Abolibah, kiam ŝi atendis lin, sian ĉielan amaton, kiu brilegis kaj aspirois en misteraj sopiroj sur la alta promontoro de l' bordo. Li pensis pri si mem, pri la tempo, kiam la unuan fojon li descendis sur tiun ĉi teron, plena de amo kaj ŝato al la filoj kaj filinoj de l' homoj, preta enkarcerigi sin por ili sur tiu ĉi malgranda stelo, preta suferi la amaran morton, portante donacojn kaj oferon al la tuta mondo, ankoraŭ kun anĝela menso, anĝela sento! Karesan esperon li portis al ĉi tiu stranga raso, kiu naskiĝis el tero kaj Dio. Ho, se kun la profunda kaj varma vivo, kiu doniĝis al la homo, ligiĝus anĝela Forto kaj Saĝo — kio ankoraŭ povus igi la filo de homo:

Kaj nun li rememoris pri Abolibah, kiu krucigis la vojon de siaj planoj — ne pro malboneco, nur pro etanimeco. Kiu retenis lian kompatan manon, etendatan al la homoj, kiuj detranĉis la flugilojn de lia saĝo... Ĉar ĉiu minuto, en kiu lia spirito flugis for, estis malfidelo kontraŭ la Korpo kaj Virino; ĉiu donaco, kiun li donis al aliulo, ŝin malprofitigis, sin kaj siajn infanojn. Kaj — bela estis Abolibah, tiel bela, ke pro ŝi li vidis nenion el la mondo, kiam ŝi stariĝis antaŭ lin. Ankoraŭ nun ŝi estas bela, ĉar malfacile povis venki la Tempo la virinojn de tiu praepoko. Tamen ŝi velkis malrapide, kiel la rozo.

Laodoro de tiu ĉi velkado pleniĝis la domon, plenigis la koron de Azazel. La disipitaj jaroj vice, kun moko adiaŭis la anĝelon, kiu igis homo. Kiom li esperis fari per anĝelforto en homvivo! Kaj kion li faris? Virinajn disputojn li pacigis hejme per la vortoj de sia boneco, siajn ŝafojn li kalkuladis vespere, kaj kontrolis siajn ŝafistojn kaj ŝafarmastrojn, defendis la limojn de siaj bienoj kontraŭ la najbaroj, tage prete atentis la kampan laboron aŭ riproĉis siajn senbridaĵajn filojn. Tiel pasis lia tuta vivo: ĉiam celo, ĉiam ilo: kaj ĉiam por la morgaŭo restis *tiu*, pro kio ĉio ĉi estis inda...

Kaj liaj filoj — la senbridaĵaj knaboj — grandigis...

Nakhor kaj Haran... Jam sciis Azazel, ke ili estas tiuj, ke ili estas tiu granda Morgaŭo, al kiuj ĉio herediĝis, de kiuj oni povas atendi ĉion. Li jam sciis, ke li mem estis nur ilo, lia tuta vivo, lia homeco estas nur ilo; la homeco de l' anĝelo, lia homa amo, estis nur por doni ĉielan forton al ĉi tiu tera raso — el kiu eksveltis tiuj ĉi du gigantaj filoj. Ĉar ne ordinariaj hominifanoj ili estas, sed ĉiela forto ribelas kaj fajras en ili... Kaj ili portas la donacon de l' anĝelo al la filoj de l' homo...

Poemoj

— Saint-Jules Zee —

Folioj falas

Floras purpuro de krepusko.
Surbrance sekfolioj
tremas en sunradioj.
Odor' sentiĝas de la musko.
La somervesto en ĉifono
faleme pendas,
spirĝeme plendas
kontraŭ la morna ĉielfono:
ĉar venis jam la velksezo.

Tuj sonas la vespera horo.
Laŭ sabla voj' ĝardena,
silenta, revoplana,
promenas mi kun peza koro.
Dance, balance en rebrilo
falas foli',
jen du, jen pli,
pieden de plektobarilo,
kie plorkantas sola grilo.

Kaj korvoj inter nudaj arboj
grake aeron ŝiras,
kaj rekviemon diras.
Disfluas nun la morgarboj.
La foliaĵo sur la tero,
nebulmemore
kaj dik-tavole
dormas kun song' pri l' suka ŝvelo
sub tuberoza arba ŝelo.

Aŭtuna meditado

Falis petaloj lastaj de l' somera krono.
La suno, mildokula dronas en medit'.
Tie, ĉi tie pala rozo el sezono
flagretas kiel ombro de malforta rid'.

Mallaŭte, ho mallaŭte, mia kor' batanta!
konvenas nur lulkanto de l' velkinta ĝoj'.
Sed ne bedaŭru, estas ja plezur' konstanta
korfloron trovi sur la reirata voj'.

Kiam hiera ŝaŭm' forflugis en vaporo,
en la pokalo ore brilas eliksir'.
Feliĉo glitas for, pliu vivas la memoro,
kaj vivas eĉ pli vive l' amo sen dezir'.

Kiel surfluta vorto, kiel roz-odoro,
longe ŝvebadas en aero ĉi malmult'.
Kaj pli karesas la spirblovo el tempforo
ol vangofrap' bruliga de vivotunult'.

... Sur naĝanta arbtrunko traveturis Azazel la ŝvelintan riveron... al la transa bordo, kie loĝis liaj filoj. Li estis ĝisbaŭte malseka, sed li jam zorgis pri nenio: la deŝiriginta basko de lia mantelo en la ondoj remis post li. Inundo! inundo! Jam ankaŭ post li nebuligis la bordo: ĉiudirekte vidigis nur akvo kaj pluvo; la pluvofadenoj, kvazaŭ mil pinglopiĉoj, truis, fendis la sonorantajn akvojn. Naĝis, naĝis la anĝelo, kiel stranga makulo en la flava akvo kaj griza pluvo.

Kiom malperfekta estas tiu ĉi malgranda, nubkovrita planedo!... Ha, Haran kaj Nakhor!...

Kaj poste, sur la transa bordrando, ĝis maleolo premiĝis liaj piedoj en la ŝlimon. Kaj poste la arbaro, la mallumo de l' teruraj arboj kovris lin subite. Kia tenebro! Ĉi tie kvazaŭ haltis la pluvego, nur ia sekreta muĝo, sonoro, batado anoncis de supre, ke ĝi ankoraŭ pluvegas kaj frapas sinistre, senindulge la netrapenetreblan foliaron. Kvazaŭ iu seke trairus sub mirinda akvofalo... Kaj dume en la malproksimo sekretaj ĝlitsusuroj, ektimigitaj blekoj. La anĝelo palpante sekvis la trarompitan pasejon de ia grandega besto.

— Ho, Nakhor kaj Haran!... Vi nun trankvile sidas en via arbara domo, sub la cedrotabuloj frapataj de la pluvo; via forto ripozas kaj kreskas en la pluvego, kiel la abundkreska semajo... Via domo certe estas jam preta, el belaj cedrotabuloj: ĝi havas du kornojn, al oriento kaj al okcidento kaj du grandajn kortojn: en unu korno loĝas Nakhor, kun sia virino kaj tridek sklavinoj, en la alia korno loĝas Haran, kun sia virino kaj en la korto troviĝas kameloj kaj muloj. Ĉirkaŭe Haran faris grandan, dornhavan barilon, el pintaj latoj, kontraŭ la sovaĝbestoj, dum Nakhor la dikajn arbotrunkojn hakis kaj pintigis per sia grandega mano. Ĉar gigantoj estas ili kaj ilia menso superas tiun de l' homo: ili elcerbumas utilaĵojn kaj konigas ilin al la filoj de homo...

Tiel meditadis anĝelo Azazel en la arbaro kaj lia animo tranĉviliĝis. Venis en lian kapon la kompatindaj premistoj, kies domon forbalais la kolera rivero kaj lia penso varmigiĝis aŭdaca. Kial ne povus liaj gigantaj filoj konstrui grandajn digojn sur la bordo de l' rivero kaj per sia anĝela forto reteji ĝin en ĝia detrua vojo? Venki la riveron kaj savi la homon kaj la havaĵon de l' homo?

La anĝelo iris pli rapide kaj baldaŭ la arbaro komencis heliĝi antaŭ li. Tie estas la maldensejo, la domo de liaj filoj... Sed tiam mirinda kraketado miksiĝis al la narkota frapado de l' pluvo: kvazaŭ milionoj da serpentoj siblus, aŭ mil gigantoj suĉus la denton. Kaj ĉiam pli proksime ĝi sonis kaj jam estis kiel granda sorĉistinkuirejo: kun bolantaj kaldronoj, kun vivantaj grasoj gutantaj sur la fajron. La anĝelo dispuŝis la branĉojn de la lasta arbeto...

Kaj subite li ekvidis la kaŭzon de la kraketado. Kia vidaĵo ĝi estis! Brulintaj, fumantaj traboj kraketas en la pluvo.

Sub delikata nebulo farita de la pluvo, du trionoj de la belega cedrodomo kuŝis en ruino kaj ardaĵo. La tabuloj kaj kolonoj sardorse unu al la alia, nigre, cindrigite: tie kaj ĉi tie malfermadis ankaŭ malgranda fajreto la okulojn, kiun ne povis estingi la tutsemajna pluvo. Kaj nebulis kaj kraketas la tuto. Jen tie, jen ĉi tie fariĝis la siblanta bruvo momente pli akra — kvazaŭ unu al la alia transdonus la voĉon la varmegaj, turmentitaj arbotrunkoj — jen ĝi mallaŭtigis, fumetis, ŝprucsonis; intersonoris kelkaj grandaj knaloj, fendigoj. Terura batalo de fajro kaj akvo estis tio super la kadavroj de la kompatindaj cedroj.

La anĝelo iris pli proksimen.

Spuroj de detruo vid'gis sur la sendifekte restinta domparto de Nakhor. La barilo rompiĝis, sur la dikaj traboj de la fasado restis blanka la loko de la hakitabatoj. Premiĝis la koro de Azazel. Kia terura malamiko estis, kiu kuragiĝis ataki liajn gigantajn filojn?

Sed Nakhor staris gaje post la aperita pordo. En la mano li tenis fortan vergon, al kiu li ligis elastajn tendenojn faritajn el besta intesto.

— Kio okazis? Kaj kie estas Haran, via frato? — demandis Azazel.



Vidaĵo

el provinco Zeeland

INFANETO

— Janusz Korczak —

Infano estas jam maljuna: havas du subajn kaj kvar suprajn dentojn, pezas dudek tri funtojn kaj laŭ la opinio de ĝia patrino estas plej saĝa el ĉiuj infanoj de la tuta mondo. Patro tamen opinias, ke ĝi estas malsaĝa kiel boto.

Patrino tiel fieras pri ĝia posedo, kvazaŭ ĝi estus ŝia propra, al neniu antaŭe konata elpenaĵo, kiun oni devas patentigi, provizi en numeron kaj doni al la amerika kapitalistaro por plua ekspluato. Vere estas ke ankaŭ aliaj virinoj havis jam infanojn, sed tiu ĉi estas tute alia, ege perfektigita, neimitebla kaj malsimila al la ĝis nun ekzistantaj etuloj.

Etulo sidas sur patraj genuoj, tiradas lian barbon, penas kapti la legatan de li ĵurnalon.

— Ne malhelpu, — murmuris la patro, formetante de sur la ĵurnalo la manojn de infano.

Infaneto flankentiras kapon kaj alrigardas scirole la patron. — Bona ombro, klinita super makulo, havanta koloron de lakto.

Kion faras bona ombro?

Infano miras per larĝe malfermitaj okuloj, per iom malfermita buŝo kaj per malrapida spirado.

— Diru al mi, — ĝin demandas fine la patro, formetante la ĵurnalon — kia estas via opinio koncerne la hodiaŭan politikon?

Infano tiras ŝureton de la patra nazumo kaj respondante: «grr... mfff... vaua»-salletas pro granda guo.

— Ah, karulo mia, vi havas nenian ideon pri politiko.

Infano detiras la nazumon, suprenlevas la manojn kaj diras kun tono de konkeranto:

— O-o-o-o!

Kaj patrino sin turnas al patro:

— Jetu for tiun ĉi abomenan cigaredon: vi brulvundos la infanon.

— Ah, etulo, etulo, kiel granda stultulo vi estas — diras patro.

Infano baldaŭ komencis murmurati kaj de sur la genuoj de patro iris en la manojn de patrino.

— Infaneto mia, — ŝi plendas — oni ofendas vin, insultas, neniu estimas vin.

Infano viŝas la nazon per pugno.

— Karulo mia, la nazeto jukas al vi. Paĉjo en-

fumis en la nazon. Diru: «fi-paĉjo», minacu al li sur la nazeto.

Etulo ekmurmuris duan fojon iom pli energie kaj patrino rapide enkuris kun ĝi en apudan ĉambiron.

Jes, jes, — infano estas jam maljuna.

Malgranda infano kun siaj ses dentoj kaj dudek tri funtoj tiel multe jam travivis, ke ĝia pasinteco povas esti temo por kelkvoluma rakonto.

Kelkvoluman libron pri suĉinfano neniu volus legi, eĉ neniu volus presigi.

Do mi decidis pri infaneto skribi nur malgrandan rakonton.

Mallumigu iom la lampon kaj legu malrapide, mallaŭflustre, ĉar mi parolos pri sekreta kaj mirindaj-plena antaŭhistoria praepoko de infana vivo.

*

Jam estis tiel, kiam Dio apartigis lumon de mallumo kaj akroĉis stelojn, ĉiun sialoke kaj ligis ilin per nevideblaj fadenoj de reciproka pezoforto. Tiel estis, kiam mondoj naskiĝadis el haoso: ne, la mondoj eĉ ne naskiĝadis ankoraŭ, ekzistis nur penso krei ilin, aŭ eble eĉ penso ne ekzistis. Vagadis koloroj kaj sonoj — estis nek vivo, nek spaco, nek tempo. Momento egalas al jarcento. Estis nenio. Ekzistis nur estonteco, se estus demando aŭ antaŭseno de estonteco.

Kaj tamen...

Aŭdiĝos forta voĉo, ordonanta al la disigintaj atomoj kuniĝi, rezigni de si mem. Kaj estos fulmo kaj pluvguto kaj mistera kristalo, — kaj farigos mirindaĵo: vivo.

Estos vivo de kreskaĵoj: kverkoj jetados semojn por kreskigi filojn, kiam la korpoj de la patroj putriĝos aŭ kiam fulmotondro frakasos iliajn branĉegojn.

Estos vivo.

Estos homo, deziranta diveni la misteron de vivo, homo — mirinda kreaĵo.

Estos...

Dume sekreta kaj mirindajplena mistika nokto.

Estos...

Infano en fulmo de gravediĝo jam estas granda mirindaĵo.

Oni diras, ke infano ne estas ankoraŭ, ke ĝi estas venonta. Ĝi estas enskribita en nenian libron de la kvartalo, neniu vidis ĝin, eĉ ne patrino mem — omŝi atendas ĝin, tamen ĝi jam de longe estis kaj estas.

— Ho, patro, goju pri la venko de via filo — respondis Nakhor ekvinte la okulojn. — Haran fuĝis malproksimen en la arbaron; lian domon mi bruligis kaj liajn servistojn mi mortigis. De semajnoj mi devis batali kontraŭ multaj homoj; kaj mi lasis mian propran domon al la fajro, por ke mi vidu bruli la lian. Ja ankaŭ li preparis sin kontraŭ mi, sed li ne povis min venki. Nun mi brakumas lian virinon, kaj li, kiu volis forpreni la mian, nun fuĝas kaj jen per mia angela menso mi fabrikis pafarkon, ke mi povu lin persekuti.

Kaj maltrankvile li rigardis al la ĉielo.

— Ĉi tiu pluvo moligas la tendenon de mia pafarko. Diru al mi, mia patro, se vi scias, kio estas la intenco de l' Ĉielo?

Azaziel ne respondis. Liaj okuloj ghuĝis al la haladzantaj ruboj, sur kies supro li malkovris aron da homaj kadavroj. La akvo de l' pluvo disfluis sur la kadavroj kaj grandaj, malbelaj, hundspecaj bestoj

flankumis ĉirkaŭ ili. El la domo aŭdiĝis, ke la servistoj de Nakhor akriĝas pezajn ŝtonhakilojn kaj en la pordo staris la giganto, la Filo de l' Angelo, kaj fabrikis sian pafarkon per angela menso kaj giganta mano.

— Ho patro! — li kriis. — De vi mi ricevis ĉi tiun lerton. Mi havos armlon, kian ankoraŭ neniam havis mortemulo!

Dume ankaŭ la fuĝinta Haran preparis sin en la arbaro. Kaj la pluvo falegis, malrapide, monotone, senfine: en riveretoj verŝiĝis el inter la kraketantaj traboj, faris lagojn sur la maldensejo, defrapis la foliaron de l' arboj. Azaziel rigardis al la ĉielo; ho, se ankoraŭ unufoje li povus flugi supren, kiel iam, se li povus iĝi libera kaj pura animo! Li rigardis al la ĉielo, al la pluvanta ĉielo.

Kaj nun jam li komprenis la intencon de Dio.

El la hungara: *Lali Blond.*

Gia koro jam komencis laboron, kiu neniam finiĝos, ĉar tiun ĉi laboron infano cedos al sia filo, nepo kaj pranepo, samkiel al infano cedis ĝia avo kaj praavo.

Vi diras, ke infano, kiu ankoraŭ ne estas, havas tiom kaj tiom da semajnoj, da monatoj. Vi pravas, tamen vi eraras. Ĝi estas por si mem, ĝi ne konas vian horloĝon, nek vian kalendaron — ĝi ĉiam estis kaj estas.

Ne nur pro tio vi eraras.

Ĝi vivas ne iajn viajn monatojn aŭ semajnojn. Ĝi vivis jam inter miliardoj da disĵetitaj polvoj en mondo, kiam aŭdiĝis krio: »Al Bastille!«, ĝi vivis, kiam popoloj larĝonde fluis por repreni de la paganoj tombon de Kristo, kiam oni flor kronis frunton de Sofoklo, kiam sklavoj, skurgataj per bategoj, konstruadis pompajn maŭzoleojn de faraonoj. Ĝi vivis ankoraŭ pli antaŭe, ĉar ĝi atendis sian naskiĝon milojn da jaroj.

Ĝi vivis en muskolo de urso en malproksima nordo kaj en eterne verda palmfolio de varmego sudo. Hej, kiom multe vojaĝis nia etulo, antaŭ ol ĝia koro la unuan fojon ekbatis.

Ĝi estis jam antaŭ multaj, multaj jaroj — ĝi vivis en plasmato de amebo, ĝi ekzistis jam en la haoso, el kiu Dio kreis stelojn, alkrōcis ilin sur ĉielo kaj fortigis per nevideblaj fadenoj de reciproka dependo.

— Tik tak, tik tak — batas koro de infano.

Obtuza, mallarĝa monotona murmuro kaj longa, senfina vojo de penso...

Por atendata infaneto oni pretigas vindaĵojn.

*

Infano eksentis doloron kaj spertis grandan timon. Ĝia doloro ne estis, kiel la nia, konscia, matura, elprova. Tio estis la unua tiel granda doloro.

Infano eksentis ion pezegan, similan al tio, kion oni travivas dum inkuba sono, kiam vi subite komencas ĝemi. Oni vekas vin kaj demandas: »Kial vi ĝemas?« kaj vi respondas: »Mi tute ne ĝemas: aŭ: »Mi ne memoras, mi ne scias.«

Kiam dum nigra nokto fremda mano kaptas vin je gorgo, pro timo vi vidas nenion, vi havas nur sufokan krion en brusto.

Tia estas la unua spiro de etulo, tia estas tiu ĉi unu momento, — unu, kiel morto. Pastro-doloro edziĝas malgrandan homan estaĵon kun vivo.

Infano kaptas per pulnro aeron kaj, tremante, komencas vivi memstare, je propra respondeco.

Metu fingron sur buŝon kaj silentu, ĉar vi vidas mirindaĵojn. Penu fari kiel eble plej malmulte, ĉar vi ne scias, ne komprenas. Vi ĵetos en vian penson unu dubon kaj elkreskos densa demand-arbaro sen respondejo.

Malvarme estas al etulo, malbone...

Oni preparas jam por ĝi kamomilon, oni alportas el apoteko diversajn pulvorojn kaj onklino demandas per telefono:

— Knabo aŭ knabino?

*

Etulo havas du sonojn: unu nigran kaj senvivan kiam nenio fariĝas, alian brunan kaj mallarĝan, kiam fariĝas io...

Profunda nokto, malproksime al tagiĝo. Vi kuŝas kun malfermitaj okuloj kaj rigardas. En via dormo-ĉambro, tie estas ĉiuj objektoj, sed ili komencas eligi el la duonlumo ne pli frue, ol kiam tagiĝas.

Vi staras apud freŝe semita kampo. Selo de grajno ne ŝvelis ankoraŭ sufiĉe, sed en la grajno kaj en la

tero fariĝis multe da mirindaĵoj kaj multe da ili ankoraŭ estos, antaŭ ol vidiĝos verda hoketo de ĝermo.

Etulo havas sub kranio, en cerbo strangajn papiliojn, teksitajn el majstra ŝpinaĵo, sur kiu moviĝas koloraj bildoj. — Etulo pensas. Kaj dormate, pretiĝas al longdaŭra batalo kun ĉirkaŭantaj ĝin misteroj, de kie fluas bono kaj malbono.

Bruna sono de infaneta maldormado estas du-speca: unu, kiam fariĝas io bruta kaj malbona, alia — kiam fariĝas io kvieta kaj bona. Kaj infano kuŝas trankvile aŭ krias, Ĝi ne ploras, ĉar ĝi ne havas ankoraŭ larmojn.

*

Patrino kliniĝis super la lulilon, ŝi serĉas jam en infano prudentan penson.

— Rigardu, karulo, patrinon.

Etulo turnas la senharan kapon en la direkto de la patrino brusto kaj komencas suĉi, serĉante la bruston per lipoj. Ĝi eksentis varmon de patrino parolado, volas buŝe trinki sian amon.

Alifoje, iom poste, sur kusenon falis varma sunradio. Infano komencis serĉi ĝin kaj movis lipojn, ĝi volis kapti sunbruston, ĝi volis trinki la sunon.

Alifoje, multe pli poste, kiam vartistino kantis lulkanton, infaneto volis trinki kanton.

Kaj patrino jam hodiaŭ serĉas en ĝi prudentan penson...

Infaneto scias nenion ankoraŭ, eĉ ne suĉi: jen ĝi rapidas, jen suĉas dormeme, faras longdaŭran paŭzon, jen movas mallerte la kapon, perdas ia bruston, koleras kaj suferas.

Tiel defalas laborilo el mano de mallerta laboristo, tiel junulo en la unua balo mallerte preteriras dancantajn parojn, tiel malsperta poeto pene faras rimojn.

Etulo manmovis, streĉiĝis, ektemis — ĝi havas kapablon de movoj, sed en ili ne estas ankoraŭ pensoj. Tamen etulo scias digesti la konsumitan nutraĵon, kreski dank al ĝi, scias pli bone, ol plej majstreca maŝino preparita per homa mano, sed scias malpli, ol kokido, kiu apenaŭ eligiĝinta el ovo, jam postkuras la patrinon kaj bekas grajnon; malpli ol eta insekto, iranta malrapide kaj prudente sur folieto de arbara planto.

*

Infaneto kuŝas en sia liteto seka, sata, kontenta — kvieta dormemo ĝin ĉirkaŭas. Ĝi palpebrumas, levas la palpebrojn pene, sulkiĝante la frunton kaj kurbigante la buŝon. Ĝiaj okuloj sin turnas senorde diversflanken, ĝi ne kapablas ankoraŭ rigardi.

Infaneto luktas kun dormemo, kiel prezidanto de nova kunveno, daŭranta tro longe. Kaj ĉirkaŭe murmuroj, tonoj, flustroj, sonoj; kaj ĉirkaŭe briloj, ombroj, makuloj, koloroj kaj tonoj kvazaŭ en nebulo.

Subite fariĝis io neatendita. Infaneto travidis. Ĝi vidas.

Griza tagiĝo desegniĝis unuajn malklarajn konturojn de belega bildo. Etulo ekmiris, ekĝojis, ektemis kaj ekdeziris sci.

Iam, antaŭ longa, longa tempo, la homo, per la unua mallerte konstruita teleskopo, direktis al la steloj rigardon plenan de demandoj, rigardon jam fieran kaj ne humilan. Li travivis momenton de ekstazo, li travivis jarcentojn de malesperoj, luktoj kaj malĝojoj.

La unua konscia sento: mi volas sci, la unua sanga rigardo, la unua doloro pro perdo de tio, kio ne estis nutraĵo, tamen necesa por vivi.

Etulo ree ne vidas, estas nokto. Ĝi komencis

plori: patrino alvokis la vartistinon, opiniante ke ĝi malsatas.

Si eraris: tio estis la unua ploro de infano ne furo tio, ke ĝi estas malsata, ne pro tio, ke la vindo kunfaldigis, sed pro tio, ke ĝi perdis nekonatan mondon. Jen ĝemkrio de malpacienca, de elreviĝo post momento de fiera suprenleviĝo. Tio estis belega, kaj malaperis, kaj ne estas plu. Krio, protesto kontraŭ spiritsenforto.

Sed infano komencis avide suĉi, surdigante la pizitan doloron, la koran bedaŭron post perdo de satinda ideo: ĝi faris la saman eraron, kiel ĝia patrino.

*

Onklino kliniĝis super la lulilon, ŝiaj okuloj renkontiĝis kun la serioza, esplotema rigardo de infano.

— Beleta infaneto, — diras onklino al patrino — ĝi havas vian buŝon kaj la okulojn de via edzo.

Si kliniĝis ankoraŭ pli, kisis la etulon.

Ĝi ekremis timigita.

Onklino hontis la kison kaj la timon de infaneto.

— Bedaŭrinda etulo, — ŝi diras — via menso dormas ankoraŭ.

La menso de infaneto dormas?

Neniu homa menso en neniu vivepoko prientatas tiel zorgeme, kiel tiu de infaneto. Se la homa menso ĉiam tiel dormas, ĝi havuŝ ĉielatingan penson kaj la universo paliĝus pri siaj misteroj.

La menso de infaneto multe laboras en silento: kaj la hodiaŭo tute ne similas la hieraŭon.

Se vi starigos ĉe maŝinkonstruaĵo en tutmonda ekspozicio, tremo, bruego kaj radturniĝo mankiĝos la spiron al vi: sed kio ĝi estas kompare kun la laboro de milionoj da motoroj, radoj kaj transmisiroj en la cerbo de infaneto.

Infano rigardas kaj pensas, pensas per plej mistera kaj plej viva parolo, sen vortoj — per parolo de bildoj, komuna al ĉiuj infanetoj de la tuta mondo kaj al ĉiuj vivaj kreaĵoj. Ĝi amasiĝas kaj vicigas bildojn, kreas materialon por konstrui simblon homan parolon, en kiu ĉiu bildo havas propran tonon kaj propran animon, bonan aŭ malbonan, amatan aŭ malamatan.

Infano malĝojas, ĝojas, miras, timas, demandas kaj deziras. Ĝi ligas etajn rememorojn de antaŭ horo kun dormo de hieraŭa tago kaj kunplektas ilian tekstajn kun nokto, kiam Dio pendigadis stelojn sur firmamenton. Ĝi fulme trakuras centjarojn kaj miljarojn de evolucio de homa penso. Baldaŭ ĝi superos la plej sagacan beston kaj kvankam ĝi estas fizike malforta, senkonsila en la vivo, ĝi komencas fratiĝi kun la genio de la homa gento.

*

Ni interparolu, infaneto.

Suno falas sur vian etan, ĉarman kapon.

Via rigardo diras, ke vi estas jam homo.

Bedaŭrinda, kiel mi kompatas vin.

Ĉar ne ekzistas pli granda malfeliĉo, ol naskiĝi homo.

Kial, se vi devis esti vekita al vivo, vi ne iĝis floro?

Kial vi ne naskiĝis papilio?

Kial ne birdido de arbara kantintino?

Ju pli alte, des pli malgaje...

Homoj deziras scii.

Infaneto, kiom da doloro estas en serĉado de kaŭzoj, celoj, vojetoj, vojoj.

Kiom da doloro...

Cu vi kredas, infaneto, ke iam?... Aŭ ne, ĉu vi opinias, ke iam?... Ne, ne.

Jam nenion, nenion plu mi diros...

Vi sulkigas la frunton?

Ne ploru, infaneto. Venos malgrandaj maljustaĵoj, ne valoras plori. Venos grandaj maljustaĵoj, vi estos jam forgesinta plori.

Kaj generacioj fluas, fluas...

Vi ridetas, infaneto, vi ne kredas? Vi pravas. Tiun ĉi vojon oni devas trairi mem, al neniu oni devas kredi.

Vi pravas...

*

Infaneto pendigita en la universo kiel stelo. Infaneto ne ekzistas ja por si mem; ĝi ekgratas sin per sia propra ungeto kaj krias. Ĝiaj manoj, piedoj kaj kapo — jen malproksimaj kontinentoj de ĝia konscio; jen malkovroj de malproksima estonteco.

Ekzistas nur eta fajrero de infaneta penso, fajrero tiel forta kiel tiu, kiu povas kaŭzi brulegon.

Infaneto havas larĝe malfermitajn okulojn, rigardas kaj esploras la ĉirkaŭantajjn ĝin ombrojn. Ĝi ne rimarkas senmovajn makulojn, sed nur tiujn, kiuj ŝanĝas la formon, kiel la nuboj.

Infaneto estas stelo, esploranta la ŝanĝeblajn formojn de la nuboj.

Ĝi kuŝas surdorse kaj ĉirkaŭe la ombroj: patrino, vartistino — malhelaj makuloj sur hela fono. Ili suprenleviĝas en la spaco, malsuprenleviĝas kaj ie malaperas.

(Etulo, sidante sur brakoj, devos alikonstrui la tiel laboreme kreitan mondkoncepton).

Ekzistas pensoj, sentoj de etulo — ili estas sen komparoj, ĉar ne estas ankoraŭ rememoroj. Estas nur esplora penso.

Ĉirkaŭe moviĝas nuboj. El inter ili infano eligis nur unu solan: ombron, kiu plej ofte aperas, ombron, kiu ne ŝanĝas la formojn, ombron, kiun oni povas bone pririgardi, ĉar ĝi ne malaperas tiel subite, kiel ĉiuj aliaj. Ĝi estas frata ombro, kiu ne forlasas etulon. Kun ĝi etulo sentas sin malpli solece. La ombro — la unua instruisto de infaneto —: ĝiaj propraj manoj.

Simile al ĉasisto, kiu antaŭ ol paŝi malproksiman ĉasbeston, lernas celi botelon pendigitan sur ŝnureto, infaneto, helpe de vido, celas kapti siajn proprajn manojn.

Ĝi faras en silento longdaŭrajn kaj penegajn studojn: ĝi lernas rigardi, lernas memori, lernas ekoni.

Oni ne devas ligi forte la manojn de infano, ĉar ili estas bezonataj al ĝi.

(Finota)

El la pola: Halina Weinstein.



Amsterdam

Reĝa palaco

LA PROJEKTO

— R. Rosefi —

Ruk sentis mildan tuŝeton sur sia ŝultro. Li turniĝis kaj renkontis la senŝancelan rigardon de Alek. Ruk sentis sian koron ŝveli per varma emocio, kiu momente nebuligis liajn okulojn. Li diris: »Hallo, Alek.« Per tiu simpla parolo rompiĝis dujara silentado.

»Sciu, Ruk,« diris Alek per ligna tono, kiun la alia tamen bone trasentis. »Estas sence, permesi, ke du virinoj tiel disigu nin. Inter ili estis la kverelo, ne inter ni!«

»Vi pravas, Alek,« diris Ruk per voĉo, kiu preskaŭ kveris pro emocio. »Kaj vi estas tre bona, ke vi bonvolas forgesi la ofendon, kiun mi estis sufiĉe stulta partopreni kontraŭ vi. Miaflanke, mi jam sincere pentis tion, kaj neniel povas pardoni aŭ min, aŭ... ŝin. De ŝi mi estas jam disiĝinta — vi jam aŭdis, ĉu ne?«

»Cu vere? Ne, mi ne aŭdis. Miaflanke, mi rompis kun la mia, kaj sciu, jam ofte mi sopiris al nia malnova amikeco. Kial ĉi ne kuniru do, kiel en la bona pasinteco?«

La suno, rigardante trans la randon de nuboj, eklumiĝis la vizaĝon de Ruk kaj jetis oran nimbon ĉirkaŭ la blondan kapon de Alek dum la du eksamikoj etendis la manojn je firma premo.

»Cigaredon?« proponis Alek senprinpe, tuj kiam li kaj Ruk sidigis sur molaj herbotufoj: tiam. — »Ho, pardonu, vi ankoraŭ ne komencis la malbonan kutimon, ĉu?«

»Ankoraŭ ne« ridetis Ruk. »Kontraŭ la sendube ĉarma fraŭlino Nikotino mi ŝajne estas imuna.« Li kliniĝis kaj prenis ŝtoneton, kiun li jetis senokupe kontraŭ la flavan kapon de leontodo, flamanta aliflanke de la vojo.

Alek klakfermis sian cigaredujon kaj eliris sian pipon. »Nun estas okazo por la pipo, mi pensas,« kaj li metis ĝin inter la dentojn kaj komencis zorge ĝin plenŝtopi.

»Diablo prenu,« li grumblis, kiam la pipo fine bone iris, »Al mi jam doloras la piedoj post tiu kvar-mejla promeno! Mi forte dekutimiĝis de la marŝado lastatempe.«

»Kaj nun vi devos rekuŝiĝi,« diris Ruk, ĉar vi jam diris, ke via motorbiciklo kuŝas en pecoj ĉe Alington, post via lasta akcidento.«

»Jes,« ekgemis Alek. »Ankoraŭ mi ŝuldas dek funtojn pri ĝi kaj la tuta ruino valoras eble du... Do, okfanta ŝuldo, kaj plie la neceso akiri novan 'ciklon', ĉar tio jam fariĝis io nereziĝebla por mi. Se nur estus rapida maniero enspezi iom da mono!«

»Se nur estus!« reĥis la alia. »Ankaŭ al mi la financo malbonstatas. La rento al la edzino formanĝas signifan pecon de mia salajro, sciu, kaj ĝuste nun estas a' mi iom malvaste en la poŝo...«

»Neniam trafinte en edzan staton,« sentencis Alek, suĉante ĝueme sian pipon, »mi estas libera almenaŭ de tio. Kaj tial mi eĉ kompatas vin, des pli, ĉar vi ne konas la konsoladon de la antaŭe aludita ĉarma fraŭlino Nikotino.«

»Al la diablo via fraŭlino Nikotino,« rebatis Ruk, pafante duan ŝtoneton kontraŭ la senkulpan leontodkapon. »Kiel ĉiuj siaj samseksanoj ŝi scias nur kaŭzi pli da elspezo al la viro. Profiton el ŝi faras nur tiuj, kiuj ŝin disvendas.«

»Aŭ kiuj sagace prenas ŝin kiel temon de verko,« korektis Alek. »Vi ne forgesu J. M. Barrie, kies libro certe havis bonan disvendon.«

»Do bone,« akceptis Ruk, »Kial vi ne povas fari tion saman? Jam vi havas sperton pri la pipo kaj cigaredoj. Kial ne verki, se ne libron, almenaŭ artikolon?«

Alek rektigis sian korpon ĉe tio. »Estas strange, ke vi diras tion, ĉar mi ja provis ion similan. Mi faris serion da notoj pri la plezuroj kaj tekniko de pipfumado, kaj intencis iam elabori ilin je artikolo. Sed ĉi tro malfidas mian lingvoposedon por komenci tiun el-laboron. Se vi vere interesiga, kial vi ne rigardu ĝin, kaj se vi opinias inda, disvolu mem mian skizon? Ĉe eventuala akcepto, ni dividus la honorarion.«

»Eh, kion mi scias pri la pipfumado, aŭ pri la fumado entute,« diris Ruk, malŝate kraĉante. »Tamen — el pure komerca vidpunkto, via propono estas riprensinda. Jes, mi pensas, ni povas iri al vi kaj almenaŭ esplori la eblajon.«

Vigle jetita ŝtono enpovigis la bantan kapon de la leontodo.

»La mondo estas mia ostro,« citis O. Henry, »Kiun mi per mia glavo malfermos,« — kaj li aldónis, ke kvankam per glavo estus facile malfermi la sukun bivalvon, malfermi ĝin per skribmaŝino estas jam alia afero... Nu, ni tamen provu!« Ruk kunfrotis la manojn kaj ĉirkaŭrigardis la ĉambretan de Alek.

»Jen estas la krudaj notoj,« diris Alek, iom fosinte inter la paperoj, kiuj kovris lian labortablon. »Legu, kaj diru vian opinion.«

Regis silento dum kelkaj minutoj. Alek fiksis folion da papero en la skribmaŝinon kaj atendis. Fine li oscedis kaj turnis la kapon al la silenta Ruk. »Kiomfoje vi legos ĝin?«

»Nur unu fojon, sed zorge,« diris Ruk malrapide. »Tio ĉi estas konciza, riĉenhava... jes, mi opinias, bona. Tamen mi pensas, ke estus utile ĝin plivastigi.«

»Ho, nepre: mi ja fidis al vi por tiu pulgigado!«

»Mi pensas, ke tie ĉi ni havas materialon ne por unu, sed por kvar artikoloj, nome: la unua, pipo kontraŭ cigaredo; — la dua, la elekto de la pipo; — tria, la elekto de la tabako; — kaj kvara, la tekniko de ŝtopado kaj fumado, kun kelkfaza finpeco.«

»Do bone,« Alek tiris la seĝon pli proksimen al la skribmaŝino, taŭzis la harojn per karakteriza gesto de la dekstra mano, kaj pretiĝis por maŝinskribi. »Diktu!«

»Dio benu vin!« ridetis Ruk indulge. »Cu vi pensas, ke mi povas kanti laŭ la mendo? Mia kapo estas tro malrapida, mi forte timas! Permesu, ke mi intervjuu vin. Pri pipoj mi estas profanulo, necesas, ke mi lavu ankoraŭ kelkajn notojn — poste mi elaboros la kvar artikolojn en la daŭro, ni diru, de tri-kvar tagoj.«

»Laŭdezire,« Alek sternis sin sur la tapiŝon, tiris kusenon sub la kapon kaj bruligis cigaredon. »Pafu.«

»Iom malfacile, tamen...« Ruk foliumis sian notkajeron. »Kio, laŭ vi, estas la respektivaj pretendoj de cigaredo kaj pipo?«

Alek profunde tiris sian cigaredon kaj blovis la fumon supren al la plafono.

»Cigaredo, mi opinias, estas bona por nerva laboro. Ĝi donas tujan stimulon, tujan satigon al la postulo de la apetito. Pipo, nu, ĝi estas pli ripoziga. Ĝi donas trankvilon, profundan kontenton. Ĝi konkordas kun bona libro kaj agrable brulanta fajro.

Ĝi konkordas kun ĝardeno, kun la paca naturo, la sunsubiro kaj malvarmeta krepusko...«

PASPORTO

— Carl Franzmann, Groesbeek (Nederlando) —

Estis precize kvarono post la kvara, kiam la librotentisto Fritz Asbach forlasis la kontoron; zorge li tenis la plenan monpoŝon de la banko sub la dekstra brako. La poŝo enhavis 35 milojn da nederlandaj guldenoj! Ne pli nek malpli! Nemiam en sia vivo li portis tiom da mono! Al la ĉefkaso li devis porti tiun sumegon. Ĉu devis? Ilustris en liajn orelojn la tentanto. Ho, kio okazus, se li hodiaŭ ne farus sian devon?

Granda batalo inter devo kaj maldevo boladis momente en lia animo. Malhonestaj perspektivoj, fariĝi ŝtelisto, bankrabisto! Sed la mono la malbenita mono en la poŝo, ekscitis liajn pensojn. Kial nomi tion «ŝteli» plej bone oni dirus: pruntepreni!

Vere, 35 miloj da guldenoj estus la granda bonŝanco en lia vivo. Io simila okazas nur unu fojon, la okazo devas esti kaptita. Kaj nun, kion fari? Fulmrapide iri hejmen kun la rabaĵo, poste fuĝi for el Nederlando, fari en eksterlando grandajn aferojn per la rabita sumo, kaj tiam, post la sukceso, redoni la ŝtelitan sumon al la banko. Jes, bone, bone, ankaŭ aliaj homoj antaŭ li faris la saman. Volonte Fritz Asbach aŭskultis la voĉon de tentanto.

Post kelkaj momentoj estis prenita la granda decido. Li diris al si: mi estas sola en la mondo. Familion mi ne havas. Feliĉe, ankaŭ la pasporto estas orda. Do, mi riskos la aventuron. Rapide estos bruligita la monpoŝo en la forno hejme. 20 minutojn post la kvina iros la ekspreso al Germanujo; ĉirkaŭ la sepa li jam estos en Emmerich...

Subite estis preta la plano en ĉiuj ĝiaj detaloj. Temis nur pri ekzakta plenumo, temis nur pri rapideco; ĉio alia estus tempoperdo.

Aveninte hejmen, feliĉe la dommastrinon li ne trovis tie. Bonŝanco. Baldaŭ la bankpoŝo fariĝis viktimo de fajro. Tiam li apartiĝis lerte la bankbiletojn en samgrandajn amasetojn, zorge dispartigante ilin en siaj poŝoj. Subite kunservante kelkajn bezonaĵojn por la granda vojaĝo, li ĵus intencis forlasi la domon, kiam li aŭdis sonori ĉe la pordo.

Ĉu policistoj? Estas ja neeble! — Denove sonoro! Diablo! Konsterne li rigardis tra la kurtenoj de la fenestro. Li ekvidis la najbarinon, kiu en ĉi tiu ĝnomo malfervis la pordon. En la koridoro aŭdigis paŝoj. Kaj nun li ekpensis pri la malfermita pordo koridora.

«Fritz, ĉu vi estas hejme?» Ho, estis la voĉo de Henriko Langebak, bona amiko! Kion li deziras en tiel malkonvena momento?

«Bone.» Ruk seke kapklinis kaj rapide notis. «Nu, pri diversaj pipopecoj. Ĉi tie vi mencias la mersaŭman pipon, la erikan, kaj tiel plu. Kiaj estas la respektivaj meritoj de tiuj pipoj?»

«La mersaŭmo havas gloran tradicion kaj multajn fervorajn adeptojn. Oni fabrikas ĝin el ia mineralo, nomata mersaŭmo, minata en Maroko kaj Malgrandazio. La materialo estas nature sorbema, kio donas al la pipo la econ de malhumida, dolĉa fumado. Bona mersaŭmo, bone trafumita, estas ja malfacile superebla; fiera estas ĝia posedanto, zorgega li estas pri sia amala pipo kaj pri la ujo, en kiu li flegeme ĝin konservas...» Pli kaj pli li pensis pri la kvar artikoloj, kiuj ja

Lace-pace fluis la voĉo de Alek. Onde suprenstris de li la fumserpento. Gratgratis la kraĵono de Ruk,

Silentu, diris Fritz Asbach al si mem, trankviligu, nenion li devas scii! Henriko ja estas tre nervoza homo, precipe de kiam li konatiĝis kun fraŭlino Relling. Sin streĉe regante, Fritz Asbach diris al la alveninto:

«Halo, Henriko, kiel vi fartas?»

Sed la nervozulo ne povis respondi. Kiel persekutata tigro li mute tramarsis la ĉambron, tien kaj reen... tien kaj reen. Alrigardante la vizaĝon de la vizitanto, Fritz Asbach pensis: Ĉiam denove la sama kanto. Certe denove li kverelis kun fraŭlino Mariano, kiel kutime, kaj nun li venis peti konsilon. Estus certe plej bone, rompi la fianĉcon!

Fine Henriko demandis:

«Ĉu vi preparas vojaĝon, Fritz?»

«Kial, Henriko.»

«Nu, via pasporto kuŝas tie sur la tablo.»

Fritz momente ektemris, sed poste li penis rideti je Henriko.

«Ho, estas mia kutimo. La pasporto min neniam forlasas.»

Foliumante en la paslibreto, Henriko subite diris:

Rigardu, Fritz! Nia simileco estas vere stranga.

Vizaĝo: ronda. Koloro de okuloj: blua. Koloro de hararo: nigra. La priskribo de via fizionomio estas precize sama kiel tiu notita en mia propra pasporto. En kazo de bezono oni povus uzi la saman pasporton por ambaŭ personoj.»

Sed Fritz Asbach ne atentis ĉi tiun babiladon, grumblyante nur:

«Estas egale; tio min nun vere ne interesas.»

Ankoraŭ ne sciante la kaŭzon de la vizito, li nun demandis:

«Ĉu io ne estas orda, Henriko? Ĉu kverelo kun Mariana?»

Ĉe tiu demando fariĝis terure pala la vizaĝo de Henriko Langebak. Fine li balbutis:

«Fritz, mi bezonas monon! mi ne povas atendi! Mi bezonas 100 guldenojn! Ĉu vi volas pruntedoni ilin al mi?»

Post mallonga meditado enmanigis Fritz al la demandanto kvar biletojn po 25 guldenoj. Certe Henriko devas fari donaceton al lia karulino. Danke akceptante la sumon, Henriko Langebak rapide foriris.

Kaj nun, Fritzeto mia, estu prudenta! Singarde li rapidis al la centra stacio. Li prenis bileton por la dua klaso, tute ne por la unua. En la vagonaro vakis an-

notante ĉion esencan en sia notkajero.

Pasis kvar tagoj. Alek estis ĵus vizitinta la motorbiciklan agenton: dolorsente li elpoŝigis el sia malgrasa monujo plian funton al la kosto de la detruita maŝino. signifus (ĉe eventuala akceptiĝo) almenaŭ tri funtojn da enspezo, dividotajn inter li kaj Ruk. Jam li malpaciencaj porti la projekton al ĝia fino; kun des pli da ĝojo, do, li ekvidis sur la strato sian amikon. Ruk pasis vikle, lia vizaĝo radiis pro interna feliĉo. Li svingis la manon je saluto.

«Nu,» diris Alek, post la intersalutaj vortoj. «Ĉu vi jam verkis la kvar artikolojn?»

«Ne, karulo, ankoraŭ ne. Sed vidu — Ruk ekscite fosis en la ampleksa poŝo de sia palto — kian belegan mersaŭmon mi ĵus aĉetis!»

La lupo de mezmontaro

Ma Ĝung-ŝi, Ming-Dinastio (1360—1634) —

Vicgrafo Gian de Jaoujo ĉasegis ĉe Mezmontaro. Casistoj iris antaŭe, agloj kaj hundoj sekvis, kaj senombraj rapidaj birdoj kaj sovaĝaj bestoj falis mortaj ĉe la pafado de sagoj. Sur la vojo oni renkontis lupon, kiu home stariĝis kaj kriis. Vicgrafo Gian tuj saltis sur ĉaron, streĉis sian bonan pafarkon kaj pafis sagon profunde en la korpon de la lupo, kiu kriis kaj forkuris. Vicgrafo Gian koleriĝis kaj kurigis la ĉaron por ĝin persekuti. La kirlita polvo vualis la ĉielon, la piedbato tondradis, oni ne povis distingi la homojn kaj ĉevalojn eĉ en la distanco de dek paŝoj.

Tiam venis al Mezmontaro moisto¹⁾ Sinjoro Duno por servi en la registaro. Li rajdis azenaĉon kaj portis librojn en sako. Frue voligante, li perdis la vojon. Li vidis la polvon kaj timiĝis.

Subite la lupo alvenis, kaj, etendinte la kapon, ĝi lin rigardis kaj diris: «Ĉu vi intencas savi kreitaĵon, sinjoro? Siateme Mao Bao liberigis testudon kaj poste povis transiri riveron rajdante sur ĝi, kaj Markizo de Sueiujo savis serpenton kaj dank' al ĝi li ricevis perlon. Testudo kaj serpento ne estas pli diaj ol lupo. Nun, kial vi ne tuj ensakigas min, ke mi evitu mian malbonan sorton? Se mi povus denove eligi, vi ja revivigus mortinton kaj donus karnon al skeleto. Ĉu mi povos ne rekompenci vin, kiel la testudo kaj la serpento?»

La sinjoro diris: «Ho, ofendi la heredan ministron kaj malobei la potencon nobelon por vin kaŝi! Katastrofo trafus min neatendite! Ĉu mi esperus rekompencon! Sed laŭ Moismo,²⁾ universala amo estas la bazo de ĉio. Do, spite ĉion, mi devus vin savi. Kvankam estus katastrofo, mi ne bedaŭrus.»

Li do eligis la librojn, malplenigis la sakon, kaj malrapide eniĝis la lupon. Antaŭe, ĝi piedpremis sian barbon, malantaŭe, ĝi sursidis sian voston, trifoje li

1) Moistoj estas disĉiploj de Modi, kiu predikis fratemon kaj homamon.

2) Moismo: Doktrino de Modi.

koraŭ angulo-placo. Baldaŭ ekiris la ekspreso, ho, la granda aventuro komenciĝis.

Dum li legis ĵurnalon, iu el la kunvojaĝantoj lin alparolis. Teruro enfalis lian koron. Sed tenis nur pri peto de alumeto. Li donis alumeton kaj denove profundigis en la studado de la ĵurnalo. Ĉu li similas al kulpulo? Tute ne, li estas ordinara vojaĝanto, trankvile leganta sian ĵurnalon.

La konduktoro anoncis nun: «Utrecht». Novaj pasaĝeroj alvenis. Senpacience kaj febre li atendis la signalon por pluveturado.

«Arhemo». Li grumbliis: Bone, bone! Felice de pasaĝeroj forlasis la vagonon. Li jam delonge observis ĉi tiujn pasaĝerojn, supozante en ili du oficistojn de la sekreta polico. Bone, nun ili forlasis la ekspreson kaj li trankviliĝis.

Sed en Arhemo la du elirantoj estis anstataŭigitaj de korpulenta homo, kiu okul-videble apartenis al la sekreta polico. Estu prudenta, Fritz! Denove li profundigis en sia ĵurnalo, kvazaŭ li vojaĝus por plezuro.

Subite vigla kurado en la koridoro de la vagono. Kio okazis?

Kompreneble la ordinara bildo ĉe alproksimiĝo

ne sukcesis ĝin enigi. Li malrapidis senĝene. La persekutantoj pli proksimiĝis.

La lupo pete diris: «Estas jam urĝe! Rapidu, mi petas vin, sinjoro!»

Li fleksis al ĝi la kvar krurojn, ligis ĝin per ŝnuro, malsuprenigis la kapon al la vosto, kurbigis la dorson, kuŝigis la barbon. Histrike kuntirigante, geometride kurbigante, serpente volvigante kaj testude ripozante, ĝi lasis la sinjoron fari, kiel li volis. Kiel ĝi mem konsilis, la sinjoro ensakigis la lupon kaj metis ĝin sur la azenon. Li devojiĝis, por ke la Jaounoj preterpasu.

Do Vicgrafo Gian alvenis. Li vane serĉis la lupon. Li koleregis, eltiris la glavon, detranĉis la timonfinon, montris ĝin al la sinjoro kaj juris: «Kiu kuraguŝ kasiĝis de mi la lupon, ĉu estu, kiel la timono!»

La sinjoro surventrigis, rampis antaŭen, surgenuigis kaj diris: «Mallerta kiel mi estas, mi volas ion fari en la mondo. Vojaĝante malproksime, perdante la ĝustan vojon, kiel mi povas trovi la kieeston de la lupoj kaj ĝin montri al la agloj kaj hundoj de via moŝto. Tamen, oni diras, ke ŝafo perdiĝas pro tro da branĉvojoj. Nu, unu sola knabo povas gardi ŝafon, ĝi estas tiel malsovaĝa, kaj tamen okazas, ke ĝi perdiĝas pro tro da branĉvojoj. Lupo ne similas ŝafon, kaj Mezmontaro havas senmombrajn branĉvojojn, kie ŝafo povas perdiĝi. Kaj nun vi serĉas ĝin apud la ĉefa vojo! Ĉu tio ne similas atendi leporon sub arbo³⁾ kaj serĉi fiŝon en arbaro⁴⁾? Krome, casado estas la afero de

3) Atendi leporon sub arbo: Iam en Sunglando estis kampulo. En lia kampo staris arbo. Foje leporo kuris kontraŭ la arbon kaj rompis sian kolon kaj mortis. Li do ne plu laboris, sed vane atendis sub la arbo alian leporon. Ĉiuj en Sunglando mokis lin. Tio signifas, ke oni estas superregata de unu ideo kaj ne povas ĝin ŝanĝi poste.

4) Serĉi fiŝon en arbaro: Fiŝoj vivas en akvo. Serĉi ilin en arbaro signifas senutilan laboron.

de la landlimo. Trafuginte la landon apud Zevenaar, fine la ekspreso haltis en Emmerich. Certe inter la pasaĝeroj troviĝis kelkiu, kiu provis kontraŭbardi malpermesitajn varojn. Kia tumulto!

«Gesinjoroj! ĉiuj eliru! paskontrolo!» kriegis subite du oficistoj, starantaj en la kadro de la vagonpordo.

Ho, Fritz Aŝbach tiurilate ne havas zorgojn. Lia pasporto estas orda.

De post lia fuĝo el la ĉefurbo nur du horoj pasis, neniu povas scii, ke li nun estas survoje al Berlino. Neniu povas scii, ke la granda rabajo estas bone kasita en la poŝo.

Dum la paskontrolado estis la decida momento, montri superhoman memdisciplinon. Oni devas resti prudenta, ludante sian rolon ĝis la fino.

Ce la demando de la oficisto li transdonis kun eleganta gesto sian pasporton, sed — teruro! — kion faris la homo?

Lautvoĉe li alvokis aliajn homojn kaj baldaŭ — sen kontraŭstaro — Fritz Aŝbach estis arestita!

En la generala tumulto li aŭdis nur la vortojn: «Henriko Langebak, vi estas arestita en la nomo de la leĝo, kiel murdinto de Mariana Relling!»

ĉasistoj. Bonvole demandu la ledĉapulojn.⁵⁾ Kiel la vojiranto povas kulpi?! Plue, kvankam mi estas malsaga, ĉu mi ne konas lupon? Ĝi estas avida kaj kruela, faras malutilon kune kun sakalo. Se via mosto penas ĝin kapti, kompreneble mi ĝojas vin servi. Kiel mi povus rifuzi diri al vi la kieeston de la lupo?!

Vicgrafo Gian silentis, kaj antaŭen veturis. La sinjoro, ankaŭ, irigis la azenon je duobla rapideco.

Longe poste, plumoj kaj standardoj ne plu vidigis, veturiloj kaj ĉevaloj ne plu aŭdigis. La lupo, koejektante ke Vicgrafo Gian maproksimiĝis, diris el la sako: »Atentu, sinjoro! Elsakigu min, malligu min, eligu la sagon el mia brako! Mi foriros!»

La sinjoro eligis la lupon. Ĝi muĝe diris al la sinjoro: »Antaŭ momento, la ĉasistoj persekutis min, ili venis tre rapide, felice vi min savis. Mi tre malsatas. Se mi ne mangus, sendube mi fine mortus. Mi pli volus, ke la ĉasistoj min mortigu kaj faru min oferaĵo por nobeloj, ol ke mi mortu sur vojo pro malsato kaj fariĝu manĝaĵo por aro da bestoj. Vi estas moisto, volas vin oferi por utili al la mondo, kial do vi domagas vian korpon por nutro min kaj savi mian vivon?»

Tion dirinte, ĝi movis la buŝegon, etendis la ungegojn, kaj kuregis al la sinjoro. La sinjoro rapide kontraŭbatalis ĝin per siaj manoj. Batalante kaj retroirante, li rifugiĝis malantaŭ la azenon. Li urinis kaj kuradis. Malgraŭ ĉio, la lupo ne sukcesis malutili lin. Li rezistis fervore. Ili ambaŭ lacigis, kaj spiregis arĉaŭflanke de la azeno unu kontraŭ la alia.

La sinjoro diris: »Sendanka lupo!»

»Mi ne volas esti sendanka, sed Dio kreis vin homojn, nur por ke ni vin manĝu.»

Ili longe kvereladis. La ombroj de la suno longigis.

La sinjoro pensis en si mem: »Tuj vesperigos, kaj se lupoj venus are, certe mi mortus!« Do li trompe diris al la lupo: »Laŭ popolimoro, se oni havas dubon, oni demandas tri maljunulojn pri ĝi. Ni iru serĉi tri maljunulojn kaj ilin demandu. Se ili diros, ke oni rajtas min manĝi, do manĝu, se ne, do ĉesu.»

La lupo goĝegis, kaj kuniris kun li. Post kelka tempo, ankoraŭ ne montrigis vojiranto sur la vojo. La lupo tre deziris manĝi. Vidinte maljunan arbon, rigide starantan apud la vojo, ĝi diris al la sinjoro: »Vi povas demandi ĉi tiun maljunulon.»

La sinjoro diris: »Planto ne havas scion, kian profiton ni tirus, se ni ĝin demandus?»

La lupo diris: »Sed demandu ĝin, kaj ĝi parolos.»

La sinjoro povis nur obei, salutis la maljunan arbon, rakontis al ĝi la tutan okazaĵon kaj demandis: »Post tio, kion vi aŭdis, ĉu vi opinias, ke la lupo rajtas min manĝi?»

El la arbo muĝis sono, kiu diris al la sinjoro: »Mi estas abrikotarbo. Kiam la maljuna fruktoĝardenisto min semis, li uzis nur unu kernon. Post unu jaro, mi ekfloris. Post alia jaro, mi ekfruktis. Post tri jaroj, mi iĝis plenume dika. Post dek jaroj, brakume dika. Ĝis nun, jam dudek jaroj. La maljuna ĝardenisto mangadis min, lia edzino mangadis min, kaj ankaŭ liaj gastoj kaj servistoj, ĉiuj mangadis min. Krome li vendadis miajn fruktojn en bazaro por akiri monon. Mi tre utilas al la maljuna ĝardenisto. Nun mi jam maljuniĝis, ne povas plu flori kaj frukti. Tio kolerigis lin. Li hakis al mi la branĉojn, detrancis la foliojn, kaj eĉ vendos min al ĉarpentisto. Ve, mia ligno ne

taŭgas por konstruado kaj mi maljuniĝas, kiel la subiranta suno, tamen mi ne povos eviti la serĉon, ke oni dehakos min! Kian bonon vi faris al la lupo, ke vi aspiras savigon? Memkompreneble, ĝi devus vin manĝi.»

Post kiam la arbo tion diris, la lupo ree movis la buŝegon, etendis la ungegojn, kaj kuregis al la sinjoro.

La sinjoro diris: »Vi lupo rompas nian kontraktan. Vi promesis demandi tri maljunulojn. Nun ni renkontis nur unu abrikotarbon, kial tiel persekutas min?»

Ili denove kuniris. La lupo iĝis pli malsata. Vidinte maljunan bovon sunumantan inter ruinigitaj muroj, ĝi diris al la sinjoro: »Vi povas demandi ĉi tiun maljunulon.»

La sinjoro diris: »Antaŭ momento, la sensencaĵo de senscia planto malutilis nian aferon. Bovo estas nur besto, kiel ni devas ĝin demandi?»

La lupo diris: »Sed demandu ĝin, alie mi vin mangos.»

La sinjoro povis nur obei, salutis la maljunan bovon, ree rakontis la tutan okazaĵon kaj demandis ĝin.

Sulkigante la brovojn, grandigante la okulojn, lekaute la nazon kaj malfermante la buŝon, la bovo diris al la sinjoro: »La diraĵo de la maljuna abrikotarbo ne estas malprava. Kiam miaj kornoj ankoraŭ estis malgrandaj, kiel kokonoj kaj kaŝtanoj, mi jam estis tre muskolforta. La maljuna farmisto vendis nur unu glavon por mi aĉeti. Li iĝis min helpi la bovaron labori en la suda kampo. Kiam mi maturigis, la bovoj pli kaj pli maljuniĝis kaj malfortigis, kaj mi entreprenis ĉiajn laborojn anstataŭ ili. Kiam li veturis, mi iris la kampveturilon, kaj elektis la plej mallongan vojon por rapidigi la iradon. Kiam li plugis, mi lasis la veturilon, kaj iris al la kamparo por forigi dornarbetaĵojn. La maljuna farmisto amis min, kiel siajn dekstran kaj maldekstran manojn. Mi provizadis lin per vestoj kaj manĝaĵoj, mi plenumadis al li edziĝojn kaj edziniĝojn, dank al mi pagiĝis la imposto kaj pleniĝis la grenejo. Mi kredis, ke mi povus havi stalon, kiel ĉevaloj kaj hundoj. Antaŭe li ne havis litron da greno en sia domo, nun li rikoltas buŝelojn da tritiko. Antaŭe li ne havis servistojn en sia malriĉa hejmo, nun li promenadis malrapideme en la vilaĝo kaj najbaraĵoj. Antaŭe liaj glasoj kaj karafoj estis polvoplenaj, liaj lipoj ne tuŝis alkoholaĵon, kaj dum duono da vivtempo li ne kontaktis kun virino; nun li fermentigas milion, ĝuadas likvorojn, kaj fieras pri siaj edzino kaj konkubinoj. Antaŭe li portis mallongan jakaĉon, kunvivis kun ligno kaj ŝtono, ne sciis kio estas saluti kaj kio estas lerni; nun li vizitas la vilaĝlernejon, portas bambuĉapelon kaj vestojn kun ledzono.⁶⁾ Ĉiun fadenon, ĉiun grenon mi ĝajnis por li. Tamen, profitante mian maljunecon, li jam forpelis min en sovaĝejon. Akra vento blovadas al mi en la okulojn, malvarma suno kompatadas mian solan ombro, miaj malgrasaj ostoj elstaras kiel montoj kaj miaj maljunaj larmoj faladas kiel pluvo. La salivo ĉiam pendas de mia buŝo kaj la predoj estas konvulsiaj. Mia ŝelo estas senhara kaj mia vundo kaj ulcero ne sanigas. La edzino de la maljuna farmisto, jaluzo kaj kruela, matene kaj vespere kalumniadas min al li: Neniu parto de la korpo de bovo estas senutila. La viandon oni povas sekigi, la felon oni povas tani, eĉ la ostojn kaj kornojn oni povas uzi por fari ilojn! Kaj

⁵⁾ Ledĉapuloj: Antikvaj ĉasistoj portis ledĉapojn, sekve oni ilin nomas ledĉapuloj.

⁶⁾ Ledzonoĉo: simpla, senornama, leda zono por malriĉa kaj malnobela ulo.



OBSERVO

MAIMONDO

Vizitanto de Hispanujo admiras belegajn konstruaĵojn el la maŭra epoko, la fieran Alhambra en Granada, la Leonan Kortegon en Cordova. Neforigebla el la vizaĝo de la kastilia lando estas tiuj trajtoj de pasinto kaj mirige ankaŭ el la karaktero de la nuntempaj loĝantoj. Homoj, lingvo, konstruaĵoj atestas pri la nobla influo de tiu ĉi invado de marokanoj, araboj el Maroko puŝitaj de la nova religio de Mahometo. Kelkaj jarcentoj de konstanta paca evoluo sekvis la sangon subpremon de la kristanoj, rifugintaj en montarojn kaj atendintaj sian tempon. Tiuj jarcentoj de kultura evoluo araba en Eŭropo estis finitaj per la venko de la kristanoj, ĉe la fino de la 15-a jarcento. Kaj la pere de tiu ĉi mondo estis faktoro tre grava por trovo de alia, la tiel nomata nova mondo. Kolumbo ricevis la petitan subtenon financan de l' kastilia reĝino dank' al tiu ĉi venko, la batalpremo de sieĝita Granada en jaro 1492. El subpremitoj iĝas subpremantoj, tiel ŝajnas esti la daŭra sorto de la homaro.

La maŭra regado en Hispanujo estis fonto riĉega de nobla kulturo. Floris sciencoj, metioj, ekonomo de novaj veroj sub la temp-al-tempe tolerema regado de la kalifoj. Apud la maŭra kulturo ekvivis hebrea renesanco, ĉar ekloĝis en la Iberia duoninsulo hebreaj persekutataj en aliaj landoj kaj trovintaj rifugon sub la kalifoj. Jam en

frua tempo sub romanoj loĝis hebreaj en tiuj landoj, sed la toleremo de la kalifoj allogis multajn, kiuj ne povis vivi aliloke.

Tiu ĉi epoko de la maŭra Hispanujo formas la helajn paĝojn el la estinto hebrea, pri kio ĉiu ano de tiu ĉi gento rajtas estis fieraj. Estis la tempo, kiam malaperis la Talmud-lernejoj en Pumbedita kaj Sura, kiuj havis la rolon de ĉefa instanco por la interpreto kaj scienca prilaboro de la Miŝna tekstoj. Estu rimarkata, ke disigite en ĉiuj landoj de la tiam konata tero, la hebrea posedis estis la eksteraj influoj, ĉiam la sanktaj libroj kaj tekstoj konservis sian rolon de kondukanto kaj kunliganto.

Sed jam prepariĝis la loko, kie scienca kaj kulto hebrea — ligitaj intime kiel nenie observebla ĉe alia gento — trovis novan hejmlandon. Estis en la jaro 756. Pasis tiam ion pli ol kvindek jaroj post la gravega batalo ĉe Jerez de la Frontera (estinta Xeres, la regiono de la fama Sherry vinoj) la venko de Tarik kontraŭ Roderigo, la gota reĝo. Ĉie la maŭroj venkis la enloĝantojn, ĉefe visigotojn kaj ekfondiĝis novaj reglandoj. Tiel Abd-ul-Rahman fondis la reglandon aŭ pli bone emirlandon de Kordova, iam centro de la fama kaproleto-industrio. Tiu ĉi emirlando floris, kaj dank' al favoraj privilegioj, la hebrea komunumo disvolviĝis kaj fariĝis centro por la ceteraj komunumoj ekzistantaj en aliaj lokoj Iberiaj. Kaj el tiu ĉi judaro aperis la plej granda poeto, plej delikata kantisto, kiu konas la klasika literaturon hebrea. Estas Jehuda ben Ha-Levi kies plena nomo araba estis Jehuda Abu'l Hassan ben Samuel Ha-Levi. Li vivis de 1085 ĝis 1140, kaj laŭdire estis mortigita proksime de Jerusalemo, kien li migris. Jehuda Ben Halevi estis la unua, kiu en okci-

si diris al sia plej aĝa filo: »Vi metilernadis ĉe la buĉisto multe da jaroj, kial vi ne akriĝas la glavon kaj atendas? Tial mi scias, ke oni malutilos al mi, kaj ke mi mortos kompatinde! Nu, mi utilis al li, tamen li estas tiel kruela kaj baldaŭ min mortigos. Kian bonon vi faris al la lupoj, ke vi aspiras bonŝancan savigon?»

Kiam la bovo tion diris, la lupoj ree movis la buŝegon, etendis la ungegulojn, kaj kuregis al la sinjoro.

La sinjoro diris: »Ne rapidu!«

Li vidis ke maljunulo venas kun promenbastono en la mano, kun neĝoblankaj barbo kaj brovoj, portante graciajn ĉapelon kaj vestojn. Probable virtulo. La sinjoro surpriziĝis kaj ĝojigis, forlasis la lupojn — kaj antaŭeniris. Riverencante, surgenuiĝante kaj plorante, li diris: »Unu vorton mi petas de vi, plejaĝulo, por min savi!«

La plejaĝulo demandis pri la kialo.

La sinjoro diris: »La lupoj, persekutata de ĉastuloj, petis helpon de mi. Mi ja savis ĝin. Malgraŭ tio, li volis min manĝi, ne aŭskultante al mia petego. Mi petis de li prokraston, kaj mi konsentis decidigi tion de tri maljunuloj. Unue, renkontante maljunan abrikotarbon, ĝi devigis min demandi tiun. Planto ne havas scion, preskaŭ min mortigis. Due, renkontante maljunan bovon, ĝi devigis min demandi tiun. Besto ne havas scion, ree preskaŭ min mortigus. Nun mi renkontas vin, ĉu Dio ne volas pereigi la kulturon?!?) Mi kuraĝas peti de vi unu vorton por min savi.« Kaj li riverencis sub la bastono.

Aŭdinte tion, la plejaĝulo ĝemetis kaj reĝemetis. Frapante la lupon per la bastono, li diris: »Vi eraris. Sendankeo estas plej malbonaĝura. Konfucianoj diras: kiu estas dankema, tiu estas filo; ankaŭ tigro kaj

lupo havas patron kaj filon. Vi estas tiel sendanka, sendube vi eĉ ne havas patron kaj filon.« Kaj li diris severe: »Forkuru, vi lupoj! Alie mi vin mortigos per la bastono.«

La lupoj diris: »Vi plejaĝulo scias nur parton de la tuta afero. Bonvole aŭskultu al mi, mi petas. Komence, kiam li savis min, la sinjoro ligis al mi la piedojn, fermis min en sakon, metis sur min multe da pezaj libroj. Mi kurbigis kaj ne kuraĝis spiri. Plie li habilaĉis al Vicgrafo Gian, intencante mortigi min en la sako kaj profiti de tio. Kial mi ne povas lin manĝi?»

La plejaĝulo diris: »Se jes, ankaŭ vi estas kulpa.«

La sinjoro plendis kontraŭ la mensogo, kaj rakontis, kiel li ensakigis la lupojn, ĉar li ĝin kompatis. La lupoj ankaŭ argumentis ruze por venki.

La plejaĝulo diris: »Ĉio tio ne estas kredinda. Denove ensakigu ĝin, ke mi vidu, ĉu ĝi efektive suferos.«

La lupoj ĝoje obeis, etendante siajn piedojn al la sinjoro, kiu denove ĝin ligis, ensakigis kaj levis sur la azenon, kiam la lupoj nenion sciis.

La plejaĝulo flustris ĉe la orelo de la sinjoro: »Ĉu vi havas ponardon?»

La sinjoro diris »jes,« kaj eligis ĝin.

La plejaĝulo okulsigis al la sinjoro, ke li piku la lupojn per la ponardo.

La sinjoro diris: »Ĉu tio ne malutilos la lupojn?»

La plejaĝulo diris ridante: »La besto estas tiel sendanka, kaj vi ankoraŭ ne volas ĝin mortigi, vi estas vere humana, sed tre malsaĝa! Malsupreniri en puton por homon savi, senvestigi sin por amikon vivi: tio estas bona por ili, sed oni mem mortus! Ĉu vi ne estas tia, malsaĝe humana, virtulo ne volas esti.«

Tion dirante, li ridegis. La sinjoro ankaŭ ridis. Li helpis al la sinjoro mortigi la lupojn per la ponardo. Ili lasis la korpon sur la vojo kaj foriris.

El la ĉina: Venlo Furno.

7) Konfucio foje iris de Velando al Ĉenlando, pasante tra Kuanglodo. La Kuanganoj lin atakis. Konfucio diris: »Se Dio ne volas pereigi la kulturon, kiel povus la Kuanganoj min malutili?«

dento instigis la disigon de religio kaj filozofio, aŭ pli precize, de kredo kaj scio. Liaj laboroj — li estis kuracisto, filozofo, poeto — estis la grundo por la plej granda pensulo de la mezepoka judaro: Mozeo Maimonido.

Tiu ĉi nomo, grekigita, sonis Moze ben Maimun en araba idiomo. Li naskiĝis la 30-an de Marto 1135 en Kordova, kiel filo kaj nepo de patroj okupintaj tra pluraj generacioj oficon en la konsilantaro de la rabenoj. La kono de la Miŝna, tio estas de la reguloj valorantaj por la vivo de la judoj, kaj per ĝi nature la kono de la Talmud-literaturo estis la kutima studo de tiu ĉi tempo. Ambaŭ fariĝis intimaj eroj de la spiritaj trezoroj de Maimonido. Sed kion malfacile. En la jaro 1148, Kordova, sub la regado de la Omajadoj estis atakata de araba sekto, de la almohadoj. Malaperis kun la libreco de la kredoj kaj la certeco aŭ sekureco de la lando ankaŭ la kultura vicleco de la hispaniaj hebreaj komunumoj. La patro de Maimonido devis forlasi la urbon kaj vagi dum jaroj tra Hispanujo ĝis fine li iris al Maroko kaj ekloĝis en la urbo Fez. Oni ne komprenas hodiaŭ, kio devigis lin iri precize en la centron de la almohada maltoleremo. La tempon de la migrado li uzis por inicii siajn infanojn en la konon de la Malnova Testamento, de la Miŝna kaj de talmudaj spekulacioj. Tio ĉefe valoris por la tre intelekta Mozeo, tre kapabla kompreni religi-filozofiajn problemojn. Samtempe, islamaj instruistoj penadis lin instrui pri natursciencoj, florantaj tiam en ĉi tiu lando, sed tute ne konataj en kristanaj landoj kaj kulturoj tiutempaj. De la naturaj sciencoj Mozeo trovis tuj la vojon al la filozofio kaj medicino, kiu lasta poste fariĝis por li vivrimedo, almenaŭ ekstere. Fine, en la jaro 1156, la familio sukcesis forkuri el la regado almohada. Patro Maimun kun la filoj Mozeo kaj Davido ekloĝis en Fostat, malnova parto de antikva Kairo, en Egipto. Maimun mortis jam sekvintan jaron.

La filo Davido komercis per juveloj, ĉe kiu partoprenis Mozeo, kio tamen permesis al li plenigi la liberan tempon per vastaj studoj. Nur kiam Davido dum vojaĝo pereis sur oceano kaj perdigis al Mozeo sian havaĵon, tiu ĉi komencis eluzi siajn konojn de medicino. Sed li ne tuj sukcesis kaj ne havis klientaron kontentigan. Sed kiam sultano Saladin, grandanima kaj tolerema, okupis la regadon, oni konsentis al la judoj pli grandan liberecon. Mozeo fariĝis kuracisto, se ne de la sultano, almenaŭ de la grandveziro Al Fadhel, kiu pagis al li regulan pension, kio forigis por ĉiam la mizeron. Ankaŭ aliaj granduloj de la kortego uzis la servojn de Maimonido, filo de Maimon, kiel li sin nomis nun. Tiel pasis la vivo de Maimonido, kiu mortis en la jaro 1204.

Tion pri la ekstera skemo de la vivo de Maimonido. Sed kion pli grava ol tiuj eksteraj okazaĵoj estis la efiko de tiu ĉi viro trans jarcentoj! Lia plej granda kaj lasta verko, skribita en lingvo araba »Kondukanto de l' erarantoj« estas la genia provo de profunde kredema judo, provi la prudentbazitan pravecon de hebrea religieco per la rezultoj de la filozofiaj rekonaj, ĉefe de la Aristotela. Lia pensado troviĝas sub la percepto, ke la pozitiva religio estas nepre necesega por la popolamasoj, sed restas nur fasado por edukitoj, por kiuj malantaŭ ĝi devas esti serĉata la vero plena. Tio estis la ĝenerala penso de la tiamaj saĝuloj arabaj, kiun jarcentojn pli poste ni revidas inter la okcidenta pensado sub la nomoj renesanco kaj humanismo. Ne ekzistas dubo, ke Mozeo Maimonido, ligante Talmudan saĝecon kun metafiziko kaj etiko devenintaj de Aristotelo, igis tiun ĉi pli konata en la okcidento. La religio juda, instruita de dio mem, devis enteni la plenan veron. Tiu ĉi plena vero povis esti provita per rekono kaj al la vera rekono sekvis la prava agado. Tiel la instruoj de Sokrato influis, tra sia nepo-lermano, la mezepokan judon.

En sia komentario de l' Talmudo, Mozeo starigis r3 kredo-tezojn, inter kiuj eble tiu de la netusebleco de la Thora certe aperas strange. Verdire, en la starigo de kredotezoj, Mozeo Maimonido montriĝis senkoncie influita de l' kristanismo. Certe ankaŭ la judaismo premias en ĝia principaro precizan klare formulitan mondpercepton, sed

ĝia decida enhavo ne estas kaj neniam estis kredo, sed la »plenumo de la Thora«. Vera judo estas ne tiu, kiu kredas al la Thora, sed tiu, kiu ĝin plenumas!

Mozeo Maimonido jam en sia junaĝo estis direktata al la akcentado de la kredo. Li, kiel lia tuta familio, ja devis aliĝi — formale — al la Islamo kaj per la lipoj konfesi la profetecon de Mahometo. Kiam severa judo konfuzis morale siajn samkredantojn per la aserto, ke ĉiuj tiuj ŝajn-mahometanoj estas rigardeblaj laŭ la Thora kiel malfideluloj, ke ilia atesto antaŭ juda tribunalo ne estas valora, tiam precize Mozeo Maimonido lin kontraŭis, por provi al li el Biblio kaj Talmudo, ke judo, por savi sian vivon, rajtas tian »lipokonfeson«. Tiu ĉi sperto, kiun Mozeo akiris per la praktiko, certe influis la junan pensulon jam tre tendencantan al filozofi-mondperceptaj problemoj.

Karakteriza por la granda hebrea estis, ke li neniam verkis poemojn, kion li rigardis bela ludado. Ankaŭ en tio li diferencis de sia granda antaŭulo Jehuda ben Halevi, kvankam ambaŭ komencis klarigi la Aristotelismon inter la hebreato en tempo, kiam la skolastiko ankoraŭ ne partoprenis en tio. La skolastiko precize konatiĝis kun la instruoj de la granda greko en la skribadoj de Maimonido.

La interligo de greka serĉado de vero kun la biblia dia kredo, komenciĝinta per Maimonido, trovis daŭrigon en Albertus Magnus, la influrica instruanto de la plej granda germana mistikulo majstro Ekkehard, kaj ĝi efikas ĉiam ankoraŭ ĝis en la nuna tempo per la vivanta aŭtoritato de Thomas de Aquino.

Sed la batalo, kiu komenciĝis inter Jehuda ben Halevi, Mozeo Maimonido kaj la judaro, ankaŭ ne finiĝis tiom rapide. Mozeo estis adorata dum sia vivtempo. Lia tombo portis la surskribon:

Jen kuzas hom', kaj tamen ne hom'. Se homo vi estis, ĉielaj estaĵoj surombris patrinon vian.

Sed pli malfrua surskribo diris: *Jen ripozas Mozeo Maimonido, la ekzilita herezulo.*

Pli akre ne povas esti skizita la batalo inter la hebreatoj pri unu el iliaj plej grandaj filoj ol per tiuj du malsamaj tekstoj.

G. Agrícola.

ROMANO DE BERNHARD KELLERMANN. Kiu ne legis la librojn de Kellermann? Li vojaĝis tra la tuta mondo kaj donacis al ni librojn kun koloriĉaj priskriboj de Japanujo, Persujo kaj Tibeto. Li profundigis en la pasintecon, de kie li prenis sian dramon de la rebaptistoj. Lia »Ingeborg« apartenas al la plej ŝatataj libroj de la sentema junularo. »La maro« vekis la sopiron al la senfina ŝanĝigema akvo ĉe ĉiu, kiu ankoraŭ ne vidis ĝin kaj »La tunelo« antaŭvidis la triumfon de la entreprenama tekniko, kiu intertempe jam eĉ faris pluajn progresojn.

Kaj nun li rakontas historion el la nuntempo. »Kanto de la amikeco« nomiĝas lia nova verko. Kvin junaj homoj revenas el la milito. Tie kunligis ilin la bona kamaradeco de la samsortanoj. Post la milito unu el ili invitas la kvar aliajn al sia patra bieno, sed li trovas la iam florantan, riĉan posedadon tute pereigita de incendio. Sed la amikoj ne malesperas kaj komencas konstrui en malfacila laboro la ruinigitan bienon. Kaj ili sukcesas en la ŝajne malebla laboro dank' al la forto de ilia espero kaj la spitema kurajo de ilia juneco, dank' al la rokfirma fideleco de ilia amikeco. Kvankam ili tre diferencas laŭ karakteroj, la amikeco, ligita en mortdangeroj, tamen firmtenas. Unu el ili estas ĉarpentisto, la dua masonisto kaj ĝardenisto, la tria frizisto, la kvara estis forĝisto, sed plu ne povas labori kiel tia, ĉar li blindiĝis. Ili ĉiuj kunhelpas por konstrui al la kvina kamarado lian posedadon. La bieno certaniere iĝas propraĵo de ĉiuj kvin kaj per ilia komuna penado montriĝas videbla beno.

La aĝo plenumiĝas en tiu vera, instiga ŝanĝigo de tragiko kaj humoro, de heroismo kaj malforto, de krimo kaj virto, el kiuj ja fakte konsistas la ĉiutaga vivo. Oni nur ne ĉiam rimarkas tion en la ĉiutageco. Sed ĉi tie, en la libro de Kellermann, de linio al linio, de pago al pago, oni ekkonas la entuziasman sorĉon de la ĉiutaga vivo kun

belega klareco. Tute proksima al la bieno situas urbeto, ĉe bordo de lago, kiu evoluigas al somero-restadejo. Jen estas abundo de figuroj, de buntaj okazaĵoj, de sortoj, montritaj kun la moroj kiujn ĉirkaŭas spiro de komiko, trateksita de ambicio, venenita de akiremo, pliintensigita de voluptemo, kelkfoje ankaŭ noblignita de doloro pro sincera amo. Vivege la homoj preterpasas, ili estas kvazaŭ palpeblaj, tiel klaraj, kvazaŭ oni jam de longe konus ilin. La kvin amikoj prezentigas kun ĉiuj siaj virinoj kaj dubaj amikinoj, kiuj ĉirkaŭas ilin, en bela, plastika homeco; ĉu oni volas ĉi ne, oni devas amikiĝi kun ili. Bernhard Kellermann gardas ĉiun el ili, li ne povas toleri, ke eĉ nur unun el ili fakte trafu plago daŭra; kvankam ili devas travivi sufiĉe da malfacilaĵoj, ĉio finiĝas bone.

La libro, aperanta en tempo, en kiu Eŭropo ankoraŭ ne resaniĝis el la sekvoj de la milito kaj jam denove staras ĉe la limo de la malespero, estas tute konsoli mal-kuraĝemajn animojn. Peca kunlaboro, bonvola komprenemo, fideleco kaj laboro, laboro, laboro, tio, kaj nur tio estas kaj restas la fontoj de bonfarto, la solaj vojoj al pli bona estonteco. Tio estas la enhavo en la nova libro de Bernhard Kellermann kaj en tio ankaŭ kuŝas ĝia granda valoro.

F. W. V.

JOHN TRANUM: VIVO INTER ĈIELO KAJ TERO.

La libro estas kvazaŭ autobiografio de la fama falombrel-saltulo. Certe interesas nin, kiel komenciĝis lia sukces-plena vivo, kiu por ordinara homo, kutimiginta singarde meti piedon post piedo sur la teron, ŝajnas simple nekomprenbla. Do, ne sen kaŭzo estas legebla en la komenco de la libro la demando: «Ĉu vi frenezigiĝis?» Kaj la titolo de la ĉapitro propre jam estas ankaŭ respondo; ĝi tekstas: «Dependas tute de la vidpunkto.» John Tranum esprimas en la enkondukaj vortoj la opinion, ke fine ĉiujn aferojn, kiuj devigiĝas de la normo, oni povas nomi frenezaj. Ĉu la homo ne estas besto, li diras, kiu nur enancipiĝis kaj estas freneza el la vidpunkto de la besto? Al ĉi tiu koncepto la matura viro Tranum venis, multe pli malfrue ol kiam li, sentanta jam kiel ludanta infano neklarigeblan intiman rilaton al motoro, eksentis la nevenkeblan volon regi pere de la maŝino la aeron.

Tranum elkreskis en Danujo sur la Fanobordo kaj jam kiel malgranda bubo li ĉestis la vetveturojn de aŭtomobiloj, ĉe kio li malkovris sian pasion por la motoro. La fama Captain Malcolm Campbell estis lia adorata idealo. Li iĝis lernanto ĉe mekanikisto, lernis la konstruon de motoroj kaj elmigris al Ameriko, ĉar nur tie li esperis kontentigi sian movemon, post kiam li, jam kiel bubo, starigis rapidec-rekordojn. Li iris al Los Angeles, laboris sur petroleokampo, estis en Beverley Hills kaj Ascot Speedway, elviviĝis sin kiel motorrad-veturulo, veturis per aŭtomobiloj terurajn tempojn. Sed tio lin ankoraŭ ne kontentigis. Lia elemento estis la aero, en kiu povas esti multobligita la sursura venko super la spaco. Fine li lernis flugi, fugis de la instruisto por kuraĝega flugo, aĉetis malnovan difektitan flugkeston, kiun li mem faris sufiĉe taŭga kaj ekzercis sin je unu el la plej kuraĝaj artistflugistoj. Sed tio ĉiam ankoraŭ estis nur etapo. Nur iom post iom sekvis tiuj brilaj flugoj, kiujn John Tranum rigardis indaj je sia penado. La «Looping» ne sufiĉis al li. Li saltis el la aŭto en la flugmaŝinon kaj reciproke, kun ŝnurŝtupetaro, sen ŝnurŝtupetaro, aranĝis flugspektaklojn, ĉe kiuj li ripete estis grave vundita kaj eĉ kiuj aliaj trovis la morton.

Tre surprize komenciĝis lia kario de falombrel-saltulo. Nova flugplaco devus esti solene malfermita. Tranum eĉ tio havis sian rolon kaj la festarango ankaŭ brile sukcesis. Sed la dungita falombrel-saltulo ne venis. Jen, ia el la festkomitato, konsternita pro tio, faris al Tranum la proponon, simple anstataŭigi la ne venintan falombrel-saltulon. Tranum neniam ankoraŭ provis desalton per la falombrelo. Sed li iam vidis, kiel ia el liaj kamaradoj eĉ tia provo trovis la morton, ĉar la ombrelo tro malfrue malfermiĝis. Kvindek dolarojn proponis la festkomitato. Sesdek! postulis la juna Tranum mallonge kaj decidigis salti. Oni donis al li kelkajn supraĵajn klar-

igojn, ĉar, pro manko de tempo, pli ne estis ebla. Kaj Tranum saltis de 1800-metra alteco en la profundon, en la mezon de miloj da rigardantoj. Kaj li feliĉe surterigis. Sesdek dolaroj ŝajnis al la ankoraŭ tre juna Tranum sufiĉe allogaj, por riski por ili sian vivon. Eble nur poste li rimarkis, ke la falombrelo facile estus povinta sin volvi ĉe la tiam ankoraŭ tro simpla instalaĵo, ĉe la flugiloj aŭ ĉe la direktilo.

Bele priskribas Tranum sian unuan ŝvebadon malsupren de la flugaparato: «Versajne pasis kelkaj sekundoj, ĝis kiam malfermiĝis la falombrelo. Mi ne scias. Sed tio ŝajnis al mi daŭri senfine. Subite kun krako malfermiĝis la ombrelo kaj mi sentis tiel fortan ektiron, ke mi pensis esti disirata en du pecojn. Sed poste mi havis rekte grandiozan senton! Estis belege, tiel ŝvebi malsupren. Mi pendis sur tiu flava velo, dum la aeroplano malaperis en la malproksimo. Sub mi estis miloj da homoj, kiuj aspektis kiel malgrandaj muŝoj.»

Kuŝis en la naturo de la aferoj, ke John Tranum ne longe povis resti kaŝita por la filmo. Li saltas de brulanta flugaparato, li promenas dum la arveturo sur la flugilsurfacoj, faras tiel artistajojn. Li plibonigas la sekurecon de la falombrelo. Estas eterna batalo kun vivdangero harstrikte preter la morto. Sed ĝuste tio estas, kio donas al Tranum la plej altan vivosenton: la danger-veno, al kiu li kutimiĝis. Tre detale pritraktas la libro la teknikan flankon de la nekomparebla artista laboro, kiu precipe al la sportamanto havas multe por diri kaj krom tio estas akompanata de ilustraĵoj. Tranum ne forgesas priskribi ankaŭ la strangan kaj ofte tragikan sorton de aliaj flugakrobatoj, ĉe kio li priskribas landojn kaj regionojn, kiujn li vidis eĉ siaj rondflugoj, kaj kelkfoje viron, kiu estis el la sama ŝtofo kiel li, sed al kiu la sorto ne favoris atingi la saman sukceson. Treege interesas estas ankaŭ liaj vizitoj en Anglujo kaj la spertoj, kiujn li faris ĉe la filmo, en kies gigantaj laborejoj li lasas fari al la leganto impresplenajn rigardojn.

John Tranum estas mortinta. Lia libro estas postmorta. Sed li tute ne mortis pro akcidento. Li mortis pro koratako, kiam li ĝuste intencis entrepreni falombrel-salton. Lia libro finiĝas kun la priskribo, kiel li provis starigi novan falombrel-rekordon kun malfruigo de ombrel-malfermiĝo. La kuracistoj tiam klarigis al li, ke la homa koro ne eltenas la postulon, kiu por tia eksperimento estus necesa pro la subita ŝanĝo de la aerpemo. «Sed la kuracistoj diras, li ankoraŭ skribas, ke mia koro estas tute sana kaj mia sangpremo normala. Kaj li fakte saltis el 6400-metra alto, superatingis la rekordon kaj venkis.

F. W. V.

MAURICE MAETERLINCK: «VOR DEM GROSSEN SCHWEIGEN.» (Antaŭ la granda silento.) Antaŭ kvindek jaroj skribis Maeterlinck, jam tiam plu ne la verkisto de la «Mona Vanna», belan kaj konsolan libron pri la morto. Belaj kaj konsolaj estas ankaŭ la mark-aŭreliaj pensoj de lia plej nova libro, en kiu la nun jam pli ol sepdekjara verkisto kun modela trankvilo provas konvinki sin kaj nin, ke vivi signifas verdire morton kaj morto estas la sola daŭra formo de la vivo. Tio memorigas nin pri tiu antikva saĝulo, kiu asertis: «Vivo kaj morto estas la sama»; kaj kiu, kiam lia amiko lin demandis, kial do li ne mortigas sin, malsate respondis: «Ĉar estas la sama.» Pluraj demandoj, kiujn faras Maeterlinck; ekzemple: ĉu ni ne imagu al ni la mondon prefere kuboforma ol kugloforma, fakte ne gvidas plu ol en la senfinon, kaj por ni, bedairindaj, ankoraŭ vivantaj legantoj, kiuj estas nur «Mortintoj en somerferioj» (ĉarma vorto de la iama verkisto de la «Mona Vanna») estas per kelkaj paŝoj tro malproksime. Ni pli volonte restas starantaj survoje kaj ĝojs ĝuas la mirindajn vortojn pri Marko Aŭrelio kiel ankaŭ por ni iom pli kompreneblajn. Aŭ la humuron, kun kiu Maeterlinck pentras al ni la embarason de dommaŝtrino, se subite kolektiĝus ĉe ŝia manĝotabla seninvite ĉiuj mortintaj familianoj. Ĉiu el ili estas kara al ŝi, sed ĉiuj kune kaj samtempe! Ne, estas nepre pli bone, eble eĉ por la literaturo de la famuloj, se ni lasas en paco la mortintojn aŭ,

almenaŭ kontentigas nin kun Maeterlinck per la nobla konstato, ke sole kaj nur lia scienco povas plinoblighi la homojn en ilia vivotempo. Pro kio, »ĉie, kie la penso pri la morto superregas, la vivo des pli riĉe ekfloras, sin pli forte evoluigas kaj plimultigas ol je ajn aliloke.« Tio valoras por la riĉuloj kiel ankaŭ por la unuopulo kaj eĉ por la poeto, tiom longe dum ĉi tiu penso ne malhelpas lin resti poeto.

F. W. V.

SHAW: »LA MILIONULINO«. La Akademie-theater, la kamerteatro de la Burgteatro antaŭ nelonge prezentis la novan teatraĵon de Shaw. »La milionulino«. La teatraĵo havas grandegan sukceson, ĝis nun ĉiu prezento okazis antaŭ plenplena rigardejo. Indas iomete mediti pri tiu sukceso. Ĝi ekbruligas du meĉojn, tiujn de konsolo kaj espero, en la malluma anima mondo de tiuj, kiuj en la lastaj dekkvin jaroj post la tiel nomataj teatraĵoj sukcesoj, plenrajte povis kredi, ke la unuan artistan ambicion, la unuan kuragan pledon por socia, aŭ politika, aŭ artistika konvinko, la unuan vere individue formitan figuron prezentitan kun aŭdaca spirito, akceptos tia indigno, ke tiuj la unuan prezentadon, se ne komence, sed meze nepre oni devas interrompi.

Ne okazis tiel.

Tuj en la unua sceno de »La milionulino« agrabla, refreŝiga aĉero de alta spirita nivelo frapas al la rigardejo kaj sovaĝa ciklono de saĝo kaptas kaj kurentnas la rigardanton. Kaj la intelekto — kutimiginta al teatraĵoj sur la nivelo de servistinoj kaj de postistaj novjarlibroj — ekfloras, kiel la gorgo, plumo, koro de tiuj, kiuj venas en la blucielaĵn, freŝaerajn alpojn el la sufoka atmosfero de la plata ebenejo. Kvankam nenio »okazas«; tamen estas necelbe jam en la unuaj minutoj ne senti, ke tiu ĉi pano estas bakita el pura tritiko; oni miksis al ĝi nenion, nek maizon, nek branon, nek stratan malpurajon desur veterilvojo. Kaj tiu freŝa sento ne forlasas la rigardanton eĉ por momento; ĝi daŭras ĝis la fino kaj la animo post unu-duhora refreŝiga spirita bano, ekscitite revas pri la belo de la verkista konvinko, pri la etika alto de la arto, pri la nobleco kaj etika sublimeco de la teatro.

Tamen, la nova komedio de Shaw ne estas regule komponita kaj zorge konstruita teatraĵo, — eĉ ne en tia shaw-a senco, kiel estis lia lasta, aŭ liaj pli malnovaj verkoj. »La milionulino« estas nura okazo, por ke Shaw diru sian opinion pri la demandoj okupantaj la mondon en ĝia plejinterno, en ĝia kerno: pri la riĉo kaj malriĉo, pri la plena materiala bankroto de la spirita laboro, pri la majesta morala forto de la kredo kaj konvinko, pri la senrezerva venko kaj la absoluta rego de la kruda forto kaj besta brutaleco, kaj, nur pretere en tiu kaj tiu rimarko: pri la paco, milito, revolucio kaj ankaŭ pri la judodemando. Pri tiu ĉi teatraĵo oni rajte povas diri, ke ĝi estas »hodiaŭa« — tiom ĝi devenas el la hodiaŭa spirito, tiom la hodiaŭa sango ĉirkulas en la vejnaro de ĝiaj scenoj.

Tamen oni ne povas aserti, ke ĝi ne havas perfektan semon, »fundamenta ideon«, el kiu povus kreski la plej perfekta teatraĵo. Sed Shaw rapide forjetas ĉi tiun semon, li malŝatas la teatraĵojn verkitajn per cirkelo, por li la tuto servas nur por ke li diru sian opinion en sia brila dialektiko pri la mondo kaj la hodiaŭa mondo. Kio estas tiu »fundamenta ideon«, kiu sola valoras la tutan spiritan kapaciton de la internacia teatra grandindustrio? Tio, ke ekstravaganca angliano heredis la centmilionpundan havaĵon de sia ekstravaganca patro sub tiu kondiĉo, ke ŝi rajtas edziniĝi nur al viro, kiu el centkvindek pundoj »faras« dum ses semajnoj kvindekunil pundojn. La sinjorino, post multgado da senrezultaj provoj, sukcesas trovi tian viron: bokŝtampionon, (ĉar nuntempe aliu ja ne povas gajni monon,) kiu post nelonga geedza vivo serĉas junan kromvirinon, ĉar eĉ li mem naŭzigas pri la materialiga, demoraliga atmosfero de la riĉo. La milionulino nun trovas snoban dandotipon. Tiu ja sopiras je mono, sed poste same ne povas toleri la animajn infektojn de la mono. Kun tiu snobo, kiu en sia fina ĉagreno perdas la paciencon kaj laŭvoĉe ribelas kontraŭ la detruajn animaj efikoj de la riĉo, la milionulino, edukita en la lernejo de la boks-

ĉampiono, ekluktas pugne, kaj venkas: en la intima gast-ejo, kie ili ĝuste tagmanĝas, ŝi jetas lin tiel forte al la ŝtuparo, ke etaĝojn li falas malsupren; sed antaŭe apud la pordo li puŝigas al muzikaŭtomato, kiu ekludas la anglan himnon. La milionulino atakas nervaj konvulsioj. Feliĉe, en la najbara manĝejo troviĝas egipta kuracisto, al kiu la sinjorino tuj enamiĝas. Sed la egipto estas ŝirmiĝita kontraŭ la mono per sia kredo al Allah, per sia sovaĝa pasio por la scienco — la milionulino do ne havas facilan aferon. Kiam ŝi proponas al li sian manon kaj riĉon: la egipta kuracisto diras, ke lia patrimo estis lavistino kaj laŭ ŝia ordono li volas edziĝi nur al tiu virino, kiu per tridek piastroj povas vivi dum duonjaro.

La milionulino akceptas la provon kaj ŝia renkonto kun la vera malriĉo en la laborejo de periferia londona fliktajloro, estas emociiga poezia ĉefverko, plej bela diamanto en tiu ĉi literatura diademato riĉa je juveloj. Kio forsonas en tiu ĉi mallonga akto pri malriĉo kaj riĉo, feliĉo kaj malfeliĉo, moralo kaj senmoralo, virto kaj peko: tio povus esti la biblio de la jaro 1935. En tiu ĉi malgranda fliktajloro Shaw montras sian vizaĝon, tiom postulitan de liaj kritikantoj; li estas la malestima vipanto de la riĉuloj, la apoganto, protektanto, subtenanto de la malriĉuloj, — en mirinda maniero: li, la granda individuo, estas la neanto de la individuo, la anoncanto de la kolektivismo. En tiu sceno la literaturhistorio nepre rekonos tiun grandan efikon, kiun faris al li lia plej lasta rustia studvojaĝo.

Cu ni daŭrigu la rakonton, la »agadon«? Superflue. La egipta kuracisto ricevas la milionulino; la honton de la mono mildigas la belo kaj forto de la kredo kaj tiu ĉi mildiĝo okazas per plej belaj vortoj interpretitaj per plej delikataj verkistaj manieroj. Finrezulte: tiu ĉi nova teatraĵo estas altranga socio-kritiko, en kiu la pripensigaj, la kritikaj notoj kaj filozofiaj rimarkoj kaŝiĝintaj sub la fundo de spritaj kaj ŝercoj falas dense kiel frapantaj hajleroj dum maja hajlopluvo: ankaŭ ĉe tiu ĉi Shaw-teatraĵo oni skuadas la kapon: ne por eviti la falantajn hajlerojn, sed por ricevi kiel eble plej riĉe, senmanke la glacian, refreŝigan efikon de tiuj ĉi pensoj.

LA DU VIVOJ DE HUGH WALPOLE (A. A.). De kiam Galsworthy por eterne fermis siajn okulojn, en la angla romanliteraturo nur nun komenciĝas elformiĝi la pozicioj. La granda reputacio de Galsworthy kvazaŭ pezis sur la nuntempaj anglaj verkistoj kaj sola romanverkisto — se eblas lin titoli per ĉi tiu vorto — povis sukcesi memstare kiel »libera naganto« li est' Wells. Sed la romanverkisto Wells estis la ido de la antaŭmilita, sekve jam forpasinta generacio kaj jam de dudek jaroj ĉe Wells la romano estis maksimume preteksto aŭ formo por temoj alidirektaj, eble pli gravaj, sed neniel belliteraturaj.

La pozicio de Galsworthy restis neokupita, precipe post kiam ankaŭ D. H. Lawrence transiris en la regionon de la eternaj sonĝoj. Certe ne tial, ke en la pli juna angla generacio tute ne ekzistis grandaj promesoj. Oliver Onions, Compton Mackenzie, J. D. Beresford, kaj Frank Swinerton: ĉiuj estas talentoj, de kiuj multaj atendis la refojan ekfloron de la generaci-arbo Dickens—Meredith—Thackeray—Galsworthy. Ili havis kaj havas interesajn temojn, originalan palettron, kaj nur ĝuste unu afero mankas por ke ili venu al la frontantaŭo kaj transprenu la tradiciojn de la angla grand-romano: la monumenteco, sen kiu tamen nenie en la mondo kaj malpleje en Anglujo povas formiĝi vera verkista grandeco. La granda vivsekreto de Balzac, Viktor Hugo, Zola, Tolstoj, Dostojevski kaŝiĝas ĝuste en tiu monumenteco, kies klarigo ja ne estas serĉota en la amplekso de la libroserioj (ĉar ja tiukaze ankaŭ Sue, Dumas-patro kaj Ponson du Terrail estus vicigitaj en tiun linion), sed en tiu mirinda talento, per kiu ili povas malfermi horizontojn al la grandioza observo de la vivo; en tiu arta kapablo de pligrandigo, kiu la leganton kvazaŭ nevole igas vidi apokalipte la konstruojn de la verkisto, kiel eĉ la plej malgranda skizo de Michelangelo sentigas al la observanto la grandegajn, superhomajn, gigantajn mezurojn.

Tiel restis do la postmilita verkistgeneracio sen kapo, sen gvidanto. Kaj subite, aperis inter ili »juna« verkisto, pri kiu apenaŭ aŭdis iu antaŭe, kaj kiun oni povas nomi juna nur tial, ke lia verkista kariero povas rerigardi vere nur al ĉirkaŭ unu kaj duono da jardekoj. Laŭ lia aĝo li jam vere ne apartenas inter la junulojn, ĉar li naskiĝis en 1884 kaj tiel li estis jam ĉe sia debuto trans la trideka jaro. Ĉi tiu verkisto, okupanta senreziste la heredaĵon de la grandaj anglaj verkistotradicioj, estas Hugh Walpole.

La stranga duobleco montriĝas en la vivo de ĉi tiu verkisto: »juna« verkisto trans la kvindekaj jaro. Bonvolu imagi verkiston, kiu estis naskita en New-Zeeland kaj tamen estas tipa verkisto de la plej Cockney-a Anglujo. Lia patro sidis sur la episkopa trono de Skotlando, li mem elektis la zigzagan vivovojon de verkisto-bohemoj. Sed ankaŭ tien li ne venis rektvoje. Antaŭe li estis dum jaroj oficiro en la rusa cara armeo, poste, per aŭdaca pirueto, li fariĝas diplomata kuriero en angla servo — ne tro ekvilibrata ekzistado dum milito kaj en rusa-angla rilato.

Sed ĉi tiu duobleco en la viv-ritmo de Walpole koncernas ŝajne ne nur liajn junajn »tempestajn« jarojn. Li estas jam rekonita romanisto, kiam li vivas duonanime en Londono (tiel, ke de li oni atendis la renaskiĝon de la London-urba romano); sed samtempe li aĉetas nostalgie etan bienon en la plej reva parto de Skotlando, en Lakeland, Lago-lando, kie la plej melankoliaj melodioj de la angla poezio naskiĝis antaŭ cent jaroj. Tie li aĉetas fekastelon — nome Branckenburg — kiu ekstere revokas por ni la mondon de Walter Scott, dum interne ĝi estas plena de la kreaĵoj de l' kubista skulptisto Epstein, kies plej granda kaj preskaŭ sola mecenato estas Hugh Walpole.

En tiu ĉi stranga kastelo li verkas siajn romanojn, kiuj unuflanke ligiĝas al la plej noblaj Dickens-aj tradicioj — precipe en la honesteco de la sentoj kaj en la verkista, ni diru: sociala konscienco —, sed aliparte ili preskaŭ tuŝas la limon de detektivromano en la freŝeco de l' kompozicio kaj ruzeco de l' templekto. En liaj romanoj oni trovas unuflanke tion, kion Henry James nomas simple »verkista vidpunkto« kaj la francaj estetikistoj »impasibilitate«: la internan distancon inter verkisto kaj ties romanfiguro; aliflanke ĉiun lian roman-agadon movas ia arda trohejto, konstanta romantika vervo, memorigante kelkloke pri Victor Hugo de Notre Dame. Kaj la sama verkisto, kiu post Galsworthy unue eksoniĝis denove la potenca simfonio de la generacio-romano, nun direktas jam de unu jaro filmojn en Hollywood, do kultivas la plej-pleje moviĝeman arto-specon. La tuta verkisto estas ia stranga koktajlo de la statikaj kaj dinamikaj vivsentoj, de la klasikismo kaj romantikismo, de la hieraŭo kaj morgaŭo.

Ankoraŭ tute en la Dickensaj tradicioj radikas la unuaj romanoj de Walpole (precipe *Mr. Perrin* and *Mr. Traill*), en kiuj li pentras per kriaj koloroj la anim-mize-rojn de malgranda angla provinclernejo, kiel tiuj aperas en amaraĵ bataladoj inter la profesoroj. En la saman Dickens-an atmosferon nin kondukas la Jeremio-libroj: analizo de knabet-animo, ĝis la sojlo de l' adolesk-aĝo.

Poste venas lerneja ekzemplo pri tiu ĵus menciita transglito al detektivromano en lia *Prelude to Adventure*, ludanta inter la honorindaj muroj de la Cambridge-a universitato — iama »*alma mater*« ankaŭ de Walpole — en la kadro de regula kriminala historio. Poste sekvas la transiro al monumentaleco. Antaŭ ĉio en la *Fortitude*, kies gvidmotivo estas, ke »en la vivo valoras ne la vivo mem, sed la kurajo, kiun ni portas en ĝin«. Samtempe, en ĉi tiu romano montriĝas grava deflankiĝo disde la anglaj — iom hipokritaj — tradicioj, kiuj elfermis el la literaturo la pritrakton de la sekse vivo kaj prefero ekzilis el si Byron, Shelley, Wilde, ol enlasi en la anglan »societyon« la penson, ke la homo ekzistas ankaŭ sub sia talio. Kaj de tiam pli kaj pli aŭdacigas la voĉo de Walpole: tio jam estas »revolucio en marŝo«. *The Duchesse of Wrexhe* temas ja pri la ribelado ekflaranta en la pra-aristokrata junularo; kaj en *The Green Mirror* li projekcias en mond-politikajn perspektivojn la ideon de la slava ribelo, kiu

tra la animo de angla etburĝo, infektas eĉ la pratradian anglan burĝ-socion.

Walpole levigis de sukceso al sukceso. Nun li jam povis dediĉi sian tempon por krei grandkonturan »generacio-romanon«, kaj paŝi en la heredon de la plej grandaj anglaj romanistoj. Kaj la fortikajestro de Branckenburg en Keswick per titana paŝpuŝo malfermis antaŭ si la bronzpordegon de la angla Olimpo, kiam li kreis la okvoluman Herries-serion, ĝisostan generacio-romanon, en kiun li mirinde enportis la strangan duoblecon de sia memo: romantikismon traŝpinitan per tradiciismo, historian temaron miksitam per detektiva vejno, malantaŭ eruptaj individuoj kirligantajn amasefektejojn de dumil-kapa statistaro.

La romano de Herries-familio kondukas la historion de baroke eventriĉa Cumberland-a familio, plektigantan ĉirkaŭ kvar figuroj (du viroj kaj du virinoj), ekde la 18. jarcento ĝis niaj tagoj. La protagonistoj de la kvar partoj (po du volumoj) kaj ilia epoko estas la jenaj:

I. Francis Herries (1730—1774).

II. Judith Paris (1775—1823).

III. Adam Paris (1824—1874).

IV. Vanessa Herries (1875—1932).

Tra ĉi tiu du-jarcenta historio de la Herries-familio la aŭtoro ebligas rigardon al la suprenarkanta vojo da Granda Britujo, ekde la Georgoj, kiam Robert Walpole (nomparence de Hugh) ekrigis la sorton de Britlando tra la kolonia politiko al la mondimperio. En la dua parto ni travivas la epokon de la du grandaj Pitt-oj, kiu, per la venko super Napoleono akiris por Anglujo en Eŭropo la rajton de *primus inter pares*. La fono de la tria parto estas la generacio de la grandaj viktoriaj, Gladstone kaj Disraeli; la kvara parto prezentas la epokon de la triumfa brita imperio, de la bura milito, de la mond-milito kaj fine la postmilitajn tempojn kun la interna, spirita, do pli ol ĉiuj ĝisnunaj granda revolucio de Anglujo.

Ĉi tiuj historiaj medioj kompreneble havas eĉ Walpole nur la rolon de mur-gobelenoj: ili estas nuraj fonoj ĉirkaŭ la peripetioj de la kvar ekzaltitaj, kelkfoje preskaŭ ekstravagancaj ĉeffiguroj. Malgraŭ sia plena angleco, ĉi tiuj figuroj estas ĝisonge romantikaj: Francis Herries, ĉi tiu nura pasio-homo, kiu ribelas kontraŭ la honorindaj tradicioj de sia burĝa familio kaj miksiĝas kun la ciganino Mirabell; Adam Paris, ĉeffiguro de l' dua parto, kiu partoprenas en la preskaŭ revolucia ĉartista movado por povi helpi la subpremitojn kaj malriĉulojn. Dank' al sia sango heredita de patro kaj patrino, arde flagrantan temperamenton havas ankaŭ Judith Paris, kiu germis el la malfrua amo de la ekstravaganca Francis Herries kaj de la ciganino (eble ŝi esprimas plej senpere la duflankan estajon, la ambivalentan individuecon de Walpole). Kaj fine romantika estas Vanessa Herries, eble la plej simpatia figuro de la tuta serio kaj unu el la plej simpatiaj figuroj de la tuta mond-literaturo. En ŝi la malnovaj Herries-manioj glatiĝas en silentan spiton: kurajo, kun levita kapo li staras kontraŭ jarcentaj antaŭjuĝoj de la brita duoninsulo kaj per tio montras vojon al la novaj generacioj ne nur en Albiono, sed ĉie en la mondo, kie la ĉeno de tradicioj katenas la liberon de homo decidi pri si, mem.

Walpole per ĉi tiu romanciklo paŝis inter la novklasikulojn de la mond-literaturo.

(B. G.) NOVA LIBRO DE ANDRÉ GIDE. Kvar jardekojn post la »Nourritures Terrestres«, post ĉi tiu nitsche-e jubila himno de ĝojo kaj ekliberigo, multe trans »je l'vojez« de nia vivo teras, proksime al sepdekaj jaro Gide verkis la »Nouvelles Nourritures«, daŭrigon kaj finon de sia junaga libro. De semajno mi kunportas ĉi tiun malgrandan libron, tenas ĝin en la poŝo kaj de tempo al tempo mi elpoŝigas ĝin, ke — hazarde malfermante — mi relegu ĝin ĉapitron. Mi kredas, ke multaj faros same, ke multaj trovos en ĝi la konsolon, kiun ni ĉiuj bezonas, se ni ĉirkaŭrigardas sur la spiritaĵ regionoj de niaj tagoj. La vojaĝanto povas senti same,

ee, liberiginte el longa tunelo, li ekvidas ĉirkaŭ si sunan kamparon aŭ sur la horizonto rimarkas la brilon de l' maro.

Kial estas eksterordinara tiu ĉi libro, tiu ĉi malforte kunligita serio da lirike meditaj ĉapitroj? Kiu ĝin enrigardis, tiu povas ekstanti ĝian nekutiman forton kaj signifon. Tiu ĉi libro estas *optimista*. Ĝi turnas sin kontraŭ ĉio, kion profetas la plejbonuloj de la burĝa literaturo, ĝi negas la senesperon kaj rigardas kun ĝojo al la estonto. Ĝi trovas la vivon hela kaj la homajn eblojn neelĉerpeblaj. Siatempo ankaŭ en la »Nourritures Terrestres« por la »teraj nutraĵoj« li entuziasmis kaj iom laŭ la maniero de Zarathustra li heroldis la amon al la materia realo, la belon de la movo, la memcelecon de la ĝojo kaj la »senkondiĉan liberecon. Gide vivis kaj skribis tiam sian »immoralistan« epokon. Sian libron li verkis por la kuraĝuloj, eksperimentantoj, katen-rompantoj kiel biblion. Li devenas el la rigor-mora protestanta familio kaj vere kun predikista ardo kaj kredo li postulis la kontraŭon de ĉio, kion postulas la protestantaj predikistoj: la plenan liberigon de la individuo el sub la ligiteco de la burĝa moralo. Lia tuta viv-verko celas tion kaj lia funda problemo estis ĉiam la antitezo inter libereco kaj ordo. Tiu ĉi antitezo kaŭzis ĉe li profundajn kaj gravajn internajn batalojn kaj se liaj verkoj tamen ĝenerale ne estas tragikaj, ties ĉefkaŭzo estis, ke la dostojevskijajn krizojn de sia animo li ĉiam kapablis fandi en la goethean superecon kaj harmonion de sia kontemplado. Sed tiu ĉi fando ankoraŭ longtempe ne signifis solvon. Tio venis nur poste, en la lastaj jaroj. Jam en la »Caves du Vatican« li rekonis kaj en facile-mokema maniero konfesis la fatan veron: ne ekzistas plena liberigo, ne eblas vivi sen ĉia ligiteco. Protos, la gvidanto de la bizara kaj iom surrealistia rabistbando klarigas al Lafcadio, juna heroo kaj privatribelanto, ke neniu povas batali izolite kontraŭ la reganta grupo kaj reganta moro de la »skvamhaultuloj«. Al ia kunularo nepre oni devas ligiĝi: oni devas tien aparteni, oni devas surprizi certajn deojn ĝuste en la intereso de la liberigo. Poste ĉiam plie maturiĝas en Gide tiu ĉi rekono, kies evoluon plej distinge markas la notoj de lia taglibro. La aferon de la individua libereco ĉiam pli li identigas kun la afero de la liberigo de la subpremitaj klasoj kaj en la printempo de 1933 en emocia ĉapitro de la taglibro li deklaras sian aliĝon al la spirita kaj politika movado de ĉi tiuj klasoj. La turmenta antitezo de libereco kaj ordo nun solviĝas por li, li trovas la fundamentan unuecon de tiuj ĉi ŝajnaj antipodecoj. En pli malfrua parolo li klarigas, kial li iĝis socialisto: ĉar li estas individuisto kaj sentas, ke la veran individuismon nur la kolektivismo povas alporti. Li rekonas, ke la individueco de l' homo nur tiam povas klare kaj senmalhelpo elvaliĝi, se ĉiu liberigis de sub tiu materia kaj morala premo, per kiu la moderna kapitalismo peziĝas sur la animoj. Do la individuo devas fandiĝi kun la amaso, ke poste li povu iĝi vera individuo. Kiel li diras en sia drama poemo »Persephone«:

»Il faut, pour qu' un printemps renaissse
Que le grain consente à mourir
Sous terre, afin qu' il reparaisse
En moisson d'or pour l' avenir.«

(Nur tiel renaskiĝas la printempo, se la greno konsentas morti sub la tero, por ke poste ĝi reviviĝu en la ora rikolto de l' estonto.)

Do Gide restis fidela al si mem: li postulas la beloĵon de l' vivo, la plenan de ĝojo kaj por tion atingi kaj atingebli al ĉiu ĝi iris al la maldekstra flanko. La kompendio de tiu ĉi sociala hedonismo estas la »Nouvelles Nourritures«. Kiel la unua »Nourritures«, ankaŭ ĉi tiu estas admona. En la unua, ŝajna admonojn li direktas al junulo imagita, kiun li nomas Nathaniel, en ĉi tiu libro li alparolas la disĉiplon nur »Camaraed« (tiel alparolas unu la alian la francaj laboristoj). Li verkas al venontaj junuloj, li klarigas al venontaj batalantoj, kiel mirinde bela estas la vivo. En la komenco de sia libro li skribas pri la ĝojo, kiu estas la vera enhavo de ĉia vivo, »kiun ni nomas frukto, se ĝi ellasas sukon, kiun ni nomas kaj

Amo — Neratov —

Estis serena, sunplena tago. Tramo rapide kuradis tra sonantaj reloj. En la tramo sidis civitano Ljaskin kaj ridetis al la brilanta, blua neĝo.

Ekstante ies rigardon, Ljaskin eklevis la okulojn. Lin persiste observis ĉarmega knabino en modesta, blanka peltmanteleto. La okuloj de la knabino estis klaraj kaj iomete mirantaj, kiel de infano.

Dolĉe ekĝemis la koro de Ljaskin.

Ho, Dio mia! — li ekpensis ĝoje, sed baldaŭ, ekmemorinte pri sia blueta nazo kaj malgranda salajro, li ekhaltis.

Li turnis sin al la fenestro kaj denove observis la blankan neĝon.

Sed la knabino rigardis plu persiste kaj atente.

Kaj denove ĝoje ekĝemis la koro de Ljaskin.

Dio, kia feliĉo! — li ekpensis inspire.

Cu vere... amo?

Ligovka! — ekkriis la konduktoro, maldelikate rompante la rozajn rovojn. — Haltejo por bluaj biletoj!

Ljaskin ĝemspiris, levis la kolumon kaj eliris. Eliris ankaŭ la knabino. Kaj denove, la trian fojon en la hodiaŭa tago, ekbatis tremante lia koro.

Aŭskulto, civitano! — diris subite la knabino per sonora, juna voĉo. — Pardonu, sed al mi estas tre konata via vizaĝo!

Kvankam iomete malnova, sed tre ĉarma maniero — ekpensis silente Ljaskin.

Mi estas preta servi al vi, sinjorino! — li respondis ĝentile, pretigante sin por aŭskulto.

Mi rekonis, mi rekonis! — ekkriis la knabino ĝoje. — La voĉon mi rekonis! Vi, civitano Ljaskin, pasintjare donis gladi al mia paĉjo kostumon kaj pantalonon, kaj tri rublojn por tio doni vi forgesis! Kaj ĉe la loĝejon vi forlasis tiam! Estas tre senhonte de via flanko!

Ljaskin malheliĝis. Li elprenis la saketon, kalkulis en arĝento kaj en paperoj 2 rublojn 95 kopekojn, sedis ilin en la manon de la knabino kaj foriris.

Tede sonoraĉis la tramoj. Kaj stultega, brilanta neĝo dolore pikis la okulojn.

El la rusa: *Estera Szyndelman*.

birdo, se ĝi kantas. »Ciu besto estas fasko da ĝojo« — li skribas aliloke. Naturo kaj ĝojo signifas por li la samon; Naturo kaj Dio, Ĝojo kaj Dio same identas. Li skribas: »Se kelkfoje mi nomas la naturon Dio, tion mi faras nur, ĉar tiel estas pli simpla kaj ĉar tio ĉagrenas la teologojn.« Li rigardas sia sankta destino esti feliĉa, ĉar, kiu volas feliĉiĝi la kunularon, tiu devas montri ekzemplon de feliĉo. Sed li rifuzas tiam feliĉon, kiu sin nutras el la mizero kaj malfeliĉo de aliaj. Li ne volas kaj ne povas esti feliĉa je la malutilo de aliaj. Li skribas: »Mi naŭziĝis de ĉia ekskluziva rajto« kaj diras, ke li preferas la publikajn parkojn al la plej bela barita ĝardeno; kaj multe pli kara estas ol la multekosta luksa libro al li la volumo, kiun li ne devas zorgi gardi, kiun ankaŭ dum promenado li povas kunpreni. »Se mi estus la sola, kiu povus ĝui iun artverkon, kiom pli bela estus la verko, tiom pli forte subpremus mian ĝojon la tristo.«

Li kredas la homon kaj la eblon de l' homo. Li kondamnas tiun falsan modestecon kiu asertas, ke la homa animo nur per helpo de dia revelacio povas rekonii grandajn verojn. La homo povas ĉion atingi, se li kuraĝas. »Ose deveni qui tu esse« — li krias, kuraĝu iĝi tio, kio vi estas, minu el vi la novan homon kaŝigantan en vi. »Mirindaj ebloj sin kaŝas en ĉiu estaĵo. Konvinku vin

mem pri via forto kaj juno. Ripetu senĉese: dependas nur de mi mem! La postulas maltrankvilon, nekontentecon kaj persiston. Kaj ĉiaman evoluon. Li rifuzas la troan memanalizon. Se la raŭpo ĉiun sian forton eluzur nur por »ekkonii sin mem«, neniam ĝi evoluus en papilion.

Sur la lastaj pagoj la meditema voĉo igas metala, kvazaŭ li anoncus manifeston.

»Levu vin, kliniĝintaj fruntoj! Levu vin, rigardoj direktitaj al tomboj! Sed ne al la malplena ĉielo, sed al la horizonto de l' tero... De tiu ĉi kadavro-odora pejzaĝo tien vin flugigu via espero. Ne retenu vin la amo al la pasinto. Kuregu al la estonto. Ne en sonĝojn transportu la poezion, en la realo ĝin ektruvo. Kaj se ankoraŭ ĝi ne estus tie, portu ĝin tien... Mi volus... ke ĉiu arbo etendu sian frukton al viaj manoj kaj lipoj... Ke fine amo plenigu vian koron anstataŭ malamo kaj envio. Ke fine vi povu transdoni vin mem al ĉiu kareso de la aero, al la sunradio, al la voĉo de la feliceo.»

»Ne oferu al la idoloj! — per ĉi tiu krio finiĝas la libro. La tristan voĉkaoson de la nuna pesimismo-koncerto de la eŭropa spirita vivo la voĉo de Gide fendas fiere, metale kaj konsole.

LUGI PIranDELLO: »ONI NE SCIAS KIEL«. La itala Nobel-premiito kreis ĉi tie agmalriĉan dramon de internaj streĉoj. Diskutado vicigas al diskutado. Kvin personoj nudigas sian animon en paroloj komence aĉaspektaj sed poste altigantaj al kristala klareco. La scenejo restas ag-malplena. La eksterordinaraj okazaĵoj estas farataj ekster ĝi. Jen okazis: Grafo Romeo Daddi, loĝanta kun sia edzino Bice en kastelo proksima al la urbo, gastigas la edzinon de sia amiko Giorgio Vanzi, kiu estas oficiro de la maristaro. En la antaŭtago de la reveno de la oficiro, Genevra, lia edzino, en varmega, reva somera matenhoro senreziste donas sin al la ŝin postulanta grafo Daddi. Oni ne scias, kiel tio povis okazi. Post tio, ĉio restas neŝanĝita, sed nur ŝajne. En grafo Daddi estiĝas la sento de granda kulpo, pri kiu li opinias sin ne responsa, sed kiu igas lin plej interne dubi pri la justa organizo de la mondo. Kiel, li argumentas, povas vivinda esti vivo, en kiu, ne sciante kiamaniere, oni povas fari senpripense murdon, trompi amikon, ne estante tamen fakte »malbon-intencas«. »La edzino de mia amiko estis mia; kiu do eble posedis la mian, senkulpe veninte en tian teruran senvolecon? Ni ĉiuj, li diras al si, ĉiam, kaj sen porti la respondecon pri tio, povas igi partoprenantoj de trompo kaj malsincero, murdo kaj mortbato; estas kiel en sonĝo: la edzino ŝongas pri la kisoj, kiujn donas al si alia ol la edzo, ŝi sentas la kisojn, ŝi ĝuas ilin kaj se tion sciis la edzo, tio estus adulto, ne malpli dolora ol la fakte okazinta, ĉar, ĉu la forto de la sento ne estas la sama kiel dum la realeco? Kaj tamen, la edzino ne kulpas, ĉar neniu povas influi siajn sonĝojn, kaj ankaŭ la regado de la subkonscio dum la maldormaj horoj de nia vivo forigas nian respondecon kaj kulpon. Pirandello laŭ tio opinias, ke la homo ne kapablas, kompreni la »kosmajn« influojn en sia animo. Grafo Daddi devas morti. Falante, trafita de la kuglo de sia amiko, li vokas: »Tio estis home farita!« La homo komprenema pli ol kutime do estas malsana? Ĉi tiu dramo de tranĉilakra, pinta diskutado estas brile konstruita, kaj skribita en ege cizelita, riĉa kaj bela lingvo; ĝi intereseĝas de la unua ĝis la lasta vorto. La grandioza, intelekta batalo de ĉiu unuopulo en ĉi tiu verko; la nekutima streĉo de ĉiu persono, teni sian situation en la vivo, kreas densecon, atmosferon plenigitan de streĉoj, en kiu la koncentrita, transpirita agado okazas de senspira partopreno de la rigardanto. Vere, ĉi tiu tekniko metas anstataŭ la »materias« ago la dinamikon de ago anima, kio havas tiel fortan efektan, ke ĝi trabruas la scenejon kiel la paso de granda batalo. F. W. V.

Lingvo Libro nro 4. 1935

kun la programo por 1936. estas nun kompostata kaj kune kun la enhavotabelo ĝi estas aparte sendita al ĉiu aboninto de 1935 post du semajnoj.

Mortis nederlanda Esperanto-pioniro

Vane oni serĉas en la Enciklopedio la nomon de sinjoro M. J. Wessel, kiu kun sinjoroj H. J. Balthuis kaj Drees Uitterdijk estis la tri unuaj pioniroj de la Esperanto-movado en Nederlando. Lia modesteco ne deziris, ke lia nomo aperu tie. Nur sub la vorto »Nederlando« oni trovas sekan mension de lia nomo. Lia modesteco ankaŭ estis kaŭzo, ke preskaŭ neniu el la nuna generacio konis ankoraŭ la nomon de sepdekjarulo, kiu preferis lasi la vicojn al la pli junaj. Nur kelkfoje li verkis ankoraŭ studon pri arto en »Literatura Mondo« kaj iom pli ofte li publikigis poemon en »Kristana Gazeto«. Sed verve vivis ankoraŭ en li la esperantista koro. Multajn sugestojn la subskribinto ricevis de la tiom pli aĝa kolego. Multaj gazetoj konas lia kiel »bonfaton. Dum multaj jaroj jam de antaŭ la milito li estis fidela membr» de UEA (lia membro-numero estis 1744) kaj kiam li antaŭ ses jaroj transloĝiĝis al Baarn, li volonte akceptis la inviton de la ĉefdelegito en Nederlando fariĝi delegito en Baarn. Depost tiam ni konis unu la alian. Depost tiam ni regule vidis unu la alian kaj baldaŭ niaj reciprokaj vizitoj ne plu estis pure formalaj. Kun danka memoro pasas antaŭ niaj okuloj la horoj kiujn ni estis kune.

Sinjoro Wessel estis forta viro. Depost la naskiĝo li estis en la lito pro malsano nenium tagon, eĉ ne pro malvarmumo. Vespere de la 7-a de januaro li ankoraŭ biciklis kaj ludis ŝakon. Kiel li deziris, li subite, sen doloro, sen longa malsano mortis. Je la 8-a li estis mortinta. La multaj konatuloj de la ĉiam gaja, juna maljunulo memoro sin dum la tuta vivo.

Joh. H.

Ni sendas

al ĉiuj abonantoj de 1935. ĉi tiun numeron. Bonvolu atenti, ke la gazeto aperos ĉiam en la unuaj tagoj de la paraj monatoj. Ni esperas, ke post ricevo de tiu ĉi dika numero sendos la abonon ankaŭ la ĝis nun ne pagintoj. Kiuj ne plu volus aboni, bonvolu remeti la gazeton en la kovrilon kaj resendi al ni.

Literatura Mondo nro 9. 1935

estas malĝuste numerigita. Bonvolu atenti, ke la decembra numero estas efektive novembro-decembra kaj devus surhavi ankaŭ la numeron 9. Tio tamen estas forgesita. Niaj abonantoj certe jam vidis laŭ la amplekso, ke ĝi estis duobla kaj aliaj bonvolu pardoni tiun fuŝon. Feliceo dum kvin jaroj nur unu fojon okazintan.

Krucvorttenigmo

La pasintnumera krucvorttenigmo elvokis bonan interreson. Ni ricevis kelkdekojn de solvoj, inter kiuj la plej unuaj eŭropaj estis J. Csapó (Timiŝoara), W. Perrenoud (Neuchâtel), Pascha (Bergen), Pujo (Bersson), Vaŭtilavicius (Gaudelieu), Vatré (Genève), al kiuj (krom s-ro Pascha) ni sendis la premiojn. Car venis samtempe ankaŭ alia solvo, ni eldonis ankaŭ sepan al fraŭlino Lekko en Tallinn. Ekstereŭropajn solvojn ni ankoraŭ atendas. Ii ankoraŭ ne povis alveni.

Jen la novaj libropremioj; donataj al la unuaj solvoj:

Por ekstereŭropanoj:

1. *Ibanez*: Sur sango kaj sablo
2. *Dante*: Divina Comedia
3. *Wolski*: Ĉu ĝi estas nur fabelo?
4. *Toscani*: Rakonto por geknaboj
5. *Wladyka*: Mi en li
6. *Pri l' moderna arto*

Por ekstereŭropanoj:


1. *Dante*: Divina Comedia
2. Pentroarto en malnova Hungarujo
3. *Deĝuŝi*: Perpoema vortaro
4. Amo de Tojjuuro kaj Vojaĝo en Faramidon

Horizontale:

1. Unua pioniro de Esperanto.
8. Patro de la E. poezio.
17. Japana E. pioniro, 1931.
18. Sufikso.
20. La agro estas...
21. Pola pioniro, fama tradukisto.
23. K. Z.
24. N. H.
26. Multnombra.
28. Konsenti!
30. Inverse: superlativo absoluta.
31. Skabiokaŭzanta insekto (?).
33. Rusa E. poeto en la 1-a periodo.
35. Fondinto de la grupo en Bratislava (C. S. R.).
37. Kunfondinto de »Verda Kato« en Parizo.
38. Senŝeligita, pistita greno.
40. Konsonanto (fonetike).
41. E. B. K.
42. Konjunkcio.
43. Ekstrema parto de nazo (helico, ŝraŭbo ktp.).
45. Lia pseŭdonimo estas: Leo Turno.
48. Gerarda, nederlanda propagandisto.
49. Rumania esperantisto, verkinto de »Spite la vivon«.
51. Rusa pioniro, trad.: »Princino Mary«.
52. Ligna glitumilo (?).
53. Interjekcio.
54. Sufikso.
55. Germana pioniro el la 1-a periodo.
58. Fama amerika pioniro.
61. Prepozicio.
63. Prefikso.
64. Sufikso.
65. Verbo, signifanta modon (?).
66. Inverse: diftongo.
67. Poseda pronomo per duobla w.
68. Prezidanto de ICK en 1923.
71. Perceptebla per flarsento (?).
72. K. ŭ.
73. Patro de patro.
74. Malofta (?), neologismo.
76. Direktoro de germana E. Presejo.
78. Inverse: Laborista mondorganizo.
79. Franca pioniro, fondinto de la Esp. rugkruca societo.
82. Reorganizinto de la bavara E-Ligo.
83. Ankaŭ inverse la sama.
85. Inverse: monogramo de fama E-isto.
86. Alkala bazo (?) kun miksitaj literoj.
87. Inverse: peni ne esti trafita de io
89. Kunfondinto de la Saksa E. Inst.
93. E. G. U.
95. Nemaŭna.
96. Fama blinda fortepianisto, hungara E-isto.
97. Kompilinto de la Enciklopedia vortaro.
99. Rusa esp. verkisto.
104. Japana Esp-isto, kunfondinto de la Jap. Esp. Proleta movado.
107. La virino estas ĝia sklavino (?).
108. Identaj vokaloj.
109. Prefikso.
111. Angla eks. sekr. de BEA.
114. Muzikinstrumento (?) kun miksitaj literoj.
115. Anglino, esp. tradukistino.
117. Somerdomo.
118. Estona pioniro.
121. N. T. in.
122. Eldoninto de Lingvo Internacia 1900—1904.
124. Kredo de realiĝo de deziro (?).
125. Germana pioniro 1901.
126. Lirika poemo.
127. Japana religia movado, uzanta E.

Vertikale:

1. Polo, verkisto de Historio de Esperanto.



2. Hispano, eksprez. en Valencia.
3. M. B.
4. Samid... (adjektiva formo).
5. Mallongigo komerca.
6. La unua reĝimo de la Int. Floraj Ludoj.
7. Prefikso.
8. An... (korprema).
9. Komenco de la alfabeto.
10. Pola eksprezid. de la UK, de Krakovo 1931.
11. Grasa fluidaĵo (en adjektiva formo).
14. Koparo.
15. Korelativo kaj universala kunjunkcio.
16. Bulgara pioniro.
19. Inverse: prefikso.
22. Horizontala tabulo (?).
24. Subtera ejo, kun la komencon (?).
25. Sinonimo de kunporto, neologisma vorto (?).
27. Anima premo.
29. Inverse: korelativo.
32. Narkota substanco.
34. Fonetike: perlaboro.
37. Skribo por nelogesi (?).
43. Multaj el sama alero.
44. Normanda SAT-ano.
46. H. A. T.
47. Muzikinstrumento kun miksitaj literoj (?).
49. Vesto por homaj membroj.
50. Mondorganizo.
53. Interjekcio.
56. Fadenforma sentorgano.
57. »Neas vorto.
59. Sen vesto.
60. Scienca branĉo (mallongigo).
62. Pastro-redaktoro, franca esp.
67. Grandan Esp. germanan vortaron li kunmetis.
68. Usona pioniro.
69. Pronomo.

70. Kontraŭo de »perdas«
71. Italo tradukis; »kurioza okazaĵo«.
72. Konjunkcio.
75. Fare.
76. Advokato de Esperanto.
77. Inverse; komerca mallongigo, kun duobla konsonanto en la mezo.
80. Sufikso.
81. »L...« skribmaterialo fluidaĵo.
82. ... estas kiu ne mortis.
84. Sufikso.
88. Turni en kontraŭan direkton.
90. Senordo (ĝi vortas ĉapon surkape).
91. Ofta mallongigo inverse, kun ĉapelo erare metita sur la kapon.
92. Konsonantoj de vorto inverse signifanta konstantan agon.
94. Inversa far.
98. Vokaloj de la vorto bela.
100. Inverse; kun ploraj okuloj.
101. Inverse; rabobirdo.
102. Grado de uzebleco.
105. Sufikso.
106. Angla esp. mortis en 1906. vizitante la U. K. en Genevo.
110. Sufikso.
111. Alkoholo (?).
112. Longecmezurilo (?).
113. Parteto de la jaro.
114. Konjugacio finaĵo kaj prepozicio (kunskribite).
116. Tri sinsekvaj literoj de la Alfabeto.
117. Inverse; ronda vazo, sen la komenca litero (?).
119. Esprimas doloron.
120. Sufikso.
123. Ofta mallongigo en jarlibro de U. E. A.

LUMAJ NOKTOJ

Fragmento el romano „Tomas Nipernadi”

— August Gallit —

Sajne li estis jam sufiĉe longan tempon survoje — li estis laca kaj polvokovrita. Li rapidis nenien, iradis simple por sia plezuro kaj amuzo tra arbaroj kaj landvojoj kaj kelkfoje ripozis sub iu arbusto, en la ombro de iu arbo, en iu malnova fojnejo ie ĉe marĉo. Li ne estis pretendema kaj kontentiĝis per malmulto.

Ofte li tute deflankiĝis de la vojo, iris tra kampoj, trafis en profundan arbaron kaj erarvagadis tutajn tagojn en densejoj (kaj sovaĝejoj, ĝis kiam li denove trovis ian irejon aŭ vojon. Kelkfoje li haltis sur la bordo de lago, ĉe la kurbo de rivero, kaj, kiam li kredis estis sola, li kantis, ludis harpon aŭ laŭtvoĉe parolis kun si mem. Kun intereso li ekobservis ian birdon, ian baraktantan insekton sur herbotigo, ian papilion — ĉiu lia muskolo streĉiĝis pro intereso kaj atento — sed poste li ekvekiĝis kaj denove ekiris plu. Nenie li restadis longe, lin okupis senpacienca maltrankvilo, li nervadis senĉese kaj li iradis kvazaŭ ion serĉante.

Kelkfoje li subite sen videbla kaŭzo ekiris returne laŭ la venita vojo — ekboj de vaganta hundo, subita ekgrako de korniko povis tute difekti lian humoron. Ĝis kiam ankoraŭ sufiĉis pano en la poŝoj, li evitis homojn kaj la loĝejojn, li ĉirkaŭiris per granda rondo. Kiam homo venis al li renkonte, li jam frue deturniĝis en la arbaron kaj atendis pacience malantaŭ arbo, ĝis kiam tiu pasis.

Foje li haltis antaŭ vilao, deprenis la ĉapon kaj ekkantis. Sed kiam en la fenestro aperis dormema vizaĝo de viro, li interrompis la kanton, alturnis abrupte la dorson kaj daŭrigis sian vojon. Aliajn fojajn li kaptis en marĉo multe da viperoj kaj portis ilin en malplenan fojnejon. Vespere li alportis kompletige ĉapelpenon da lampiroj. Poste li mem sidigis sur la tero kaj ĝuis, rigardante la strangajn lumetojn ĉirkaŭ si kaj aŭskultante la koleran sibladon de la viperoj. Kaj tiel li ekdormis inter ili. Sed matene la viperoj estis for kaj la lampirojn li trovis nenie. Li estis ial ĉagrenita kaj seniluziĝita kaj li ekmigris plu. Ie estis en li rompita kaj senordigita. Sajne la lumaj noktoj estis la kaŭzo de lia maltrankvilo.

La senpluveco daŭris. La suno, flamanta fajro-rado, disjetadis fajron kvazaŭ el radradioj. La vento dormis kun la fermita buŝo kontraŭ la varmega tero — eĉ folio ne tremis, eĉ herbotigo ne moviĝis. La rostita tero estis malmola kiel ŝtono kaj ardis kiel ruĝvarma fero, prenita el fajro. La musko de la arbaro estis bruligita kiel karbo de keno, tuŝate ĝi disflugis kiel polvo. Brulis la marĉoj, la densaj nuboj de la fumo disfluis, kovrante la ĉielon kvazaŭ per flava vualo. Kiam iu veturis sur la landvojo, longa, longa polvonubo serpentumis post li — longe, longe ĝi ŝvebis en la aero, kvazaŭ drako maldiligente movanta la voston kaj per la kapo rapide persekutanta la veturanton, dum unuopaj vertebroj de la spino restis malantaŭ iu bosko, iu monteto sur la zigzaga vojo. Estis konsterne silente.

Eĉ la birdoj dormetis lace en la densejoj, kun la flavaj bekoj spiregante malfermitaj. Nur malgranda kanbardo pepis soife, ficedolo¹⁾ ĉirpis maltrankvile, galmago flirtis ekriante super la bruligita marĉo. Ie malproksime en la arbaro sonis la voĉo de kukolo, sed

eĉ tiu, narkotita de la suno kaj la odoro de rezino, kukuis kun longaj intervaloj, ofte ripozis kaj kolektis forton. Kelkfoje ĝi komencis fervore, sed faliginte el la beko la unuan parton de la kanto — kuk —, la duan — ku! — eĉ ne sekvigis.

Kiam alvenis vespero, la aero estis plena de akra fumo kaj polvo. La akvo de la lagoj estis sunpaligita kaj senkolora. La subiranta suno tra la fumo kaj polvo ŝajnis rustbruna, falis por momento flamante malantaŭ la arbaron, sed la lumo ne ĉesis. La firmamento helis roze, kelkaj unuopaj nuboj vagis tie kvazaŭ ruĝaj veloj. La kuprobruna luno supreniĝis al la rando de la ĉielo, sed post momento jam paliĝis kaj malleviĝis denove — la ĉielo eklumis pro naskiĝo de nova tago. La noktoj estis mallongaj kiel momento, lakte palaj, flame varmegaj, plenaj de la venena odoro de trifolio, rezino kaj marĉo leviĝis malgranda nubelo, nur el sufiĉe malalta marĉo leviĝis malgranda nubeto kaj disiĝis rapide kiel fumo de pafilo. Komenciĝis nova tago, ankoraŭ pli varmega ol la antaŭa — nur la grizaj folietoj de la arĝentsaliko ektremis por momento pro timo de la sunleviĝo. Kaj arbaluido ekvoĉis krie, sed poste ankau ĝi malaperis rifuge en la marĉo.

Tomas Nipernadi jam trairis la arbarojn de Jaanihansu, la vojo krute malsupreniĝis. Antaŭ li malfermiĝis la vastaj marĉoj kaj torfejoj de Maarla, el kies malaltaĵoj leviĝis kiel tuberoj nur unuopaj insuletoj. Sur tiuj montetoj staris malgrandaj domoj kaj malarĝaj kampstrioj de malriĉuloj, komenciĝantaj ĉe la domoj kaj penetrantaj kiel fisostangoj rekte en la marĉon. Mallarĝa, serpentuma vojo, apoganta sin pontone al la marĉaj razenoj kaj arabaj radikoj, kunigis tiujn insuletojn, jen iom leviĝante, jen tute malaperante en la akva putraĵo de la marĉo. El la arbaroj de Jaanihansu elfluis la larĝa rivero Kaava, sed atinginte la marĉojn de Maarla, ĝi disfluis, estigante laĝetojn, flakojn kaj putromarĉon. Nur fore, ĉe la akvofalo, la rivero denove kuntiriĝis, refluis en la fluejon kaj mugante falis malsupren tra la katarakto. Ĉe la akvofalo staris pramo kun malgranda kabano de la pramisto sur la bordo, dum sur la kontraŭa bordo estis drinkejo, ĉirkaŭata de alnoj, arĝentsalikoj kaj marĉaj betuloj. La ruĝa tegmento de la drinkejo vidiĝis kiel lumturo tra la marĉo.

Nipernadi intencis jam ekiri malsupren, sed jen li eksentis subitan ventblovon. Kiel hundo ĝi ekbojis jelpo, unu fojon, duan, trian. La arboj kaj arbustoj ekzumis, la polvo de la landvojo portiĝis kiel turniĝantaj kolonoj al la marĉo. La arbaro kvazaŭ ektremis, komence malforte, ie interne, en la koro, sed poste ĝi komencis muĝi kaj ŝanceliĝi kaj la suproj de la piccoj balanciĝis kiel kano.

De trans la marĉoj leviĝis karbnigra nuboj. Kvazaŭ morne nigra muro ĝi supreniĝis rekte el la tero.

Ĝi leviĝis rapide, egale, dum la rando blankis kaj radiis. Jam sonis ankau malproksima bruo de tondro kvazaŭ el fermita ejo. La viro haltis ravite.

Per la leviĝado de la nuboj la tuta tero distranĉiĝis je du malegalaj partoj. Tiu, kiu restis sub la nigra muro, fariĝis karbnigra, kvazaŭ vintra nokto sterniĝis super la kampoj. La arbaroj, kampoj kaj domoj

EPISTOLO SENTIMENTALA

— Juljan Tuwim —

1.

Karesas min varma ĉambreto,
Aminda, brilanta, serena...
Mi volas nun vin pridonaci
Per ĉi epistolo sentplena.
La lampo mistere lumetas
Elsube de verda ŝirmilo...
Solsidas mi — vidvo maldolĉa —
Ĉe forno, en mola sidilo.
Kaj brandon ĉerizan, ŝtelitan
El panja provizo-regalo,
Trink-trinkas mi inde, trankvile.
El ĉeha eks-moda pokalo.
Mi fumas... Kaj eble en fumo
Bruligas estinto-fantomon,
Per blua rubando skribante
El buŝ', sur aer', vian nomon?

2.

Faligis min rev' pri potenco,
Bataloj, pasi', idealoj!
Dormetas mi dolĉe, kuŝante,
Kaj songas pri bluj migdaloj.
Vidiĝas petolaj »etetoj«
Aŭdiĝas »cimbaloj-kabaloj«,
Kaj tiuj fabelaj, neebraj
Reviĝas nun bluj migdaloj.
Mi vidas... vi ilin persiste
Etigas kaj pistas, muelas...
Kaj mi kun teruro demandas:
»Plej kara! do kion vi celas?«
Kaj vi en respond': »Ne malhelpu!
Kaj min ne kapturnu... Regalan
Torteton por via fianĉiĝo
Preparas mi nun... blumigdalan!«

3.

Mi havas tagojn tre sentemajn,
Infan', ĉagrene-senklopoda,
De Dickens, Walter Scott mi legas
Kaj sentas min antikva-moda.
Kaj havas strangajn aventurojn,
Forkuron en romana stilo,
Nekonatulojn tre misterajn
Sur voj' en poŝta veturilo.
Mi vidas vin — en krinolino, —
En manoj preĝlibret' necesa...
Kaj mi forgesas, ke ja estas
Nun jaro mil naŭcent deksesa!
Lasante mian varman ĉambreon,
Tra strat' mi kuras pluvmalseka.
»Poŝtveturil'!... ne! fiakro!... flugu!
Kastela strat', numer' kvindeka!«

4.

Kaj jen memorigas... delonge
Al mi nevidata ĉambreto...
Sur muroj bildetoj multnombraj.
Sofeto, pianino, kaj breto...
Belaj': kusenetoj, floretoj,
Libret' (netranĉite-kutima),
Fenestrkurtenet', speguletoj...
Ho, kara sanktej' malproksima...
Seĝetoj, tableto trezora,
Ĉar dormas en eta tirkesto,
Sub roza rubando amase
Leteroj de mi — amatesto.
... Kaj se al tablel' vi aliras,
Aŭdiĝas: tirkesto silente
Pro ar' de teruraj leteroj
Sopiras, respiras turmente!

5.

Ho, Di'! ĉu estus forgesota
La kanari' en kaĝo ora?...
(Dum pluv' por grajnoj en butikon
Mi akompanis vin honora.)
Ĉe kanari-ĉskulapino
Konsultis vi tre malkvieste,
Ĉar Maĉjo foje ĉesis kanti,
Rezignis pro malsan' komplete.
Ne scias mi, ĉu regajiĝis
Mate', sinjor' melankolia...
Laŭ mi — ĝi devas ĝemi kiel
Tableto pro letero mia!...
Mate', malnova ci amiko,
Se resaniĝo estas fakto,
Kaj ci nun kantas — ho! pardonu,
De ci ĝi estas ja — netakto!

6.

Vivfinas la malgajoj ŝercaj
Kaj vi, malgaja ŝerĉpetolo...
Post dudek strofoj — jen finiĝas
Sentimentala epistolo.
Okul', ne ploru!... Pli mallaŭte!
Malĝoj' finiĝos — ĝoj' finita...
Bonfartu, mia malproksima,
Mia pasinta kaj perdita!...
Jam kaptas min dormemo granda...
Mort' venas sen dolor' min preni...
Mi vin ne vidos eĉ en sonĝo:
Vi eĉ en song' ne volas veni...
Tamen al dormo min afabla
Man' malproksima lulos tiam...
— — — — —
Horlog' tiktakas: »Ne-neniam...«
Sed koro batas: »Ĉiam — ĉiam...«

El la pola: Leo Belmont

kvazaŭ malleviĝis en abismon. Sed ĉi-flanke blankis kaj radiis ankoraŭ ĉio, la suno brilis ankoraŭ super la marĉoj kaj kampoj kaj flavaj polvokolonaj turniĝadis gaje unu post la alia al la marĉo.

Vento silentiĝis, kvazaŭ streĉe ekaŭskultante. La arbaro kvazaŭ ekĝemis kaj ekstaris kandelrekte en ekstata atendo. Eĉ neniu herbotigito moviĝis. La birdoj ekatendis kun batanta koro, ne estis aŭdebla eĉ la plej malgranda ĉirpado, fajfado, pepado, kaj eĉ la akridoj desigis la segadon. Nur malfruiginta korniko flugis

terure grakante al la arbaro. Estis stranga silento, solena atendo kaj ekscito pro io granda kaj timiga.

Sed jen ekridetis subite la vento, kvazaŭ furioziĝinta ĉevalo ĝi starigis sin sur la malantaŭaj piedoj, ekkaptis arbojn, taŭzis arbustojn, leviĝis gaje renkonte al la nuboj kaj uragane ekrapidegis tra la marĉoj kaj arbaroj. Ekmugiĝis la arboj, la arbustoj estis kvazaŭ frenezaj, ĉiu branĉeto, ĉiu herbotigito turniĝadis, susuris, fajfis, Jam falis la unuaj gutoj sur la varmegan teron, grandaj kaj pezaj. La karbnigra muro de la nuboj

estis leviginta en la mezon de la ĉielo, ĝia larĝa rando brilis kaj radiis kiel flavaj flamoj de fajro. Sed poste la suno malaperis malantaŭ la nigra muro kaj malserena vespera krepusko sterniĝis super la tero. Nur la malproksimaj montetoj antaŭe helis ankoraŭ momenton. La tondrobruo proksimiĝis rapide. Ekpluvis.

Tomas Nipernadi ekrigardis senhelpe.

Sed jen li subite ekvidis viron, kurantan de la arbaro.

Peze, malgracie, swingante la manojn, li kuris rapide al la drinkejo de Kaava. Liaj mallongaj piedoj en la pezaj krurbotoj ŝanceliĝadis kvazaŭ ebrie. Li estis malalta, dika, kun la malgranda kapo tute ĉe la ŝultroj. Sufiĉe longan distancon post li kuregis junulino, permane tenante la pendajon de la jupo.

— Kūūp, Kūūp, vokis la junulino, Kūūp, ne lasu min sola!

Sed Kūūp eĉ ne rerigardis, li flugis demonte kiel ŝarĝita ĉevalo.

— Kūūp, aĉulo, kriis la junulino lamente, atendu do!

Subite eksonis laŭta ekrakado de tondro tute proksime. Akvostrioj ekfalas kvazaŭ tra malfermitaj digoj. Sur la varmega tero, kiu nur antaŭ momento polvis, estiĝis rapidaj fluetoj, komence malgrandaj, senfortaj, sed baldaŭ ili diligente ekfaris sulkojn, survoje ili kuniĝis, larĝiĝis, kvazaŭ per akra nazo plugis al si fluejon kaj plaŭdis jam en longfosajoj kaj inter flankoj gaje antaŭen. La pezaj gutoj, albatante la teron, dispeciĝis je fajreranta polvo. La tero vaporis kaj bolis.

La junulino haltis meze de la vojo, per simplenaj okuloj ĉirkaŭrigardante.

Per unu salto Nipernadi estis apud ŝi, ekprenis ŝian manon kaj ekkuris kun ŝi al proksima duonruina fojnejo. Tute malsekaj, gutante de akvo, ili saltis en la fojnejon.

La digajoj de la ĉielo fluis malsupren kiel ŝaŭmantaj akvofaloj, radiis, brilis, muĝis. Jam fluis de la deklivoj kaj montetoj larĝaj riveretoj malsupren al la marĉo, portante sur la dorso pezajn ŝarĝojn — defalintajn foliojn, sekajn branĉojn, putrajn strobilojn kaj survoje kuntiritan koton kaj ŝlimon. La malpli

altaj lokoj fariĝis grandaj flakoj kaj grizaj akvejoj. Fulmo hakadis la ĉielon, kvazaŭ el sennorme granda fajrejo disjetante blindigan fajron. La aero tremis kaj obtuze sonis pro la senĉesa bruado de tondro kiel malplena ejo. Estis konsternite varme kaj sufoke.

— Kio estas via nomo? demandis Nipernadi.

— Anne-Mari, — respondis la junulino, forviŝante akvon de la vizaĝo. Ŝiaj malsekaj haroj falis sur la varioldifektitan vizaĝon, la du malgrandaj okuloj rigardis iom malserene kaj kolere. Je ĉiu tondrokrako ŝi ektemis timeme kaj ŝoviĝis pli proksimen al la junulo. Pro la gutado de la vestoj estiĝis ĉirkaŭ ŝi sur la planko malgrandaj flakoj.

— Kaj kion vi faris tie en la arbaro? demandis Nipernadi. Vi tute ne aŭdis la proksimiĝon de la ŝtormo?

— Ne aŭdis, estis tiel kviete kaj bele. La suno brilis kaj...

Subite ŝiaj pensoj kvazaŭ ekhavis la gustan direkton.

— Tiu Kūūp, fiulo! ŝi diris riproĉe. Lasis min meze de la vojo por batado de fulmo! — tia malkuraĝulo. Ne indas plu alfoje iri kun tiaspeculo en arbaron. Estis tiel varme kaj mi, stultulino, ekdormis sub arbusto. Nu, kaj kiam la vetero fariĝis karbnigra kaj fulmo subite komencis frapadi, Kūūp saltleviĝis kaj kiel freneza ekkuris al la arbaro. Pri mi li tute ne pensis. Tia pigo! Ni estis nur por iom da tempo venintaj en la arbaron por kolekti berojn kaj promeni.

— Kiu estas tiu Kūūp? demandis Nipernadi.

— Kūūp estas drinkejisto, jen tie, ĉe Kaava — la junulino montris tra malfermaĵo de la fojnejo per la dikfingro al la marĉo. — Ne estas ja tiu drinkejo ia trezoro, somere ĝi estas malplena kiel sako. Nur muŝoj vagadas sur la malplenaj tabloj. Sed vintre estas iom pli agrable, tiam la viroj venas hejmen de la eksteraj laboroj kaj ankaŭ la karavanoj de la ciganoj revenas. Tiam Kūūp havas sufiĉe por fari.

— Ciganoj, tie ĉi en la marĉo? miris Nipernadi.

— Guste ili! akcentis Anne-Mari konvinke. Rigardu tien maldekstren — la junulino montris per la dikfingro trans la ŝultron — tie estas iliaj kabanoj.



Béla Czobel

Stratoparto

La arto

— Théophile Gautier —

Jes ja, la verk' pli belas,
se l' ŝtofo pri l' labor'
ribelas:
verso, oniks', marmor'.

Falsa malhelp' forestu!
Sed por rekt-marŝa uz'
survestu
kotornojn striktajn, Muz'!

Se l' ritmo plate pasas:
fi! — ŝu' de troa grand'!
Ĝin lasas
kaj prenas ĉiu pland'.

Skulptist'! for la molfleksa
argil', cedanta al prem'
poleksa,
dum la spirit-flugem'!

Luktu kun ŝton' Karrara,
Parosa: gardos dur'
pri rara
pureco de l' kontur'.

Bronz' Sirakuza decas,
kie per firma ark'
impresas
fiera-ĉarma mark'.

Per mano delikata
sekvu en la tavol'
agata
profilon de Apoll'.

Penrist'! Ne akvarelu!
La farbon por rezist'
akeclu
en forn' de emajlist'.

Faru sirenojn bluaĵn,
kun vostoj volve en fon'
trafluaĵ;
la monstrojn de blazon'!

Sub aŭreol-trilobon
Virginon kun Jesuet';
la globon
kun krucifiks-siluet'.

Forpasas ĉio. Staras
nur art' eterne plu.
Urb' falas;
transvivas ĝin statu'.

Kaj la medal' plugfere
fosita el kampar'
severe
atestas pri cezar'.

La dioj mem formortas.
Sed suverena vers'
pli fortas
ol ĉia bronz' kaj erc'.

Skulptu, fajlu, cizelu;
ke l' rev', ĉi fluga flock',
sigelu
sin en rezista blok'!

El la franca: *K. Kalocsay.*

Nun ili estas malplenaj, nur Jaan Trotulo loĝas tie — eble vi jam aŭdis pri Jaan Trotulo? Lia vera nomo estas Jaan Indus, sed Trotulo oni nomas lin pro tio, ke li estas freneza kaj opinias sin ĉevalo. Batante sin malantaŭe per vipo, li kuradas henante tra la marĉaj vojoj — tute freneza li estas. La tutan vivon li ŝakris, vendis, ŝanĝis, ŝtelis ĉevalojn, ĝis en la maljuneco li kredas sin mem esti ĉevalo. Nenion alian li volas krom nur skrapadi per la piedo, heni kaj troti. Speciale feliĉa li estas, kiam oni lin batas kaj vokas al li: nu, ĉevaleto! — tiam li malantaŭenigas sian kapon, ekhenas kaj ekkuras kiel vento laŭ la landvojo. La ciganoj, traveture haltante tie ĉi, restigas al li por mango pankruston, sed la maljuna Indus manĝas ankaŭ fojnon, avenon kaj herbon. Sed la ciganoj ekloĝis tie ĉi pro tio, ke la marĉoj estas por ili bona kaŝejo de la ŝtelitaj ĉevaloj. Ne povas fremdulo tie ĉi trovi la beston!

— Kaj kiu vi mem estas?

— Mi mem? — trenis Anne-Mari. Nenio — nur malmulto. Ankaŭ mia edzo, Jairus, estas for kaj mi servas ĉe Kūūp kiel servistino.

Subite eksonis laŭta tondrokrako, la tuta fojnejo estis kvazaŭ plena de fajro. La tero tremis kaj obtuze bruis. Per unu salto la junulino estis sur la sino de la viro.

— Jesuo Kristo, sola kaj amata fileto de Dio, kara gardaĝeŭto de mi ĉiuj, pardonu miajn pekojn kaj

erarojn, trompojn kaj maljustaĵojn, samkiel vi ankaŭ pli frue pardonis al ĉiuj pekuloj! ĉiris la junulino rapide per unu spiro, kun fingropintoj humile kunmetitaj ĉe la buŝo.

— Pekas vi ja ŝajne ege, kun tiu Kūūp? ridis Nipernadi, tenante la junulinon sur la genuoj.

Anne-Mari alrigardis lin malŝate kaj depuŝis lin.

— Kun tio stultulo ne estas ja peko! ŝi diris simplanime.

Akvo gutadis de ŝiaj vestoj sur la plankon kaj la junulino, kvazaŭ hontante pro la flakoj, naĝantaj ĉirkaŭ ŝi, saltadis kiel piĝo ĉiam denove al pli seka loko. Je ĉiu iom laŭta ektondro ŝi ektremis, timeme ĉirkaŭrigardis, metis la fingrojn humile al la buŝo. Sed en la intertempoj de tondro ŝi estis parolema, gaja kaj babilĉirpis rapide kaj kolorriĉe. La tukon ŝi estis preninta de la kapo kaj sterninta sur la genuojn, la blankaj haroj pendis kiel malsekaj tufoj sur la ŝultroj. Ŝia buŝo estis kvazaŭ ruĝa tomato en la flava kadro de la vizaĝo.

La viro rigardis ŝin iom nekomprene, demandis:

— Ĉu ankaŭ via edzo, Jairus, estas ĉe la eksteraĵ laboroj?

La junulino sulkigis la vizaĝon. Deturnis la rigardon.

— Mi ne amas tiajn demandojn, ŝi diris malkontente. La edzo forestas kaj nenio pli. Forestas jam du jarojn kaj tri monatojn kaj revenos ne pli frue ol

pasis ankoraŭ naŭ monatoj. Tiel. Kaj ion aĵian mi ne havas por diri en tiu ĉi afero.

Si ridetis, ĵetis rigardon al la junulo. Fariĝis denove pli amika.

— Vi estas scivola kiel Tavet Jona, ŝi diris. Vi eble jam konas Tavet Jonan? — li estas nia pramisto, jen, tie en la kabano, kontraŭ la drinkejo. Li estas ankoraŭ tute juna, proksimume dudekjara, jam kiel dekjara li orfiĝis kaj de tiu tempo li tiradas la pramon. Sed orfiĝis li de tiu tempo, kiam lia patro akcidente mortis. Vidu, tiu viro estis vera kanajlo. Granda li estis, la nigra vila kapo estis kiel tiu de leono, kaj kiam li ekvokis foje sur sia pramo, tiam oni aŭdis kvazaŭ laŭtan tondrobruon. Ne ekzistis homo, kiu ne timis la maljunan Jona Leonkapon, neniu volis volonte entrepreni transveturon de la rivero. Kiu iel povis, restis prefere hejme, kaj kiam oni veturis al la urbo aŭ revenis de tie, oni ĉiam kunigis je longa karavano kaj nur tiam proksimiĝis al la pramo. Sed amas tiam maljuna Jona iun ciganan knabinon, sekvadis ŝin kiel kulo, kaj ne lasis sian intencon. Ofte oni diradis al li: hontu, maljuna Jona, prudentiĝu kaj estu saĝa, kien vi metos tian knabinon! Sed ne cedis la maljunulo, ne prudentiĝis, kiel urso li murmuris responde. Li diris: ne estas via afero nek via knabino, mi mem arangas miajn aferojn! Kaj foje, kiam la cigana knabino volis transriveriĝi, la maljuna Jona premis ŝin sur la pramon. Kaj tiam li demandis la knabinon por la lasta fojo: aŭdu, knabino, respondu nun al mi kvazaŭ al via Dio: ĉu vi volas fariĝi mia por vivo aŭ morto? Tiel li demandis. Sed la junulino ridis responde, kion ŝi sciis timi aŭ antaŭvidi? Ŝi ridis kaj petolis ĝue. Sed kiam la pramo venis mezen de la fluo, la maljuna Jona dishakis la ŝnurojn kaj tiam ili floris malsupren de la akvofalo. Ho, kiel kriadis kaj vokadis la knabino, sed nenio estis jam farebla — nur post kelkaj tagoj oni trovis iliajn kadavrojn albordigitaj malproksime laŭflue. Eĉ la rivero ne volis tiajn.

De tiu malfeliĉa tago, Tavet Jona estas la pramisto, sed ankoraŭ tiu knabo ne estas pli prudenta ol la patro. Tiel scivola li estas, ke li eĉ ne transriverigas la vojaĝanton antaŭ ol li fundamente pridemandis, kiu li estas, de kie li venas, kien iras, por kio, kiun oficon li havas, ĉu li tamen neniel povis resti hejme, ĉu la ĉevalo sufiĉe manĝis, trinkis. Kaj ricevinte al ĉiuj demandoj precizajn respondojn, li kantante alternas la dorson, ektiras la ŝnuron de la pramo, kvazaŭ neniom lin interesus tiuj respondoj. Li demandis nur por havi interparoladon. Sed kanti amas Tavet Jona, ĉiam li sidadas ĉe la fenestro de sia kabano kaj kantas tutajn tagojn kaj noktojn senĉese. Neniu instruis al li la kantojn, Dio scias, de kie li prenas la vortojn kaj melodiojn. Kiel al birdo, la kantoj estis jam ĉe la naskiĝo metitaj al li sur la bekon. En iu geedziĝa festo li kantis tri tagojn kaj tri noktojn seninterrompe, kaj kiam la festanoj jam forveturis hejmen kaj la gemastroj volis jam havi pacon en la domo, oni diris al li: ĉesu nun, Tavet Jona, estas jam sufiĉe! Tiam la junulo kvazaŭ vekigis el dormo kaj diris: tre damage, nur nun kvazaŭ komenciĝis la kantemo! Kaj kiam Jona ektrilas, li aŭdas jam nenion, la vojaĝantoj trans la rivero povas tutajn horojn voki lin al la pramo, sed Tavet Jona eĉ ne aŭdas ilin. Li ja vidas la ŝvingantajn homojn, sed ne aŭdas ilin. Kaj okazas do tial ĉi tie ofte grandaj malkontentoj kaj insultadoj, neniu en la ĉirkaŭaĵo ŝatas Tavet Jonan. Ĉiuj diras, ke li estas turmento por ili, peza ŝarĝo sur iliaj ŝultroj. Nur Kütüp laŭdas Jonan — ne malmultaj vojaĝantoj, vane atendinte la pram-

iston, eniras la drinkejon kaj malplenigas pro ĉagreno kelkajn botelojn da biero. Pro tio, kiam en la urbo estas foiro kaj estas multe da veturantoj, mi devas ĉiam porti de Kütüp al Jona bieron kaj brandon: drinku kaj kantu la knabo! — ankau Kütüp havos en la somera tempo iom da enspezoj.

Nuntempe tie ĉi tute ne estas multe da veturantoj, ĉiuj evitas la pramon kiel peston. Nur pro plej granda bezono oni ekvojiras. Tial oni vidas tie ĉi malmulte, malmulte da fremduloj. Aŭ kiu do bezonas tiun pramon? Nur Jaan Trotulo kuradas ofte al la pramo, heunte haltas, rigardas mirante en la akvon, skrapas senpacience per la piedo kaj poste, kvazaŭ ektimiginte, denove rekuras galope kaj bruspirante!

Komencis malrapide lumigi. La torenta falado de la pluvo portiĝis rapide plue. La tondrobruo malproksimiĝis, la ekbriloj de fulmo ne estis plu tiel blindigaj. Pluvus nur maldense, estigante sur la flakoj saltantaj, brilantajn vezikojn. Iom malaltaj lokoj vaporis kaj nebulis. La Kaava-rivero, kiu nur antaŭ kelkaj horoj estis kumpremita en la mallarĝa fluejo inter la nufaroj, riverlapoj, kano kaj tifeoj, fluis nun larĝe antaŭen. La akvofalo mugis morne, malsuprenigante pezajn akvarojn. Vento ne furiozis plu, kvazaŭ laca hundo, bojinta ĝis raŭkiĝo, ĝi jam nur jelpante kaj spiregante kuris laŭ la postesignoj de la uragano.

Anne-Mari komencis plekti la harojn.

— De kie kaj kien do vi mem iras? ŝi demandis, tenante la harpinglojn inter la dentoj. Tiam viron mi pli frue ne vidis tie ĉi. Vi estas verŝajne de malproksime — eĉ harpon vi kunhavas, verŝajne vi muzikis en geedziĝa aŭ alia festo? Aŭ eble vi kunhavas ĝin nur por ŝajno kaj vi venas serĉi malaperintan ĉevalon, bovineton, porkidon?



Jenő Barsay

Laborista knabino

Si ridetis larĝbuŝe, surmetis la kaptukon.

— Ni havas tian famon; kiam io malaperis, tuj oni kuras tien ĉi por serĉi. Ĉiaspecaj viroj kaj oficistoj iradas tie ĉi esplorante, ili kvazaŭ serĉas spurojn de vulpo. Sed somere ja ne valoras veni tien ĉi. Somere ni vivas kiel musoj en la truoj, eĉ la viroj! ne estas hejme. Certe ankaŭ vi sekvas lajn postesignojn?

La junulo svingis nec la manon.

— Mi iradas simple por mia plezuro, ne havas mi tĉe ĉi eĉ la plej malgrandan aferon. Mi denove plu-migras.

Li ridetis, ĉirkaŭprenis la junulinon je la talio kaj demandis:

— Povas esti, ke vi eble petas min resti? Vere, vi povas esti iom pli afabla kaj akcepti min por kelkaj tagoj ĉe vi — ho, kiel mi tiam ludas al vi tiun ĉi grandiozan instrumenton!

Li frapis per la fingroj kelkfoje la fundon de la harpo kvazaŭ fanfarone kaj fieraĉe.

Sed Anne-Mari depuŝis lin.

— Neniun mi bezonas! ŝi diris. Mi mem havas edzon.

— Kŭŭp?

— Ne, Jairus!

— Sed Jairus sidas pro ĉevalŝtelo en malliberejo kaj ne liberigos antaŭ naŭ monatoj! Eble la tempo iĝos, eĉ pli longa? — tiaspeculo povas ankaŭ aliajn pekojn havi sur la koro.

La junulino ĵetis al la viro koleran rigardon.

Sia vizago ardis kaj ruĝis. La buŝo fariĝis mal-larĝa kaj kurba. Ŝi sidiĝis denove sur la sojlo de la fojnejo kaj rigardis kvazaŭ explore la ĉielon, en kies griza teksaĵo komencis estiĝi blujaj strioj kaj makuloj. La pluvo ĉesis, falis nur unuopaj malfruiĝintaj gutoj. Jam helis en sunlumo iu pli alta monteto, iu verda kampstrio, por momento la riĉkreska pinto de iu pino aŭ pieco. Ombroj kuris tra la marĉo, kvazaŭ rajdistoj rapide galopante unu post la alia. La lastaj akvofluetoj plaŭdis malsupren laŭ la deklivoj kaj montflankoj, dum la vosto forsekiĝis kvazaŭ tiuj de serpentumantaj viperoj. Jam ekfajfis jen tie, jen aliloke birdo, ruĝ-vosta alnombirdo fajfante enaeriĝis, fringelo ekvokis gaje cet-cet-cet! kaj citronflava citrinelo²⁾ rondflugis super la arbaro.

— Tio estas mensogo, vokis Anne-Mari mala-fable, mi ne diris, ke Jairus estas mallibera! Eble tion rakontis al vi iu alia babilulo? Kaj eĉ se li sidas en malliberejo, do ne pro ĉevalŝtelo. Ho ne, la ĉevalojn ĉe Jairus ne kaptas eĉ satano — ne estis li tia fuŝulo! Eĉ henadon oni povis aŭdi en la marĉo — sed la beston oni tamen ne trovis. Li konis sian laboron kaj la marĉon de Maarla, li kreskis tie ĉi, konis ĉiun eĉ plej sekretan vojeton, ĉiun razenon, scipovis kaŝi sin kiel vipero sub razeno. Tute aliaj aferoj forkondukis lin de tie ĉi — mankas kaŭzo por rakonti pri ili. Sed nun li baldaŭ revenos kaj tiam pli ol unu viro gardu sin!

Si ridetis superece, fierege.

— Ankaŭ Kŭŭp? demandis Nipernadi.

— Ne, kial? miris Anne-Mari. Kŭŭp ne havas kaŭzon por timi Jairus — ili estas amikoj.

Si levigis de la sojlo kaj komencis sin rapide ordigi.

— Rigardu do, kia pluvego estis! ŝi diris ĝoje. La tuta Maarla subite fariĝis plaŭdanta lago. Certe nun ankaŭ Jona denove ekkantos. Lastatempe la suno brul-silentigis ankaŭ lian gorĝon.

Ŝi alrigardis petole la junulon kaj vokis:

— Tiel, kaj nun: ĝis!

La lupoj kaj la ŝafoj

— Lafontaine —

Post jaroj kaj mil jaroj de streĉa viv' milita,
La lupoj kun la ŝafoj paciĝis post pardon'.

Por ambaŭ partoj tio tre certe estis bon'.

Ĉar, se festenis lupoj per ŝafid' perdit'a,

Ilian haŭton uzis paŝtistoj laŭ bezon'.

Neniām libereco, nek por sinpaŝtaj grupoj

Nek por la sangsoifaj lupoj.

Ne povis ili vivi sen tim' pri akapar'.

La paco do okazis. Da garantioj — kvanto:

La lupoj donis idojn kaj hundojn la ŝafar'.

La intersang' fariĝis en formo ordinara

Eĉ sub kontrolo komisara.

Post kiam la lupidoj, kun ĝuoj kaj honor'

Sin vidis lupoj fortaj, perfektaj, sangavidaj,

Atendis ili iam — kvietaj kaj perfidaj,

Ke la paŝtistoj estu for.

Kaj ili jen strangolis plej grasajn ŝafojn por

Ce l' dentoj ilin porti al la arbar' apuda,

Kie la lupfrataro atendis, laŭ inform'.

La hundoj ripozantaj fidele al konform'

Murdataj estis en la dorm'.

Rapidis ĉio tiel, sen ia bru' aluda,

Ke eĉ por unu hundo ne eblis fuĝa kur'.

Konkludi ni do povas nur,

Ke justas, se trompulojn ni kontraŭbatalegas.

La paco estas bona mem — Sed ĉu utilas ĝi, se regas

Ce l' malamiko perfidem'?

El la franca: *Juliette Baudin.*

Per kelkaj saltoj ŝi estis sur la landvojo. Akvo kaj koto ŝprucis kaj bolis ĉirkaŭ ŝi. Ŝi ekprenis per la mano la malsekan pendajon de la jupo kaj gaje ek-saltis trans la flakojn al Kaava.

— Anne-Mari! postkriis Nipernadi.

La junulino rerigardis por momento, ridetis sonore kaj poste kuris saltante plu. Baldaŭ ŝi malaperis ĉe la vojkurbo malantaŭ marĉaj betuloj, arĝentsalikoj kaj alnoj. Nur la sonora rido sonis ankoraŭ kelkfoje.

— Kia strangulino! diris la junulo ĉagrenite. Tiel ege ŝi rapidis, iom da tempo ŝi ja povus ankoraŭ resti, ne estis ja urĝe! Kiel mi ludus al ŝi! Estas certe nenio la kanto de Jona kompare kun tio. Sed ŝi ne volis — fier'a ŝi estis. Nur laŭdis Jairus-on kaj Kŭŭp-on, tiajn kanajlojn! Kaj forkuris — kiel blankis ŝiaj kruroj en sunlumo kaj la buŝo estis pleneza de rido!

Li deprenis la jakon kaj dismetis ĝin por sekigo.

Jam helis la suno. Kelkaj malfruiĝintaj nubop-pecoj kuregis kiel erariĝintaj ŝafidoj post la ŝafaro. La birdoj kvazaŭ eldormiĝis, ĉiuj arboj kaj arbustoj estis subite plenaj de ilia pasia fajfado kaj ĉirpado. Ili trilis, fajfis, ĉirpis, huis, intermikse, konkure, kaj ĉiu ĉirpo kaj ĉiu fajfo estis plena de senbrida ĝojo kaj rapida batado de koro. Sur ĉiu folio kaj floro brilis kaj radis pezaj pluveroj kiel perloj. Musko estis plensorbata de akvo, sukriĉa, ŝvelinta, kaj je tuŝoj de vento ĝi deskuis gaje la malsekajon kiel hundo veninte el akvo.

La suno komencis proksimiĝi al la horizonto.

La junulo staris kelkan tempon senmove, sed poste li prenis la jakon, pendigis la harpon per ŝnuro trans la ŝultro kaj ekiris rapide al la arbaro.

Ne, ne, tie ĉi li ne restos — eĉ la varioldifektita Anne-Mari ne invitis lin eĉ por momento al si. Tiaj strangaj homoj estas tie ĉi, eĉ Dio mem ne komprenas iliajn kuriozajn agojn kaj farojn. Ili ŝtelas, kantas,

restadas en malliberejo, iras dum fulmotondro en arbaron por kolekti berojn, kaj, kiam venas la deziro, veturas per pramo malsupren de la akvofalo — nur miru.

Kial estis Anne-Mari tiel fiera?

Ĉu li ne promesis ludi al ŝi sian harpon?

Ne, ŝi ne volis — ŝi bezonas nenion! Kvazaŭ li almozpeticis amon! Li deziris simple iom sidi, sur la harpo iom movi la fingrojn kaj paroli, kiel strangaj estas tiuj ĉi lumaj noktoj, varmegaj kaj helaj, kiam ĉiu nervo estas ĵetita kvazaŭ sur varmegan amboson kaj en la animo regas ia neklarigebla maltrankvilo, ia stranga nervozeco.

Ne, bravulo estis tamen tiu maljuna Jona Leonkapo — dishakis la ŝnurojn kaj veturegis malsupren de la akvofalo!

Veninte en la arbaron de Jaanhanso, Nipernadi subite ekiris returne.

Li ja devus pli proksime rigardi tiun akvofalon?

Per granda ĉirkaŭiro li venis al la akvofalo de Kaava kaj sidigis tie ĉi. En la lumo de la subranta suno brilis kaj radiis la ruĝeta akvo de la akvofalo, falegis ŝaŭmante kaj muĝante malsupren de la alta kalkŝtona muro. La akvopuvo ŝvebis kiel rozkolora nebulo, sed kiam la suno subiris, ĝi malheliĝis, fariĝis griza. Malsupre turniĝadis la fluo, movis sin maldiligente kaj kvazaŭ sata besto moviĝis malrapide antaŭen.

Kaj la ĉielo estis luma, tiel strange luma kaj lakte pala.

Nipernadi abrupte starigis.

Rapide li ekiris al la drinkejo de Kaava.

*

La nokto estis kvieti kaj sufoke varmega, la ĉielo pale argentgriza, unuopaj steloj trembrilis malhele. Plenluno ekbrilis rustkoloro tra la arboj.

Malantaŭ la drinkejo, ĉirkaŭate de plurbrakaj marĉaj betuloj kaj tremuloj, staris malgranda tenejo, malalta kaj malrektiĝinta, la muskokovrita tegmento apogis sin malantaŭe rekte al la tero, dum sur la spino kreskis abundaj herbo kaj urtikoj. Grandaj densaĵoj de lapoj staris ambaŭflanke de la sojlo. La herbejo, iom pli malproksime, estis plena de blankaj erioforoj.

Nipernadi alpaŝis al la tenejo,³⁾ aŭskultis kaj frapis.

— Anne-Mari, kara, ĉu vi aŭdas? li diris — tio ĉi estas mi, la sama viro kun harpo, kun kiu vi estis dum la ŝtormo tie ĉe la marĉo en la duone disfalinta fojnejo, ĉu vi memoras? La sama junulo, al kiu vi rakontis pri Kūüp, Jona, Jaan Trotulo kaj pri via kompatinda, malfeliĉa edzo Jairus, kiu estas malliberigita pro grava ĉevalŝtelo. Pardonu, ke mi ĝenas vin. Mi estis jam certe forironta de tie ĉi, jam mi eĉ foriris, sed tiam mi ekpensis, ke eble Anne-Mari eĉ ne estas tiel malafabla kaj tamen invitos min por momenteto al si? Kompreneble, ne tuj, ne hodiaŭ kaj ne morgaŭ, ankaŭ pri postmorgaŭ ni prefere nun ankoraŭ ne parolu, sed estonte, iom pli malfrue, ni diru, post unu aŭ du semajnoj. Tiam, kiam vi jam alkitimiĝis al mi, kiam vi jam ĵetis sur min kelkajn fajrajn rigardojn. Sed hodiaŭ vi permesas al mi simple iom sidi tie ĉi kaj iomete babilu, ĉu ne? Kaj se vi volas esti aparte afabla, ŝovu vian liton pli proksimen al la pordo, alie vi certe ne aŭdas min.

Li starigis la harpon ĉe ŝtono, forviŝis la ŝviton kaj sidigis sur la sojlo de la tenejo.

— La noktoj estas tiel varmegaj, li diris, tiel varmegaj kaj lumaj. Oni rigardas la subiron de la suno kaj apenaŭ oni sukcesis turni sin, kiam la fajro-

disko brilas kaj radias jam sur la kontraŭa parto de la ĉielo. Ĉu estis nokto aŭ tute ne estis? Kaj tio faras nin tiel maltrankvilaj kaj malsanaj, ni ĉirkaŭmigras kiel malsanuloj kaj ne trovas nian ĝustan lokon. Kaj dormemo mankas absolute, oni estas vigla kiel birdo sur branĉo.

Mi venis tien ĉi, Anne-Mari, sed tamen mi nenion volas de vi. Vere absolute nenion. Sed mi povas frenezigi pro la penso, ke homo preteriras min kun plej granda trankvilo, kvazaŭ mi estus por li muskokovrita ŝtono, landvoja polvo, putra arbostumpo. Li preteriras kaj eĉ ne rigardetas. Tio ja estas terura, Anne-Mari, ĉu ne. Kaj tiam mi vokas tiun homon, vokas kaj ekparolas al li, Dio scias, kion kaj kial — eble nur por tio, ke vidu tiu homo, ke ankaŭ mi estas viro, ke mi spiras, suferas, sentas ĝojon pri la beleco de la someraĵ tagoj.

Kial mi ne rajtu paroli al vi, ke mi amas vin, ke vi estas tiel bela kaj ĉarma kaj ke ĉiuj homoj en la mondo estas kvazaŭ sunfloroj — ili turnadas siajn kapojn nur post vi, suno. Mi parolas ĉiam tion, kion la homoj volas aŭdi. Mi scias, ke tiel oni ne rajtas, ke oni devas diri la veron tute senkaŝe. Sed mi ne povas, mi hontas. Kiel mi povu diri la veron — Anne-Mari, malĉasta virino, tia sentaŭgulino, la propra edzo estas en malliberejo, sed ŝi kunvivis kun Kūüp! Ŝi logas tiun arkipiedulon en arbaron por beroj, sed mem baldaŭ falas por sunfrapo sub arbuston! Kaj ankaŭ tion ja neniu ankoraŭ scias, kio okazas tiam, kiam vi portas la bierojn kaj branĉojn al Jona por kantino? Certe vi kolekus pri tiaj paroloj kaj de tio profitus nek vi nek mi — prefere jam mi mensogos. Prefere jam mi diros: Anne-Mari, virino el la marĉo, tuj kiam mi ekvidis vin, tuj de la unua rigardo finita jam estis via kompatinda, malfeliĉa knabo! Tiam vi ridetos certe, alrigardos min pli afable kaj estos iom pli favora al mi, malfeliĉulo.

Vidu, kiel leviĝas super la arbarojn unuopaj nubogigantoj. Kiel vicigita armeo ili aperas. Ili ne estas ankoraŭ blankaj, sed iliaj randoj jam rozkoloriĝas kaj estas argentgrizaj — mateno estas proksima, la fajrujo jam ekbrulas. Jam ekpepis tie kaj aliloke fringelo, nigrakapa silvio vokis sonore. Kaj skaraboj kaj insektoj ekmovas sin sur herbotigo — finita estas la



Ferenc Medgyessy

Malgoja virino

nokto, pasis la momentlonga nokto. Antaŭhierau mi kuŝis en arbaro sub brakriĉa kverko kaj tiam mi vidis strangajn aperaĵojn, tiel reale, tiel versimile. Ne, ili eĉ ne estis aperaĵoj, sed okazis vere tiel, kiel mi vidis tie sub la brakriĉa kverko.

Malproksime, malproksime trans landoj kaj maroj, vivas la reganta princo de Kapurthala, fama maharago. Eble vi jam pli frue aŭdis pri li? Li havas grandajn palacojn kaj la sennombraj aroj de liaj sklavoj kunportadas kiel diligentaj formikoj al li trezorojn el ĉiuj partoj de la mondo. Kiel riveroj, riveretoj kaj torrentoj, pasantaj montojn kaj arbarojn, fluadas riĉaĵoj en liajn trezorojn. Kaj tie estas amasoj da perloj kaj diamantoj unu apud la alia kiel razenoj en niaj marĉoj. Ha, Anne-Mari, ekvidante tiujn juvelojn per nekutimita okulo, oni subite blindaĵas kaj mutiĝas — tiel radias kaj brilas ili en la trezoroj unu apud la alia, kiel miraklofloroj florante. Kaj la maharago de Kapurthala havas filinon Enelele, tiel malgranda kaj delikatan kiel ĵus malfermita primolo. Kaj iradas ŝi dancante, saltante, kun la perlaĵ kolĉenoj kiel fadenoj el lunarĝento ĉirkaŭ ŝi. Sed jen ŝi subite malsaniĝas. Ne aŭdas plu la reganta princo la ridadon de Enelele, ŝian gajnan pepadon — dormas malvarma kaj senmova la malfeliĉa Enelele. Scipovas neniu ŝin kuraci, konas neniu rimedon kontraŭ la malsano. Eminentaj kuracistoj de la lando ĉirkaŭiradas sur piedfingroj, ŝiradas la harojn kvazaŭ herbaĉon de bedoj, kun longaj grizaj barboj kiel vipinoj ĉe la buŝo. Konsumiĝas pro malĝojo la reganta princo, ne manĝas, ne trinkas, ne metas la kapon sur la molan kusenon, kun okuloj ruĝaj de kolero kaj malespero kiel tiuj de bovo. Li ordonis tiam senkapigi sescent eminentulojn de sia lando por puno kaj averta ekzemplo al la ceteraj, aranĝis solenajn preĝadojn, sed nenio helpas — malvarma, senmova kuŝas en sia lito la malgranda primolo Enelele. Kaj tiam, de la malĝojo kunpremita kiel malplena sako, proklamis la maharago de Kapurthala tra la landoj kaj maroj: kiu savos la malsanan Enelele, ricevos fian tronon, fian potencon, liajn riĉaĵojn, ekhavas Enelelen por feliĉo kaj beno.

Vidu, jam alvenadas seninterrompe longaj karavanoj de blankaj elefantoj kaj sur ili la plej riĉaj kaj potencaj princoj de la lando en blankaj kaj nigraj turbanoj. Vidu, jam rapidegas el landoj malproksimaj vagonaroj kaj ŝipoj kaj riveroj da kameloj al Kapurthala. Kaj tie, apud la brilo kaj pompo de la aliaj, rajdas ankaŭ Tomas, junulo el nordo, kun la nomo Nipernadi, rajdas sur malgrasa ĉevalo, sen brilo, humile, en malriĉa vesto de laborulo. Sed li ja konas sian saĝon kaj sorĉon, li nur ridetas superece pri la insultoj kaj ne respondas al la moko — tia estas la norda junulo el la malproksima lando de arbaroj kaj riveroj. Kaj kiam alvenis la tempo, kiam la saĝuloj de ĉiuj landoj nenion sciis fari, ankaŭ la junulo provas sian ŝancon. Ion alian li eĉ ne faras krom nur paroli al la malsanulino pri la arbaroj kaj herbejoj de sia lando, pri la lumaj noktoj kaj varmegaj tagoj, ŝaŭmaj akvofaloj de la riveroj kaj mistereco de la marĉoj. Kaj rigardu, Enelele leviĝas, leviĝas de sia malvarma lito kaj la malgranda primolo-fringeletoj ridas gaje kaj sonore — jen sana ŝi jam estas dank' al Dio.

La reganta princo de Kapurthala, la riĉa maharago, batas sian altan bruston kvazaŭ bruantan tamburon: jen, li diras, prenu ĉion, kion mi havas, vi povas aldone ankaŭ min mem uzi kiel pagion por vi. Kaj ĉiuj tiuj, kiuj estas ĉirkaŭe, ĉiuj princoj kaj saĝuloj kaj eminentuloj, ili kuŝas en polvo, sur la tero

surventre, surbruste, renversite. Ili volus hurli de kolero kaj envio, sed ne kuraĝas, ili nur turnadas la okulojn kaj silentas.

Kaj tiam diras la junulo el nordo, kun la nomo Tomas: pardonu, sinjoroj, mi ja nenion postulis! Mi volas de vi nenion da riĉaĵoj, ĉar mi mem estas miloble pli riĉa: mi havas en la nordo balanciĝantajn arbarojn kaj super ili fluigas kukautaj sovaĝaj anseroj. Mi havas herbejojn kaj tie floras miozotoj pli rave ol la amasoj de viaj rubenoj. Mi havas en la nordo kampojn kaj kiam vento movas la pezaĵn orspikojn, estas kvazaŭ mugus maro. Kaj sunon mi havas, ĝi brilas kaj radias eĉ noktomeze.

Jen kiel, ili miras, ankaŭ la suno estas via kaj brilas eĉ noktomeze? — Jes, tiel, mi respondas, brilas ankaŭ noktomeze. Verdire mi ne havas ankoraŭ kabanon, kien tien mi an kapon, tian malgrandan kabanon, sed viro certe povas aranĝi ankaŭ tion! Sed de vi mi volas nenion, mi venis tien ĉi nur por mia plezuro kaj ĝuo kaj pro la malgranda Enelele. Se vi permesas, mi kunprenas malgrandan memorajon! Kaj mi prenas de la piedo de Enelele ŝian ŝueton, metas en la brustoŝon kaj sidigas sur mia ĉevalo. Bonan tagon kaj adiaŭ! mi diras.

Tio ĉi estas vere okazinta historio, pri tio mi povas ĵuri je Dio kaj liaj eminentaj altranguloj, la episkopoj! Tiel okazis al mi antaŭhierau nokte kaj kiel pruvo pri tio estas en mia brustoŝo la eta ŝueto de tiu primolo. Vidu mem, jen ĝi estas.

Nipernadi ekserĉis en la poŝoj. Li fariĝis ĉiam pli senpacienca, maltrankvila, li palperĉis tie kaj ĉi tie.

— Kie mi ĝin kaŝis? Ĉu ĝi ne perdiĝis? li diris ektimigante.

Sed poste li viŝis per la mano la frunton kvazaŭ vekigante.

— Tiaj lumaj noktoj vere frenezigas la homon! li diris sopirĝemante.

Li silentis, sulkigis la brovojn.

— Tiaj paroloj ne plaĉas al vi, Anne-Mari, li diris, mi scias tion. Do mi klopodas paroli pri io alia.

Kiel domaĝe estas, ke vi ĉiam ankoraŭ ne kredas, ke mi enamiĝis je vi!

Vere, baldaŭ povos okazi tiel, ke iun belan tagon mi veturegos malsupren de la akvofalo, kiel tiu Jona Leonkapo. Mi veturegos malsupren kaj finita estos via knabo. Ĉe mi okazas tiaj aferoj simple kaj rapide. Estas ja facile tion fari: la rivero, akvofalo kaj pramo staras por dispono, necesas nur prunti hakilon, per kiu dishaki la ŝaurojn. Kaj hakilon pruntas por tia celo ĉiu ajn.

Aŭ eble vi ŝanĝos ankoraŭ vian sintenon?

Vidu, Anne-Mari, tio ĉi estas la marĉo de Maarla kaj mi ne komprenas, kial ĝi ankoraŭ ne estas sekigita je fekunda herbejo? Ĉiam ĝi gargaras kaj gluglas sub la razenoj kaj ĝiaj nebuligoj ne havas finon. Rigardu, kiel leviĝas la blanka nebulo, la malgrandaj marĉaj betuloj kaj miskreskaj pinoj kvazaŭ pendas per siaj pintoj de la ĉielo. Mi rigardis ĉe la akvofalo, tie estas nur kelkajn klaftojn larĝa kalkŝtona muro, ĝi tenas la akvon. Se tiun muron eksplodigi per kelkaj dinamitkartoĉoj, la marĉo senakviĝos kiel renversita plado. Tiam vi ne bezonos plu ŝteli ĉevalojn, konduki ilin por kaŝo en la marĉon, amikumi kun la ciganoj. Eĉ Jairus, veninte hejmen, povos fariĝi honesta terkulturisto kaj ankaŭ la tagoj de Kūip estos pli gajaj. Tiam oni konstruos tie ĉi larĝan landvojon kaj la veturantoj volonte eniros la drinkejon por iom ripoziĝi la piedojn.

Ha, kara Anne-Mari, kiaj grandiozaj herbejoj

Al sia liuto

— Sir Thomas Wyatt (1503—1542) —

O liut', vekigu! Kun muziko rita
Nun kantu, — O, laboro malŝparita! —
La finon de l' esper' kaj revkonstru';
Ĉar kiam estos mia kant' finita,
O liut', silentu: mi ne kantos plu.

Mi tuŝos tra orelo surda koron,
Per plumbo ĉizos vorton en marmoron:
Al ŝi mi kantos ĉiam sen influ';
Ĉu do sopiron kantu mi aŭ ploron?
Ah, ne, liuto! Mi ne kantos plu.

Al mia amo kaj petego kanta
Si restas pli kruele adamantanta,
Ost rokoj al ondar' kaj ŝtormobru';
Nekonsoleblaj pro neglekto vanta,
La liut' kaj mi ne kantos plu.

Fiera, vi trofeojn multajn trafis
El koroj tro naivaj, kiujn pafis
Amoro per kruelaj saĝoj, — Ĉu
Vi kredas: Li pafarkon malagrafis
Ĉar mia liut' kaj mi ne kantos plu?

Ne pensu, ke vi sola sub la suno
Mokeme glitos el la sort-plenumo,
Ke vin ne trafos venĝo kaj detru':
Suferon de amanto sekvos puno,
Ĝe se la liut' kaj mi ne kantos plu.

Vi eble kuŝos laca kaj velkinta
Dum longaj noktoj de l' malvarmo vintra,
Al lun' plendanta pri la korenu';
Torturoj vin deziro akrapinta:
Kiu volos, zorgu! Mi ne zorgos plu.

Kaj povas esti, ke vi tiam pentos
Kruelon vian, kiam vin turmentos
La penso pri perdita ama ĝu':
Vi belon nura prunto tiam sentos,
Kaj sopirados — kiel mi ne plu.

O liuto, ĉesu la muziko rita,
Finiĝis la laboro malŝparita:
Mi malaperos en la tempoflu';
Nun estas mia lasta kant' finita —
O liut', silentu, mi ne kantos plu.

El la angla: L. N. Newell.

povus tie ĉi esti kaj sur tiuj herbejoj paŝtus sin dudeko da laktbovinoj de Anne-Mari, tiaj grandaj, ruĝaj, kun mamoj kiel blankaj tinoj. Kaj Anne-Mari starus sur la sojlo de sia bieno, rigardus tiun brutaron, dum paro da bubetoj ploretus ĉe sia jupo, ŝi rigardus la brutaron, ridus larĝbuse kaj vokus: — hali-halo! la brutaron hejmen por la vespero, mem havante blankan antaŭtukon por la melkado, kun la okuloj kaj buŝo plenaj de la brilo de la subiranta suno! La brutaro kurus brupaŝe al la hejmo, dum la pezaj mamoj pendtuŝus la fekundan herbejon, la hundo antaŭ ĉio, la pastisto post ĉio — kaj baldaŭ, baldaŭ lakto gaje ekfluus en la ladajn ujojn. Kaj ĵen, vidu, ankaŭ Jairus (aŭ Kūūp, kiel vi deziras) envenus kun la ĉevalo kaj plugilo tra la pordego, forviŝus ŝviton de

la frunto, rigardus ĝoje al vi kaj dirus: ho, satano kaj infero en la brulanta sulfuro, ĵen estis tago! Post tio vi ambaŭ irus en la vestiblon, kun la paro da bubetoj ĉiam pendantaj je la jupo, ĉiam pendantaj je la jupo, kaj tie via edzo dirus al vi ankoraŭ: ĵen, tute ne estas necese ŝteli ĉevalojn kaj pro ili, aĉuloj, sidadi en mal-liberejo, la aĉuloj mem kreskas sur la herbejo kiel fungoj en arbaro!

Mi rigardis la marĉon; dum jaroj la rivero portadis el la arbaro ŝlimon kaj koton kaj la kalkŝtona muro ĉe la akvofalo retenis ĉion ĉi. Tiamaniere dum jardekoj kaj -centoj estiĝis tie ĉi vasta marĉo, dum antikve estis tie ĉi fruktoporta valo. Mi konas tiujn ĉi aferojn, kredu min, Anne-Mari. Mi estas profesie marĉdrenisto, mi iradas tra la lando kaj kiam mi trovas tian marĉon, mi senprokraste eklaboras. Plurajn dekojn da marĉoj mi jam drenis, la akvo fluis kun terura bruo malsupren kaj postrestis bela valo kiel fermita manplato. La speciala arto en tio ĉi tute ja ne estas necesa, oni nur boru dinamitnestojn proksime al la akvofalo, proksimume dudekon da paŝoj flanke, plenigu ilin per eksplodmaterialo, almetu la meĉajon, kaj la ŝtonoj flugos aeren. Kiam tiel estas procedite, oni kunigas la riveron kun la kanalo kaj tiam — ho, graco kaj beno! — la akvo ekfluas laŭ la nova fluejo, fluas kaj ŝaŭmas, ĝis la marĉo estas seka. Aŭtune, kiam la marĉo sekigis, ni povos laborigi hakilojn kaj plugilojn kaj la sekvontan printempon ni semos novan herbon. Tiel nutra humo tiam aliloke apenaŭ troviĝos.

Kion vi opinias, Anne-Mari, se ni ĵam morgaŭ komencus tiun laboron? Vi, Kūūp, Jona, mi, ĉe Jaan Trotulon ni petos por helpo, kaj multaj tagoj eĉ ne pasos antaŭ ol la laboro estos farita.

Imagu nur tiun miron, kiam la karavanoj de la ciganoj revenus aŭtune hejmen kaj konsternite haltus ĉe Kaava. Ili frotus la okulojn, skuus la kapojn: kia diabla fantomaĵo kaj sorĉo tio ĉi estas? Tie ĉi antaŭe ja estis marĉo kaj Maarla kaj ilia hejmo, sed restis de tio absolute nenio. Restis starantaj nur iliaj antaŭaj kabanoj duonpende, sed ankaŭ ili estas kvazaŭ pli alte, kvazaŭ en fremda loko? Anstataŭ la marĉo kuŝas belaj herbejoj kaj rivero fluas tra ili, ĉu ĝi estas Kaava? Ili serĉas sian antaŭan hejmon, sed ne trovas ĝin. Kaj tiam plenigis ilian animon granda teruro kaj timo, tremante ili saltus sur siajn veturilojn, kaj galope rapidegus for de tiu ĉi malbenita kaj fremda loko.

Vere, Anne-Mari, jam morgaŭ ni ekboros la dinamitnestojn.

Pro prokrasti mankas kaŭzo, ĉe Jona liberigis de tiu malagrabla tien- kaj returne-tirado de la pramo kaj povos estonte trankvile vivi nur por sia kanto. Ne estos plu necese fulmrapide saltlevigi, kiam sentaŭgulo veturas al la rivero; li povos trankvile fini sian kanton kaj komenci la sekvantan. Tiam pramo ja ne estos plu necesa, la rivero kuintirigos en la mallargan fluejon kaj sur tiun oni povos konstrui ponton.

Estas strange, Anne-Mari, ke vi respondas nenion. Vi eĉ ne salutis min ankoraŭ. Ĵam mi sidis kaj parolis tie ĉi kelkajn horojn, sed vi silentas kiel birdo en sia nesto. Aŭ ĉu la dormemo estas tiel forta, atakas kiel inkubo? Kaj ne ĉesu antaŭ ol ĝi faligis vin sur la litfundon por profunda dormo kaj ripozo. Levigadas nur la brusto, kaj la nazbloj estas disblovitaj kiel akvofaloj.

Ne, kompreneble ne, vi ne dormas, vi aŭskultas malantaŭ la pordo, kun oreloj pintigitaj, buŝo ridanta. Kiu do povus nun dormi, nun, kiam la nebulo jam mal-

aperis el la marĉo, la suno estas en la alto de duon-hektaro kaj aroj da hirundoj rondflugas alte, alte. Estas preskaŭ certe, ke la nestoj de la hirundoj verŝajne jam estas plenaj de junaj idoj, ĉies pepantaj bekoj estas eltenditaj trans la randon de la nesto, tiel ke neniam forto kaj potenco jam povas pleniĝi iliajn avidajn kropojn. Vidu, la turdoj jam eĉ elportis siajn idojn, nun ili flugadas en granda aro, de kampo al kampo. Certe ili devas gluti ankoraŭ kelkcent milojn da raŭpoj kaj insektoj, antaŭ ol la flugiloj estos sufiĉe fortaj por la granda alsuda flugo trans la arbarojn kaj marĉojn.

Anne-Mari, komprenu do fine, ke mi amas vin! Respondu nur unu vorton, unu plej simplan vorton, mi ja devas scii, ke vi estas malantaŭ tiu ĉi pordo. Aŭ ĉu vi volas, ke mi ludu al vi?

Cu la paroloj jam sufiĉas, vi konsentas pri ĉio kaj volas nun aŭdi ankaŭ la muzikilon? Tute vere, mi ja promesis ludi al vi, jam tie, en la fojmejo, ĉu vi memoras?

Li pennis de la ŝtono la harpon, lokiĝis pli proksime al la pordo, pasigis kelkfoje la fingrojn sur la kordoj, aŭskultis poste iom kaj ekludis. Tio estis polko, rapida kaj brua. La fingroj tuŝadis kvazaŭ dancante la kordojn. La vizago ridetiĝis, la okuloj fariĝis afablaj. Ŝajne li mem ĝuis sian ludon.

— Cu ne, Anne-Mari, tio ĉi estas ja bela? li demandis.

Sed ankaŭ nun aŭdigis el la tenejo nenia respondo.

— Cu vi vere ekdormis? miris Nipernadi.

I frapis, ludis, frapis denove.

— Tia ursa vintrodormo! vokis la junulo.

Sed tiam knaris la malantaŭa pordo de la drinkejo kaj sur la sojlo aperis Kūüp. Li estis dormema, ŝirmis la okulojn kontraŭ la suno. Liaj blankaj ĉemizoj kaj kalsono brilis blinde.

— Kiu do bruacas tie la tutan nokton? li vokis, tenante la manon antaŭ la okuloj kaj penante tra la fingroj rigardi kontraŭ la suno. Cu estas veturanto al la foiro, edziĝfestano? Do li frapu sur la pordo de la drinkejo, tie, kie estas la elpendaĵo!

Li tuis longe kaj peze, inter la fingroj de la maldekstra mano fumis pipo. Tusante li arke kurbiĝis.

— Cu Anne-Mari estas tie ĉi, en la tenejo? demandis Nipernadi.

— Anne-Mari tie ĉi, en la tenejo? ripetis Kūüp. Ne, tie estas nur malplenaj boteloj de biero.

Nipernadi malkontente deĵetis la harpon.

— Kie ŝi estas do? li demandis spiteme.

— Estas do? ripetis Kūüp la lastajn vortojn de la demandanto. Ŝi dormas tie, en la drinkejo, en la ĉevala parto.⁴⁾

Tiel, kaj ŝi tute ne estas en la tenejo? Kaj ĉiuj belaj rakontoj pri la maharago de Kapurthala, pri Enelele, pri la drenado de la marĉo de Maarla kaj ĉio cetera estas ĵetitaj kvazaŭ aeren, por neniu? Li nur vane parolis al la malplena tenejo, siajn plej belajn vortojn li ĵetis kontraŭ la putran pordon? Kiel ĉiam, kiel ĉiam, la plej bela pasas preter la oreloj, sed tio, kion ili kaptas, estas nuraj rubo kaj ŝlimo.

Kaj Anne-Mari aŭdis nenion, nek pri amo, nek pri la dudeko da laktovimoj, kiuj havas mamojn kiel blankajn tinojn? Ne aŭdis, kiel li promesis ŝanĝigi la akvon kaj muĝe malsuprenigi ĝin el la marĉo. Ne aŭdis — kaj tio estas la ĉefajo — lian majstran ludon, kiu povas ripetigi unu solan fojon en la vivo! Li ja ludas ĉiutage, sed tamen povas okazi tiel, ke la solan fojon en la vivo li scipovis enfermi en la ludo sian tutan animon kaj sopiron. Kaj Anne-Mari aŭdis el tio

nenion, ŝi dormis kvazaŭ mortigita, dum la brusto levigadis, la nazlojoj muĝadis kiel akvofaloj, dormis tie, en la ĉevala parto!

— Alportu al mi bieron kaj tranĉaĵojn da pano! li diris al Kūüp.

— Tranĉaĵojn da pano? ripetis Kūüp laŭkutime la lastajn vortojn de la parolanto. Unu botelon da biero kaj du tranĉaĵojn da pano? Aŭ du botelojn da biero kaj unu tranĉaĵojn da pano? Kiel estis, sinjoro?

— Panon kaj bieron! vokis la junulo kolerete.

— Bieron? Jen tiel, nun la preciza kompreno estas per unu fino jam en la mano: du bierojn kaj du tranĉaĵojn da pano!

Li trenis sin dormeme for, liaj pezaj paŝoj sonis longe en la malplena drinkejo. Tie li tuŝadis kaj vokadis Anne-Mari-n. Verŝajne li trovis nenion. Fine li revenis kun biero kaj pano, metis ilin sur la sojlon de la tenejo, verŝis bieron en la glason.

— Cu vi estas de malproksime? li demandis, — jen, eĉ muzikilon li kunhavas? Supozeble vi ludas tian instrumenton, tio estis kvazaŭ aŭdebla antaŭe. Aŭ ĉu vi kunhavas ĝin por ia alia celo? Tie ĉi estis antaŭe ne-longe viro kun granda trumpeto, sed lia trumpeto estis plena de kontrabanda brando, ankaŭ al mi li proponis por malalta prezo tiun brandon, tre bona trinkaĵo ĝi estis. En harpon oni certe ne povas meti brandon?

Li rigardis la muzikilon je ĉiuj flankoj, frapis la rezonejon, provis ĝin skui.

— Aŭ ĉu la varo estas jam aliloke vendita? li demandis ruze.

— Mi estas marĉdrenisto! diris Nipernadi fiere. Mi iradas kvazaŭ kastristo tra la lando kaj kie mi trovas marĉon, tie — ek' al labor'!

— Tie — ek' al labor'? miris Kūüp. Do tia viro vi estas — kiu povus tian konkudi laŭ tiu ĉi harpo. Nu, pri la marĉo de Maarla certe nenio estas farebla. Ĝia akvo kuŝas profunde kaj sub ĉiu razeno kirlas dekduo da fontoj. Tiun diablon eĉ satano ne venkos!

— Certe venkos! fanfaronis Nipernadi. Mi jam konas miajn laborojn kaj aferojn. Kaj fonto tute ne ekzistas tie ĉi. Ĉio estas ŝlimo kaj koto, portita malsupren el la arbaro, kaj la kalkŝtona muro ĉe la akvofalo ne lasas la akvon deflui.

— La akvon deflui? ripetis Kūüp.

Li metis la harpon al la nazo, flaris — ne, tio ĉi vere ne estas por transporto de kontrabanda brando! Estas simple nur bagatela kaj senvalora ilo, laŭgas eble al infanoj por ludado. Domaĝe, tre domaĝe, en ĉiu trumpeto estis nedireble malkara brando, ĉiuj trinkis, ĝudis kaj bone pagis. Li, damniita, povus ja ankaŭ tien ĉi enverŝi kelkajn gutojn, kial do li vane kunportas la instrumenton!

Jen, marĉdrenisto? Kūüp vidis eĉ pli grandajn sinjorojn, kiuj sur maŝino rapidegis tien ĉi, mezuris kaj esploris la marĉon, ŝovis sian nazon sub ĉiun razeton, gluis en libron ĉiun muskon kaj tifeon, sed poste skuante la kapon denove forrapidis sur sia maŝino. Nur abomena odoraĵo de fumo restis post ili, nenio pl. Hi, malbenitaj, nenion povos fari al la marĉo de Maarla — restos eterne la marĉo kaj la aferoj, ligitaj kun la marĉo; se nur Jauris revenus pli rapide hejmen, tiam ĉiuj denove havu laboron, agadon kaj monon.

Jen, tia vanta muzikanto intencas sekigi la marĉon de Maarla! Mem li estas malriĉa kaj mizera, ĉirkaŭiradas kvazaŭ hubula servisto, eĉ la botoj estas tro grandaj kaj disŝiritaj. Eble li eĉ ne povas pagi la kalkulon? Sub la influo de dormemo mi kredencas al li tiel multe, tute sufiĉas unu biero kaj unu pantranĉaĵo. Aŭ ankoraŭ

pli ĝuste: unu tranĉaĵo da pano kaj por la biero monon tuj anticipe! Se do li ne povus pagi por la pano, Kūūp povus lin enskribi en la libro por almozuloj. Kūūp havas tian libron por almozuloj. Tie li enskribas ĉiujn siajn senesperajn debitorojn kaj donacojn al almozuloj. Kaj kiam do kiel vera kristano li iras unu fojon en la jaro, kaj nome dum la grava pentekosto, al komunio, tiam li kunprenas tian libron al la preĝejo, antaŭ la sankta altaro genuante li metas tian libron sub la genuojn kaj post la sakramento kaj hostio montras ĝin ankaŭ al la pastro. Kaj la pastro tiam faras strekon sub la jarraporto kaj skribas sub tiu streko tiamaniere, ke li legis tiun ĉi aĵon de la komenco ĝis la fino kaj laŭdas la malavaran donacaĵon kaj zorganton pri la malriĉuloj, sinjoron Kūūp, la drinkejiston de Kaava.

Kūūp multe ja ne donas, plejparte staras en tiu listo la senesperaj debitoroj — iu prenis kringon kaj ne pagis, iu trinkis botelon da biero kaj nepaginte forŝteligis, iu ĵetis glason kontraŭ la muron kaj obstinis pri la pago. Ili ĉiuj enestas en tiu libro sub la nomo almozuloj, precize, detale, laŭ la adreso. Tiaj uloj kolektetas Kūūp. Tiaj sangsuĉistoj — nur tiom ili, rabistaj filoj, utilas, kiom la pastro laŭdas kaj kiom la bona Dio konsideros ĉe la absolvo de la pekoj.

Sed stampon la pastro ne metas sub la jarraporton. Li skribas, sed stampon ne metas. Ofte Kūūp paroladis kaj insiste petadis pri tiu stampo, certe estus kvazaŭ pli noble kaj elegante kaj ankaŭ por li mem estus pli bele kaj agrable rigardi, se la gravaj stampoj de la preĝejo britus tie en la libro de almozuloj. Sed la pastro estas terure avara kaj ne donas. Diras, ke la subskribo tute sufiĉas. Tia strangulo — ne volas fari ĝojon al proksimumo, kiel ordonas kaj instruas la sankta skribo. —

Trinkas la muzikanto, ĝuas, la panon li manĝas rapide kaj avide. Ne, — tia aĉulo certe ne kapablas pagi ĉe unu cendon! Denove la bona Dio sendis al li rabiston por ŝarĝo, li nur plenigas ĝue sian borborigmantan stomakon per la ŝvito kaj peno de la proksimumo. Plej terura estas tio, ke oni neniel scipovas diveni, kiu havas en la poŝo monon kaj kiu ĝin ne havas. Ja ekzistas, kiel oni rakontas kaj asertas, ankaŭ tiaj talentaj drinkejstoj, kiuj jam laŭ la vizaĝo scipovas diveni la kvanton de la mono de la gasto. Oni diras, ke ili, sat-

anoj estas tiel saĝaj, ke tuj post la unua rigardo ili povas diveni je precizeco de unu cendo — ili legas sur la vizaĝo kvazaŭ en libro. Sed Kūūp ne scipovas, vere neniel. Li ja provadis kaj ekzercadis, sed nenio farigas el tio. Li verŝajne ne havas tian talenton, la grandan kaj de la Sinjoro donacitan talenton de drinkejstoj.

— Do marĉojn vi drenas? demandas Kūūp devove. Ĉu laŭ ordono de la registaro?

— Jen mono! diras Nipernadi. Sangu kaj prenu vian parton.

Li ja havas monon! miras Kūūp. Ne, pro diablo, ĉiuj suspektoj estis vanaj. Nu, jen vi havas, kiam mankas la drinkejista talento. Vera drinkejstoj rimarkus tuj, kun kiu li havas aferon, portus tutan korbon da biero al la sojlo de la tenejo, instigus drinki kaj gustumus ankaŭ mem. Jen, tiam jam estus kalkulo! Sed nun — nun vi timis pri viaj du bagatelaj boteloj kaj la granda drinkado pro tio tute ne venis. Ho, domaĝo kaj mizero! Ho, amaraj larmoj de malriĉulo!

Eble li eĉ estas marĉdrenisto, sendita de la registaro, afergvidanto de iu agrikultura societo, instruitoro, aŭ kiel oni nomas ilin, fiulojn? Nuntempe oni povas ja kredi nenion. La vizaĝo kaj vestoj diras ja nenion. Iufoje veturas tien ĉi eleganta sinjoro, drinkas kaj diboĉas, sed baldaŭ jam polico estas post li — li eĉ ne estis io alia ol ĉiutaga ŝtelisto. Sed alian fojon venas simpla vireto, tia malgrasa kaj modesta, sed poste li montriĝas grava persono. Kiu ilin scias, kiu ilin scias, tiujn vagantojn tra la lando!

Sajne necesas voki Anne-Mari'n, ŝi interparolu kun la junulo, eble li mendos ankoraŭ ion? Kelkajn bierojn, kelkajn vinojn, malgrandan botelon da kuminlikvoro? Kaj ankaŭ Anne-Mari parolu pri tiu ĉi marĉo, tie ĉi nenio estas por dreni. Tie ĉi estas tute senfunda ŝlimejo, sub ĉiu razeno estas kelke da plaŭdantaj fontoj. Eble li senpripense eĉ ekplopaĉos tie ĉi, superakvigos ĉiujn herbejojn, troviĝantajn malsupre de la akvofalo.

— Jes, Anne-Mari ne estas tie ĉi, diras Kūūp subite. Ŝi dormas en la drinkejo, en la ĉevala parto. Nun ŝi jam certe levigis — ĉu mi eble voku ŝin?

— Ne, ne estas necese, diras Nipernadi.

— Ne, ne estas necese? miras Kūūp. Vi mem ja kvazaŭ demandis pri ŝi?

— Ha, tio estis jam antaŭ longe! diras la junulo.



Rezső Diener
Dénés:

Muta naturo

La granda aventuro

— F. Szilágyi —

I.

Senpacienca knabinkrio: — Karlo for el la lito, mi devas min lavi!

Silento. Poste nova krio, eĉ pli akra boras sia tra la pordo:

— Ka-a-arlo! Iru jam, mi malfruos!

Ionjo krias. Si estis la sola ano de la familio, kiu regule perlaboris iom. Car pri la kontribuo de la patro oni ne multe povas kalkuli. Li estis ĵurnalisto, nun iom maljuna kaj, pro lia nekuracebla kverelemo, senkontrakta. Li kuradas nun de mateno ĝis vespero, agas, grumbblas, kolektas anoncojn kaj dum la taga kurado forkonsumas tiujn bagatelajn sumojn, kiuj falas foje-foje kvazaŭ el la ĉielo. Sed li avare konservas la eksteran dekoron kaj Dio savu tiun, kiu ne alparolas lin: «Sinjoro Redaktoro».

Ionjo estas unu el liaj infanoj. Si staras nun senpacience antaŭ la banĉambro. Tie dormas Karlo, la frato de Ionjo. Nu, la loĝejo estas sufiĉe granda, memoro de la bona antaŭmilita tempo, ĝi konsistas el tri ĉambroj, — sed iamaniere oni devas solvi diversajn zorgojn. Oni ja povas ŝuldi per la luprezo al la domposedanto, sed singarde, ke la ŝuldo ne estu tro granda. Nun du ĉambroj el la tri estas subluigitaj. Kiam la dua subluanto kun sia edzino, antaŭ kelke da tagoj, enloĝiĝis, la familio havis gravajn zorgojn. La domloko de Karlo estis facile trovbla. La domo estis konstruita ankoraŭ en tiu tempo, kiam oni povis trankvile grasiĝi sen la danĝero, ke oni fine ne povos eniĝi iun aŭ alian ejeton de la loĝejo. La banĉambro do estis sufiĉe granda. Karlo, dudektri-jara junulo, kiu ĝis nun ne povis labori, escepte kelkajn helplaborojn, ekz. sekreta nokta neĝbalaado, aŭ kelksemajna kontora laboro, kaj kiu neniam estis sola, verdire ĝojis pro sia ekskluziva, propra banĉambro, kie li vivis la pli belan duonon de sia vivo, de la deka vespere ĝis la sepa matene.

Tiu solvo do estis tre kontentiga. Pli malfacila problemo estis la lito. La novaj subluantoj bezonis unu liton kaj la solan kanapon (kaj ili ricevis tri el la kvar seĝoj de la familio). Antaŭ jardeko la meblaro estis multe pli granda, sed kelkaj procesoj, kelkaj ŝuldoj forblovis ties grandan parton. Nun Karlo bezonis liton kaj oni povis konstati sen tro longa kalkulado, ke inter

la bezono kaj la provizo la diferenco estis precize minus unu lito.

La banĉambro estis nekutime granda. En tiu nekutime granda banĉambro staris nekutime antikva bankuvo. Oni jam delonge ne povis sin bani en ĝi, ĉar diversloke dek truoj vundis la maljunan korpon, sed estis fakto, ke en la nekutime granda banĉambro ankaŭ la bankuvo estis nekutime granda.

Archimedes iam elsaltis el la kuvo kun la subita malkovro de la Regulo. Karlo faris la malon. Li saltis en la kuvon kaj krias: Heŭreka! Sed la kuvo ne montrigis oportuna kuŝejo. Ia insida diablo ŝtelis sin en la duŝon, kiu cetere ne funkciis jam de kvin jaroj kaj la duŝo malgraŭ ĉiuj artifikoj, penadoj, teknikaj maŝtrajtoj faligis ĉiunokte kvar-kvin grasajn akvoglobojn sur la nazon de Karlo. Karlo ne amas tion. La problemo revivigis. Trovigis en la loĝejo ripozseĝo kaj unu el la du fratinoj de Karlo (tiu, kiu ne havis laboron), de tiu dormas en la ripozseĝo. Vere la bona sorto konservis tiun ĉi meblon por la sepparajo de la neceso.

Nun Karlo havas ĉambron kaj liton, sed li devas vekigi antaŭ la sepa, ĉar la knabino frue komencas sian laboron. Karlo tion ne amas, li amas duondorme kuŝi kaj revii pri tiu tempo, kiam li estos riĉulo, aŭ almenaŭ bone pagata laboranto. Tiuj revoj havas tre agrablajn detalojn, ili estas bagatelema konstruitaj kaj elĉizitaj. En tiu revmondo havas gravan rolon la deksepjara gracia knabino el la najbara loĝejo, kiu mirakle ekfloris en la lasta duonjaro. Si iomete «katumis» kun li, dufoje ili rigardis filmon kune, sed poste io interrompis la bone ekirintan romanon. De kelkaj semajnoj ŝi arogante rigardas preter li, kiam ŝi vagabondas sur la mallargaj stratetoj de la antikva kvartalo kun tiu ruĝvanga, pomadita minesciaskiu. Agrable estus facile, elegante lin nokaŭti, malfermi la pardonon de la eleganta Hispano, alporti ŝin ĉi tien (vi vidas, kiel eleganta virĉambro iĝis el la antikva banĉambro), kaj postuli de ŝi la kompletigon de la interrompita ludo. Sian friponetajn vangojn nun estas purpur-ruĝaj, ĉu vi vidas la junan, vivspiran figuron, ĉu vi aŭdas la sensincitan ekvidon. Sed nun mi ludos kun vi, museto — li pensas. Li proponas cigaredon al ŝi, ili ekfumus ambaŭ atendo-plene, nubo de delikata fumo ĉirkaŭŝvebas ilin kaj nun...

— Jam antaŭ longe? Ĉu antaŭ longe? Kaj nun vi tute ne havas plu emon?

Tio estas malnova afero — la humoro de la sinjoroj ŝanĝiĝas kiel vento. Nur ĵus li frapegis kaj kriaciis pro la virino, sed nun, post momento, eĉ vidi ne volas ŝin plu.

— Ĉu vi longe restos tie ĉi, tie ĉi en Maarla? demandas Kūūp scivole.

— Longe? ripetas Nipernadi kvazaŭ vekigante.

— Kiel mi sciu tion! li vokas poste spiteme. Vi estas tie ĉi vere strangaj homoj, mi devas ankoraŭ pripensi, kiel fariĝos pri la marĉo kaj ĝia sekigo. Vi kutimigis tie ĉi al la mizera kaj sentaŭga vivo, pli bonan vi eĉ ne bezonas. Kie aliloke oni povas vidi tian malsagaĵon, ke virino ne dormas en tenejo, sed ĉe ĉevaloj? Kaj la suno estas jam en la alto de dek hektaroj, sed ĉiuj ankoraŭ dormas profunde kaj videbla estas neniu.

Kaj Nipernadi prenas la harpon kaj stariĝas.

— Sed pri la drenado de la marĉo de Maarla ni parolos ankoraŭ! li diras.

Tiam li paŝas al la rivero kaj vokas:

— Jona, aŭdu, Jona, venu kaj transriverigu min!

Li staras, atendas.

— Jona, fripono! li vokas afflikite, venu do!

— Tia strangulo, diras Kūūp, rigardante la junulon, Dio scias, de kie kaj kiu li povas esti? la tajloro, ia muzikisto? — instruktoro ŝajne certe ne!

El la estona: *Henriko Seppil*.

¹⁾ *Ficedolo* = bastardnajtingalo (*Ficedula Hypoleis*).

²⁾ *Citrinelo* = speco de birdo (*Emberiza citrinella*).

³⁾ En la estona kamparo la fraŭlinoj kutimas somere dormi en la tenejo.

⁴⁾ La malnovaj drinkejoj en la estona kamparo konsistis el du partoj — en unu fino la drinkejo mem kaj en la alia: ejo por la ĉevaloj kaj veturiloj.

— Ka-a-ar-lo-o! Tiu ĉi sentaŭgulo denove ekdormis!

Karlo grumblante ellitiĝas. Malbonhumora li estas. Rapide li surmetas la pantalonon, kies brilo logas la atenton al ne emfazinda korpoparto, la ŝtopoplenajn ŝtrumpojn kaj la ŝuojn, kies plandoj diskrete enlasas la koton kaj pluvon. Karlo oscedas. Li iras en la kuir-ejon. Tie li atendas, ĝis la bancambro reliberiĝos.

— Ĉu la juna sinjoro jam moŝtis forlasi sian baldakenliton? — grumblas la patro kaj poste Karlo transprenas komision por urĝigi pagon, kiu eventuale neniam estos plenumita. Karlo almenaŭ trifoje estis tie. Komence li tre fervore klopodis pri la afero, ĉar Patro promesis dek procentojn, sed poste klariĝis, ke la tuta promeso ne valoras unu groŝon. Kvankam la mono nun estas ege necesa ne nur por Karlo, sed ankaŭ por la tuta familio. Ĉiu kredito nun eĉerpiĝis kaj de kelkaj tagoj ili manĝas senĉese stufitan grion sen viando, sen graso aŭ butero. Cetere hodiaŭ Karlo planas perfidon kontraŭ la familia majesto. Unu el liaj amikoj (kian societon serĉas al si tiu ĉi bubo; senlabora kelnero estas tiu amiko), akiris al Karlo senpagan bileton por tagmanĝi en la komunuma manĝejo. Jam plurfoje temis pri tio, ke la familio devus sian registriĝi en la listo de la oficiale helpataj malriĉuloj, sed parte la sinjoro redaktoro protestis tre akre, parte Panjo, kiu trans ĉiu fajro komplete konservis la sinjorinan majeston, indigniĝis pro la malinda ideo:

— Prefere malsatmorti. Kune kun tiuj ĉifonuloj? Neniam!

Sed Karlo havas ian kriplan ribelemon en sia interno. Pri la mezuro de tiu ĉi ribelemo oni ankoraŭ nenion povas diri, sed eble la hodiaŭa tagmanĝo estas ĝia plej supra grado. Jes, hodiaŭ li gustumos la menuon de la komparto. Hieraŭ li jam vidis la menuokarton. Ĝi estas fidiga. Rizo-suppo, bovoviando kun brasiko. Kaj grio tute ne!

La bancambro estas daŭre okupita. Nun liberiĝis la gazeto. Honorekzemplero. Karlo trafolumas la grizan kaj lacan paperon. La politiko ne interesas lin, oni nur devotiĝas de la plej ĉefa demando. La

felietono estas tute stulta. Nenio en la kriminala rubriko, almenaŭ nenio interesa. Ebrieco, mortigo pro ĵaluzo, vilaĝa trinkejo kiel batalkampo: nu, nenio. Inter la anoncoj, kiel kutime, nenio. Oni serĉas nur agentojn por la »enkonduko de sensacia novaĵo«. Fiksan salajron oni ne pagas, nur procentaĵon. Karlo jam konas tion. Nu, entute nenio.

Fine! Denove malfermiĝas la pordo de la bancambro. Karlo nun denove estas sola. Zorgeme li aerumas, lit-odoro restis post la sin lavintoj. Kaj nun li nudigas sin ĝiskokse kaj diboĉas en la freŝa akvo. Poste li longe rigardadas sin en la fendita spegulo. Li vidas tute belan knabon tie. Definitive li plaĉas al si. Nigra hararo, brunaj okuloj, etaj lipharoj. Oni povas miri, ke li konservis sian junecon en tia mizero. Sufiĉe alta li estas kaj kiel li konstatas, liaj movoj, gestoj estas elegantaj. En tiu ĉi momento Karlo estas tre kontenta. Cetere la kutimajn zorgojn li jam ne sentas, same, kiel oni ne sentas la normalan premon de la atmosfero. Karlo vivis ĝis nun nur militon kaj postmilitan militon. Punkto.

Pasis la naŭa. En la lukazerno bruo, frapado. En la korto estas ekspozicio de ĉifonoj, litaĵoj. Karlo nun estas preta. Vana rigardo al la najbara loĝejo. Nu, egale! Li ekfajfas. Kaj nun li iras piede por enkasigi la postulon de la patro. Li estas gaja, sed malrapide li iras kaj sen konvinkiĝo pri la utileco de lia vojo. Seninteresaj elmontrejoj rabas de li longan tempon, li postiras beletajn virinkruerojn nur *l'art pour l'art*, li faras tion tute diskrete, sin ne rimarkigante, fine li alvenas al la komercejo, sed tiel kredperdinte li parolas kaj la komercisto eĉ ne multe ĝenas sin:

— Mi bedaŭras, kara amiko, neeble. De mateno mi ankoraŭ ne vidis acetanton. Nu, tia estas nun la situacio. Bonvolu diri al via patro, ke li estos la unua, al kiu mi pagos, se mi povos.

La fripono. — Karlo nun tre malrapide paŝadas en la aŭtuna sunbrilo. Li ne rememoras pri simile bela novembro. Estas varme kaj foje-foje orfolio falas antaŭ la piedojn. Estas ĉarma la lula falado de la folioj. Estas gracia la ritmo de la lulfalo. Li rememoras la



István Nagy:

Montetoj
de Erdély

Poemoj de Eino Leino

El la finna: C. I. C.

Elegio

Kiel rivero
por la juneco eskapas.
Grizajn fadenojn
vivo-teksilo enfrapas.
Vane, ho vane
volas mi kapti momenton;
vino, kunuloj
plu ne ĝojigas la senton.

Tempo fiera
de l' energio jam pasis.
Mensa ravigo
min antaŭ longe forlasis.
Post la levigo
ĉu nun do sekvos subiro?
Horon serenani!
jen mia nura deziro.

Tion mi scias:
por la serĉanto de l' vero
estos ripozo
nur en la tombo sub tero.
Stormas la vivo,
sunon subglutas malhelo;
ruĝa strieto
restas: sopiro al belo.

Revo-montetoj
floraj subiĝis enmare.
Mi malriĉiĝis:
kantojn mi pagis tre kare.
Ĉion mi donis,
estis malmulta la kreo,
post la revaĵoj
restas nur tristo, kor-veo.

Laca mi estas
laca, ho, laca por mortil!
Ĉu do tro peza
estis la ŝarĝo por porti?
Eble mi volon
havis, sed ne energion?
Nur memriproĉon
gajnis mi — plue nenion.

Estis do vanaj
ĉiuj suferoj kaj penoj,
vane rompitaĵoj
estis la karaj katenoj?
Ĉu mi nun falos
antaŭ la fin' de l' laboro,
kiam cikatro
kovris la vundon de l' koro?

Spiti la diojn
estas neeble por viro!
Koron konsoli
eĉ ne kapablas la liro.

Raŭkas agordo,
frosto malvarmon alspiras.
Kiel rabbesto
morti en groton mi iras.

La Tricoteuse*

La Tricoteuse! Teruran sencon havas.
Vaporas sango ĉirkaŭ tiu vort',
La Tricoteuse! Timigas ĝi kaj ravas
kiel abismoj de kruela sort'.
Aŭskultu, nokte jakobenoj krias,
forkuru, gilotinoj jam funkcias,
kaj en l' animo, kiel Belsazaro,
ekvidas vi per fajra literaro:
La Tricoteuse!

La Tricoteuse! De lando kaj popolo
per ŝtrumptrikil' turniĝas histori',
kaj falas reĝa kap' laŭ via volo,
se maŝon ruĝan ekdeziras vi.
La Tricoteuse! Kolero via: sango.
La Tricoteuse! Sed via am': lavango.
Patrinton karan oni murdi povus,
se ame-fluste al l' ore! sin ŝovus
La Tricoteuse.

La Tricoteuse! Nun iu pensas eble:
nur malfeliĉon donas via sin';
sed malfeliĉa estas ja duoble
la viro, kiu ne renkontis vin.
La Tricoteuse! Vi mian vojon baris.
La Tricoteuse! Vi min freneza faris.
Barakti en la maŝoj estas vane,
enkateniĝis min ja blanka-mane
La Tricoteuse.

La Tricoteuse! Sed viro morte laca
ĉe vi en nigra nokto de l' harar'
ripozas dolĉe post klopod' senpaca,
kaj vin memoras dum la taglabor'.
La Tricoteuse! En viv' unua tento!
La Tricoteuse! Finflagro de l' prudento!
Mi ĉiam pensas vin, ĝis vivvespero.
Forgesos tuj la viron sub la tero
La Tricoteuse.

Sed kie trovi ŝin en vasta mondo?
demandas vi, kunfrato, kun esplor'.
Ŝi vagas kiel vento, mara ondo,
subite venas ŝi, tuj estos for.
Sed kia estas de l' poeto nomo?
La kanton verkis juna norda homo
al l' amatino: kun la buŝo varma,
rigardo rava, plej malica, ĉarma
La Tricoteuse.

*) Tiel estis nomataj la virinoj, kiuj dum la franca revolucio trikante aŭskultadis la rigorajn decidojn de la nacia konvento.

Somervespera vento

La somervespera vento
delikate zumas,
la vojetojn en arbaro
luno argentumas.

Inter pinoj eksonoras
la kukola kanto,
jam trankvilas la malgaja
koro de l' migranto.

Konsolo

Si mordiĝis, elsuĉis, elprenis min,
forĵetis la sekan kruston.

Si trinkis la sukon el mia pokal'
kaj manĝis la koron el brusto.

Ho, se mi eĉ povus malami ŝin!
Sed cindro ne brulas en flamo.
Nur unu konsolon mi havas, jen:
Vi trinkis venenon en l' amo.

Libera viro

Liberan viron en katen'
ne tenas glavo, fera ĉen',
lin ne sklavigas la perfort',
nek diktatora vort';
dum ĉio falis al la ter',
li staras en la fulmveter',
kaj ĉe la falo lia man'
plu frapas al tiran'.

Libera estas viro nur,
se li kuraĝas sen terur'
fidele iri al batal'
pro sia ideal';
ne skuas lin amasa kri'
nek punminac', nek ovaci',
tra nigra nokto sen ŝancel'
li marŝas al la cel'.

Libera vir' en tiu sort'
trankvile diras al la Mort':
»mi mortos; sed post mia hor'
plu vivos la labor'«
Car por hero' nur floro-kron'
ja estas mort', se laŭ ordon'
de l' konscienc' li devus sin
oferi en la fin'.

Iliadon: »Kial, vi, noblanima Tydeides, demandas min pri mia deveno. La homa gent' ja similas foliojn sur la branĉo. Vento forblovas ĝin...« Estas bele, sed jen nur tio restis al li el la tuta greka lingvo. Kioma estas nun? Li rigardas al la turo de la ruĝa-blanka, gaja preĝejo. Pasis la deknua. Nun li havas ankoraŭ du horojn. Tiam li renkontos la kelneron kaj ili kune iros al la manĝejo. Sufiĉe longa tempo ĝis la unua. Kion li faru? Li ekidas sur benko. La avenuo estas gaja kaj sunplena. El la centro de la urbo verŝiĝas gaja amaso. La trafiko havas elegantan karakteron. Oni promenas kun ridantaj infanoj, kun pli-malpli bonmoraj hundoj. Karlo sidas apud la stratangulo. El la flankstrata parto servistinoj rapidas al la vendohalo; unu el ili tre petole abridas lin. Malbela ŝi estas. Ho, kiel bela estas tiu aŭto. Iu fremdlanda diplomato sidas en ĝi.

Tre malrapide pasas la tempo. Almozulo lamadas al li. Li devas ekridi: »Onklo, vi ne estas granda psikologo.« Entute li havas monon nur por du aĉkvalitaj cigaredoj.

En la tabakvendejo li elspezas siajn lastajn monerojn. Poste li residiĝas sur la benko. Nun li ne havas monon, li nun liberiĝis de ĉiu respondeco, nun li estas tute senpeza. Kvankam kiel agrable estus havi multe da ĝi! Tiom ekzemple, kiom certe havas tiu eleganta fripono, dando, kiu afekte frapas la aŭtoperdon. Por momento pugniĝas la mano de Karlo. Sed li ja ne estas obstina karaktero, la mano rapide reglatiĝas. Tiu Karlo estas simila al juna hundo, lia rigardo saltas tien-reen, foje li ekkoleras, sed en la ora varmo de la tagmezo rapide fandiĝas la kolero. Estas pli bone ridi.

II.

La suno karesas la teron per somere varmaj kaj mildaj fingroj. La strata bildo viglas sub la kareso, sed subite la tuta bildo laciĝas. Estas momenta silento; oni ne vidas eĉ unu aŭton, la homoj haltas, mem la suno laciĝas, lacete ĝi okulumas. Kvazaŭ en ĉambro

ĉiuj eksilentus kaj oni dirus: »Anĝeeto traflugas la ĉambron.« Aŭ, kvazaŭ en simfonio momenta silento atentigus pri la grandiozo de la sekvonta melodio. Ankaŭ Karlo laciĝas, preskaŭ li ekdormetas, kiam io neatendita kaptas lian atenton. Taksiaŭto venas en la proksimo, la antikva maŝino ekknaras kaj la veturilo subite turniĝas ĉe la angulo. La turno estas tiel abrupta, ke Karlo ektemas kaj la radoj kontuzas la trotuarrandon. — Certe la pasaĝero frapetis por la ŝoforo — pensas Karlo, — ke ĉi tie li turniĝu kaj la ŝoforo ne estas sufiĉe lerta. — Li ne havas tempon daŭrigi la pensojn, ĉar la aŭtomobilo faras nur kelkajn metrojn en la flankstrato, poste ĝi haltas. Sur la ŝtupo de la veturilo aperas ekstreme gracia virinkruro, en griza silkŝtrumpo kaj lakŝuo. La gracia piedo longe restas sur la ŝtupo, Karlo havas tempon bone ĝui la gracie sveltajn liniojn. Li konstatas, ke ŝi ne volas elpaŝi tute antaŭ ol fini la kalkulon kun la ŝoforo. Sed fine aperas la tuto, juna, eleganta, brunblonda virino. Virino, kiu havas ideale subtalan talion kaj indan tajlorinon. Karlo per la tuta korpo turnas sin en la direkto de la flankstrato. La virino ĉirkaŭrigardas kaj singarde ekiras. Ankaŭ la aŭto forveturas. Karlo preskaŭ senkonscie ekstaras. Lin logas la neverŝajne subtila kaj tamen radike reala estaĵo. La virino denove ĉirkaŭrigardas kaj nun, post la unuaj malrapidaj paŝoj, ŝi daŭrigas la vojon rapide kaj piede.

La cerbo de Karlo laboras fulmrapide. Kial ŝi haltiĝis la aŭtomobilon, se ŝi ankoraŭ ne atingis la celon? Kien ŝi iras, kaj de kie ŝi venas? La koro de Karlo pulsas forte. La rapidaj paŝoj maltrankvile frapetadas sur la trotuaro antaŭ Karlo. Ŝi estas bela, tre bela. La plej bela ŝi estas el ĉiuj virinoj, kiujn Karlo ĝis nun vidis. Oni povas nur sonĝi pri tia virino. Kial li sekvas ŝin? Li mem ne scias. La sekreta kulpo de la belulino nun incitas Karlon, kvazaŭ ŝi apartenus al li. Car ŝi havas ja kulpon. Ŝi venas de sia amato, kie ŝi pasigis dolĉajn horojn kun tiu rabisto. Kaj nun ŝi de-

vas rapidi, ŝi foriris sub preteksto de aĉeto, baldaŭ hejmenvenos la edzo. Certe ili ne estas tro riĉaj, ĉar ŝi ne volis per aŭto alveni ĝis la domo. Tio ja estus suspektinda. Tamen ili ne havas materialajn zorgojn. Certe ne, ŝia eleganteco ne estas supraĵa, el ĝi radias la tradicia trankvilo, konstanteco. Kurbkrura junulino, proleta knabino, venas kontraŭe al li. Kial tiu tavolo de la socio neniam havas tiel deformitajn piedojn. Ho jes, la konstanta bonfarto. Tiu ĉi knabino vidis ĉiam mizeron, dum ŝi jam ne scias, kiel ŝi serĉu novajn plezurajn. Karlo divenadas, meditas kaj koleras. Nun li kredas, ke li kapablus esti kruela. Pri la maniero de la krueleco liaj ideoj estas iom miksitaj. Ĉar la virino estas tre bela.

La grizŝtrumpaj, lakŝuaj piedoj ritme frapas la asfaltan. Ĉe la stratkruciĝoj, kiam ŝi suprenpaŝas, oni vidas pli multe. Komplete bela ŝi estas, kiel Phryne. Se la kulpo estas tiel bela, oni devas ŝin pardoni! La strato nun leviĝas, blanka ŝtuparo sekvas. La virino kurete iras kelkajn ŝtupojn kaj senintence donacas plezuralmozon al la junulo. Poste ŝi konsciĝas pri la nedezirata akompananto. Ŝi konsterniĝas, hezitas kaj ririgardas. La rigardo de Karlo klare montras, ke li volas ion. Momento ne sufiĉas por analizi, kiaj ingrediencoj estas en tiu alrigrado. Sed io premas la koron de la virino. Ŝia bruna rigardo malheligiĝas. La longgantaj manoj faras subitan, maltrankvilan geston. La bela figuro inter du ŝtupoj sin turnas, — statua bildo — la vestoj nun klare montras ŝian gracion korpon. Ŝi turnas sin rekte kaj defende — atake al Karlo. Estas klare, ke ŝi timas. Kaj la strato estas tute senhoma. De malproksime oni povas aŭdi la karakterizan siblon de la tramvojo. La suno ridas milde, sed ŝia apenaŭ-alda voĉo klopodas esti akra kaj decida:

— Kion vi volas? Bonvolu tuj foriri!

Karlo mem surpriziĝas pro sia cerceco. Ĉar ankaŭ Karlo estas decida, kaj duonlaŭte, bone silabante la vortojn, li diras:

— Sinjorino, mi scias ĉion. Vi komprenas, ĉu ne, ĉion?

La subtile kolora vizaĝo ekpalas. La mieno iĝas dolorplena. Ribelemaj larmoj ŝoviĝas en la okulojn. La rigardo tute profundigiĝas. Pereiĝa parfumo flugas al Karlo el eta poŝtuko. Karlo afliktiĝas kaj volas frakasi sian kapon.

— Mia edzo do, li komisiis vin — ŝi diras kaj en la kliniĝo de la belega kapo estas pento, malĝojo, kaj angoro.

Karlo ne respondas. Lin surprizas la nova rolo. Li rigardas ŝin. Rompita, florplena branĉo. Mem la duondiino de la malespero. Karlo estas kortuŝita. Nun li devus konfesi ĉion, ke li mensogis, ke ankaŭ tion faris la senlaboreco, ke temas nur pri subita kaprico de nenifaranto. Li devus tion fari, sed li nur staras. Li staras ja sub sorĉo. La sorĉo radias de la malgaja mieno de la belulino, el la parfumo, el la tuta komplekso de la virino, kiu nun staras tiel senkulpa, pura, — virga. La morala indigno de Karlo iom post iom cedas el sia streĉiĝo. Karlo komprenas ĉion. La edzo estas maljuneta homo, ŝtatoficisto, sekuto, eble prokuristo en banko. Senhara dikulo. Ŝi ne diras tion, sed la intuicio de Karlo diktas la priskribon. Ĉu ne estas nature, ĉu ne estas komprenebla, ke pompa papilio ne restas en polvoplena, griza ĉambro, sed serĉas plezurflorojn en la vivĝardeno. La pensoj de Karlo atingas la parnasan altan kaj li teksas en ŝi la romanon de la nekomprenata virino. Sed la silento nun daŭras longe kaj ĝi iĝas tre ĝena.

La sinjorino nun subite decidis. Ŝi levas energie sian kapon kaj sen alrigrado, kvazaŭ ŝi parolus al malinda servisto, ŝi diras:

— Bonvolu veni kun mi. Kaj eĉ ne unu vorton pri la afero. Mi arangos ĉion.

Kaj Karlo iras kun la plej bela virino. Lia poŝto estas malplena, kiel la kapo de bankproduktisto, sed printempo tamburas en lia koro. Li ne rimarkas la malestimon de la virino, ĉar li sentas, ke li konfesos al ŝi la veron, la tutan veron. Kaj ĉu oni povas dubi pri tio, ke ŝi komprenos lin?

III.

La domo estas nova, moderna. Senvorte ili alvenas al la unuaetaĝa loĝejo. Blanka pordo. Ŝi elprenas ŝlosilon, malfermas. Ĉambristino venas el la ĉambro. Demande ŝi rigardas Karlon. La sinjorino nun turnas sin al Karlo. La voĉo estas rigida:

— Vi atendas respondon, ĉu ne? — iom da atentiga akcento estas en la frazo.

Karlo komprenas.

— Jes — li respondas.

La sinjorino nun ordonas al la servistino iri en la butikon por io. Jes, pensas Karlo, ŝi timas la ŝtelaŭskulton. La ĉambristino foriris. Karlo kaj ŝi eniras ĉambron. Varna nesto, glata moderna meblaro. La

S E R E N E

Kiam *Strindberg* jam ne estis tute sana kaj ĉiam pli klare montriĝis la signoj de la poste plene atakanta frenezeco, en Gotenburgo li ĉiutage manĝis kune kun fama profesoro — malgraŭ lia fameco mi forĝis la nomon sed pro tiu manko mi ne volas oferi la anekdoton — nu, kiel mi diris, kun profesoro, kiu bedaŭrinde havis la saman malsanon, kiun *Strindberg*.

Foje *Strindberg* alvenis tagmeze al la tablo kaj lia amiko akceptis lin per la jenaj vortoj:

— Amiko, mi mortis.

— Azeno vi estas, — diris *Strindberg* — vi ne povis morti, vi ja mangas bifstekon!

— Tio pruvas nenion, — respondis la profesoro — almenaŭ ne pli, ke ankaŭ mortinto povas manĝi bifstekon.

*
Ferenc *Molnár*, la konata hungara verkisto, foje serĉadis inter la libroj de antikvario. La komercisto tre konvinke proponis bonaspektan libron al la verkisto. Fine li diris:

— Aĉetu tiun ĉi libron, sinjoro Verkisto! Ĝi estas el la biblioteko de barono N...

Molnár protestis:

— Ĉu vi kredas, ke vi povas min influi per tio, kiu la libron antaŭe havis? Al mi estas tute egale...

— Ho ne, — diris la librovendisto — ne egale. Mi nur volis vin certigi pri tio, ke la libro estas absolute ne-tuŝita.

*
Ankaŭ tiu ĉi historioto okazis, tamen ni preterlasu la nomojn. Statviro, aristokratdevena, foje vizitis sian kolegon, same aristokratdevenan. La unue menciita statviro estis tre parolema homo. Kiam li alvenis, lin helpis maljuna lakeo, kiu ŝajnis al li konata:

— Mi jam vidis vin, kara amiko, ĉu ne?

La maljunulo serioze respondis:

— Ho jes, Grafa Moŝto. Mi servas jam ĉi tie la kvaran degeneracion...

prokuristo ŝajne perlaboras multe. Eble eĉ mil pengojn monate. Kaj tiu aĉa dikventrulo havas ankaŭ ŝin. Ŝi estas nun tute trankvila kaj tranĉe frosta.

— Atendu momenton! — ŝi diras.

Post unu minuto ŝi revenas sen surtuto. Dekoltita, malpeza silkbluzo estas sur ŝi kaj malhela, duonlonga jupo. Ŝia mieno estas trofiera, sed sub ĝi kaŝkuradas ĉagreno. Ŝia beleco aliĝas kaj renaskiĝas en ĉiu momento. La sorĉo daŭras.

— Vi devas silenti, ĉu vi komprenas? — ŝi diras kaj en la mano de Karlo ridas du fabele grandaj monbiletoj. Kvinoble pli granda sumo, ol la monata salajro de Ilono.

Karlo nun volus vekigi. Nun oni devus esti kavaliro. Oni devus ĉesigi tiun ĉi aĉan ludon. — Sinjorino, li devus diri laŭ la reguloj de la romantiko, — kion vi pensas pri mi. Mia koro estas via, reprenu vian monon. Mi silentos, ĉar vi estas la plej bela virino en la mondo. Rigardu min. Mi estas juna kaj nekomprenebla malriĉa. Mia vivo estas griza kaj nun mi scias, ke sunvarmo ĝis nun ne penetris ĝin. Mi ne volas vian monon, sed... Tiel li devus nun paroli, sed Karlo nun balanciĝas inter du sorĉoj: la beleco de la virino kaj la beleco de la mono. Hodiaŭ li povos plensatiĝi en restoracio. Kaj... Estiĝas granda kaj longa silento. Ŝi miskomprenas la silenton.

— Ĉu li promesis pli multe? — la sinjorino diras kruele.

Karlo balbutas.

— Ne, ne.

Mallerte, kvazaŭ ne volante rimarkigi sian movon li ĉifas la monon en la poŝon.

— Do, — volas adiaŭi la sinjorino, kiam Karlo denove ekbalbutas.

Ŝi dumtempe reakiris sian ekvilibron. Kun intereso kaj pli multe da bonvolo ŝi rigardas la junulon. La juna homo nun estas ruĝa, li batalas kontraŭ sia embaraso kaj ŝi ekkonjektas ion. Ŝi sentas, ke temas ankaŭ pri io alia. Iom ŝi eklevas sian gracilinian mentonon, la bluzo iom glatiĝas kaj klare desegnas la formon de la juna brusto. Ŝi staras, sed unu el la rondaj genuoj apogas sin sur la sidejon de la malalta

seĝo kaj reliefiĝas la tuta piedo. La rozkoloro de la karno opale diafnas tra la silkŝtrumpoj. Karlo nun subite vekiga kaj ekfajras.

— Sinjorino, — li ekkrias, lia voĉo estas raŭka. Mi estas sen unu groŝo, sed mi ne bezonas vian monon.

Ŝia rigardo montras surpriziĝon kaj pardonemon:

— Ni lasu la aferon — ŝi diras milde — mi komprenas vin. Vi bezonas la monon kaj mi — la lecionon. Sed nun foriru.

Ŝi etendas la manon al Karlo. Li ne elŝas. Lia mieno parolas tro klare. Sed nun li, kun la nekontraŭstarebla fajro de lia juneco kun la praa forto de la deziro, estas bela. La sinjorino unue ruĝiĝas, poste paliĝas. La sorĉo nun estas plena kaj reradias al ŝi. Ŝi paŝas malantaŭen. La libera mano de Karlo ekbrakumas ŝin. Ŝi volas krii, sed la lipoj de Karlo mutiĝas ŝin. Karlo tuŝas la veluran karnon kaj sovaĝiĝas.

— Cielo helpu — ŝi ĝemas kaj streĉas sian pugnon kontraŭ la juna viro, sed poste malfermiĝas la manoj kaj ankaŭ ŝi karesas. Poste ŝi subite elŝiras sin kaj diras:

— Ĉu vi frenezigiĝis? Kara, kara! Sed vespere je la naŭa venu ĉi tien...

— Tiam mi redonos la monon — pensas Karlo. Ho tiam...

IV.

Duono post la dekdva. Karlo sidas sur la benko. Li rigardas ĉirkaŭ si. Jen ĉi tie la aŭto puŝiĝis al la trotuaro. La postsignoj estas klare videblaj. Li ekstaras. La aŭtomobilo iras kelkajn metrojn. Jen la loko, kie ĝi haltis. Ĉi tie ŝi ekiris. Li denove vidas la gracie belajn virinkurojn, Grizaj ŝtrumpoj, lakŝuoj. Ŝi iris en tiu direkto.

Li metas sian manon en la poŝon, bankbiletojn li ne trovas.

— Jes — li diras al si — ŝi iris en tiu direkto. *Kial* mi restis sur la benko kaj kial mi ne akompanis ŝin *vere*?

La kapo de Karlo ankoraŭ muĝas pro baldaŭ forgesota fabelo. En la poŝo estas nur la mangbileto.

Kaj iom laca li ekiras al la komunuma manĝejo.



István Farkas:

Strato en periferio

INFANETO

— Janusz Korczak —

Pasas jarcentoj, multaj jarcentoj.

Mi diras: multaj jarcentoj, ĉar la horoj de la infaneta maldormo, traplektitaj per dormo, la momentoj de gajaj ridetoj kaj de kolereksplodoj, de mallaltaj priprenoj kaj de doloraj malesperoj, — tiuj horoj kaj momentoj, kiuj sur la disko de horloĝo signas sin kiel malgrandaj tempospacoj, por infaneto estas periodoj senlime longdaŭraj.

La hieraŭan impreson ĝi travivas hodiaŭ nebule, kiel centjara maljunulo siajn unuajn infanjarojn.

Pasis multaj jarcentoj, antaŭ ol etulo komencis distingi bonajn kaj malbonajn ombrojn. Bonaj ombroj, kiujn ĝi jam konas, estas ĝiaj du manoj. Bona ombro estas la brusto de la vartistino: ĉi tiu granda nuboj kovras la tutan horizonton, donas varmon kaj forigat malsaton.

Kiam ĝi vekigas, ĝi kuŝas trankvile, rigardas scivole, atente aŭskultas, turnas la kapon en la direkto de ĉiu brueto kaj de ĉiu lumekbrilo.

Kiam ĝi ploras, oni montras al ĝi brilajn objektojn, — oni klakas, frapas, oni balancas ĝin — kaj la lacigita etulo sentas sin kvazaŭ vojaĝanto, kiu post multaj, sendormaj noktoj troviĝas neatendite en kabaredo, kie estas riĉa, interesa programo kaj brua socio. Oni volus atiskulti kaj rigardi, tamen la okuloj estas plumbopezaj kaj la bildoj fluas sur supraĵo de konscio, kiel grizaj nuboj dum krepusko.

*

Lumigu hele ĉambron kaj legu laŭte, ĝoje, triumfe...

Infano estas jam homo...

Kaj tio fariĝis tiel rapide kaj nature.

Kiu vekis en etulo penson, ŝvebant dum la unua flugo super kolorriĉa, brulena herbejo de la vivo, kiu vekis penson, enaŭskultanta en la kanton de la leviganta suno!

Ho, penso infana! Vi estas, kiel surfaco de fonto, kirlata de kvieta venteto.

Tiom da steloj sur ĉielo, alvenis ankoraŭ unu.

Tiom da arboj en arbaro, ankoraŭ unu arbetoj eligis el la grajnoj.

En horon de arbara birdaro eniĝis ankoraŭ unu eta, naiva voĉo de kantisto...

La naturo ne konas ripozon, puŝata al laboro per potenco de nevidebla mano. Ĝi mirinde elskulptis malgrandan homon dank' al krea inspiro. La inspiro de l' Naturo havas forton de titano kaj sanktan konsciecon. Ĝi ĵetas amasojn de montoj tute senorde, ĝi majstre skulptas ĉiun ŝtonflankon per rosgutoj kaj ornamas per musko, kies eretoj vivas, ĝojas kaj kredas.

La verko de belarto, penega produkto de homa laboro, erarigante la okulojn, trompas la naturon. Ekbatu skulptajn per martelo, vi havos gruzon, krustojn, disrompitan polvon. Detraĉu per mikrotomo peceton de etula, rozkolora ungeto, vi ekvidos sub mikroskopo vicon de novaj, beleĝaj bildoj.

Se en la vejnoj de etulo ne fluas sango, celanta tra riveroj kaj riveretoj al maro-koro, se tra la riveretoj de ĝiaj nervoj ne fluas impresoj al maro-cerbo, se ĝi ne havas mirindan povon de kreskado, ĝi estus ankoraŭ milionfoje pli perfekta, ol ĉiuj senvivaj verkoj de belarto, pendigitaj en la malhelaj salonoj de valoraj muzeoj.

Kaj kunveturas homoj el diversaj landoj de la

tuta mondo por admiri ilin, senkolorigitajn, pene el-laboritajn dum longaj horoj, katalogitajn, laŭdatajn kaj provizitajn per prezo.

Vi, infaneto, ne havas prezon.

*

Infaneto estas sovaĝa homo, kiu antaŭsentas jam unu kaj alian el la ĉirkaŭanta ĝin mondo, klarigante al si naive la reciprokan rilaton de la misteraj aperaĵoj.

Kiam ĝi antaŭe kuŝis silente kun okuloj fiksitaj en la spacon, ne ĉirkaŭrigardante, ne plorante, nenion dezirante, — ĝi tiam vicigis sencele amasigitajn en sia animo diversajn bildojn.

Infaneto kredas en bonaj kaj malbonaj spiritoj, kiuj alportas favorojn aŭ anoncas malsukcesojn. Ĝi iam kredis, ke ili ĉiuj estas egale potencaj, ke ĉiuj estas videblaj kaj ke nenio pli potenca estas super ili. Nun etulo scias, ke la spirito-doloro estas nevidebla, kaj la bona spirito-patrinino ne scipovas batali kontraŭ ĝi, etulo scias, ke ekzistas sorĉvoko, alvokanta la bonajn spiritojn.

Tiu ĉi sorĉvoko estas la krio de infano. Kaj nun infano krias konscie, cele, por alvoki la bonajn spiritojn, ke ili plenumu sian servon.

La pordo, post kiu malaperas la vartistino, estas ĉielo, kiu, ridetante, donas sunfavoron, kolerante, silentas aŭ tondras.

Simile al la primitiva homo aŭskultanta arbarbrulon, rivermurmuron, venteghurlon por legi en ili ordonojn de dioj, infano atente aŭskultas kaj esploras la signifon de la tonoj elirantaj el la bonaj spiritoj. Ĝi atente aŭskultadas siajn longajn monologojn kaj penas ekkapti rilaton inter ili kaj inter la movo de la propraj manoj. Ĝi ĉesis esti senpensa observanto, konstatanta indiferente faktojn, ĝi deziras kompreni, ĉu ili estas produkto de bonaj aŭ de malbonaj spiritoj; de amikoj aŭ de malamikoj.

Kiam patrinino en ĉapelo kliniĝis super la lulilon, infano ektimis, vidante, ke la bona spirito ŝanĝis sian formon.

Vidante la unuafonojn moveblan ludilon, hundon, kanarion en kaĝo, etulo antaŭ ol fidi al io, deziras diveni, ĉu aperis bona aŭ malbona spirito, ĝi esploras patrinon per okuloj, plenaj de demandoj kaj de miro.

Infano decide fidas al siaj bonaj spiritoj kaj kredas ilian senerarecon.

*

Tio estis grandega malkovro, eksterordinara, epoka, decida. Etulo konvinkiĝis, ke la du ombroj — ĝiaj manoj — estas absolute obeemaj al ĝia volo.

Ĝi jam de longe suspektis, ke la du proksimaj ombroj, la du amataj bonaj spiritoj, havas ian specialan valoron, ke ili estas tute aliaj, ol ĉiuj ceteraj. Tiam tio estis nur neklara antaŭsento de granda vero.

De la momento, kiam infano ekvidis la grizajn konturojn de la ĉirkaŭanta ĝin mondo, tio estis la dua tiel grava momento.

Ĉiujn senmortajn malkovrojn de inspiro, kiuj simile al fulmo malfermas neatendite ĉielon de konscio, antaŭiras longdaŭra, penega laboro de multaj, multaj generacioj.

El la vico de faktoj, en kiuj io sin kaŝas, laŭsajne mirindaĵo, laŭsajne nedependaj inter si, tamen ligitaj per io, naskiĝas subite viva, blindiganta sintezo en plej misteraj ĉeloj de la cerbo. Komplicitaj faktoj

tute senvole kaj senscie kunmetadas sin en vicojn kaj en kolonojn — kaj subite aperas nova mondo de ideoj, logika kaj klara kune kun siaj sunoj, lunoj, kometoj, lakta vojo.

Infaneto, kiu apenaŭ egalas homon el ŝtona epoko, jam fratigas kun la genuloj de la homa gento.

Kiam antaŭe oni donadis al infaneto klakilon en manon, ĝi kaptis ĝin forte kaj alrigardis mirigite, ĉar la mano, la bona spirito, ŝanĝis sian formon. La klakilo eldonis sonojn kaj infaneto miris, ke la ĝis nun silenta bona spirito sonas. Kiam la klakilo elfalis el la mano, ĝi miris, ke la bona spirito revenis al sia antaŭa formo kaj eksilentis.

Tiuj ĉi esploroj daŭris treege longe, ĉa divorvo de la mistero estis tre malproksime.

Suĉante la propran pugneton, etulo de tempo al tempo eligas ĝin el la buŝo, atente alrigardas, sulkigas la brovojn kaj dronas en ekstazo.

Kaptinte ian objekton, infaneto portas ĝin al la buŝo kaj ree atente alrigardas ĝin. Etulo estas ĉiam pli proksime al la vero, tamen ankoraŭ ne tute certa, ĝi estas kvazaŭ timigita de la kuraĝeco de sia hipotezo.

Infano estas ankoraŭ malproksime de la plena vero, ĝi ne scias, ke ĝiaj manoj estas ja ĝi mem, sed ĝi scias, ke ili estas obeemaj al ĝi, ke oni ne bezonas sorĉvoki ilin per krio, ke ili estas ĉiam al ĝia dispono kaj ĉiam estas kune kun ĝi.

Infaneto estas ravita pri la malkovro, estas feliĉa pro sia aŭtoritato, pro sia unua proprajo — unua grado de sendependeco, fiberiĝo, forto.

Aba, a, aa, ooo, — pepas infaneto, direktante siajn manojn tien kaj reen kaj postrigardas ilin, jam certa, ke ĝi ne eraras.

Post la granda fortoŝtrecio ĝi sentas sin laca.

Patrino ridetante kliniĝis super ĝin. Kaj infano ekridis laŭte, korece. Patrino parolas al ĝi plej karese,

kaj infaneto jen etendas la manojn al ŝi, jen metas ilin en la buŝon, kaj suĉas ilin kaj ridas.

Patrino eligis al ĝi la manojn el la buŝo, etulo ektimis pri sorto de sia nova proprajo, ekkriis dolore kaj laŭte, protestis tiel forte, ke patrino paligis.

Ĉiuj ridetas al infaneto.

Mi opinias, ke maljuna kverko, rigardante ridindan formon de malgranda kverketo kun etaj folietoj, ridetas al ĝi per siaj verdaj folioj, kaj juna kverketo, senzorga, gaja en la ombro de la patraj branĉegoj, pepas al la patro mallauĝflustre. En la korpego de la maljuna kverko, en ĝia arboŝelo kaj radikaro estas jam tiom da senvivaj ĉeloj, en ĝiaj vejnoj rondiras sukaj malrapide, kvazaŭ laciĝinte; kaj la juna kverketo, trinkante la sangon de patrino-tero, sin nutras kaj kreskas, kreskas, kreskas.

Sajnas al mi, ke ĉiu birdo havas ridetojn por siaj etuloj, ĉar kora bondeziro por venontaj generacioj, kvazaŭ blua nebulo, ĉirkaŭas ĉion, kio salutas la morgaŭon.

La serioza, maljuna suno-nutranto trovas rideton eĉ por arbara konvalo, kaj arbara konvalo respondas al ĝi per la tremo de la blankaj folietoj kaj per pura aromo.

Infaneto respondas ridete al rideto, ne tial, ke ĝi komprenas ĝin, ne tial, ankaŭ, ke ĝi konas la koran parolon de la rideto, sed tial, ke tiel estis dum centoj da jarmiloj, ke la hodiaŭa tago salutas kortuŝe la morgaŭan matenon, kiu kviete respondas al ĝi, ke tiu ĉi rideto fluas trans milojn de generacioj kaj ligas en unu fratecan familion la blankiĝintajn estojn de idolana tombejo kun la infano, kiu estas fluonta en la aerspaco. Car tiu ĉi rideto estas ligilo en la ĉeno de generacioj.

Kiel la unua spiro estas senvola movo, antaŭanta la konscian vivon de infaneto — sen tio ne estus vivo, — tiel la unua rideto antaŭas la penson, — sen ĝi ne estus penso...



Jenő Gadányi:

Kompozicio

BESTAFEROJ

Fiŝoj en sanatorio

Proksime al Stockholm, sur la insulo Lovö estas la sanatorio de la fiŝoj, kiel ni legas en la semajna raporto de *Sueda Internacia Gazetservo*. En tiun sanatorion alvenas el tuta Svedujo la semmanaj, senpiedaj pacientoj por traktado kaj ekzamenado. Ho, ho, eĉ la fiŝoj?

La mutaj pacientoj plejparte kiel postaj pakajoj alvenas en la sanatorion, kies oficiala nomo estas Doltakva Fiŝeksperimenta Instituto. La doktoroj estas la plej spertaj fakuloj de fiŝmalsanoj kaj la sendantoj estas la fiŝakvaj inspektoroj, kies tasko estas malhelpi fiŝ-epidemiojn. Sajnas al mi, ke eĉ la vivo de la fiŝoj ne estas «ĝisfunde kremo», kiel oni diras en Hungarujo.

Jen estas la afero de la kankro. La kankro, dum la aŭtuno, estas preskaŭ nacia afero en Svedlando. Neontransparentoj sur la stratoj anoncas, ke Ĝi alvenis, la ekstero de la restoracioj estas ornamita per gigantaj kankrofiguroj, oni ricevas specialajn telerojn, ornamitajn per kankro-reliefoj kaj eventuale eĉ la blanka antaŭtuko de la ĉarmaj, blondaj kelnerinoj estas ornamita per aktuala kankro-girlando. En la mezo de la tablo ruĝa kankromonto turnas kaj al tiuj, kiuj ne malestimas la alkoholaĵojn, la kankroj servoplene glitigas la gorĝojn.

Kaj nun klarigis, ke io minacas la plezuron de la sveda *gurmand*-aro. Mistera malsano disvastiĝis inter ili kaj ĝi kaŭzis tre grandan maltrankvilon inter la kankroj — kaj la homoj, kiuj ja havas specialan bonvolon al la kankroj. Rapide oni transportis kelke da malsanuloj al la Instituto, sed la esploroj nur parte donis rezulton. Verdire la kankroj ne multe helpis al la doktoroj, ili nenion diris pri sia farto, pri la simptomoj; ili ja estis jam trans la unua timo kaj kondutis kiel filozofoj. Tamen oni konkludis, ke la kaŭzo de la malsano estas speciala fungospeco, sed bedaŭrinde ĝis nun oni trovis nenian kontraŭrimedon. Kiel mi diras, la kankroj montris sin filozofoj kaj akceptis eĉ la malesperigan deklaron senemocie, pensante, ke preskaŭ egale, ĉu dika fungo metas punkton al la fino de ilia vivo, aŭ ornamita pledo iĝas ilia honora

katafalko. La homoj estas malpli rezignemaj, tamen ili provizore devas kontentigi per la konsilo, ke: «oni malhelpu la iradon de kankroj el infektitaj akvoj al aliaj, kiujn la malsano ankoraŭ ne atingis».

La instituto esploras i. a., kian efikon havas al fiŝoj la industriaj elfluajoj en la riveroj kaj lagoj.

Kompatindaj fiŝoj! Kaj ni vivas, kiel fiŝ' en la akvo.

Katoj en pensio

En la *Interligilo de l' PTT* antaŭ ne longe mi legis, ke en la angla buĝeto estas registritaj 120 pundoj por pagi la aĉet-kaj konservadkostojn de katoj, servantaj por forigi la ratdangeron en la post-magazenoj kaj konserv-ejoj. Kelkcento da katoj ricevas tiamaniere ŝtatan funkcion, — eble eĉ insignon. Imagu, kiel fiera estas tia kato: «mi estas oficiala besto!» Kaj vi ankoraŭ ne scias, kio estas la plej rimarkinda en tiu afero: ke la katoj post fiksitaj tempo iĝas pensiitaj katoj kaj ĝuas je regnaj kostoj senzorgan maljunagon.

La subskribinton, kies maljunago ne estas tiel firme esperigita, konsolas, ke almenaŭ la anglaj katoj...

Memmortigaj ursoj

Samlake, kie la aferon de la fiŝsanatorioj, en la semajna raporto de la *Sueda-Internacia Gazetservo* mi legis pri la nordaj ursoj, ke vunditaj de homo ili prefere dronigas sin en montlagon, ol transdoni sin al la homo. Unu el la stokholmaj gazetoj antaŭ nelonge eĉ intervjuis faman ursĉasiston kaj petis la opinion de la fama persono pri la vero de ursasinnmortigo. Poste li rakontis, ke foje li mortvundis urson. Homo kaj hundo sekvis la sangospurojn de la besto ĝis malgranda monta lago, kie malaperis ĉiu spuro. Nenie oni povis trovi ion, estis do klare, ke la urso ne volis kapitulaci al homo, prefere ĝi mortigis sin. Pli volonte ĝi dronigis sin en la montlageto. Mi ne komprenas tiujn ĉi ursojn, ili estas tiom pesimistaj!

Fersil.

Ridetas al vi patrino, ho infaneto. Si ne bedaŭras, ke ĉiu tago de via grandigo estas tago de ŝia falo, ke ĉiu via spiro, ĉiu pulsobato estas paŝo antaŭen por vi, malantaŭen por ŝi.

Infano nun faras siajn esplorojn laŭ ia plano kaj kun granda entuziasmo. Ĝi konas jam la unuopajn spiritojn, penas nun diveni ilian reciprokajn rilaton.

Ĝi observas la tagmanĝon de la gepatroj.

La bonaj spiritoj faras iajn strangajn gestojn. Infaneto postsekvas iliajn manmovojn, armitajn en forkojn kaj tranĉilojn, observas ilin de la telero ĝis la buŝo atente kaj pacience.

Dum sia esplorado etulo travivas tri momentojn: tiun de plej malgranda miro — tiam ĝi havas larĝan malfermitajn palpebrojn kaj rideton en la okuloj, tiun de pli granda miro — ĝi duonmalfermas la buŝon kaj rigardas, rigardas; tiun de plej granda miro — ĝi rapide spiras, maltrankvile movigas kaj timeme rigardas.

— Donu al infano iom da supo — diras la patro al la edzino — ĝi tiel nin rigardas.

Kaj al infano-esplorulo oni volas perforte enversi acidan, salan supon. Ĝi deturnas la kapon, kraĉas, forpuŝas mane.

Ĝi jam de longe ĉesis kredi la senerarecon de la bonaj spiritoj kaj la neprecon subiĝi al ili, kontraŭe, ĝi rigardas ĉiam pli suspekteme, estas ĉiam gardema, ĉiam preta protesti.

Ankaŭ la bonaj spiritoj havas siajn strangaĵojn, oni devas atente observi ĉiun ilian agon, oni devas ilin eduki tiamaniere, ke ili estu obeemaj al la volo de infano.

Ĝi iam fidis al la bonaj ombroj kaj multfoje rigardis la patrinojn kun dolora riproĉo, antaŭ ol ĝi konvinkigis, ke oni ne devas ĉiam al ŝi fidi.

La manoj de infano estas la solaj seneraraj ombroj.

Infano nun postulas esplori ĉiun objekton per la manoj kaj per suĉo.

Gepatroj diras, ke ĝi amuziĝas.

La malgranda homo komencis tro seriozan laboron kaj havas tro malmulte da tempo por malspari ĝin en amuzado; ĉirkaŭas ĝin tro multe da dangaĵaj misteroj, kun kiuj oni ne povas facilanime ŝerci.

Kiam ĝi kuŝas en la lulilo, laŭŝajne senokupe, ĝi esploras siajn manojn por konvinkigi, ĉu ili ne enhavas iajn kaŝitajn kaj gravajn ecojn, kia estas ilia reciproka rilato; ĝi paroletas, ekzercas la voĉajn kordojn, kiel

VERKOJ KAJ VERKISTOJ*

SWIFT KAJ ANDERSEN

I.

Stranga estas la sorto de la libro. Strange estas kiel ofte la supra, la formo erarigas la amason, dum la esenco malaperas. La formo de la Gulliver-vojaĝoj estas ĉeno de aventuroj kaj ĝia sorto, ke la plej amara satiro, la plej kruela pamfleteto de la mond-literaturo, en mallongigita, oni preskaŭ dirus, kastrita formo estas nun — infanlegajo. Nu, tio tute ne estis la intenco de Swift; lia libro estas unu el la plej malesperigaj, plej groteskaj grimacoj, plena de malgaja ridaĉo. Swift volas montri, kia estas kaj kia ne estu la homo. Gulliver estas la heroo de izoleco; lia vojaĝo al la pigmeoj, lia restado ĉe la gigantoj kaj liaj aliaj aventuroj estas unuavice simbolo de mortemulo, kiu restas soleca kaj nekonata ĝis sia morto. Sub tiu ĉi tragedia vualo okazas la ploriga komedio, la groteskaj scenoj kun kuriozaj figuroj kaj kun la konstanta esenco, *kiaj estas ni*. Kiam Swift volas demonstri, kiel ridige bagatelema, supra estas nia fiere anoncita socia vivo, la civilizo, li montras tion sub la mikroskopa bildo de Liliputo. En Liliputlando la ŝnurdanco estas unu el la plej gravaj artoj. «Tiu, kiu la plej alten povas salti ne falante de la ŝnurego, ricevas la konkursitan oficon.» La plej granda artisto de la ŝnurdanco estas Flimnap, la financministro de Liliputo. Sur la naztuko de Gulliver tutaj rotoj de la liliputanoj povas ekzerci, sed ili kredas

* En tiu ĉi rubriko ni konigos grandajn verkojn kaj verkistojn, en populara formo.

sin potencaj kaj estas plenaj de milita fiero. La groteskiga spegulo de Swift kompreneble ne indulgas la politikan vivon. El la du grandaj partioj unu portas altan sukalkanonon, la alia malaltan. Konstanta milito minacas inter najbaraj landoj pro tio, ke la imperiestro, pro hazarda akcidento, malpermesis, ke oni rompu la ovojn ĉe la pli larĝa ŝel-parto. La revolucioj ekflamas en la signo de la ov-problemo. Jen la tradicioj en la spegulo de Swift.

Kiam Swift gvidas Gulliveron al la lando de gigantoj, la okuloj de la heroo rimarkas la difektojn de la homa korpo en giganta grandeco, li rimarkas la grason de la haŭto, la truon de la poroj, centoblitige bloviĝas al li la baladzo de la korpoj. De alia flanko, la reĝo de la gigantoj atentigas Gulliveron, t. e. la leganton, ke *la speco de homoj, el kiu vi devenas, estas la plej malnobla, la plej mizera el ĉiuj vermetoj, al kiuj iam la naturo donis lokon sur la surfaco de tiu ĉi bela terglobo.* «Tiu ĉi reĝo ne konas la kanonojn, kaj kiam Gulliver proponas malkaŝi la sekretojn de ĉi tiu invento, la reĝo koleras kaj miras, ke tia senpova kaj rampaĉa vermo, kia Gulliver, povas okupiĝi pri tiaj nehomaj kaj teruraj pensoj... ke oni povas tiel sensente preparoli tiajn terurajn sangverŝojn kaj detruojn, kiuj estas la natura efiko de tiuj kruelaj maŝinoj kaj apartoj, eltrovitaj certe de iu malica spirito aŭ de malamiko de la homa raso.»

Ne priskribeble ridinda estas la tria vojaĝo, al Laputa. Laputa estas la lando de la teoriuloj. Ili ne loĝas sur la tero, sed sur ŝvebanta insulo.

fortepianisto, kiu antaŭ granda koncerto faras longdaŭrajn laciĝajn provojn.

Dum promeno ĝi esploras aron da indiferentaj, moviĝantaj ombroj, ĝi estas kiel homo, kiu estus faranta vojaĝon inter sonoj kaj planedoj — tio estas efektive interesa kaj bela, sed kiel do pensi pri distraĵoj, kiam ĉirkaŭe estas tiom da misteraĵoj.

Strato kun sia bruo, ĝardeno kun verdaĵo, fremdaj loĝejoj, fremdaj personoj estas malproksimaj kontinentoj, nekonataj, vizitataj dum multjaraj vojaĝoj.

La laciĝinta infaneto ekdormas kaj moviĝas maltrankvile, ĉar ĝi vidas en sonĝo fragmentojn de antaŭnelonge viditaj bildoj.

*

Oni montras al infaneto bildetojn, ĝi rigardas kaj ne komprenas, tamen observas scivole, kiel ĉion, kio ekzistas. Oni ja devas scii kiacele tio servas. Infano volas kapti la bildetojn kaj meti ilin en la buŝon.

Infano ridetas al aliaj infanoj kaj etendas manojn al ili. Tio estas bonaj spiritoj, servantaj al nekonataj celoj.

Oni starigis infaneton antaŭ spegulon. Ĝi ekrigardis la patrinon, ekmiris kaj kaŝis la vizaĝon sur sia brako, timante danĝeron. Ĝi argumentas: kiam mi ne vidas danĝeron, ĝi ne ekzistas.

Etulo denove enrigardas la spegulon, la scivolo de esploro venkis la timon. Kaj en la sama momento patrino forprenas etulon: ŝi faris eraron. Etulo ja longe devas rigardi kaj pensi, antaŭ ol ĝi ion komprenas.

Ĝi longe amuziĝas kun kolorigita ligna ovo kaj scias jam meti ĝin el unu mano en alian.

Nun ĝi jam ne plu bezonas centfoje esplori la samon, ĉar ĝi jam bone memoras.

Ĝi esploras la parolon de la bonaj spiritoj; okazis foje, ke patrino kolere alparolis infanon, ĝi ekmiris, treege ekmiris:

— Jen grava, tre grava, mistera afero.

Post nelonga tempo infano ekparolos la unuan vorton.

Baldaŭ ĝi komprenos, ke inter movebla pilko kaj bona spirito-patrino estas diferenco de vivo...

La bonaj spiritoj jam de longe ĉesis esti por ĝi ombroj sur hela fono.

*

Patrino aperas malantaŭ vitra pordo. Infaneto etendas la manojn al ŝi kaj renkontas la vitron.

Denove misteraĵo?

La tiel bone konstruita teorio pri la bonaj spiritoj kaj pri iliaj ecoj subite disfalis.

Infano ekploris.

— Ignorabimus. Ni ne scios.

*

Banante sin, infano faris malkovron: krom la manoj ĝi posedas piedojn — du malproksimajn landojn.

Kaj kio estas litkovrilo, kuseno, lito? Eble ili estas la infano mem?

Denove ĝi komencas peneghe esplori, revizii la jam akiritajn verojn...

— Ignorabimus. Ignorabimus.

*

Infano staras per propraj fortoj.

Ĝi triumfas...

Infano, infano, kun kiel granda fido vi iras renkonte al la vivo...

El la pola: Halina Weinstein.

La kapo de la landanoj estas flankenturnita, unu el la okuloj rigardas al la ĉielo, la alia internen. Ili bezonas apartan serviston, kiu per bato atentigas la mastron, ke li devas aŭskulti aŭ paroli. Se oni volas atentigi lin pri aŭskultado, li ricevas frapon al la orelo, se pri respond-devo, al la buŝo. La virinoj en tiu lando ne estas tre fidelaj al la edzoj, ili ege ŝatas la fremdulojn kaj la edzoj estas tiom okupitaj pri siaj pensoj, ke ili rimarkas nenion.

Sub la influo de la Laputa-anoj fondiĝis en Lagado la Planfarista Akademio. Gulliver vizitas ĉi tiun akademion kaj renkontas eksperimentanton, kiu de ok jaroj penas eltiri kaj enfiologi el kukumoj la sunradi-ojn.

La satiro havas nekontraŭstareblan forton, ĝia limo estas la senfino:

»Enirante la duan ĉambron, mi jam de la pordo ekretiriĝis, tiom terura odoro min frapis. Sed la gvidanto enpulis min kaj ankoraŭ alflustris, ke — mi ne ofendu la scienculon, ĉar li havas tre senteman naturon — kaj mi do ne kuraĝis eĉ fingre fermi la nazon. La loĝanto de tiu ĉi ĉambro estis la plej aĝa scienculo de la akademio: lia vizaĝo kaj barbo estis pergamenflava, liaj manoj kaj vestoj kovritaj per aĉajo. Kiam oni prezentis min, li ege ekĝojis, ĉirkaŭbrakis kaj kisis min, kiujn afablaĵojn mi volonte estus preterlasinta. Tiu ĉi scienculo, de kiam li estas en la akademio, laboras pri inventaĵo, per kiu oni povas restarigi el la homa ekskremento la originalan nutraĵon...»

Troviĝas scienculoj, kiuj, anstataŭ lacigi la pulmojn kaj langon, paroladas tiamaniere, ke objektojn ili portadas en sakoj, kaj kiam ili renkontiĝas... ili demetas la sakojn, serĉadas la aktualajn objektojn kaj, tiel ili diskutas dum horoj. Poste ili reciproke helpas surmeti la sakojn kaj reekiras... Tiu ĉi lingvo — diras Swift — estas tre praktika, ĉar ankaŭ la anoj de diversaj nacioj povas kompreni unu la alian. (Jen tiel aperas la deziro de la internacia interkompreniĝo, en la formo de genia karikaturo, jam antaŭ ducent jaroj.)

La okuloj de Swift rigardas la homojn, kvazaŭ li ne vivus sur la tero, la homo restas al li kurioza besto. Gulliver fine atingas la idealan landon de la ĉevaloj, kaj en tiu lando la homa socio ricevas sian plej kruelan, plej teruran kritikon. Kiam Gulliver jam kredas, ke lia vivo atingis sian feliĉan havenon en la trankvila kaj saĝe direktita lando de la ĉevaloj, li devas foriri, ĉar la ĉevaloj estas maltrankvilaj pro la intima ĉeesto de Jehu (= homo). Li ploras, kaj li sentas abomenon, kiam li revenas al Eŭropo. Li preskaŭ svenas, kiam lia edzino volas (lin ĉirkaŭbraki; li sentas la abomenan hom-odoron). Pli malproksimen neniu povis ekzili sin el la homa socio, pli ege neniu turmentis sin kaj la leganton, ol Swift, sed pli forte neniu povis vekti la volon por la nobliĝo, ol tiu ĉi genio.

Pri lia vivo jen kelkaj indikoj: Naskiĝis en 1667, vivis en la — eble — plej tempesta epoko de Anglujo; revolucioj kaj reakcioj sekvis unu la alian; mizero kaj profitpelo: la ekevolvo de la kapitalismo markas tiun ĉi epokon, kies terurajn dolorojn vidis, bone vidis Swift, la verkisto. Swift, la homo ne kuniras kun Swift, la verkisto. La kontrastoj, kiuj kuniĝis en tiu genio, fine disiris lian konscion, li frenezigiĝis; sed homo, kiu ne povis toleri sian propran disharmonion, en kiu brulis la tuta kaoso de la freneza mondo, fine devis frenezigi. Li mortis en 1745.

Kaj ni, kiuj legas la »Vojaĝon de Gulliver« — la plenan, ne por-infanan verkon, — ni ŝutu ĉindron sur nian kapon, ploru dum dek tagoj, klopodu iĝi puraj kaj tiam ni eklevu nian frunton kaj rigardu al la leviganta sumo de la Bona Volo.

Aŭtunvespero

— Ludmila Jevsejeva —

Largajn stratojn jam kovris nebula vualo,
Nudaj arboj dormetas sub aŭtuna ĉiel'.
Ne rakontas plu vent' pri pasio varmega,
Sole ploras la kor' pro malĝoj' kaj kruel'.

Sur la bedoj ĝardenaj sangruĝigās asteroj —
De l' aŭtuno modesta kaj unua salut'.
Vesperombroj densiĝas sur paneloj de l' urbo,
En malgranda kafejo ridas piano kaj flut'...

Ce haveno dormema sonas kanto marista,
Pri ventego terura kantas iu, pri vel'.
Le krias freneze griza mevo senhejma,
Sed, pri kio ĝi plendas super akva nivel'?...

Ce preĝeja pordego sidas pala knabeto,
En okuloj infanaj regas zorgoj kaj pet'...
Sur stratoj malhelaj raŭka voĉo virina
Alumeton postulas por la cigared'.

Largaj stratoj jam dormas sub nebula vualo.
Nudaj arboj jam sonĝas pri la vintra ĉiel'.
Ne rakontas plu vent' pri pasio varmega,
Sole ploras la kor' pro malĝoj' kaj kruel'.

II.

Kiam temas pri Gulliver kaj Swift, oni facile asocias la nomon de Andersen. La fama dana verkisto antaŭ sesdek jaroj mortis. Neniu en la homa literaturo povis rakonti pli belajn fabelojn al la infanoj kaj — al la plenaĝuloj. Andersen ne tro favoras al la feinoj; kelkfoje ankaŭ ili troviĝis ja en liaj fabeloj, sed li preferas la plej senpretendajn, plej ĉiutagajn aĵojn, kiuj ricevas vivon de li. Li importis en la literaturon la plej diversajn vazojn, potojn, ĉifonojn, flagojn, skarabojn, kaj li estas, kiu donis civitanecan en Fabelujo al la malbela eta ansero. Mirindaj estas tiuj fabeloj. Nemezurebla saĝo kaj kompreno ridas el ili. Malnovaj teujoj donas instruon al infanoj de seriozaj burĝoj kaj oni povas diri, ke la plej belaj estas tiuj ĉi domaj fabeloj.

En gazetartikolo mi legis, ke Andersen estas antaŭulo de Miki-muso kaj kelkaj rememoroj pri fabelpartoj asertas, ke estas vere tiel. Fostoj rolas en tiuj fabeloj, kiel ĵugantaro en la konkurso de skaraboj; stebkandeloj parolas vivvige kaj neniam mi forgesos tiun fabelon, en kiu, pro la malĝajo de la reĝidino, la tuta regno estas tiom melankolia, ke la drinkemaj maljunulinoj nigriĝas per inko sian brandon. Amo kaj humoro estas en tiuj fabeloj. Andersen amis ridi kaj en kelkaj siaj fabeloj serene li kontentigis sian kelkfoje maliceman inklino. Rememoru tiun fabelon, kie la nokta vento interŝanĝas la firmtabulojn kaj oni volas viziti la barbiron en la domo de la ŝtatssekretario. La homa troseriozo estis la sola, kiun Andersen ne ŝatis, la solena trompifido, kiun li tiel neforgeseble karikaturas en la fabelo »La novaj vestoj de la reĝo«, bone konata el la traduko de nia Majstro. Vi ĉiuj rememoras, kiel trompas du aventuristoj tutan popolon kaj kiel ili teksas novan veston al la reĝo, kiam povas vidi nur tiuj, kiuj estas saĝaj kaj taŭgaj por sia ofico. Kiamaniere neniu kuraĝas konfesi, ke li nenion vidas sur li. Fine knabeto kuraĝas diri la veron. Tiam klariĝas, ke la reĝo estas tute nuda.

Swift verkis al la plenaĝuloj kaj oni faris el li verkiston por infanoj. Andersen verkis por infanoj, sed plenaĝuloj povas lerni el liaj fabeloj kaj pleniĝi de la plezuro, kiam radias la saĝo kaj ĉarmo de tiuj etaj trezoroj. F. S.

Kosmetikaj zorgoj en la biblia epoko



»Viaj karaj pomadoj estas bonaj — por igi bonodora« — mi legas en la *Kanto de l' kantoj*. »Kiam la reĝo sidas ĉe sia tablo, bonodoro de nardo venas de mi — laŭdas sin la fianĉino. »Pli bona estas la odoro de viaj ŝmirajoj, ol tiu de ĉiuj herboj« — asertas Salomono, la galanta kavaliro de la Biblio, pri kiu estas skribite:

»Kaj li havis edzinojn, 700 reĝinojn kaj 300 konkubinojn.«

Se ni atentis la lastan indikon, ni ne devas esti tre maltrankvilaj pro tio, ke la posedantoj de la tiamaĵ drog-vendejoj estus finintaj sian vivon en la malriĉulejo de Jerusalemo. La glora regnestro kaj septcentfoja fianĉo (— la tricentmembra serio ĉe maldekstra flanko nun estu preterlasita —) mem faris tute respektindan trafikon en la drog-vendejoj de la Sankta Urbo. Ho, ho, tiaj reĝoj estas sufiĉe maloftaj nuntempe!

La kosmetiko estas arto de ornamo kaj kaŝo. Ke tiu ĉi arto ludis gravan rolon jam en la biblia tempo, pri tio ni legis tre interesan artikolon en kuracista fakgazeto el la plumo de prof. Török. Tiu artikolo interese kaj vive sekvas la evoluon de la kosmetiko en la biblia epoko.

La ekirpunkto de tiu ĉi evoluo estas la moseaj leĝoj, kiuj okupiĝas pri la korpa pureco. En la Genezo ni trovas la jenan frazon: »Gibjon havis filojn, nomitajn Aĵa kaj Anah, kiu lasta trovis *varmajn* fontojn en la dezerto.« Prof. Török atentigas pri tio, ke la vorto *varma*, kiel atributo de akvo *ne taŭga por trinki*, en si mem indikas la ekiron de la pra-kosmetiko. Ankaŭ tio estas verŝajna, ke la nomadaj hebreoj — krom la primitivaj nomadoj — jam konis ankaŭ la tatuadon.

La idoj de Jakobo venis al Egipto, kie ili konatiĝis kun la egipta kulturo kaj lukso, kaj same kun tiuj procedoj, per kiuj la edzino de Potifar kaj la aliaj egiptaj sinjorinoj klopodis pligrandigi sian »seksapelon«. Oni preskaŭ devas supozi, ke tiuj procedoj en multaj okazoj donis

pli grandan rezulton, ol en la historio de la bela kaj hontema Jozefo.

Dum la kvardekjara vagado en la dezerto, la hebreaĵ sinjorinoj — kredeble — ne uzis pli bonan pudron, ol la polvon de la dezerto, sed en Palestino revekiĝis plena la arto de la kosmetiko, kiun eĉ pligrandigas la import-eksport-trafiko kun Fenecio. Tiu popolo transportis abunde balzamojn, rezinojn, beligilojn al Palestino.

I. a. ni legas en la Biblio, ke reĝo Ahasvero kolektis la »belvizaĝajn« junulinojn kaj ordonis, ke »oni donu al ili beligilojn«. Ahasveron oni povas ankaŭ rigardi kiel mecenaton de la tiama drogkomerco, ĉar la elektitaj belulinoj precize dum dekdu monatoj estis preparataj al tiu solena momento, kiam ili rajtis montri sian plaĉan aspekton al la fakspertaj reĝaj okuloj.

Salomono ŝanĝis drog-donacojn kun la reĝino de Saba, kiu certe ne malŝatis parfumaĵojn.

La metio de la pomadfabrikado estis jam konata en la tempo de Saŭl. Troviĝas profetoj, kiuj mallaŭdis la troigon de ŝminkado. Mallaŭdintoj kaj mallaŭditoj havas posteulojn en la moderna tempo. Sed la oleado de la hararo estis tute ĝenerala kaj ekz. la harŝmirajo de la reĝoj kaj ĉefpastroj diferencis de tiu de la ordinarioj.

Judit, antaŭ la log-sceno kun Holofernes, ŝmiris sian korpon per delikata mirbo. Inter aliaj faktoroj ankaŭ tio konfuzis la kapon de la kompatinda Holoferno, tiel ke apenaŭ li povos retrovi ĉe la Lasta Juĝo tiun konfuzitan kapon.



Junulino en la neĝo

— André Maurois —

»Usono? diris Blondel... Ha! ĝi estas multe pli kompleksa ol kredas niaj verkistoj... kaj eĉ ĝiaj. Ĝin mi trakis de New-York ĝis New-Mexico, de Louisiane ĝis Arizona, mi instruis la francan lingvon en dektri universitatoj kaj en tri junulinaj gimnazioj, kaj mi asertas, ke Usono estas ne unu- sed mult-flanka. Kio estas vera pri Boston, tio estas falsa, se vi priskribas Kansas-City, eĉ pli, se vi pripentras Los Angeles. Babbitt? Sed Babbitt mem evoluis, eĉ se nur, ĉar li legis Babbitt. Vi, eŭropanoj, kiuj neniam eliris el Place de la Concorde aŭ el Piccadilly, ĉiam ŝajnas kredi, ke la usonanoj havas sentojn ne similaĵn al niaj? Sed jes! La usonano amas, ambicias, jaluzas proksimume kiel ni. Li estas malsama? Jes, konsentite. Mi diris »proksimume«. Sed la similecoj superas la diferencojn. La usona patrino estas antaŭ ĉio patrino; usona virino estas antaŭ ĉio virino. Kiam li amas, la usonano estas eble farĉita per puritanismo, cetere naive kompensata de pseŭdosciencia freŭdismo, sed tamen li amas, kaj

liaj sentimentaj dramoj estas por ni tute kompreneblaj. Blondel haltis momenton, eliris el poŝo leteron kaj pludiris:

»Kelkfoje tamen oni estas surprizata. Tiam oni eraras. Nu, ĉi tiun leteron skribis viro el Chicago, Harry Plugg, kiu estis mia lernanto antaŭ... ok aŭ dek jaroj; kaj lian malfeliĉon mi senvole kaŭzis. Plugg estis brava tipo, tute ne sensprita, kun terura akcento de Middle-West. En tiu tempo mi instruis literaturon en Sandpoint, kurioza enmontara universitato iam fondita por kristanigi indianojn. Pli interesajn studentojn mi malofte renkontis dum mia tuta profesorkariero. Ja iom sovaĝaj, iom krudaj, sed tiom sinceraj, vivaj, ardaĵ... Mi kutimis kunveni ĝin miahejme du-, tri-foje ĉiusemajne, po grupetoj, kaj libere kaj familiare konversacii kun ili. Jen malfacilaĵo de l' matura aĝo: humane kontakti kun junaj homoj. Profesoro, kiu amas sian profesion, iĝas natura ligilo inter malsamaj generacioj. Post kelkaj semajnoj en Sandpoint, mi

La Talmudo, kiel ni legas en la citita studo, alvokas la edzon, ke li atentigu la edzinon pri la flegado de sia korpo kaj ke li estu oferema en tiu rilato. Per aliaj vortoj, li ne forstreku la parfum-rubrikon el la mastrum-buĝeto.

La buŝlavado devenas el la Talmuda epoko. La buŝ-origo originas en la egiptaj tempoj.

La ŝmirado per odora oleo havis purigan celon; la odoraj substancoj servis por forigi la ŝvitodoron kaj haladzon, kaŭzitan de la varma klimato. Inter la ingrediencoj de tiu oleo ni trovas olivon, migdalon, rezinon, vinon, mielon, gudron ktp. Fine oni ruĝkolorigis la miksaĵon. En la biblia epoko la ŝmirado tiom disvastiĝis, ke la ŝmirfarado iĝis aparta profesio.

La ŝminkado, la nigriĝo de la okulharoj kaj brovoj jam delonge estas konataj en la historio de la kosmetiko. Ankaŭ tiu sinjorino jam sufiĉe longe songas en sia tombo, al kiu profeto Jeremio diras la jenan admonon: »Kaj vi perdita, kion vi faros tiam? Se vi vestas vin en purpuron,

eĉ se vi ornamas vin per oraj pendjuveloj, eĉ se vi ŝmiras viajn okulojn per farbo, vane vi vin beligadas!«

Por la forigo de la superfluaĵoj oni uzis mirhon, kalkon kaj ian terspecon. Estas indikoj pri tio, ke oni konis la henaon. La publikulinoj en la tempo de Jesaĵo, portis sub siaj kalkanaj etan ujon, faritan el kropo de kokino. Se konvena individuo alproksimiĝis, ŝi piedpremis la saketon, el kiu la parfumo intense elsprucis kaj ankaŭ tio efike atentigis la koncernan sinjoron pri la cedemo de la sinjorino.

Krom la ŝmirado oni beligis la harojn ankaŭ alimaniere. La rajdistoj de Salomono frotis siajn harplektaĵojn per orpolvo, tiel ke ilia kapo brilis sub la suno.

Bedaŭrinde, nek la citita interesa studo, nek niaj propraj esploroj donas respondon al kelkaj demandoj, ekz. kiel oni reklamis la bibliajn pomadojn, ĉu estis tiutempe komerca libertago, ĉu la komizoj estis kontentaj? Estus ja interese scii ion ankaŭ pri tio, ĉu ne?

Kopirajto ĉe F. Sz.



jam ne rimarkis ajnan ĝenigon ĉe miaj preferataj lernantoj. Ili alvenis en mian studĉambron moviĝemaj kaj ludemaj kiel aro da junaj hundoj. Unuj elektis fotelojn, aliaj sidis sur la tapiŝo, ĉiuj ekbruligis cigaredojn aŭ pipojn. Principe ni devis paroli nur pri Rousseau, Balzac, Stendhal; fakte ili parolis ĉefe pri si mem kaj pri la vivo, pri kiu ili havis grandajn timojn. Tiam efektive la krizo iĝis ĉiutage pli grava. La juna usonano timis pri sia estonto, kaj tiuj junuloj konsultis la francajn romanojn same kiel renesanculo demandis Virgilion aŭ Puritanon la Biblion.

*

Unu dimanĉon, mi staris antaŭ la fenestro de mia ĉambro, kaj mi rigardis la neĝon fali, kiam mi vidis tiun junan Plugg, kies originalan parolmanieron kaj senflatan saĝon mi ŝatis, malsupreniri el malgranda aŭtomobilo, kiu ĵus haltis antaŭ mia pordo.

»Jen nia amiko Plugg, mi diris al mia edzino... En dimanĉo! Kion do li volas?»

Mi devas diri por klarigi mian surpriziĝon, ke la dimanĉojn usona studento preskaŭ neniam uzas por siaj studoj. Unuj vizitas la preĝejon (en Sandpoint ne multaj; sed ekzistas piemaj universitatoj); aliaj sportadas; preskaŭ ĉiuj promenas junulinon. Resume, viziti dimanĉe la francan profesoron estas sufiĉe strange.

Plugg, sen haltigi sian motoron, kiun mi vidis tremi sur la neĝa vojo, laŭiris kun mallarva kapo kaj malserena mieno la vojeton, kiu kondukas al mia domo. Mi malsupreniris por malfermi antaŭ li la pordon, ĉar ni ne havis serviston, kaj nur nigrolino kelkhore helpis mian edzinon en la mastrumado.

»Kia fervoro, Plugg... Paroli france dimanĉon matene!»

»Paroli france, li respondis... Ho! ne, Sinjoro, temas pri persona afero. Mi tre pardonpetas, Sinjoro, ke mi ĝenas vin tiel frue, sed mi ĵus faris agon... agon, kiun mi ankoraŭ ne komprenas. Mi bezonas konsilon, kaj mi pensis, ke eble vi konsentos ĝin doni al mi.»

Ju pli mi aŭskultis lin, des malpli mi rekonis la kvietan ĉiutagan Plugg. Lia embaraso ekembarasis min.

»Sidigu, Plugg, kaj prenu cigaredon. Tio trankviligos vin.»

»Dankon, Sinjoro. Cetere, ne daŭros longe... Stulta afero. Sed ĝin mi volus diri tute senkaŝe, eĉ se vi poste min riproĉos.»

»Bone, mi aŭskultas vin. Ĉu vi havas fajron, Plugg? Nun, ek!»

*

La soleneco de lia konfes-komenco iĝis min timi, ke li eble faris gravan agon: »Kial li preferu ne vizitas sian dekanon, mi pensis. Ja Philips, ne mi, devas zorgi pri la studentoj.»

»Mi estos tre verema, li diris; kaj eĉ, se mi povos, objektiva, kiel vi konstante diradas... Vi scias, Sinjoro, ke la studentoj de nia universitato la unuan sabaton de ĉiu monato organizas balon, al kiu rajtas inviti junulinon ĉiu el ni. Kelkaj havas sian »girl« en Sandpoint mem, el la profesor- aŭ bienul-filinoj. Tio estas la malplimulto, kaj plejparte ni venigas nian amikindon el la apudaj urboj. Komprenable, ni ne rajtas gastigi ilin en nia loĝejo, ĉar ĉi tiu situas en la universitato mem. Cetere estus malmorale... (ne, maltaŝa vorto!), almenaŭ danĝere. Ni do luprenas por ili ĉambron en hotelo, ekz. Sandpoint-Inn aŭ aliloke.»

»Ĉion ĉi mi scias, mi diris. Mi mem loĝis en Sandpoint-Inn, antaŭ ol lupreni ĉi tiun domon. La komforto estis bona kaj mi efektive vidis dum multaj

sabatoj la hotelon plena de fratinoj, kuzinoj, kaj fianĉinoj. Estis brue kaj rave.»

»Mi kredas, Sinjoro, pludiris Plugg, ke vi renkontis min lastan sabaton dum la maĉo Harward-Sandpoint, kiam mi estis kun Katherine. Vi sidis en la posta vico super ni, kaj mi eĉ senkulpigis Katherine, kiu apogis sin al viaj genuoj.»

»Efektive mi memoras, ke vi estis kun tre bela junulino, blonda, kun ruĝa robo, ĉu mi bone memoras?»

Li malfacile glutis salivon kaj diris:

»Jes, ŝi estas blonda kaj tre bela... Mi promenas kun ŝi de kelkaj monatoj. Hieraŭ vespere, ŝi do venis por la balo. Ni dancis parton de la nokto, poste mi kondukis ŝin al ŝia hotelo kaj mi revenis hejmen kaj enlitigis. Vi scias, kie mi loĝas en la teretaĝo de Harrison Hall. Mi devas diri, ke antaŭe dum la tago mi montris mian ĉambron al Katherine.»

»Ĉu vi rajtas enirigi junulinon en vian ĉambron?»

»Ĝis la vespermanĝo, jes. Sed se virino estas vidita eliranta el la ĉambro de studento post la konvena tempo, tuj oni forigas lin el la universitato, kio estas tre malbona afero. Nu, mi estis kondukinta Katherine

POEMO

— A. S. Puŝkin —

(1829)

Ĉu stratojn bruajn mi promenas,
Ĉu venas templon dum solen',
Aŭ feston gajan partoprenas,
De revoj miaj daŭras ĉen'.

Mi diras: fluos temp' alterne
Kaj mort' nin ĉiujn prenos for;
Ni iros teren por eterne;
Kaj jam proksimas ies hor'.

Kaj kverkon solan reĝfieran
Rigardas mi kun trista sent':
Transvivos ĝi min efemeran,
Jam kiel aĝon de l' pragent'.

Ĉu vin, infan', mi ame tenas,
Adiaŭ, — batas mia kor':
De via voj' mi tomben venas,
Vi — al la vivo kaj dislor'.

Ce l' pas' de ĉiu jar' kaj tago
Mi ofte pensas kun sopir',
Penante trafi en imago
Je l' dat' de mia lasta spir'.

Kaj kie trafos min la sorto;
En ondoj, vojo, aŭ batal',
Aŭ lastan dormon post la morto
Mi trovos en najbara val'.

Se ĉie korpo senanima
Egale putros sen sufer',
Min tamen loĝas pli proksima
Ripoz' en mia hejma ter'.

Kaj daŭru plu ĉe tomba mia
La juna vivo sub ĉiel',
Kaj ĉiam floru senpasia
De la natur' eterna bel'.

El la rusa: A. Lavrov.

al ŝia hotelo, kaj la aŭtomobilon al garaĝo; mi ĵus eniris mian ĉambro kaj ekmalvestis min, kiam mi aŭdis malgrandan baton sur la fenestro. Sekvis dua, kaj tria, kvazaŭ ŝtonetojn oni ĵetus sur la vitrojn. Mi rigardis eksteren kaj mi vidis sub mia fenestro Katherine sur la neĝo kun ŝia blanka mantelo.

»Diablon, mi kriis mallaŭte, kio okazas, karulino?»

»Mi ne povis eniri hejmen, ŝi diris, mi forgesis la ŝlosilon de mia ĉambro.«

»Sed kial la pordisto ne malfermis?»

»Mi ne vidis lin.«

»Kio? Mi vidis lin, kiam mi lasis vin tie.«

»Mi malvarmas, ŝi diris, subite tremante.«

»Atendu momenton, karulino, mi tuj malsupreniros kaj reiros kun vi al la hotelo. Certe mi sukcesos malfermigi la pordon.«

Tiam ŝi alproksimiĝis al la fenestro kaj flustris:

»Lasu min veni al vi, Harry, estos tiom pli ĉarme. Mi foriros morgaŭ tre frue.«

»— Mi estis tre embarasita kaj kolera. Nenio estas pli severe malpermesata ol tio, kion ŝi petis; tian aferon la dekano, vi scias, neniam pardonas. Pro tia, Finnegan estis forigita kaj tamen li estis unu el la kolonoj de la futbal-teamo, kio mi bedaŭrinde ne estas; fine, kompromiti mian tutan karieron pro virina kaprico ŝajnis al mi stulte... Plie, infano mi ne estas; mi tre bone imagis la tentojn de nokto pasigita kun junulino bela, kiel Katherine, kaj mi tute ne intencis serioze min ligi. Ŝi estas tia »girl«, kian oni plezure promeniĝas en stadionoj kaj baloj, sed... mi parolis antaŭ kelkaj tagoj, ĉu vi memoras, Sinjoro?... jes, kiam ni eksplikis »Les femmes savantes« de Molière... ni parolis pri la virin-specimeno, kiun mi volonte edzinigis, kaj ĉi tiu S-ino Harry Plugg tute ne similas al Katherine, tion mi certigas.«

»Sed, dum mia kapo tiel saĝe rezonis, dum mi pensis, ke ŝia konduto estas ne komprenebla, ke ŝi mensogas pri la pordisto kaj aranĝis mem ĉi tiun aventuron, io en mi male deziris profiti la okazon. Mia kapo diris: ne!; miaj manoj etendiĝis al ŝi. Ŝi krotiĝis kaj momenton poste mi tenis ŝin, malpezan kaj frostan, en miaj brakoj. Mi metis ŝin sur mian sofion, kaj fermis la fenestron.«

»Katherine multe ridis. Ŝi stariĝis, demetis sian malsekan mantelon kaj aperis kun sia bala robo. Estis tiel bele, tiu robo blanka kaj brila, tiuj nudaj ŝultroj kaj tiu blonda kapo sur mia malnova sofo, ke dum momento mi forgesis mian malbonhumoron kaj mian maltrankvilon... Ŝi petis cigaredon. Ŝi estis tre senzorga kaj petis klarigojn pri miaj libroj, miaj fotoj, miaj desegnoj...«

»... Katherine, mi fine diris, estas tre malfrue; morgaŭ matene, mi tenisludos; vi devos leviĝi je la sesa; nun necesas dormi. Vi havos mian liton, karulino, kaj mi transportos en la banĉambro mian sofion, sur kiu mi kuŝos. Morgaŭ matene mi vekos vin, kaj provoŝ aranĝi vian eliron senakcidente... Kun iom da bonŝanco, ne estas neeble.«

Ŝi havis mokan mienon.

»Ĉu vi timas min, ŝi diris.«

»Kaj sen aldoni plian vorton, ŝi malagrafis sian robon. Ha, Sinjoro... kiel belaj kaj emociaj estas la gestoj de virino kiu malvestas sin... Vi kelkfoje diris, ke mi iam estos artisto; nu, mi dezirus tion pentri: tiun geston de la brakoj super la kapo kiam ŝi demetis sian robon. — Kelkajn sekundojn poste, Katherine estis muda. Mi jam scias, ke ŝi estas bele skulptita, ĉar



Géza Csorba

Hunna pafarkisto

mi jam ofte vidis ŝin en banvesto. Sed nuda... Ha! Sinjoro, kia stranga besto, la viro...«

»Mi diris: »Katherine!« Nenion plu mi bedaŭris. Ŝi ridetante ĵetis sin sur mian liton. »Tiel estu« mi pensis. Eble mian sorton mi nun ludas, sed ja ŝi valoras...«

»Tion vi volis, Katherine«, kaj miavice mi malvestis min, rapide, senorde. Mi ĵetis miajn vestojn ĉiufanken kaj per salto mi estis apud ŝi.

»Tiam okazis nekredebla afero... Mi probable, kaj eĉ certe, ne konas la virinojn: ĉi tiu mi ja ne komprenis. Car tiu ulino, kiu preparis la tutan aferon, kiel dirite, kaj venis kun bala robo tra la neĝo por pasigi nokton en mia ĉambro, kuraĝante nudigi antaŭ mi, laŭte ekkriis kaj ŝajnis ofendita, kiam miavice mi malvestis min.«

»Harry, ŝi kriis volvante sin en la littukoj, estas hontinde! Se mi estus opiniinta vin kapabla tiel konduti, mi ne estus veninta.«

»Sinjoro, mi ja ne povas rakonti ĉiujn detalojn de tiu nokto. Tamen ili estus kuriozaj, sed mi ne kuraĝas... Kvankam ĝis lasta grado provinte peton, petegon, perforton, furiozon, rezonadon, promesojn, mi pasigis la nokton apud tiu aminda ulino sen io ajn ricevi de ŝi. Ĉirkaŭ la 4-a matene ŝi endormiĝis. Dormi mi ne povis, mi malamis ŝin kaj pensis pri rimedoj por pumi ŝin. Ĉu vi memoras, Sinjoro, pri tiu romano de Balzac, kiun li verkis por venĝi sin de koketulinio? Li tie prezentas ŝin stampita per brulruĝa fero de la viro, kiun ŝi spitnokis.«

»Jes ja, mi diris. Estas »La Duchesse de Langeais«...«



OBSERVO

(G. B.) LA ETA REGO. La eta reĝo unufoje ĉiusemajne vizitas min; en la dimanĉnumera desegnoaldono de la »New York American«. Ĉiusemajne ekscite kaj ĝoje mi atendas lian alvenon, kaj kiam li alvenis, mi tranĉas lin el la gazeto. Mi konfesas, ke mi kolektas la etan reĝon, kiel infanaĝe la poŝtmarkojn. Liajn aventurojn desegnis O. Soglow amerika grafikisto, kaj apud la Miĉjo-muso de Walt Disney, la eta reĝo estas la plej eminenta desegnita heroo de nia epoko. Estas certe, ke hodiaŭ li estas la plej populara reganto. Ke liajn agojn eternigas ne grandegaj, seriozaj freskoj, sed etaj, koloraj desegnaĵoj, tio nur parolas por li. Mi timas la heroojn de freskoj.

La aspekto de la eta reĝo ne estas impona. Almenaŭ per du kaplongoj li malsuperas ĉiun; li havas dikan, stumpan nazon, pintan kaj kurban katlipharojn kaj grandegan ventron. Li portas ermanan reĝmantelon, kaj beletan, simplan orkronon. Liaj soldatoj, ministroj kaj lakeoj estas grandegaj, kolorpompaj kaj eksterordinare solenaj. La eta reĝo sidas sur belega granda trono, kaj se li ascendas aŭton, li apenaŭ vidiĝas el la monumentale grandmezura kurentlinia veturilo. Generale lin ĉirkaŭas granda kaj pompo; kaj la fortbrustaj lakeoj, kies vizaĝon ornamas barbo similanta dentbronon, atendas liajn ordonojn el la alto kun severa kaj glacia vizaĝo.

»Nu, se la pasintan nokton mi estus havinta ruĝan feron, mi estus markinta Katherine iom super tiu bela mamu, kiun movetis ŝia kvieti spirado!«

»Vi iĝas romantika, Plugg.«

»Tia mi kutime ne estas. Sinjoro, eĉ la malon vi ĝenerale riproĉas al mi, sed ĉi-nokte... mi estis indigne nigrigita!... Je la sesa mi vekis Katherine, ĉar elirigi ŝin antaŭ la veno de la servistoj estis la sola savrimedo por eviti la punon de la dekanu. Dimanĉe matene la strato de Sandpoint estas malplena; mi esperis, ke ŝi eliros tra la fenestro ne vidate.

»Kiam mi skumovis ŝin, ŝi malfermis grandajn surprizitajn okulojn, poste memoris kaj tuj estis tre gaja. Mi komprenis, ke la tuta aventuro por ŝi estas nur komika okazaĵo kaj ĝin vante ŝi rakontas al ŝiaj amikinoj.«

»Vestu vin, mi diris kiel eble plej krude ŝetante al ŝi ŝian ĉemizon. Mi estas jam preta. Mi tuj iros al la garaĝo por havi la aŭtomobilon. Ne staru antaŭ la fenestro, sed atentu mian venon, kaj kiam vi vidos min, estu preta por malsupreniri. Mi helpos vin.«

»Dankon, Sir Harry, ŝi moke diris, vera kavaliro vi estas.«

»Post dek minutoj mi estis kun mia Ford sub la fenestro? Neĝis tre forte, kiel nun. Katherine malfermis.«

»Salto en miajn brakojn, ne timu!«

»Ĉu mi aspektas kiel timema virino?«

»Kiam ŝi estis en la aŭtomobilo, mi ekirigis ĝin, sed ne al Sandpoint-lan mi direktis! Ne, Sinjoro. Ĉar se tiel, Katherine ne estus punita, kaj mi pensis, ke ŝi meritas severan punon. Mi do trairis la tutan urbon, poste la riveron kaj direktis nin al la Longwood-arbaro.

»Harry, kien vi kondukas min?«

»Ĉar mi ne respondis, kaj ŝi havas senmezuran memfieron, ŝi ŝajnis bone amuziĝi.«

»Bona ideo! ŝi diris. Matena promenado, arbaro kuŝanta sub la neĝo... estas rave! Vi estas poeto, junulo!«

Soglow, la desegnisto, ĉiusemajne filmsimile raportas pri la aferoj de la eta reĝo. Iun semajnon li elveturas per kvarĉevala jungaĵo. Ĉe la vojorando infano ludas per turbo. La eta reĝo iĝas haltigi la ĉevalojn, descendas kaj demandas la infanon, kiel oni devas turnadi la turbon, poste li metas sur la pavimon sian ostfanan kronon kaj gaje ekturnas ĝin. Lia sekvataro mirege lin rigardas. Tio estas la tuto. Alie. La eta reĝo veturas al piedpilka konkurso, sed li jam ne ricevas lokon. Li sendas hejmen sian gvardiestron, ke tiu alportu la tronon, li lokigas ĝin ĉe la pordego kaj de tie li rigardas la konkurson. Alie. Li devas iri al ŝipar-revuado, oni metas sur lin admiralan uniformon kun ĉiuj ordenoj. Li elŝteligas tra la malantaŭa pordo de la palaco, iras en parkon kaj sur la lageto naĝigas velsipetojn inter infanoj. Kun ĉiuj ordenoj. Alie. Li rigardas soldatan paradon. En senfinaj vicoj salutante preterpaŝas lin ĉiusepacaj bataliloj. Timiga, edifa spektaklo. La eta reĝo ocedas, poste mansignas al sia adjutanto, kiu forrapidas kaj baldaŭ revenas kun tablo por kartludo. La eta reĝo sidiĝas kaj feliete ludas paciencon, dum la gvardianoj kun brustoj streĉitaj ŝenpaŝe pretermarŝas lin.

Dum iom da tempo, la eta reĝo havis financan embarason, sed li ne malsperigis. Li akiris ŝtupetron kaj gluis afiŝon sur la muron de la palaco: »Cambro luota«. Aliokaze li pentrigis sian portreton. La inaŭguron partoprenis la aristokrato de la lando: uniformoj, fraĵoj, festaj tualetoj. La reĝo donas signon, ĉiu klinas sin profunde kaj la portreto senvualigas. Poste la vizaĝoj konsterniĝas. La reĝo sur la bildo manĝas sardinon kaj super li kolosaj literoj anoncas: »Lia majesto ĉiam konsumas sar-

»Dum mi laŭiris la vojon en la arbaro, kio ne estis facila pro la neĝo, kiu kaŝis la talusojn kaj la fostaĵojn, mi krude kridiris, kion mi pensas pri ŝi. Ĉion dirinte, kaj konstatinte ke mi nun estas almenaŭ ses mejlojn for de Sandpoint, mi haltigis la aŭtomobilon, senvorte prenis en miajn brakojn Katherine, tiel surprizitan kaj timizitan, ke ŝi eĉ unu demandon ne faris, kaj portis ŝin sub la abiojn ĝis maldensaĵo pli blanka ol ŝia blanka mantelo. Mi milde metis ŝin teren, kaj sen paroli aŭ atenti pri ŝiaj krioj, mi kuris al la aŭtomobilo kaj forrapidis. Katherine kredible nun estas sur senhoma neĝa vojo, kun maldikaj ŝuetoj kaj baldaŭ robo, je almenaŭ duhora distanco de Sandpoint...«

*

»Jen, Sinjoro, kiam mi tiel agis, ĉio ŝajnis al mi tre justa. Sed dum la reirado mi demandis min, ĉu mi bone agis? Ho certe! mi ne multe kompatis tiun senkorulinon, kiu min ne kompatis. Certe, mi ankaŭ ne timas revenon. Si ja ne kuraĝos rakonti la aferon kaj ŝi prefere elpensos ian rabhistorion, ol nomi min, kiam ŝi ĉiam pentras tiom humile sklava antaŭ ŝi. Al la elektra seĝo ŝi irus prefere ol diri mian nomon... Sed, sed... mi imagas la malfeliculinon kun ŝiaj maldikaj ŝtrumpoj en la mola neĝo, mi demandas min, ĉu mi ne devas malgraŭ tio iri savpreni ŝin. Tial mi emiris vian domon por ricevi de vi konsilon. Kion vi pensas? Kion fari? Ĉu ŝi meditu sian koketecon, aŭ ĉu mi petu ŝian pardonon?... Sed jen la diabla afero: nun ŝia fiero estas batita, kio estas por ŝi granda bono, sed se mi cedos kaj savos ŝin, ŝi tuj sammomente reakiro sian triumfan aspekton: »Kompatinga Harry!« Jam mi imagas ŝian rideton... Mi ne scias, Sinjoro, mi faros, kion vi konsilas.«

*

»Tuj iru al ŝi, mi diris, ĉar neĝis pli ol iam ajnu. Sed mi ofte bedaŭris tiun mian konsilon.

El la franca: Roger Bernard.

dinon de X. Y.! Malmultekosta kaj nutra! Generale la eta reĝo havas senton por la reklamo. Foje surstrate li haltigas sian aŭton, kie li ekatentas pro granda tumulto. Makleristo vendas la kal-forigilon de Blotzky. La reganto aĉetas hotelon da ĝi kaj hejme ĝin elprovas. Ĝi ne utilas. Alitage, fronte de solena defilo kaj soldat-orkestro, li pretermarŝas la standon de la vendisto. Li portas grandegan standardon kun la jena surskribo: »La kalforigilo de Blotzky valoras neniojn!»

La interesajn reformojn ĉiam konsideras ĉi tiu regnestro. Ĉie li lernas ion. Dum vojaĝo en Hindio li vidis fakiron, kiu kuŝis sur najla tabulo. La reĝo post hejmenveno jetas la litojn el la dormoĉambro, li kuŝiĝas, kun krono kaj reĝa mantelo, sur najla tabulo kaj kun afabla movo invitas apud sin la miregantan reĝinon.

Grandparte tiel vivas la eta reĝo. Li amas malbone kondukti, li amas indignigi la dignoplenajn homojn. Nenian rilaton li havas kun la reĝeco. Tiam pli al la reĝo, kiom oni senigis de la trono kaj kiu ie malĝojas sub nia konscio: kun la infanago. Soglav, ĉiusemaine unu fojon, residiĝas sur la tronon nian ekzilitan infan-memon. La eta reĝo plej ofte protestas kontraŭ la severa kaj honorinda plenkreska mondo kaj feras pli-malpli grandajn skandalojn. Kiel evidentigaĵas, li ĉiam pravas. Oni devus vivi, kiel vivas li: facilanime, sincere kaj senhonore. Kiomfoje mi jam volis seki lin kaj fari ĉiokaze, kio ĝuste venas en mian memoron. Kiom bone estus kelkfoje, dum malfacilaj kaj seriozaj traktadoj kun via ĉiokaze kapti muŝon kaj bonvole transdoni ĝin al la alia koncernato. En tramoj multfoje mi deziris amike frapeti la vazon de sinjoroj kun okulvitroj, aŭ senatende interrompi ilian konversacion kaj per unu-du afablaj vortoj trankviligi ilin: »Kial vi tiom ekscitiĝas, baldaŭ ia trafos vin apopleksio!» Sinjorinojn, tre honorindajn laŭaspekte, mi volus demandi ŝercoje pri maldecaj aferoj. Dumlabore ofte mi volus iri promeni, kaj en solenaj kunvenoj fajfi laŭte. Sed, bedaŭrinde, eĉ pli simlajn petolojn mi ne kuragaŝ entrepreni. Eĉ mi ne kuragaŝ telefone voki politikiston, por ke mi diru mian opinion pri liaj spiritaĵ kapabloj. Mi ne kuragaŝ iri sur la straton kaj brue anonci, ke la kalforigilo de Blotzky estas malbona, ke ĉiuj produktaj de Blotzky estas malbonaj, ke la plej multaj homoj malsaniĝas, eĉ malsanmortas pro ili, ke liaj libroj estas senencaj kaj mensogaj, liaj konstruoj estas malsanigaj kaj multekostaj, liaj lernejoj estas malutilaj, kaj eble nur liaj gasreceptoj estas fidindaj. Blotzky bedaŭrinde dekulimigas la homojn pri la sincere. Ĝis nun mi ne atingis eĉ tion, ke en grandaj kaj elegantaj societoj mi deprenu miajn ŝuojn.

Facile estas al la eta reĝo, li povas fari tion. Unue, ĉar li estas reĝo, due, ĉar li estas nur desegnaĵo.

(G. L.) LA MURDANTA KINO. Ni rompas nian kapon, kion ĉi murdas, ĉu la kino murdas la teatron kaj dume ni ne rimarkas, ke ĉi iam murdis ion: la varieteon kaj la cirkon. Nome, ne tiel ni grupizu, starigante unu kontraŭ la alia, la teatrajn ludojn: teatro kaj kino, sed prefere, kiel ili disduiĝis ĉiutempe: la spektaklo kaj la dramatikoj.

Tiuj du specoj de teatraĵoj ĉiam kunharmoniiĝis, ĉar ili kontentigis malsamaĵn bezonon. Ekzemple neniam ni aŭdis, ke la hispanaj taŭrludoj malhelpus la evoluon de la hispana dramliteraturo, aŭ ke la feinfud-baletoj de Molière malutilus la komediojn de Molière.

La kreaĵ elementoj de la spektakloj ekde pratempoj estis la sango, la lerto, la erotiko, la amaso kaj la burleskado. Laŭepoke kaj laŭlande jen tiu, jen alia elemento havis pli gravan rolon en ili, kaj laŭ teoria ekzameno la hodiaŭaj revuoj estas la idoj de la gladiatoraj ludoj, ĉar la revuo tiel similas la luktojn kontraŭ sovaĝaj bestoj, kiel la hodiaŭa franca lingvo similas la latinan, el kiu ĝi transformiĝis.

Kontraŭe la dramatikoj (mi elektas ĉi tiun vorton por la komplekso de la tragikoj kaj komikoj) klopodas

klarigi la grandajn homajn demandojn, kiuj volas timigi aŭ gajigi la kosmon kaj la socion.

Ekzistas ja »artspecoj«, en kiuj la dramatikoj kaj spektakloj intermiksiĝis. Tiaj estis la mezepokaj teatraĵoj, kaj parte tiaj estas multaj hodiaŭaj filmoj, kiel ekzemple la »Kruca Milito« de Cecil B. de Mille, en kiu la amo kaj la kredo (dramatikoj) sovaĝe intermiksiĝas kun sango, lerto, erotiko, burleskado kaj amas-sceno (spektaklo).

Al la spektakloj apartenas ankaŭ la pratempa kaj hodiaŭa cirko, la »varié«o, taŭrludo, kokbatalo kaj granda piedpilka konkurso, kiu estas sporto nur por la ludantoj; por la rigardantoj ĝi estas nura spektaklo.

La demonstraĵo loko de la dramatikoj estas la teatro; pli ĝustedire, la sceno: la universala kvadrato prenitaj el kaj lokitaj super la vivo.

La rigardanto por anbaŭspeca teatraĵo akceptas la vidpunkton de ekscito, sed dum la spektaklon akompanas tera (aŭ anima) ekscito, la dramatikoj eligas el ni transcendan (aŭ animan) eksciton.

Pro tio, neniam aren-ludo povis malutili al la evoluo de la greka tragedio.

Kaj nun, iun belan tagon, aperis la kino, kiu eĉ hodiaŭ estas nur infana kaj infanludo. Samtiel ĝi ne trovis memstaran formon konvenan por si, kiel la aŭto, kvankam ĝi lasta ŝanĝis la malnovan kalesformon al la nova kurentlinia formo.

Komence la kino solvis nurajn fotograf-taskojn: ĝi fotografis homajn, nunajn aŭ historiajn okazojn (ekz: la morton de princo Guise, historia rekonstruo kun Le Bargy, antaŭ pli ol dudek jaroj, aŭ afrikan leontason per negrolancoj), naturpriskribon (la »Vivo de mimozo«) aŭ teatraĵn (ekzemple Cines: Bataille »Femme nue«).

Poste venis la eposoj (ekzemple Arden Enoch), grandaj romanoj (Mizeruloj) kaj dume memstarajn vojojn klopodas fari por ŝi la filmo, kiu dum la epoko de muta filmo vere atingis kulminon, kie ĝi efektive estis la senlima reganto de spektaklo kaj dramatikoj.

Tiam la teatraĵ homoj komencis timi, ke la kino murdos la teatron. Kaj ĉu ĝi murdis? Jes kaj ne.

La laŭta filmo signifas regreson en tio, ke donante rolon al la homa voĉo, ĝi ion reŝovis la antaŭan senlimitecon al la homaj fenomenoj kaj tiel ĝi denove komencis imiti la teatron. Sed ĉi tie estas gravaj malfaciloj. Nome, la teatro estas rigore nacia fenomeno, dum la spektaklo estas internacia. Ibsen ne plaĉas al la francoj, Shakespeare hodiaŭ estas plie »hungara teatra verkisto«, ol anela, la hispana dramo neniam povis enradikiĝi en Orient-Eŭropo, ktp.

La laŭta filmo kvazaŭ denove komencis la tutan filmevoluon kaj ankoraŭ ĝi tute ne estas en tiu stadio, kiu atingis la muta filmo.

Kun la teatro ĝi ne povas konkurenci, ĉar *dramm* motiven ne eblas fotografi. Vane ja estas bonega kiel dramproduktulo la filmo »Raskolnikov« de Harry Bour kaj Pierre Blanchar, la alternaĵ bildoj de la eksteraj okazaĵoj kaj la interna evoluo ne klarigas, sed malhelpas la evoluon de la tragikoj, se ne paroli pri tio, ke la rusa aĉero de la romano fariĝas tute franca.

Kiom alia estas la Reinhardt-filmo, la »Songo de Somermeza Nokto« rajte estiganta tiom da entuziasmo kaj sukceso. Tiu ĉi filmo volas elĉerpi ĉiun rimedon de dramatikoj kaj spektakloj, kaj ĝi staras pli proksime al la »ideala laŭtfilmo«, ol la plej multaj hodiaŭaj filmoj: ĝia eraro estas ĝia virto, t. e. la volo anstataŭi la teatron. Tion la filmo ja ne povas laŭ sia naturo, ĉar ĝia esenco kaj nasko ligas ĝin al la spektakloj, kie pli grava estas la *regisoro*, ol la ludanta aktoro aŭ fakulo.

Pro tio oni vidas, ke la filmo tie estas la plej sukcesa en la spektaklo, kie la reĝisoro estas la senlima sinjoro super la rimedoj de la filmo kaj ne ligas lin historio, psikologia verŝajno kaj la tuta arsenalo de la dramatikoj. Ni pensu nur pri la »Continental« de Ginger Rogers kaj Fred Astaire, kiu valoras tiom, kiom cirkludo, dum la timigaj infanaĵoj de aliaj amerikaj operetoj kaj dramoj nin lasas seninteresaj.

Kaj, ekzemple, tial ne povis la amerika filmo murdi

la eŭropi teatron, ĉar Eŭropo, ĉi tiu kunigita, komplika, multflanka, saĝa kaj malsaĝeta, pia kaj ĉnika, majuna kontinento, neniam transiros sur la infanan, simplistan nivelon de la amas-Ameriko. Kaj kio en la ĵus menciita Reinhardt-filmo estis gena, ties kaŭzo estis, ke la anglan komplikajon volis esprimi amerika simpla (jen ekzemple la malsaĝa cirk-humoro de la ama paro), sed ankaŭ tio estas vera, ke la demona Puck (pro la bonvolo de Reinhardt) estis pli angla, ol Shakespeare mem.

Sed la kino murdis la cirkon (tion kunhelpis iomete ankaŭ la aŭto anstataŭante la ĉevalon) kaj la varieteon. Ĉu vere? Bonvolu ĉirkaŭrigardi. Kie malaperis la famaj nomoj, kiel Ronacher, Renz, Wulff? Arlekeno hodiaŭ nur tiam altiĝas la atenton, se li estas tiel eksterordinara talento, kiel Grock aŭ la Rivels-oj; kaj la plej granda arlekeno de la mondo hodiaŭ estas filmstel: Chaplin. Ĉu cirka baletisto aŭ paradmaŝo povas konkurenci kun la briloj de Hollywood? Ĉu ĉeval-spektakloj? Dum kvindek jaroj oni ne vidis en cirko tiom da aŭdacaj kaj belaj ĉeval-prezentatoj, kiom en ununura bovkaba filmo.

Ni ne timu pri la teatro pro la kino. — sed ni timu pri la kino pro ŝi mem, ĉar se ĝi forlasas la imiton de la teatro, kaj klopodas fariĝi la sola kulturanto de la »spektaklo« en la plena senco de la vorto — *sur novaj kaj memstaraj vojoj*, volante anstataŭi ne aparte la cirkon kaj aparta la varieton, sed ilin ambaŭ kune en komuna nova artoformo — ĝi povas fariĝi tio, kio estis la universala romia »circenses«. Poste oni devas zorgi nur pri »panem«, ĉar eterna estas la klasika krio de la amasoj: *Panem et circenses!*

EINO LEINO (elp.: Lejno), finna poeto, nask. 1878, mort. 1926.

Li komencis la versfaradon kiel gimnaziano, kaj kiel juna studento li jam estis ŝatata poeto, vera princo de l' poezio. Deveninta el regiono, kie la popola dialekto estas abunde riĉa kaj fleksebla, Leino faris facile fluantajn, forme agrablajn, de esprimoj riĉajn versojn. Li majstre regis la poezion »teknike«, li lerte ludis per rimoj kaj asonancoj. Tiu lerteco iam kaj tiam forlogis lin al ludajoj malindaj al lia talento. Tial oni trovas en liaj poemkolektoj inter veraj juveloj ankaŭ malpli valorajn vitropceetojn. Ĉiokaze li estis kaj daŭre estas rekonata kiel la plej talenta finna vortaristo. Multaj el liaj poemoj fariĝis kvazaŭ populokantoj kaj multaj el liaj parolturnoj estas uzataj kiel proverboj.

Li komencis kiel memstara, laŭkutima amkantisto. Iom post iom li tamen atingis altan nivelon de forte persona, individue travivita poezio. Lia esprimmaniero fariĝis elektra frapa, lia fantazio pli kuraga. Tute speciala trajto de Leino estas lia nacie finna sed samtempe tre »homarana« vivkoncepto, kiu atestas pri vastanima kulturpersono.

Kvankam la lirikaĵoj posedas plej gravan lokon en lia verkaro, li estis tre produktiva plumisto ankaŭ sur aliaj kampoj de la literaturo. La kolektita verkaro de Leino ampleksas 16 dikajn volumojn, konsistantajn el versajoj, dramoj, romanoj, literaturhistoriaj studoj, eseoj ktp. Krome li estis aktiva ĵurnalisto kaj majstre lerta tradukisto (i. a. li enfinigis Divina Commedia de Dante). Do, lia vivo estis tre fekunda — sed ankaŭ konsumata; des pli multe, ĉar Leino malspare eluzis siajn fortojn, kaj spiritaĵoj kaj fizikajn. Kiam la morto estingis lian vivon, la fajro jam estis preskaŭ forbrulinta.

En nia hodiaŭa numero ni prezentas kelkajn specimenojn el la poezio de Eino Leino.

L. I. L.

GOSTA BERLING SUR LA SCENEJO.

La famaj kaj pitoreskaj tipoj eternigitaj de Selma Lagerlöf en »Gösta Berling« estas revivigitaj sur la scenejo. Jen, varianta de la fama romano, farita de la verkistino mem, havis sian unuan prezenton en Reĝa Drama Teatro en Stokholmo kaj estis salutata kiel la ĉefa drama koazo de la sezono.

Dro Selma Lagerlöf deklaris, ke la multaj provoj dramigi ŝian verkon estis bonaj sed havis malfortajn punktojn, kiuj laŭ ŝia opinio dependas de tio, ke oni ne trovis taŭgan finon por la varianto.

Si trovis la dialogojn tiel konvenaj por la teatro, ke ŝi opiniis nur malmultajn ŝanĝojn necesaj. Por la fina akto ŝi elektis la morton de la majoredzino en la rondo de Gösta Berling kaj liaj kamaradoj, la kavaliroj de Ekeby.

La prezentado estis brila, kaj la kolorplenaj scenarango kaj kostumoj donis perfektan iluzion pri grandbiena vivo en Vermlando antaŭ cent jaroj.

La verkistino ĉeestis la prezentadon, kiu kulminis per entuziasma kaj kortuŝa tributo al la amata »grande dame« de la sveda literaturo. Post la prezentado ŝi aperis sur la scenejo, ĉirkaŭata de la famaj figuroj kreitaj de ŝia magia plumo kaj akceptis la ovaciojn de la publiko. (*Sveda — Internacia Gazet servo*).

INTERESA SVEDA LITERATURA KONKURSO.

Konata sveda eldonejo, »Natur och Kultur«, faris interesan literaturan konkurson por romanoj temantaj pri profesiaj vivo kaj laboro. La sveda literaturo havas relative malmultajn librojn de tiu speco, sed tiu konkurso rezultigis tri bonegajn librojn, elektitajn inter naŭdeksep manuskriptoj senditaj al la ĵugantaro. El la tri gajnintoj du estas viroj, Josef Kjellgren kaj Hugo Swensson, kaj unu virino, Stina Aronsson.

La libro de Josef Kjellgren, »Pri ponto«, temas pri la konstruo de la lasta kaj plej granda ponto de Stokholmo, Västerbron, ĵus finita, kaj pri ĝiaj laboristoj. Li kapte priskribas la diversajn tipojn de laboristoj, iliajn vivojn, ĉagrenojn kaj gojojn. La viva rakonto kun sia riĉo de interesaj detaloj formas specon de epopeo de la moderna laboristo kaj ricevis altan laŭdon de la kritiko.

La libro de Hugo Swensson, »Paul Hoffman, instruisto«, temas pri la profesia vivo de instruisto en ŝtata gimnazio, de la komenco de lia kariero ĝis lia pensia aĝo. Estas bonega verko, artista kaj plena de vivo kaj koloro. Estas la unua libro de sia speco en la sveda literaturo, kaj ĝi donas detalan priskribon de lerneja laboro kaj de la problemoj de edukisto. Ankaŭ tiun libron la gazetaro tre varme akceptis kiel valoran aldonon al la sveda literaturo.

La libro de Stina Aronsson, »La medalo pri Jenny«, priskribas la vivon de forte laboranta fraŭlino. Kvankam eble ne tute sur la nivelo de la libroj de la du aliaj gajnintoj, ĝi estas verkita per multe da talento kaj entenas profundan psikologian studon pri la menso de metiistino. Stina Aronsson estas laŭdata por sia rava kaj riĉa stilo, kiu donas plian ĉarmon al ŝia verko. (*Sveda Int Gazet servo*.)

LA NOVA SOCIETO DE BELAJ ARTOJ

en Budapeŝto dum la ĵus pasintaj semajnoj aranĝis sian ĉijanaran printempan ekspozicion. La artistoj, apartenantaj al la Societo esprimas apud sia hungara karaktero plenan ligitecon al la okcidenta, pariza kulturo kaj en ĝi ni trovas la plej bonajn talentojn de la juna aŭ mezaĝa generacio de belartistoj. La printempa ekspozicio estis surprizo el la vidpunkto de ilia evoluo. Plejparte ilia temo estas la vivo de laboristoj, kamparanoj, kion ili prezentas per esprima forto vere majstra. La bildoj, prezentataj en nia numero bedaŭrinde nur pale povas redoni ilian valoron, kiu ĉefe troviĝas en la kolorefekto kaj temelekto.

Por etkvanta monsumeto
Pleniganta librobreto!
A E L A !

Traduko-konkurso

Ni sentas ĝis nun tre grandan mankon de seriozaj, unuarangaj gramofondiskoj en nia literaturo.

Tiun mankon deziras nun forigi la entrepreno, fondita de orhestrmajstro Tord Benner el Stockholm. Tiu entrepreno farigos ankoraŭ en la komenco de la somero dudek diskojn, kiujn kantas la plej eminentaj kantartistoj de la mondo. Tiuj eminentaj kantistoj bezonas same eminentajn tekstojn kaj tion deziras akceli *Literatura Mondo*, anoncante la suban konkurson por artraduko de kvar kantoj kaj novverko de unu kanto. Tiun konkurson rajtas partopreni ĉiu, kiu sentas en si talenton. Ni esperas kaj kredas, ke la seriozeco de la konkurso kaj la entute

130.— svisajn frankojn valorantaj premioj helpas malkovri novajn talentojn aŭ instigos al pli intensa laboro la malnovajn. Tion ni esperas des pli, ke laŭ promeso de s-ro Tord Benner la traduklaboro de la plujaj diskoj, fabrikotaj, estos disdonata inter la premiitoj (eble jam ĉi-aŭtune) kaj ĉi tiuj tradukoj estos honorariataj per tre honestaj sumoj. Ni menciuj ankoraŭ, ke por povi ĵugi pri la tekstfideleco de la tradukoj, ni petis por helpo kelkajn akademianojn kaj por ke ĉiu, nur iel kalkulebla tradukanto povu labori, ni elektis ĵuĝistaron, konsistantan el esperantistaj verkistoj, niam ion tradukintaj.

(Daŭr. sur pg. 63.)

Unua traduko: N. Hervé: »Mam'zelle

Nitouche». Acte II. No. 11. Couplet.

La publikigo okazas per la speciala permeso de Mr. Heugel, (Abis, rue Vivienne, Paris) la posedanto de reproduktaj rajtoj.

Ando con moto

A mi-nuit après la Fê-te - Re-venaient Ba-bet et Ca-det. Ois-ti-ty mar-chaient à l'aveuglet-te; - Ca-det trembla-tre hâ-tait Son-dain Le vo-leur, comme un bi-let-te, - Vous fai-sait tourner Ca-det, L'au-tre Tous ses yeux hors de la têt-te, - Il re-vent chez lui Ca-det. Tou-te la nuit est com-pli-te, - Faut nous dé-pê-cher - Ba-bet - Tâch'en pro-fi-ter, gross on leur aie, pr-rê-te! - La bourse ou la vie!" - C'è-tait - Deux bous vo-leurs en go-ro-leur plus hon-rête, - Te-nait Ba-bet, le - ser-rait - Chif-fon-nait sa col-le-pen-sive et ma-ette, - Ba-bet lu-te-ment - L'ui-vrait-ell' ou-ni-rait la pau-let - - - - - te! - Fa-ri-lon Fari-la - Fa-ri-quet - - - - - te. - Fa-ri-lon Fari-la - Fa-ri-ret - - - - - te. - Fa-ri-lon Fari-la - Fa-ri-ret - - - - - te. - Fa-ri-lon Fari-la - ta-ri-let - - - - - te! - J'ai trop peur, disait Ca-det. J'ai pas peur, Di-sait Ba-bet - - - - - te! - Un vo-leur saisit Ca-det, Un vo-leur saisit Ba-let - - - - - te! - Je me moust' disait Ca-det, Je me meus' disait Ba-let - - - - - te! - Je n'y a'viendrais plus Ba-bet!" Hoi, j'y re-viendrai, Ca-bet. - La-ri-ret-te La-ri-ré! La-ri-ret - te La-ri-ré! - bet! - La-ri-ret-te La-ri-ré! La-ri-ret - te La-ri-ré! - bet! - La-ri-ret-te La-ri-ré! La-ri-ret - te La-ri-ré! - det! - La-ri-ret-te La-ri-ré! La-ri-ret - te La-ri-ré! -

Larghetto

17 I know that my Re-deem-er liveth, 3 and that He shall stand at the lat - ter
 day — up - on the earth; 3 I know that my Re-deem-er liveth, and that He shall stand
 — at the lat - ter day upon the earth, — upon the earth. I know — that my Re-deem-er liveth, and that
 He shall stand at the lat - ter day upon the earth, — upon the earth. 8
 And tho' worms de-stroy this bo-dy, 2 yet in my flesh shall I see God, yet in my flesh shall I see
 God. 3 I know that my Re-deem-er liveth: and tho' worms de-stroy this body, yet in my
 flesh shall I see God, yet in my flesh — shall I see God, shall I see God. I know that my Re-deem-er
 liveth. 3 For now is Christ ris-en from the dead, 1 The first fruits of them that sleep, — of
 them that sleep, the first — fruits of them that sleep, 3 For now is Christ ris-en, for now is Christ
 ris-en from the dead, 1 the first fruits of them that sleep. 11

Dua traduko.

(Joh. XVI, 25, 26; Cor. XV, 20.)

Third part N:o 43. Air

G. F. Händel: »Messiah»

Kvara traduko:

Min tankes tanke ene Du er vorden.
 Du er mitt hjertes første kjaerlighed!
 Jeg elsker Dig som ingen her paa jorden.
 Jeg elsker Dig, jeg elsker Dig,
 Jeg elsker Dig i tid og evighed,
 Jeg elsker Dig i tid og evighed!

Tria traduko.

Richard Wagner:

»Tannhäuser

Lied an den

Abendstern

Wie To-der-ai-nung Jähm-rung die Lande, umhüllt das Tal mit sanftem Sc-
 wan-de; der See-le, die nach jenem Höhn verlangt, vor ihrem Flug durch Nachts-Strassen bangt!
 3 Da schimmert du, o Lieblichster der Sterne, dein sanftes Licht entzündet du der Ferne, die nühle
 Jähm-rung heit sein Lieber Strahl, und freundlich zeigt du den Weg aus dem Tal. 1 4
 O du mein hol - der A - bendstern, wohlgrüßlich, im-mer dich so gern; vom Herzen, das sie
 nie - ver-riet, grü-ße sie, wenn sie vor-bei - dir ziehet, wenn sie entschwebt dem Tal der Erden, die
 sel - ger En - gel dort zu werden, wenn sie entschwebt dem Tal der Erden, ein sel - ger En - gel -
 dort - zu wer - den! 17

La tradukotaj tekstoj estas la tri, kies muziknotojn ni kune publikigas kaj la kvara, kanto de Grieg, kies teksto estas sur la 63-a paĝo. Ankaŭ ĝian muziknoton ni volonte sendas senpage al ĉiu petanto.

La originalan tekston oni devas verki por la mondfame konata valso de Johann Strauss: La blua Danubo, kies muziknoton pro ĝia longeco ni ne povas publikigi. Ĝin oni povas havi tre mal-kare en ĉiuj muzikvendejoj. La versoj devas esti farataj por la tuta muziko.

Kaj nun jen, la

KONDICIOJ DE LA KONKURSO:

1. La traduko de ĉiu unuopa kanto estas aparta tasko. Ĉiu partoprenanto rajtas konkursi per ĉiuj tradukoj kaj per la verko de nova teksto, sed ankaŭ per unu sola tra-15-a de majo.

2. Al ĉiu konkurso estas aldonata letero pseŭdonima, per kio ankaŭ la konkursaj tekstoj devas esti provizataj. En tiu letero devas esti enfermata la nomo kaj preciza adreso de la konkursinto. Konkursojn, el kiuj la juĝistaro povas eksciĝi la nomon de la konkursanto, oni flankenmetas.

3. Limtempo de la ensendo de konkursoj estas la 1-a de majo.

4. Por gajni la konkurson, oni devas nepre atenti, ke

a) La tradukita teksto devas resti fidela al la originalo, la originala kanto harmonianta kun la muziko;

b) La tradukoj devas esti unuarangaj el vidpunkto de la Esperanto-poezio kaj facile kompreneblaj eĉ por neperfektaj esperantistoj. Avantaĝo estas, se la traduko estas pli malpli komprenebla je unua aŭdo ankaŭ al tiuj, kiuj ankoraŭ ne lernis Esperanton.

c) Kun granda zorgo oni devas atenti la kanteblecon de la teksto, la fidelecon de la ritmo al tiu de la originalo kaj muziko, la lokigon de la vokaloj kaj konsonantoj ktp.

5. La konkursverkojn unue oni komparas kun la laŭvorta traduko de la tekstoj, due prijuĝos ilin juĝistaro, konsistanta el Hendrik Adamson, Julio Baghy, Vilhelmo Bleier, Raymond Schwartz kaj E. Stillmann. La membroj de la juĝistaro ne rajtas konkursi. La verkojn, por premio rekomenditajn de la juĝistaro fine prijuĝos sinjoro Tord Benner el la vidpunkto de muzikeco kaj kantebleco. Li mem decidis pri la disdono de la premioj kaj pri tio, kiuj tradukoj estos aplikataj sur la diskoj.

6. La premioj estos disdonataj nur, se la juĝistaro trovas la tradukojn aŭ la originalan kanton indaj por ili.

7. La premioj de la konkurso estas la jenaj:

5 unuaj premioj po 10.— svisaj frankoj en kontanto;

5 duaj premioj po 10.— svisaj frankoj en libere elekteblaj libroj eldonitaj de Literatura Mondo;

5 triaj premioj po 6.— svisaj frankoj en libere elekteblaj libroj eldonitaj de Literatura Mondo.

8. Ĉiuj rajtoj pri la premiintaj konkursverkoj apartenas al s-ro Tord Benner sen pago de aparta honorario.

9. La rezulto de la konkurso estos anoncata en la aŭgusta numero de Literatura Mondo.

Jubileo

Maloftan jubileon festas nia kolego *Jakobo Sapir* en Bjalystok. Li en aprilo nunjara fariĝas 25 jara esperantisto. Inter liaj multaj funkcioj ni trovas la ĉefdelegitecon de UEA por Polujo, multe li kunlaboris al diversaj gazetoj kaj precipe la esperantistaro en Bjalystok dankas al lia energia agado tre multe. Ni deziras al li kaj al ni pluajn 25 jarojn en sano kaj aktiveco.

La jubilea festo okazos la 9-an de majo. Gratuletoj estas sendeblaj al: Esperanto, Bjalystok, Sienkiewiczza 35, Polujo.

Multajn el niaj artikoloj

verkis kolego dr. Szilágyi, kiu plene resaniĝinte el grava malsano, nun dediĉas multan tempon al nia gazeto. El lia plumo ankaŭ estonte aperos en ĉiu numero sur kelkaj paĝoj tiutipaj interesaj kaj variaj artikoloj kaj ni esperas, ke tio trovas la plaĉon de niaj legantoj. Al niaj gazetokolegoj ni speciale atentigu, ke ĉiu kopiorajto de tiuj artikoloj ĉu en Esperanto, ĉu nacilingve, apartenas al la verkinto mem.

Nekrologo

Kun funebra koro ni informas niajn legantojn pri la morto de unu el la plej ĉarmaj esperantistoj, s-ano *Mihaelo Arabeno* el Genova. Li estis konata inter ni, kiel »Oklo Miĉjo« kaj laboris tre multe por la movado. Li estis oferema, helpema, ĉiam ridema. Per lia laboro eldoniĝis la verko de Mazzini: »Devoj de l' Homo«, multe li laboris por nia revuo kaj kunlaboris al la eldonpreta Itala Antologio. Ni kunsente kondolencas al la familio kaj al la esperantistaro en Genova.

Kun funebra koro ni devas informi niajn legantojn ankaŭ pri la morto de s-ano *Honor. Bonnevie* la nestoro de la norvegaj esperantistoj, ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio, helpanto de ĉiu bona afero, longjara abonanto de nia revuo. Li estis ĉie, kie oni povis ion fari por la movado, por ĝia literaturo. Li estis inter la plej fruaj esperantistoj en Norvegujo kaj mortis 78 jara en marto. Plej sincerajn kondolencojn al la norvega esperantistaro kaj al la familio sendas la redakcio de Literatura Mondo.

Kurevortenigmo

aperinta en la januara numero enhavis kelkajn preserojn kaj ankaŭ cetera ĝi estis iom malfacila. Tial ni ricevis nur tre malmultajn solvojn. Ni bedaŭras tion kaj samtempe publikigas jene la nomojn de la gajnintoj:

Teodor Kilian Ĉeĥoslovakio
J. Pascha Nederlando
F. Christaller Germanujo
P. Brunet Francujo
J. Csapó Rumanujo
M. Džün Nanking

La premioj al ili estas jam senditaj.

Niaj subtenantoj

denove kreskis en la pasintaj monatoj kaj ni danke salutas inter ili

S-aninon Seckel el Almelo
S-anojn K. Bruklis el Alŝvanga
Chr. Kromziĉk el Rotterdam
Kennedy el Glasgow
Freitas el Porto
E. C. Stillmann el Bruxelles
kaj Esperanto-Grupo St. Gallen

Ni esperu, ke en la proksimaj monatoj ni povos ankoraŭ saluti inter ili la mankantajn dektri.

AELA-anoj, atentu! Ni ekspedas en la tempo inter 8-a — 15-a aprilo la verkon: »Romano de San Michele«, kiu estas la tria volumo de la serio C. Nericevintoj bonvolu reklamaci.

Kelkajn tagojn poste sekvos plua volumo.

Juna hungaro deziras serioze korespondi kun fraŭlinoj ĉulandaj pri lingvoj, literaturo kaj ĉiaj interesaj. Adreso: Gabrielo Szöllösy, *Vesés* Roder Imre u. 26. Hungarlando.

LA ĴURO DE PIULO

— de L. N. Newell —

La egipta vilaĝo staris sur altajeto tiom malalta, ke oni apenaŭ rimarkis ĝin; tamen sufiĉe alta por protekti la domojn kontraŭ la inundoj de Nilo. La kotajn domojn kaj kolombo-turojn originis la preskaŭ horizontaltaj radioj de la suno. Revidiĝis la koloroj, kiujn paligis la tagmeza suno: precipe la smeralda verdo de la kampoj kaj palmoj, kaj la oro de la mezdistancaj sablodunoj; ĉe la horizonto, la montetoj surmetis delikatajn purpurojn, malvojn, brunojn.

Abdallah Abd er-Rihim, sidante kaŝe en la sukerkanoj, ne rimarkis la belecon de la vespero; li fiksis anstataŭe siajn okulojn sur la vilaĝo por vidi, ĉu iu venas en lia direkto. Certiĝinte, ke de tie li ne estas observata, li turnis sian rigardon al la bordoj de la kanalo, kelkcent metrojn for, samtempe karesante la tubon de sia fusilo senscie. Sur la vojetoj laŭlonge de la kanalo, paŝis pezaj bubaloj kun kriemaj knabinetoj sur siaj ĝiboj, kaj sekretebaj azenoj rajdataj de nigre vestitaj virinoj. Aliaj virinoj trempis vazojn en la akvon; poste ili metis la pezegajn vazojn sur la kapon, kaj kun tiu majesta, ebena paŝo, kiu estas la plej gracia marŝmaniero en la mondo, kun rektaj dorsoj kaj elstarantaj mamoj, iris al la vilaĝo por prepari la vesperan manĝon.

Ankaŭ de tiu flanko, nenia danĝero; ĉiu pensas nur pri reiro al la vespera preĝo kaj la familia manĝo. Abdallah tiam turnis sian rigardon al la vojo, apud kiu li atendis, kaj kiu kondukas al la kampoj de Abd el-Aziz Mahmud, la plej riĉa terposedanto de la vilaĝo. Li tamen ne atendis Abd el-Aziz, kiu en sia aĝo jam ne iras al la kampoj por labori, sed ties plej aĝan filon, Husejn Abd el-Aziz. Post dudek minutoj ĉiu fidela mahometano devos nepre genui por diri la vesperan preĝon, kaj Husejn kutimas tion fari hejme, anstataŭ sur la kampo kun siaj laboristoj.

Abdallah atendis sen ia malpacienco; ĉi tiun momenton li atendis jam de kvar monatoj, jam de la tago, kiam oni metis lin en la malliberejon. Oni akuzis, ke li seksatencis la dek-dujaran filinon de Abd el-Aziz en kotonkampo; kiam homoj alkuris responde al la krioj de la knabino, Abdallah forkuris, kaj poste en la policejo juris, ke li estis en sia propra kampo dum la tuta mateno. Sed frato de la knabino estis vidinta lin kaŝkuri el la kotonkampo, kaj Abdallah ne povis trovi sufiĉajn atestantojn por juri, ke li ja ne povis tie troviĝi. La juĝisto kondamnis lin je trimonata mallibero, kun punlaboro. Ĉiutage en sia karcerio, ĉiutage kiam li ŝvitegis sur la vojo, kiun li riparigis, Abdallah juris, ke li venĝos sin, kaj nun la momento estis veninta.

Li aŭskultis: li aŭdis malproksimajn kriojn de knabinoj, foran blakadon de azeno, sed ne la frapadon de azenhufoj sur la apuda vojetoj. Li komencis timi, ke ĉi tiun tagon Husejn ne venos, aŭ escepte estas irinta hejmen pli frue. «Ho Dio,» diris en si Abdallah, «ke li venu hodiaŭ, ke mi ne maltrafu; mi promesas marŝi preĝante, proksiman vendredon, trifoje ĉirkaŭ la tomo de ŝeĥo Suliman, krom fari la vendredajn preĝojn en la moskeo.» Li reekzamenis sian fusilon; ĉiu pura kaj en ordo, kun kartoĉo en la tubo.

Subite li ekĝojis; ŝajne Dio aŭdis lian preĝon. Sonis huffrapetoj sur la vojetoj, kaj baldaŭ aperis Husejn, pense rajdanta, kaj portanta ankoraŭ sian sunombrelon super sia turbano. Li tenis en la mano sian

rozaron, sendese murmurante «Allah, Allah, Allah,» ĉe ĉiu globeto.

Abdallah kaŝis pli malalte en la kanoj, levis sian fusilon, kaj kun ankoraŭ unu preĝo al Dio, ke li ne maltrafu, tiris la ĉanon. La figuro sur la azeno etendis la brakojn, kvazaŭ bene, falis antaŭen sur la kolon de la azeno, kaj senbrue glitis teren, kie ĝi kuŝiĝis, senforma amaso. La azeno trankvile deiris la vojeton, kaj komencis manĝeti la herbojn en la apuda kampo.

Momente Abdallah atente rigardis la figuron sur la tero; ĉu ĝi moviĝas? Ne; ĉio bona; Dio ja aŭdis lian preĝon. Li aŭskultis: nenia bruo; ĉe la akronaj knabinetoj estas jam hejme en la vilaĝo, de kiu levigas spiraletoj el blua fumo. Kun longaj paŝoj, kurba dorso, Abdallah ŝtele kuris tra la kampoj al la vilaĝo, ĉiam ŝirmante sin malantaŭ la altaj kreskaĵoj. Li eniris la vilaĝon ne per la vojo, sed tra fendo inter sia domo kaj la najbara, kaj silente, fantome glitis tra la pordo en la mallumon de la ununura ĉambreto. En unu angulo estis hela trueto en la obskuro, kie virino kaŝis super sterka fajro kaj odoranta potoj. Si sentis lian ĉeeston kaj sin turnis.

«Kie vi estis, O Abdallah?» ŝi diris. «Estas jam la preĝo.»

Efektive de la vilaĝa minareto sonis la paca voĉo de la muezino, vokanta ĉiun mahometanon al la preĝo. Kun grunto Abdallah piede silentigis la virinon, kaj levis la akvovazon por lavi la kapon, manojn kaj piedojn, laŭ la preĝorito. Poste li sternis pajlomaton sur la tero, kaj komencis sian vesperan preĝon, starante, genuante, per frunto tuŝante la teron, kaj murmurante rapide sed senare la eternajn vortojn. Dum li preĝis, ĉia ekscito, ĉia zorgo malaperis el lia vizaĝo; li estis nur sekvanto de Muharrad, parolanta kun sia Dio; kaj sur lian animon pezis nenia ĝeno.

Fininte la preĝon, li silenteme manĝis, kaj poste trankvile kuŝiĝis apud la virino sur la tero, ambaŭ volvitaj en lantukoj. Kaj dormis, kiel decas al justulo, kiu plenumis ĉiun sian devon.

Kiat li estu maltrankvila? Venĝo pro ofendo aŭ insulto estas la leĝeca moro de la felaho; la sento pri honoro estas tre delikata kaj flamiĝema, kaj tiu, kiu ne kuraĝas ataki siajn malamikojn, baldaŭ nomiĝas virino — la plej ofenda el ĉiuj insultoj. Mortigo, remortigo, familia vendetto, kiu daŭras ofte tri-kvar generaciojn, ĉio ĉi estas tute natura afero; kaj la felaho ne komprenas, kial la Egipta Registaro tiel severe punas la venĝintojn: kvankam li filozofe elportas la punon, kiam ĝi lin trafas.

Abdallah do dormis pace; tiom pli tial, ke li kredis sin nesuspektembla: lin vidis ja neniu, kaj kiu povos pruvi, ke li ne pasigis la tutan posttagmezon en sia kampo ĝis la vespera preĝo?

Tamen, lian dormon oni ne lasis longe trankvila. Post du horoj fusil-tenilo frakase malfermis la pordon de lia domo, kaj enpaŝis du *ghaffir*, policaĵo nokto-gardistoj. La edzino hurlis timege, Abdallah levigis salte kun blasfemo, kaj palpebrumis ko'ere en la lumo de lanterno.

«Bone, jen vi estas, O Abdallah,» diris unu el la gardistoj. «Vi venos kun ni ĉi nokte,» kaj li etendis la manon por kapti la ŝultron de Abdallah.

«Kion vi volas?» respondis Abdallah, forpuŝante la manon de la gardisto kun malestima gesto. «Vi ne havas aferon kun mi.»

El la „Granda Testamento“ de Villon

— G. Waringhien —

François Villon (fransua' vijon') estas la unua tre granda poeto, kiun havis Francujo (1432—1464?). Sed lia ŝago ne egalas lian genion: pro unu murdo kaj pluraj ŝteloj li estis kondamnita je pendumilo, kiun verdikton interveno de amikoj ŝanĝigis en ekzilon: li uzis tiun favoron por fariĝi rabisto. Ĉirkaŭ du jarojn antaŭ sia morto, li verkis poemon, titolitan »La Granda Testamento«, en kiu li transdonas al amikoj aŭ malamikoj siajn pli malpli efektivajn posedaĵojn: bona okazo ilin moki kaj piki. Sed al tiu satiro miksiĝas elegiaj pecoj, en kiuj li kantas sian timon al la sufero, mizero, malriĉo kaj morto: perfektaj paĝoj, ne superitaj en la franca literaturo.

Tiu malbonfama poeto ricevis pian kaj kleran edukon. Lia verko entenas multajn aludojn al la skolastiko, al la Biblio kaj al latinaj klasikuloj. Ci-sube oni trovas en la strofo 6-a citaĵon el la *Predikanto* (II, 9), en la 7-a citaĵon el *Ijob* (7, 16), en la 11-a citaĵon el la *Psalmaro* (103, 16); sed oni atentu, ke li citas laŭ la latina traduko, kiu prezentas ofte miskomprenojn de la hebrea teksto. En la fina balado (ĉar Villon intermetas baladojn kaj rondoĵojn meze de la okversaj strofoj), estas aluditaj: *Flora*, roma hetajro menciita de Juvenalo; *Alcibiado*, helena elegantulo kaj ŝtatisto, kiun pluraj mezepokaj verkistoj prenis por virino; *Thais*, helena hetajro, rolulino de la komedio *Eŭnuko*, de Terenco (ŝi estas aludita ankaŭ

de Dante, *Infero* XVIII, 133); *Eho*, nimfo el la helena mitologio; *Pierre Abeillard*, franca skolastikisto (mort. 1142), kiu amis sian lernantinon *Héloise*, kaj pro tio estis kastrita de ŝia onklo; ŝi mortis en 1164, abatino de la Parakleto, ĉe Nogent-sur-Seine; *Buridan*, franca skolastikisto (mort. post 1358), pri kiu oni rakontis, ke la reĝino Marguerite de Bourgogne venigis lin por ŝui lian amon, kaj poste jetigis lin al Seine en sako, el kiu li el-saviĝis; *Blanche de Castille*, patrino de Santa Luis; tri heroinoj el francaj epopeoj: *Berthe au grand pied*, *Biétrix*, *Alis*, el kiuj la unua estis la patrino de Karlo la Granda; *Jeanne d'Arc*, franca generalino, kondamnita al fajromorto, ne de la Angloj, kiel diras Villon, sed de la katolika eklezio, kiu poste ŝin sanktigis. (Jak Kor, strofo 10-a, estas *Jacques Coeur*, financministro kaj riĉegulo, kiu mortis en 1456, ekzilita kaj mizera.)

Mi ĉi-sube proponas tradukon de la versoj 169—356 de La Granda Testamento. Se Kalocsay malbenis la *trian* rimon de Dante, mi rajtus malbenigi la *kvaran* de Villon: oni do indulgu la makulojn de mia interpreto.

G. W.

Nota. Por kompletigi la figuron de Villon, oni relegu en »Eterna Bukedo« (pĝ. 72.) la »Baladon pri la pendumitoj«, majstre tradukitan de Kalocsay.

Bedaŭras mi pri l' temp' de l' juno,
dum kiu mi pli petolatis
ol iu ajn, ĝis viv-aŭtuno.
Sian forigon al mi kaŝis
ĉi temp' ne per pied' forpaŝis,
nek sur ĉeval'. Ho, kiel, ve, do?
Subite fluge forvojaĝis,
nenion lasis por heredo.

Ĝi pasis. Kaj mi restas plue,
magra je scio kaj prudente,
trista, senforta, morusblue
mienanta, sen havaĵ' kaj rento.
Eĉ plej humila el mia gento
nin malkonfesas, forgesante
pri la natura dev' kaj sento,
ĉar monon havas mi nul-kvante.

Kaj ja elsepojn mi ne faris
por trinkon aŭ frandaĵojn mendi,
por am' nenion mi malŝparis,
kion amikoj nun pretendi
povus kaj kun riproĉ' priplendi.
Mi diras, kaj per vorto prava,
pri tio povas min defendi:
sen kulp' ne diru vin kulphaval!

Vere mi amis laŭ la tento,
kaj amus ja por plia foj';
sed trista kor', malsata ventro,
nutrita nur trione, oj!
fortiras min de l' ama voj'.
Nu, kies plenas manĝo-kesto
tiu tradancu ĝin kun ĝoj',
ĉar de l' digesto venas festo.

Ha Di'! Se estus mi studenta
sen sekvi junan fi-petolon,
kaj severmore konduinta,
mi havus domon kaj lit-molon.

Sed mi por lerno fleksi kolon
ne volis, kiel aĉaj buboj.
Ha, dum mi skribas ĉi parolon,
preskaŭ rompigaĵas kor' al ruboj.

Tro larĝe, kvankam sen utilo,
mi uzis vorton de l' profet'
dirantan: »Goju, mia filo,
al via infaneco, sed
jen poste ŝanĝ' de l' etiked',
ĉar: infaneco kaj juneco
(jen propravorte lia pled')
estas vantaĵo kaj eksceso.

For-flugis miaj tagoj haste,
kiel, laŭ Ijob, la tol-haroj,
kiam tekisist' glatigas laste
per flam' de pajo la tol-varojn.
Se restis eĉ faden-elstaroj,
ili subite ekruinas.
Kial do timi pro l' amaroj
de l' viv', se morto ĉion finas?

Kie 'stas nun la bonvivantoj,
kiujn mi sekvis en jun-forto,
kun belaj diroj, belaj kantoj,
kun tiel plaĉaj ag' kaj vorto?
Unujn rigidaj faris morto:
el ili restas plu nenio.
Ilin gastigu ĉielkorto —
kaj la ceteron savu Dio!

Nun unuj, dank' al Dio, pozas
kiel moŝtegoj, grandaj mastroj,
aliaj, nudaj, pet-almozas,
panon vidas nur en fenestroj;
aliaj iĝis en la klostroj;
kartuzianoj, celestenoj
en botoj de kaptist' de ostroj;
tiel diversas la postenoj.

Al grandaj mastroj, Di-favoron!
Vivante pace kaj gemute,
ili ne spertas sort-rigoron,
pli bone do preteri mute.
Sed donu Di' al multaj, brute
mizeraj kiel mi, indulgon!
Por la aliaj estas ŝute,
tro ili havas vinon, bulkon.

Kaj bonajn vinojn freŝ-spilitajn,
kaj saŭcojn, flanojn, tortodiskojn,
kaj grasajn fiŝojn; poĉajn, fritajn
ovajon, tutajn riĉajn listojn;
ne similante masonistojn,
kiujn necesas servi pene,
sen vinverŝistoj faras distrojn,
ĉar ĉiu sin mem servas plene.

Sed senutile, mi konfesas,
de l' tem' mi vagis ekster limon.
Ne estas mi juĝist', ne pesas
kaj punas aŭ absolvas krimon.
Mi pli ol ĉiu havas ŝlimon
en kor'. Laŭdatu Jesu-Kristo,
pacigu ĉiujn ĉi animojn!
Skribita skrib', riskita risko.

Kuŝu pastraj', kiel ĝi kuŝas!
Sekvu parol' pli bonefika.
Ĝi tem' ja malagrabla tuŝas
multajn, ĉar teda, malamika.
Malriĉ' amara kaj kritika,
pro spito kaj envi', sentencas
ja ĉiam per parolo pika;
eĉ ne dirante, tiel pensas.

De l' juno estas mi sen havo,
magra kaj eta laŭ deveno,
nek mia patro, nek la avo
Orac' plezuris pri mon-pleno.

Malriĉ' nin pelas kun malbeno.
Sur tomb' de l' patroj — bonakcepton
l' animoj trouv en Edeno —
oni ne vidas kronon, sceptron.

Dum min premeĝis mank' de mono,
ofte konsolis min la kor':
»Vin ne turmentu tiel, homo,
vin ne translasu al dolor'.
Ne havas vi, kiom Jak Kor',
sed ja pli bone sin misnutri
en kruda lan', ol, eks-sinjor',
nun en riĉega tomo putri.«

»Ol eks-sinjoro...« — kia diro!
Cu iu lin sinjor' jam nomas?
Kiel Davida kantis liro:
»Vi lian lokon jam ne konas.«
Pri la ceter' mi ne rezonas,
ĝi taŭgas ne por mi, pekanto:
al teologoj mi ĝin donas,
ĝi estas tem' de predikanto.

Mi do ne estas, mi rekonas,
fil' de angela origino,
la frunton stel-diaĉem' ne zonas.
Mortis patret', ĉe Di' l' animo,
la korpo kuŝas sub pavimo.
Mi scias, ankaŭ panjo mortos
(ĝin scias mem la povrulino),
kaj ankaŭ l' filon oni portos.

Mi scias, ke l' mizerajn, dandajn;
saĝajn, stultajn; malvelajn, belajn;
ŝparajn, malŝparajn; etajn, grandajn,
homojn kamparajn kaj nobelajn;
laikojn, pastrojn; zibelfelajn
damojn kaj de ia ajn sorto:
kaj kufportantajn kaj ĉapelajn,
ja senescepte rabas morto.

Kaj ĉu Pariso, ĉu Helena,
kiu ajn mortas, mortas dure,
la spiron perdas, suferplena,
ĉe l' koro krevas gal' terure
kaj ŝvitas li supernature.
Neniu al li helpi venas,
nek fil' nek frat' garantiule
lin anstataŭi entreprenas.

Pro morto li paliĝas, verdas,
kurbigas naz', dikiĝas kolo,
sin streĉas vejnoj, karno velkas,
ŝvelas artikoj kaj muskolo.
Virina korp', kun tia molo,
glathirila, milda kaj sentiva,
ĉu tia estu via rolo?
Jes, aŭ ĉielen flugi viva.

BALADO PRI LA DAMOJ DE PASINTA TEMPO.

Diru, kie, en lando disa,
jam estas Flora, Roma gem';
arkipiada kaj Taisa:
laŭ bel' el kvazaŭ sama sem';

Eho, kun bruripeta ĝem'
en sia belo senkompara
apud river', ĉe lag-margen'?
Sed kie jam la neg' lastjara?

Kie la saĝa Heloisa,
pro kiu Abelard' kun ingven'
kastrita iĝis Sankt-Deniza
monak'? (pro amo, jen ĉagren!')
Kaj la reĝin', kiu sen ĝen'.
Buridanon post nokto kara
jetigis en sako al Sen'?
Sed kie jam la neg' lastjara?

Blanka, reĝin' kun lip' ĉeriza
kaj kun kantvoĉo de sirena,
kaj Berta, Bietriks', Aliza,
Haremburgis, grafin' de Men,
brava Johana el Loren',
kiun bruligis veng' anglara?
Kie? Virgina Suveren'!
sed kie jam la neg' lastjara?

Princ', kie ili? Por diven'
ne petu pri respondo klara,
ke vin ne trafu ĉi refren':
sed kie jam la neg' lastjara?

»Cu tiel? Kaj la kadavro de Husejn Abd el-Aziz,
kiel ĝi okazis?«

»Uallahi, je Dio! Cu mi scias? Cu mi estas via
ekzekutisto de hundoj?«

»Balaŝ kalam, ĉesigu vortadon,« kaj la gardisto
denove etendis la manon.

»Lasu!« kriis Abdallah kolere, ripete forpuŝante
la manon kun la malestima, obstina pacienco de eĉ
kolera egipto.

Nun ambaŭ gardistoj etendis la brakojn, kaj
komenciĝis furioza sed mallonga lukto. Lerte unu el la
gardistoj frapis per sia fusilo la ventron de Abdallah;
li rigidigis senspire, kaj ili surmetis al li la manka-
tenon.

Tiam ili trenmarsiĝis lin al la subpolicejo, kiu
situis meze de la kampoj, duonkilometron ekster la vi-
laĝo. La procesieton sekvis lia edzino, hurlante, blas-
femante, kaj per ĉiaj fivortoj insultante la gardistojn.
Alvenis ankaŭ vilaĝanoj, kun membroj de la familio
de la murdito; ili provis bati, alkraci, ponardi Abdallah,
kaj la gardistoj devis eĉ pli lukti kaj sin riski por
protekti sian arestiton, ol por lin aresti.

Fine, meze de bruego kaj konfuza lukto en
la mallumo, ili sukcesis lin logigi en karceron sur la
policeja korto, kaj frapbalai la homamason ekster la
policejon. Grade la amaso foriris al siaj domoj, sed la
edzino de Abdallah longe kriegis ekster la pordego,
skuante la kradon; fine eĉ ŝi sidis, poste kuŝis sur la
tero, por dormi ĝis la mateno.

En la mateno alvenis la polica leŭtenanto, junulo
tre bela kaj vireca en sia kalia uniformo, kun gaje
klinita fezo kaj blankaj gantoj. Li sidis en sia oficejo,
blanka kaj senromana, mendis kafon, bruligis cigare-
don, kaj tedite komencis legi la raporton de la serĝento

pri la trovo de la kadavro, plendo kaj akuzo de la
familio de la murdito, kaj la aresto de Abdallah.

»Venigu lin,« li diris lace al la atendanta policano.
Oni enmarsiĝis Abdallah, duone luktantan, kun
vundoj kaj sekiginta sango ĉie sur siaj vizago, brakoj,
sultroj, kaj kun ŝirita galabijo.

Li komencis paroli torente, preskaŭ antaŭ ol tra-
pasi la pordon.

»Ja bej, Allah ĵitaŭil omrak! O bejo, Dio longigu
vian vivon! Diru al ĉi tiuj hundidoj, ke...«

»Ua omrak! Kaj vian!« respondis la leŭtenanto.

»Silentigu lin.«

Policano pugnofrapis la buŝon de Abdallah, kaj
Abdallah jetis al la policano murdemane rigardon.

»Vi estas Abdallah Abd er-Rihim Hasan?«

»Jes, O bejo.«

»Vi loĝas en Uadi Sial?«

»Jes, O bejo.«

»Bone. Abd el-Aziz Mahmud el-Bedaŭi akuzas,
ke hieraŭ vespere vi pafmortigis lian filon, Husejn Abd
el-Aziz Mahmud. Li kaj kvin aliaj atestantoj deklaras;
ke vi plurfoje kaj publike ĵuris vengon kontraŭ la
familio de Abd el-Aziz pro via malliberiĝo.«

»O honorinda moŝto! Cu klera sinjoro, kia vi,
kredas tiajn hundojn? Uallahi! mi...«

»Silentigu lin,« lakone ordonis la leŭtenanto. La
policano ripetis la pugnofrapon, kaj Abdallah la ri-
gardon.

»Vi estas arestita, kaj restos tie ĉi por la magis-
trata enketo. O soldato, remetu lin en la karceron. Vi
povas forigi la katenon.«

La policanoj, nomataj en Egiptujo soldatoj, for-
igis Abdallah, luktantan kaj krietante al la leŭtenanto
komplimentojn kaj plendojn; baldaŭ fermigis la pordo

de lia karcero, kaj denove li estis sola. La leŭtenanto mendis pluan kafon, bruligis pluan cigaredon, kaj oscedis. En tiaj subpolicejoj ja nenio okazas.

En sia karcero Abdallah longe furiozis, kaj laŭvoĉe recitis la maljustaĵojn, kiujn li suferas. Sian monologon li variigis jen per malbenoj kaj venĝojuroj kontraŭ siaj falsaj akuzantoj, jen per prova parolado, konvinkanta eĉ la plej malfacilan ĵuĝiston, ke li estas denaska senkulpulo. Sed la tago pli kaj pli varmigiĝis, kaj fine liaj vortoj fariĝis nur murmuro, kaj eniris la silenton de la tagmeza dormo.

Oni vekis lin je la kvara kaj duono, por konduki lin antaŭ la reprezentanton de la urba magistrato. Li stumblis el la helega lumo sur la korto en la obskuron de la oficejo, kaj staris palpebrumanta antaŭ la tablo, kie sidis tri viroj. Malantate, en la centro, estis la reprezentanto de la magistrato, sendata por fari la leĝan enketon: li estis grasa hometo, ŝvitanta en siaj fezo kaj eŭropanaj vestoj; dum la tuta intervjuo li svingetadis unu piedon kaj frapadis la tablon laŭtakte per sia kraĵono, krom dum la momentoj, kiam li parolis. Ĉe lia dekstra mano sidis lia skribisto, ombra homo, kiu estis tiom miopa, ke li pasigis la tutan tempon aŭ tenante la nazon tri centimetrojn for de sia skribpapiro, aŭ ĝin antaŭenpuŝante aĝle por iom vidi la parolantojn. Maldekstre sidis la leŭtenanto, kun tedita esprimo ankoraŭ sur sia vireca vizaĝo.

La reprezentanto ne donis al Abdallah okazon por komenci la konversacion; li tuj komencis sian formalan demandadon.

»Abdallah Abd er-Rihim Hasan?«

»Jes, via honora moŝto.«

Kaj tiel plu. La skribisto ĉion knaris sur paperon, ŝajne skribante per la nazo. Fininte tiun scenon, la reprezentanto mendis kafon, bruligis cigaredon, kaj sin turnis por preparoli la Kabineton de Sedki Paŝao kun la leŭtenanto. Ili parolis tute malkaŝe antaŭ Abdallah kaj la policanoj; kiel tiuj brutuloj povus kompreni la parolojn de la *efendija*, de la edukitaro? Dume, Abdallah staris senmove, kaj pensis iom angore pri la venonta intervjuo.

Kritikinte la Kabineton de Sedki Paŝao el ĉiuj vidpunktoj, la reprezentanto oscedis, kaj ordonis al la policano venigi »la aliajn.«

Post du-tri minutoj eniris deko da homoj, ĉiuj vestitaj en la ceremonia kaftano kaj blanka turbano de la iom riĉa kamparano. Ili basvoĉe salutis la *efendiojn*, kaj tuj kaŭris en linio, kun postaĵo sur kalkanoj, kaj etenditaj brakoj apogataj sur genuoj. Dum unu-du minutoj ili fiksis la okulojn sur Abdallah, kun medita esprimo, kiu trankvile promesis, ke post la nepra puno de la lego, venos ankaŭ la saldo de kontoj laŭ la kamparana moro. Tiam ili turnis la kapon al la tablo kaj aŭskultis. Malantaŭ ili staris kvar policanoj; ankaŭ akuzantoj kaj atestantoj ekscitiĝas, kaj kelkfoje estas necese trankviligi ankaŭ ilin per kelkhora restado en karcero.

»Abd el-Aziz Mahmud!« diris la reprezentanto.

»*Effendim!*« respondis fortika maljunulo, kun falta vangoj kaj barbo sub la mentono.

»Kiam vi lastfoje vidis vian filon Husejn?«

»*Effendim*, je tagmezo: li venis por doni monon, kiun li estis kolektinta de terluanto.«

»Kiam li foriris el via domo?«

»Je la kvara. Li iris rigardi miajn laboristojn en la kampo apud la kanalo.«

»Kaj li ne revenis laŭ kutimo je la vespera preĝo. Kiam vi komencis serĉi lin?«

»Ni atendis du trionojn de horo sen manĝi. Mi tiam sendis mian filon Fuad al la kampo.«

»Fuad Abd el-Aziz!«

»*Effendim!*« respondis Fuad.

»Vi iris survoje al la kampo apud la kanalo. Kie vi trovis la kadavron de via frato?«

»Sur la vojeto, kiu iras al nia kampo, sep minutojn for de la vilaĝo. Li kuŝis sur la ventro. Mi kriis lian nomon, sed li ne respondis. Tiam mi vidis, ke li mortis.«

»Kion vi faris tiam?«

»Mi kaptis lian azenon, kiu estis en la apuda kampo, kaj rajdis hejmen por informi mian patron. Li iris al la policojo por informi, ke tiu hundo Abdallah, kiu ĉiam estis malpura kaj fava, mortigis nian Husejn.«

Ĉe tio Abdallah, kiu ĝis nun staris senmove, kvazaŭ la afero lin neniel concernus, eksaltis, kvazaŭ oni estus lin vipinta.

»Vi mensogas! Oni pafmortigas hundon de via familio, kaj vi venas tien ĉi por azenbleki pri honestaj homoj!« Li volis daŭrigi per kelkaj rimarkoj pri la honoro de la virinoj de tiu familio, kiam la reprezentanto donis la malvovan ordonon, »Silentigu lin.«

Necesis du policanoj ĉi foje por ŝtapi tiun buŝon, kaj, eĉ kiam silenta, li spiris forte kaj okule minacis siajn senhontajn akuzantojn. La lukton rigardis la reprezentanto, kiel oni rigardas muŝojn sur fenestrovitro.

Nun la demandoj direktiĝis al Abdallah.

»Kaj kial vi mortigis Husejn?«

»Kial mi mortigus tiun sesdekidon? Mi atentis miajn aferojn. Ĉu mi havas tempon por fari la laboron de la pendigisto?«

»Bone. Vi diras, ke vi ne mortigis lin. Nu, rigardu tion ĉi.« La reprezentanto gestis al policano, kiu donis al li fusilon. »Kio estas tio?«

Abdallah silentis.

»Via fusilo, ĉu ne? Ni trovis ĝin en via domo. Eble spirito ĝin metis tien? Kies ĝi estas?«

»Ĝi estas mia,« respondis Abdallah, atente observante la reprezentanton.

»Kaj per ĝi vi pafis Husejn, ĉu ne? Vi atendis en la kanoj, kaj pafis lin, kiam li alproksimiĝis?«

»Ne, je la profeto Muhammad, li estu feliĉa! Mi ne uzas mian pafilon jam de semajnoj.«

»Vi ne uzas ĝin jam de semajnoj. Bone. Mi komprenas. Kaj kiel estas, ke jen en la tubo estas tute freŝe bruligita pulvo? Eble via edzino iras ĉasi?«

Abdallah interne malbenis sian stultecon, ke li ne purigis la fusilon; sed sur lia vizaĝo aperis esprimo de kompleta nekompreno.

»Freŝa pulvo? Via moŝto, Dio protektu vin! Vi eraras. Kiel povus esti freŝa pulvo, se mi ne pafas jam de monatoj?«

»Ĉu tiel? Sendube la diabletoj. Eble la ĵuĝisto kredos vin, kaj ne min.«

»Ja baŝo, O paŝao, kiel mi povus memori? Eble mi iris hieraŭ kaj pafis unu el la hundoj, kiuj difektas miajn kreskaĵojn.« Indigne: »Ĉu mi memorus ĉiun hundaĉon, kiun mi pafas?«

La reprezentanto ridetis grase, kaj kapjesis. »Mi ja komprenas. Dum semajnoj en la vilaĝo, vespere en la kafejo, vi laŭte ĵuras, ke vi venĝos vin pro tiu afereto, pro kiu vi pasigis tri monatojn en malliberejo. Vi informas la mondĉion, ke la maljunulo Abd el-Aziz bedaŭros siajn mensogojn. Kaj tiam, por prui viajn vortojn, vi prenas vian fusilon unu vesperon, kaj iras pafmortigi — hundaĉon en via kampo. Tiel, ĉu ne?«

«Ĉu mi atentus tiajn friponojn? La malestimo sur lia vizaĝo estis admirinda. »Ili ne indas alkraĉon. O noblulo, mi estas konata en la vilaĝo. Neniu eĉ unufoje aŭdis min minaci tiun familiaĉon: neniŭ diras tion. Ĉu Dio permesus al tia mensoganto vivi?»

La reprezentanto sin turnis al la linio el kaŭrantaj viroj. »Muhammad, Ali, Nasr, Abd el-Hamid, Nur, ĉu vi aŭdis aŭ ne aŭdis Abdallah deklari, ke li scias protekti sian honoron, kaj ke li mortigos la tutan familion de Abd el-Aziz?»

Konfuzo ĥoro jesis emfaze, kun multaj ĵuroj je la nomo de Allah.

Ĉe tia malnobleco, Abdallah tute furiozis. »Idoj de publikulinoj!« li kriegis. »Malbenojn sur viaj patroj! De kie vi havas viajn filojn, O Abd el-Aziz? Ĉu kalvulo, kia vi, povas fari idojn al siaj edzinoj?»

Ĉe tiu eksplodo estis haoso en la oficejo. La viroj levigis kune kaj ekkuris por dispecigi Abdallah. Ĉiu samtempe kriegis, malbenante kaj blasfemante, kaj meze de la bruego la policanoj batalis por restarigi kvieton. Fine el la konfuzo apartigis tri grupoj: la akuzantoj, la policanoj, kaj Abdallah kun siaj gardistoj, ĉiuj anhelantaj, kun freŝa sango sur vizaĝoj kaj ŝultroj.

La leŭtenanto oŝcedis. »Sufiĉas, ĉu ne? Ni povas atendi la proceson.« La reprezentanto kapjesis, kaj ordonis al policano alporti kafon. Oni forpelis la akuzantojn kaj atestantojn, kiel ŝafojn, kaj remetis Abdallah en lian karceron. Kiel antaŭe, li laŭte informis la mondon pri siaj suferoj kaj afliktoj, dum la aliaj mal-liberuloj malbenis lian patron kaj faris malkomplimentojn pri lia patrino; en la sekvanta insulto-duelo, kriata de karcero al karcero, Abdallah resereniĝis.

Pasis du horoj. Subite li aŭdis novan, familieran sonon tra la ekstera fenestro de sia karcero, kiu malfermiĝis sur la kampvojeton kondukantan al la tombejo. De fore, aŭdigis basa kanto kun forta ritmo, sur fono de virina ululado: la egipta mortoveo tremanta kaj ripetata. Baldaŭ la konfuzaj sonoj pliklarigis kaj plilaŭtigis, kaj la procesio aperis preteriranta la policejon. Ĉe l'antaŭo marŝis la viroj, blanke vestitaj, kun seriozaj, senĉagrenaj vizaĝoj. La plej proksimaj viraj parencoj subportis ŝultroportilon, sur kiu kuŝis la ĉerko. Tiuj, kiuj ne povis atingi unu el la teniloj, metis manon sur la portilon mem, kaj tiel marŝis kantaŭte. La unua portanto estis Abd el-Aziz mem, kun okuloj fiksitaj sur la eterneco. Post la viroj iris la virinoj, nigre vestitaj. Ili kriis, ploris, jen rektigante la dorson kaj ŝvingante la brakojn al la ĉielo; jen kurbigante sin kaj prenante polvon de la tero por versi nur la kapon. Ĉiu-kelkpaŝe ili haltis, ŝiretis siajn vestojn ĉe la brusto, kaj levis la kapon por ululi kun blinda malespero.

La procesio forpasis, kiel dancistoj trans scenojn, kaj la kanto kaj hurlado fariĝis nura murmurado en la malproksimo.

Abdallah daŭris rigardi tra la fenestro, kontente ridetante. Fine, kvita kun tiu hundaro. Tamen, ne. Estas ĉi tiu akuzo, ĉi tiu mallibereco; tion oni devas pagigi. Abdallah grincigis siajn dentojn. Denove lia kolero pleniĝis lian koron, ĝis ĝi eksplodis en subita ekkrio: »Allah!« Li ekpaŝis tien kaj reen furioze.

Tiam frapis lin alia penso: morgaŭ estos vendredo, kiam li devus plenumi sian juron, marŝi trifoje preĝante ĉirkaŭ la tombo de la sanktulo, ŝejho Suliman. Tio ĝenis lin; se oni ne plenumas juron, teruraj



E. Wieralt:

Predikanto (litogr.)

LA VOJAĜO

— Charles Baudelaire —

I.

Por knab', kiun revigas la mapoj, bildalbumoj,
la mondo, kiel lia malsat', estas giganta.
Ho, kiel vaste granda la mondo ĉe lamp-lumoj!
Ĉel' rememoroj, kiel la mond' estas malgranda!

Ni ekiras iun tagon kun cerbo flame brula;
la kor' de spitoj pezas kaj de dezir' amara.
Kaj iras ni obee laŭ ondo-ritmo rula
luli senfinon nian sur la fineco mara.

La unujn la patrujo malnobla fuĝi spronis,
l' aliaj fuĝas sian hontindan nask-sekreteton,
aŭ stel-serĉantoj, kiuj en in-okuloj dronis,
fuĝas tiranan Circe, ŝian parfuman reton.

Por ne ŝanĝigi besto, ili sin ebriiĝas
per spaco kaj per lumo kaj per ĉieloj flamaj.
Ĥlin la suno bakas, glacio morde pikas
kaj forviŝadas lante spurojn de l' kisoj amaj.

Sed veraj vojaĝantoj ja estas, kiuj iras
por iri, akceptante ŝian fatalon ĝue;
ilia kor' malpeza kiel balon' facilas,
ili, senscie kial, eterne diras: Plue!

Dezir' ilia havas formon de nub-figuroj,
kaj ili revas, kiel rekruto pri kanono,
pri ŝanĝaj, nekonataj, voluptaj aventuroj,
de kiuj la hom-lingvo ne scias eĉ pri l' nomo.

II.

Terure, ni imitas laŭ danco kaj laŭ salto
la turbon, la globeton; la Scivolemo, urĝe,
eĉ en la dorm' turmentas kaj rulas nin sen halto,
kiel Anĝel' kruela, batanta sunojn skurge.

Ho, stranga fato, kies fincelo ne kapteblas,
nenie ekzistanta, serĉebla ajn-angule!
pro kiu l' Homo, kies esper' senlace febras,
por trovi la ripozon kuregas frenezule!

L' anim' estas trimasto serĉanta Ikarion;
sur ponto sonas voĉo: »Rigardu! Bordo certa!«
El masto-korb' ni aŭdas fajre frenezan krion:
»Ho, Amo... Glor' Feliĉo!« Inferon! Rif'
dezerta!

Ĉiu insulo, kiun la gardist' signalas,
ja ŝajnas Eldorado kaj promesita lando.
La Fantazio, kiu jubile bakhanalas,
ĉe l' matenbril' ĝin trovas nur nuda roka rando.

Ho povra amant' de landoj himeraj, ekzotikoj!
ĉu ĉeni lin per fero, ĉu ĵeti al fundo mara?
Ho, ĉi marist' ebria, trovant' de Amerikoj,
kies miraĝo igas l' abismon pli amara!

La vagabond' maljuna, dum en la kot' li vagas,
naz-en-aere revas pri paradizo brila;
lia okul' sorĉita Kapuon ekimagas,
kie kandel' lumetas en kabanac' argila.

III.

Mirindaj vojaĝantoj! kiaj rakontoj noblaj
legiĝas en l' okuloj profundaj kiel maroj!
Montru la trezorojn de l' memoroj miloblaj,
el astroj kaj etero la mirajn juvelarojn.

Mi volas kunvojaĝi sen velo kaj vaporo
por peli for la tedon de l' prizon-ĉeloj hontaj.
Do, sur spiriton nian, streĉitan kiel tolo,
pentre la rememorojn kun kadroj horizontaj!

Diru, kion vi vidis?

IV.

Nu, vidis ni riverojn
kaj stelojn, vidis ankaŭ sablaĵojn sub siroko,
kaj malgraŭ multaj plagoj, embuskaj viv-danĝeroj,
ja ofte ni enuis, samkiel en ĉi loko.

La gloro de la suno sur mar' violkolora,
la gloro de la urboj en la krepuska suno,
ardigas nian koron per la sopir' dolora,
plonĝi al la ĉielo de mild-alloga lumo.

Pejzaĝoj plej grandiozaj, kaj plej riĉegaj urboj
neniam havis tiajn allogojn mister-mirajn,
kiajn kaprice formis hazardo per la nuboj.
Kaj ĉiam la deziro nin faris plu-sopiraj.

La ĝuo la deziron nur igas pli fortika.
Maljuna arb', Deziro, vin sterkas la volupto;
dum igas ĝi la kruston pli dura kaj pli dika,
la branĉoj pli sin streĉas al sun' por fajra nupto.

Ho, kien do vi kreskos, arbeg' pli tempo-spita
ol la cipreso? — Tamen, ni kun zorgem' fervora
kolektis kelkajn skizojn por via album' avida,
ho fratoj, kiuj trovas, ke belas ĉio fora.

Multfoje ni salutis idolojn rostro-havajn,
kaj tronojn lume brilajn, faritajn el juveloj,
palacojn fee pompajn, kies ornamoj ravaj
ruiniga revo estus por viaj bankieroj,

kostumojn, kiujn sorbas l' okul' ebriiĝate,
virinojn, kies dentojn kaj ungojn pentras farboj,
jonglistojn saĝajn, kiujn serpent' karesas flate.

V.

Kaj plu, kaj plu ankoraŭ?

VI.

Ho, infanecej cerboj!

Por ke ni ne forgesu pri la plej ĉefa aĵo:
ni vidis, sen ĝin serĉi, en la plej plena rego,
tra tuta long' de l' fata ŝtupar', je ĉiu paŝo,
spektaklon enuigan de la senmorta peko:

Jen ino: sklav' malnobla, orgojla kaj stupida,
sennaŭze sin amanta, senride memadora.
Jen vir': tirano kruda, lasciva, mon-avida,
kaj sklavo de la sklavo, flu' en kanal' fetora.

Ekzekutisto gaja, martir', kiu ĝemspiras,
festeno, kiun spicas parfume sango-gutoj,
despoto, kies nervojn venas de povo ŝiras,
popol' enamiginta al bestigantaj knutoj.

Ni vidis religiojn, al nia propra rito
similajn, grimp-ataki ĉielon; kaj sanktulojn,
kiel la molkorpulo voluptas en plum-lito,
serĉadi en harzono kaj najloj korplezurojn.

La Homon vante klaĉan, ebrian de genio,
kiu de frenezumoj nun kiel ĉiam plenas,
voki al Di' en sia furioza agonio:
»Ho mia similulo, Majstro, mi vin malbenas!«

Kaj malpli stultajn, hardajn amantojn de l' Ebrio,
fuĝi de l' granda greĝo barita de la Sorto,
rifuĝi en la sinon senliman de l' opio.
— Jen pri la tuta globo l' eterna tagraporto.

VII.

Amara scio, kiun el la vojaĝ' ni havas!
Ĉi tiu mondo eta, kun monotona fluo,
hieraŭ, nun kaj morgaŭ per sama bild' nin trafas:
horor-oazo en la dezerto de l' enuo!

Ĉu iri? resti? Restu, se havas vi radikon;
for, se vi devas. L' unu kurege, dua kaŭre
ja trompus tiun mornan, viglantan malamikon,
la Tempon. Estas, kiuj, kurantaj ĉiamdaŭre,

El la franca: *Lali Blond* kaj *K. Kalocsay*.

aferoj povas okazi: oni falas en puton, aŭ renkontas
homon kun malbona okulo, kaj forgesas forgesti la
malbonon; aŭ venas en la nokto diabletoj por turmenti
kaj malebligigi la dormon. Teruraj aferoj, precipe tiuj
diabletoj, kiuj povas tute mizerigi la vivon al la homo.

Li ja devos iri morgaŭ al la tombejo por fari
tiujn preĝojn; sed kiel — en malliberejo? Kiel, kiel
— en malliberejo? Horon, du horojn li cerbumadis,
jen paŝante, jen kaŭrante kun etenditaj brakoj. Ĉu
mortigi la gardiston? Sed denove, kiel? Pri la puno
sekvonta tian pluan murdon li ne pensis: la egipta
kamparano ne kutimas antaŭpensi la rezultojn de siaj
agoj.

Subite li haltis, kaj staris kvin minutojn sen-
move meze de la karcero. Li ridetis; li havis sian
planon. Li iris al la kradpordo de la karcero kaj el-
rigardis. Estis mallume ekstere. En la oficejo, nenia
lumo: la leŭtenanto ne deĵoras. Apud la pordego de
la korto, nur unu sola figuro kun fusilo — la gard-
isto; ankaŭ la serĝento foriris por siaj aferoj. Abdallah
tre singarde provis altiri la atenton de la gardisto; eĉ
la aliaj malliberuloj devos ne scii pri la plano.

»Tsss! O soldato, aŭdu!«

Je la tria provo, la gardisto aŭdis, kaj base
grumblyante, venis al la karcer-pordo.

»O azeno, kion vi volas? Ĉu mi estas tie ĉi por
vin atenti?«

»Aŭdu: kion oni faros al mi?«

»Ĉu mi scias? Kredeble pendigo.«

kiel la Jud' vaganta aŭ apostoloj piaj,
kontentas per nenio, nek ŝipo nek vagono,
por fuĝi la skermiston malnoblan; kaj aliaj,
kiuj ĝin scias murdi sen las' de l' naskregiono.

Se fine ĝi nin tretas per plando al kranio,
esperos ni, kaj krios: Antaŭen, sen prokrasto!
Kaj same kiel foje ni vojais al Ĉinio
kun haroj en la vento, okuloj al la vasto,

ni ensipiĝos naĝi sur Ocean' Tenebra
kun la jubila koro de vojaĝanto juna.
Aŭskultu, sonas voĉoj kun ĉarma son' funebra,
kantante: »Ho ĉi tien! vi, kiuj el parfuma

Lotuso volas manĝi. Jen la rikolto sorĉa
de l' miraj fruktoj, kiujn malsatas via sino.
Venu vin ebrigi per gusto strange dolĉa
de l' posttagmez', al kiu neniam venos fino.

Rekonas ni l' fantomon per ton' familiara;
niaj Piladoj festas brakstreĉe rendevunon.
»Por korfesigi naĝu al via Elektra kara!«
Si diras, al kiu iam ni kisis la genuon.

VIII.

Mort', kapitan' maljuna' ho Mort', jen temp' de
l' migro!
Ĉi lando tudas. Levu la ankron! Svelu velo!
Kaj kvankam kovras maron, ĉielon inka nigro,
la kor', vi scias, plenas de radianta helo.

Verŝu venenon vian por nin fortigil! Havas
ĉi tiu fajro tian cerbobruligan povon:
ni volas plongi abismon — Infer', Ĉiel', ĉu gravas? —
por trovi, sur la fundo de l' Nekonata, novon.

»Pendigo? Allah-Allah-Allah! Mizero! Kial mi
naskiĝis?«

»Allah fu! Ekzistas tamen Dio!« diris kompare
la gardisto.

»Sed vi ne komprenas! Mi faris juron, pro...
pro ia grava afero, ke morgaŭ mi marŝos preĝante
trifoje ĉirkaŭ la tombo de Suliman. Nun mi ne povas.
Ĉu vi komprenas, kiel mi turmentigos?«

La gardisto estis tre religia homo, kaj ankaŭ
bonkora, kaj li bone perceptis la malfacilan situacion,
en kiu troviĝis Abdallah.

»Tamen, ĉu li diris konsole, »la diabletoj ne povos
longe vin turmenti.«

»Sed ĉu mi povos morti, ne plenuminte tian
promeson?« Abdallah flustris ankoraŭ pli sekrete.

»Aŭdu: vi estas bona homo: vi helpos min, kaj Dio
rekomencos vin per riĉeco kaj multaj filoj. Nur mal-
granda afero: vi malŝlosos mian pardonon, mi foriros
por unu horo, kaj revenos rapide, nevidate, kaj neniu
scios pri la afero. O soldato, mi ĵuras per la Profeto,
ke mi ne perfidos vin; mi ĵuras, ke mi revenos je la
gusta tempo.«

»Ĉu vi estas frenezulo? Cetere, ĉu aldonis la gard-
isto, »mi ne deĵoras dum la nokto. Mi finos post duon-
horo, kaj revenos nun tagmeze morgaŭ. Neeble.«

»Rabuna jŭgazik! Dio vin rekomencos! Ne estas
necese iri nokte. Lasu min eliri post la tagmezo morgaŭ;
ĉiu en la mondo estos dormanta; neniu min vidos;

estos pli sendangere, ol dum la nokto. O homo, kion vi volus fari? Ĉu vi ne plenumus juron?»

Tiu petego, kaj tia rezonado, ŝancelis la decidon de la gardisto; li estis pia homo. Abdallah vidis sian avantaĝon, kaj tuj almetis la finkonvinkan argumenton.

«Mi havas du pundojn kasitajn. Mia edzino scias, kie ili estas. Mi diros al ŝi, ke ŝi donu al vi la monon, kiam mi estos farinta miajn preĝojn. Du pundoj!»

Du pundoj preskaŭ egalas la salajron por tuta monato, kaj estas argumento nerezistebla.

«Du pundojn kaj duonon,» diris la gardisto.

«Ja saldm! Ana meskin! O Paco! Mi estas malriĉega!» diris Abdallah. «Du pundojn kaj dek piastrojn.»

«Du pundojn kaj tridek piastrojn,» firme respondis la gardisto.

«Mi malsatos, tamen, bone. Estu tiel.»

«Tamen, vi ja ĵuras reveni, ĉu ne? Se vi malaperus, mi perdus mian oficon, mian pension, kaj krome pasigus kelkajn jarojn en malliberejo,» diris la gardisto, kun ektimo.

«Ĉu mi estas mensogema kristano?» lin trankviligis Abdallah. «Vi mem apenaŭ rimarkos, ke mi forrestis etan tempon.»

La gardisto reiris al la pordego por saluti la serĝenton revenintan de siaj privataj aferoj, kaj Abdallah kuŝigis sur la nuda planko, kaj dolĉe dormis. Sur liaj lipoj estis rideto.

Fariĝis laŭ la plano. Je tagmezo, oni ŝanĝis la gardistojn. La leŭtenanto foriris por siaj tagmanĝoj kaj siesto. La serĝento kaj la gardisto, la sama gardisto, sidis sur benko apud la pordego.

La mondo estis silenta. Blankega sunlumo torente falis senbrue; ĉio paligis en la varmego. Baldaŭ la kapo de la serĝento kliniĝis; li ronkis. Similaj dormosonoj aŭdiĝis el la apudaj karceroj.

La gardisto zorgeme levigis, kaj piedpintis al la pordo de la karceroj, kaj ĝin malslosis per la ŝlosilo, kiu pendis ĉe lia zono. Abdallah silente eliris nudpiede, kaj gestante al la ĉielo por ripetiti sian juron, glitis tra la korto, sur la eksteran vojeton.

Tagmezo silento kaj soleco. En domoj, sur kampoj, la homoj ĉie kuŝis dormantaj post la peza laboro de la mateno. Abdallah sin turnis en la direkto de la tombejo, kaj komencis kuri. Necesis tio, spite la varmon, ĉar estis multo fareda en lia malgranda horo.

En ses-sep minutoj li atingis la tombejon, kaj irinte rekte al la tombo de la sankta ŝejho, ĉirkaŭiris ĝin trifoje, preĝante.

Nun, kun trankvila konscienco, li sin turnis al la dua afero. Ankorauŭ kurante, sed tre zorge, por ne esti vidata, se troviĝus ilin maldormemulo, li ekiris en la direkto de unu el la kampoj, kie probable li trovas la filojn kaj laboristojn de Abd el-Aziz. Ankorauŭ dek minutojn da vojo, kaj li alvenis. Dio estu laŭdata, jen ili. Sur la rando de la kampoj kuŝis ses viroj: Fuad Abd el-Aziz, liaj du pli junaj fratoj Ali kaj Salah ed-Din, kaj tri laboristoj. Ĉiuj profunde dormis.

Abdallah ĉirkaŭrigardis, kaj tuj rimarkis longan tranĉilon uzatan por dehaki la sukerkanojn. Li prenis ĝin, pesis, kaj klinante sin, pikfrapis ĝin en la koron de Fuad. La mortigato gemegis, malfermis la okulojn larĝe, kurbigis siajn fingrojn, kaj kuŝis senmove.

Abdallah rigardis la aliajn; ili ne vekigis. Tiam li aliris al Ali, kaj zorgeme sed peze piedfrapis lian nazon tiel, ke la sango elsprucis. Ali ruliĝis sur la tero, kaj saltis staren. Li rekonis Abdallah, kaj momente turnis sian rigardon al Fuad. Guste kiam lia buŝo

Lunluma

— Hendrik Adamson —

En orumo de lunlumo
brilas neĝo. Jen: elfreĝo,
kvazaŭ blua stri' de fumo
post verdaj' de abi-heĝo.

Ni infane man-en-mane
migras tra malnova parko;
montdeklivo sin ekrane
klinas al alea arko.

Nigraj ombroj, kvazaŭ tombaj
ŝtonoj ilin jetus, rampas
rampas al dekliv', sennombraj,
neĝo-kreton inke stampas.

Kor' sin multe plorsingulte
pro l' pasinto riprotegas,
pro perditaj tagoj stulte
al si mem Levidojn legas.

Tute vane. Man-en-mane
iras ni kun antremado,
kaj interklinigas kane;
plifortigas manpremadon.

Estu ĉirkaŭ ni la tomboj,
gravas nur, ke ni ne mortis;
ne timigas nin la ombroj —
bone ili nin eskortis.

En orumo de lunlumo
ni nin kisas, karulino;
kvazaŭ blua stri' de fumo,
jen elfreĝ' — sed for la timo!

Kisi rajtas ni kaj ami:
nia estas ja ĉi tero;
rajtas bruli, rajtas flami,
kaj ridigas nin himero.

malfermiĝis por krii, Abdallah pugnofrapis lian okulon; Ali falis teren, kolizante kun Salah ed-Din, kiu levigis sidon, surprizita kaj ankorauŭ duondorma. Abdallah sin turnis, kaj forkuregis. Du-tri momentojn li aŭdis la kriojn de la nun vekigintaj laboristoj, poste, nenion; oni prizorgis, senutile, Fuad.

Dek minutojn poste, li estis jam ĉe la pordego de la policejo. Silento; ĉiu, krom la gardisto, ankorauŭ dormis. Senparole, ili iris al la karceroj, Abdallah eniris ĝin, la gardisto reslosis la pordon, kaj reiris al sia benko. Li iom puŝis la serĝenton, por ke tiu vekigu; la gardisto opinias, ke estas jam lia vico por dormi.

Pasis unu horo; la leŭtenanto estis ĵus reveninta de sia siesto, kiam alvenis Abd el-Aziz, Ali, Salah ed-Din kaj aliaj familianoj, kriegante, ĵurante vengon, postulante la tujan mortigon de Abdallah. Estis por ĉi tiu bonŝance, ke li estis fermita en karceroj, alie la furiozantoj estus lin mortigintaj spite la policanojn.

La leŭtenanto devis alvoki pluan taĉmenton el apuda kazerneto, antaŭ ol li povis rekvietigi sian policejon. Tiam, li kolektis la familianojn en sia oficejo por atendi la reprezentanton de la magistrato, kiu, farinte alian enketon tiumatene en la sama distrikto, tiumomente pace dormis en la vilaĝo.

Post lia alveno kun sia skribisto, oni ordonis al ok policanoj stari kun la familianoj de Abd el-Aziz; nur tiam ili malŝlosis la karceron de Abdallah, kaj lin kondukis al la oficejo.

Abdallah rigardis Abd el-Aziz kun duone subpremita triumfo en siaj okuloj. Ĉi-foje, tamen, la familianoj ne rigardis lin mediteme kaj digne; kontraŭe, ili salte starigis kaj estis sur lin kurontaj; nur malfacile la policanoj sukcesis ilin rekaŭrigi sur siajn kalkanojn.

»Nun, kio estas? Kial ĉi tiu bruego? Ĉu vi estas frenezaj?« diris la reprezentanto.

Raoso; ĉiu volis paroli, krii samtempe. Silentigo flanke de la policanoj. La reprezentanto fingromontris al Ali.

»Tiu homo murdis mian fraton Fuad,« diris Ali. »Ni ĉiuj estis dormantaj sur la kampo. Subite mi sentis teruran frapon sur la vizaĝon — vi ankoraŭ vidas la sangon sur miaj vestoj — kaj mi vekigis. Antaŭ mi staris tiu malbenita hundo; mi ekstaris kaj vidis Fuad sen viva sur la tero. Tiam tiu homaĉo frapis min teren kaj forkuris. Mi falis sur Salah ed-Din, kiu ankaŭ vidis lin forkuranta, kaj rekonis lin. Tiam ni vekis la laboristojn, kaj forportis Fuad al nia domo.«

»Frenezuloj!« kriis Abdallah. »O bejo, ĉu vi iam aŭdis tiajn mensogojn? Ĉu malliberulo promenas libere por mortigi eĉ tiajn hundojn?«

»Silentigu lin,« diris la reprezentanto. Oni faris, sed ĉi tiun fojon Abdallah eĉ ne rigardis la pugnofrapinton.

»Kaj vi,« diris la reprezentanto al Ali, »kion vi respondas al tio? Ĉu vi frenezigis, aŭ ĉu vi songis?«

»Je Dio kaj je Lia Profeto mi ĵuras, ke lin mi vidis kaj nenium alian! Ĉu mi ne havas okulojn? Ĉu mi kaj mia frato songis la saman songon?«

La reprezentanto fermis siajn okulojn, kaj suspiris. Li kutimigis al la mensogado de akuzantoj kaj akuzatoj, sed estis en ĉio ĉi mensogo pli ol ordinara; estis teda afero. Li malfermis la okulojn, kaj ordonis venigi la serĝenton.

La serĝento, aŭskultinte ĉion de la pordo, sciis, pri kio temas.

»O serĝento, ĉu io eksterordinara okazis hodiaŭ?«

»Kiel eksterordinara? Kion via moŝto volas diri?«

»Ĉu malliberulo eliris la policejon, aŭ eĉ sian karceron?«

»Effendim!« kriis la serĝento indigne. »Ĉu mi ne faras mian devon? Ĉu mi lasas promeni krimulojn kaj rabistojn?«

Li tamen rigardis, dum frakcio de sekundo, la gardiston kun eksuspekto en sia okulo.

»Respondu klare: ĉu Abdallah aŭ iu alia eliris la karceron eĉ kelkajn minutojn hodiaŭ?«

»Uallahi, neniam!«

Nun ankaŭ la reprezentanto rigardis la gardiston kun ioma malfido. »Ja Muhammad!« li vokis.

»Effendim!« respondis la gardisto, kun timego en sia koro; li jam malbenis la impulson, kiu igis lin riŝki siajn oficon kaj pension, kaj longan restadon en malliberejo. Tamen, li ekvidis esperon.

»Kaj vi, kion vi faris? Ĉu vi liberigis Abdallah ĉi posttagmeze?« lin demandis la reprezentanto.

»Kial mi farus tion? Ĉu mi estas freneza? Li estis enŝlosita, kaj kiel li forirus kiam la ŝlosilo pendas de mia zono? Rigardu, jen ĝi!« li diris triumfe; evidente por li la ŝlosilo estis klara pruvo pri lia senkulpeco.

»Kaj,« li diris kun subita inspiro, »kiel Abdallah povus eliri la pordegon sen esti vidata de la serĝento?«

Kaj li sin retiris el la diskuto, sukcesinte ŝovi la respondecon sur la sultrojn de sia superulo, kiu ja ne povas konfesi, ke dum pli ol unu horo li dormis, tiel ke la tuta malliberularo estus povinta forkuri.

»Vi vidas, via moŝto,« diris Abdallah, preskaŭ ridante, »tiuj filoj de sesdek estas tre ruzaj. Kies sango estas sur la vesto de Ali? Kaj kial la laboristoj ne vidis min? Jen la vero, kaj mi provokas ilin malpruvi ĝin! Tiuj enviduloj Ali kaj Salah ed-Din ĵaluzis siajn pli aĝajn fratojn; ili volis mem heredi la tutan bienon de sia patro. Ili murdis jen unu, jen la alian, kaj por kovri sian diablan krimon, ili akuzas min — senkulpon, kiu malutilis al alia neniam!«

»Filo de diabloj, vi mensogas! Dio sufoku vin!« kriis la familio de Abd el-Aziz, kaj ili denove saltis feroce at Abd-Allah. Ĉi tiun fojon eĉ la leŭtenanto devis partopreni la batalon por restarigi ordon. Kiam reestis iom da kvieto, Abdallah daŭrigis preskaŭ fafarone, dum la reprezentanto rigardis de unu vizaĝo al alia, kun kolera mistifikigo.

»Sed Dio,« daŭrigis Abdallah, »ne permesis tian krimon; Li protektas la senkulpajn kaj la piajn. Ili faris tro; ili volis akuzi homon, ke li faris krimon, dum li estis kilometron for en karceron, kun gardistoj kaj bone ŝlosita pordo. *El-Hamdulillah!* Dankon al Dio! Li frenezigis miajn malamikojn!«

La reprezentanto rigardis la leŭtenanton, la leŭtenanto rigardis la reprezentanton, kaj ili ambaŭ kapjesis.

»Forigu ĉiujn,« ordonis la leŭtenanto.

»Vi scias,« li aldonis poste, kiam li kaj la reprezentanto estis solaj, »mi ne surprizigis, se tiu Abdallah sin savus tute senpune. Mi estas certa, ke li faris la unuan murdon, sed se ŝajnas, ke Abd el-Aziz kaj liaj filoj mensogis la duan fojon, kial ne ankaŭ la unuan fojon?«

Kaj efektive Abdallah liberigis tute senpune, pro necertece de atestaĵo kaj reciproka kontraŭdirado de atestantoj. Kaj li estis prudenta: li sciis, ke estos ĉiam dangere resti en la sama distrikto kun Abd el-Aziz kaj liaj filoj; li translokigis sin kaj sian edzinon tuj al Kairo, kie homo, kiu havas malamikojn, povas malaperi.



E. Wiiralt:

Fumanto (kol. monotipo)

La nomtabuleto

— Hasse Z. —

Konsulo Henriko Fredman estis tute ĉiutaga konsulo kaj homo. Tiutempe, kiam li estis nur simpla komercisto, li estis preskaŭ eĉ pli ĉiutaga. Al tiu ĉiutagulo apartenis, kiel medaljono al ĉeno, kiel postmarko al letero, blanke emajlita nomtabuleto sur la pordo, kun la nomo presita per bluaĵ, grandaĉaj literoj, nomtabuleto, kiu povis konveni al komercisto, sed ne al konsulo. Kaj eble eĉ malpli al konsul-edzino. Sinjorino Fredman malsatis tiun ĉi tabuleton, kiel ege malfavore diferenca de la aliaj nomtabuloj de la domo. Ili ĉiuj estis el latuno kaj sur ili ne troviĝis antaŭnomo, sed nur familia nomo ĝuste kaj ĝuste. Tiel estis nobele. Sinjorino Fredman ofte parolis kun sia edzo pri tio, ke ili mendu alian pordtabulon, sed Fredman respondis evite. Li ŝatis la malnovan tabuleton. Li ne estis moderna snobo. Li estis simpla kaj natura homo kun antaŭ-kaj ankaŭ kun familia nomo sur blanka, simpla, emajlita ladtabuleto.

Sed kion la homoj pensos, kiuj venos ĉi tien? — ĉirsis sinjorino Fredman. — Kion ili kredos? Nur la plebo havas emajltabuleton, escepte ĉe la kuirpordo, kie ĝi taŭgas.

Fredman lasis resti la tabuleton. Kaj tiel alvenis la kristnaska tempo. Kaj iun tagon sinjorino Fredman iris en bonan fervendejon kaj mendis latuntabuleton, tian, kia ĝi devas esti, nur kun la familia nomo, nigre engravurita. Kaj ĝi estis kvarangula, ne ovala kiel la malnova blanka emajltabuleto.

Kaj tiel komenciĝas la historio.

Unu tagon antaŭ la Sankta Vespere Konsulo Fredman foriris al tagmanĝo. Konsulo havas grandajn devojn en la socia vivo. Sinjorino Fredman sidis sola hejme kaj ordigis la krist-donacojn. Kaj oni sonorigis ĉe la pordo kaj kiam sinjorino Fredman malfermis, tie staris portisto kun la nova nomtabuleto. Sinjorino Fredman malfermis la pakojn kaj sereniĝis, ĉar ĝuste tiel devas aspekti nomtabuleto. Ĝi estis precize tia, kiel la aliaj en la domo, nur pli nova kaj delikata.

— Li ricevos, kiel kristdonacon — pensis sinjorino Fredman. — Mi pagis ĝin per mia propra mono. Kaj mi surmetos jam ĉi vespere, ho jes.

Sinjorino Fredman, kiu estis agema virino, prenis ŝraŭbilon, malmuntis la malnovan tabuleton kaj surfiksas la novan. La malnovaj ŝraŭboj taŭgis precize. Sinjorino Fredman rigardis sian verkon kaj ekĝemis de ĝojo kaj malpeziĝo. Fine ŝi faris ordon ĉirkaŭ tiu ĉi malnova balaaĵo. Ĉiu homo estas sia propra anoncanto, kutimas Fredman diri kaj tial estas ankaŭ bone, ke oni havu al si indan nomtabuleton sur la pordo.

Tiel iĝis malfrue kaj sinjorino Fredman enliĝis kaj endormiĝis kun la feliĉa konscio, ke ŝi faris bonan kaj belan aferon.

Precize 14 minutojn post la dua horo nokte, konsulo Fredman alvenis hejmen. Per aŭtomobilo li venis, pagis al la ŝoforo kaj malslosis la pordegon. Poste li enpaŝis al la vestiblo, malbutonis la surtuton por spiri iom pli facile kaj ekiris sur la ŝtupojn. Li iris unu etaĝon, li iris du kaj iris tri etaĝojn. Tie li haltis, elprenis nikelslosilon kaj laŭ sia malnova kutimo li rigardis en tiu direkto, kie lia blanka emajltabulo kutimas brileti kontraŭ la mallumo. Sed tie briletis nenio. Nenia emajltabulo troviĝis tie.

— Unu etaĝon pli supren mi venis, — pensis Fredman. Tio povas okazi. Okazis jam al aliaj kaj eĉ

al mi. Oni estas iomete laca kaj distra en la nokto de tia tago.

Fredman turnis sin kaj iris malsupren unu etaĝon. Tie li haltis. Sed tie ne troviĝis blanka emajltabuleto.

— Konsiderinde — pensis Fredman kaj malbenis la dommastron, kiu ne prizorgis la noktlumigon de la ŝtuparo kaj malbenis sin mem, kiu ne havis almeton. Kaj daŭrigis la cerbumadon: — Nature mi iris unu etaĝon pli suben, anstataŭ por iri pli supren. Mi devas supreniri nun du etaĝojn.

Fredman iris du etaĝojn pli alten. Nun li estis en la kvara etaĝo. Sed tie ne troviĝis blanka emajltabulo.

Fredman apogis sin al la ŝtuparej-muro, fermis la okulojn kaj sentis, ke la koro batas iom maltrankvile.

— Estas tre strange — li pensis. — Eble mi venis en malĝustan domon. Sed mi rekonas ĉion, almenaŭ kion mi vidas. Kaj mi ne trinkis tiel multe. Mi devas konvinkiĝi pri la afero. Mi iros denove malsupren.

Fredman iris malsupren al la parteron, tra iris la vestiblon kaj elpaŝis tra la pordego. Nun li estis sur la strato.

Estis ja lia domo. Tute bone li vidis. Tie li loĝas de ses jaroj. Nenia dubo. Fredman estis preta reiri tra la pordego, kiam terura penso ekbatis lin: imagu, ke li sonĝas, ke li iras endorme, se ĉio estas nereala, kio vivas kaj moviĝas ĉirkaŭ li. Tiookaze povas esti tiel, ke ĉio konformas, escepte tute etan detalon. La tabuleto estis tia detalo. Ĝi elfalis, kiel kvadrato el filmo.

— Mi iras endorme, — pensis Fredman. — Aŭ — kaj li vere ektimis — mi jam mortis kaj mi revenadas. Povas esti, ke mi jam estas mortinto de pluraj jaroj kaj iu alia persono okupis mian loĝejon kaj pro tio ne estas tie mia malnova emajlita blanka nomtabuleto. Alia estas tie. Mi mortis kaj oni enterigis min, aliaj homoj loĝas en mia loĝejo kaj forprenis mian tabuleton.

Fredman komencis iri tute malrapide antaŭen sur la strato. Subite li renkontis policiston, veran, vivantan policiston. Fredman ricevis ideon, iris al la policisto, eklevis la ĉapelon kaj diris per la voĉo de vivanta homo:

— Pardonon, sinjoro policisto, kie estas la numero 35 en tiu ĉi strato?

— Tie — diris la policisto, — la dua domo de la angulo.

— Dankon — diris Fredman. Kaj li turnis sin, iris returne al la domo, kie li loĝis dum sia vivdaŭro kiel konsulo kaj pli frue, kiel komercisto. Singarde li malfermis la pordegon kaj enpaŝis. Ĉio estis tiel, kiel ĵus kaj en la lastaj ses jaroj. Fredman denove tra iris la vestiblon kaj iris al la unua etaĝo. Li haltis sur la plej supra ŝtupo. Tie antaŭe loĝis la kapitano kaj maldekstre la doktoro. Li konis ambaŭ. Li salutis hieraŭ matene la kapitanon. Tio estis kvazaŭ antaŭ jarcento. Kaj eble estis tiel.

Fredman iris ankoraŭ unu etaĝon. — Estas la dua etaĝo — li pensis. Tie loĝas vidvino Tabell kun sia filino. Ŝi estas postistino kaj havas ruĝajn harojn. Kaj maldekstre loĝas la direktoro. Li havas gramofonon. Ĝi estas aŭdebla al mi. Al mi, al mi! Tio estas ankoraŭ unu etaĝo. — Fredman iris al la tria etaĝo malrapide kaj tire. Meze li haltis kaj ekspiris, sed nur por momento, ke li ne konfuziĝu kaj miskalkulu la

Enciklopedio de Dioj

— Hjalmar Gallberg —

Amor (greklingve Eros), amido. Malpermesato. Foje vidita hazarde en iu kristana fistrato.

Balder, dio germana, pioniro de i paca trankvilo. Prapacifisto. Kondamno: tre longa ekzilo.

Ceres nun spertas, ke grenon ni brule oferas, dum la senpanaj najbaroj malsaton suferas.

Demos, di' de l' popol', nenaskita pro manko de forto, generita de Marx; post jarcento, mortinta (aborto).

Eternaj dioj sub G, H, kaj N sin antaŭe trovis; dioj fuĝintaj, ĉar ilin kateni ni provis.

Fortaj Fulmdioj kaj ĝojo-diinoj — ilin forpelis tiranoj kaj prudaj virinoj.

Inri, surkrucita skrib' de Golgota. Jesus el Nazaret, Reĝo de l' Judoj. (Sub J retrovota.)

Jesus, la di' krucumita, kun tuta la gento malpermesita en nia dudeka jarcento.

Kristus (signifas: sanktoleita je reĝo). «Ilin pardonu, ĉar ili ne sciis...» — jen lia preĝo.

Multaj Migrantaj gedioj troviĝis sub L, R, S, T. Dia aero nomiĝas libero. La dioj nun fuĝas nin do.

Pallas Athene, la Inteligento, Racio, jam, pro ordono, transiris al nekonata nacio.

«Quo vadis?» (Kien vi iras?) Aldi' oni faris demandon. «Al la ĉiel'. Oni diris: forlasu la landon!»

Venus, la ŝaŭmo-devena, nun vivas en granda mizero. Sin pormorala polic' hejmensendis de l' tero.

Xerxes la maron per skurĝoj forte batfendis, ĉar de mardioj la greka libero dependis.

Zeus onidire forestas. La dioj potencaj la homojn fuĝis, post unu alia. Neniu memoras la nomojn.

El la sveda: *Magda Carlsson.*

ŝtupojn. Kaj li daŭrigis kaj alvenis al la loĝejantaŭo, al sia propra loĝejantaŭo. Tie li haltis, klinis sin antaŭen kaj rigide rigardis en la mallumon. Sed la tabuleto ne troviĝis tie. Malrapide li palpis antaŭen kaj sentis sur la pordo tabuleton. Estis alia, kvarangula, ne lia malnova ovala.

— Estas finite al mi — pensis Fredman — absolute finite. — Kaj li returnis sin kaj iris malsupren sur la ŝtupoj, tra la pordego, al la strato. Komencis plui. Fredman klinis supren la surtutkolomon kaj iris trans la straton en malgrandan parkon, kiu situis meze. Tie li falis sur benkon kaj provis ordigi la pensojn de sia konfuzita cerbo.

Kiam iomete li sidis tie, li aŭdis voĉon, kiu parolis, virvoĉon. Li rigardis tien kaj konstatis, ke la voĉo venas el telefonejo. Tie staris sinjoro kaj telefonis. Gaja kaj sava ideo kaptis Fredman. Li devus telefoni hejmen, paroli kun sia edzino kaj peti sin veni mal-

supren kaj malfermi al li. Kaj tiam li iros kun ŝi. Sed ĉu li diru ĉion, kio okazis? Ne, per tio li nur ektimigus sin. Li devus diri, ke li forĝis hejme la ŝlosilon de la pordego. Estas bone tiel.

La viro en la telefonejo finis sian paroladon kaj Fredman okupis lian lokon. Li petis sian numeron, trovis efektive du monerojn, metis en la skatoleton kaj kun maltrankvilo kaj kun streĉo atendis la respondon. Fine ĝi okazis. Estis sinjorino Fredman. La konsulo ŝajnis sian voĉon tiel trankvila kaj klara kaj krome amika, kiel eblis. Li parolis pri la ŝlosilo kaj ricevis la trankviligan respondon de sia edzino:

— Tuj mi venas, Henriketo, sed mi devas ion surpreni.

Sinjorino Fredman demetis la mikrofonon kaj tuj rememoris pri la nova tabuleto. «Estus maloportune, se Henrik ricevus ĝin nun. Tio konfuzus la kristnaskan surprizon. La okazo ĝuste nun ne estas konvena. Rapide ŝi prenis la ŝraŭbilon, for la novan tabuleton kaj reen la malnovan. Cio estis farita en kelkaj minutoj, ĉar sinjorino Fredman havis manieron certan en la laboro. Poste ŝi jetis sur sin mantelon kaj kuris malsupren kaj malfermis al la viro, kiu staris tie pala kaj serioza kaj atendis antaŭ la pordego.

— Estas malagrabla Henrik, ke vi forĝis la ŝlosilon, — diris sinjorino Fredman, — vi estas tiel ordema.

— Cio povas okazi — diris Fredman.

Tiel ili iris silentaj sur la ŝtupoj. Unu etaĝo, du etaĝoj kaj tri etaĝoj. Kiam ili atingis tion, Fredman tiris la brakon de sia edzino al si, por ke li povu stari certa, se io okazus. Poste li jetis rigardon al la pordo maldekstre. Kaj jen, tie lumis la malnova, kara, blanka emajlita tabuleto, lumis bone kaj bonvenige, kiel ĝi faris tion dum ĉiuj ses jaroj.

Silente kaj senvorte paŝis konsulo Fredman en sian loĝejon kaj silente kaj senvorte li enlitiĝis. Sed li ne povis dormi. Li kuŝis maldorma kaj pensis pri la mirigaj sensacioj de la nokto. Tiel li kuŝis unu horon, kiam subite li ekmovis sin, elpaŝis el la lito kaj palpis malrapide al la antaŭĉambro. Tie li malfermis la pordon kaj nudpiede li iris al la malvarma ekstero. Kaj tie li staris silente kaj rigardis la malnovan, blankan emajltabulon. Kaj drolote li karesis ĝin per sia mano kaj flustris:

— Neniam, neniam plu vi foriru de mi.

Kiel estis poste pri la kristodnaco de sinjorino Fredman, tio estas tute alia historio.

El la sveda: *F. Szilágyi.*



E. Wiiralt:

Maljunulo kun kato (monotipo)

ŜIA ELEKTO

— Hjalmar Andersson —

Ofte en vesperoj, kiam la pluvo vipis kontraŭ la fenestroj, aŭ la neĝventego siblis, venis mia amiko — la verkisto — por forbabilu kelkajn horojn. Tiam li plej ofte rakontis fragmentojn el sia alterna vivo.

Estis tia vespero. Ni sidis en mia simpla mansardo. Ekstere torentis la pluvo kaj de tempo al tempo la vento ŝiris la arbarkronojn. Mia amiko ŝajnis maltrankvila kaj fojon post fojo li ŝanĝis la temon de l'interparolo. Mi komprenis, ke ia speciala afero okupis liajn pensojn kaj mi ricevis ateston por tio, kiam li diris:

— Pli kaj pli turmentas min la penso, ke mia nuna okupo nur estas forjeto — nenio fidinda. Sidi kaj fari librojn, ludi kun vortoj, krei novajn sublimajn vortmiksaĵojn, — ĉu tio estas laboro por juna kaj sana viro. Estas ja nur vegeti. Pli bone estas ŝvingi falĉilon tra ondanta greno, faligi arbeĝojn aŭ meti relojn.

Mi ne samopinii kun li. Pensante pri liaj literaturaj sukcesoj, mi respondis:

— Vi ignoras vian profesion. Vi verkistoj havas ne malgrandan vivtaskon. Ekzistas multaj solaj homoj en arbarkabanoj, en malproksimaj vilaĝoj, jes eĉ en la urbejoj, por kiuj viaj produktoj estas kiel lumradioj en la griza, ĉiutaga vivo. Cetere vi ja ne havas kaŭzon paroli tiel pri via metio. Por viaj libroj la kritikistoj havas nur laŭdvortojn.

Mia amiko mangestis prekaŭ moke:

— La kritikistoj! Ĉu vi akceptas ilian kompetentcon rilate al la prijuĝo de libroj? Ne, iliajn vortojn mi ne konsideras, ĉu ili estas laŭdaj ĉu mallaŭdaj. Sed mi ricevis alian kritikon, kiun mi akceptis tiel serioze, ke mi intencis forĵeti la plumon kaj min tute liberigi de tiu aĉa metio.

— Certe tiu kritikisto ne komprenis vin, mi diris. Ignoru lin kaj demandu same kiel Lichtenberg: «Kiam kapo kaj libro kolizias kaj sonas kave, ĉu la kaŭzo devas esti en la libro?»

— Tion oni povas demandi en certaj okazoj, sed ne en tiu. Mi ne scias, ĉu la kapo de tiu, kiun mi aludas, iam kolizius kun miaj libroj.

Mi komprenis, ke li ne aludis ordinaran kritikiston kaj mi diris divene:

— Temas pri virinoj, ĉu ne? Ordinaraj afero.

Post iom da silento li respondis:

— Estas tiel.

Mi ŝercis iomete pri tio, citante poemon pri viro, kiu post obstina kontraŭstaro fine estas venkita kaj kaptita de ruza belulino. Li ridetis melankolie kaj diris:

— Vi eraras. Kaptita mi ne estas, sed mi bedaŭras tion, ĉar ŝi estas ege rava. Si vere malkvietigis mian animon tiel forte, ke mi ŝin neniam forgesos. Sed vi ja nenion scias. Se vi deziras, mi rakontos de la komenco.

Lia demando estis superflua, kion li ankaŭ komprenis, ĉar li komencis, ne atendante mian respondon:

— Okazis, kiam mi loĝis en Novurbo. Mia sukcesa libro, «La lumturgardisto» ĵus aperis. La kritikistoj havis nur laŭdvortojn pri ĝi, kaj estas strange, ke ankaŭ miaj antaŭaj libroj samtempe estis konsiderataj kiel majstraĵoj. Eĉ tiuj, kiuj antaŭe nomigis senencaĵojn.

En la malgranda urbo oni ekinteresiĝis pri mia persono. Oni invitis min jen tien jen aliloken parto-

preni familiajn festojn kaj balojn. Granda domaĝo por mia verkado. Eble dum longa tempo oni atendis inspiron kaj ĝi aperas ĝuste tiun vesperon, kiam oni devas viziti komerciston G. aŭ direktoron Z. Oni ne volas esti malgentila, oni iras tien kaj provas laŭpove partopreni la senaniman babilaĉon — kaj la inspiro flugas for. Sed sufiĉe pri tio. Mi ja rakontos al vi pri mia kritikistino. Ne iun specialan el miaj libroj ŝi kritikis, sed mian profesion entute. Kaj ne nur la mian, sed ĉiujn profesiojn similajn. Ŝi estimis nur verajn korpajn laborojn.

Estis festo en inĝeniera familio. Ŝi kaj mi estis inter la gastoj. Ni renkontiĝis antaŭe ĉe similaj festoj kaj mia intereso por ŝi kreskis kaj kreskis. Fine ĝi transiris en pasian enamigon. Ĉe tiu festo mi intencis ekscii mian sorton, prikiu mi havis nur unu opinionon, Mi, malsaĝulo.

La somera nokto estis ĉarma kun brilanta lunlumo kaj pura, freŝa aero. Ni dancis kaj eliris en la balkonon por nin refreŝigi. Eble la sorĉanta lunlumo ebriigis min kaj detruis en mi ĉiujn barojn de modesteco, ĉar mi premis ŝin perforte al mi kaj asertis per toronto da vortoj, kiom mi amas ŝin. Mi petegis pri sia konsento al edziĝo kaj mi promesis fari ĉion por ŝin feliĉigi. Mi eĉ fanfaronis pri mia laboro, kiu havigis al mi sufiĉe da mono. Tre ridinde mi agis.

«Silentu, iu povas aŭskulti!» ŝi diris per tremanta voĉo kaj ŝovis min for de si. «Ni iru en la ĝardenon; tie ni povas trankvile paroli.»

Eserplene mi iris ĉe ŝia flanko en la belan ĝardenon. Mia koro batis forte kaj mi atendis streĉe la vortojn el ŝia buŝeto. Ili venis:

«Via edzino mi ne povas fariĝi,» ŝi diris serioze. «Jam antaŭ ol mi evoluis al virino, mi interne juris, neniam fari interligon kun intelekta laboristo, ĉu verkisto ĉu alia. Mi havas memorojn el mia infanaĝo, kiuj estas tiel amaraj, tiel malriĉaj je sunbriletoj, ke vi certe komprenos min, post kiam mi sciigos ilin al vi.»

Ŝi faris paŭzon kaj rigardis min. Pro mia silento ŝi daŭrigis:

«Vi certe scias, kies filino mi estas; almenaŭ vi aŭdis la nomon de mia mortinta patro.»

Mi kaptis, memorigante min pri la fama kantisto, kies portreton mi vidis en multaj gazetoj. Kaj mi diris iom distre:

«Kiam li mortis, nia lando perdis grandan viron, brillan kantiston.»

«Grandan viron, brillan kantiston,» ŝi diris moke, dum ŝiaj okuloj fulmis terure en la lunlumo. «Ne ekzistas alia grandeco ol esti nobla homo. Kion valoras, ke homo povas kanti bele aŭ skribi flue kaj inspire, se li agas malbone kontraŭ siaj kunhomoj. Vi rajtas rigardi min aĉa filino, sed mi ne povas diri belajn vortojn pri mia patro. — Demandu mian patrinon, ĉu ŝi estis feliĉa kun li; demandu, ĉu ŝi memoras, kiel ŝi laboregis — cetere, tio ne utilas. Mia patrio ne akuzas lin, neniam faris tion, neniam faros tion. Ŝi nur ploris en sia malespero. Malgraŭ tio ŝi amis lin. Kvankam li trompis ŝin, kvankam li fordrinkis sian salajron kaj lasis al ŝi zorgi por ni infanoj. Ho, kiel ŝi laboregis por teni la mizeron for de la hejmo! La vintroj estis teruraj. Niaj ĉambroj estis trablovaĵoj kaj malvarmaj, ofte ni malhavis brullignon. Mi memoras noktojn, kiam ni frostis tiel, ke ni ne povis dormi.»

Verkoj kaj verkistoj

Bellamy kaj la Bellamismo

La laboregantoj de la mondo komplikiĝis en situacio, simila al monderevolucio; sinceraj kaj bonhomaj geviroj en ĉiuj rangoj kaj klasoj, ĉagreniĝas kontraŭ sociaj cirkonstancoj, mallevantaj la vivon ĝis kruda, kruela batalo por vivo.

Edward Bellamy

26 Marto 1850—22 Majo 1898.

La nuna epoko karakterizigas per sia granda aktiveco en preskaŭ ĉiu fako; la materia progreso ĉie marŝas gigant-paŝe, febre laboras la cerboj de scienculoj, inĝenieroj, teknikistoj ktp. Inventajo sekvas inventaĵojn je preskaŭ nekredebla rapideco; novaj ideoj naskiĝas ktp., ktp.; fakto, kiun oni tulkore aklamus, se la inventintoj celus nur altajn idealojn, ni volas diri: se scienco, tekniko, arto estus uzataj por la bono de la Homaro; alivorte, se oni pensus kaj laborus nur por la prospero kaj harmonio inter la homoj.

Bedaŭrinde, speciale nuntempe la vortoj: paco, harmonio, kunlaboro, bono, amikeco, humaneco estas nur banalaj frazelementoj, kies veraj karakteroj mankas al l plej multaj homoj.

La tuta mondo montras bildon de malordo: la popoloj kontraŭbataladas unu la alian; ĉie oni konstataŭ reciproke ĵaluzon kaj konkuron. Malamo anstataŭis amon, kun la rezulto: malpaco, ĉagreno, eĉ milito.

En la nuna mondo la homo perdis la vojon, kaj nur helpe de klara lumo kaj fortaj energiaj manoj li povos esti kapabla ĝin trovi.

Ho, certe, oni diros al ni: sendube nepre necesas

ŝanĝo, pli ĝuste plibonigo, sed kiamaniere oni sukcesos rekonstrui la tutan mondon! «La registaroj, diversaj konsilantaroj jam tro multe kaj ofte diskutadis, paroladis, pripensadis pri la afero, sed plej kleraj politikistoj kaj ekonomistoj vane klopodis trovi elturnigon el la haoso. Estis ĉiam tia la situacio, kaj certe restados ankaŭ tia.» Kaj oni plue ne enprofundiĝas pri la problemo, kiu laŭ ĝenerala opinio do estas nesolvebla.

Jen nia deirpunkto: pere de paroladoj, diskutadoj, pripensadoj, la *kaŭzo* de la malbono ne estas forprenita; tiamaniere la situacio ne povos pliboniĝi. Kaj malrapide sed certe la homaro alproksimiĝas la abismon, akcelante sian rapidecon kiel la akvo de Niagara antaŭ la akvofalo: ŝtatbankroton. Tia estos la sorto de la homaro: la portanto de la plej altaj Diaj pensoj perdos sian moralon.

Ni permesis al ni tiun ĉi mallongan antaŭparolon, por konvinki la leganton pri la graveco de la situacio; ni afable petas lin, ke li atente legu la sekvantajn liniojn kaj, kvankam la sistemo, kiun ni klarigos, *ŝajnas* iom fantazia, tamen ĝi estas efektive tute simpla kaj logika. Krome, ĝia sola celo estas: la altigado de homaj felieĵoj kaj prospero.

Kiu estis Bellamy?

Edward Bellamy, kies du verkoj: «Looking backward» kaj «Equality» (Esperantlingve «Rerigardo» [el la jaro 2000] kaj «Egaleco») vekis esperon pri estonta plibonigo de la monda situacio, naskiĝis la 26-an de marto 1850 en Chicopee Falls, Massachusetts.

Kiel 18-jara junulo, vojaĝante tra Eŭropo, li jam estis dolore trafita de akraj kontrastoj, ĉie de li observitaj. Kun abomeno li konstatis, kiel kruele, nehumane la

Tian nokton mortis unu el miaj fratoj. Li estis malforta de la naskiĝo kaj la suferojn li ne eltenis.

Sed mia patro vojaĝis ĉirkaŭe en la lando kaj estis laŭdata. Kelkajn el siaj kantojn li mem verkis kaj laŭdire ili estis tiel kortuŝaj, ke ili aperigis larmojn. La aŭskultantoj adoris lin. Ili ja ne sciis, ke li tute neglektas sian suferantan familion.

En domo apud ni loĝis masonistfamilio, kaj en ĝi troviĝis infanoj, kiuj estis samaĝaj kun ni. Ni ludis kune kaj mi ne povis pretrevidi, ke ili havas pli bonan sorton ol ni. Kiam ilia patro venis hejmen de sia laboro, kun ŝprucmakuloj de mortero sur la vestoj kaj en la lipharoj, ili saltis gaje ĉirkaŭ li kaj li frapetis ilin per siaj grandaj manoj kaj aspektis felica. Mi staris rigardante kaj pensis pri mia patro. Jaluzo ne estas bela eco kaj ankaŭ ne malamo, sed mi devas konfesi, ke mi jaluzis kontraŭ la bonvestitaj, gajaj masonistinfanoj kaj malamis mian patron. Kial mia patro ne fariĝis masonisto, ĉarpentisto aŭ io simila? mi demandis silente en tiaj okazoj.

Kion mi rakontis, tio ne estas bela: oni ne devas paroli malbone pri mortinto kaj precipe ne pri sia propra patro, sed kiam tiu vivas fivivon en drinkaĵoj kaj kun publikulinoj, dum lia familio suferas, tiam vi devas kompreni, ke tia patro ricevas tian filinon.

Si estis parolinta kun stranga vortofluo kaj nun ŝi silentis. Mi komprenis, ke ne restis plu por diri kaj mi serĉis vortojn konvenajn por la situacio. Mi diris:

«Cu vi do kredas, ke mi kiel edzo fariĝos simila al via patro; ke ankaŭ nia edziĝo fariĝos malfeliĉa?»

«Eble jes, eble ne. Sed, kiel mi jam diris, mi juris, neniam edziĝi kun viro, kiu ne estas korpa laboristo. Cetere, mi jam faris mian elekton.»

Estis, kvazaŭ forta bato trafus min. Kial ŝi ne tuĝ

diris tion? Nevole mi diris en la aeron:

«Kiu estas la felieĵulo?»

«Li estas staplisto en la seĝejo ekster la urbo», ŝi diris kaj ekrigardis maltrankvile sian horloĝon. Mi povas aserti, ke li estas bela, forta knabo. Nun mi devas foriri, ĉar li venos baldaŭ.»

Mi staris kiel fiksa en la tero. Si ne iris multajn paŝojn, kiam altstatura junulo renkontis kaj ĉirkaŭbrakis ŝin. Kiel statuo mi staris en la lumino, forlasita, sen la plej eta ŝanco. Mia literatura laboro kaj konata nomo ne valoris. Li estis staplisto, viro el la granda armeo de la korpaj laboristoj, kaj ŝi preferis lin, ne nur pro la amo, sed ankaŭ pro la honesta metio.

Senigi mi, la aŭtodidakto, memoris la tempon, kiam ankaŭ mi portis pezajn tabulsarĝojn sur miaj ŝultroj aŭ hakis trunkojn en la arbaroj. Tiumtempe mi volis min liberigi de tiuspeca laboro. Mi volis fariĝi intelektulo kaj mi sukcesis. Nun mi sopiras ree al la arbaroj, kie oni devas streĉi la muskolojn en la batalo por la pano. Sed mi timas, ke mi ne plu taigas por tio. La plumo ne estas ilo, kiu kreas muskolojn, ĝi kreas nur malgrasajn, tremantajn manojn...

Li finis kaj starigis. Baldaŭ li adiaŭis, surmetis sian larĝgrandan ĉapelon kaj eliris. Li estis neordinare deprimita tian-vespere. Sed, se mi bone konas lin, li denove ekprenos sian plumon kaj skribos kiel neniam antaŭe. Tiaj estas la verkistoj entute. Post lia foriro mi staris kelkajn minutojn ĉe la fenestro kaj rigardis en la malluman, pluvan nokton. Kelkaj homoj iris tie malsupre sur la strato, ĉiu al sia celo. Mi provis diveni ilian metion: — tajloro — inĝeniero — lavistino — staplisto — komercisto — aktoro. — Stranga miksaĵo, el kiu nia socio konsistas kaj devas konsisti.

homoj agas reciproke al siaj proksimumoj. La malbonaj vivcirconstancoj de multaj homoj faris al li profundan impreson. En la sekvantaj dudek jaroj, Bellamy studadis la diversajn socialajn problemojn. En tiu tempo, kiam lia ĵurnalista laboro altiris atenton, eldonigis lia rimarkinda verko: »Dr. Heidenhoff's Process»; poste li verkis »Miss Ludington's Sister».

Tamen ne pro ĉi tiuj verkoj Bellamy famigis; li studadis la socialajn problemojn, kaj ties rezulto estis la verko »Looking backward». Post dek jaroj de seninterrompa studado li aperigis la tre detale klarigantan libron »Equality», kiun oni rigardu kiel la vivcelan laboron de nia genia aŭtoro kaj ekonomisto.

Kion celis Bellamy?

Jen konciza enhavo de liaj verkoj.

En »Looking backward», la aŭtoro vekas la heroon de sia rakonto post centjara dormado — kaj miaopinie tute prave — por ke tiu ririgardu el la jaro 2000 al nia hodiaŭa socio. Julio West, tiel nomiĝas la junulo, do povas kompari la ŝtaton, en kiu li vivis ĝis tiam kun tiu en kiu li vekigis.

Cirkaŭrigardante en la nova ŝtato, vere, lia miro kaj admiro estas senlimaj. Ĉie li vidas ŝanĝojn, pli ĝuste ŝajnas al li, ke ĉio tute metamorfosis. Ĉu sonĝo, ĉu nova mondo? kiel oni alimaniere povus prezenti tion? Senŝerare, perfekte, kiel la radaro de maŝino, la diversaj eroj harmonie interfunkcias kaj glate iras la motoro. La forte surprizita Julio West renkontas nur feliĉajn, gajajn homojn kaj — ho teruro de la nuna epoko — li nenie vidas akrajn kontrastojn: nek milionulon apud mizera almuzulo; nek riĉegan komerciston apud malfeliĉa senlaborulo. En la nova perfekta ŝtato ekzistas nek rangoj, nek klasoj; troviĝas nek abunda riĉeco, nek dolorplena mizero.

La sistemo, detale ellaborita de la klera ekonomisto Bellamy kaj prezentita de li al la mondo, entenas: »egal-eccon por ĉiuj en ekonomia senco.» Sendube tiu ĉi doktrino ŝajnas tro bela por esti vera kaj ĝian efektivigon oni konsideras tute neebla. Tamen, ni petas vin, ke vi ne senpripen- se prijuĝu la sistemon, sed legu kaj relegu antaŭe, sen antaŭjuĝo, la du librojn.

Ĉu ne estas okulfrappe, ke la aŭtoro en la jaro 1888 jam menciis nuntempo efektivigintaj inventaĵojn? Ekz. la radion kaj ĉe tre perfektigitan, kian ankoraŭ ne spertas nia epoko! Utopioj, nur utopioj, oni nomis tiajn ideojn *tiutempe*. Kompreneble! Sed ni, homoj de tiu ĉi jarcento, scias, kaj povas konstati, ke ili ne estas utopioj. Nu, kial ne povas realiĝi ankaŭ la aliaj profetaĵoj de Bellamy!

Ĉiu, leginte la du librojn, certe ekĝemos: »ho, se vi nur povus vivi en tiu mondo de paco, harmonio kaj feliĉo.» Tio estas ebla, vere, se ĉiuj homoj interharmonie kunlaboros; se la diversaj popoloj kaj rasoj, trans landlimoj kaj maroj, reciproke manprenos kiel gefratoj.

Serioze leginte, oni certe komprenos, ke la perfekta ŝtato ne efektivigis, se oni antaŭe ne estus forpreninta *la kaŭzon* de la malbono. Kaj kio estis la kaŭzo? Estas nur unu respondo pri tiu ĉi demando: *la mono*, pli bone dirite: la senpersoneco de la mono en manoj de arbitraj personoj.

Ho, ni tre bone konscias pri tio, ke nia aserto, *je la unua vido*, kontentigos preskaŭ neniu. Ĉu vere! Ĉu la mono, tiu potenco aĵo kontraŭ mizeroj, povus esti la kaŭzo de la haosa, malfeliĉa ŝtato, kiun vidigas la nuna mondo? Absurde!

Tamen, pririgardinte kaj konsiderinte la aferon, post honesta kritiko, oni sendube konkludos, ke ni estas pravaj, ĉar la mono, kiel interŝanĝaĵo, vekas la malnoblajn instinktojn: egoismon, ĵaluzon, malamon.

Sed, oni demandus — kaj ankaŭ Julio West faris tion — se ne ekzistas mono, kiamaniere oni povas funkcigi la komercon, la bankojn, ktp.!

La aŭtoro genie respondis en »Equality»: la Bellamy sistemo tute eliminas ĉiun ideon pri gajno kun ĝiaj sekvoj: konkuro, ĵaluzo ktp. Kiel la nomo »Equality» klare esprimas: ĉiuj, senescepte, ekonomie havas la samajn rajtojn. B. diris: »ŝtato, al kies bonfarto eĉ unu persono

ne partoprenas, ne estas bonfarta». Koncize: »komuna produktado sub ŝtata administrado, aliflanke egalrajta disdonado».

Do ĉiu eivitano, kia ajn estas lia profesio, estas ŝtata oficisto. La nova ŝtato devigas ĉiujn labori: certe neniu protestos kontraŭ tia devo, ĉar laboro preskaŭ ĉiam feliĉigas la homon. Ho, kiel volonte la milionoj de senlaboruloj submetus sin al *tiu devigo!* Krome, estas juste, ke oni, postulante egalan parton el la produktado, ankaŭ faru egalan laboron.

Anstataŭ mono kiel interŝanĝaĵo, Bellamy elpensis genian rimedon: slipo-sistemo. Kalkulĉambro kalkulas ĉies parton en la tuta produktado. Ĉiu partoprenanto de la produktado, laboranta ĉu ĉe la administrado, ĉu alimetoj, akiras priidentecan slipon kun numero, nomo, foto kaj subskribo kune kun certa kvanto da nepre private uzotaj sigeloj, kiujn oni devas transdoni kiel kvitancon por ricevita parto de sia individua porcio. Por ĉiu donita sigel-libreto oni iel laboras la slipon ĝis tuta konsumo de la valoro. Se necesas, certa sumo da ili restas rezervita, por la eventualaj okazoj, se iu elsespus sian tutan sumon en tro mallonga tempo, ekz. pro lukso aŭ troa amuzo, senzorge pri la komuna bezono. La gepatroj ricevas, okaze de ĉiu infanaskigo, slipon por la infano, ĉar ankaŭ tiu ĉi iam aniĝos al la laborŝtato.

De infano ĝis homo.

Ĉiu infano vizitas la lernejon ekde la sepa aŭ oka jaro ĝis la deknaŭa. Dum la lastaj jaroj la instruo tamen estas individua, t. e. laŭ la talento pri prope elektita fako aŭ metio, kompreneble ĉi tio rilatas al kapableco kaj aspirioj.

Estas deviga la ĝenerala servado por ĉiuj geknaboj senescepte, de la 19-a ĝis la 21-a jaroj; en tiu tempo ili devas helpi en restoracioj, hoteloj, mastrumadoj, malsanulejoj, ktp. Tiamaniere ili konatigas kun la reala, praktika vivo. Havante 21 jarojn, oni komencas plenumi la veran oficon. Laŭ proporcio de la kapableco oni povas atingi pli altajn funkciojn. La ekonomia egaleco garantias kontraŭ ĉia korupto. Tiamaniere la plej noblaj kaj estimataj homoj okupiĝas pri la plej gravaj funkcioj.

Post la 45-a jaro oni estas liberigita de ĉiuj labordevo; tiam fakte komenciĝas la pensiva vivo, kvankam oni almenaŭ dum dek jaroj restas rezervulo, disponebla je la socio, por ke la ŝtatamaŝino, ankaŭ dum neatenditaj akcidentoj, regule funkcii.

Jen tre koncize la Bellamy sistemo, kiu meritas la plej altan atenton.

La homo egoismo.

»La homo denature estas egoisma; sekve tiu ĉi mal- virto forte instigos lin, protesti kontraŭ la starigo de la supremencia ŝtato», oni diras. Precipe la riĉuloj, kiuj identigas la monon kun la potenco, kaj sekve de tio pasie defendas sian trezoron. Tamen ili interkonsentos kun la ideoj de Bellamy, se temos pri la sorto de milionoj da proksimumoj, kiujn minacas mortmalsato.

La Internacia Unio »Bellamy» detenas sin de ĉiuj politikaj principoj. La anoj laboras nur por la disvastigo de la ideoj de Bellamy, formante kernon da pioniroj en nova homa kulturo.

Resumo.

La tero donas sufiĉe, eĉ abunde.

Ankaŭ la teknika produktokapablo sufiĉas, pli ĝuste: ĝi estas senlima.

Se ĉio kaj ĉiu laborus, la produktado estus pli granda ol necesas por la ĝenerala materia bonstato.

Socio ne povas esti prospera, se ne ĉiu partoprenas en tiu ĉi prospero.

La rimedoj, por akiri la bonstaton de la popolo, devas troviĝi en la manoj de la koncerna registaro. Privatuloj povus ilin uzi, subigante alies interesojn al siaj propraj avantaĝoj. Kaj la historio pruvas, ke tio estas ne- respondata.

Leopard-dresisto rakontas

— Jack London —

Li havis reveman, mondforan rigardon en siaj okuloj, kaj lia virguline gentila, insista, kaj samtempe malgaja voĉo ŝajnis esti serena enkorpiĝo kaj profunde loĝanta melankolio. Li estis leopard-dresisto, kvankam li ne aspektis tiel. Por akiri siajn vivrimedojn li aperadis en kaĝo kun ludantaj leopardoj, antaŭ grandaj popolamasoj, kaj montradis bravaĵojn, por kiuj liaj mastroj lin rekomencis laŭ skalo dependa de la animvibriga efekte, kiun li produktis.

Kiel mi diris, li ne aspektis tia. Li estis mallarg-koksa, mallarg-sultra kaj anemia: sed ŝajnis, ke ne malĝojo lin tiel subpremis, sed ia dolca kaj gentila malĝajeco, kies ŝarĝon egalanime kaj gentile li portadis. Dum tuta horo mi penis eligi de li rakonton, sed al li ŝajnis manki la necesa imag-kapablo. Por li lia grandioza kariero enhavis nenion romantikan, nek kuragan, nek animvibrigan — nenion krom griza sameco kaj senfina tedeco.

Leonoj? Ho, jes! li batalis kun ili. Tio estas nenio. Oni devas nur resti sobra. Ciu ajn povas tradraŝi leonon, por ordinara bastono. Foje li batalis kun leono dum duonhoron. Li nur frapis al ĝi sur la nazon, kiam la besto atakis, kaj kiam ĝi ruze atakis kun sia kapo malsupre, nu, estis necese nur elteni la kruron. Kiam ĝi volas kapti la kruron, oni retiras ĝin kaj ree frapas al la besto sur la nazon. Jen ĉio!

Kun la mondfora rigardo en siaj okuloj kaj kun sia vekiginta vorto-fluo, li montris al mi siajn cikatrojn. Tiaj estis multaj, kaj unu fresdata: tigrino, grintinte lian ŝultron, atingis ĝis la ostoj. Mi povis vidi la lerte fiklitajn ŝiraĵojn en la vesto, kiun li portis. Lia dekstra mano, de la kubuto ĝis la malsupro, aspektis, kvazaŭ ĝi estus pasinta tra draŝmaŝino, tiel ĝi estis difektita per ungegoj kaj dentegoj. Sed tio estas nenio, li diris, nur dum pluva vetero ĝenas lin iomete la malnovaj vundoj.

Subite lia vizaĝo heliĝis pro rememoraĵo, ĉar, efektive, li estis tiel dezirema doni al mi rakonton, kiel mi estis aŭdema.

«Mi supozas, ke vi aŭdis pri la leon-dresisto, kiun alia homo malamis?» li demandis.

Li paŭzis kaj empense rigardis malsanan leonon en la kontraŭe staranta kaĝo. Ĝi havas dentdoloron, li klarigis. «Nu, la leon-dresisto ĉiam finis sian spektaklon per tio, ke li metis sian kapon en la buŝegon de leono. La homo, kiu malamis lin, ĉeestis ĉiun spektaklon, esperante ke li iam vidos la leonon ekmordi la kapon. Li sekvis la ludistaron tra la lando. Jaroj forpasis kaj li maljuniĝis. Kaj fine, sidante en fronta seĝo, li vidis, kion li atendis. La leono ekmordis, kaj ne estis necese volki kuraciston.»

La leopard-dresisto ekrigardis siajn manungojn en maniero, kiu estus kritikinda, se ĝi ne estus tiel malgaja.

«Nu, jen kion mi nomas paciencon,» li daŭrigis, «kaj tia estus mia metodo. Sed ĝi ne estis la metodo

de iu, kiun mi konis. Li estis eta, maldika, glav-glutanta kaj jonglanta franco. De Ville li sin nomis, kaj li havis ravan edzinon. Si estis trapez-artistino kaj saltegis de sub la tegmento en la reton, belege sin turnante en la aĉro.»

«De Ville havis rapidageman karakteron, tiel rapidan kiel liaj manoj, kaj liaj manoj estis tiel rapidaj kiel tigra piedego. Foje, ĉar la ringo-mastro nomis lin ran-manganto¹⁾, aŭ io simila, eble eĉ pli malbona, li ŝovis lin kontraŭ la molan, pinarban scenej-fonon, kiun li kutime uzis ĉe sia ponard-ĵetado — tiom rapide, ke la ringo-mastro eĉ ne havis tempon por pensi — kaj tie, antaŭ la publiko, de Ville bruligis la aeron per siaj ponardoj, enigante ilin en la lignon ĉirkaŭ la ringo-mastro; tiel apude, ke ili trapenetris ties vestaĵojn kaj granda nombro da ili eĉ pikigis en lian haŭton.»

«La arlekenoj devis eligi la ponardojn por lin liberigi, ĉar li estis kvazaŭ alpinglita. Tio decidigis la homojn sin gardi kontraŭ de Ville, kaj neniu kuraĝis esti pli ol nur gentila al lia edzino. Si estis ruza koketulo, sed ĉiuj timis de Ville.»

«Tamen, estis iu, Wallace, kiu timis nenion. Li estis leon-dresisto, kaj ankaŭ li metadis sian kapon en la buŝegon de leono. Li enmetus ĝin en la buŝegon de iu ajn el ili, kvankam li preferis *Augustus*, grandan, bonhumoran beston, kiu estis ĉiam fidinda.»

«Kiel mi diris, Wallace — reĝo Wallace ni nomis lin — timis nenion vivantan kaj mortintan. Li estis, sen ia dubo, vera reĝo. Mi vidis lin ebria, kiam pro veto li eniris kaĝon de furiozigitaj leonoj, kaj sen bastono tradraŝis ĝin. Nur per sia pugno sur ĝian nazon.»

«Sinjorino de Ville...»

(Je ekbruo, kiu aŭdigis malantaŭ ni, la leopard-dresisto malvarmsange sin turnis. Ĝi estis dividita kaĝo, kaj mano de ludanta simio estis kaptita de granda, griza lupoj, kiu penis perforte ĝin eltiri. La brako ŝajnis elteni ĝin pli kaj pli longe, kiel dika elastaĵo, kaj la kunularo de la kompatinda simio faris grandan bruon. Neniu zorganto ĉeestis, tial la leopard-dresisto alproksimiĝis kelkajn paŝojn, akre ekfrapis la lupon sur la nazon per la peza kanbastono, kiun li portis, kaj returnis sin kun malgaja, pardon-peta rideto por rekomenci sian nefinitan rakonton, kvazaŭ neniam interrompo estus okazinta.)

«... rigardis reĝon Wallace kaj reĝo Wallace rigardis ŝin; vidante tion de Ville ĉagreniĝis kaj lia vizaĝo eknigris. Ni avertis la reĝon, sed vane; li nur priridis nin, ankaŭ li ridis pri de Ville kaj kiam tiu volis batali, li ŝovis lian kapon en sitelon plenigitan per pasto.

«De Ville aspektis ridinde — mi helpis pur-

¹⁾ Laŭ usona slango la francoj estas nomataj ran-mangantoj. (Trad.)

Bonstato estas akirebla nur per laboro. La socio havas la rajton uzi la laborenergion de ĉiuj anoj.

La registaro apliku tiun ĉi energion por la bono de la popolo.

* * *

Ni sincere esperas, ke, per la supremencŭitaj linioj, la leganto iom interesiĝos pri la Bellamy sistemo. Estas

nia opinie laŭdinda fakto, ke la aŭtoro tiel akre lumigis la nuntempajn cirkonstancojn, kaj ĝoje ni konstatas, ke preskaŭ ĉie la voĉo de la Bellamyanoj aŭdiĝas nun, ĉar la tuta mondo nepre bezonas plibonigon.

Sonu tiu ĉi voĉo ĉiam pli laŭte, kaj iom post iom ĝi resonu en la homaj koroj. La Bellamy penso elpuŝu ĉiun alian malpli noblan penson.

M. van Orden.

SENKULPECO

— H. E. Bates —

La infano jam forvadis el la sekureco de la patrina terpomgardeno. La posttagmezo estis silenta senfino de briletanta varmo, sed en la kampo trans la ĝardeno la juna herbo komencis reverdiĝi post la fojnrinkolto, tiel ke ĝi faris freskoloran razenon mezo de sekaspekta julia ĉirkaŭaĵo.

Super la ebena verda vizaĝo de la kampo sin movis nenio krom la flagretantaj papilioj vibrantaj en la sunlumo, etaĵoj kun koloroj de turkiso kaj citrono, de testudaĵoj kaj eburo. La infano ilin rigardadis kun apatia intereso, liaj okuloj ilin vane ĉasadis. Foje li demetis sian larĝan blankan sunĉapelon, kaj tenis ĝin kaptopreta, sed ĝia ombro apenaŭ falis sur la herbon, jam montrigis moka ekflagro de flava brileco malproksime for inter la terpomfloroj. Malvigle li remetis la ĉapelon kaj antaŭeniris seriozmiene tra la kampo, kun manoj profundigintaj en la poŝoj de lia eta pantalono. La sunĉapelo, tro granda por li, donis al li la aspekton de malgranda maljunulo marŝanta profundmedite tra vasta bulludejo. Ŝajnis, ke la papilioj ne plu interesas lin. Estis al li tro varme ilin eĉ observi.

Ce la fino de la kampo staris domo, kiun duone kaŝis arbaro de senfloraj siringoj kaj malhelaj laŭroĵoj kaj netranĉitaj fruktarboj. La senkolorigintaj flavaj markezoj de la domo estis malfermitaj pro la suno, kaj la pordoj staris fermitaj, kun farbo vezikigita, kio ĉio donis al la domo forlasitan aspekton. La ĝardeno estis dezerto de arboj kaj eĝlanterioj, senordaj alceoj kun palaj rozkoloraj butonoj, kiuj ĝuste tiam malfaldigis; sangbrilaj papavoj sin semintaj milope ĉirkaŭ

la florbedoj kaj la vojetoj kaj sur la pordsojlo mem. La atmosfero ŝajnis dormemiga pro la papavodoro. La brilaj skarlataj florkapoj flamis kvazaŭ dangersignaloj.

Proksimigante al la domo, la infano marŝis kun stranga indiferenteco. Jen li strabe rigardis ion eĉ la plej fora horizonto, jen ŝajnis, ke li atentegis serĉas ion sur la herbo aŭ en la ĉielo. Estis, kvazaŭ la domo tute ne ekzistus. La infano marŝis al ĝi kun mieno de serena kaj sencela senkulpeco.

Tamen tiu senkulpeco estis suspektinda, ĉar li marŝis, laŭ rekta linio, al loko, kie la ĝardenpalisaro estis rompita, kio lasis breĉon sufiĉe grandan por ebligi al humdo sin trapaŝi sub la ŝirmo de la siringoj kaj la laŭroĵoj. Dum li alproksimiĝis al la breĉo, lia senkulpa mieno iĝis pli anĝeleca. Li sin klinis por deŝiri blankan floron de trifolio. Li malvigle flaris ĝin, deŝiris duan kaj ankaŭ tiun flaris. Li ĉirkaŭvagadis laŭ belaj cirkloj sur la herbo, ŝajnigante serĉadi. Dum la tuta tempo liaj okuloj estis direktitaj sur la domon, malvirte kaŝemaj, sopreme viglaj.

Iom poste li dormeme flankenveturis al la breĉo. En sia dormemo li ŝajnis ne nur senkulpa, sed ankaŭ blinda. Tamen liaj okuloj per unu rapida ekrigardo konstatis la sendangeran senhomecon de la kampo malantaŭe kaj la ĝardeno antaŭe.

Subite li malaperis tra la hego kun ekbrilo de blanko, kvazaŭ kuniklo. Li rampis tra la arbaro kaj la eĝlanterioj kaj fine elĝis en plenan sunlumon, palpebrumante kvazaŭ viro elpaŝinta el malluma ĝangalo.

Tie li ŝanceliĝe rektiĝis kaj haltis. Liaj okuloj ne

skrapi lin; sed li kondutis malvarmete kiel kukumo¹⁾ kaj tute ne minacis. Sed mi vidis ekbrilon en liaj okuloj, tian kiam mi ofte vidis en la okuloj de sovaĝaj bestoj, kaj mi tre serioze avertis Wallace-on. Li ekridis, sed de tiam ne tiom ofte li rigardis en la direkto de s-ino de Ville.

»Kelkaj monatoj forpasis. Nenio okazis, kaj mi komencis pensi, ke mia timo estas tute senbaza. Ni estis tiam en okcidento, ludante en Frisko.²⁾ Ĝi okazis dum la posttagmeza spektaklo, kaj la granda tendo estis plenplena de virinoj kaj infanoj. Mi serĉis 'Rugan Denny', la ĉef-kanvas-aranganton, kiu malaperis kurr mia poŝtranĉilo.

»Pasante preter unu el la vestiĝ-tendoj, mi enrigardis tra la truon en la kanvaso por vidi, ĉu mi povus lin trovi. Li ne estis tie, sed ĝuste antaŭ mi staris, Reĝo Wallace', trikot-vestita, atendante sian vicon por eniri la kaĝon kun ludantaj leonoj. Kun granda amuzo li observis disputon inter du trapez-artistoj. Ĉiuj aliaj, kiuj estis en tiu tendo, regalis sin per la disputo — kun escepto de de Ville, kiun mi rimarkis rigardi la 'reĝon' fikse kaj kun nekaŝita malamo. Wallace kaj la aliaj estis tro okupitaj per la disputo, por ke ili povu rimarki tion, kio sekvis.

»Sed mi vidis ĝin tra la truon en la kanvaso. De Ville tiris sian naztukon el sia poŝo, faris movon, kvazaŭ forviŝante per ĝi la ŝviton de sia vizaĝo (estis varm-ega tago), kaj samtempe preterpasis la dorson de Wallace. Li ne haltis, sed, flirtigante la naztukon, iris

antaŭen al la enirejo, kie, elirante, li turnis sian kapon kaj jetis fiksan rigardon posten. La rigardo ĝenis min tiam, ĉar mi vidis en ĝi ne nur malamon, sed ankaŭ ian senton de triumfo.

»De Ville meritas observadon, mi pensis, kaj efektive mi spiris pli facile, kiam mi vidis lin eliri kaj envagioni en tramon veturantan al la malsupra urbo. Kelkajn minutojn poste mi estis en la granda tendo, kie mi trovis 'Rugan Denny'.

»Reĝo Wallace' plenumadis sian taskon, kaj la rigardantaro estis ensorĉita. Li estis en escepte sovaĝa animstato, kaj incitis la leonojn ĝis tia grado, ke ili murmuregis — t. e., ĉiuj, kun escepto de la maljuna Augustus, kiu estis tro grasa kaj mallaborema kaj maljuna, por ke io lin incitu. Fine Wallace kraketis per sia vipo kaj envicigis la maljunan Augustus. La besto bonanime palpebrumis, malfermis sian buŝegon kaj la kapo de Wallace eniris. Tuj la makzeloj de la leono kuniĝis, laŭtmaĉe, ĝuste tiel.»

La leopard-dresisto ekridetis, dolĉe kaj enpense, kaj en liaj okuloj montrigis la mondfora rigardo.

»Kaj tia estis la fino de 'Reĝo Wallace', li daŭrigis per sia malgaja, mallaŭta voĉo.

»Post kiam la ekscito trankviliĝis, mi trovis eblecon, kaj, kliniĝinte, ekflaris la kapon de Wallace. Tuj mi ekternis.»

»Ĝi... estis...?« mi demandis esplore, kun streĉita avido en mia voĉo.

»Flartabako, kiun de Ville ŝutis sur liajn harojn en la vestiĝ-tendo. La maljuna Augustus neniam intencis fari tion. Li nur ternis.»

1) Usona slango — ĉar kukumo posedas malvarmigan efikon (Trad.)

2) Mallongigo de San Francisko.

El la angla: *Georgo Smille.*

plu tenis sian aspekton de suspektige angeleca senkulpeco. Ili pleniĝis de singardemo kaj miro, de kulpeco kaj plezuro. Ili rigardadis kun nova, neflankengiganta intenseco.

Antaŭ la infano etendis sin frambarbetejo, vico post vico da verda kaj ruĝa frandajoj. Ilin vidante, li nenion alian volis rigardi. Li ŝajnis momente paralizita de la ruĝa ŝarĝo de la altaj dikaj trunketoj. Hejme, flank-al-flanke kun la terpomoj, ankaŭ lia patrino kulturis frambojn, maturajn, densajn, belegajn, kiel ĉi tiuj.

Al la infano, tamen, la framboj kreskigitaj de lia patrino subite ŝajnis malestimindaj. Krome ŝi timiĝe malpermesis pli frandaj ol iam povus esti tiuj de lia patrino, kaj lian buŝon turmentis la subita konscio pri la forta aromo de la fruktoj kaj la folioj sub la varma suno.

Li deŝiris frambon. Ĝi rapide degelis en lia buŝo, kvazaŭ neĝo. Iam vasta fiŝreto kovris la arbetaron, sed la fostoj forputriĝis kaj la reto falis senutile implikita inter la frambujojn. Staris nenia baro kontraŭ lia progreso en senfinajn frambaleojn. Unue li marŝis kaŝeme, haltadante por aŭskulti, sed la ĝardeno estis silenta, sendanĝera, senhoma. Sin movis nenio krom li, kaj poste li ekmarŝis pli sentime, senĝene susurigante la foliojn per siaj rapidmovaj membroj.

Senĉese li mangadis. Kvazaŭ li konkursus kontraŭ la tempo aŭ la lumo. Unue li glutis unuopajn berojn, kvazaŭ grandajn ruĝajn fingringojn plenajn de sango. Tedite ĝuste de ilia belegeco, li kolektis malpli grandajn, pli maldolĉajn fruktojn kaj ilin manĝis per manplenoj, rejetante sian kapon kaj karmezinigante siajn lipojn.

Alvenis momento, en kiu la gusto de eĉ la plej belaj fruktoj ekŝajnis strange seninteresa. Li paŭzis, profunde spirgemis, kaj lekis la lipojn, ebrigiĝita de la fruktoj. Li ekpensis deprimi sian ĉapelon.

Li komencis marŝi tien kaj reen laŭlonge de la aleoj, ĝin plenigante. Ankoraŭ nenia sono aŭ movo evidentigis en la ĝardeno, krom lia propra ĉirkaŭserĉado inter la folioj. La suko de multaj framboj ekmakulis la blankecon de lia sunĉapelo. Li tion ne rimarkis. Li estis ebria de malpermesita feliĉego.

Subite li atingis la aleo-finon, kaj tie li eklevis la rigardon. Antaŭ li etendiĝis vasta razeno, senhoma kaj papavtapiŝita. Li ĝin rigardis kun la aŭdaca indiferenteco de senkonsidera memfido. Li deŝiris frambon kaj ĝin manĝis kun laŭta kaj senĝena lipŝmako, kvazaŭ por spiti la lastan danĝeron de la loko.

Li sin turnis por preni plian frukton kaj ekhaltis.

Pala objekto, kvazaŭ minaca vizio, aperis super la frambarbetoj malantaŭ li. Ĝi estis pajloĉapelo. Dum unu sekundo li ĝin rigardis kun kapturniĝo kaj miro. Ĝi moviĝis. Lia koro eksaltis. En la posta sekundo la pajloĉapelo rapide alproksimiĝis al li kun plenvoĉaj kolerkrioj —

«Diable, mi vin senhauĝigos!»

La infano fuĝis. Li sin ĵetis laŭ frambaleo kun senbrida teruro en la koro, gratigante dum sia blinda kurado. Dum la tuta tempo li konsciis, ke lin persekutis la pajloĉapelo. Lin teruris krioj de kolero kaj minacoj pri nemigo. Li stumblis, lasis fali sian ĉapelon, ne kuraĝis halti por ĝin repreni.

Sur la kampo li paŭzis dum ankora momento por regajni la spiron. Malantaŭ li muĝo de kolero ĵetiĝis al li el inter la framboj, kvazaŭ kanon-kuglo. Retro-rigardante li vidis, ke oni prenas de sur la tero lian blankan sunĉapelon kaj ĝin kolere svingas. Li fuĝis tra la kampo kun timegoplena rapideco.

La voĉo de la viro lin sekvis. Retro-rigardi li jam ne plu kuraĝis. Li kuradis kun senĉesa malespero, ĝis li povis halti denove sekura malantaŭ la palisaro de sia patrino. Sed eĉ tie li ne povis resti. Li estis tremanta, ellacigita. Finfine tamen li profunde enspiris kaj kun granda peno ekvagiis ŝajndiferente tra la terpomoj kaj apud la framboj al la domo, penante rigardi angelmiene la ĉielon.

Okazis ke samtempe, kiam li eligis el malantaŭ la tramarbetaro de sia patrino, ĉi tiu mem elvenis el la domo. Si estis vasta, fortega virino kun klabsimilaj brakoj kaj kun malhela suspektema elrigardo.

Vidante ŝin, li haltis. La halto estis fatala. Ŝi tuj alproksimiĝis al li. En tiu momento li rememoris ĉiujn avertojn, kiujn ŝi donis al li pri la framboj. Kiomfoje ŝi jam avertis lin, ke, se li metos sur ilin ŝeĉ unu, fingron, ŝi lin senhauĝigos. Ŝi alproksimiĝis same neeviteble kiel la pajloĉapelo en la alia ĝardeno. Li vane tordigis por liberiĝi, ĉi tiuj fojoj li ne povis sin savi. Li freneze signis sian senkulpecon.

»Mi instruos al vi!« ŝi kriis.

»Mi ne, ja mi ne!« li plorgemis.

»Rigardu nur vian buŝon!« ŝi kriis.

Ŝi kaptis lin senindulge. Lia kulpeco tiel evidentis sur liaj lipoj, ke ŝi lin batadis, dum ŝia brako suprenmalsupren moviĝis kiel draŝilo.

La infano, kriegante sian senkulpecon pri krimo kiun li ne faris, malĝaje rimarkis trans la kampo proksimigantan figuron.

Per blanka ĉapelo ĝi signalis terurajn minacojn.

El la angla: *Alec Venture.*



E. Wieralt:

Infankapoj
(krajono)

DE LANDO AL LANDO

DE ATLANTIS ĜIS AMERIKO

Nuntempe jam estas generale konata fakto, ke ne Kristoforo Kolumbo estis la unua, kiu subordiĝis en Ameriko. Nature, tio ne signifas senlorigon de Kolumbo, kies graveco homa kaj historia estas en tio, ke li estas la unua granda reprezentanto de la moderna homtipo. Tiu tipo modernhome serĉadas, esploras kaj songas pri misteraj interrilatoj, pri kiuj hieraŭ oni eble nur ridis, sed el kiuj ekkreskas la grandaj realaĵoj de la estonteco.

Jam Platono mencias la nomon de insulŝtato, *Atlantis* (eble ĉe la okcidenta bordo de Afriko), kiu dum eksterordinare teruraj tertremoj kaj inundoj absolute malaperis de sur la tero. Jen la komenco de longa diskuto, kiu daŭras jam de jarmiloj. Sciencistoj kaj fantaziuloj traktadas pri la legenda tero. Neniu neas, ke ĝi ekzistis, sed neniu povas diri, kie ĝi estis. La priskribo de Platono ne estas tro zorgema (li montras sin ĉi-koncerne praavo de la moderna ĵurnalistoj), sed ni vidas, malantaŭ la vualo de jarmiloj insulojn, trans kiuj estas aliaj insuloj kaj malantaŭ tiuj ni nebulas supozas kontinenton... la nebulo momente fendigas kaj ni ekvidas la prateritorion de la nova mondo. Jes, Ameriko estas tie, Ameriko, kiu reaperas ĉe *Plutarhos* (en la verko *Moralia*). Ekzistas ja, laŭ la babilado de la barbaroj, mistera insulo: Ogygia, kie la suno en iu monato malaperas nur por unu horo kaj ĉe tiam ĝi nur dormetas, sur la tero estas nur duonmal-lumo kaj oni povas vidi la silueton de kontinento. Nu Ogygia estas verŝajne Izlando kaj la kontinento eble Ameriko.

Sed nun ni transflugu jarcentojn, dum kiuj geniaj kranioj intuicie eksentis la ekziston, ĉe la situon de la nekonata kontinento, kaj ni parolu pri tiuj maristpopoloj, kies fantazio incitis la Tero kuŝanta tie, kie la Suno dronas en la Oceano.

Iam, eble inter la sesa kaj oka jarcentoj, irlandaj kaj vaskaj maristoj, poste normanoj kaj, ĉ. la fino de la XII-a jarcento, kimroj malkovras Amerikon. Kaj ne temas nur pri tio, ke ŝiprompaj maristoj ĵetiĝas al la rokoj de nekonata lando, sed pri regula vizito, sistema koloniigo kaj esplorado en la nova tero. Irlandanoj ekz. havis dum pli ol 200 jaroj koloniojn tie. Tiuj ĉi popoloj, kies tutan viveharon plenis la oceano, ĉiam estas logataj pli kaj pli malproksimen. La ondoj de la oceano susuras, tamburas, muĝas kaj tondras misterajn melodiojn kaj la soifa animo avide englutas ilin, ne povante kontentigi. Pli kaj pli malproksimen! Sekvi la vagadon de la fiŝoj, esplori la fenomenojn de la oceano, batali persiste kontraŭ la elementoj.

T. Matolay, kies interesa artikolo estas nia gvid-fadeno (aperinta en *Földgömb*, 3. n-ro 1936.), tute kompletigas tiujn faktorojn ankoraŭ per unu, kiu speciale rilatas la irlandanojn. La Gofa fluo kaj la tempestoj ne malofte alportis strange aspektantajn boatojn, ŝippartojn, vestojn, kadavrojn, ĉe vivantojn kelkfoje. En la britlandaj muzeoj estas multaj pruvoj pri tio. Jen, timplena fremdulo erarvagadas sur la irlandaj bordoj. Ni estas eble en la sepa jarcento. La surpriziga irlanda fiŝisto unue mem ektimas, poste scivole proksimiĝas al la fremdulo. Nekonata lingvo, diferenca haŭto, strangaj vestoj! La scivolo ampleksiĝas kaj la religia epoko vekas sopiron konverti la paganajn, kiuj ankoraŭ ne konas la kristan veron. Ek al la okcidento! Estas legendoj pri insuloj, pri la tero de Satano; ili serĉadas tion kaj — anstataŭe malkovras Amerikon.

La unua, ankaŭ laŭnome konata normana ŝipisto, kiu estis en Ameriko, estis *Ari Marsson*, kiu en la jaro

982 estas pelata de tempesto kaj tiamaniere li atingas Amerikon. Kaj lin sekvas *Leif*, kiu jam plurfoje vizitas la novan landon, malgraŭ tio, ke tiutempe la vojaĝo pretendis iom pli da tempo kaj penado, ol nun. Li atingis la regionon de *Boston* kaj malkovris abundan vinber-teritorion, pro kio li nomis la regionon: Vinlando. Eventuale ankaŭ la vino havas allogan rolon en tiuj ĉi iom longaj semajnfinaj ekskursoj.

La normanoj, vizitante Vinlandon, plurfoje aŭdis pri malproksima lando — sude, kie, laŭ la rakonto de la indianoj, «vivas blankuloj, portantaj blankajn vestojn.» Laŭ la islandaj fabeloj, la normanoj sciis, ke tie loĝas irlandaj kristanoj kaj ili donis ankaŭ nomon al tiu teritorio: *Hvitramannaland*, t. e. la lando de blankuloj. Sed la sorĉo de Vinlando estis tre katena kaj la normanoj neniam vizitis *Hvitramannalandon*. Ankaŭ en Izlando la irlandanoj antaŭis la normanojn, ĉar kiam ĉi lastaj venis tien, ili trovis tie irlingvajn preĝarojn kaj aliajn signojn de ilia profunda pieco. Kaj, laŭ la islandaj fabeloj, tiuj pias fremduloj venis de okcidento, t. e. el Ameriko. Verŝajne ankaŭ el ili devenis la grandkorpa, barba blankulo Kvealkoatl, kiu multe da utilaj scioj instruis al la aztekoj kaj ĝis ilia duondio, kaj kies revenon ili atendis dum jarcentoj. Tiu kredo klarigas la amikan sintenon kaj sindonon de la aztekoj al la grandbarba *Cortez*; oni ja kredis, ke Kvealkoatl realvenis. Poste oni ja konstatis la miskomprenon, sed tiu ĉi eraro kostis iom multe al la aztekoj. Sed tio estas alia historio.

Cirkaŭ 1170, *Madoc*, la estro de Norda Kimrujo malkovras mirindan landon okcidente. Li lasas tie 120 homojn, revenas kaj plenis dek ŝipojn per homoj por reiri. Ĉu li realvenis aŭ ne, ne estas certe, sed estas verŝajne — kaj estas multaj, kiuj identigas lian personon kun tiu de Kvealkoatl. La hipotezo ne estas malverŝajna.

La veneciaj fratroj *Zeno* ĉ. 1390—1405. vojaĝis al Ameriko. Iliajn vojaĝojn antaŭe oni ne kredis, sed tiu ĉi aventura vojaĝo nun ne ŝajnas plu fantaziado. En la originala manuskripto, plej interesa estas la rakonto de frislanda fiŝisto. Tiu ĉi fiŝisto 26 jarojn estis kaptito de indianoj. Ventego jetis lian barkon al la amerika bordo kaj oni kaptis lin sur la teritorio de *Estotiland*. Tie li renkontis latine parolantan interpretanton kaj la estro havis inter siaj militriunfajoj multe da latinaj libroj. (Eble postsignoj de la ir-koloniigo). Poste li forlasas *Estotilandon* (Florida?) kaj atingas *Drogion*, kie li preskaŭ iĝas tagmango de kanibaloj, sed iamaniere li havas okazon instrui al ili la fiŝkapton kaj dank' al tio li savigas. *Drogio*, se la rakonto ne estas fabelo, estas *Meksikio*.

En la jaro 1472 la dana *Scolvus* kaj la portugala *Cortereal* ekiras al *Tatarlando* kaj alvenas Amerikon. Same kiel nia Kristoforo, ili ne sciis, kion ili efektive malkovris. Nur post kelkaj jardekoj oni eksciis, ke ne Hindujo estas la nova tero...

Kiel ni vidas, la Eŭropa-Amerika linio estis, jam antaŭ Kristoforo, sufiĉe trafikplena. Oni do povas diri, ke ne estas tute maltrafa la sekvanta ŝerco popola, trebleva en la paloca dialekto (la palocoj estas strangdialektaj hungaroj en la norda parto de la lando):

Junulo dimanĉe posttagmeze staras antaŭ domo kaj interparolas kun onklo Ruffy, saĝulo de la vilaĝo. La maljunulo diras:

— Nu knaboo, ĉu vi scias, kiel oni malkovris Amerikon? (Ni penadas iomete almenaŭ konjektigi la dialekton.)

— Ne, onklo!

S E R E N E

Heinrich Mann, la germana verkisto rakontas:

— Kiam mi estis 26-jara, mi vojaĝis al Parizo kun mil frankoj en mia poŝo. Kiel ĉiu juna verkisto, ankaŭ mi estis scivola pri la nokta vivo de Parizo, precipe pri la apaĉromantiko.

Foje mi estis atestanto de vera pariza apaĉhistorio. Ĝi finiĝis per hommorto. Venis la polico kaj ni ĉiuj devis iri al la gvardiejo. Kial ne, ankaŭ mi partoprenis la interbatiĝon. Mi defendis min, ĉar oni atakis min. Mia vesto ĉifoniĝis, mia vizaĝo estis sanga. Vane mi diris, ke mi estas germana verkisto, la oficisto alridis min. Mi komencis krii, atesti mian veron kaj atingis, ke la policoficisto sendis policiston al mia loĝejo, ke mia mastro min legitimu. La policisto revenis, ke mi ne loĝas tie kaj la mastro min ne konas.

Mi konsterniĝis. La oficisto ironie min alrigardis. Mi komencis klarigi, ke verŝajne la policisto eraris. Mi loĝas tie kaj tie, en la dua etaĝo, jam de monatoj kaj kiu havus intereson malpravigi tion. Mi parolis tiom multe, ke la oficisto ekŝanceliĝis kaj post longa meditado denove sendis tien la policiston. Post dudek minutoj la bravulo revenis, kriante, ke mi ne trompu la policon, neniam mi loĝis tie kaj kiu povas scii, kia internacia fripono mi estas.

Mi vidis, ke ia mistera hazardo intervenis. Mi kaptis mian elokventecon kaj estas karakterize pri la kulturo de la franca policoficisto, ke fine li kredis al mi. Mi ne havis legitimilon, laŭ li eĉ ne loĝejon, sed ŝajne li ek-sentis la sinceron, radiantan el miaj vortoj. Matene je la sesa mi liberiĝis.

Mi hejmeniris, jeteris min en la liton kaj rapide ekdormis, ke laŭeble tuj mi forgesu la nokton.

Tagmeze je la dekdua, kiel ĉiam, frapis mia mastro. Li enportis la matenmanĝon, ĉokoladon kaj frukton, poste alokulumis min kaj diris:

— Nokte dufoje serĉis vin la polico. Kompreneble, mi diris, ke vi ne loĝas ĉi tie...

— Estis ĉio tiel, ke la maljuna Kolumbuc skulptis teraure grandan ŝipaon kaj ekiris sur ĝi kun siaj homoj. Jam eble tri jarojn li vagabandis tien-reen sur la granda akva, kiam junulo surrampas la maston kaj ekkriejas: — Teerao!

— Nu, se terao, — diras bona Kolumbuc — tiam ni iru tien.

Ili ĉio iras tien. Apud la bordo denaŭve ekparaŭlas Kolumbuc:

— Jaohaano — li diras — alligu la ŝipon al la akaci-arbaŭ, sed forte ja!

Jaohaano faras tion. Nu, tiam li vidas, ke sur la bordo kuraadas dekdou da nigravizaĝaj nuduloj.

— Ili certe estas la sovaĝaŭloj — diras Kolumbuc. Kaj li alparolas unu el ili:

— Diru nur baonulao! Ĉu vi estas la sovaĝaŭloj?

— Haŭ jes, — diras la malparaŭlo. — Kaj kiun ni paŭvas estimi en la sinjaorao?

— Mi estas Kolumbuc.

— Sed ne! Ĉu paovas esti — Kristaofarao?

— Jes ja!

— La diaŭblaŭ! — diras la sovaĝaŭlo — tiam ni efektive estas malkaŭovritaj!

F. Sz.

Balado de duelo

El „Cyrano“ de Edmond Rostand

Gracie jetas mi ĉapelon
Kaj malrapide, kun impon'
Mi jetas grandan la mantelon
Kaj spadon tiras kun ekson'.
Belmoda kiel Seladon'
Kaj lerta kiel Skaramuŝo,
Mi vin avertas, Mirmidon:
Mi pikos ĉe l' versfin' — kaj tuŝo!

Bedaŭru do pri la kverelo.
Kie vin lardi, ho kapon'?
Femur' aŭ flanko estu celo,
Aŭ kor' super la blua zon'?
La klingoj tintas: din-din-don...
La pinto flirtas kiel muŝo.
La ventron, jes! Sen fanfaron',
Mi pikos ĉe l' versfin' — kaj tuŝo.

Jam mankas al mi rim' je »elo»,
Sed ĝin vi donas, ho poltron'!
Jen blankas vi kiel redon'.
Frap'! Mi rebatas kun redon'
Baton de via pikbaston'.
Mi versos jam ne nur per buŝo.
Spadaĉon tenu, Laridon'!
Mi pikos ĉe l' versfin' — kaj tuŝo.

Princ', petu Dion pri pardon'...
Pretigaŝ mi por spado-puŝo.
Mi frapas, trafas... Laŭ propon'
Mi pikas ĉe l' versfin' — kaj tuŝo.

El la franca: E. Mihalski.

En Rusujo oni konstruas grandegan kino-urbon

La ĉefa administrado de la rusa kino-fota produkto intencas konstrui rusan Hollywood, — grandegan kino-urbon en la suda regiono de Rusujo.

Laŭ projekto la kinourbo unuigos ĉiujn entreprenojn de l' kinoarto. Nuntempe en Rusujo aperas ĉiujare 65—70 filmoj.

Post la fino de l' konstruado (I-a vico) oni aperigos ĉiujare 200 filmojn kaj post konstruado de l' II-a vico 650—700 filmojn.

La nova kino-urbo rusa similas al la amerika Hollywood, uzante ĝian teknikon kaj sperton.

La estro de l' ĉefa administrado de la rusa kino-produkto, Sumjackij, diris en intervjuo:

Unuavice estos konstruataj 40 pavilonoj kun tuta areo de 33.000 kvadrataj metroj. Krom tio estos konstruataj 5 aliaj pavilonoj por desegnitaj filmoj kaj 12 laborejoj.

Por tiu unua vico la kino-urbo bezonas 105.000 ĉefajn dekoraciojn. La unua vico de la konstruataj kostas 305.000.000 rublojn.

En tiu kinourbo estos koncentrigitaj la plej bonaj fortoj. Por la komenco oni bezonas 100 reĝisorojn (ĉiu el ili kun produkto de po 2 filmoj ĉiujare), 72 ĉefajn fotografistojn, 55 reĝisorojn-muntistojn, 65 tonspecialistojn, 40 arkitekturistojn-dekoraciistojn, 20 fotografistojn por la arte desegnitaj filmoj, 110 asistantojn ktp. Krom tio oni bezonas multajn dramverkistojn, kompilantojn kaj minimume 500 bonkvalifikitajn aktorojn ne kalkulante la multajn milojn da epizodistoj.

La kinourbo estos finkonstruata en jaro 1936 en Krimeo aŭ en Kaŭkazo.

D. Viktorov-Cehoviĉ

Polusstelo

— Eino Leino —

Ho, Polusstelo,
de l' alta loko
kun pika moko
vi ridbriletas
al la cetera
stelar' sinmova,
kaj al surtera
penado ŝtorma,
klopod' sendorma!

Mi ja kompatas
vin, strangan stelon,
ĉar vi imagas
la vivo-celon
nur inter ondoj
trankvila esti,
kaj malproksime
senmova resti,
dum maro ŝtormas,
sen pac' maldormas.

Vin ĉirkaŭiras
la tutĉielo,
la nebuloj
kaj ĉiu stelo;
laŭ vi sin movas
la pala luno,
al vi sin klinas
la arda suno
kaj per la lenso
la homa scienco.

Sed mi kompatas
vin, stelo fora,
ĉar vi ne scias,
kiel en koro
sufer' volupto
brulige ŝiras,
la peko ardas,
la kor' sopiras,
la menso ŝtormas,
sen pac' maldormas.

Al tero fali
kaj sin relevi,
batali, plugi,
labori, revii,
kaj fari ĝuste
kaj fari krime,
erari, penti
laŭ vol', senlime —
ho, kiel bela
la viv' surtera!

El la finna: L. I. L.

Best-aferoj

Ŝajnas, ke preskaŭ necese estas rezervi konstantan rubrikon al la problemoj de la besto-socio. »Literatura Mondo« ja ĉiam klopodis kontentigi ĉiun socian tavolon, reprezentante ĉiun nacion kaj nun ĝi faras nur pluan paŝon, vastigante sian sferon ankaŭ al la besto-mondo. Farante tion, ni devas emfazi, ke ni estas nur obeemaj perantoj de tiu humana spirito, kiu radias el nia tuta epoko. Ĉu vi eventuale kuragis nei, ke la dudeka jarcento estas la gloro de la kulturo kaj humanismo? Nu ne, ĉu ne?

En la lasta numero ni raportis pri diversaj novaĵoj de la best-socio, ekz. pri la vivo de malsanaj fiŝoj en ilia fiŝ-sanatorio kaj pri la solvo de la pensio-problemo de katoj kaj fine, iom mire, ni notis, ke koncerne al la homoj la ursoj estas iom pesimistaj kaj nekutime retrigimaj. Tiam ni ne tute komprenis la aferon. Sed, dank' al la *Sveda Internacia Gazetservo*, mi ĵus sciigis pri tia netakt-aĵo, pri tia miskonduto fare de homoj, ke oni vere povas kompreni la konsternigon de la noblaj, subtilanimaj ursoj.

Norde, en Laplando, oni eventuale estas iom pli kruda, ol ekzemple en Suda Eŭropo, tamen la menciota afero ŝajnas al ni iom tro senhonta el ursa vidpunkto.

Pripensu ja, samideano, aŭ eĉ samideanino: vi trankvile dormas kaj post via dolĉa sonĝo vi vekigas kun rideto sur viaj lipoj en tiu agrabla sento, ke vi estas komence de la mateno, ke sekvas bela tago. Kaj, ĉar vi estas tute sola, eventuale viaj movoj ne estas la plej decaj kaj etiketaj. Sed, hah, tiam vi rimarkas, ke vi ne estas sola en la ĉambro kaj via societo ne estas agrabla, ĉar tie staras du-tri impertinentaj fotografistoj, kiuj atendas vian revenon al la tago, kaj fotografas tiujn ne tre decajn movojn, kiuj akompanas vian senkonscian vekigon. Kion vi farus tiam?

Kaj nun aŭskultu la raporton de la *Gazetservo* pri tio, kion oni kuragis fari kontraŭ la noblaj ursoj:

»Laplاندanoj en malproksima norda Svedujo zorge observas kavon, kiun kaŝas negokovritaj arboj, kaj kie laŭsupoze tri ursoj baldaŭ finos sian vintrodormon.

Zorge kaŝitaj filmkameroj estas aranĝitaj ĉe la kavo kaj pretaj por la momento, kiam gesinjoroj Urso deci-

dos, ke estas printempo kaj tempo por ili eliri kaj vagi en la arbaroj.

La fotografisto estas s-ro Stig Wesslén, kiu havas vastan sperton pri bestfotografado. De la lasta somero oni faris preparojn por fari tiun ĉi filmon, la unuan en sia speco, pri ursoj elirantaj el sia vintra loĝejo.

Nun ĉio estas preta, la dormejo de la ursoj estas trovita, la kaŝitaj kameroj estas aranĝitaj, kaj la fotografisto devas nur pacience atendi ĝis la oficiala printempodato. Ĉar, diras li, la ursoj pie sekvas la kalendaron kaj finas sian vintrodormon ĉiujare preskaŭ en la sama dato.

Jen, nur tiom! Sed metu la manon super vian koron kaj diru, ĉu la ursoj ne pravas, kiam ili estas suspektemaj koncerne la homojn?

*
Estas agrable noti, ke ekzistas konsolaj faktoj. Rememoru nur la libron de Baghy »Hura«, en kiu oni eĉ starigas monumenton je la honoro de simio. Estas interesa renkonto de la hazardo, ke ges-roj Kellog en Ameriko, eble sen la lego de la Baghy-a verko, dum unu jaro paralele kun unujara infano edukis unujaran simion. Bedaŭrinde la ĉimpanzido vivis nur ankoraŭ unu jaron, sed ges-roj Kellog en belaj vortoj eternigis ĝian memoron. (La renkonto estas interesa, ĉar ankaŭ en la Baghy-romano okazas kombino de la homa-simia edukado). Gesinjoroj Kellog notas, ke la tute sovaĝa simio adaptis sin pli rapide al la benita civilizo, ol la infano (verŝajne sekvo de la pli mallonga vivdaŭro). Sed la homido pli lerte simiumis, t. e. sen pripensu imitis, dum la simio montris sin pli kritika, pli eslorema koncerne la kaŭzojn kaj motivojn de la ago.

Jen! Jen! La simioj estas pli...

*
Mi devas interrompi la pritrakton. Oni informis min, ke mi kaj la aliaj simi-protaktantoj estos elektitaj kiel honoraj civitanoj de Simiujo. Kaj en la nuna tempo estas tamen pripensinde... Mi do diris nenion.

Fersil.



OBSERVO

NUNAJ TEMPOJ.

(Sur margeno de la nova filmo de Chaplin.)

La granda, senkompara Chaplin ankoraŭfoje, post kelkajara interrompo, montriĝis al la mondo. La griza hometo, la trampo kaj vagabondo — nia malnova, proksima amiko, plivere nia kunfrato, unu el ni, sed en sia malriĉeco pli felika ol ni, ĉar li posedas tiun feliĉecon, kiu nia epoko rabis de ni: la feliĉecon de solulo, de vagabondo.

Charlie laboras en moderna fabrikejo, kies febreca »tampo« entiras lin en tian staton, ke oni devas lin, rezulte, sendi en frenezulejon. La »benoriĉa« tekniko ne eltenis la provon rilate al Charlie: li, la griza homo, ne bezonas ĝin, lin ĝi frenezigas. Prezentiĝas ia stranga paradokso: se la maŝino efektive estas kreita por helpi lin, kiel volas la defendantoj de l' tekniko, kial ĝi ne nur ne helpas lin, sed kontraŭe, ne lasas lin eĉ dum momento ripozi, empelas lin en torturan vetŝvitadon kaj fine frenezigas lin? Kaj kiu fakte profitas de ĉio ĉi? Certe ne li mem, nek liaj kamaradoj. Post resaniĝo Charlie ekvivas la vivon de milionoj da liaj samtempuloj: la vivon de senlaborulo, de trampo, de vagabondo. Kaj, kiel ĉiam, li kontravirole, almenaŭ senkoncie, enuras en konflikton kun la leĝo. Senlaboruloj manifestas en la strato, protestas, demonstracias — Charlie ne aliĝas al ili (kaj mi, verdire, ne povas kompreni ĉi tiun lian pasivecon), lin tio ne interesas — sed hazarde li trovas ruĝan flagon, kies signifon li ŝajnas eĉ ne kompreni, ĉar en la plej danĝera momento, kiam la polico ekatakas la amason, li, alte tenante la trovitan flagon, marŝas tra la strato, serĉante verŝajne la perdinton. Tiel li falas en la manojn de l' polico, kiu opinias lin almenaŭ la gvidanto de l' amaso, kaj li formigras en la malliberejon. Nur tie li retrovas ŝajnan trankvilecon. Tie oni ne devas labori, tie li ricevas manĝon, gazeton kaj eĉ cigaron! Kiam oni pli poste, kontraŭ lia propra volo, elirigas lin el la malliberejo, lia tuta strebado estas: reveni en ĝin. Charlie ne povas paĉigi kun la ekzistanta ordo, al kiu li estas ne nur nebezona, sed eksplacite malutila. Cetero Charlie la mondon ankaŭ ne bezonas, nek ian ajn ordon, tiun aŭ alian. Kion li bezonas, pri kio li senĉese revas, estas: oportuna ĉambro, glaso da lakto, pano kaj — amikino. Sed Charlie-n ne interesas la problemo, kiamaniere havigi al la homo ĉiujn ĉi bezonaĵojn. Nur la amikino de l' vivo li trovis, kaj ŝi restos lia fidela kunulino en lia longa vivovagado.

La novan filmon de Chaplin antaŭiris grandega reklamo, per kiu oni penis kredigi, ke ĝi estas kritiko, satiro pri la »nunaj tempoj« kaj ĝiaj atributoj. Eble tia ĝi volis, ĝi intencis esti, sed fakte ĝi ne fariĝis tia entute. La ĉiamaj konfliktoj de Charlie kun la medio kaj kun la ekzistanta ordo ofte ne estiĝas el la kulpo de l' medio aŭ ordo. Kelkfoje Charlie mem estas la kaŭzo. Charlie tute ne estas klaskoncista, nek organizita. Li estas nura vagabondo, simpla dia kreaĵo, kies stomako sencerecmonie postulas satigon. Libera birdo, kiu postulas en la naturo siajn rajtojn. Charlie supozeble sentus sin same malbone en iu ajn alia sociordo, eĉsepte tiun, kiu havigus al li ĉion necesan por vivi sen la bezono labori.

Fakte ja Charlie estas nura vagabondo, nekapabla por paĉigi kun la ekzistanta ordo, nek kapabla por batali por alia ordo. Liaj nervoj estas tro streĉitaj: li preferas la »komforton« en la malliberejo ol la aliĝon al siaj kamaradoj, postulantaj panon kaj laboron. Sar la fono de la amarka vivo de Charlie akre, kompreneble, konturiĝas la brila primoko de la »nunaj tempoj«, sed malgraŭ tio Charlie tute ne estas konsiderebla kiel tipo. Chaplin kreis forte individuajn tipojn, kiu neniel reprezentas iun ajn ideologion. Pri kio en la filmo revas la malgranda, senhelpa kaj ĉiam senkulpa Charlie: kvieteco kaj sateco,

sen la bezono laborakiri ilin, — tion delonge jam akiris la genia Chaplin en sia reala vivo.

George Verda

*) Mi permesis al mi uzi en tiu ĉi artikolo vorton novan: »tampo« en la proksimuma senco de »rapideco«. En multaj lingvoj ĝi estas skribata »tempo«, sed mi pro kompreneblaj kaŭzoj — por eviti konfuzon, ĉar »tempo« en Esperanto havas alian striktan signifon — ŝanĝis la »e« je »a«.

G. V.

(V.) JEAN GIRAUDOUX: LA GUERRE DE TROIE N'AURA PAS LIEU. (La Troja Milito ne okazos.) Duaktaĵo.

Abundo de ravaj sonoroj, disradiado de metaforoj kaj paraboloj, grandioza artfajraĵo de spriteco! Kapturnaj vortoj karavane paŝantaj tra la abismoj de la penso; kaj subite, blovo de anĝelo kaj flugilfrapado: ni estas transportataj ĝis la neatendegaj sferoj, kie sub la senkompara lumo la rideksplodo de diimo kovras la konfuzan rikanadon de l' demonoj. Nia tuta animo banas sin en aparta intelekta etoso.

La Troja Milito ne okazos! Tio estis, laŭdire, la titolo de artikolo el la »Demokratia« socialista ĵurnalo, en kiu la subskribanto asertis ĵus antaŭ la konflikto, ke la necesa malsubteno estos rifuzita al la registaro de Athen. La milito ne okazos! Tiu de Trojo, same kiel la aliaj. Do, dum oni akriĝas la animojn, smirge poluras la kanonojn, plenstopas la korojn per ofendigema patriotismo, la pacifistoj digne provas sian fidon pri la paco, pri la suno, pri la vivo.

Sed ĉiuj militoj tamen okazas, ĉar ĉiam ekzistas certa Pariso, kiu kuŝas kun certa Helena, ĉiam regas la apatio, la stulteco kaj la mensogemo de la homoj. La Troja milito okazos, ĉar la homoj estas sklavoj antaŭ la neevitebla destino kaj iliaj klopodoj ne povas ŝanĝi la iradon de la historio.

Kiel en Amphitruon 38 kaj en Judith, Giraudoux reprenis kaj revivigis la antikvajn mitojn, kiuj lulis la praoriginon de la homa penso, kaj ilin adaptis tra la tempo kaj spaco al la cirkonstancoj nunaj, kaj eĉ ventoj. Li evidentiĝas la eternan veron de la fabelo, ne per la artifiko, de l' kostumoj aŭ de l' scenigo, sed per la subtileco de la lingvo, injektante la bolantan dinamismon de l' propra spirito en antologie malnovan vortuzon, kiu tiel prenas nekredible aktualan signifon.

La movo de la sceno, kiel tiu de la spirito, tuj aperas ekde la kurten-leviĝo, kaj ĝi neniam lacas aŭ pigras en la stagneco de filozofia komento, kion oni povus atendi ĉe tiaŝpeca konceptaĵo. Ni estas senvole kaptitaj, preskaŭ fizike, kaj, sen esti certaj, ke ni ĉion bone komprenas kaj divenas la motivojn de la figuroj, ni fariĝas laŭvice Hektoro, Pariso, Helena, plej intense dividante kun ili la timojn kaj la dezirojn. Ĉar la aŭtoro kvazaŭ intence lasis en la desegno de siaj figuroj certan aspekton de ne-finiteco, kiu invitas la publikon al laŭplaĉa kompletigo. Tiel nia intereso ne lacigas kaj tamen nia atento distriĝas. Do, la ĉefa celo de l' teatro estas atingita: la kompleta distriĝo disde niaj ĉiutagaj zorgoj kaj la aktiva partopreno de nia spirito, kvankam malstreĉa, kio tre gravas.

La rebatoj en sia raspa vereco tintas akre kaj vigle kiel klingo-ludo. La frivolo, rimedo, rikanado, naiveco nenion forprenas de la profundeco, amplekso kaj vario de l' temo. Tie, la teatro kaj la literaturo harmonie kunagadas por ravi ne nur la eliton, kiel oni ofte konstatas, sed ankaŭ la ordinaran homamason, kapablan senti la belon de arto por ĝi konceptita.

Certe, ne sen ironio kaj amareco Giraudoux renverŝas la ordon de la establitaĵ valoroj: Hektoro, la heroo, laca de sia heroeco, transportas tiun lacon al neatendita socia malkuraĝo; Helena, la sensenta virino, fremda al ĉia ĝenerala ideo, eĉ ne amkapabla, fariĝas la blinda instrumento de l' sorto; Demokos, la oficiala poeto, prezidanto de l' senato, amanto de l' sonoraj formuloj, eksploatas ĝis sango la fervoran kaj vigan entuziasmon de l' junularo.

Kaj tiel alta estas la pretiĝo de l' talento — tio plene pruvus, se ankoraŭ necese, tiun de Jean Giraudoux — ke oni vidis, ĉe la ĝenerala provripeto de la *Troja Milito*, plurajn el niaj Demokos-oj ĝisfrakase aplaudi sian propran murdon. Nekompreno? Eraro? Tute ne! Sincera omaĝo tute nature ŝprucanta kaj ĉe kun iom da koketemo el la maljunaj kleruloj, kiujn spite al ĉio la Arto konkeras! Tiuj, pro sia profesio kaj sia sprito, rekonas la aŭtentikan ĉefverkon kaj akceptas morti pro ĝi... almenaŭ simbole!

Sed ili ne evitos la propran morton, ĉar dank' al ilia monumenta mensogo, Hektoro tamen entreprenos la Trojan Militon.

(V.) SORTONS HUGO DE LA CAVE! (Ni eliru Hugon el la kelo!) Ĉu titolo de novaperinta libro? Tute ne. Sed devizo de la multaj kleruloj, kiuj en Francujo restis fidelaj al la memoro de Victor Hugo, kaj aktive batalas por redoni al la granda poeto la lokon, kiun li meritas en la literaturo.

Lastan jaron en majo okazis la kvindeka datreveno de la morto de Hugo, kies restoj kuŝas en kriptoj ĉe la Panthéon. Jam antaŭ la oficiala soleno, kelkaj intelektuloj proponis, ke la restoj de la nacia poeto oni eliru »el tiu aĉa kelo« kaj ilin transportu en alian pli indan lokon ĉe la plena luno, donante al tiu ago ankaŭ simbolan signifon. Ni eliru Hugon el la senfunda marĉo de l' forgeso, en kiun lin puŝis generacio da muknazaj subtiluloj kaj melonkapaj profetoj!

La solena festo oficiala okazis preskaŭ en atmosfero de konspiro... Ĝi la radio-instalaĵo rifuzis funkcii en la lasta momento. La gazetoj grize raportis, escepte de »Les Nouvelles Littéraires«, kiu organizis grandskalan enketon pri la opinio de la plej gravaj verkistoj koncerne la valoron de Victor Hugo. Sed ĝenerale oni kvazaŭ hontis pri la glora mortinto. Kia diferenco de post la funebra soleno ĉe la enterigo! Ĉu mortis ankaŭ la populareco de Victor Hugo? Felibe, ne.

La opinioj pri Victor Hugo, same kiel la diversaj formoj de lia vasta genio, ĉiam estis ege ekstremaj. La demando, ĉu Hugo estis inteligenta, jam flugis riveron da inko. Konata kritikisto ekkriis: Mi preferus esti kripla, ol havi la spiriton de Victor Hugo! Kaj dekojn da tiaj »trafaj« karakterizoj oni povus citi senpene. La tro fervoraj admirantoj falis en la alian eksceson kaj ne montris pli da objektiveco. La batalo de Hernani ĉiam daŭras!

Al la veraj admirantoj de l' genio apartenas la tasko venke elskermi la batalon kontraŭ la stagna indiferenteco. Jam de kelkaj jaroj oni organizis en eksterlando sisteman kampanjon por »enterigi« Victor Hugon, kaj la ekzemplon montris la francoj mem. En studentaj rondoĵ, ekzemple, regas tia timiga influo, ke eĉ sole la nomo de l' poeto oni ne povas prononci sen naski rideton sur ĉies lipoj.

Inter la junaj literaturistoj estas interese konstati, ke ĝuste tiuj, kiuj plej ŝuldas al Hugo, lin plej akre insultas. Kaj tio, kion ili plej kritikis ĉe la majstro, ja larĝe sufiĉas por ilin famigi.

Victor Hugo nekontestible havis la plej vastan influon sur la posteulojn. Lia plej grava merito kuŝas unue en la revivigo de la lingvo. La tuta dekaŭna jarcento uzis la lingvon de Victor Hugo. Kiam tiu skribis »Mi metis la rugan ĉapon sur la malnovan vortaron« li donis trafan bildon pri la grandioza revolucio, kiun li faris en la vortuzo. Per tio li akre markis la disigon inter si kaj Lamartine. El la vortrezoro de Lamartine ĝis nun persistis tio, kion Hugo transprenis, sed pereis definitive tio, kion li forĵetis.

La ampleksan verkaron de Hugo, same kiel tiun de Richard Wagner, oni devas ĵuĝi en ĝia tuto por esti frapita de ĝia monumenteco. Pri tiu esenca trajto tre trafale aludis la artikolo pri Walpole en la lasta Observ-rubriko de nia revuo. Ne gravas tiu ĉi aŭ tiu alia patosa deklamo, grava la larĝaj freskoj, la imponaj konstruoj, la giganta svarmado de pasioj kaj eventoj, la frakasa tumulto de l' sentoj, kaj la tuta vibranta mondo elsorĉita el lingvo senkompare riĉa.

Tute prave oni diris, ke »la dekonno de lia lirika verko sufiĉas por vivigi lian famon tiom longe, kion daŭros la franca lingvo«. Kvankam li ne estis romanverkisto en la propra senco, liaj romanoj, ĉefe *Notre-Dame de Paris* kaj *Les Misérables* reprezentas kulminajn eventojn en la literaturo de l' pasinta jarcento. Precipe la dua tiel populariĝis, ankaŭ dank' al la filmo kaj teatro, ke ĝiaj figuroj preskaŭ apartenas al la ĉiutaga vivo: la galerano Jean-Valjean, la episkopo Myriel, la eta Cosette, la policano Javert fariĝis senmortaj tipoj.

La vivo mem de la poeto liverus riĉan materialon por okazoplena filmo. Nenio mankis en ĝi: amo, politiko, ekzilo, vojaĝoj kaj bataloj. Post Napoleono li restos la ĉefa figuro de l' jarcento.

La objektiva kritiko ĉiam salutas en li, se ne la plej grandan pensulon, certe la plej grandan verkiston de Francujo.

(G. B.) LA DUDEKJARA »DADA«. Kelkaj franca revuo trafis en miajn manojn kaj tiel mi eksciis, ke la dadaismo estas dudekjara. En la revuo, la franca poeto-dadaisto Ribémont-Dessaignes publikas siajn rememorojn pri la naskigo de la fama ismo. Jam tiam li »reirgardis« al ĉi tiu »moderna« arta kaj literatura movado, kaj ankaŭ de tiam pasis jam iom da tempo. Je la oka de februaro estis la dudeka naskiĝtago de la dadaismo, kaj pri tio ĉiu forĝesis, unuavice la iamaj dadaistoj mem. Pri la cirkonstancoj de la naskigo ni trovas atentindajn indikojn en la notoj de Hans Arp, alsaca verkisto, unu el la »patroj«.

— Jene mi deklaras — skribas Hans Arp — ke Tristan Tzara eltrovis la vorton »dada«, je la oka de februaro 1916, vespere je la sesa. Mi ĉeestis kun miaj 12 infanoj, kiam Tzara unue prononcis tiun vorton, kio vekis en ni rajtan entuziasmon. Tio okazis en Zürich, en la kafejo Terras kaj mi portis kukon en unu el miaj naztruoj. Mia konvinkigo estas, ke ĉi tiu vorto havas nenian sencan kaj ke nur la idiotoj kaj hispanaj profesoroj zorgas pri datoj.

Ĉi tiu indiko ŝajnas sufiĉe fidinda kaj ne malhavas literaturhistoriistan seriozecon. Kion la vorto »dada« signifas tio estas iom malcerta. Ĝia originala senco estas »amata ĉevaleto«. Tristan Tzara, la romandevana franca poeto, trovis ĝin en la »Larousse« kaj elektis ĝin devizo por la nova direkto. Kial? Oni ne povas scii. Ĉirkaŭ la dadaismo entute, oni nenion povas scii. Alia dadaisto, Richard Hülsenbeck, diris ja sincere: »La vivo estas katmuziko, kaj kiuj ĝin komprenas, tiuj estas la dadaistoj.«

Estis milito, kiam internacia eta verkista grupo naskis en Svisujo la dadaismon. Post tiom da militdeklaro, ankaŭ la dadaistoj deklaris militon. Ili militdeklaris al la realo, al tiu realo, kiu en 1916 jam delonge perdis sian sencan. Ĉio estas sencela, tio estas blufado — ili deklaris. Certe efikas sur ilin ankaŭ la brila romano de André Gide: »La keloj de la Vatikano«, kies juna heroo demonstracias kontraŭ la burĝa moralo per sensenca ago, per sencela murdo. La tuta agado de la dadaistoj estis serio de tiaj »action gratuite«: demonstracie sencelaj agoj. Sed en tiu sencelco ili estis plene celkonsciaj. Ili eldonis revuon, sur kies titolpaĝo paradis Mona Lisa kun potencaj torditaj lipharoj. Kelkfoje — kiel skribas Ribémont-Dessaignes — ili gvidis muzeo-vizitojn. Grandan grupon da interesigantoj ili kondukis al la Louvre; la gvidanto haltis antaŭ klasikaj kreaĵoj kaj solenvoĉe laŭlegis la plej novajn borsajn kurzojn. Kelkfoje ili transportis la dadaismon ankaŭ en la vivon. Unu el ili ŝtelis en omniĉeso monujon el la poŝto de kelnero, ĉar tiu memorigis lin pri pastro. Poste li pripentis sian kulpon kaj post tri tagoj li redonis la monujon al nekonata homo, kiu hazarde similis al la kelnero.

Tiel vivis kaj agis la dadaistoj, inter ili ankaŭ kelkaj valoraj verkistoj, ekzemple Cocteau kaj Aragon. Kompreneble, oni ne povis longe daŭrigi ĉi tiun ludon, ĉar ĝi iĝis teda. Naskiĝis dadaismaj sablonoj, kiujn post kelka tempo oni ne povis plu varigi. Al Mona Lisa oni povas doni, post la torditaj lipharoj, maksimume ankoraŭ vang-

barbon aŭ kaprobarbon, kaj per tio proksimume elĉerpigas la programo. La dadaismo, post kelkaj jaroj, jam floris nur en la dadaismoj spritaĵoj de la kabaretoj, lomtēpe ankoraŭ populara estis tiu kalva sinjoro de la anekdoto, kiu metis sur sian kapon vermicelojn anstataŭ spinaco, sed tion jam tre malmultaj konsideris serioze. La pli bonaj dadaistoj memstarigis sin kaj ekiris aliajn vojojn. Nun, post dudek jaroj, la publiko jam apenaŭ memoras la dadaistojn.

Mi kredas, ke pleje malutilis al ili la evoluo de la socio. Tiu realo, de kiu ili sin turnis, rapidege dadaigis konforme al ili, kaj eĉ, dadaigis mort-serioze. Dum la lastaj dek jaroj ĝi tute perdis, eĉ la ŝajnon de bonsececo. Por ke ni uzu nur la trivialan ekzemplon: oni hejtas lokomotivon per tritiko, dum milionoj malsatas. Ĉi tio estas kulmino de ĉia dadaismo, pli konsterna ol la lipharoj de Mona Lisa kaj pli neverŝajna ol la spinaco sur la kapo. La agado de la dadaistoj iĝis tute superflua, de kiam ŝtatiroj kaj ŝtatekonomoj transprenis la dadaismajn metodojn. Kiu volas ribeli hodiaŭ, tiu povas ribeli nur kontraŭ la dadaisma realo. Hodiaŭ tio estas konsterna, se iu volas mangiĝi per tritiko homon anstataŭ lokomotivon.

Aragon, kiu, post longaj dadaismaj kaj surrealistmaj provadoj, kreskis je brila verkisto kaj je spirita gvidanto de la franca maldekstro, jam plene rekonis ĉi tion. Li skribas en unu el siaj lastaj artikoloj: «Mi anoncas la revenon al la realo, por la transformo de tiu realo!» Ion pli belan li vere ne povis diri je la dudeka naskiĝtago de la mortinta dadaismo.

(G. A.) PARIZA TEATRO. La entuziasmaj aŭ senreviĝaj, sed ĉiel laŭtegaj krioj, kun kiuj Parizo kaj la tuta lando akceptis la rezultojn de la politika voĉdonado, sonis malproksimegen. Ili superkriis tiujn multe malpli laŭtajn fanfarojn, kiuj festis en la taga ĵurnalaro la naskiĝon de nova dramverkisto.

La «nova franca dramverkisto», pri kiu oni faras tiom da bruo, estas junulo. Jen lia sola merito, krom tio, ke li kuraĝas skribi la veron, aŭ almenaŭ tiom, kion li kredas vero. Ĉio ĉi sendube estas jam granda plenumo en la Urbo de Lumo, kie pli kaj pli malmultas la junaj verkistoj, precipe tiaj, kiujn ne timigas ilia propra voĉo.

Nu, mi konfesas, ke la teatraĵon mem mi trovis longa, primitiva kaj enuiga. Sed al la publiko ĝi plaĉas. Eĉ al la kritikistoj, precipe al la «dekstraj». Nome, la teatraĵo ege tradraŝas la Respublikon kaj ties instituciojn. Ĝin traas ia studente cinika spirito. Kun junule kruela, incitema, venĝema amareco ĝi predikas, ke oni devas esti fripono. Oni devas ne ŝpari. La ŝvite-pene gardataj groŝoj ja nepre perdiĝas inter la manoj de iu potencumita

trompisto. Per bankroto, per mondkrizo, per io ajn alia. Oni do ĝuu la momenton kaj la gajnitan monon. Oni vivu de unu tago al alia. Nepre oni ne estu honesta, diligenta. Prosperas ja nur pendiginduloj, ŝtelistoj, trompistoj. Nur por ili ridetas la fortuno.

Se al vi plaĉas, mi povas rakonti en kelkaj frazoj la temon de la «Sep malgrasaj bovinoj» (Les Vaches Maigres), kiu, novaĵon de la teatro *Oeuvre*, fanfaras ĵurnalato kaj parto de publiko kiel verkon de la alveninta aŭ alvenonta Nova Dramverkisto.

Juna etoficisto edziĝas. Eĉ en la nupto-nokto li laboras por sia firmo, dum lia edzino songas pri amo — sola. Li laŭte anoncas kaj fervore praktikas la burgajn virtutojn. Iom post iom li kolektas por si riĉon, sed tiel, ke ĉiam superfluan goĵon kaj plezuron li forprenas de si kaj de sia familio. Ankaŭ la bienon de sia edzino li monigas, por ke li povu partopreni per pli granda sumo en la entrepreno de liaj ĉefoj. Por sia investita kapitalo li ricevas titolon de direktoro. Sed — la firmo bankrotas. Ĉio perdiĝas. Kaj la «honesta, ekzemplo-done brava, ŝparema burĝo», kun sia edzino, du filoj, graveda filino, baraktas sur la sojlo de malsatmorto.

Tiam, en la lasta momento, aperas la ĉarlatana vivkunulo (pli ĝuste: konkubulo) de lia bofratino. Kaj tiu ŝtelisto, trompisto, sentaŭgulo, kiu gajnis dum sia tuta vivo la monon tie kaj tiel, kie li povis plej facile, per minimuma peno — kaj kiun la honesta edzo ĝis nun ege malestimis — proponas nun negocon, kiel komisiito de intertempe sukcesinta politikisto. Li proponas al la honesta edzo la rolon de «pajlo-pupo» en la dube-puraj negocoj de la ministro. En la ekshonestulo, vidinte ke la honesto taŭgas maksimume por malsatmortigo, akceptas la proponon. Li komencas «novan vivon», kolektas novan riĉon, kiu — ni povas esti trankvilaj — ne dissolviĝos plu, kiel ajn tempestos la krizo...

Malpli malglata, senproportia kaj troiga estas la novaĵo de la Pigall-teatro, verko de Leopold Marchand. La titolo estas: *La vivo estas tiel mallonga* (La vie est si courte) kaj la protagonisto ĉi-foje estas ne politikisto, sed romanverkisto, eĉ — mortinta romanverkisto. Lin ni eĉ ne vidas sur la scenejo. En la unua akto li estas malsana, en la dua li jam ne vivas. Lia vidvino — kiu kredis, ke ŝi estis la sola virino en lia vivo — hazarde interkonatiĝas kun la eta Jeanne, iama amatino de la romanverkisto. La rivalinoj iĝas amikinoj; precipe, kiam ili malkovras, ke la mortinto havis ankoraŭ unu paseman amrilaton — kun la plej intima amikino de la edzino.

Poste la edzino kaj Jeanne vivas kune en provinca kastelo. Kaj, dum la jaroj pasas, ĉiu el ili suspektas la alian pri la unua malfidelo al la memoro de l'komuna



E. Weiralt

Infero (akvaŭorto)

amato. Sed ni ekscias, ke la knabino korespondis nur kun imagita viro. La vidvino, male, montras pli kaj pli kreskantan intereson al la najbara bienulo, kiu estas fortika kaj tre vivanta homo.

Mi ne scias, kaj mi dubas, ĉu iu scias, kion volas diri Léopold Marchand per tiu ĉi teatraĵo. Kaj, eble tio estas la plej bona kvalito de la verko. *Tial* ĝi marŝos dum iom da tempo. *Tial*, ke ĉiu serĉas kaj neniu trovas la kaŝatan esencon kaj risorton. Eble, Marchand volas demonstri, ke la amatino, la sekreta, kaŝata flankvojo en la vivo de viro, scias pli amu, scias resti pli fidela ol la laŭlega edzino, al kiu apartenas la honoroj kaj rajtoj... Sed tiun ĉi tezon la aŭtoro montratas tre malcerte, nur por momento li ekbriletigas ĝin kiel jonglisto. Eble li timas, ke alie la mastroj kaj la publiko de la teatro, sed precipe la horo de la oficialaj kaj laŭlegaj edzinoj, elskrapas al li la okulojn, aŭ almenaŭ prifajfas lian verkon.

(V.) CARADOC EVANS, LA SATIRISTO DE L' PROPRA LANDO, skribis pri si mem: Mi venas el Kimrio, lando, kies ĉefaj eksportaĵoj estas pastroj, politikuloj kaj boksisoj. Mia provinco estas Cardiganshire. Mi devenas el kampula familio, kvankam mia patro sukcesis kiel aŭkciano kaj bien-agento. Sed li mortis tridekjara, lasante vidvinon kun kvin tre malgrandaj infanoj.

El la kvin mi estis la antaŭlasta. Mi vizitis la vilaĝan elementan lernejon. La instruado estis senpaga. Post la predikanto, la instruisto estis la plej terura tirano de la loko. Li instruis al mi la arton skribi kaj legi la anglan lingvon, sed neniam mi havis la plej etan ideon pri tio, kion mi legis.

Patrino volis, ke ŝiaj infanoj lernu bonstatan metion. Kompreneble la liberalaj profesioj staris ekster konsidero. La bonhavaj gepatroj edukis siajn filojn kiel predikantojn aŭ advokatojn. La kimroj sukcesas en predikado, juro kaj politiko, pro tio, ke oni povas aĉeti ilian konsiencan je tre malalta prezo. Mia pliaga frato lernis la metion de drapvendisto, kaj same faris mia pliaga frato, kaj je la ago de dekkvar mi estis sendita al drapvendisto en Carmarthen.

En tiu butikoj mi unufoje gustumis freŝan viandon. Mia stumblo-ŝtono estis la angla lingvo. Mi ĉiam ridigis la klientojn pro mia misuzo de l' vortoj »punctuation« anstataŭ »punctual«, »corner« anstataŭ »corner«, »twice or three times once before« ktp. (signifas reciproke: interpunkcio — akurata — kornuso — angulo — dufoje aŭ tri fojoj unufoje antaŭe).

Poste, mi akiris novan postenon en Cardiff; tio estis servuteco: ses-ĝis okope ni dormis en unu ĉambro, kaj ni estis tre malbone nutrataj. Mi venis al London kaj estis pelata de drapvendisto, kaj eniris la oficejon de malgrava semajna publikajo. La eldonanto-posestanto rigardis min kaj dungis min por la salajro de tri funtoj semajne. Monaton poste, li diris al mi: »Pruntedonu dek funtojn al mi.« Mi respondis: »Dek funtojn mi ne posedas.« Li diris: »Bona Dio, se mi ne pensus, ke vi estas riĉa, mi ja ne okupus vin.« Neniam mi ricevis ian salajron de li, sed mi estis ŝparinta proksimume tridek funtojn, kaj mi vivas per tiu sumo. Tie mi restis ĝis la afero bankrotis. Mi pasigis multan tempon forŝirante la lineoleumon disde la planko kaj displante la pordojn, ĉar mankis fajromaterialo.

Mi deziras verki rakontojn, sed mi ne scias pri kio rakonti. Tiam, iuvespere mi malfermis la Biblion ieajn, kaj la teksto sub miaj okuloj estis tiu de la dekoka ĉapitro de la Genezo. Mi tion legis kaj pensis: »Jen la maniero lerni la anglan lingvon.« Kaj poste: »Kial ne

provi verki kimran rakonton en la stilo de la Biblio?« Tion mi provis.

Post la eldono de »My People« (Mia popolo), la homoj komencis paroli pri mi. Mia onklo, pri kiu mi ne ŝatas memori, disklaciis, ke li edukis min. Sed la vilaĝa instruisto diris: »Se Caradoc kapablas verki libron, la idioto de l' vilaĝo certe povas verki novan Biblion.«

Evans naskiĝis en Pantycroft, Kimrio. La precizan daton de lia naskiĝo oni ne konas, sed oni supozas, ke li nun estas proksimume 55-jara.

Hazardo lin kondukis al ĵurnalismo. Li fariĝis iam redaktano de *Everybody's Weekly*.

La malamon al la propra devenlando esprimis Evans en kolekto de etaj noveloj titolita »My People« kaj eldonita en 1915. Ĝin oni malpermesis en Kimrio. La aŭtoron oni vigle misfamigis el la ambonoj kaj lian portreton oni publike bruligis.

Iam, en London, li estis ĉe kimra barbiro en la Strand. La barbiro, ne sciante, kiu li estas, diris: »Se Caradoc estas ĉi tie, mi tranĉus lian gorgon.«

Kiam en Cambridge, li diris en lekcio, ke la kimroj instruis al la londonaj vendistoj, kiel fraude akvumi sian lakton, skandalo okazis en la kunveno, kaj li devis peti polican protekton por reiri al sia hotelo. Lloyd George sentencis: Tiu viro estas renegato!

Sed Evans daŭrigis vigle sian satiradon kontraŭ la propra lando per serio de noveloj. Aperis en 1916: *Capel Sion*, kaj en 1919: *My Neighbours*. Ribeltumuloj akompanis la prezentadon de lia komedio: »Taffy« (mokenomo de la kimroj). Multajn personojn oni devis eligi el la teatro. Cetere la prezento havis malmultan sukceson.

La unua romano de Evans: *Nothing to Pay*, aperis en 1930. Ĝi estas rakonto pri kimra avarulo. Pri tiu verko Glyn Roberts diris: Ĝi estas unu el la plej grandiozaj romanoj, kiujn mi legis, kvankam ĝiaj figuroj estas ekcese mankhavaj kaj ĝia heroo unu el la plej turaj monstroj, kiuj iam invadis la pagojn de romano. Dua romano sekvis en 1932. Tiu oni nomis miriga libro.

Hugh Walpole ne hezitis diri pri li: ŝia honesteco estas unu el la plej frapaj trajtoj en la moderna literaturo. Kvankam li verkis relative malmulte, Evans jam eniris la legendon de l' famo. Evidente, li estas depost Swift la plej granda satiristo kontraŭ la propra popolo.

(M) LA ROMANOV DE LA RADIUMO verkis *Rudolf Braungraber* en dika 400-paĝa volumo, kaj tiu ĉi libro estas multe pli ol nura romano de hemia elemento. Ja, tiuj tri jardekoj, kiuj trabraus de la unua pago de la lasta, fundamente ŝanĝis la politikan, ekonomian kaj socian aspekton de la mondo. Kaj tiun ŝanĝon plastike vivigas ĉi tiu romano.

Per elŝiritaj moment-fotoj komenciĝas la rakonto. La sceno de unu estas Londono, iu periferia kvartalo. La alia okazas en Parizo, la tria en kaŝita vilaĝo de la ĉeĥa Ercmontaro. Kiam antaŭ niaj okuloj vivigas ĉi tiuj historietoj, ni ankoraŭ ne vidas ilian kunapartenon. Nur poste, multe post la mezo de la romano interkroĉiĝas la disaj scenoj en potenca unuon: en la monumentan atestadon de tio, kion la radiumo estigis en la homa vivo de la 20-a jarcento. En Kongo kaj en la sovaĝa okcidento, en francaj hospitaloj kaj laboratorioj, en la diversaj batalkampoj de la mondilito, en la vivo de la grandaj ekonomiaj koncernoj, ĉe la pliperfektigo de la stratosferaj vojaĝoj kaj en mil aliaj direktoj disvolvigas triumfoj kaj tragedioj ĉirkaŭ la radiumo, kiu, dum ĝi iĝis la plej multekosta kaj terura substanco de l' tero, samtempe estigis neantaŭvideblajn ŝanĝojn en la kampo de teoriaj sciencoj, de ekonomia vivo, de praktika medicino.

La protagonisto de la romano do estas ne unu aŭ alia rolanto, sed mem la radiumo. En unu loko ĝi aperas kiel treme atendita helpilo en la lukto kontraŭ terura malsano: la malsanuloj espere-angore atendas: ĉu realiĝos la esperoj pri la nova substanco. En alia ĉapitro, ĝi aperas kiel ingredienco de iu aŭ alia mineralo, kaj ekirigas potencajn batalojn pri teritorioj. Kaj fine, ni

vidas la misteran novan substancon kiel kolizian punkton de mondekonomiaj federacioj kaj kiel kaŭzon de milito bruletanta sub cindro kaj ĉiunmomente ekflagranta.

Kiam disvastiĝas la famo pri la nova substanco, havanta superteran potencon, tutmonde komenciĝas pri ĝi diskutoj kaj disputoj. Ekzistas kiuj kontestas la miraklan efikon — el sincera konvinkigo. Kaj ekzistas kiuj sin montras skeptikaj nur tial, ke des pli trankvile kaj sendanĝere ili povu etendi la manon por la akiro de la nova substanco... Dum la radiumo estas nur malmulta, vete klopodas akiri la miraklan kuracilon la diversaj hospitaloj de la mondo. Sed jen, ŝanĝiĝas la situacio. Novaj radiumtrovlokaj malferrigigas en Kongo kaj sur la belgaj bordoj, kaj subite morta danĝero minacas la radium-monopolon de Ameriko. La malsanularo, kompreneble, ĝoje salutas ĉi tiujn sciigojn. Sed — kiom koncernas la kartelojn la intereso de la malsanuloj? La karteloj do ĉiurimede klopodas gardi la antaŭan prezivelon. Oni devas subpremi la produktadon kaj konservi la malnovajn, monstraĵajn prezojn — oni aŭdas ĉie — ĉar alie estas finita la monopolo.

Mi ne povas raporti ĉi tie pri ĉiuj ĉapitroj de la romano. En tiuj ĉapitroj ja gravas ne tio, *kiu* okazas, sed pri tio, *kiel* ĝi okazas. Tamen, la romano havas kelkajn ĉapitrojn, ĉe kiuj oni devas halti. Ekzemple, kiam la ĉefo de la eŭropa radium-trusto, Pierre Cynac, kiu dum sia tuta vivo ne havis ĉe unu minuto por alio ol por laboro kaj mon-akiro, do, kiam Pierre Cynac unue renkontiĝas kun la Virino. Estas nur fatala ludo de cirkonstancoj, ke eĉ tiu virino signifas negocion: ŝi estas ja nepino de la amerika radium-reĝo kaj oni sendis ŝin en batalfronton, por ke per sia rideto ŝi provu influi la grandan ekonomian militon. Ĉar alie, laŭ la cirkonstancoj de povo, la rezulto de la milito jam ne povas esti duba.

Grandioza kaj vere ekscita sceno estas, kiam kunsidas la potencoj de la radiumo el la nova kaj malnova mondoj. Argumentoj sonas por kaj kontraŭ, kvankam oni sentas ilin jam tute superflujaj, ĉar la bela amerikanino ja havas la grandan promeson: Pierre Cynac estas ĉi tie ĉe paco. Dum horoj daŭras la intertraktado. Pierre Cynac senvorte sidas sur sia seĝo. Kaj kiam fine li levigas por paroli, li diras solan vorton, ke li — ne estas ĉi tie paco. Pierre Cynac restas fidela al tiu idolo, kiu lin gvidis dum lia tuta vivo. La mono triumfas super la amo.

Ekscita estas la vojo, kiun la radiumo faris de la laboratoria tablo de Marie Curie ĝis la Belgiaj kaj Pensilvaniaj granduzoj. Kaj ĉiujfine atendas la plej ekscita sceno: la mistera radium-malsano inter la laboristinoj de la fabriko de Cynac. Apud ilia lito senpove staras la kuracistoj. En malluma ĉambro baraktas tiuj malfeliĉulinoj kaj en la malluma ĉambro fluas mistera lumo el iliaj okuloj kaj buŝo. La mistera lumo mortigas la laboristinojn, sed ne estingiĝas plu. La potenco de la radiumo ja estas nevenkebla. Kaj en la fantazio de Cynac vivigas teruraj vizioj: kadavroj kuŝantaj vice, el kiuj, post paso de centjaroj, restos nenio krom la mistera kaj timiga lumo...

EDUARD WIIRALT.

Eduard Wiiralt estas konata estona grafikisto, laboranta jam pli ol dek jarojn en Parizo. Li ne nur estas la plej bona estona grafikisto, sed li apartenas al la plej perfektaj nuntempaj tutmondaj grafikistoj, kion asertas ankaŭ Henri Heraut en la franca revuo »Xylographie«. La esperantistoj iom konas lin laŭ la estona numero de Lit. Mondo (majo 1931); ankaŭ la kovrilpago de Estona Antologio I estas de li.

Eduard Wiiralt naskiĝis en 1898. Li vizitis la artindustrialajn lernejojn en Tallinn kaj la artdernejojn »Pallas« en Tartu. En 1922/1923 li studis en Dresden, en 1925 veturis al Parizo. — Ĉi-printepe en Tallinn estis aranĝita ekspozicio de Wiiralt: ĉk. 350 laboroj el la jaroj 1915—1936. Pasintjare estis ankaŭ aranĝita en Rotterdam ekspozicio de liaj laboroj, okaze de kio aperis tre favoraj kritikoj en la nederlandaj gazetoj, laŭdintaj lian artistan perfektecon kaj grandiozan teknonon. »Wiiralt estas vere



Artisto Eduard Wiiralt

artisto, granda artisto en grafiko. Liaj laboroj meritas la atenton pro du kaŭzoj: teknika perfekteco, funda kono de lia artfako kaj aldone al tio tre granda fantazio, povanta esprimi jen plej grandan delikatecon, jen plej turmentan demonecon.

Lastjare E. Wiiralt ricevis premion de estona ilustracio por la 6 gravuraĵoj-ilustraĵoj al »Gabrielide« de Puŝkin (franca Puŝkin-eldonon).

Wiiralt ilustris multajn estonajn librojn (ankaŭ poemojn de M. Under) — interalie ankaŭ francajn eldonaĵojn, ekz. »Decameron« kaj »Concupiscences« de Mauriac — en la lasta libro estas ankaŭ tre bonŝukcesinta portreto de Mauriac.

En angla artjurnalo, »The Print Collector s' Guaterley« aperis en aprilo 1936 granda artikolo kun ilustraĵoj de Basil Burdett pri Wiiralt sub titolo »Estona grafikisto«.

Wiiralt estas majstro en ĉiuj grafikaj teknikoj. Liaj unuaj sep parizaj jaroj estis tre intensivaj por stilsferadoj ili donis ankaŭ al lia temaro senlaman vastecon, pasion kaj asketismon, inferon kaj ĉielon, plej senhontan karnon kaj plej subliman potencon. — Estus malguste ligi Wiiralt al Ununura formulo, kiel oni estas tion farinta, nominte lin fantazisto aŭ erotikulo. Li posedas maloftan multflankecon, kaj bildoj atestas pri la interesa evoluo de la artisto, ni vidas dramecajn internajn streĉojn kaj solvojn, katastrofojn kaj plej delikatan lirikon, ni vidas pere de li la tutan mondon, ne nur ian mallargan eltranĉaĵon, ni vidas fantazon kaj realecon, inkubajn fantomojn kaj profetan fervoron. Generale li tamen estas realisto, kion pravas liaj portretoj, eĉ la ideoj tiel fantaziaj kiel »Infero« kaj »Kabaredo«, kie tiuj apartaj eroj estas prezentitaj per plej granda realeco, malgraŭ ilia nerealeco.

Tiu realeco, propra al Wiiralt, atingas sian plej belan kaj idealan esprimigon en liaj laboroj de post 1933. Ĉiam pli kaj pli trankvila, klasika iĝas lia stilo. En Estonio oni kun intereso observas la evoluon de Wiiralt: sendube li estas unu el niaj plej grandaj artistoj. *Hido.*

THEODOR HEINRICH MAYER: MONO — MONO!

Theodor Heinrich Mayer, kiu naskiĝis en 1884 en Wien, estis transloĝiĝis siaj gepatroj el Aŭstrio—Slesvigo, studis en Wien farmacion kaj filozofion kaj dediĉis sin al la merkado kaj komence konkeris por si apartan lokon, pritraktante la rilatojn inter homo kaj maŝino en poezia formo kaj kreative tiamaniere propran specon. Apud tio, liaj profundaj ekonoj kaj lia riĉa prezentkapablo kondukis lin al la patrolanda romano. La roman-serio »Cent jaroj de Aŭstrio« montras la priskribon de

la aŭstria sorto de la lastaj cent jaroj. Al ĉi tiu serio apartenas la romano »Mono — Mono!« La ŭrganta hasta ritmo, kiu kuŝas en ĉi tiu titolo, trablovas la tutan libron. Neniam ankoraŭ la danco ĉirkaŭ la Ora Bovido, la demona povo de la mono super la koro de homoj estis priskribita kun tia insisteco. Theodor Heinrich Mayer nesupereble sukcesis montri, kiajn multspecajn formojn povas alpreni ĉi tiu demono kaj kiajn animajn detruojn ĝi povas estiĝi eĉ en la plej simplaj mensoj. En 1873, la jaro de la mondekspozicio, la loĝantaro de Aŭstrio estis kaptita de malsaneca spekulacia febro. La paperoj eĉ la borso altiĝas kaj altiĝas. Ĉiu, kiu ĉi tie partoprenas, ŝajnas havi la eblon riĉiĝi en plej mallonga tempo. Altfinancistaro, burĝaro kaj metistoj sin jetegas en riskajn entreprenojn kaj eĉ la kamparanoj en la Alpo-valoj provas per perantoj partopreni eĉ la granda fiŝkaptado, ĝis fine la tuta kartodomo rompiĝas. En ĉi tiun grandan bildon Theodor Heinrich Mayer metas aron da akre desegnitaj figuroj. Estas maljunaj, spertaj spekulistoj, kiuj kun bongega flarsento antaŭvidas la altiĝon kaj malaltiĝon de la valoroj kaj en ĝusta momento forpuŝas ĉiujn danĝerajn paperojn; piratoj de la monaferoj, kiuj maltime eniras riskajn aventurojn por kolekti fabelajn riĉaĵojn, kiuj poste, ankoraŭ pli rapide ol ili estis rabkolektitaj, denove disfluas; nobeloj, kiuj provas regajni ilian perditan havaĵon en ĉi tiu fremda mondo; modestaj homoj, al kiuj la deloga mono tute konfuzas la kapon. Ankaŭ la mondo de la amo estas regata de la povo de la mono kaj influata de ĝi. La malfarmo de la granda mondekspozicio fare de imperiestro Francisko Jozefo estas priskribita en plej viva maniero kaj donas okazon por impresa priskribo de la figuro de la skulptisto Fernkor, kiun jam tiam obsedis spirita mallumo. En la mezpunkto de la romano staras juna financiro, kiu, jam signita de la morto, uzas la mallongan tempon, kiun li ankoraŭ havas por vivi, por fari vicon da spekulacioj de freneza kurageco. Por gajni virinon, ties beleco katenas la tutan Wien-on, li ĉion riskas. Favorata de plej granda feliĉo, ĉiuj liaj spekulacioj sukcesas. La mono kvazaŭ per si mem alfluas lin, sed li atingas sian celon en momento, kiam li mortante ne plu bezonas la monon kaj tiamaniere fakte sufokiĝas en la enflueginta orrivero.

F. W. V.

LA EDENO ANKAŬ NUN EKZISTAS, NUR NI EKZILIS EL ĜI NIN MEM. Tiu ĉi bela frazo estas de Mihály Földi, unu el la gravaj aŭtoroj de la moderna hungara literaturo. La kariero de la verkisto estas tre interesa. Li ekiras kiel kuracisto, poste naturalisma verkisto, nun li estas redaktoro de tre grava budapeŝta ĵurnalo kaj — atingis inspiroplenan Di-kredon, kies fundamento estas sobra kaj filozofia naturscienca koncepto.

Estos interese citi kelke da frazoj el la tre originala, interesa kaj konvinka idearo de la aŭtoro:

Mi transvivis epokon, kiu plene ŝanĝis la sciencajn vidpunktojn. ... Dum mia studtempo la atomo estis la plej eta ero de la materio. ... Nun ĝi estas memstara modunuo kaj mem la materio sublimiĝis; ni konas ĝin kiel aperan formon de la forto. La scienco esploro do atingis la saman Nekonatan, ĉe kiu oni devis halti antaŭ jarcentoj. ... Ankaŭ nun oni povas nur doni diversajn nomojn al la prakaŭzo. ...

Mia rezulto estas la intelekta Di-kredo. ... Ni kredu pri tio, ke konscia, sistemiga forto antaŭigas la homaron al la perfektigo. ... Ni vidas klare, ke estas ne-necese, ke oni malsatu kaj suferu, ke oni korpursurkorpe batalu por la pano. Estas loko por ĉiu sur la tero! Kaj ĉie fermentiĝas la ideo, ke en la kuniĝo, en la konsciigo de la pliiĝita respondeco-sento kaŝas sin la savo, kiun alportos la revolucio de la animo.

Mi atendas la realigon de la burĝa socialismo. ... Tiu ĉi nomo ŝajnas paradoksa, sed ĝia enhavo ĝin pravigas. ... ĉar la burĝo estas kontraŭulo de neniuj klaso kaj lia sorto ne estas ligita al la kapitalismo. Se la kapitalismo bezonas do transformiĝon, la burĝaro povas fari ĝin sen revolucio kaj teroro, ĝi povas repaciĝi malamikojn kaj povas dediĉi

Vermlando vi belega*)

Teksto: A. Fryzell.

Popolmelodio.

Ej för långsamt. Folkmelodi från Östergötland.*

Verm-lan-do vi be-le-ga, vi
Se-ĉe mi re-nis-me-ĉe en-ĉiel

plej-be-le-lan-d' vi kro-no de lan-d' en Sved
pro-me-si ta lan-d' ĉi ta min re-nis al Verml

lan-do! Mi ti-e-ro-las vi-vi,
lan-do. Kaj ti-e-ro-las mi Se-ĉe en el

Verm-lan-do kna-bi-nu pre-nis mi

mi scias, ke mi re-nis-am pen-tes.

* Se Dybecks • Runa • 1865.

Vermlando vi belega, vi plej bela land',
vi krono de landoj en Svedlando!
Se eĉ mi venus mezen de l' promesita land',
mi tamen reirus al Vermlando.
Mi tie volas vivi, kaj tie mortos mi.
Se iam el Vermlando knabinon prenos mi
mi scias, ke mi neniam pentos.

Trad.: G. Löfvenmark.

*) *Noto:* Värmland (Vermlando) estas provinco de Svedlando. Naskloko de multaj svedaj poetoj, ekz. Selma Lagerlöf.

al la servo de Dio sin, la socion, la ŝtaton kaj la tutan homan vivon. ...

Kiel la intelekto liberigas nin el la infanaj instinktoj, tiel la konscia kredo kaj la aktiva boneco venkos la kaoston. La socio savigos de la problemaro pri la posedrajto, timo kaj potenco-amoro kaj, demetinte siajn superfluaĵojn, ĝi sublimiĝos.

La Edeno ankaŭ nun ekzistas, nur ni ekzilis el ĝi nin mem. ...

La supraj pensoj estas troveblaj en la nova libro de Földi: *Krio el la terico* kaj ili donas bazon ankaŭ al la vasta trivolumenta romano de la sama verkisto, kies titolo estas: *Al la lando de Dio*. F. Sc.

JUBILEO DE F. TUGLAS. En ĉi tiu jaro festis sian 50-jaran naskiĝtagon la konata estona verkisto Friedebert Tuglas, kiun ankaŭ la esperantistoj konas pere de la esperanta eldonaĵo »Kvin noveloj«, aperinta en 1924 tradukite de Henriko Seppik. Du noveloj de li estos ankaŭ

Flirtas haga papilio*.)

Teksto kaj muziko: C. M. Bellman.**)

Andante

Bellman

Flirtas haga papilio en nebul' kaj en sunor' faras domon sur folio kaj la litan sur la flor'. Et-estajojn en la marĉo naskis jam la suna varm'. Ludas la zefira arĉo, pompas la printempa ĉarm'.

Hago, sub printempan signon venas ĉio en la mond', kaj fieran blankan cigنون levas gaje blua ond'. Fonto montras la spegulon al arbar' en luna bril'. Takte frapas sur betulon kaj sur piron la hakil'.

En Brunnsviken la najadoj levas kornojn kun plezur', kaj torentas la kaskadoj; tie estas Solna tur'. Trotas en la bela tago kun fiero ĉevalid', dum feliĉa sin al Hago turnas kamparan' kun rid'

Trad.: E. Malmgren.

Coda

Flirtas Haga papilio en nebul' kaj en sunor' faras domon sur folio kaj la litan sur la flor'. Et-estajojn en la marĉo naskis jam la suna varm'. Ludas la zefira arĉo, pompas la printempa ĉarm'.

Hago, sub printempan signon venas ĉio en la mond', kaj fieran blankan cigنون levas gaje blua ond'. Fonto montras la spegulon al arbar' en luna bril'. Takte frapas sur betulon kaj sur piron la hakil'.

En Brunnsviken la najadoj levas kornojn kun plezur', kaj torentas la kaskadoj; tie estas Solna tur'. Trotas en la bela tago kun fiero ĉevalid', dum feliĉa sin al Hago turnas kamparan' kun rid'

Trad.: E. Malmgren.

*) Hago: parko de Stockholm.

**) C. M. Bellman, elstara poeto en la or-epoko de la sveda literaturo. Komence de la XII-a jarcento.

prezentotaj en la dua parto de la Estona Antologio. Pasis ankaŭ 3 jaroj de tiu tempo, kiam aperis la unuaj literaturaj provoj de la juna Tuglas.

Friedebert Tuglas okupas tute apartan lokon en la estona prozo, liaj ĉefaj trajtoj estas pentrado de animstatoj, de sento-medioj, kaj ĉe tio lia prozo estas tre proksima al la liriko. Iu kritikisto diras, ke en la verkoj de Tuglas troviĝas ĉiuj stiloj, ĉiuj fluoj: naturalismo, novromantiko, impresionismo kaj simbolismo. La fonto de lia art-programo estas la sopiro al mondo pli perfekta — interne pli riĉa kaj intensiva, de ekstere pli bela. Li ŝatas rifugi en sia fantazio ekster la kaŭzecon, tial oni malmulte antaŭdivenas en liaj verkoj la evoluon de la temo. La temo de liaj noveloj ne estas prezentita pere de racia analizo, sed kiel sento-stato, malgraŭ tio ili povas enhavi plej grandajn vivoverojn, sed kompreneble rigardatajn tra la animprismo de la aŭtoro. Legante liajn novelojn, oni estas transportata en ian izolitan, fermitan artmondon, kvazaŭ sur ian insularon, kiu foras de la reale-kontinento. Sur tiun fantazi-insulon kunvokas la verkisto la

leganton por tie senbride festi, por elversi el la animo ĉion ŝvele turmentantan, por povi poste reveni al la sobra pens-kontinento. Estas tre karakterize por Tuglas, ke en li kuniĝas granda fantaziemo kun akra intelekto kaj kritikemo. En liaj verkoj mankas ordinareco, banaleco, malstreĉeco, ĉar li estas postulema al si mem kaj al la leganto. A. Adson diras pri Tuglas, ke li ne nur kreas literaturon, sed ankaŭ «vivas literaturon», ke li estas granda esteto ne nur en siaj verkoj, sed ankaŭ en la vivo. Tuglas estas ne nur alte taksata novelisto, sed ankaŭ konata pro siaj kritikaj laboroj kaj interesaj vojaĝpriskriboj. Aperis de li libroj pri Hispanio kaj Nord-Afriko. Tuglas mem diras, ke li havas du pasiojn: libroj kaj vojaĝado; kaj li estas multe vojaĝinta, komence devige, ĉar de 1906—1917 li estis politika emigranto.

Laŭ lia opinio la plej alta celo estas krei mitojn, — je pli granda feliĉo la artisto ne sopiru. Li trovas la, art-literaturon valora nur, se ĝi enhavas belon sen superfluaĵ aldonoj, senton sen sentimentaleco, sencen sen instruemo. Oni povas konstati, ke la verkoj de Tuglas respegulas tiujn postulojn, kaj tial li okupas apartan lokon en la estona literaturo. La nomo de Friedebert Tuglas jam de jardekoj estas speciale kara al ĉiu estona literaturamanto.

D.

ROMANG DE WILHELM SCHMIDTBONN. Ĉe la jarcenturno en Innsbruck vivis juna Rejn-landano, kiu propre venis tien nur pro la emo migri. Sed plaĉis al li la urbo, kiun li poste nomis la plej fantasta urbo de Eŭropo, plaĉis al li la montoj. Kaj precipe plaĉis al li tirola knabino, tiel ke li edzinigis sin. Kiel li konatiĝis kun ŝi, tio estis tre stranga. Li posedis belan nigran pudelon kaj ĉi tiu kun jubila bojado alsaltis iutage en la Maria Theresien-strato junan knabinon; ŝi apenaŭ povis sin savi de la ĝojsaltoj de la hundo, kiun ŝi neniam antaŭe vidis. La konateco tiel estis farita, kaj estas malnova afero, ke geedzeco ofte farigas en plej strangaj manieroj. Sed pli grava por la germana poezio ol ĉi tiu renkonto estis, ke Schmidthonn tiam laboris pri la dramo »Mutter Landstrasses« (Patrino Landvojo) kiu, malproksime de ĉia nevera romantiko, lumigis la mondon de migruloj kaj perditoj, kiu al li persone ne estis ne konata. La teatraĵo baldaŭ famigis la junan Rejnlandanon, ĝi estis ludata sur multaj germanaj scenejoj kaj eĉ en Ameriko kaj Japanujo. Schmidthonn verkis ankaŭ multajn aliajn, same kiel li verkis ankaŭ multajn librojn post sia unua »Uferlente« (Bordohomoj) ĝis sia lasta ĵus aperinta »An einem Strom geboren« (Naskita ĉe rivero). En ĉi tiu libro li rakontas pri si mem kaj pri sia vivo. Sed ĝuste pro tio, ĝi estiĝis rakontlibro, pli bunta kaj interesa ol multaj elpensitaj. Schmidthonn estas, kiel montras jam lia verkista nomo, naskita en Bonn, ne malproksime de la naskiĝdomo de Beethoven, kiun lia onklo aĉetis kun la helpo de aliaj burĝoj por instali ĝin kiel muzeon. En lia infantezo kaj juneco flubruis la Rejno kaj ĝis hodiaŭ la hejmspiro al ĉi tiu rivero ne forgesis sin anonci ĉe la poeto. Li estis unu el sep infanoj kaj estis du monatojn tro frue veninta en la mondon. Li estis volvita en vato kaj metita en korbo en la sunbrilon, kiu piradiis la Rejan ĝardenon. La patrino batalis por la infano kaj venkis. Li restis vivanta, sed la vivo poste ne plu tiel envolvis lin en vaton. Kia bonega virino estis ĉi tiu patrino, pri kiu li tiom multe rakontas! Kiam ŝi mortis, li sola el inter la gefratoj povis sidi apud ŝi kaj teni sian manon. Tro multe mi ĉagrenis sin dum ŝia vivo, estis silenta interkonsento, ke nun ĉi tiu loko decas al mi.

Longe hezitis Schmidthonn, ĉu li iĝu muzikisto aŭ verkisto. Liajn unuajn poemojn li skribis sur la tegmento de la domo, kaj poste li laŭlegis ilin al la du servistinoj kaj donis ilin al ili kun dediĉo. Foje, ĉe la festo de la patra naskiĝtago, oni perdis la knabon kaj fine trovis lin en la loĝejo de malriĉaj homoj. Tie li sidis en niĉo kaj rakontis al ili historiojn. Pli ol duonjarcenton poste li ligas al tio la deziron, ke ĉe la fino de sia vivo li povu diri, ke li atingis ŝaton kiel rakontisto inter simplaj homoj.

»La malriĉaj homoj estas la plej bonaj,« estas liaj vortoj kaj kun ili li ankaŭ komprenas sin, kun la malriĉegaj montkamparanoj en Tirol, kun la simplaj homoj ĉe la nordmarbordo, kun la migruloj sur la multaj stratoj, sur kiuj li mem estis migrinta. Li estis unu el la unuaj biciklistoj kaj la unua, kiu, mirate kaj admirate, traveturis la svisan Julier-pasejon per biciklo. La migremo kuŝis en lia sango, sed kutime li iris tute siajn proprajn vojojn. Al Norderney li iris en vintro, kiam ĉiuj fenestroj tie estis fermitaj per tabuloj; sed li promenis tie meze en decembro tra florantaj rozogardenoj, kvazaŭ li estus sur la Riviero. Kiam lia teatraĵo estis ludata en Barcelona, riĉa hispana adoranto, kiu studis en Bonn, metis je lia dispono sian domon ĉe la maro. Schmidtbom ĝin opiniis modesta somerdomo, sed ĝi estis pompa vilao kun fama parko, pri kiu estis verkita eĉ libro. La poeto devis al la dommaŝtro redoni la donacon, resti tie dum la vintro. Li estus sin sentinta malfeliĉa en ĉi tiu luksego kaj preskaŭ vive enterigita. Lia vivo devis esti penado por lin ĝojigi. Kaj pro tio li veturis al Mallorca kaj tie trovis inter la nigraharaj hispanoj ankaŭ blondajn grandegulojn kaj grandegulin-ojn, posteulojn de la iama gota loĝantaro, tiel, ke lia vivdeziro, pasigi iam jaron sur Islando, per kelka fantazio ŝajnas plenumita.

Tre malmulte kaj tre malofte Schmidtbom skribas pri siaj verkoj. Ĉe la fino li dediĉas al ili tutan paĝon de la ampleksa libro kaj diras pri ili, ke ili forlasis lin kiel infanoj patron. Tie li ankaŭ plendas, ke de neniu el siaj lastaj teatraĵoj li vidis prezenton.

La poeto estas nun malsana kaj por resaniĝi li devas restadi malproksime de sia hejmlando. Li vivas en la sudo, en tiu Ascona, kie kuradas la longharaj apostoloj kaj vegetaranoj, dioseruloj kaj vivreformuloj. Kun ili Schmidtbom certe havas tre malmulte komunan. Ascona ne estas por li la loko, kie li povus trovi trankvilon kaj pacon — »per senfina mordo la hejmspiro tuŝas lian internon«. Post kelkaj monatoj la poeto iĝos sesdekjarulo. Ni prenas lian »Vivilibron« kiel belan donacon. Kion li rakontas en ĝi, tio radias korvarmecon kaj naturecon, sinceran opinionon kaj amon al ĉio honesta kaj anime nobla.

F. W. V.

IMRE UNGAR.

En marto koncertis en Tallinn nia fama samideano la blinda pianisto Imre Ungar el Hungario, kiu kune kun sia edzino-esperantistino jam dum kelkaj jaroj koncerteले travojaĝas plej diversajn landojn. Li mondfamigis en la jaro 1932 gajninte en Varsovio ĉe la Chopin-konkurso la unuan premion. De 1932 li estas kun granda sukceso havinta en Tallinn kvin koncertojn. Speciale pri la lasta ĉiuj gazetoj aperigis tre favorajn kritikojn.

Li ne nur majstras la instrumenton, sed antaŭ ĉio li estas grandstila muzikesprimanto. Meditema, profundiginta en sia mem, li plene sin donas al la interpretata muzikajo kaj elvokas impresojn de plej granda valoro. Ke la vivo de Ungar evoluas apartmaniere, tio sentiĝas en lia ludo. Rimarkeble superas granda sentemo, tial ankaŭ la preludojn de Bach li interpretis laŭ sia maniero, aldoninte al ili apartajn korvibrigajn nuancojn, pro kio tiuj iam sekaj muzikajoj elyivigis kaj impresis novaj. Krom Bach en la programo estis ankoraŭ Mozart, Beethoven, Debussy, Chopin. Brile sukcesis la lasta sonato de Beethoven op. 111, kiun li prezentis pasie kaj kun intensa travivado.

Bone estis prezentitaj ankaŭ la impresionistaj muzikajoj de Debussy. Kio rilatas Chopin, lin la artisto ludis kun granda korvarmo kaj esprimriĉeco. Ĉar la sento de melankolio pleje respondas al la inspiro de I. Ungar, tial la muzikajoj de Chopin iĝas, de li ludate, speciale profundimpresaj.

Imre Ungar estas blinda de sia dua jaro, Esperanton li eklernis en la blindulinstituto estante 12-jara knabo. Li estas idea esperantisto, serioze interesita pri la Esperanta movado. Laŭeble li vizitas ĉi jare ankaŭ la Universalan Esperanto-Kongreson en Vieno.

Hido.

TRYGVE GULBRANSSON: KAJ ETERNE KANTAS LA ARBAROJN.

Jam post la unuaj paĝoj oni estas kaptita, kaptita de la poeto. Estas agrable legi en la hodiaŭa celkonscia tempo libron, kiu ne havas tendencojn, kiu nur priskribas abundon da travivaĵoj, kiuj havas en si la plenumigon de niaj plej kaŝataj sopiroj. En norvega montarbaro vivas de malnovaj tagoj fieraj gento de kampuloj. Tre fieraj kaj fortaj estas la homoj, ĝustaj sinjoroj, admirataj, timataj kaj malamataj de la loĝantoj de la ebena. Sed la nova tempo kun novaj ideoj kaj novaj homoj frapas sur ilia pordo. Forte ligita kun la eternaj fontoj de la arbaro, ĉi tiu gento de sanaj viroj kaj gajaj virinoj ĉion venkas kaj portas la novajn ekonojn renkonte al la estonteco. Oni deziregas renkonti la personojn de ĉi tiu libro, ĉar ĉiu el ili en sia speco estas admirinda. Thorgeir, la maljunulo de la gento, per kiu la historio komenciĝas, kun sia nerompita sinjoreco, kiu rekonas la povon de la Dio, sed ne volas subigi sin al la malgrandeca moraro de siaj servistoj. Anne Hamnerbø, la pramaljuna, la gardistino de moro kaj kutimo, plastikiĝas antaŭ niaj okuloj, simile al la grandaj virinfiguroj de la antikveco. Dag, la patro, kaj lia bela saĝa edzino Therese, la filino de komercisto, kiu tute enkreskas en sian novan vivon, komprenas krei novon kaj paciĝi ĝin kun la malnovo. Dag, la filo, ĉe kies lulilo staris la kampulreĝa parenaro, la patrino parenaro de malnovaj komercistoj, vivas en la arbaroj la senlignan vivon de libera ĉasisto. En la mastrumo ja ankoraŭ regas lia patro per forta mano. Sed la plejan belon donacas al ni la poeto en la priskribo de la amo de Adelheid Barre, la Fiera majoro-filino, kaj de la juna Dag. Ambaŭ malsociemaj kaj silentemaj, neniu el ili volas montri sian amon. Tio certe estas la pleja belo de la tuta bela libro. Poezia en plej profunda senco kaj tamen interesa kaj ĉarma.

F. W. V.

Nekrologo

Kun granda bedaŭro ni sciigis pri la perdo, kiu trafis la katalunan movadon kaj nian originalan literaturon per la morto de

Artur Domènec Mas.

Li estis esperantisto de la jaro 1913. li klarigis centojn da Esperanto-Kursoj en laboristaj societoj, eĉ per la sendatacjo RADIO-BARCELONA, li verkis multajn poemojn, kelkfoje atingis en la Internaciaj Floraj Ludoj la plej altan premion, la NATURAN FLORON, kaj li estis Prezidanto de la Grupo BARCELONA STELO, sekretario kaj prezidanto de la FLORAJ LUDOJ, sekretario de KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO kaj redaktoro de KATALUNA ESPERANTISTO.

Li estis eks-profesoro pri latina lingvo, eminenta gramatikisto, lernis Esperanton dum kelkaj tagoj.

Li faris multajn prelegojn kaj verkis multajn artikolojn poresperantajn katalune kaj hispane. Kaj dum la diktaturo en Hispanujo, la guberniestro de Katalunujo punis lin per monopuno de 500 pesetoj pro artikolo esperantlingva aperinta en KATALUNA ESPERANTISTO.

Lia morto okazis la 29. aprilo 1936. La 30-an de aprilo okazis la enterigo-procesio, ĉeestata de multaj esperantistoj, inter ili la Prezidanto de KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO S-ro Alberich la eks-prezidanto de la Va UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO S-ro Pujulà, kaj membroj de la grupoj BARCELONA STELO kaj NOVA SENTO.

Nia poeto, Jaume Grau Casas perdis en la karmemora mortino sian bopatron.

Al ĉiuj amikoj kaj parencoj ni esprimas mian plej koran kondolencon.

L. M.

La ŝtona gasto

— Roda Roda —

„Mi amis vin pro viaj aventuroj —
Pro mia kompatem' vi amas min“
Desdemona

Sinjoro Radnay opiniis, ke ŝia filino aspektas malsane kaj venigis kuraciston.

Olga estis iom ĝenata. Dio mia, la kuracisto estas juna, sana kaj ne havas nervojn. Kiam li rigardas ŝin tiel akra-vide, ŝi hontas, ke ŝi lasas al si priskribi fersirupon kaj devas obee engluti ĝin trifoje tage.

Cetere, pri tiu ĉi paleco: doktoro Wendel certe estas tre kapabla en sia fako — sed neniam fersirupo helpas kontraŭ la paleco de Olga. Io konsumas ŝin, kies nomon ŝi mem ne scias. Sed se kapitano Burger ne estus prezentita al ili — ŝi neniam suferus tian turmenton.

Tamen, ŝi ne volus malhavi kapitanon Burger. De kie li venis, la stranga homo? Kion li pensas dum la horoj, kiujn li pasigas silente en ilia rondo? Ĉu li aŭdas la ridadon de la gastoj? Ĉu li vidas la gejunulojn, kiuj babilas kaj muzikas en la salono de la patrino? Aŭ ĉu lia fulmanta rigardo vidas nur ŝin, Olgan? Ho, tiu rigardo, kiu kaptas la ekzaltitan knabinon kaj ne delasas ŝin eĉ por momento — ĝis la adiaŭo...

Kial ŝi sola estis kaptita de lia sorĉo? La patrino ludas bridĝon kiel ĉiam en la ĉesto de Burger — doktoro Wendel babilas — la patro havas sian kutiman distritan rideton...

Ili baptis lin la ŝtona gasto kaj asertas, ke li afekte pozas. Olga scias tion pli bone. Ne, tiuj morte malgajaj okuloj ne mensogas. Terurega travivaĵo devas pezi sur Burger.

*

»Olga,« vokas sinjorino Radnay el la apuda ĉambro, »Kion vi faras? Kial vi ne dormas?«

La knabino saltleviĝas. Mia Dio, kiel ŝi ektimis! Ŝi pensis... Nu, ĉu ŝi kredas je fantomoj kaj aperaĵoj?

Tremfingre ŝi estingas la lumon. Malrapide rampas la horoj. La strathruo pretteruligigas mallaŭtigite, ĉar la vilao de la Radnay-familio staras en distingita soleco.

Ĉirkaŭ noktmezo oni estingas ekstere la lanternojn — nun la dormo-ĉambro de Olga iĝas tute kvieta kaj senluma. Dormas ĉio. Kaj neniŭ pensas pri tio, ke Olga Radnay turmentas sin por trovi la kialon de la melanĉolio de kapitano Burger.

*

Marde sinjorino Radnay havas sian akcepto-tagon. En la salono sidas amaso da dignaj sinjorinoj, en la fumejo la sinjoroj kartludas. Estas plej vikle ĉe Olga. La filino de ministra konsilanto ludas tangon kaj daŭrigas post multaj petoj per populokanto. Duonkreskintaj bubinetoj sidas ĉirkaŭ la tabelo kun albumoj sur la genuoj.

Malantaŭ la fortepiano staras du seĝetoj. Tie sidigis Olga kaj doktoro Wendel. Antaŭe oni multe ĥercincitis Olgan pro doktoro Wendel. De kiam la ŝtona gasto venis, oni ne plu faras tion...

La kuracisto sidas iom klinite antaŭen kaj suprenrigardas al Olga. El liaj okuloj elrigardas supereco kaj deziro.

»Kiel vi defendas lin, Olga! Kaj mi nur asertis, ke sen la kapitano estus pli hejmece agrable ĉe mi.«

»Vi estas envia, doktoro!«

»Ne, ĵaluza.« — li klinas sin pli proksimen al ŝi kaj flustras...

La sango fluegas al ŝia kapo; ŝia mano tremas...

*

De tri tagoj Burger ne estis ĉe la familio Radnay. Olga ne povas kompreni, kie li restas. Ĉu li malsanas — forlasite, ĉenita al sia lito?

Senokupe ŝi sidas ĉe la fenestro. La patrino envenas havante la ĉapelon sur la kapo, preta foriri. — »Vere vi povus min akompani, filineto. La freŝa aero estus por vi bona.«

»Ho, dankon, patrino, mi preferas resti hejme.«

»Vi iĝas vera ĉefkonsidantino, melankolia spirito, laŭ Burger.«

Olga rigardas sian patrinon rekte en la vizaĝon: »Patrino, mi petas vin: moku pri io ajn, nur ne pri Burger. Tion mi ne povas aŭdi.«

Ŝia voĉeto tremas kaj sangondo kolorigas ŝiajn vangojn.

Longe tirata fajfado ŝvebas sur la lipoj de la senĉeremonia sinjorino Radnay. Sed ŝi prudente subpremas tiun signon de kompreno. »Tiiiel!« ŝi diras, kaj levigas. »Tiiiel! — Dio gardu vin, etulino! Enuigu vin laŭeble plej amuze! Mi venos ĉirkaŭ la sepa.«

Sinjorino Radnay subeniras la ŝtuparon. »Tiiiel,« ĉi ripetas en siaj pensoj. »Tiel estas la afero. Do oni metos ĝustatempe seruron antaŭ la pordon kaj iomete malfunkciigos la interesan viron.«

Duonhoron poste, ŝi miksas la bridĝkartojn ĉe sinjorino de Töring kaj ne suspektas, ke ŝia ŝafido ordonas en tiu ĉi sama momento al la servistino, enlasi la lupon — malgraŭ ke la patrino ne estas hejme.

Richard Burger nun sidas sur la loko de la patrino kaj ludas pensiginte kun la multkoloraj fadenoj de brodaĵo.

Olga atendas, ke li ekparolu.

»Kial vi estas ĉiam tiel malĝoja, sinjoro kapitano?«

Li silentas. Eble li ne aŭdis la demandon, eble li ne volas respondi...

»Kial?« ŝi insistas. La vorto preskaŭ forbloviĝas pro la galopanta bato de ŝia koro.

Burger apogis la kapon en sian manon. Flagras en liaj okuloj. »Jam multaj demandis antaŭ vi, Olga. Mi povis diri ĝin al neniŭ. Jen... la kompatemaj animoj retiriĝis kaj lasis min al mia sorto. Al la soleco. Se nur unu iam troviĝas, kiu helpus silente al mi porti, kiu atendus, ĝis mia animo malfermos sin al ŝi per si mem... Sed tia ne ekzistas en la mondo.«

Olga rigardas lin emociite. Nun, nun venis la momento, kiam la mizera viro rajtas postuli de ŝi la vivon ofere.

Malrapide ŝi etendas sian manon trans la tablon. »Mi neniam demandas.«

Li esplorrigardas ŝin, kvazaŭ ne kredante.

Jen ŝi kappesas konfirme.

Fulmrapide li eksaltas, prenas ŝiajn ambaŭ manojn kaj skuas ilin malmilde. »Ĉu estas eble? Olga! Ĉu estas amo, kion vi sentas por mi?«

»Estas amo,« murmuris Olga, timtremante. — Li jam ĉirkaŭbrakis ŝin kaj flamiĝas sian vizaĝon per siaj kisoj.

Ne, oni ne devas ektimi de ŝia Richard. La malĝojo fuĝas, la sulkoj de lia frunto glatiĝas sub la karesoj de ŝiaj manoj. Unufoje li eĉ ekridis laŭte.

Mezen en la feliĉon akre sonas la antaŭĉambra sonorilo. Post unuminuta aŭskultado Olga rekonas la voĉojn.

AŬSTRIAJ POĤTOJ

— El la germana: Jenny Weleminsky —

Respondo

— Grillparzer —

Ĉu vi forlasis poezion?
Ne perdis mi la emon!
Se mi ne povus skribi ion,
Mi vivus la poemon.

Malŝati popolaĉan ŝaton,
Al si sufiĉa,
Ne fali en malvirtan staton,
Fiera, se ne riĉa.

Nek estas manko de talento,
Nek versoj raras.
Pli alta ol la mond', la sento,
Poetojn faras.

Kaj se ekzistus en la juna koro
Nur vervo suna,
Neniam disiganta de l' honoro,
Ĝi restus ĉiam juna.

Aliajn nur timigu minacsorto,
Ne min!
Kaj eĉ mortanta, estu mia morto
Poema fin'.

La majstro kaj lia verko

— J. G. Seidl —

De traboj nudigita jam staras katedralo,
Tuŝante preskaŭ nubojn; la turo de la halo
Nun celas al ĉielo, fortega kaj plensorta —
La majstro staras sube, malgranda kaj malforta.

»Nun estas plenumite! Sur pergameno iam
Ĝi staris, nun en mondo, videbla kaj por ĉiam!
Ĉirkele mia nokte prizorgis la desegnon,
Kaj naskis nun mil manoj miljaran ĝian regnon.

Se havus mi mil manojn, kaj ĉiu man' el ŝtalo,
Kaj ĉiuj mil alkroĉus sin al la katedralo,
Ne povus mi eĉ unu kolonon ja forŝovi: —
Mi kreis, Di' nur rompos! — Ho homo, granda do vi!

Obstine vokas tion li al la firmamento,
Riproĉe flagras fulmo videbla en oriento.
»Sed strange« li daŭrigas, — »mi tion sola faris,
Nun altas ĝi en nokto, en vivo ĝi ekstaris.

Ĝi estas mia verko, sed ja superas min,
Revoki mi ne povas, ne povas rompi ĝin!
Se vivus mi cent jarojn, cent jarojn estus morta,
Kaj tiam mi revenus, ĝi estus same forta.

Se havus mi mil manojn, kaj ĉiu man' el ŝtalo,
Kaj ĉiuj mil alkroĉus sin al la katedralo,
Ne povus mi eĉ unu kolonon ja forŝovi! —
Mi kreis, Di' nur rompos! — Ho hom', malgranda do!

Kio estas amo?

— F. Halm —

Ho koro, diru kio
Do estas sento ama? —
»Animoj kun sama penso,
Du koroj kun bato sama!«

De kie venas amo? —
»Ĝi venas kaj ĉeestas!«
Kaj kiel mortas amo? —
»Se ĝi mortas, ĝi am' ne estas!«

Kaj la plej pura amo? —
»Forgesas sin senplende!«
Kaj plej profunda amo?
»Ĝi amas plej silente!«

Kaj kiam ĝi estas plej riĉa? —
»Sin fordonanta tute!«
Kaj kiel parolas amo?
»Silentas, ĝi amas mute!«

La epitafio

— Anastasio Grün —

Ofte skribas vi sur ŝtonon:
»Ne havis malamikon li!«
Granda laŭdo estu ĝi,
Sed enhavas ja malbonon:
Estus ĝuste tiel bona:
Lia koro estis ŝtona,
Oni traktis lin kiel ludilon,
Oni knedis lin kiel argilon,
Blinda por la lumo estis la okulo,
Muta lia buŝo kontraŭ malbonulo.

Ne forrabu mian memoraĵon
Mian havon, plejan valoraĵon:
Malamikojn ja, kies kolero
Estis sprono, krono kaj fiero;
Do estu ŝtono mia
Sen vorto tia.

Estas onklino Irene kaj kuzino Marie. Animtrankvile Olga iras renkonten al la gastoj. Nenia postsigno de konfuzo. Anstataŭ tio, ŝi sentas fieran ĝojon. — Post la diversaj manpremoj kaj kisoj ŝi prezentas Richard Burger kiel sian fianĉon.

»Ja de kiam, infaneto?...« vokas la onklino surprizite. »Kaj via patrino? Via patro?»

La stranga knabino suprentiras la ŝultrojn. — »Kiam la patrino venos hejmen, ni kompreneble informos ŝin.«

La onklino kaj la kuzino interŝanĝas rigardojn. — »Kie estas do via patrino?« — La tono de la onklino

estas severa.

Dum unu sekundo li tenas la manon de sia fianĉino. — »Estu firma, Olga! Estu firma!«

Kuraĝe ŝi alridetas lin. — »Vi venos morgaŭ ĉirkaŭ la dekunua, ĉu ne, Richard?«

La tri foriras.

Je la proksima stratangulo la onklino adiaŭas sian estontan nevon, dirante ke ŝi iru kun Marie al la kudristino.

Sed apenaŭ Burger malaperis el la vido, kiam la paro sin turnas al la veturilstarejo. Ili interkompreniĝis

per sola rigardo: al sinjorino de Töring! Oni vidu, kiamaniere la amegata bofratino ricevos la sciigon pri la fianĉiĝo de sia filino.

*

Sinjorino Radnay diras al siaj amikinoj, ke ŝi opiniis ke ŝia filino havas pli bonan guston; ĉiokaze oni devas havi kuragon por vegeti kun tia senĝoja ulo. La patro enterigas siajn esperojn pri agrabla bofilo, kun kiu oni povus kartludi dum la longaj vintraj vesperoj. Pri la decida interparolado inter patrino kaj filino oni ne aŭdas eĉ vorteton, ankaŭ ne en la plej bone informitaj rondoj.

Do tiel Olga kaj Burger estas gefianĉiĝintaj.

De kiam ili iras la vojon duope, Burger ne plu estas tiel malĝoja. Des pli turmente lia sekreto mordetas je la koro de la bedaŭrinda Olga. Sed ŝi persistas kaj ne demandas. Kiam gaja brilo traĝlitas sur liaj trajtoj, ŝi estas feliĉa.

Ŝi scias, ke ĉiu alia knabino en ŝia loko elektus doktoron Wendel. Sed pro nenio en la mondo ŝi ŝanĝus la simplenan plaĉon por la vivanta enigmo.

*

Oni ludas la operon »Othello«. La familio Radnay sidas kun la kapitano en logio. Sinjorino Radnay opinias la bonan Burger aĉa, kaj mencias sian suspekton, ke lia melankolio venas de digesta perturbo. Kaj la teatraj scenoj, kiujn li ĉiam ludas! Nur ĥieraŭ estis denove sceno. Hodiaŭ estas unu el liaj maloftaj ĝentilaj tagoj. Desdemono sur la scenejo kantas:

»Mi amis vin pro viaj aventuroj,
Pro mia kompatem' vi amas min.«

Jen, la manoj de la fianĉa paro trovis sin kaj kunigis kun forta premo.

Ridante Olga sidas ĉe lia flanko. Dum la interakto ili babilas kune mallaŭte. Sinjorino Radnay denove ekhavas iom da konfido al la estonteco de sia ununurulo. Eble li tamen evoluos en tolereblan homon.

Poste venas la fina sceno. Othello anoncas al sia edzino, ke ŝi mortos per lia mano.

Subite Burger staras rekte, ambaŭ manoj fiksapogas

sin sur la logia rando, li antaŭenŝovas la kapon. Liaj dentoj klakas aŭdeble.

»Richard! Richard!« flustras Olga petege kaj tirtas lian manikon.

La gepatroj ne aŭdas; ilia tuta atento estas turnata al la bravega Othello.

»Richard!«

La kurteno falas. Aplaudado kovras la akran krion, post kiu Burger falas teren svenante.

... »Tiamaniere oni ne povas daŭrigi — oni devas fari ion«, diras patro Radnay al patrino Radnay, kiam ili priparolas la strangan okazaĵon en la silento de sia dormoĉambro.

*

La postan tagon Olga aspektas ne dorminta kaj havas postplorajn okulojn. Pro tio la patrino estas mal-Bonhumora. Ŝi decidis konsulti doktoron Wendel.

Vespere Burger venas. »Kion vi devis pensi pri mi, patrino?« li demandas spione.

Ŝi sekvas sian politikon, la malfeliĉiga fianĉeco rompiĝu — sed sen ekscito.

»Kion mi pensis, kara Burger? Ke vi estas muzik-frenezulo kaj tre nervoza.«

Liaj okuloj ekbrilas kontente. Li aspektas terura hodiaŭ. Lia vizaĝo estas blanka kaj pinta, ruiniĝinta. Liaj manoj tremas.

Post la vespermango la fianĉa paro sidas en la salono. Apude la gepatroj mallaŭte interparolas kun doktoro Wendel.

Delikate ŝi ŝovas sian manon en la lian. — »Richard, mi promesis al vi ne cerbumi pri via sekreto. Sed ĉu ne estus pli bone, se vi dirus ĝin al mi? Mi tiel amas vin, Richard!«

»Richard«, ŝi ree komencas, ankoraŭ pli timeme — diru ĝin al mi!«

Li ekzamenas ŝin per brilantaj okuloj. — »Jes, mi diros ĝin al vi. Ĉu vi juras, ke vi silentos? Vi juras? Je via animo?«

»Je mia animo.«



Corinth:

Tirola
pejzaĝo

LA SVATANTO

— de L. N. Newell —

En «Eŭropo oni plej nature kaj facile amikiĝas al fraŭlino se oni estas fraŭlo; la honestaj knabinoj ne kutimas altiri la atenton de la edzoj. Kontraŭe, en Egiptujo, mi konatiĝis kun Nigma ĝuste tial, ke mi ne estis fraŭlo, sed respektinda kaj sendanĝera edzo. Se oni vidus ŝin parolanta al mi (diskrete, kompreneble, sen troa ridado), tamen ne povus esti skandalo; se oni estus vidinta ŝin babilanta kun juna senedzina viro, ŝia reputacio estus ruinigita por ĉiam, kun, por egiptino, teruraj sekvoj.

Iam mi instruis en knabina lernejo, kaj tie, en la porinfana fako, instruis ankaŭ Nigma Josef. Mi tuj rimarkis ŝin, ĉar inter siaj taskoj, ŝi devis ankaŭ prizorgi la tabelon de la lecionoj por la duagradaj klasoj, kaj mi devis aranĝi mian laboron konsulte kun ŝi.

Ŝi tiam havis proksimume dudek-kvin jarojn, kaj estis mezalta, kun korpo svelta kaj tre gracila; kaj kiam ŝi forĝesis, ke ŝi devas imiti la eŭropajn sinjorinojn, ŝi sin movis sufiĉe bele. Kion plu? Tre nigraj haroj — longaj, kompreneble; grandaj nigraj okuloj, blankegaj dentoj, lipoj iomete tro larĝaj, haŭto malpale bruna. Ŝi ofte ridis, kaj ŝia esprimo estas afable mokema. La voĉo estis iom rauka, sed ne malagrabra; ŝi estis helpema, kaj ŝajnis bonkora.

Kun mi ŝi evidente volis amikiĝi, pro du kialoj: unue, ŝi ŝatis ĉion eŭropan, kaj kompense malŝatis preskaŭ ĉion egiptan; due, mi flue parolis la francan lingvon, kaj ŝi tute ne parolis la anglan lingvon. Simile al tre multaj egiptinoj el la «respektindaj» familioj, ĉu mahometanaj, ĉu kristanaj, ŝi estis edukita en franca lernejo — ĉu laika, aŭ religia, mi ne plu memoras. Kredeble religia, ĉar Nigma estas koptino, kaj la koptoj preferas la kristanajn lernejojn.

Ĉe nia unua intervjuo, la franca lingvo tuj faris ligan inter ni; mi ĝojis, ĉar mi povis paroli al ŝi senpene, anstataŭ paroli malrapide kun iu, kiu apenaŭ komprenas la anglan lingvon; ŝi ĝojis, ĉar ŝi povis rilati kun eŭropano.

Tamen, la unua interparolado ne estis sen danĝero. Kiam ŝi estis aranĝita la horojn de miaj lecionoj, ŝi diris al mi, kun la surfaca rideto de tiu, kiu estas preta ofendiĝi. «Vi ne ŝatas akcepti ordonojn de virino, ĉu? Kaj precipe de brunulino kia mi?»

Evidente komplimento estis necesa, kaj mi faris mian eblon.

«Ĉu ĝis via mortohoro?»

«Ĝis mia mortohoro. — Diru ĝin, Richard!»

Subite li turnas sin al ŝi. Malmilde li ĉirkaŭprenas ŝian brakon per siaj fingroj kaj siblas en ŝian oreilon:

«Mi iam virino... mortigis. Ĉu vi komprenas? Ŝi ridis. Mi ne toleris aŭdi tion. Kaj ŝi daŭre ridis. Do tiam mi fermis al ŝi de malantaŭe la okulojn kaj la buŝon — ĝis ŝi estis morta. Ekstere en la arbaro. Poste mi trenis ŝin per la haroj — en la dornaĵon. La sango fluis super ŝian blankan veston. Longa tempo pasis de tiam. Kvintcent jaroj. Sed... ŝi ne estas enterigita. Tie ŝi kuŝas — en sia sanga, blanka vesto — en la dornaĵo — kaj atendas. Kiam oni trovos ŝin, ŝi diros, ke estis mi kiu faris tion. Jam de longe ili suspektas min. Ili ŝtelkaŭre atendas min — detektivoj ŝtelkaŭras ĉirkaŭ mi. Ĉu vi komprenas? Ĉar mi estas suspektata.»

Olga fiksigardas lin kun muta teruro.

La patro, la patrino, doktoro Wendel enrapidegas la

«Kontraŭe,» mi respondis, «ĝi faras nuran laboron efektiva plezuro. Kaj, se vi sciis kiom mi suferis por bruniĝi mian haŭton! Ĝi estas la koloro, kiun mi plej admiras.»

Cetere, en tiu komplimento troviĝis apenaŭ mensoĝeto. Ŝi nomis min flatemulo, sed ridetis kontente; kaj mi rimarkis, ke mi ne estas farinta al mi malamikon. Ŝi diris jam de la komenco la familiarajn *tu kaj toi*, kiel tre multaj egiptoj france parolantaj.

Tio estis mia unua percepto pri ŝia preskaŭ mal-sana sento pri la propra senindeco, ŝia timo pri mal-respekto aŭ malestimo; ŝi deziregis esti eŭropanino, kaj dolore konsciis, ke ŝi estas «nur» (la vorto estas ŝia, ne mia), nur egiptino brunhaŭta. Ŝi mem proponis, ke mi malestimu ŝin, ĉar ŝi bezonis aŭdi mian aserton, ke mi tute ne malestimas ŝin.

Poste, ŝi tre ofte kaptis la okazon alparoli min, kiam mi eliris klasejon post leciono; ŝi kvazaŭ embuskis min, kaj alparolis al mi torenton da francaj frazoj. Tamen, mi ne tro lasis mian viran memestimon fierigi; mi sciis, ke ŝi ne persekutas min ĉar mi estas mi, Noel Mansell; eĉ ne tial, ke mi estas virsekulo; sed nur tial, ke mi estas tre blonda membro de la angla raso; kaj ĉar tio estis honoro, kiun mi partoprenis kun kvindec milionoj da aliaj homoj, mi ne tro vantis mian allogon.

Ŝi parolis pri diversaj aferoj, ne tre interesaj: pri la klimato, pri la lernejaj ferioj, pri la karaktero de miaj instruatoj, kaj similaĵoj. Tamen, nia rilato progresis ĝis la punkto, kiam mi povis inviti ŝin temangi kun mia edzino kaj mi en nia hejmo.

Ŝi levis la kapon kun rapida rideto, kiam mi diris tion; konfirmante mian suspekton, ke ĝi estas esperinta tiun inviton jam de longe. Tamen, ŝi devis antaŭviti repuson al ŝia fervoro, kaj diris, «Vi estas tre afabla. Sed kial via edzino interesigas pri egipta instruistino? Ŝi ne vere deziras renkonti min.»

Mi estis alktumigiĝinta al ŝi, kaj havis mian respondon preta. «Sed, fraŭlino, mi multe parolis al ŝi pri vi, kaj ŝi senpacience atendas la okazon vin vidi. Ĉu proksiman jaudon?»

«Mi ne scias, ĉu mi povos. Petu, ke ŝi sendu al mi invitleteron, kaj tiam mi sciigos vin pri la afero.»

Tion mi ne estis atendinta; sed post momento mi divenis la veron, kiun ŝi ne volis konfesi. Respektinda egipta fraŭlino ne povas viziti amikojn sen la permeso

salonon.

Wendel vidas flagri frenezon en la okuloj de Burger — li vidas Olgan duonmorte genui sur la tapiŝo.

«Tuj mi venos kun vi, sinjoro kapitano! Unu momenton.» — Li puŝas Olgan, kun la gepatroj, en la apudan ĉamburon, sonorigas la telefonon — kaj revenas al Burger kaj lasas rakonti al si la murdhistorion ankoraŭ unufoje — pli vaste, pli detale. Burger priskribas al li ĉion.

Dudek minutoj pasas. Jen haltas post fulmrapida veturo aŭtomobilo antaŭ la domo. Wendel ekspiras. La savularo. La kuracisto kaj kvar fortegaj flegistoj.

Burger furiozas kaj preskaŭ sufokas la doktoron, la perfidulon, kiu vokis la policon.

La kompatemaj manoj de Wendel kuntiras la pordkurtenojn, por ŝpari al Olga la vidon, kiel oni kondukas ŝian fianĉon al la frenezuleja aŭtomobilo.

El la germana: J. Weleminsky.

de ŝiaj gepatroj; kaj Nigma bezonis la leteron por montri al ili kaj por havi la permeson.

Nu, ni sendis la leteron, kaj ŝi respondis, ke ŝi volonte venos, se ŝi povos kunveni sian fraton, »ĉar ŝi timas trairi la urbon sola.« Kio signifas, ke ŝi ne estas permesata viziti amikojn sen dueno, ĉu patro, patrino aŭ frato.

Ili alvenis; Nigma estis sin vestinta honore al la okazo. Ŝi portis belan robon, tre modan laŭ la gusto de Egiptujo, kiu estas sufiĉe simila al la gusto de Parizo: altajn kalkanumojn, kiuj iom malbonigis sian belan marŝon, ĉar ŝi ne tute kutimis al ili; kaj en tiu varmega klimato, ŝi portis longajn ĝiskubutajn gantojn. Kaj — kompatindulino! — por impresi mian edzinon, ŝi estis teginta sian vizaĝon per blanka pudro? Tion ŝi faris por kaŝi sian brunecon, sed ĝi nur donis malsanecan aspekton al ŝi velura haŭto. Mi suspektas, ke ŝi portis la gantojn samkiale.

Post la salutoj, ŝi sidis silente, singardema mian edzinon por vidi, ĉu necesas sin prepari kontraŭ rikanoj. Iom post iom ŝi trankviliĝis, kaj komencis babilu, laŭ la kutimo de virinoj en ĉiu lando, pri robaj kaj modaj kaj similaj virinaj aferoj. Dume, mi konversis kun la frato, junulo dudekjara, kiu estis provonta la *Bachot*, kaj estis edukata en franca religia kolegio. Mi miris, kiom la francoj sukcesas stampi la egiptojn per franca aspekto; li parolis kaj gestis kiel franca junulo, kiu kombinas necertecon pri sia valoro kaj pri sia impresoj de aliaj, kun la opinio, ke li ĉion scias pri la mondo. Ni parolis pri la literaturo. »Jes«, li informis min, »en la angla literaturo estas bonaj, sed entute ĝi ne multe valoras kompare kun la franca. Mankas al la angloj formo, stilo; ili havas geniulojn, sed barbarajn geniulojn.« Li rigardis min por vidi, kian impreson li faras; mi faris la taŭgan respondon.

»Sed Shakespeare, Milton? Ĉu estas poezio pli bela, ol ilia?«

Kaj tiel plu: la kutima konkurado kiam franco renkontas anglon.

Nin ne aŭskultis Nigma; ŝi havis praktikan menson, kiu ne malŝparas tempon pri la literaturo. Ŝi estis tiam parolanta pri filmoj kaj la beleco de la aktorinoj.

»Ĉu vi iam vidis Greta Garbo? Mi pensas, ke ŝi estas bela. Kia blanka haŭto! Ne kia mi, brunulino! Kion mi farus, se nur mi povus esti blonda, kiel ŝi!«

»Sed kial, fraŭlino? Vi sinjorinoj ja estas amuzaj: jen en Eŭropo preskaŭ ĉiuj virinoj volas esti brunaj, kaj sidadas multajn horojn sub la suno por bakiĝi. Ili eĉ pagas grandajn sumojn por kosmetikoj brunigaj. Kaj jen vi kaj aliaj egiptinoj, kiuj volas la kontraŭon! Laŭ mia opinio, la bruna haŭto estas pli bela, ofte, ol la blanka.«

»Ah, sed ne estas la sama afero«, ŝi diris. »Ili estas eŭropaninoj, do ili bone povas brunigi sin, sed mi estas egiptino.«

Frazo certe neklara, tamen mi ĝin komprenis, ĉar mi estis jam renkontinta la egiptan snobismon pri haŭtkoloro. Ekzistas multaj egiptoj blankaj aŭ preskaŭ blankaj; ili estas la plej feliĉaj kaj malestimas ĉiujn aliajn. Poste, estas tiuj, kies haŭto havas la koloron de kafolakto; ilin ridigas la brunulojn de meza kaj suda Egiptujo. Ĉi tiuj siavice povas moki nur la nubianojn kaj sudananojn nigrajn. Kiujn la sudananoj malestimas, tion mi ankoraŭ ne eltrovis, sed certe iujn. Mi ne surpriziĝus, konstatante, ke tiu ĉena malestimo trairas tutan Afrikon ĝis Cape Town.

Mi ankaŭ sciis, ke tiu snobismo estas pli forta ĉe la virinoj, ol ĉe la viroj: egipto konsentus edziniĝi virinon pli brunan, ol li, sed egipto ne volas edziniĝi al viro pli brunan, ol ŝi; ŝi tro sentas sian superecon.

»Nu, ĉu ni diris al Nigma, »arango kun kuracisto, ke li donu al ni vian haŭton, kaj al vi nian, kaj ĉiu estos kontenta!«

Tiu ideo amuzis ŝin, kaj ŝi komencis paroli ankoraŭ pli hejmece. Ŝi naive interesiĝis pri la mebloj, bildoj kaj drapoj de angla hejmo, kaj volis rigardi ankaŭ la subvestojn de mia edzino. La du virinoj foriris en la litambon, kaj mi aŭdis viglan konversadon kaj ridojn. La



Kolig:

La familio de la pentristo

plimulton ŝi admiris, sed ne povis kompreni la simplecon, senornamecon de kovriloj, vestoj kaj similaj aferoj. Ŝi ĉion rigardis, admiris, sed ŝi ne notis por poste imiti; spite ŝian ŝaton pri ĉio eŭropa, mankis al ŝi la risorto, kiu instigus al ŝi eŭropanigi sin.

Entute, la vizito estis sukcesa; Nigma tiom sentis sin senembarasa, ke ni eĉ persvadis al ŝi instrui al ni araban kanton de la felahoj. La penso, ke ni volas lerni kamparanan kanton, longe ridigis ŝin: vere komika ideo; sed fine ŝi ekkantis, iom ruĝigante, ĉar ŝi kantas laŭ la maniero de la neinstruitaj kamparanoj, anstataŭ laŭ la maniero de Badia' Mesabni, la plej moda kantistino en Egiptujo.

Post tio, ŝi pli ofte parolis al mi en la lernejo, sed zorgis ne paroli pri la vizito, se alia instruisto troviĝis en aŭdodistanco. Baldaŭ temis pri revizito, ĉar necesis prezenti siajn eŭropajn amikojn al la familio. Estis aranĝite, ke je unu el la festotagoj ni iru al la domo de ŝia patro.

La egiptoj estas gregemaj homoj, kaj plej feliĉe laboras multope, kune babilante kaj ridante. Ili ŝatas la kunpremon de iliaj kunuloj; ekzemple, unu taksio an fiakro ofte devas enteni dek aŭ dek-du homojn samtempe. Same pri la hejmo; la familianoj ŝatas kune vivi, kaj ĉar la egiptaj familioj estas grandaj, ili kunloĝigas nekredblan nombron da homoj en unu malgranda apartamento.

Tial, kiam oni eniras egiptan hejmon, oni estas prezentata al tiom da familianoj, ke estas neeble memori ĉiujn. Mi do havas nur malklaran memoron pri la personoj, kiujn ni renkontis dum nia unua vizito en la familio de Nigma Josef, krom pri Nigma mem, ŝia frato, kiun ni jam konis, kaj — plej granda surprizo — angla soldato, serĝento en la regimento tiam deĵoranta en la urbo. La anglaj soldatoj en Egiptujo estas la plej solecaj homoj en la mondo, kaj mi tre miris pri la ĉesto de ĉi tiu.

Komence la konversado estis malfacila, kiel ĉiam ĉe tiaj internaciaj kunsidoj. La soldato parolis la francan lingvon kun aĉa akcento, sed sufiĉe flue; tamen, ni devis atenti, ke li, mia edzino kaj mi ne komencu privatan konversadon en la angla lingvo pro facileco. La virinoj baldaŭ trovis temon por si: fanfaronado kaŝita pri siaj kudraĵoj, brodaĵoj, trikajoj. Mi rigardis longan serion da vestoj, kovriloj, tablotukoj kaj similaj, paciencie broditaj kaj ornamitaj en Nigma kaj ŝia fratino, kaj zorge konservataj en ŝranko, por ke ili ne difektuĝu per la uzado. Mi rimarkis, ke la prudeco de la egiptinoj tamen permesas, ke ili montru tiel siajn kalsonojn kaj similajn intimajojn.

Poste, mi sukcesis ne malgentile paroli kun la soldato. Li estis juna kaj tre blonda, proksimume dudek-okjara, kun brosaĵ lipharoj; unu el tiuj angloj, kiuj aspektas ĉiam, kvazaŭ ili ĵus sin banis. Liaj grizaj okuloj estis seriozaj kaj malkaŝaj, kaj mi baldaŭ rimarkis, ke ili sekvas la formon de Nigma pli ofte, ol la aliajn.

»Jes, ĉi li diris, respondas al demando mia, »mi konas la familian jam dek sep-ok monatoj. La plej aĝa frato frato estas kontlibristo en la kantino, kiun mi estras, kaj iam li invitis min. Mi estis sufiĉe kontenta akcepti, ĉar ni ne konatiĝas kun multaj homoj en tiu ĉi lando... La franca lingvo? Nu, mi iomete lernis en la duagrada lernejo en Anglujo; kaj mi studis el libro tie ĉi; mi pensis, ke se mi vizitas la familion, mi devus almenaŭ iom paroli kun ili, kaj nur la plej aĝa parolas la anglan lingvon. Mi suspektis, ke precipe kun Nigma li volis paroli; li estis tiom fremda en tiu medio, ke nur tia

Pagate estas . . .

— J. P. Jacobsen —

Pagate estas dum jaroj de pun'
por kura, plezura momento.
Kion ride ni faras en fluga hor',
ne lavas jarlonga plorpenito.
Elfluas malĝojo, elfluas amaro el rozoj ruĝaj.

Triumfe, orrade nin portas Fortun' —
kapturmon dumfluge ni sentas,
sed nigra, trenpeza, la ŝarĝo Malĝoj'
ĉe l' halto nin tamen atendas.
Elfluas malĝojo, elfluas amaro el rozoj ruĝaj.

En dormon duone vin lulas plezur' —
neniam ekdormas malĝojo...
Ĝi firmarigarde logsuĉas vin,
turnakvon simile, ĉe vojo.
Elfluas malĝojo, elfluas amaro el rozoj ruĝaj.

Vin rido ne volas prilumi ĉe l' lit',
sed larm' havas horojn sen nombro;
ĉar rid' estas nur de la nuno ekbril',
sed plor' — de l' pasint' estas ombro.
Elfluas malĝojo, elfluas amaro el rozoj ruĝaj.

El la dana: *Majda Carlsson.*

kialo igus lin lerni la francan lingvon kaj vizitadi la familion.

Tiam Nigma interrompis nian interparoladon, proponante, ke ni rigardu la familian foto-albumon. Tiu rito estas plenumata de ĉiu gasto ankaŭ en Egiptujo; kaj same kiel en Eŭropo, ĝi tre utilas por ŝtopi truon en la konversado. Tiun celon ĝi trafis, kvankam estis unu momenta embaraso. En la albumo staris foto de egipta oficiro, kun aĝla vizaĝo preskaŭ nigra; li aspektis tre vireca, efektive bela tipo. Ni tion diris: »Kia bela viro!«

Nigma rigardis nin momente, tute senkomprene. Ni rimarkis, ke ni faris eraron. Sed feliĉe nia eraro amuzis ŝin, kaj ŝi ridegis. »Sed... sed, ĉi balbutis, »li estas nigra! Aŭskultu, patro, ili opinias la nigrulon bela!« Kaj sub la ŝirmo de ŝia ridado, ni ekparolis pri io alia. Ni petis, ke ŝi ludu iun muzikaĵon per la piano, kiu staris en la sidĉambro.

»Ne, vi ne deziras aŭdi min ludi, ĉu? Kiel egipta muziko povus interesi vin?«

Ni sciis la respondon al tia demando, kaj baldaŭ ŝi ekludis. Ŝi prezentis al ni la plej lastan ĵazaĵon, por montri, ke ŝi scias ion alian, ol la mizera popolkanto, pri kiu ni estis petintaj dum ŝia vizito al ni. Ni aplaudis, kaj ne kuragiĝis peti, laŭ nia prefero, pluajn felahajn kantojn.

Post longa vespermanĝo, kaj babilado pri la klimato, pri la lernejaj ferioj, pri la karaktero de ŝiaj kaj miaj instruatinoj, ni foriris samtempe kun la soldato, kiu nomigis Felton. Kun li mia edzino kaj mi marŝis al la centro de la urbo, por trafi aŭtobusojn. Kaj dum ni zigzagis tra la mallumaj stratoj, evitante koton kaj azenrajdantojn, ni ĉiuj havis tiun jukon en la animo, kiun oni havas, kiam kunveno ne marŝis bone, kiam la intima fluo de la parolado mankis, kiam oni montris sin malsprita.

Mi singardeme parolis al Felton pri Nigma. »Eksterordinare agrabla junulino, tiu Nigma. Si havas grandan kuragon, ĉar ŝi sukcesis venki la antaŭjuĝojn de la familio, kaj labori ekstere. Maloftajo, tio.«

»Je-es,« li parolis malrapide, »ŝi estas alloga knabino. Jes, ni tre ŝatas ŝin. Efektive, — li haltis, kaj rigardis min serĉe por recertiĝi, ke mi estas tia homo, al kia oni povas paroli sen timi mokon. La anglo ĉiam timas mokon pri siaj amaferoj.

»Efektive,« li daŭrigis, post momento, »mi kelkfoje pensis, ke mi ŝatus promeni kun ŝi.« Li uzis la anglan popolan esprimon por la antaŭfianĉeca interkonigo, kunpromenado, reciproka provado. Si estas honesta knabino, kaj serioza.« Subite li konsciis, pri kia temo li parolas, kaj ruĝiĝis; kaj marsis kelkajn minutojn senparole.

»Nu,« li daŭrigis, kun tiu bezono pri malkaŝa parolado, kiun ĉiu el ni kelkfoje sentas ĉe nekonatoj, »mi ne scias, kion pensus mia familio. Si ja ne estas blonda, tion vi vidis. Tamen, kiel gravas la koloro? Se ŝi estus bona edzino?«

Mi kapklinis konsente; efektive, mi pensis, ke spite la diferencojn pri raso, vivspertoj, medioj, tia edziĝo povus ruliĝadi trankvile. La afero tre interesis min, ĉar edziĝo inter anglo kaj egiptino estas tre malofta; precipe tial, ke ili neniam havas okazon renkontiĝi. Felton kaj Nigma ŝajnis reciproke taŭgaj, ĉar ŝi estis inteligenta kaj pli bone edukita, ol la plimulto el la egiptinoj; kaj li evidente ne havis antaŭjuĝojn pri raso, koloro aŭ lingvo; ili faris, efektive, tre interesan kompromison inter la ideoj, pensmanieroj kaj kutimoj de la du rasoj. Estis videble, ke li ŝatas, preskaŭ amas ŝin, pli ol li vorte konfesis. Mi ne scias, ĉu ŝi amas lin, sed ŝi tiom admiris ĉion eŭropan, kaj tiom deziris eskapi el ĉio egipta, ke ŝi nepre farus sian eblon por feliĉiĝi lin.

»Tamen, mi ne deziras nun paroli al ŝi pri la ideo,« Felton daŭrigis; »mi ankoraŭ ne sufiĉe konas ŝin. Mi neniam havas okazon paroli al ŝi sola. Ĉiam estas kun ni aŭ fratino aŭ frato, aŭ alia familiano. Si ŝajne ne komprenas, ke mi deziras paroli al ŝi sola kelkfoje. Mi plurfoje invitis ŝin iri kun mi al kino; ŝi akceptis nur unufoje, kaj tiam venis ankaŭ la patro kaj patrino.«

Nun mi komprenis la malfacilaĵojn: spite sian restadon en Egiptujo, Felton ankoraŭ sciis tre malmulte pri la moroj de la egiptoj. Fraŭlino neniam povas esti sola kun viro, ĉe en sia hejmo, ĝis kiam li estas jam petinta pri ŝia mano al ŝia patro, kaj paginta al ĉi tiu la doton. Tiam, kelkfoje, li estas permesata pasigi duonhoron sola kun ŝia fianĉino en la sidĉambro, sed ĉe tiam li ne povas promeni kun ŝi sola, aŭ iri al kino. Mi demandis al mi, ĉu tion mi devus klarigi al Felton; farante tion, mi riskus tute senkuragiĝi lin; ne farante tion, mi lasus lin en senbaza espero, kaj kaŭzus al li eventuale pli grandan elreviĝon. Nu, mi nenion diris; dum mi estis ankoraŭ pesanta la aferon, ni atingis la haltejon de la aŭtobusoj, kaj disiĝis.

Nu, post tiu tago, Nigma kaj mi havis tute novan temon por konversado, kiam ni renkontiĝis en la lernejo. Pli ĝuste, ni havis nur unu. Si konstante parolis pri Felton, pri lia honesta karaktero, lia blondeco, lia vasta scio kaj kompreno pri la mondo, liaj grandaj kapablaj manoj, lia forlikeco. Mi rimarkis, ke interesas ŝin ne nur la anglo, sed ankaŭ la viro; mi kredas, ke ŝi estis enamiginta al li. Ankaŭ ŝia karaktero ŝajnis ŝanĝiĝi; ŝi ne perdis la iom mallargan elrigardon de la egiptino, sed tamen ŝi estis pli komprenema, pli virineca, malpli knabineca; kaj super ĉio, ŝia memfido multe kreskis; ŝi ne plu antaŭvidis rikanojn.

Tiel daŭris du monatojn; tiam finiĝis la lerneja jaro; mi foriris kun la edzino al Aleksandrio por unumonata libertempo, kaj ne renkontis Nigma dum tri monatoj. Kaj kiam mi vidis ŝin en la lernejo, ŝi estis tiom okupita pri la reorganizo de la klasoj, ke tute ne estis tempo por konversado.

Baldaŭ ni invitis, ke ŝi temaĝu kun ni, kaj sendis la kutiman invitleteron. Ĉi tiun fojon venis kun ŝi ŝia edziniginta onklino, bela virino, pli juna ol Nigma.

Post la salutoj kaj demandoj pri libertempo, ni komencis paroli pri pasintaj aventuroj, ridi pri komunaj memoroj. Nigma parolis al ni sufiĉe facile, senembarase, sed ŝi ridis malpli ofte, ol antaŭe. Si diris sarkasmajn frazojn de tempo al tempo; tion mi neniam adidis ĉe ŝi antaŭe. Mi rimarkis en ŝia voĉo amaran tonon. Kaj al frazoj pri la varmece, la belaj gardenoj kaj promenejoj de Aleksandrio, la novaj lernantinoj en la lernejo, kaj tiel plu, ŝi respondis sen ŝia kutima entuziasmo.

Fine, mia edzino turnis la konversadon al temoj pli intimaj. »Kiel do,« ŝi diris al Nigma, »ĉu vi ankoraŭ ne estas edziniginta?«

»Kiu volus edzinigi min?« ŝi respondis, kun stranga rideto, kiu ŝajnis al mi kolereta. »La viroj preferas la blankajn virinojn; oni ne deziras negrinojn, kia mi.«

Denove tiu obsedo pri la koloro; ĝi estus jam tendinta min, se mi ne estus diveninta suban tragedion. Evidente la aferoj iris malbone.

En Egiptujo ne estas maldelikate demandi pri la aferoj, ĉe la amaferoj, de aliaj; ni do kuragiĝis ŝin, ke ŝi rakontu al ni, kio okazis.

»Sed tiu anglo — ni ja vidis, ke li interesiĝas pri vi?«

»Ĉu mi scias? Li sendube edziĝis al iu angla fraŭlino, kiu estas pli bela, ol mi. Sed kiel tio gravas al mi?« Si povis rideti, kaj altigis sian belforman nazon kvazaŭ malestime. »Mi estas instruistino, dank' al Dio, kaj tiel



Degas:

Dancistino

Senrĵuoj

— El la ĵapana: T. Nakamura

Filoj inklinas
Obei — la gepatroj
Jam vivon finas.

*
Ne incidento
Ridinda por *solul'* la
Komika vento.

*
Nun ŝi mamnutras...
Baj, baj, — jam lavendaĵo
En ŝonĝo putras.

*
Infano bone
Dormas, — ja zorgas panjo
Spiron ŝpione.

Herbricit domo.
Per mut' insektoj signas
Venon de homo.

*
Neĝas en abund'.
Sur nokta voj' lanterne
Gvidas nigra hund'.

*
Patrin' fervora
Rizplantadante iras
Al filo plora.

*
Lin ne amuzas
Tiom la inoj, kiom
L' edzin' ĵaluzas.

Kiu ne scias
Sola en la kvartalo:
Jen edzo ŝia.

*
Por dormetato
La libron foliumas
Senĉese l' vento.

*
Ve, vidu vanon
Fantomu do, edzin', por
Nutri l' infanon.

*
Tir' de kurteno.
Ho, ho, ho, — oni krias:
Neĝa mateno!

Senrĵuo estas 31-silaba epigrama
ŝerca, humora, aŭ proverba, aŭ bele-
ne estas konataj. — *Trad.*

tristika simile al *haĵkuo*. La aŭtoroj
de l' famaj senrĵuoj, tie ĉi tradukitaj

mi restos libera ĝis la morto. Mi ne estos la sklavino de iu ajn viro.◀

◊Sed ĉu vi ne renkontadas lin — ĉu li ne plu venas al via domo?◊

Ne, li ne plu venas; li ĉesigis siajn vizitojn jam antaŭ tri monatoj. Pro sia manko de memfido, Nigma vidis en tio tedigon pri ŝi; la anglo trovis ŝin neinteresa, »tro indigena«, tro nigra. En la tonoj de ŝia voĉo mi aŭdis doloron kaŝitan, la doloron de virino, kiu senespere deziras viron, kaj maltrafis sian okazon. Kompatinda Nigma; ŝi volis, pli ol iam antaŭe, esti eŭropana, esti edzino, kaj pli ol iam antaŭe, ŝi malesperis pri eskapo el sia teta familia vivo.

Ni provis klarigi al ŝi, ke ne pro malestimo Felton ĉesigis siajn vizitojn, sed pro tute aliaj kaŭzoj.

◊Li ja ŝatis vin, Nigma. Sed li deziris koni vin pli bone, lasi, ke vi konu lin pli bone, antaŭ ol proponi la edziĝon. Kaj malfeliĉe tio estis neebla.◊

◊Sed kiel neebla? Li ja venis al ni ĉiusemajne, ni ofte vidis unu la alian, ni ofte babilis kune? Li estus povinta paroli pri la afero al mia patro — li ne estus postulinta tre altan doton.◊

Certe Nigma estis legitima francajn romanojn; certe ŝi sciis, ke eŭropanoj admiras la romantikan amon, volas edziĝon de animoj — kio postulas longan konadon sen la ĉesto de aliaj. Eble ŝi pensis, ke tio estas nur en romanoj.

◊Ne estas eble koni unu la alian profunde, se ĉiam ĉeestas la gepatroj,◊ mi diris. ◊Li volis promeni kun vi sola, iri kun vi al kino, paroli libere sen la embaraso de la ĉesto de aliaj. Kaj supozeble, kiam li trovis tion neebla, li opiniis, ke estas nur unu afero farebla: ne plu vidi vin.◊

Surprizis min, ke Nigma ne divenis tion antaŭe, ĉar estas ankaŭ egiptaj junuloj, kiuj rifuzas edziĝi samkiale; sed ŝia menso estis irinta en alian direkton. Kiam ŝi aŭdis nian opinion, ŝia vizaĝo esprimis unue nekredemon; poste ĝi aspektis kolera, kaj ŝi rugiĝis. Mi supozis, ke ŝi riproĉos al Felton, ke li tion ne diris malkaŝe; sed ne.

◊Ĉu tiel? Ĉu tiel?◊ ŝi fine diris. Miksita kun ŝia kolero estis ankaŭ ia sento pri malsarĝo; rekuragiĝis ŝia memestimo. ◊Estas ĉiam same ĉe ni. Ni egiptinoj aŭ devas

edzinigi al viroj, kiujn ni apenaŭ konas, aŭ ni tute ne edzinigas, ĉar la viroj ne volas edzinigi virinon kiun ili ne konas. Tiu malmodemaj egiptoj! Kial ni ne povas esti liberaj, kiel la eŭropaninoj?◊

◊Sed, Nigma, kial vi ne insistis iom liberigi? Kial vi ne reinvitas lin nun? Vi povus poste fari tion, kion li petus. Vi ja laboras, vi subtenas vin mem, vi rajtas fari tion, kio plaĉas al vi. Diru al la frato, ke li reinvitu Felton, kaj tiam promenu kaj vin amuzu sola kun li, spite la gepatrojn.◊

◊Tio estas neebla.◊

◊Sed kial neebla?◊

◊Car — ĉar ĝi estas neebla. Ili ne permesus. Kaj kion dirus la najbaroj? Oni dirus terurajn aferojn pri mi, kaj en la tuta vivo neniu viro volus edzinigi min.◊

Mi komprenis, ke la ribelemo de Nigma eluziĝis; ŝi estis tiom luktitinta por labori ekster la hejmo, ke ne plu restis morala forto por la nun necesa batalo. Cetere, se ŝi ja ribelus, kaj spitus la opinion de la familianoj kaj najbaroj, ŝi eĉ ne povus plu okupi sian postenon: en knabina lernejo oni ne volas fraŭlinojn kun malbona reputacio.

◊Kion mi povus fari?◊ ŝi diris malespere. ◊Mi ne povas akcepti egipton, kiun mi vidis nur dum interparoloj kun la gepatroj, kaj anglo same ne volos akcepti min.◊

Ni provis ŝin gajigi, dirante, ke eble Felton revenos, ke estas tre multaj viroj, kiuj volonte edziĝus al ŝi: ni parolis laŭ la hipokrita maniero de la homoj en tiaj okazoj — ni ja sciis, ke apenaŭ estas espero por kompatinda Nigma...

Si ankoraŭ estas en mia lernejo. Preskaŭ ĉiutage ni konversas kaj ŝercas pri la lernejaninoj, la ferioj, kaj similaj temoj. De tempo al tempo ŝi vizitas nin, aŭ ni ŝin; kaj ni tiom intimiĝis, ke ni povas ŝerce nomi ŝin la nigrolino, sudanino, kaj tiel plu. Sed ni ne plu aŭdas pri ŝvatantoj; viroj ne venas serĉi ŝin. Nigma antaŭvidas plurajn jarojn da laboro en la lernejo, ĝis kiam ŝi tediĝos pri tia sencela laboro; kaj tiam ŝi reiros al la stato el kiu ŝi luktis: ŝi estos denove perfekte honesta kaj respektinda fraŭlino, kiu tute dependas de sia familio kaj ne havas fantaziajn ideojn pri la moderna virino, amo kaj edziĝo, kaj promenoj sola kun viro.

Sortofurno

— Henri Duvernois —

Kiam Fernand Moitriuel proksimume antaŭ tridek jaroj revenis en Parizon de sia nuptovojaĝo, li precize fiksis la tagordon de sia edzeca vivo, t. e. la akceptotagojn, la grandajn kaj malgrandajn vesperfestojn, la intimajn kaj solenajn vespermanĝojn kaj similaĵojn...

— Bonvolu, — li diris al la edzino, — sciigu ankaŭ Grégoire Flé, ke ĉiam li estos bonvena gasto ĉe ni. Tio kompreneble devigas je nenio. Grégoire estis bona kamarado al mi en la lernejo kaj en la kaserno. De tiam li iĝis verkisto kaj laŭdire eĉ ne sentalenta; sed li ja estas neplibonigebla bohemo, kiu kredas sia devo, ke li vivu artistan vivon: lia pipo bezonas konstantan lokon en iu literatura kafejo, krome li vestas sin malzorge, do sufiĉe mismaniera, kaj se iu ne havas saman opinion kun li pri io aŭ tio, li same pugnofrapas sur marmortablo el la epoko de Ludoviko la dekkvina, kiel sur tute ordinara kafeja marmortablo, sur kiu oni kutimas rompi maksimume nur bierbotelojn, aŭ kafatasojn. Mi kredas, ankaŭ por li estos pli bone, se ni invitos lin tiam, kiam ni estos solaj. Sed eĉ tiel mi konsilas, evitu ĉian disputon kun li... Anstataŭ politiko aŭ literaturo parolu al li pri la kuirarto: pri tio, se vi aŭskultos lin, li scias rakonti dum horoj, kompreneble kun la suprema fakscio de iu, kiu dum tuta vivo devis kontentigi pri vinaĉo kaj mangajrestaĵoj...

Sed Grégoire Flé, bedaŭrinde, laŭvorte komprenis la frazon, ke li estos agasto ĉiam bonvena. Li aperis en la domo ofte, grase, gaje, kun longa hararo kaj tre kurta pantalono, odorante de brando, tabako, jen entuziasme, jen ŝanceliĝante kaj kun la rubando de ia stranga ordeno en la butontruo, kiu simile herbosupon, brilis en diversaj vivaj koloroj. Liaj vortoludoj, kriegoj, nebutonumitaj manumoj, lia malkaŝemo kaj senpacienco faris nuzeran efektan, precipe, se li venis tiam, kiam gastoj estis eĉ gesinjoroj Moitriuel.

— Vidu, maljuna knabo, tion ni devus ordigi, — proponis al li Fernand. — Venu al ni vespermanĝi, ni diru, la unuan mardon de ĉiu monato. Tiel ne povas okazi al vi, ke eble vi renkontos nur miajn kolegojn, tiujn eniĝajn grandindustriulojn, kiuj, mi scias, tute ne interesas vin...

— Pardonu, — korektis lin Grégoire. — min interesas ĉio. Viajn amikojn mi trovas simple ravantaj; mi esperas, ke ankaŭ mi plaĉas al ili.

— Kompreneble, kompreneble, ĉiuj adoras vin. Sed vidu do, ni estas egoistoj: ni volas vin gardi por ni mem...

Grégoire trankviligis ankaŭ pri tio. Estas vere, ke, certe senrajte, li iom suspektis la mildan sinjorinon Moitriuel, kvankam tiu malamis nenfun kaj obeis al ĉiu, unue al siaj gepatroj, poste al sia edzo, pli poste al sia sola filino Claire. La unuan mardon de ĉiu monato, kvankam la vespermanĝo oni pometis nur je la duono post la oka, Grégoire jam je la sepa sonorigis ĉe sia amiko, ĉe sia sola amiko, ĉar cetero li havis nur provizorajn kamaradojn en la malriĉo: aŭ tiajn, kiuj atingis la supron de la verkista kariero, aŭ tiajn, kiuj dronis en tiu senfunda abismo, kie la iamaj poetoj iĝas komercistoj, oficistoj aŭ piaj rentuloj. Tiu monata okazo estis por li la sola, kiam li povis gustumi la lukson. La observojn, kiujn li povis fari ĉe gesinjoroj Moitriuel, li abunde utiligis en siaj fekunde naskiĝantaj romanoj, ĉar tiu ĉi ŝajne kaprica bohemo estis kvazaŭ bona librolentisto. Li notis ĉion, la uniformon de l' servisto, la mangokarton, la arĝentan servicon, la ŝtofon, koloron, fasonon de la robo de l' dommastrino...

Ĉe tiaj okazoj li mem aperis en nigra vestaĵo, kiu parte estis simpla kiel strata jako, parte solena, kvazaŭ fumjako, kaj kiu, kun malgranda blanka kravato, estis tute tolerebla dum festvespero. Nur ĉiam, aŭ preskaŭ ĉiam li estis la sola gasto. La grandaj monataj vespermanĝoj estis ĉiam la antaŭan tagon, la unuanlundon de ĉiu monato. Grégoire nur en la ĵurnalraportoj povis legi pri ili. Inter la gastoj troviĝis ne nur grandindustriuloj, sed ankaŭ ministroj, eĉ ankoraŭ romanverkistoj, kiujn ilia original-eco aŭ la eldonnombro de iliaj verkoj faris interesaj. Sed li eĉ tiam ne plendis: marde vespere li povis manĝi el ĉiu bakitaĵo, el la rarspecaj fruktoj, kiuj restis de lundo. Kaj ankaŭ li povis sidigi en komfortan brakseĝon, apud la kameno, sur la saman lokon, kie la antaŭan vesperon iu pli fama kolego prenis lokon. Per unu vorto, ankaŭ lin oni aŭskultis.

Kaj estis tie Claire.

Gesinjoroj Moitriuel havis palacon en Parizo, kastelon en Normandio, villon sur la Riviera, ne unu, sed plurajn aŭtojn, kaj unu filinon. La romanoj de Grégoire Flé desegnis la granddotajn knabinojn ĉiam malbelaj. Sed Claire refutis la verkiston: simple ŝi estis belega. La sekreta romantiko tiris ŝin al tiu ĉi bohemo, kiu estis mallerta sed animplena, senkultura sed sincera, kaj kiu vere sciis entuziasmi. Kiam ŝi estis ankoraŭ knabineto, ŝi kune kun la gepatroj multe priiris lin, sed nun ŝi defendis lin kontraŭ ili. Komence de la sepa horo vespere, kiam Grégoire sonorigis, tute ĝis la duono post la oka, kiam oni anoncis, ke la tablo estas servita, Grégoire kaj la domfraŭlino povis babili trankvile kaj konfide. La knabino eltrudis de li eĉ tion, ke ŝi povu nomi lin baptopatro; kion siateme oni elektis pro lia riĉo kaj socia rango tiu miksigis en fraŭdan bankroton, en kiu li perdis ĉi-aspecan titolon kaj rangon, inter pluraj ankaŭ tiun de la baptopatro. Kiam Claire iĝis dudekjara, Grégoire definitive rezignis pri tio, ke dum tiuj ĉi monataj preparoj senĉese kaj sole nur li parolu, li kontentigis je tio, ke li aŭskultu sian adoptitan baptofilinon, en kio lin gvidis nenia literatura flankpenso. Estus facile, tamen li ne faris, ke li knedu el tio mi-romanon, almenaŭ ducentokdek-

Soneto

— Michelangelo —

Ne estas eĉ plej arta rev' el ŝtono,
kiun ne fermus marinorekzemplero
per sia troo; ĝin nur trovas fero
gvidata skulpte per inspir' kaj kono.

Malbon' timata, esperata bono
vin loĝas, dan' pompanta en fiero,
sed vane penas mi kun malespero,
ne donas l' art' efekton laŭ bezono.

Nek amo kulpas do, nek via belo,
nek duro, fat', malŝato malafabla
pri mia plago, nek destin' aŭ sorto;

samtempe ja indulg' kaj mortkruelo
nestas en vi, sed mi, kun nekapabla
ardanta cerbo trafas nur al morto.

El la itala: Loli Blond.

paĝan konfeson de filino de la nova jarcento. Maksimume foje-foje li alpinis ian valoran noton pri la modaj sociaj ludoj, pri la favorataj dancoj, pri la populara muziko kaj plej nova pentroarto. En sia malgranda biblioteko Claire kolektis ĉiun libron de Grégoire, kiujn ŝi mem bindis: rozkolore, se ili estis mildaj; nigre, se ili estis malgofaj; lazure, se ilia humoro estis printempa; kaj rustoruge, se ĝi estis aŭtuma. En ĉiu, sur la interna paĝo, gigantis versaj dediĉoj kun kleraj kaj individuaj arabeskoj destinataj por grafologoj. Eĉ, el la bonvolo de l'aŭtoro, ŝi havis ankaŭ du manuskriptojn de Grégoire: la unu estis tiu de la *Jurrompulo* (kvardekmilversa dramo), la alia tiu de la *Alkurinto* (serca unaktaĵo).

Tia estis do la situacio inter niaj geherooj, kiam aperis la Amo en la figuro de Etienne Fournier, ĉarma, eleganta, bonmaniera kaj bonkombita junulo.

— Kiel li plaĉas al vi, baptopatro? — demandis Claire de Grégoire.

Kaj ne atendante la respondon: — Ĉu ne, ĉarma?

— Carmal! — jesis obeje Grégoire.

Kaj vere plaĉis al li tiu ĉi simpatia junulo, kiu aŭskultadis la vortojn de l'verkisto, pli ĝustedire liajn oratoradojn, kun larĝe aperitaj okuloj, kun estimo, miro kaj kun ioma, bone kaŝita, dormemo. La honora baptopatro, same kiel la gepatroj de Claire, eĉ se el diversaj kaŭzoj, tamen per aprobaj okuloj rigardis tiun ĉi edziĝon. Etienne estis preta advokato kaj li malpacience atendis, ke li ricevu ian laboron, se li jam sukcese venkos sian lamigan timemon kaj se foje li povus kapti ian sensacian krimproceson. Krome li havis bonan nomon inter la rugby-ludistoj, kaj lia familio, kiel oni kutime diras, ĝuis publikan honoron. Grégoire kortuŝe rigardis tiun idilion en tiu tiel frosta salono kaj li trankviligis eĉ je tio, ke de tiam, de la sepa ĝis la duono post la oka, li rolu nur kiel muta kaj bonvola tria persono. Post vespermanĝo Etienne ĉiufoje diris al li: »Se plaĉas al vi, sinjoro Flé, mi povas transporti vin hejmen.« Grégoire kun ioma malfacilaĵo sidigis en la fermitan malgrandan aŭton de Etienne, kiun la junulo gvidis fulmorapido. La vojo estas sufiĉe longa de la strato Michel Ange al la bulvardo Batignolles. Grégoire tute ne avaris pri la konsiloj: »Kiu gvidas, ne parolu multon. Li pensu pri la ceteraj frenezuloj.«

Cirkaŭ kvarono post la deknua, por fini la komencitan temon, ili ambaŭ iris al la literatura kafejo, kies konstantaj gastoj malamis la grandkapulojn kaj batalis kun nevideblaj pafiloj kontraŭ la oportunistoj.

Tie okazis, ke iun vesperon Etienne Fournier flatadis jene:

— Kara sinjoro Flé, mi volus peti de vi grandan komplezon, sed nur en la plej granda sekreto... Vi ja scias, ke Claire kaj mi estas jam preskaŭ gefianĉoj. Nu, la deziro de Claire estas, ke mi skribu al ŝi ĉiutage kaj unu el niaj amikinoj, kiuj estas juna kaj vidvino, volonte akceptas la peradon. Mi devus tiun komenci morgaŭ, sed mi konfesas... mi faris almenaŭ dek mizerajn eksperimentojn... Mi scias, kion mi devus diri: sed neniam mi sukcesas... Kion mi ĝis nun skribis, estas resumebla en kelkaj vortoj: »Claire, mi amas vin.«

— Ne estas sufiĉe — opiniis Grégoire.

— Ankaŭ mi havas tiun ĉi opinionon: ion alian ŝi devas trovi en tiuj ĉi leteroj, ne tion, kion ŝi ja krome aŭdas de mi. Se mi devus nur paroli, mi timus nenium. Sed se mi havas plumon en la mano, mi iĝas konciza preskaŭ ĝis la malgentilo. Kara sinjoro Flé, helpu min! Por vi ja nenio estus pli facila! Kaj Claire neniam ekscios, ke la leteroj devenas de vi... —

— Estas en ordo — respondis Grégoire.

Kaj tuj li vokis la kelneron:

— Léon, mi petas inkan kaj plumon! Kaj du abrikot-brandojn.

Kaj tiel parolinte, li komforte lokis sin sur la velurkanapo de la kafejo, kvazaŭ pianist-artisto, kiu sin preparas por muzika plezuro: la plumon li provis sur sia ungo, por momento li ekgapis, poste la plumon elprovitante li mergis en la inkan, kaj tiel li komencis la laboron, kun ia stranga delico, ĉar ja ĉi fojon temas pri tiel kara kaj altruista verko, kiu destiniĝas ne por la indiferenta publiko, sed por unu sentema koro.

— Sed, ĉu ne, ne estos tro bela? por la versaĵneblo! — petegis modeste Etienne.

— Be-le-ĝa ĝi estos! — silabadis Grégoire. — Nur fidu min kaj ne plendu, se — kiel oni diras kutime — la fianĉino estos tro bela!

Tiu ĉi unua amletero iĝis tricentkvindek-linia. Ĝia skribo daŭris de dudek minutoj post la deknua ĝis la unua horo post noktomezo, kiam la kafejposedanto komencis estingi la elektrajn lampojn.

— Poste, se vi kopios ĝin, ne forlasu multon — konsilis al li Grégoire. — Mia amiko, mi konas la virinojn; ĉu saĝaj, ĉu stultetaj, ĉiuj estas similaj en tio, ke la sinceron de la amo ili penas per la pezo de la letero. Tie kaj tie vi povas streki kelkajn vortojn, ĉar tiel ne vidiĝos, ne tio, ke vi kopiis, — kio estus katastrofo — sed, ke vi kopiis vin mem... —

Post kelkaj tagoj, kiam Grégoire aperis ĉe gesinjoroj Moitruel, Claire tuj flankentiris lin:

— Baptopatro, — ŝi kriis —, mi ricevis leteron de Etienne: ĉef erko! Mi ricevis kapturon... Ĉu vi scias, kio estas mia opinio? Mi kredas, ke Etienne naskiĝis ne advokato, kiu profesio ja eĉ estas plenplena, sed plie verkisto... —

— Ĉu vi kredas, ke tie ne estas plenplene? Aŭskultu, mia knabino: multaj povas brili por momentoj, sed la forto de la verkisto estas lia persisto. Sub la efiko de forta sento ĉiu kultura junulo skribas bele; alia afero estas la invento, la redakto, la verkista laboro!... —

— Do bone, — flustris Claire. — Sed rigardu min: via baptofilino neniam estis en pli granda embaraso... Verdire, mia ideo estas ĉi tiu korespondado. Mi kredis, ke mi ricevos de li kelkajn karajn leterojn, kiujn respondi estos facile... Sed tiun ĉi ĉefverkon... Kaj mi? Mi amtaŭsentas, ke mi trovas nur simplajn, prozajn, perfortitajn diraĵojn... Baptopatro, kompatu min... Helpu! Venu en mian studĉambron... Tie estas ĉio, delikata leterpapero, anserplumoj kaj porto-vino... —

Do Grégoire Flé estis devigita respondi sian propran propran leteron. Cetere, tiu ĉi ludo lin tute ebrigiis. Unue Claire laŭtlegis al li ĉiujn tricentkvindek liniojn, je la fino kompreneble kun la insolenta subskribo de Etienne.

— Nu, vidu, mi ja ne mensogis! — ŝi fieris antaŭ Grégoire. — Ĉu ne estas ĉefverko tiu ĉi letero? Ĉu ĝi ne meritis, ke ĝi ricevu lokon en ajna antologio de la koro?

— Vi pravas — rekonis sinjoro Flé —, vi ne troigis, estas vere ĉefverko! Nu, ni faru ion, ke vi ne troviĝu malinda. Ĝis vespermanĝo ni havas ankoraŭ kvindek minutojn; tio sufiĉos.

Ĉiu profunda sentemo, kiun la kompatinda verkisto konservis ĝis nun neuzita, venis en tiujn ĉi leterojn, en la leterojn de juna sportknabo kaj juna fianĉino. Kiam oni anoncis, ke estas servita la tablo, Grégoire jam eltrinkis plenan botelon da porto-vino, rompis tri plumojn kaj redaktis ducentlinian, pasie treman leteron.

— Kion vi pensas, ĉu li ne eksentos la trompon? —

zorgemis Claire, dum super la sultro de Grégoire ŝi legis la leteron.

— Ne timu, estas nenia danĝero: tie kaj tie mi faris du-tri ortografiajn erarojn, kompreneble ne iajn grandajn erarojn, kiuj etendiĝas kvazaŭ flakoj, sed nur etajn, karrajn, malgrandajn erarojn, kiuj tiel emocias la virojn... Ne decas, ke vi eĉ por momento montriĝu pli valora ol Étienne, tio evitindas ja por la feliĉo kaj trankvilo de via estonta edziĝo.

— Ĉu mi ne skribu postskribaĵon?...

— Por nenia prezo! Mi ne volas vin ĉagreni, sed ja via prozo, knabineto, tro diferencas de la mia...

De tiam gesinjoroj Moitrinel konsternete rimarkis, ke la gefianĉoj kun ĉiam pli kaj pli granda estimo kaj amo ĉirkaŭas tiun, kiun, post lia dorso, Moitrinel nomis nur «triaraĝa mezverkisto». Eĉ la gejunuloj tiom perfortadis, ke Grégoire estis invitita al la plej proksima solena vesperrango, inter tion elektitaj gastoj. Cetere, la verkisto kondukis tre dece, escepte ke li iom incitigis dum ia politika disputo kaj ke de juna gastino li petis fortan nigran kafon «kun multa rumo». Sed Claire kaj Étienne trovis ĉion ĉi sen signifajo.

De ĉio estis en ordo. La gefianĉoj kaj ilia korespondanto naĝis en la lazuro, sed en tiel brila lazuro, ke Grégoire baldaŭ estis vedata. Kvazaŭ nordano ekzilita en Afrikon, kiu sopire vokas kaj atendas la bonfarajn nubojn kaj iom da pluvo...

Nun ni venis al la plej delikata parto de la historio, al la laŭprofesia, unuflanka, eĉ deformanta konsiderado. Claire, la unumonata fianĉino, gardis jam tutan volumon, en malgranda santal-kesto, kun la subskribo de Étienne. Ankaŭ Étienne havis simil-enhavan, pli malgrandan, sed respektindan volumon, kiun Claire notis sola, kiel responda aŭtoro. Sed la du volumoj estis verko de Grégoire Flé. Trankvile oni povus diri pri ili, ke oni verkis ilin ĉirkaŭ 1830, en la epoko de la romantiko. Ĉiu pago fabelis pri odoro de multaj floroj kaj pri trilo de eĉ pli multaj birdoj. Sed ja viglaj cenzuristoj tiel triumfe batalis kontraŭ tiuj ĉi karaj, etaj poeziaj ornamaĵoj, kaj la nova literaturo tiel flankenpuŝis ilin, ke antaŭ niaj gefianĉoj ili ŝajnis tute novaj. La juna knabino estis emociita ĝis ploro, ke sportjunulo, nuntempe, skribas al ŝi longan leteron, kaj ne ian telegrafspeciĵon en tia stilo: «Darling, morgaŭ je la kvina, sur la golfgrundo, ĝis.» Siavice, se Étienne ricevis malgrandan pakadon, kiu ja estis nur letereto kun la subskribo de Claire, li estis plena de miro kaj rekono. Ĉar li timis pro la estonto — la bona Grégoire Flé ja ne estos ĉiam apud li — li antaŭe atentigis sian fianĉinon:

— Vi scias, se ni estos jam geedzoj, ni neniam disiĝos unu de la alia kaj tiam mi ne havos okazon por skribo.

— Ankaŭ mi ne! — tuj aprobis Claire kun videbla malpeziĝo. — Ni legos, kion ni skribis unu al la alia...

La kalendaro tiun tagon montris la dekkvinan de septembro. La geedziĝo estis fiksita por la dudekkvina de oktobro. Tiam intervenis la supre menciita laŭprofesia deformado. Grégoire Flé havis tre decidajn ideojn pri la romanverkado, en kiuj, kiel en ĉiuj siaj ideoj, li ne konis ŝercon. Grégoire asertis, ke bona romano ne ekzistas sen katastrofo, kiun li, kiel optimisto, metis en la okazaĵoj, por ke poste la tuton li finu je ĝenerala kontentigo. Dum sia longa kariero li ofte atakis tiujn danĝerajn novigantojn, kiuj ne emis sekvi tiun lian leĝon kaj ne volis baki sian bakadon en la delonge elprovita bakujo. Per unu vorto, la bona Grégoire estis amiko de la Sortoturno. La romanon, en kiu mankis la sortoturno, eĉ turnaj, li juĝis enuaj kaj neeblaj. Ĉiu lia libro plenis

de tiaj bele-belaj turnoj. Do tial li decidis, ke la utilan, la necesan la neforlaseblan sortoturnon li enkondukos ankaŭ en la ĝis nun banalan romanon de Claire kaj Étienne. La tempon li trovis konvena ankaŭ pro tio, ke jam nenia juro, nenia nova tenereco, nenia poezio venis en lian kapon. Venis la tempo de la pluvonuboj. Do li diris al Étienne:

— Ĝis nun, kara amiko, vi sekvis min fidele, kaj vi nur gajnis per tio. Via fianĉino, kiel vi vidas, ne nur amas, sed eĉ adoras vin... Vi elŝiris...

— Pardonon, ne mi...

— Do: ni elŝiris ŝin el ŝia mezeca etoso. Kio ajn okazos, via fianĉeco tamen estas alia, tute alia, ol estis tiu de la gepatroj, de la Moitrinel-paro... Sed, mia amiko, tio ne estas ĉio! Ni ne ekdormu sur niaj laŭroj... Kiu multe luliĝis laŭ la ritmo de milda muziko, tiu certe ĝoje akceptos la sonoron de la kornoj kaj stan-teleroj. Ni, romanverkistoj scias tion bone. La rozodoro estas ĉiam agrabla, sed post la sufoka sulfurodoro ĝi estas rekte ĉiela. La beletaj frazoj, kiujn vi subskribis kaj kiujn vi ricevis, preskaŭ igis plena la sekurecon de vi ambaŭ... Sed, bedaŭrinde, la amo mortas pro tio! Ĉu mi volas, ĉu ne, ni devas intermeti la jaluzon. La sortoturnon donos ĝuste la jaluzo. Atŝkultu min atente: se mi amas iun, tion mi devas ankaŭ pruvi, eĉ per ĉiu argumento de la amo. Nu, kio do estas la jaluzo? — unu el la argumentoj de la amo! Tion, cetere, mi klarigas pli larĝe sur la dudektria pago de mia romano «Vengo». Tien ni alvenis ankaŭ ĉe vi. Atentu, junulo: via Claire luliĝas tiel bele, ke ŝi baldaŭ ekdormetos. Veku ŝin, dum ne estos malfrue! Kiel mi klarigas en mia komedio «Dividparto»: «la posedo de ies koro certas nur, se tiu koro nin jam vundis.

— Ĉu vi volas vundi Claire? — demandis premite Étienne.

— Por certa tempo, en la intereso de vi ankaŭ. Nia



Bacher:

Duobla portreto

Idilio

— Vilmar Adams —

Min printemp' inspiris,
Logis al pilgrim'.
Vojon jen transiris
Eta pastistin'.

Restu serioza!
— Genus sin la dam'.
Kia kurioza
Carma panoram'!

Honti ŝin intigis
Jena fenomen':
Akvon ŝaf' eligis!
Kia hont' kaj ĝen'!

Fine sin eklevas
Punce ruĝa kap':
»Fi, vi honti devas,
Fi, malsaga ŝaf'!«

Vesto sur ŝi stranga,
Patra kamizol'.
Ŝi sep ŝafojn blankajn
Pelas kun fervor'.

Kure ŝi komandas,
Helas lan-ŝtrumpet'.
Pli bastono grandas
Ol la virinet'.

»Aŭdu do, ne kuru!«
Vigle batas man'.
Bluas la okulo,
Ho, sukerinfan'!

Jen okulojn kaŝas
Nun subite ŝi.
Ŝafoj plue paŝas
Sen paŝtista sci'.

Herb' post bano freŝas.
Mire gapas mi.
Tule mond' malpezas —
Vera idili'!

Sciu do, urbano,
Pro printemp' ja nur
Bildo-libr' infana
Iĝis la natur'.

El la estona: *Hilda Dresen.*

romano, ĝis la nuna tago, havas nur du rolulojn. Rapide la trian! Foje, en albumon, en Biarritz, se min ne trompas la memoro, mi skribis proksimume jenon: »La amo en la franca estas jen vir-seksa, jen in-seksa, sed la enuo en ĉiu lingvo estas unuseksa.« Vi povas min fidi: mi estas fakulo...

— Sed do kion mi faru?

— La pasintan fojon, ĉe gesinjoroj Moitrinel, vi konatiĝis kun beleta bruna virino.

— Jes, kun sinjorino Zuyzertas.

— Pompa nomo, almenaŭ por la rolo destinita al ŝi! Balzac pravas: estas fatalaj nomoj... Sinjorino Zuyzertas... Do estu sinjorino Zuyzertas! Mi vidis, ke Claire jam senpacienca, kiam tiu ĉi belulino ne volis vin delasi. Tial en via hodiaŭa letero ni dediĉas dek liniojn al la sinjorino... Ne timu, Mi trovos transiron. Efikos tute nature... Veku Claire, dum ne estos malfrue. Veku ŝian koleron. Ne malutilos, se vi malpacienigos, poste vi ekkonos »la plortrempan dolĉon de la repaciĝo«. (Vidu la lastan linion sur la lasta paĝo de mia plej nova romano *La Dancistino kaj la Alkristo*.)

— Mi ne kontraŭdiras: mi fermas la okulojn kaj gvidu min, kien vi volas...

— Mi certigas vin, ke vi estos danka. Don Juan ne estas Don Juan, se li ne povas sentigi la malcertecon...

Do Grégoire sukcesis krei la sortoturnon. Cetere la sukceso estis plena. Claire, kiu lin urĝe vokis, jam preskaŭ furiozis.

— Tion mi bezonis! — ŝi diris al Grégoire. — Mi ne povis esti feliĉa longe. Se vi sciis, kian aĉan leteron mi ricevis hodiaŭ matene: tiu ĉi sinjoro, imagu, ne hontas skribi al mi pri aventurino, al kiu li amindumas sovaĝe, pri ia sinjorino Zuyzertas, pri tiu ĉi ina Chaplin, kun tiuj timigitaj okuloj, kun la du kurbaj piedoj kaj kun la lipharoj... jes, kun la lipharoj!... Car mi juras, baptopatro, mi juras, ke ŝi havas ankaŭ lipharojn! Kaj li skribas pri tia virino kaj eĉ citas ŝiajn vortojn. Per unu vorto, li frenezigiĝis pri tiu monstro kaj dediĉas al ŝi dekkvar liniojn!

— Nu, kiom ĝi estas! — opiniis Grégoire. — Al vi li jam dediĉis miloble pli; estas egale, tamen estos

bone ĝin registri. Ĉu vi ne sciis en via proksimo iun junulon, per kiu vi provus inciteti vian fianĉon?

— Eĉ du je ĉiu mia fingro!

— Estas grandioze!

— Eble Robert Chancereuil.

— Ĉu bela knabo?

— Atendu nur... mi devas pensi... Jes, mi kredas, tre bela. Li petis pri mia mano, sed ĉar li ne havas eĉ groŝon kaj ĉiam nur kartludas, patro ridis inter liajn okulojn.

— Bonege, knabineto! Okulon por okulo!

— Dekkvar linioj por sinjorino Zuyzertas? Do dudek por Robert Chancereuil. Kaj, kara baptopatro, vi bone furiozigos Étienne?

De tiam la romanverkisto facile kaj konstante uzis tion, kion la verkistoj inter si nomas turno aŭ varianto. Li ĝuis, kiel la kreanto, kiu faris sian verkon pli vivo-plena per drama detalo. Por sia baptofilino li skribis pikan kaj spritan leteron, en kiu la bela sinjorino Zuyzertas ricevis kontentige sian parton: »Ankaŭ vi, ŝi skribis, kiel la ceteraj viroj, atentis nur pri sia supereco. Kompreneble la publike konata stulteco de sinjorino Z. vin trankviligas, eĉ ravas! Mia baptopatro jam delonge verkis en sia belega *Eglé*: »Se virino volas atingi la nivelon de viro, sufiĉas, se ŝi atingas ĝis lia ŝultro.« Kompreneble mi diras nur en bilda senco, ĉar ja en la realo tiu virino estas per tuta kapo pli alta ol vi, kaj se vi sciis, kiel komika vi estas en la proksimo de tia gigantino! Cetere, mi tuj eltrovis, ke vi havas konscienciproĉojn, kiam hodiaŭ matene, sen nomkarto, mi ricevis solan malhelan rozon, en skatolo plenstopita de vato. Mi komprenis! Tiun ĉi rozon, ĉu ne, kara Étienne, oni nomas »Konscienciproĉo«.

Sekvis — per fino batas la vipo — la priskribo de luno, en kiu la plej grandan rolon ricevis certa Chancereuil...

Étienne, kiun tiu ĉi letero preskaŭ kapofrapis, tuj vokis la savanton, kiu pri ĉi tiu temo: »la rozo ne de mi devenis« improviziis same spritan kaj spitan leteron... »La afero komencas iĝi interesa!« — pensis en si Grégoire kaj diligente li frotadis la manojn. »Se mi ne intervenus siatempe, ankaŭ ili, kiel la ceteraj, falus en la

La kursgvidanto kaj la kursanimo

— EMBA —

La kurso komenciĝis same, kiel ĝenerale la kursoj kutimas komenciĝi. Sed ĝin gvidis ne s-ro Baghy, nek la metodfama pastro: la gvidanto estis nur samideano Benda, kiu, cetere, estis konvinkita pri sia alta talento kaj — kiel ni vidos — bonege konis la historion, literaturon kaj ĉiufankajn detalojn de la movado.

Li staris sur la estrado kaj klarigadis al la sciavidaj aliĝintoj, ke Esperanto jam estas oficiale akceptita mondlingvo: precipe en Germanio oni faras treege multe en la intereso de ĝia disvastigo; antaŭ nelonge oni konstruis tie grandan monumenton por ĝia eltrovinto Zamenhof; krom tio, la Gvidanto akceptis Heroldon de Esperanto kiel oficialan gazeton de la landa politiko. Dise en la tuta mondo aperas tre multaj Esperanto-gazetoj. La preciza »AELA« eldonas la dumonatan Literaturan Mondon, kiu estas la suplemento de la SAT-revuo, kiu lasta subtenas sin per la heredaĵo de ADLEL en Parizo. La Katolika Espero eldonas la revuon IPE, la Sennaciulo eldonas »ISE« en Hungario, kie ISE estas tre favorata de la HESL. La PIRATO de nun aperas en la sankciita Abesinio. Krom tio aperas tre multaj libroj. Antaŭ nelonge verkis la fama verkisto Baghy la intiman romanon PARNASA GVIDLIBRO, kiu s-ro Kalocsay komentas kaj klarigas en aparta libro titolita VIKTIMOJ. Kaj Zamenhof jam antaŭ cent jaroj manifestis, ke Esperanto, pro sia interna ideo, nepre venkos tuj post la Geneva Konferenco.

Tiu ĉi parolado de samideano Benda havis grandan sukceson. La gekursanoj flame aplaudis. Precipe blonda knabino kun ruĝaj lipetoj admiris pleje samideanon

kaptilon de la filistraj edziĝoj kaj same estus sufokiĝintaj per tiu certa certeco, kiel tronutritaj bestoj per enterito.

— Si ne konsideras min serioze! Primokas! — plendis Etienne.

— Li mensogis, kiam li diris, ke li min amas — ploregis amare Claire.

Kaj Grégoire, kies ununura teatraĵo ankoraŭ ne prezentigis, fine povis ekoni la triumfan senton de dramverkisto, kiam li rigardas de post la kulisoj, kiel viviĝas liaj figuroj, dank' al la obeemaj aktoroj.

Sed oni ja ne povas ĉion antaŭvidi kaj antaŭscii. Venis ankaŭ la tempo, kiam kaj Claire kaj Etienne rezignis pri la interveno de Grégoire, ĉar oni ne bezonis lin por tio, ke ili frapu, unu por la alia, Robert Chancereuil kaj sinjorino Zuyzertas. Jam ili interŝanĝis nur mallongajn kaj krudajn telegramojn, kiuj ĉi foje vere devenis de ili. Neniu el ili vokis plu Grégoire. Al li okazis, kiel al la genioj: la verko superis la verkinton. Eĉ, iun belan tagon, la gepatroj sciigis lin telegrame, ke la mardan vespermanĝon, sen ia kaŭzo kaj klarigo, ili prokrastis por la sekvonta semajno. Claire iĝis tute nevidebla, kaj Etienne, laŭ la dommajstro, vojaĝis en Italio.

Ce la vespermango aperis nur Moitriel kaj lia edzino, ambaŭ estis malafablaj kaj retenigemaj.

— Kie estas Claire? — zorgemis Grégoire.

— Si estas malsana, — diris mallonga la patro. — Si petis, ke ni ekskuzu ŝin antaŭ vi.

— Sed ja fine, kio do okazis? — maltrankvilis la romanverkisto.

— Nuraj nekredetlaĵoj... Claire rompis kun Etienne kaj la fianĉeco finiĝis.

Benda. Eĉ por momento ŝi ne turnis la okulojn for de la fama Esperanto-scienulo kaj profesoro, kiu, krom tio, estis bela kaj juna »knabo«. Kiam je la fino samideano Benda anoncis, ke en la sekvanta horo li parolos larĝe pri la senco kaj esenco de la movado, la »ekesperantistoj« disiris kun plena entuziasmo.

*

La sekvantan tagon, samideano Benda iris promenaŭ sur la bulvardo, kiam li subite estis salutata:

— Bonan tagon, samideano Benda!

Kontraŭ li staris la blonda knabino, kiu tiom admiro lin rigardis hieraŭ vespere.

— Ĉu vi ne rekonas min? — ŝi trilis ĉarme kaj varme.

— Ho, kion vi imagas pri mi, kara fraŭlino! Mi havas bonan memoron kaj mi tuj rekonas miajn kursanojn, precipe se ili estas tiel belaj kiel vi!

La knabino ĉarme ekridetis.

— Kien vi iras? — ŝi demandis intime iom poste.

— Promeni.

— Ankaŭ mi havas la saman intencon.

— Nu, ni iru do kune, — proponis s-ro Benda kun iom da instruista gravo.

— Ĉu vi scias, kion ni faru? Ni iru al la monto. Tie ni trovos ombrajn benkojn kaj vi bonvolos paroli pri Esperanto.

La interkonsento estis farita. Ili ekiris.

— Vi eĉ ne imagas, kiel mi ĝojas pri tiu ĉi renkonto — ĉirpis plu la ruĝaj lipoj. — Mi flamas de studemo kaj sciavido kaj min ege interesas ĉio, kio rilatas Esper-

— Kverelo de geamantoj! Nur fidu min. Mi ordigos la aferon.

— Lasu nur viajn eternajn frazaĵojn. Vi ordigos nenion, ĉar ja estas nenio ordigenda: Etienne, bedaŭrinde, frenezigiĝis pri ia aventurulo, kiu estas pli aĝa ol li almenaŭ per dek jaroj. Kompreneble, vi jam volus kriadi: »La kompatinda Claire!« Sed ne kompatu ŝin; tiu ĉi ansero volas edzinigi al certa Chancereuil, kiu havas nek monon, nek estonton, nek profesion, nek kunligojn.

— Nu, sed ankoraŭ ne estas ĉio finita.

— Ĉu vi pensas? Pournier jam portis sian elekttimon al Frenco kaj Claire diras, ke ŝi mortigos sin, se ni ne cedos ŝin al Chancereuil. Do tiel!

— Nu tion... — ĝemis Grégoire frapita en la polvon.

— Jes, Etienne kaj Claire — ĝemadis Moitriel... — Ili, kiuj ĉiam diris, ke ili estas liberaj... ke ili ne havas antaŭjuĝojn... ke ili legas nenion... Jes, ke ili legas nenion. Vere, ke ili legas, sed mi devas kredi, ke ili sin nutras per la malnova, per la plej malbona, plej danĝera literaturo, per tiu, kiu konstante serĉas ian abismon aŭ similan, ke ĝi havu kien jetadi la tiel nomatajn heroojn... Per la romantika, la katastrofa, la tragika literaturo!...

— Sortoturno!... diris Grégoire, per voĉo preskaŭ sufokiĝanta.

Kaj en tiu ĉi pia verkist-animo, kiu tiel gaje kaj sensuspekte miksis kaj konfuzis ĝis nun la vivon kaj la romanon, la libro-heroojn kaj la vivantajn homojn — la unuan fojon en lia vivo komencis vekigi guto da dubo...

El la franca: L. Létinois.



Hanak:

La lasta homo

anton. Ho, kiel mi dezirus paroli kiel vi kaj scii tiel multe pri la movado! Tiom da mirindaĵoj mi jam aŭdis pri Esperanto kaj mi ne estos trankvila, ĝis mi ellernos la lingvon plene. Oni diras, ke la kimra princo portis Esperanto-kravaton kaj la Negus Negesti sin razas per Esperanto-razilo. Ĉu?

Samideano Benda ja nenion legis pri ĉio ĉi en la Parnasa Gvidlibro (kvankam en tiu libro enestas ĉio, eĉ kio ne enestas en la SAT-vortaro), sed li pensis: se ekzistas Esperanta klingo, kial ne ekzistus ankaŭ Esperanta kravato. Do, tre facile povis okazi, ke en la UEA-kongreso de 1935 en Romo, sinjoro Mussolini promesis, ke konkerinte Abesinion, li devigos la Negus-on, uzi Esperantan klingon. Kaj tio, ke la kimra princo favoris Esperanton, ja estas memkomprenebla.

— Kompreneble, fraŭlino, — li respondis vigle. Cetere, la plej gravaj kaj potencaj personoj favoras Esperanton. Ili parolas ĉiam tre favore por nia lingvo kaj movado. Bedaŭrinde, ili ankoraŭ ne ellernis la lingvon tiel perfekte kiel mi, sed tio ja estas komprenebla: ili ne havas tempon por tio. Ho, kara fraŭlino, vi eĉ ne imagas, kiel okupitaj estas tiuj gravaj personoj! Sed tamen, ili faras por Esperanto, kiom ili povas. Ekzemple, la rusa caro, s-ro Stalin, pentrigis sur la naciajn standardojn la kvinpintajn stelojn; domage estas nur, ke la pentristo ne sciis, ke nia stelo havas verdan koloron. Ankaŭ la ĉina imperiestro havas kelkajn silvestojn kun nia insigno. Krome, se aperas Esperanta libro, li tuj presigas la duan eldonon, kion oni tre subtenas en kelkaj eminentaj rondoj japanaj. Unuvorte, Esperanto estas tre-tre progresinta! Oni uzas ĝin ĉie kaj ĉie. Eĉ en milito, eĉ ŝtormoj, oni Esperante krias: »Hura! aŭ la Idoj de Paco«.

— Belege, belege — krias la knabino. — Ho, kiel mi vin envias! Kiel mi deziregas scii tiel multe, kiel vi! — ŝi flamis, sed poste malgajigis. — Ho, ho! se mi havas amikon tiel eminentan kia vi, kiel rapide mi progresus en la lingvo-scio! La kurso ja nur rampas, rampas.

Tiuj vortos flatis samideanon Benda. Ilia rigardo renkontiĝis. Sekrete li komparis ŝin al sia edzino, kiu konstante grumbas pri lia esperantista agado.

Dume ili atingis la supron de la monto kaj sidigis sub komprenema arbo. Kelkajn momentojn ili silente observadis.

— Mi volonte helpus vin — ekparolis samideano Benda.

— Ĉu vere? — ĝojis la knabino.

— Kial ne? Ĉu ne ĝuste por tio mi estas ja esperantisto, ke mi eduku novajn adeptojn por la movado?

— Mi dankas! — ridetis la knabino kaj pliproksimiĝis al li tiel, ke unu sentis la varmon de la alia. La atmosfero iĝis streĉa.

— Mi dezirus, ke ni jam estu ĉe la fino de tiu ĉi kurso — parolis la knabino kun facila ĝemo.

— Kial? Ĉu ĝi jam tedas vin?

— Ne, ne, ne, ne! — ŝi krietis. — Tute ne! Kontraŭe! Mi jam volus esti travivinta la tutan kurson kaj scii ĉion ekscieblan. Mi havas amikinojn, kiu tre bone parolas Esperante. Ŝi ĉiam fanfaronas, ke ŝi edziniĝis al la plej bona lernanto de la kurso, al ia komizo. Nu, mi diras tiam, ke tio ne estas tiel granda triumfo, kiel se ŝi estus edziniĝinta al la instruisto mem. Krome, ŝi rakontis ankaŭ tion, ke dank' al Esperanto jam tre multaj knabinoj edziniĝis: unu al franco, alia al finno, alia al serbo ktp. Ĉu vere?

— Jes, certe! Ŝi diris la veron! — pravigis samideano Benda. Atetu la Enciklopedion; tie vi trovas amason da tiaj okazaĵoj, kvankam tie estas menciita apenaŭ la duono. Ekzemple mi havas konaton: ankaŭ li edziniĝis pere de Esperanto, eĉ jam ekstedziĝis brile kaj sukcese, kvankam tio ne enestas en la Enciklopedio, sed ne grave — enestas en la movado! Ankaŭ s-ro Baghy diris la samon. Ĉu vi scias, kiu li estas? Li estas la fama verkinto de la »Verdkata Testamento« kaj »Streĉitaj Kordoĵ« kaj »Vortoj de Kamarado Lanti«, kiujn verkojn eldonis Raymond Schwartz en Parizo, per la helpo de SAT. Tiel estas, kara! Esperanto estas tre progresinta! Jen estas tutaj Esperanto-familioj, ekzemple s-ro Bleier kaj...

— Interese, tre tre interese! — entuziasmis la knabino. — Kara samideano, vi nenion povus de mi peti, kio ajn ĝi estus, kion mi ne plenumus, se vi promesust helpi min en la plej baldaŭ ellerno de la lingvo. Bolas en mi la san... la sopiro farigi plej rapide esperantistino.

— Ho kara, tre volonte mi faros tion! Plezure mi instruos vin ekster la kurso. Ni interkonsentu pri la tempo. Ekzemple, morgaŭ... ne, ne... postmorgaŭ vespere ni povos renkontiĝi kaj poste, ĉiun duan tagon. Ĉu bone?

— Bonege, bonege! Sed mi tre timas, ke mi ne povos ellerni...

— Eh, ne timu! Mi esperas, ke tiel inteligenta knabino, kia vi, bone parolos jam post tri monatoj.

— Ĉu vere?

— Se vi dediĉos al la afero nur duonhoron tage, mia espero nepre realiĝos — li diris entuziasme. Sed poste, kvazaŭ pro subita rememoro, li rigardis sian herloĝon kaj saltlevigis. — Ho kara, pardonu! Mi devas kuri al la stacidomo: mia edzino kaj fileto alvenos per la vagonaro de la oka.

La knabino aspektis kvazaŭ briko estus falinta sur ŝian kapon.

— Do, ĝis revido, postmorgaŭ vespere!

— Ne, ne, sinjoro! Subite mi konvinkiĝis, ke... jes, estus domage pri la tempo. Esperanto neniam venkos. Adiaŭ!

FRATETO

— Jan Jian —

Baj Ling kaj ŝia kuzo Ĉen Hung, sidante ĉe la du ekstremo de granda sofo en la salono de Ĉen, paroldis sencele pri aferoj naciaj, familiaj kaj lern-ejaj. De tempo al tempo, obstine defendante siajn kredojn, ili ridinde kverelis, sed ĝuste tio esprimis la ekscitan afekcion inter la gekuzoj ĉe ilia revido post unujara disiĝo.

»Kuzino, mia patro ne elvenos nun — li ankoraŭ ne ellitiĝis. Mi regalos vin per bona cigaredo.« Tion dirinte, Hung starigis, elprenis ŝlosaron el la poŝo de sia silkŝtofa peltrobo kaj iris al sia dormoĉambro en la malantaŭa korto por preni cigaredojn — al junuloj havantaj malpli ol dudek jarojn sinjoro Ĉen malpermesis fumi, sed li estis delonge kun unu okulo malfermita kaj la alia fermita.

Ling sin ripozigis oblikve al la sofordorso, silente kaj plezure rigardante la meblaron kaj dekoraciojn en la salono de ŝia onklo, kie ŝi ne ĉeestis jam unu jaron. Tie estis la elegantaj kuriozaĵoj, kies nomojn ŝi ne povis eldiri, la kelkjarcentaj renomulaj pentraĵoj kaj skribaĵoj sur la muroj, la moderna ebona meblaro, la netdesegna kaj diverskolora tapiŝo, la sofo tegita per pale blua flanelo. Do ŝia rigardo turniĝis al ŝi mem, sidanta en la bongusta sofo kaj portanta la solan o'ematikulan blutolan supveston... »Mia patrino ja estas lia propra fratino! Mi ja estas infano naskita de lia fratino! Kvankam la patrino mortis, ĉu li povas lasi min morti de malsato?... Ju pli riĉa oni estas, des pli oni amas monon — jes, mi ne petus de li eĉ unu monerejon, kvankam mi mortus de malsato...«

»Kuzino! Jen Tri-kasteloj!« Hung ridante enkuris, elprenis cigaredon el verda ladcigaredujo kaj ĝin donis al ŝi. Ŝi rigardis fikse la cigaredon en ŝia mano: diketan, kun sulketoj krucel al la kuniĝantaj paperrandoj, kun orstelo presita apud unu fino kaj linio da malgrandaj anglaj vortoj 'Three Castles' en la mezo, kaj la strietoj de tabako aminde hele flavaj — tian cigaredon ŝi ne vidis jam sep tutajn jarojn. Antaŭ sep jaroj, kiam ŝia patro ankoraŭ ne foriris de Pekino kaj estis ia 'estro' en la ministrejo por Internaj Aferoj, ŝi havis nur dek unu aŭ dek du jarojn. Ŝi ofte pelegis de ŝia patro veturi en lia aŭto, kaj li ne povis ne kunporti ŝin al ŝia oficejo. Kaj profitante la tempon, kiam ŝia patro estis aferplena, ŝi grimpis sur la tablon, prenis el verda ladcigaredujo kelke da tiaj cigaredoj, diketaj, kun sulketoj ĉe la paperrandoj kaj presitaj orsteloj, kaj, kaŝiĝinte sub la grandan skribtablon, lude ilin bruligis...

»Ve! Jam antaŭ sep jaroj mia patro min forlasis!« ĝemis Ling fumante la kvazaŭ konatan cigaredon.

»Efektive! Estas jam dek tri jaroj, de kiam onklo mortis! — Ĉu vi ankoraŭ memoras, kiel via patrino aspektis?«

Ling ne respondis, kaj ankaŭ Hung nenion plu diris; malĝojo kaj blua fumo momente regis la tutan ĉambron.

»Mia juna mastro! Ekstere estas maljunulino, nomata Cao, kun infano. Ŝi diris, ke ĝi estas nevo de la mastro. Ĉu mi ŝin enlasu?« tre respektive raportis servisto Ŝii Sun, enveninte en la salonon, starante apud la pordo.

»Nomata Cao? Nevo de la mastro? Mi ja nenion scias pri tiu ĉi parenco! Raportu al la mastro!« diris Hung turnante al Ŝii Sun oblikvan rigardon, jetis la

cigaredfinon en la cigaredpladeton, kaj, kumtirante kvazaŭ ŝajnige la nigrajn brovojn, sin apogante al la sofordorso, li diris indiferente, kvazaŭ al Ling, kaj ankaŭ kvazaŭ al si mem: »Kiel ĝene!«

Ling rigardis la altan dorsan figuron de Ŝii Sun en griza vatita robo; tiuj vortoj revenis akre en ŝian menson.

»Nomata Cao? Tiu infano estas nevo de la onklo?« ŝi stulte remaĉis. »Nur ni gefratoj mem havas la feliĉon esti nevoj de la onklo! Kaj nia nomo ja estas Bai, ne Cao.« Ŝi ne povis rememori tiun parencon, kaj ankaŭ kuzo Hung ne sciis. Sed subite ŝi ekdivenis: Estas tiu homo, estas tiu infano!...

Kiam ŝi estis dekunujara, iom pli ol unu jaron post kiam ŝia duonpatrino edziniĝis, en la daŭro de unu monato, preskaŭ ĉitage, kiam ŝia patro venis hejmen je la dua aŭ tria horo nokte, ŝia duonpatrino nepre kverlegis kaj kverelegis, ĝis ili vekigis je la bruo kaj vestiĝinte kuris en la ĉambron de la patro, kaj la patrino iom post iom hontsaĝne paciĝis. Kvankam la kaŭzon, kial la duonpatrino kverelegis, ŝi ne sciis tiam, tamen kelkaj vortoj, kiujn — preskaŭ la samajn ĉitage — ŝi aŭdis plej klare, kaj pri kiuj ŝi havis la plej profundan impreson, nun ebligis al ŝi klare kompreni tiun okazon.

»Cao Mei-ĵan! Kia publikulnaĉo! Tiel vin sorĉas! Ŝi diris al vi, ke pro vi ŝi ne plu havas rilaton kun aliaj viroj, kaj vi ŝin kredas?! Aĉulino! Fiulino! Senbontulino! Iru al ŝi! Ne plu revenu!« kolere kriis la duonpatrino, kaj forjetadis ĉion ajn, kio troviĝis apud ŝi: kuriozaĵojn, plumon, inkŝtonon, tason, glason... kelkfoje eĉ jetadis ilin kontraŭ la patron. La patro, elportante la doloron, la postan tagon elmetis novajn glasiojn, tasojn kaj ceterajn, kaj vespere denove... Ling ankoraŭ klare memoris, ke, ĝuste pro tio, ŝia koro tiam sentis malamon kontraŭ la duonpatrino, kaj pro tio ŝi intence malobeis ŝin por venĝi sian patron kaj sekve ŝi estis riproĉata kaj batata.

Ŝi rememoris ankaŭ, ke post kelkaj monatoj, iun tagmezon, kiam ŝi akompanis la patron el la oficejo en la aŭton kaj ĝoje rakontis al li, kiu kelnero malbontraktis ŝin kaj kiu onklo donis al ŝi skatolon da bombono, la aŭto subite haltis sur la asfaltojvojo kun du vicoj da bonorde tonditaj malaltaj pinoj kaj kondukanta al la pordego de la Ministrejo por Internaj Aferoj, kaj ŝi starante antaŭ la aŭtofenestro vidis figuron, kiu kuŝis metron antaŭ la aŭto. Cang De — konfidata servisto de la duonpatrino, sendita por kaŝobservi la patron — sidante flanke de la ŝoforo, riproĉe kriis:

»Ĉu vi ne volas vivi?! Kia loko por dormi?! For de tie ĉi!« Vidinte, ke la aŭto haltis, la kuŝinta homo subite starigis — Ho! virino! kun taŭzita hararo, blue flava vizaĝo, ruĝaj okuloj, larmoj en la palpebroj kaj kun vestoj malpuraj, kelkloke ŝiritaj kaj kelkloke flikitaj. Ling timigite rapide retrigiĝis al la sino de la patro. Sajnis, ke la patro konas la virinon, ĉar li malfrankive ordonis al Cang De:

»Iru demandi ŝin, kio estas al ŝi! Sed, antaŭ ot Cang De havis tempon por demandi, tiu virino jam sin jetis al la aŭto, frapadis la aŭtofenestron, plorante, kriante.

»Mortigu min! Mortigu min! Via moŝto sinjoro Bai! Kie kruela vi estas! Tri tutajn monatojn, nek homon nek monon mi vidis, per kio mi vivus! Nur pro malsato mi min vendis por tia fiprofesio! De kiam

Kiel bela la junaĝo! . . .

— Lorenzo dei Medici —

Kiel bela la junaĝo,
kiu fuĝos de ni plue.
Kiu volas, gaju ĝue!
pri l' morgaŭ' ne certas saĝo.

Vidu, Bakho kaj Ariana,
belaj, sin amantaj flame,
ĉar la trompa temp' tirana
fuĝas, ĉiam kunas ame.
Nimfoj kaj ceteraj, same,
vigle gajas plu kaj plue;
kiu volas, gaju ĝue,
pri l' morgaŭ' ne certas saĝo.

Kaj la gajaj satiretoj,
nimf-amantoj, jen, senĝene
en la grotoj, arbaretoj
embuskadas centpostene,
aŭ, de Bakha varmo plene,
faras feston plu kaj plue;
kiu volas, gaju ĝue,
pri l' morgaŭ' ne certas saĝo.

Tiuj nimfoj ja ne plendas
pri la ruzaj am-stimuloj,
kontraŭ Amo sin defendas
nur kruduloj, sendankuloj.
Miksiĝinte, en plezuroj,
ili festas plu kaj plue;
kiu volas, gaju ĝue,
pri l' morgaŭ' ne certas saĝo.

Kaj jen, sur azeno sia,
bela ŝarĝ' Sileno venas,
olda, gaja kaj ebria,
li de gras' kaj jaroj plenas,

ja rekt-stari vane penas,
sed jubilas plu kaj plue;
kiu volas, gaju ĝue,
pri l' morgaŭ' ne certas saĝo.

Sekvas Midas; ŝanĝ' al oro
tuj post lia tuŝ' eventas.
Kiom taŭgas la trezoro,
se la hom' ja ne kontentas?
Kaj ĉu dolĉon oni sentas
soifante plu kaj plue?
kiu volas, gaju ĝue,
pri l' morgaŭ' ne certas saĝo.

Orelstreĉu bone ĉiu!
Paŝton sur morgaŭ' forlasu,
nun ni, aĝaj, junaj, kriu,
inoj, viroj, ĝojon ĉasu,
ĉiu trista pens' forpasu,
kaj ni festu, plu kaj plue,
kiu volas, gaju ĝue,
pri l' morgaŭ' ne certas saĝo.

Junaj damoj kaj amantoj,
vivu Bakho kaj Amoro,
kaj muziko, dancoj, kantoj!
Ardu de dolĉec' la koro.
Nek laciĝo, nek doloro!
Kiel estas, estu plue,
kiu volas, gaju ĝue,
pri l' morgaŭ' ne certas saĝo.

Kiel bela la junaĝo,
kiu fuĝos de ni plue...

El la itala: K. Kalocsay.

mi loĝis ekstere kun vi, mi jam esperis fariĝi bona virino, mi vivis fidele al vi kaj havis rilaton kun alia viro. Ke mi vin ne hontigu, mi ne volis vin viziti. Tamen vi ne venis kelke da monatoj, ĉion lombardigeblan mi jam lombardigis, ĉion vendeblan mi jam vendis, kiel mi vivu de nun! Mortigu min! Mi petas, ke vi min mortigu. Mi volas esti via eĉ post morto!... Tiu ĉi infano estas via sango kaj karno, ĝin prenu hejmen kaj eduku...» diris la virino plorante kaj montrante al la flanko de la asfaltvojo, kien rigardante Ling vidis ruĝan tolrulon, de kie elvenis akra kompatinda ploro de infaneto.

La patro maltrankviligis, ne sciis kion fari kaj balbutis:

»Re — reiru! Re — reiru! kaj sin turninte al Cang De, kiu elaŭtiginte, staris flanke, li mankaresis siajn lipharojn, kaj kun rideto rigardis tiun virinon per ŝtelistaj okuloj, la patro diris:

»Do — donu al ŝi kelkan monon!« Cang De kapjesis. Sed, vere, la patro havis neniom da mono sub sia dispono, ĉar la duonpatrino timis, ke la patro sin malsanigos per diboĉo, kaj tial lin ordonis, ke li transdonu al ŝi ĉiun moneron el la ĉirmonata okcent-dolara salajro kaj sciigu sin pri la uzo, kiam li bezonos monon. Tion la patro eble forgesis, ĉar li elprenis sian monujon, sed kelke da vizitkartoj kaj unu agendo tuj rememorigis lin.

»Reiru! Vespere — vespere mi sendos — sendos al vi du cent dolarojn! — Irigu la aŭton!« Tirinte la virinon iom flanke, Cang De eniris la aŭton, bang' sonis la aŭtopordo, dudu sonis la motoro kaj la aŭto rekte kuris el la pordego de la Ministrejo por Internaj Aferoj...

Ling memoris ankaŭ, ke kiam ŝi resaniĝinte de nove iris al la patra oficejo, ili ne tagmanĝis hejme, sed prenis bongustegan okcidentan manĝon; kaj ke ĉar ŝi petis manĝverĝojn, la kelnero ridis je ŝi kaj ŝi ploris.

Si memoris eĉ pli klare, ke la sekvantan printempon la politika situacio ŝanĝiĝis, ŝia patro foriris de Pekino kune kun la duonpatrino kaj la unujara frateto Bao — naskita de l' duonpatrino — kaj ne plu revenis. Ili forlasis ŝin en Pekino sen adiaŭo, sen mono, tiel same, kiel Cao Mei-jan... jam sep jarojn...

»Kuzino! Fumu alian cigaredon!« Ling ekvekigis, kiel el sonĝo, kaj fikse rigardis al Hung tenanta cigaredon. Post momento, tiun cigaredon ŝi prenis kaj, ĝin ekbruliginte, ekfumis. Si ensuĉis kelkfoje kaj diris mallaŭte al Hung:

»Ĉu mi eliru vidi?«

»Kion vidi? Ne estas malriĉuloj ne abomenaj!« Tion dirinte Hung eksentis la malkonvenon de tiu diraĵo antaŭ Ling kaj ruĝiĝis, sed vidante, ke sur ŝia vizaĝo ne estas eĉ plej malmulta esprimo de ofendiĝo,

li ŝajngis sin senĝena, intence iris al la ĉambrangulo kaj jetis la cigaredfinon en la kraĉujon.

«Ni iru vidi! Eble venis tiu...» Si ne finis la frazon, sed Hung fine iris kun ŝi el la varmigitita de vaporhejtilo ĉambro.

«Kial vi nin tiel ĝenas! Ĉu mi ne diris al vi, ke nia mastro ne konas vin?» Ling tuj aŭdis, ke la servisto Sü Sun tion krie diras interne de la pordego.

«Ne konas?! Kiu ne konas Bai Ĝin-ĵih? Ĉi tiu infano estas filo de Bai Ĝin-ĵih...» Tion Ling aŭdis klare, kiam ŝi atingis la ŝtupojn interne de la pordego. 'Bai Ĝin-ĵih' — la nomo de ŝia patro! Ŝia kapo turniĝis, la oreloj zumis al ŝi, la pluan diraĵon ŝi ne povis aŭdi, la kruroj tremis, ŝi pene supreniris kaj, enirinte en la pordejon, vidis, ke kuzo Hung kolere krias gestadante:

«Foriru! Kiel vi kuraĝas pretendi, ke vi estas nia parenco? Mi ne konas vin!»

«Ne utilas diri, ke vi ne konas! Vi estas fraŭlo Cen, ĉu ne? Jen estas via kuzo; lia patro lin forlasis, ne venis eĉ letero jam sep jarojn, oni ne scias, kie lia patro estas, lia patrino mortis antaŭ pli ol kvin jaroj...» diris maljuna virino sidante sur la malalta ŝtonleono ekster la pli ol unu futon alta sojlo; ŝi estis blankhara, sulkplena, simila al almozulino. Etendante el la eluzita maldika vesto tremantan velkintan manon malantaŭ sin, ŝi daŭrigis:

«Paŝu antaŭen! Salutu vian kuzon! Li donos al vi mangajon...»

«Al la diablo! Kuzo?! Kiu vin konas?! For!» Hung kolere ŝvingante la manon ordonis al la servistoj, ke ili ŝin forpelu.

Maldika, malforta infano rampis timeme el post la maljunulino. Ling ne kuraĝis ĝin rigardi, tamen fine ŝi ĝin rigardis — ho! longeta vizaĝo, iom elstara frunto, nigraj grandaj pupiloj, la flankaj okulanguloj iom leviĝantaj, alta nazo, elstaraj lipoj. Ho! tiom ĝi similis, tiom similis ŝian patron! Ŝi konfuzo kaj freneze kuris al ĝi, firme tenegis ĝiajn manojn, vokante 'frateto'. Subite granda fortego haltigis ŝian langon, venena akra voĉo sonis de ŝia orelo!

«Vidu! Kion vi faras!» Ŝi delasis tiun delikatan, glacian, velkan manon kaj penis diri en tia trankvila kaj milda voĉo, per kia oni diras al ordinara aminda infano:

«Infano! Kiomjara vi estas?»

«Okjara.» Kvankam ĝi tremis en eluzitaj maldikaj vestoj, la pala vizaĝo de la infano ruĝiĝis de honto. La infano estis tiel aminda, tiel beŝa, tiel digna, ke ĉiu kredus, se oni dirus, ke ĝi estas infano de ŝia patro. Ŝi fikse ĝin rigardis, ne povis diri unu vorton plu, kvankam multon ŝi volis diri.

«Venu! Mi estas via fratino; kiel frateto Bao, vi tiel same estas mia frateto de sama patro kaj malsama patrino; kiel li, vi tiel same estas nevo de onklo mia. Vi ankaŭ devus sidi en tiu varmigitita de vaporhejtilo ĉambro kaj esti afable traktata. Vi... venu!» Ŝi volis tion diri, sed ne eldiris, ŝia onklo ne konfesis lin kiel sian nevon, ŝia patro ne konfesis lin kiel sian filon, la socio ne konfesis lin kiel homon, kiel ŝi povis havi la forton eldiri kaj lin voki 'frateto'?

Rigardinte Ling, la solan mildan, bonkoran personon, kiun ŝi renkontis tie ĉi, kaj rigardinte la malpuran bhutolan robon, kiun Ling portis, la maljunulino, ŝajne ekkuraĝiĝinte, diris:

«Vi servas la fraŭlojn kaj fraŭlinojn ĉi tie, ĉu ne? Mi diru al vi tiun ĉi aferon, vi bonvole raportu al via mastro...» Ling konfuzo sin turnis al la mal-



Haller:

Abesina knabo

junulino ofendigante, ĉar tiu ne sciis, kiu ŝi estas; sed samtempe konflikta penso diris al ŝi, ke ŝi devus danki tiun maljunulinon pro tio, ke ŝi ne eltrovis, ke ŝi estas fratino de la infano.

«Lasu min rakonti al vi: Tiu ĉi infano estas filo de mia filino. Ĝia patro ĝin forlasis. Antaŭ sep jaroj ĝia patrino, portante ĝin, vizitis ĝian patron ĉe la Ministrejo. Li diris, ke oni sendos al ni du cent dolarojn. Sed ĝis kiam ĝia patrino mortis, ni ja ne ricevis eĉ unu moneron! De tiam mi lavadas kaj kudradas, kaj tiel ĝin nutras. Sed nun mi ne kapablas, mi maljunigis! Vidu, ke ĝis nun ni ankoraŭ ne havas vatiajn vestojn!... Ĝia patro loĝas en granda eŭrop-stila domo, veturadas en aŭto... Vi scias, ke ĝia patro estas Bai Ĝin-ĵih, — kiu ne konas Bai Ĝin-ĵih? Antaŭ ol li foriris, li perlaboris kelk mil dolarojn ĉiumonate en granda oficeĝejo! Bai Ĝin-ĵih! Kiu lin ne konas?!...» La maljunulino ripetadis la nomon de ŝia patro, ĉiu silabo pikis ŝian oreleon, ŝian koron.

«Mia filino nomiĝis Cao Mei-ĵan, mi portas kun mi foton de ŝi kaj de Bai Ĝin-ĵih, vidu, se vi ne kredas!» diris la maljunulino kaj efektive transdonis al ŝi paperpakon. Ling skuis sian kapon, ŝi ne havis kuraĝon ĝin vidi.

«Oni diris, ke oni nin ne konas, sed kiu ne scias, ke sinjorino Bai estis fratino de sinjoro Cen? Sinjorino Bai mortis antaŭ longe, forlasis unu fraŭlilon kaj du fraŭlojn. Poste Bai Ĝin-ĵih edziĝis alian, nomataŭ Uang, ĉu ne?»

«Jes, jes! Ĉio rilatas al nia familio! Kaj tiu fraŭlino forlasita de la fratino de sinjoro Cen ja estas mi mem!» Ling volis tion eldiri, sed ŝi nenion diris, nur konfuzo tiris siajn harojn.

«Mi ne povis trovi ĝian patron; se mi sendos ĝin al orfejo, oni postulos de mi tri garantibutikojn. Kiu garantius por ni?! Mi ekmemoritis sinjoron Cen. Petu lin por ni, ke li faru ĝin servisteto. Kio restos de via mango, sufiĉos por ĝin satigi... Ve! jam du tagojn ni ne mangis...»

«Avimo! Ni iru!» diris tiu infano, levante sian amindan kapon kaj tirante la veston de la maljunulino.

«Ni iru? Atendu onklon! Onklo vin mangigos, vestos. Ĉu vi ne malsatas? Ne sentas malvarmon?...» La infano, larĝe malferminte siajn grandajn nigrajn okulojn, ŝin rigardis kaj silentigis. Tion vidinte, Ling preskaŭ ploris, sed kion ŝi povis fari?! Ŝi volis malgraŭ ĉio ĝin ricevi, nutri, eduki, ĉu la socio permesis ĉu ne, ke ŝi voku ĝin 'frateto'. Ŝi volis ĝin forporti kun si.



Kokoschka:

La pentristo Carl Moll

Sed per kio ŝi ĝin nutros, edukos? Ŝi, kiel ĝi, estas infano forlasita de la patro, nur ŝi estas pli maljuna, povis vivi tiujn sep longajn jarojn per sia propra povo kaj grandaj penoj... Sed kiel tiuj malmultaj dolaroj, kiujn ŝi gajnas ĉiumonate, povus ankaŭ ĝin nutri? Krome... la socio...

»Kvankam ni perlaboris per tiu profesio, mia filino ja estis bonulino! De kiam ŝi konis Bai Ĝin-ĵih, ŝi tuj ĉesis pagi la imposton kaj ricevis nenian alian plu. Antaŭe ankaŭ sinjoro Bai estis tre bona, ofte ŝin vizitis, ofte donis monon al ni. Nur de kiam li edzinigis tiun virinon nomatan Uang...»

»Idioto! Foriru! Starante tie Hung delonge malpacienca kaj, tirante la veston de Ling, li diris: »Kial vi atentis ŝin? Ĉu vi ne timas, ke pedikoj rampos sur vian korpon! Kiel malvarme! Ni eniru! Sin tirante, li ekiris. Ling sekvis lin, rerigardante al la infano ĉe la sino de la maljunulino, tiel simila al la patro, tiel aminda...»

»Frateto! Si interne ĝin vokis malĝoje, intime kaj fervore. Pene turninte la kapon antaŭen, ŝi vidis dekkeltajn geservistojn amasigantajn en la pordejo, ĉiuj vizagoj ridetis al ŝi. Si sciis, ke tiu rideto diras: »He, via frato! Relenante la larmojn kaj elportante la doloron, ŝi mallevis sian kapon kaj eniris.

Enirinte la salomon, Hung iris al la malalta ebena tableto antaŭ la sofo, prenis du cigaredojn el la verda ladcigaredujo kaj donis unu al Ling. Si mekanike ĝin prenis, rigardante rekte antaŭen. La sono, kiun Hung faris frotante alumeton, ŝin ekremigis. Ŝi fale sidigis en la sofon, fumante. Sajnante febranta, ŝi jen malvarmigis, jen varmigis. Ŝi rigardis ĉiun objekton en la ĉambro, penante trovi ion, kio povus ŝin eksciti, distri. Sed ŝi povis trovi nenion. Ĉiu tablo kaj seĝo, ĉiu pentraĵo kaj skribaĵo, ĉiu vazo, ĉiu taso, ĉiu kuriozaĵo, kies nomon ŝi ne sciis, estis vizaĝo longeta, kun

iom elstara frunto, grandaj nigraj pupiloj, la flankaj okulanguloj iom levitaj, alta nazo, lipoj elstarantaj — tiuj multnombraj vizagoj moviĝis antaŭ ŝiaj okuloj, jen proksimen, jen malproksimen, jen ŝajne ridetantaj al ŝi. Ŝi rigardis ilin — »de la patro?«, »de la frateto?« ŝi ne povis distingi.

»Verdire, estas vere«, diris Hung sin apogante al la sofordoro, eligante densan fumcirklon. »Kiel simila al la onklo! Kaj ĉio, kion ŝi diris, estas vera. Sed, vi scias, ni ne povas konfesi. Pensu, ŝi nutris ĝin sep jarojn, kiom ni devus al ŝi pagi? Kiom kostus ĝia nutrado? Ĝia eduko? — se ni ĝin konfesus, ni ne povus ne eduki ĝin. Kaj ĉu tiu maljunulinaĉo de nun ne ofte venus por nin eltordi? Kiam ŝi mortos, ĉu ni ne devus ŝin enterigi? Ĉu ni havas tiun ĉi devon? Kaj, krome, laŭ leĝo la rajton konfesi infanon antaŭ edziĝo havas nur la patro, ne ni...»

Ling ne povis plu sidadi tie kaj aŭskulti al tia parolo. Ŝi kolere starigis. Ekflamigis ŝiaj okuloj. Ŝi fikse rigardis Hung; al ŝi ŝajnis, ke la pekono de forlasado de tiu infano faris ne ŝia patro, sed Hung. Ŝi volis severe lin bati, pece lin disŝiri. Subite ŝi volis plori; ŝia koro, ŝajne pikita de io, akre doloris. Ŝi pinĉestingis la cigaredon per du fingroj. Stranga voĉo sprucis el ŝia buŝo:

»Mi ne eniros. Diru al la onklo por mi, ke mi foriras.« Ne plu rigardante lin, ŝi turnigis malantaŭen. La frapigo de la glacia porcelana pordotenilo kontraŭ ŝian manplaton ŝin tremigis, kaj samtempe klare rememorigis ŝin pri tiu infano:

»Ĝi ne havas manĝaĵon, nek vatitan veston! Ĉi tiujn jarojn ankaŭ ŝi mem ofte ne havis manĝaĵon kaj vatitan veston, sed ŝi neniam petis unu moneron de sia onklo, malsatante vidi lian ĉiam ridetaĉantan vizagon aŭ aŭdi lian malvarman diraĵon: »Multaj estas, kiuj ĉe mi manĝas; estas malfacile mastrumi.« Jes, por savi infanon mortontan de malvarmo kaj malsato, ŝi ja povus konsciencie, kurage kaj sen la plej eta honto elendi la manon, kiu neniam petis monon de iu ajn, al sia milionota onklo por peti iom da mono, sed... tiu frostmortonta kaj malsatmortonta infano estis ŝia frateto, ho, ŝia frateto!...»

Ŝi firme eliris el la salono. Forta vento, vento portanta sablon kaj malvarmon, b'ovegis kontraŭ ŝin. Ŝi rapide enŝovis siajn manojn en la varmajn poŝojn de la vatita robo, sed, subite, ŝi sentis glacial malmolan objekton — ho! unu dolaron! per kiu ŝi aĉetos manĝaĵon por la estonta semajno. Ŝi tuj ĝin firme tenis, kvazaŭ ricevinta vivon.

»Ĉu vi iras, fraŭlino Ling?« diris al ŝi la servistoj ekstere de la dua pordego, sed en ŝia orelo zumadis: »via frateto!« Ŝi sin kuntiris, penis eviti renkonton de ŝiaj okuloj kun iliaj kaj konfuze kapjesis.

Sur la malalta ŝtonleono ekstere la pordego sidis ankoraŭ tiu maljunulino. La infano jam endormigis, apogante la kapon sur ŝia genuo. Evitante plue vidi la infanon, Ling penis levi altaj la okulojn. Pasante preter la maljunulino, ŝi jetis al ŝi la varmigitan de sia mano dolaron kaj murmuris:

»Nia mastro ĝin donis al vi,« kaj malsupreniris la ŝtupojn, rapide foriris kontraŭ la malvarmega nord-venton.

»Per unu dolaro ĉu mi povas reaĉeti la vatitajn vestojn el la lombardejo aŭ aĉeti manĝaĵon?!« sonis post ŝi la rauka voĉo de la maljunulino.

El la ĉina: Venlo Fon.

Tri pecetoj de Baudelaire

HUNDO KAJ FLAKONO.

»— Bela, fidela, kara hundo mia, venu kaj flaru ĉi tiun bonegan parfumon aĉetitan ĉe l' plej bona parfumisto de la urbo.«

Kaj la hundo, ŝvingante per la vosto, kio miakrede signas ĉe tiuj kompatindaj estuloj ridon; kaj rideton, alproksimiĝas kaj metas demandeme sian malsekan nazon sur la senŝtopilan flakonon; kaj, subite paŝante malantaŭen, timigite ekbojas riproĉe al mi.

»— Ha! fia hundo, se mi prezentus al vi pakon da ekskremento, ja vi plezure flarus ĝin kaj eble glutus. Nu, vi mem, malinda kunulo de mia bedaŭrinda vivo, similas tiun publikon, al kiu delikatajn parfumojn, incitilojn de kolero, oni devas neniam prezenti, sed liveri zorge elektitan fekaĵon.«

EBRIIGU.

Estu konstante ebriaj. Jen la tuta kaj sola konsiderinda punkto. Por esti liberaj de l' abomeninda pezo de l' tempo, kiu premrompas al vi la ŝultrojn, kaj klinas vin perforte al la tero, ebriiĝu senhalte.

Per kio? — Per vino, poezio aŭ virto laŭplaĉe; sed ebriiĝu.

Kaj sur palacaj ŝtupoj, sur fosa verdaĵo, en la malserena soleco de via ĉambro se vi okaze vekigiĝos sentante, ke via ebrieco ĉu parte, ĉu tute jam perdis sian efikon, demandu la venton, la ondon, la stelon, la birdon, la horloĝon, ĉion, kio forkuras, ĝemas, ruliĝas, kantas, parolas, demandu pri la horo kioma; kaj la vento, la ondo, la stelo, la birdo, la horloĝo respondos: »Jam estas la horo por ebriiĝi! Por ke vi ne estu sklavo turmentata de l' tempo, ebriiĝu, senhalte ebriiĝu! Per vino, poezio aŭ virto laŭplaĉe.«

LUDILO DE MALRICULO.

Pri senkulpa amuzo imagon mi volas havigi al vi, tiom malmulte da efektive senkulpaj amuzoj estas renkonteblaj!

Kiam vi matene promenos kun konscia intenco voĵiri sencele, plenŝtopu viajn poŝojn per tiaj kelksoldaj bagatelaj eltrovaĵoj, nome platligna ŝnuretmoza pulĉinelo, amboŝfrapaj forĝistoj, rajdisto sur fajfilvosta ĉevalo, kaj apud trinkejoj, piede de arboj disdonu tiujn ludilojn al nekonataj malriĉaj infanoj, kiujn vi okaze renkontos. Vi konstatos, ke iliaj okuloj supermezure vastiĝas. Komence ili ne kuraĝas akcepti, ili dubas pri sia feliĉo. Baldaŭ ili abrupte ekkaptos la donacon, kaj forkuros kiel katoj, kiuj lerninte malfidi la homon, rapidas malproksimen post enbuŝigo de la manĝota peceto al ili ĵetita.

Vojrande, malantaŭ la krado de vasta ĝardeno, funde de kiu aperis blanke brila en la sunlumo belarhitektura kastelo, staris gracia, sanaspekta infano en elegante altranĉita kampa kostumo.

Tiajn infanojn lukso, senzorgeco kaj konstanta spektaklo de riciaĵoj igas tiel beletaj, ke oni povus pensi, ke ili estas faritaj el alia materialo ol infanoj de mezklasa aŭ popola deveno.

Apud li sur herbotapiŝo kuŝis, tiel freŝa kiel sia mastro, multekosta ludilo lakita, orumita, purpure vestita kaj kovrita per plumtufoj kaj vitrajaj ornamoj. Sed la infano tute ne atentis sian plejaman ludilon; kion li rigardis, tio estas jena:

Sorparbo

— Marie Uder —

Svelis ĝi de ĉiu flanko,
Verdon tute kovris blanko,
Pro florad' petol-inklina
Flirtis kvazaŭ rob' virina.

Cien la florneĝ' sin ŝovis,
Vojon tra l' fenestro trovis,
Dum abundis dolĉ-aromo
Iom naŭza ĉe la domo.

Kiam vent' la florojn levis,
Kvazaŭ kuseneg' ekkreis —
Kaj lanugoj en grandaro
Svarme flugis dum la falo.

*

Ĝi nun iĝis serioza,
Verdas en kviet' ripiza.
Ĉu lacigis am-ebrio?
Svelas nova energio.

Ree kaptas ĝin frenezo:
Troas jam la ruĝa pezo —
Kiom da sukajo densa!
Ho, volupto senripensa!

Ĝin feliĉo ŝarĝe premas —
Eĉ aer' nun sangoplenas.
Pereigas abundeco,
Ĝia troas fekundeco.

Nur beraroj, bero-ruĝo!
Ne sukcesos plu rifugo:
Altrudad', impertinento —
korton kovras ruĝ-tegmento.

Geme la pordego krakas,
Jam verandon ekatakas
La sorparoj venkon ĝuas,
Ruĝo, ruĝo ĉien fluas.

Tra l' fenestro frumatene
Jam ruliĝas ili ĝene,
Eĉ la dormo ekpurpuras,
Ruĝon, ruĝon respegulas.

El la estona: *Hilda Dresen.*

Trans la krado, sur la vojo, meze de kardoj kaj urtikoj ankaŭ staris alia infano malpura, malbonaspekta, kvazaŭ fulge ŝmirita, unu el tiuj knabaĉoj, kies belecon senpartia observanto malkovrus, se li purigis lin de la naŭza mizero-ŝmirajo, same kiel farus kompetentulo elflarinta idealan pentraĵon sub krudlaka tavolo.

Tra tiuj simbolaj ferstangoj, kiuj faris apartigon inter du mondoj, publika ŝoseo kaj kastelo, la malriĉa infano vidigis al la riĉa sian propran ludilon, al kiu tiu ĉi avide okulumis, kvazaŭ ĝi estus io malofta kaj nekonata. Nu, tiu ludilo, kiun la vojuleto incitis, ŝvingis kaj skuis en kradita skatoleto, estis... viva rato! La ludilon kredeble pro ŝparemo la gepatroj prenis el la vivo mem.

Kaj ambaŭ knaboj fratece ridis unu al la alia per dentoj samblankaj.

El la franca: *Marc Pujol.*



OBSERVO

(A. M.) GORKIJ. De jardekoj mi gardas en mia ĉambro foton: en la arbaro de Jasjana Poljana, inter neĝaj arboj, staras maljunulo kaj junulo: la maljunulo surhavas la proletveston de rusaj mujikoj: kitelon, zonan ĉirkaŭ la kokso, senformajn ŝuacojn kaj entute li aspektas kvazaŭ rusa lignohakisto, kiu dumlabore ripozas en la arbaro; la alia, la pli juna, apogas sin sur sian bastonon, li estas vestita urbane, ja ne tute elegante, sed tamen burĝe. Lia surtuto estas bonfasona, lia ĉapelo iom arteca. La maljuna kamparano estas grafo Tolstoj, la juna urbano Maksimo Gorkij, la «kozako». Malhele ili rigardas en la lenson de la fotoaparato; sur ĉi tiu bildo Tolstoj jam estas sepdekjara, Gorkij apenaŭ estas tridek aŭ tridek kvin. La vizaĝo de Tolstoj estas maldelikata kaj kruda: ĝi estas la vizaĝo de kamparano, kiu ĵus paŝis el arbaro, kien li apartenas ne formoveble, kie li naskiĝis kaj kie li pasigis la vivon. La pejzaĝo, arboj, arbustoj, griza ĉielo, la dezerta rusa angulo estas la natura fono de ĉi tiu alta maljunulo, kiu, el sub la sulkitaj brovoj, vidas la mondon per nerepicebla kaj severa rigardo. Sur ĉi tiu bildo rigardas mujiko multe spertinta kaj multe suferinta, ligita al sia fiksa ideo kaj fiksa tero; ĉi tiu mujiko estas Tolstoj, la grafo. La alia figuro estas Gorkij, ĉiamaniere pli urbeca, pli «burĝeca», ne nur laŭ la vesto; la vizaĝo estas plena de konfliktoj, de serioza spleno; unu manon elegante li enpoŝigis, per facila klino li apogas sin sur promenbastono kaj entute li aspektas kiel sukcesa urba verkisto, kiu ekskursis en vilaĝon, promenas en arbaro, renkontis mujikon, longe parolis kun la «infano de la popolo» pri vivo kaj morto kaj eĉ toleris, ke li estu fotografita por la moskvaj ilustritaj revuoj. La paralelon mi ne volas pli akriĝi, ĉar, en la finaj konsekvencoj ĝi eĉ ne estas pravigita. Sed, okaze de la morto de Gorkij, mi legis pri li multajn studojn, artikolojn, rememorojn, — manifestadojn, kiaj povas naskiĝi nur en la momento de morto, ĉar ili estas tro personaj, kaj intimaj, por ke la memorskribanto publikigu ĝin jam en la vivo de la eminenta verkisto, — kaj fininte la aktualajn revadojn, mi prenis de sur la muro la malnovan foton kaj longe ĝin rigardis. La foto estis farita en Jasjana Poljana, ĉe unu el la promenoj, pri kiuj Gorkij rememoras en sia taglibro. Sur ĉi tiu foto, Tolstoj estas jam nura «rolo», profeto kaj mistiko; li jam verkis la romanon «Milito kaj Paco» verkis la «Morton de Ivano Iljiĉ», li jam nur predikas kaj skribas taglibron; kaj post unu el tiuj promenoj notis Gorkij en sia taglibro, ke Tolstoj subite ekploris kaj al la maltrankvila demando de la juna amiko, li respondis malespere: «mi ploras, ĉar mi ĉion skribis kaj diris, kion eblas skribi kaj diri pri la vivo, sed en nenio mi sukcesis, la homoj ankaŭ hodiaŭ ne estas pli bonaj, pli saĝaj, pli feliĉaj.»

La du figuroj sur la foto estas mortintaj; la revolucio, por kiu unu estis sencola preparanto, la alia ĝia oficiala kaj festata verkisto, proksimume antaŭ dudek jaroj, je kolosaj kostoj, «realigis» tion, je kio kredis la du verkistoj, je kio ili sin ĵuredevisis, kion ili anoncis. Tolstoj estis grafdevena, kristano kaj mistika «komunisto»; Gorkij devenis de etburĝoj, — lia patro estis prokuristo de ŝipentreveno, lia patrino estis filino de riĉa komercisto, — en sia junaĝo li forvagas el la gepatra domo, vivas sur la bordoj de Volĝo inter mujikoj kaj laboristoj. En sia dudektria jaro li verkas kaj publikigas en kaŭkasa ĵurnalo sian unuan verkon kaj post tri jaroj jam tuta Rusujo konas lian nomon; liaj verkoj tuj estas tradukataj al la plej multaj lingvoj de la mondo. Li konatiĝas kun la rusa revolucio, fariĝas amiko de Lenin; post la 1905-a moskva ribelo li fuĝas tra Finnlando al Ameriko, de tie li iras al Capri kaj vivas tie dum sep

jaroj. Tiam lia nomo jam estas mondfama, la prestiĝo de liaj laboraĵoj estas nedifektebla, kaj enlande kaj eksterlande. La militon li travivas en Moskvo kaj en la Krimea duoninsulo; la revolucio rigardas lin sia oficiala verkisto, sed Gorkij ne tute konsentas kun la mastroj de la sovjetoj, dufoje li elmigras, lia rolo en la revolucio estas homa kaj justa. La fratino de Lenin, Uljanova, skribas nun en rusa gazeto, ke «Gorkij venis al Kremlo ĉiam por nur por aliaj, ĉiam li volis helpi; li petegis amnestion, kaj Lenin, kiu lin amis kaj respektis, ĉiam praaŭskultis lian peton, kaj, kie estis eble, li helpis al la protektatoj de Gorkij.» Li ege kondamnis la literaturpolitikan sistemon de la sovjetoj; konata estas lia parolo, kiun li diris antaŭ du jaroj en Moskvo, en la «Kongreso de Verkistoj», kiam li postulis nepran liberon por la verkistoj. Li postulis, ke oni desigu la literaturan partiodiktaturon. Li brulstampis la agitan tendenc-literaturon kaj per sia influo li atingis, ke la rusaj verkistoj liberigis el la jardeka primitiva kaj burokrata spirita terurismo; la verkistoj ne plu devas siajn verkojn limigi al la sovjeta politika aktualeco, kaj ili denove povas skribi pri la homo, kiu estas ne partiano, sed la eterna ludilo de vivo kaj morto. Gorkij estis granda verkisto jam antaŭ la milito kaj li restis granda homo ankaŭ en la revolucio. Li devenis de etburĝoj, sed jam liaj unuaj verkoj vicigis lin inter la verkistojn de proletaro; li neniam predikis, ĉiam «nura» verkis. Li fiksas vivojn, skizis sortojn, ne konkludis el tiuj sortoj, ne induktis politikajn dogmojn el siaj ekkonoj, kaj tamen, ĉie en la mondo la proletaro fermis lin en sian koron. La homoj sentis: tiu ĉi kozako estas nia homo. De la momento de sia ekverko Gorkij estis konata de la mondo; liaj verkoj pli rapide kaj pli intense penetris eksterlanden ol tiuj de Tolstoj, kiu nekontraŭstareble, sed per malrapida ondado trais la universalan homan spiriton. Gorkij havis sukceson kaj pri tiu «sukceso» nun artikolas febre tiuj, kiuj lin konis, kiuj estis en lia proksimo; kiuj estis atestantoj de la senekzempla scio de ĉi tiu granda individuo.

Kio estis la sekreto de lia sukceso? Gorkij gardis en la revolucio sian verkistan objektivcon, sian homecan dignon. Liaj verkoj prezentis la vivon de «malriĉuloj», sed la verko kaj la homo servis ne la idealojn de unu partio, de unu movado, sed tiujn idealojn eternajn, kiujn, jes ja, la lenolribroj etikedas kiel «generale homajn». Inter la artikoloj, kiuj nun, post lia morto, klopodas klarigi la sekretojn de lia individueco, tre impresis min la rememoro de Ivano Bunin, la Nobelpremiita, elmigrinta rusa verkisto. Bunin en iu franca gazeto priskribas siajn proprajn rememorojn; dum jardekoj li vivis en la proksimo de Gorkij, ili logis kune en Krimeo, ili renkontiĝis en Moskvo, ili estis kune en Capri, kaj la bildo, kiu mi desegnas pri la granda verkistkunulo, estas intima kaj ampleksa, konfidinda kaj homa. Bunin skribas, ke Gorkij havis neŭrastenion kaj estis timema. Li volis vivi cent jarojn, lia fortika organismo batalis kontraŭ lia malsano, lia neŭrastenio kaj liaj detruaj pasioj; la tutan tagon li parolis, la tutan tagon li drinkis, kaj li fumis cent cigaredojn; ne povis bone elteni la vivon kaj ĉefe ne povis ĝin elteni sen narkoto. (Kiu ĝin eltenas? ... mallaŭte kaj saĝe demandas Bunin.) Antaŭ la publiko li kondukis malaplonbe kaj embarasite; kaj krom la drinkado, fumado, rolado kaj neŭrastenio, ĉiutage estis kvar-kvin horoj, kiam li laboris, kiam li reiris al la verkado. Li amis la monon — skribas Bunin — «li amis ĉion, kio estis multa kaj granda». Iam li kolektis malnovajn monerojn, medaletojn, juvelojn... Ankaŭ la vinon li trinkis tiel abunde kaj tre amis ĝin. Hejme li trinkis nur francan vinon, li malsatis la vinojn rusajn. Ofte mi meditis, kiel li havas fortojn por tia vivmaniero; ĉiutage dum horoj paroli kun homoj, kaj en ĉiu parto de la tago kaj de la nokto drinki, fumi cent cigaredojn, dormi kvin aŭ ses horojn, kaj dume per delikata kaj ronda skribo verki romanseriojn kaj teatraĵojn?... Tiu ĉi bildo, kiu mi desegnis Bunin, estas senteble fidela. Tiu ĉi verkisto ne estis la asketa proleto; li estis homo kaj verkisto laŭ la eble. Sed trans tio kaj fore de la revolucio la «suk-

ceso» de Gorkij estas ĝuste tiu ĉi fideleco: la fideleco al si mem, al sia naturo kaj al la homoj. Nun, kiam la mal-espéra generacio volus eduki siajn verkistojn laŭ la ekzemploj de Robespierre kaj Savonarola, ne malutilas prezenti lin kiel ekzemplon, lin, kiu maskigis etburĝo, kiun la neŭrasteno kaj talento portis al vagabondado, al la revolucio, portis al la senfinaj bordoj de la homa travivaĵo, kaj kiu en la revolucio povis resti kontraŭstara animo, kaj kiu en la privata vivo povis esti burĝe splena kaj nesubaĉeteble honesta homo... Gorkij, la «oficiala verkisto de la sovjetoj», avancis en la momento de sia morto: la tuta homaro, ĉiu socio volas lin alproprigi. Lia «sukceso» estas absoluta kaj tamen kiom malregula!

La bildon mi rependigis al la muro. La du figurojn mi transdonu al la historio. Ankoraŭ tro proksimaj ni estas al ili, por povi tute objektivite juĝi iliajn intencojn. La tempo jam pesis ilian arton kaj vicigis tiujn al la eternaj trezoroj de la homa spirito. Unu el ili, Tolstoj, antaŭ dudek kvin jaroj, sur la mortlito, diris: «La kamparanoj... kiel mortas la kamparanoj?» La alia, Gorkij, agonis dum tagoj kaj laŭ la noto de lia kuracisto, doktoro Levine, li diris agonante: «Estos milito, estos militoj... oni devas prepariĝi». Nun jam ambaŭ silentas. Nur iliaj verkoj parolas anstataŭ ili, sentempe, per voĉo neniam mallautiĝanta, kiel la maro. Ili havis sukceson... Kaj ĉe la krepusko de sia vivo ili ambaŭ povis tragike mediti, ĉu per ilia verkaro «la homoj fariĝis pli bonaj, pli saĝaj, pli feliĉaj?» (L. Sp.)

(A. S.) CHESTERTON †.

When fishes flew and forests walked
And figs grew upon thorn,
Some moment when the moon was blood
Then surely I was horn;

«Kiam la fiŝoj flugis kaj promenis la arbaroj kaj kreskis figoj sur la dornarbetoj, en momento, kiam sanga estis la luno, certe tiam mi naskiĝis» diras la Azeno, «kvarpiede iranta parodio de la diablo», en la plej fama poemo de Chesterton. Ke la fiŝoj kutimas flugi kaj la arbaroj promeni, tion malkovris la poetoj de la XX-a jarcento, la ribelantoj de la malracio, kiuj ekkonis, ke la poezio multfoje komenciĝas tie, kie haltas la sobra menso, kie la komandon kaptas la liberaj asociadoj kaj puŝas la ŝipon de l'verso al pli larĝaj maroj. Chesterton estis la heroldo kaj samtempe unu el la plej grandaj plenumantoj de la esprimismo, dadaismo, surrealismo.

Sed — vane priridas ĝin la tuta freneza naturo — la Azeno havis sian horon: «Jubilo sonis ĉirkaŭ miaj oreloj kaj palmoj stermiĝis sub miajn piedojn.» Ankaŭ la azeno apartenas al la eterne strikta ordo de la aĵoj kaj ankaŭ ĝi gloriĝas en absolutan momenton, ankaŭ ĝi havas transcendecon, kiel tiuj aĵoj. Chesterton estis poeto kaj heroldo ankaŭ de la Ordo. Ne tio estas la granda sensacio — li diras — se la vagonaro elreliĝas, sed tio, ke kontraŭ tiom da kontraŭaj eblaĵoj ĝi tamen alvenas ĝustatempe.

Malraciismo kaj ordo. De centjaroj, ĉiu ordo estas la ordigiteco de la menso, ni ja ne kapablas eĉ imagi alian ordon ol tiun liniitan de la menso, kaj niaj revolucioj estas des pli sovaĝaj, ju pli raciaj estas iliaj utopioj. Nur unu granda simbolo vivas ankoraŭ, en kiu sin trovas malraciismo kaj absoluta ordo: la katolikismo, kies absoluta ordo estas ankoraŭ cis la raciaj enordigoj de la mondo, kiu havas ankoraŭ magian kaj simolan stampon, ĉar ĝi fontas el praaj mondsentoj, el grandproportiaj kaj neklarigeblaj travivaĵoj de la Ordo, ne kiel la parvenue rektaj linioj de la raciismo. Tial devis Chesterton veni al la plej fama paradokso de sia vivo: al sia konvertiĝo.

La du kontraŭaj tendencoj de Chesterton, lia katolika malraciismo kaj lia katolika Ordo-estimo havas komunajn animajn radikojn. En iu el liaj malfruaj romanoj, en la *The Return Of Don Quijote* (La reveno de D. Q.), la heroo ekiras por aĉeti certajn malnovajn farbojn, kiujn li uzis infanaĝe. Sed tiujn ĉi hejme fabrikatajn farbojn oni jam nenie povas ricevi, la grandaj magazenoj jam de longe ne tenas ilin en stoko. Post longa vagado, la nova Don Quijote, en marborda urbeto, ektrovas la maljunig-

intan farbokomerciston, kiu ankoraŭ fabrikas la malnovajn farbojn... Li alvenas ĝustatempe: li sukcesas lin savi, ke oni ne fermu lin en frenezulejon.

La fundamenta travivaĵo de Chesterton certe estis la malnovaj farboj. Li estis malfruiginta membro de la granda prerafaelita generacio, de tiu disvastigita kaj iam triumfa eŭropa familio, kiun turmentis kaj kelkfoje en nemorteman artiston suferigis la nostalgio al la perditaj koloroj, al la Maria-sonoriganta bluo de la mezepoko, kaj al ties batalema princa ruĝo.

Chesterton jam apartenas al tiu generacio, kiu scias, ke la celo de la arto estas ne la bela mensogo, sed la bela vero. Kontraŭ tia profunda forsopirado ne helpas fabeloj kaj pseŭdoplenumigoj. Se oni estas artisto, oni devas prezenti la nostalgion kiel nostalgion. Tial li ne verkis historiajn romanojn, sed tre modernaj artspecojn, eseojn kaj detektivnovelojn, en kiuj la nostalgio realiĝis kiel stilo, kiel koloro kaj ĉefe kiel parenteza, sekreta poezio. Lia poezio estas eĉ pli fortefika pro tio, ke ĝi aperas ĉiam neatendite el inter la malvarme brilaj linioj de iu eseo, aŭ el inter la paradokse komplikaj linioj de iu detektiv-historio.

Kaj li rekonis la praktikajn konkludojn. La praktikajn konkludojn, kiuj por la homoj de la praktiko estas tiom nepraktikaj. Kontraŭ multo li batalis kaj tiel senespere: kontraŭ la malpermeso de la biertrinkado, kontraŭ la grandbienoj, kontraŭ la grandindustrio, kontraŭ la imperialista politiko. Li batalis por nova mondo, kiu — kiel la malnova mondo — denove konsistis el malgrandaj sed organaj, komunejoj devenantaj el homaj okazaĵoj, anstataŭ la nunaj mekanike kunmetitaj gigantaĵoj, anstataŭ la mondorganizaĵoj devenantaj kiel hipertrofi-ajoj de la raciismo. Ventomuelilo-batalo ĝi estis, sed tiel ĝin deziris la nostalgio kaj la plej granda angla tradicio: la tradicio de la zigzagaj vojoj:

I knew no harm of Bonaparte and plenty of the squire,
And for to fight the Frenchman I did not much desire;
But I did bash their baggonets because they came arrayed
To straighten out the crooked road an English drunkard made.

(Mi scias nenion malbonan pri Bonaparte, sed des pli pri la bienulo, kaj mi ne havis multan emon batali kontraŭ la francoj, tamen mi frakasis iliajn bajonetojn, ĉar ili venis en militlinioj por rektigi la kurban vojon, kiun faris iu ebria anglo.)



Corinth:

La poeto Herbert Eulenberg

LA LETEROJ DE KATHERINE MANSFIELD. (V. H.) Katherine Mansfield estas bone konata, kiel aŭtoro de la *Jurnalo* kaj de pluraj delikataj novel-kolektoj. Tiuj ĉi libroj havis seriozan sukceson, rekono, al kiu oni kutime aldonas: tiu ĉi verkisto estas ankoraŭ povinta doni multe... Sed la vera signifo de K. Mansfield venas al perfekta esprimo nur en ŝiaj leteroj. Tiu ĉi senpretenda volumo subite levis la nomon de sia aŭtoro inter la grandulojn de la poezio: — Keats, kaj inter la modernaj, Rilke samrangas kun ŝi. Kiam ŝia edzo, J. Middleton Murry, antaŭ kelkaj jaroj eldonis ilin, preskaŭ konsterne, spir-retene ekatentis ĉiuj, kiuj en la epoko de la literatura amas-produktado ĉiam sopire atendas la originalan kaj daŭre valoran. De tiam tuta serio da biografioj kaj kritikoj okupiĝas pri K. Mansfield — ŝiaj leteroj nun jam estas mond-fama. En la kadro de mallonga studo estas neeble menciigi ĉion, kio estas en ili menciinda; ne kiel kritikisto, sed nur en formo de margen-notoj mi volus emfazi la plej elstarajn belojn kaj valorojn de la libro. Denove kaj denove mi tralegis tiujn ĉi vere *simpajn* leterojn — kaj kun ĉiam pli granda raviĝo. Ilia riĉo estas neelĉerpbla: prozo ŝvebanta en la altoj de la poezio; profundaj pensoj, prezentitaj sen patoso; ne artefarita *literaturo*, sed dura realo parolas en ĉiu ĝia linio. La mistika rayo de la arto ellevas, transformas eĉ la plej ĉiutagan epizodon, eĉ la plej personan detalaĵon.

K. Mansfield mortis en la jaro 1923, en ftizo; apenaŭ ŝi estis tridekjara. La libro, kiu ampleksas dek jarojn (1913—1923), estas historio de preskaŭ senĉesa turmentigo. Ŝi vidas sur ŝi la malrapidan detruon de la terura malsano — financaj zorgoj ŝin persekutas — la frato, ŝia sola proksima parenco, mortas en la batalkampo. Serĉante sanigon, li migras sur la marbordo de Francio, en Italio, poste ŝi denove hejmeniras. Nenie trankviliĝo, nenie rifuĝo. Svisio estas la lasta espero, — kiam post kelkaj mallongaj monatoj disnebulas ankaŭ tiu ĉi espereto, denove ŝi ekvojaĝas, nun jam sen espero, kaj vivas ĝisfine la dezertan vivon de migrantoj. Heroe ŝi kontraŭrigardas la morton, nelacigeble ŝi laboras, verkas eĉ dum la plej intensaj doloroj. »Vivi, krei — plej intense eluzi la momenton kaj elĝui ĉiun paseman plezuron, — jen la tragika *Schnuchtsmotiv* (motivo de spiro), kiu re kaj revenas. Sentemo ĝisekstre ekcigitita (*sensibility*) kontraŭ kaj la malbelaj, malindaj elementoj: jen donaco de dioj. La korpan suferon mi rigardas privilegio: — ŝi skribas mallonge antaŭ sia morto.

Multaj serĉas unuavece la virinajn trajtojn en la verkoj de K. Mansfield. Sed tio povas esti nur ŝtupo al la kompreno, cetera ankaŭ danĝera, ĉar ĝi povas deformi, ĉar ĝi guston de la juĝo. Finfine, en la antaŭa oni devas serĉi la *generale homan*.

La kuraĝo estas nedisigebla de ĉia grandeco. Ĉe verkisto ĝi estas ia interna fajro, antaŭ kies senindulga lumo diseriĝas ĉio, kio ne estas sincera sento sed sentimentaleco. Charles Lamb havas mallongan studon, *The sanity of true genius* (La saneco de veraj genioj), — en ĝi li studas tiun profundan veron, ke la elstaraj talentoj ne estas abnormaj, — t. e. ke la mil formoj de la sufero ne deformas la grandajn spiritojn. La malsano sendube multobligas la akrecon de la sentemo: »Mi esperas de Dio, ke la homoj ne tute tiom suferas, kiom mi opinias — estus neeltenebla,« — skribas K. Mansfield. Sub la premo de deprimo, de turmento la malforta karaktero perdas la ekvilibron — sed tiu, kies vojon lumigas la genio, sekure paŝas sur sia mallarĝa roko-vojo.

Signo de anima elasteco estas ankaŭ la bolanta humuro, kiu ofte estas nekontraŭstarebla reago de la plej malhela humoro. Ne la laca, rezigna rideto de la mal-sanulo ĝi estas, sed shakespeare-a gajo kaj vivoĝojo. Troviĝas en ĝi ĉiu nuanco, de la delikata moko ĝis la laŭte bongusta rido. »Mi sentas, ke mi soifas la feliĉon kun neestingebla soifo.« Infano, hejmo, paco — K. Mansfield varnege, pasie sopiras ilin, des pli varnege, ju pli malproksimen ŝi peliĝas de la plenumiĝo. Ekstere, en la ŝtormo, la dekstro estas speco de sindefendo. Ĝia atingo

eble estus perdiĝo por la artisto, aŭ, kie ŝi esperis trankvilon, ŝi trovus nur ordonon por nova forsiĝo.

Ankaŭ la amo estas formo de sindefendo: rifuĝo el la solo. Sed K. Mansfield, la poeto, devis elteni antaŭ tiu ĉi plej malfacilan provon. Tiu (kaj ajna elstara talento), kiu »kantas sian kanton« nur al unu, rapide refalas post pasema ekflago en la grizan muton. Por tiu ne estas progreso. Rilke belege skribis pri tio verse kaj proze: *Die Lieder kamen wie das Sehnen kam und werden mit dem Bräutigam vergehen.* (La kantoj venis, kiel la sopiro venis, kaj ili foriros kun la fianĉo.) La elvaliĝo estas tiu horo, kiam la homo destinita por kreado devas transflugi eĉ siajn plej fortajn simpatiojn; laŭ Rilke, li devas tralumi tiun, kiun li amas. Tiam senfina pejzaĝo aperetiĝas por li, sed tien li povas enpaŝi nur sola. Ne la sensangan ideon de la rezigno ni tuŝas ĉi tie, sed ian laŭleĝan transformiĝon, kiu pli malpli frue okazas en ĉiu vera artisto, kaj kiu ne estas malpli tragika.

K. Mansfield diras foje al verkisto-amiko: »Ni apartenas al la Sankta Ordono de la Artistoj.« Ĝi estas la plej severa ordono. La »samikoj« helpas unu la alian en la batalo. Grandiozaj estas tiuj leteroj de K. Mansfield, en kiuj ŝi kritikas la verkojn de junaj verkistoj. Ŝi kredis je tiu fatala abismo, kiun la milito fendis inter du epokoj kaj ofte ŝi opiniis, ke nur tiuj verkistoj povas esti sinceraj en siaj verkoj, kiuj rekonas, akceptas tiun ĉi disigiĝon. El la teruraj spertoj de la militaj jaroj devenas ankaŭ ŝi pasia pacifismo.

Ĉio ĉi eble vekas la impreson, ke K. Mansfield estas iom superece intelektul-direkta homo. Sed kontraŭe, ŝi malamis »la terure blindigan lumon de la intelektulismo«. Ŝi verkis kun senpera humuro, koloro kaj precipe kun ĉio-komprena amo pri simplaj homoj, ĉiutagaj aventuroj, pri pompo de la ĉielo kaj maro, pri plantoj kaj bestoj. — »Mi estas en mia ĉambro. Fene tro kaj pordo malfermitaj. Pensante, ke la domo estas malplena, la vento faras mallaitan inspektadon, zumante al si mem. La ombro de la olearbo dancas kaj ne estas alia voĉo krom tiu de la maro.« Tiuj ĉi kelkaj mallauĉ-melodiaj vortoj citas la tutan humoron de la suda regiono. La facileco de ŝia stilo apenaŭ toleras la perforton de la traduko: la *m-l*-forma, forsaltanta spirito de la momento vivas en la leteroj de Katherine Mansfield.

Kiel ŝi prisribas tempestan tagon en sia soleca marborda loĝejo, aŭ la vintran solenecon de la svisaj montaroj, aŭ la koloron de nubo, aŭ kure forŝtelitan vizaĝ-esprimon, movon, aŭ malgrandurban straton, ian odoron aŭ sonon: ĉio ĉi kunportas novajn malkovrojn el la mirindaj eblaj de la prozo ankoraŭ ne sufiĉe elmita. Apenaŭ troviĝis poeto, kiu sufiĉe pie kaj tenere kaptis tiujn ĉi efemerajn impresojn (simbolojn de l' pasemo): ja ankaŭ tio estas jam miraklo, se ili postvivas la krudan procedon de la plum-en-inkigo...

Tiu ĉi forta animo, kiu ĝis lasta horo fiere regis super sia rompiĝema korpo, povas esti kuraĝiga ekzemplo por tiuj, kiujn mistika leĝo vicigis inter la konstruantojn de la spirito. Laŭ ŝi, plej grave estas esti ĉiam »funda kaj vera« kaj »vivi el tio, kio estas konstanta en la animo.« Tiuj ĉi du frazoj ampleksas la esencen de la verkista kaj homa konfeso de Katherine Mansfield.

(G. B.) PROCESOSJ DE WILDE. Okaze de la morto de Lordo Darling estus malfacile renovigi la diron plur-okaze aplikitan: kiu memoras la nomon de la juĝisto de Wilde, dum la nomo de Wilde mem jam delonge estas senmorta? Lordo Darling antaŭ kvardek jaroj sendis en pundoŝton Oskaron Wilde. Li nun mortis en la aĝo de okdekkelkaj jaroj. La hodiaŭa angla amaso pli multe konas lin, ol Wilde-on mem. La poeton de la »Granat-domo« kaj la »Balado pri la pundoŝtono en Reading« la angloj ne legas, sed la juĝoj de Lordo Darling faris grandan bruon kaj ili okupis multajn lokojn en la bulvardaj ĵurnaloj, ĝis li pensiigis. La meza angla leganto ĝenerale pli multe konas la juĝistojn ol la verkistojn. La tribunalaĵo debatoj havas grandegan rolon en la ĵurnaloj. La malluman, misteran kaj maltrankvilan fonon de la

vivo la angloj ekkonas el la tribunalaj sciigoj kaj ne el la modernaj romanoj. Ili preferas tiun fonton, ĉar la plejmultaj romanverkistoj estas suspektinde kompatemaj al tiuj mallumaj aferoj, dum la juĝistoj per koncizaj, lakonaj frazoj brulstapas la malhonestajn kaj malordajn simptomojn: Mr. Justice Avory, la plej severa juĝisto de Anglujo, estis senekzemple populara kaj okaze de lia morto eĉ kelkaj el liaj juĝitoj faris pri li honorajn deklarojn. Do estas suzobeble, ke la iama juĝisto de Wilde, la antaŭ nelonge mortinta Lordo Darling, estis multe amata de milionoj da filistroj, ĉiuokaze pli multe ol Wilde. Nur la radikala «Manchester Guardian», unu el la plej bonaj kaj plej honestaj ĵurnaloj, skribis diskrete en la nekrologo, ke Darling estis malbona homo kaj li tute ne havis komprenon pri la juro. La ĵurnalo menciis eĉ tion, ke li, senekzemple en la angla justfaro, dum la debatoj ne malkaŝis siajn politikajn sentojn, kaj la akuzatojn, se tiuj konfesis aliajn principojn, li riproĉis en neallasebla maniero kaj ekdisputis kun ili.

La kompatinda Wilde ja ne havis facilan aferon kun ĉi tiu juĝisto. La proceso havis principan signifon: la viktoria brita moralo juĝis la iom fanfaronan «artistan liberon». Wilde devis iri en malliberejon ne tiom pro sia sekse abnormeco, kiom pro siaj verkistaj opinioj. Iom frue li komencis en Anglio distrupteti la principon «ĉio permesata». Ja nur post tri jardekoj venis D. H. Lawrence, la unua angla verkisto, kiu malkovris pri si mem, ke li estas viro. Ankaŭ lian verkon konfiskis la anglaj magistratoj, same kiel la faman «Ulysses» de James Joyce, kiu nur vicigas laŭ scienca karakterizo tion, kio venas en la memoron de homo dum la tago surstrate kaj en diversaj lokoj de sia loĝejo. Wilde devis malsukcesi kontraŭ Lordo Darling, kiu reprezentis la burĝan moralon. La severa juĝisto ĉiuokaze ja havas literaturan meriton: al li estas dankebla la «Balado pri la pundomo en Reading», la plej bela kaj plej sincera verko de Wilde, kiu neniam naskiĝus sen la pundomo.

Mi opinias, ke la posteularo eĉ pli severe truktas Wilde-on ol Lordo Darling, — ne nur la angla filistra, sed eĉ la klera eŭropa posteularo. Wilde estas pli-malpli forgesita kaj apenaŭ legata. Nur la mezeŭropaj komencaj lernantoj de la angla lingvo legas la «Feliĉan princon» post la unua volumo de la gramatikoj de Plat. Liaj samtempuloj almenaŭ indignis pri la verkisto de «Dorian Gray» kaj per tio ili plenumis lian deziron. Sed la posteularo kun malsata gesto neglektas la iom dandan korupto-kulton de Wilde. Lia cinikismo, kiun iam oni admiris, nun jam efikas tede. Sarkasmo supereco, malvarma spektiko kaj sprita kruelo hodiaŭ estas vera nur eĉ Aldous Huxley, kiu havas pli profundan, pli veran, pli riĉan skalon kaj krome estas pli humura, ol Wilde. Sed la juĝo de la posteularo tamen estas maljusta. Ĉiu artisma akuzo, kiun oni mencias kontraŭ Wilde, estas vera kaj tamen li estis granda verkisto. Babits en sia literaturhistorio bone elmontras, ke la plej multajn el siaj verkoj li ĉerpis el la verkoj de aliaj verkistoj. Laŭ fonto de liaj fabeloj estas Andersen, la verko «Dorian Gray» estas la eho de la «Azenfelo» de Balzac, la «Salome» dramigas la «Herodias»-on de Flaubert kaj ankaŭ la plejparto de liaj studoj kaj poemoj ne estas tute originala. Babits tamen ŝatas lin — kaj prave. Malgraŭ la imitimo, la stilaj ekstravagancoj estas en li io originala, io ĉarma. Mi ne povas diri, kio ĝi estas. La sekreto de la verkista individueco estas neesplorable. Tiu ĉi verkisto subtilte plagiatas, «reverkis» ideojn, li ofte parolis afekte kaj artifice — kaj tamen, el ĉiu lia verko kun kontinua efekte elradias lia individueco. Kiel forta devis esti tiu individueco, se ĝi penetris eĉ tra tiom da artefaritaĵoj! Tiun ĉi supozon poste pravigas lia lasta verko: La pundoma balado. Tie li ne plu estas subtila; la danda naturo ĉesis. Tie klariĝis, kio estas malantaŭ la pozoj kaj prunteprenitaj fanfaronajoj. La kostumon de la «dekadenc»-artista forĵetis la sentema, suferanta, malmultvorte sincera homo. Klarigis, ke Wilde povas verki ankaŭ senartefike — simple kaj monumentale. Pri la mizero de pundomo, pri la agonio de mortkondamnito, pri la morala

bankroto de la justfaro li verkis kun tiel intima simpleco de popolkanto, kiel kapablas verki nur vere grandiozaj poetoj. Lian vivon ruinigis la stulta juĝo de Lordo Darling, sed eĉ tiu juĝo ankaŭ kreskigis kaj nobligis lian verkistan individuecon. Kontraŭ la estetika juĝo de la posteularo jam estus dece renovigi la proceson. Wilde denove devus esti malkovrita, same kiel multaj aliaj, kiujn oni juĝis «malmodernaj» verkistoj, inter ili Anatole France, Zola, Ibsen. La posteularo, de kiu la verkistoj kutime esperas tre multe, kelkfoje estas surprize nekomprenebla. Sajne, nur la tute maljuna posteularo estas justa. La homoj kontraŭ la patroj estas severaj kaj ili estas indulgaj nur al la avoj. (L. Sp.)

VIRO DE SIA TEMPO. La persono de Oliver Cromwell.

Ekzistas personoj, kiujn oni kredas koni tre bone, en ĉiuj iliaj fortoj kaj malfortoj, iliaj faroj kaj malaj faroj, kaj kiuj tamen estas tute aliaj, ol la bildoj, kiujn oni imagis pri ili. Oliver Cromwell, la Lord-Protektor, la estro de Anglujo, apartenas al ĉi tiuj homoj. Ĉiam denove oni provas ekkoni lian veran personecon kaj estas ŝagataj la ĝisnunaj opinioj pri li. Tio okazas ankaŭ per la interesa nova libro, en kiu Hilaire Belloc entreprenas la ĝeneralan revizion de la ĝisnunaj esplorrezultatoj kaj opinioj pri la fama batalanto kaj ŝtativiro.

De la tago, konstatas Hilaire Belloc, kiam la reĝo post la morto de la Lord-Protektor denove komencis sian regadon en Anglujo, proksimume dum cent kvindek jaroj fluis riverego da malamo trans super Cromwell. En la memoro de la respublikanoj el la epoko de la enlanda milito, li vivas kiel perfidulo de ilia afero. Honorindaj viroj, kiu havis aferojn kun li, ŝokiĝis pri lia duba lerteco. La premeĝaj impostoj, sen kiuj ne estus ebla la armita povomontro, incitis la malamon de la poseduloj. La rememoroj al la militmultoj kaj la posta mizero vekis la koleron de la subaj klasoj. Ĉi tiuj fortoj kreis la unuan Cromwell-legadon, kiu estis kredata dum la dekoka kaj frua deknaua jarcento.

Sed estiĝis kontraŭopinio, kiu montriĝis pli profunda kaj forta, kiam oni komencis serioze trakti la historian esploron. Formiĝis nova legendo, kies forto estas sentebla ĝis la nuntempo. Laŭ ĉi tiu dua mito, skribas Belloc, Cromwell estas nacia heroo; la afero, kiun li defendis, ŝajnas justa kaj pli ol tio, ĝi ŝajnas la afero de Anglujo kaj ankoraŭ pli, ĝi ŝajnas la afero de la mondo. Laŭ ĉi tiu varianta la Lord-protektor nenion faris, kio iamaniere ne estus ĝusta; liaj sukcesaj agoj estas priskribataj kiel agoj geniaj, liaj malsukcesaj agoj kiel elprovoj kaj malhelpoj. Pro tio Hilaire Belloc klopodas distingi la esencan disde la malesenca, la partian konstaton disde la vero. Li vidas en la Lord-protektor geniulon en la dispono pri la kavalerio, taktikulon de plej unua rango. Kontraŭe, li samopiniis pri tio, ke la furioza kontratulo de Karlo I. malgraŭ la tuta brilo de lia mallonga publika kariero, postlasis nenion daŭran, ke li nenion surkonstruis, ke neniam daŭranta ago parolas por li. Ne ekzistas legolibro, granda ŝtata konstruaĵo, eĉ ne militara organizaĵo, kiu estis de li kreita. Nur sola afero pozitiva kaj restanta prosperis al Cromwell, skribas Belloc sarkasme: liaj batoj. Lia senkompata programo malsuprenigis Irlandon en staton, el kiu ĝi neniam povis leviĝi. Tio nature estas severaj, tre kondamnaj konkludoj, sed ili estas diritaj kun multe da sprito kaj temperamento. Oni do vidas: ĉi tiu prijuĝo estas tre diferenca de la Carlyla heroo-admirono.

Kelkaj ĉapitoj el la libro montru ĝian manieron kaj iom orientigu pri la enhavo. Por ĉi tiu celo ni elektu unue la ĉapitron, kiu priskribas la ekzekuton de reĝo Karlo I. kaj kiu provas klarigi, kian parton Cromwell havis en ĉi tiu tragedio.

»Marde, la 30-an de januaro 1649, kiam jam ĉio estis preparita per la morto de la reganto, kaj la maskitaj ekzekutistoj jam atendis, ili ankoraŭ bezonis ekzekutordonon. Cromwell estis en la ĉambro de sia bofilo. Ceestis ankaŭ kolonelo Harrison kaj kolonelo Huncks. Unu el la viroj devis subskribi la ordonon. Ĉar ili ŝajne

hezitis, Cromwell turnis sin al Huncks kaj invitis lin subskribi. Ĉi tiu rifuzis. La ordon-papero ankoraŭ sen subskribo kuŝis sur malgranda tablo; inko kaj plumo estis pretaj. Nun Cromwell mem kliniĝis super la papero kaj ĝin subskribis, dum li nomis Huncks-on obstina frenezulo. Tiel fine, post ĉiuj malfruoj, kiuj estiĝis per la serĉado de ekzekutitoj kaj per la klopodoj pri la subskribo, tio estis preta por la ekzekutito.

Dum la ekzekuto, Cromwell, ĉe la pordo de sia domo en Queen Street, staris gardistojn, por ke Fairfax, kiu ne konsentis la ekzekuton kaj kies edzino estis laŭtigita sian faman proteston, ne provu liberigon. Ekzistas rakonto, kies kredindecon oni povas akcepti aŭ malakcepti, ĝi estas de tiel drama speco, ke multaj pridubas ĝian verecon, sed ĝi ne ŝajnas malebla. En la ĉambiron, kiu kuŝis la kadavro de la reĝo, je la vespero eniris persono, en kiu iu gardisto rekonis Cromwell-on. La enirinto iom levis la tukon kaj rigardis la vizaĝon, kiu aspektis trankvila eĉ post la morto. Oni aŭdis murmuron la vizitanton: »Kruela neceseco!»

Kiel mortis Cromwell, priskribas alia ĉapitro: Vendrede, la 27-an de aŭgusto 1658, raportas Belloc, la febrastakoj, kiuj skuis la Lord-protektoron estis tiel fortaj, ke oni timis, ke li ne transvivos la nokton. La sekvantaj tagoj ili duobliĝis. Lunde levigis forta ventego, pri kiu oni en tuta Eŭropo ankoraŭ longe memoris. Cromwell mallaŭte parolis antaŭ si mem kaj tage kaj nokte jetiĝadis en sia lito. La vortoj, kiujn li flustris, venis el la profundo de lia animo; ili estis seninterligaj kaj malklaraj. Evidente ili estis preĝoj per la nacio, por Anglujo, poste la re kaj renovigita, sed malcerta firmigado de sia elektiteco. En klara momento Cromwell demandis predikiston, ĉu estus eble perdi la gracon. Ne, oni certigis al li. La sanktuloj devas esti liberaj de kulpoj. Ĉu ne estas legebla tiel en la libro de Calvin? La malsanulo iom malpeziĝinte ekĝemis kaj diris: »Mi scias, ke mi iam troviĝis en graco.« Sed la timoj denove revenis. Oni aŭdis, kiel Cromwell en la ardo forno de sia forbrulanta spirito jesas la dian amon kaj tamen ĉiam denove murmuris ion timigite. Jaŭde, la 1-an de septembro, Oliver Cromwell trankviligis. Tiuj, kiuj plej multe estis interesataj pri tiaj asertoj, klarigis, ke ili aŭdis, kiel li elparolas la nomon de sia plej maljuna filo, ŝanĝeligante tien kaj reen ĉe la rando de sia vivo. Dum la tuta nokto la Lord-protektor flustris daŭre la dogmojn de sia religio. Poste sekvis longa silentado, kiu daŭris ĝis la mateno kaj tagmezo. Li ne plu ekkonis ion teran kaj posttagmeze li mortis. Estis la jarotago de la grandaj bataloj.

Post kiam oni balzamis la mortintan Cromwell, oni metis reĝe vestitan vaksofiguron de li sur pompolito kaj sur la kurtenoj oni fiksis liajn titolojn kaj lia nomon. Jen la figuro kuŝis en plena pompo, por ke la popolo ĝin rigardu, dum ĝi preteriras. Sed flanke kelkaj fideluloj gardis Cromwell-on sur lia soleca mortokusejo. Tiel Hilaire Belloc.

Se oni legas lian kritikan libron, oni vidas preterpasi la ĝenan kavaleriestron, la malamikon de la reĝo kaj la severan diktatoron. Kaj ĉirkaŭ la persono vivigas la tumulto tempo, kiu levis kaj portis lin, kiu lasis atingi al li la plejalton kaj kiu tamen multon rifuzis al li. Estis senbridaĵaj jaroj, jaroj de sangaj bataloj, kiu estis donis pli al la militisto ol al la ŝtativo. Kio estus fariginta el Cromwell, kiu propre nur kiel kvardekjarulo paŝis en la antaŭaĵon, en alia epoko? Ĉi tiu demando akompanas la leganton seninterrompe ĉe la legado. Ĝia respondo estas same malfacila, kiel tiu de ĉiuj similtaj demandoj.

F. W. V.

STRANGAĴOJ PRI LA RIDETO.

Ke la rido estas donita nur al la homo kaj lin, kiel la lingvo diferencigas de la besto, oni jam ofte akcentis por signi la altan valoron de ĉi tiu kapablo. Jam Aristotelo observis, ke la infanoj pli frue ploras ol ridas kaj el tio konkludas, ke la rido komenciĝas nur kun la ekheligo de la spirito. La poetoj laŭdis ĉi tiun gajigon de la mieno kiel la videbligon de la anima ĉarmo, kaj

klara pastro eĉ volis konkludi el la tonseko de la rido pri la diversaj temperamentoj. Li opiniis, ke la kolerulo ridas *hahaha*, la flegmulo kaj de la bela sekso similas kaj la sangvinulo *hohoho*.

Karl Julius Weber, la »ridanta filozofo« plivastigas ĉi tiun psikologion de la rido: »Laŭ regulo, la plena laŭta rido esprimiĝas per A; la moka rikana proksimiĝas al E; la gorĝido de la junularo kaj de la bela sekso similas al I (sed ankaŭ tiu de la »sortistinoj«); la gaja rido de la surpriza ĝojo al O, kaj la U ŝajnas farita por la ploro aŭ por la rido ĝis la sufoko, ĉe kiu oni estiĝas ruĝa kaj blua. Laŭregule, la viroj ridas per A kaj O, la virinoj per E kaj I.«

La amaran, devigatan ridon la prauloj nomis »sardonas«, ĉar ili komparis ĝin kun la spasma kuntirigo de la ridmuskoloj, kiu estas kaŭzata de la »ridherbo« (apium risus) sur la insulo Sardinio. Ke tro forta rido povas dolore efiki, ĉiu scias. Oni parolas ofte eĉ pri »mortridi sin« kaj ke tio ne estas nura frazo, volis pravi instruulo de la baroko, R. Textor, en latine skribita libro, en kiu li priskribas grandan aron da viroj, kiuj laŭ onidiro, mortis pro troa rido. Li priskribas ĉi tie inter aliaj la grekan pentriston Zeuxis, kiu estis sin mortridinta pri maljuna virino de li mem pentrita, kaj la famaĉan verkiston de la renesanco, la »prince-skurĝon« Pietro Aretino, kiu ĉe orgio tiel forte ridis, ke li sveninte falegis de la seĝo kaj ne plu rekonsciigis.

Pli ofte oni akcentis la bonan efikon de la rido kaj rekomendis ĝin eĉ kiel sanigilon. »Rido estas sana«, diras la proverbo. Mijna von Barnhelm de Lessing diras »Rido faras nin pli prudenta ol tagreno, ĉar oni pli ĝuste prijuĝas la cirkonstancojn.« La granda angla humoristo Sterne diras: »Se oni ridetas, kaj ankoraŭ pli se oni ridas, oni ion aldonas al la malgranda tempospaco de la vivo.« La fama holanda kuracisto Sydenham asertas, ke la alveno de arleono en urbeto estas duoble pli valora ol la alveno de dudek azenoj sargitaj per medikamentoj. Dank' al la spritajoj de amuzistoj ĉe la mangotablo, la altaj sinjoroj promesis al si bonan efikon je ilia digesto. Ĉi tiu bona efiko ankaŭ tute serioze estis observata de multaj kuracistoj. La franca kuracisto Tissot skribis libron, en kiu li diras, ke per la rido danageraj abscesoj estis malfermitaj; estis forigita la angla malsano ĉe infanoj, se oni tiklis kaj per tio ridigis ilin. Rido, laŭ li, kuracas stomakdolorojn kaj hipohondrion kaj estas sendanĝera ilo kontraŭ intestaj gasoj.

Erasmus de Rotterdam foje raportas, ke li devis tiom ridi pri leteroj, ke pro tio al li diskrevis absceso. Kiam Gleim vizitis la vunditan poeton de la printempo, Ewald von Kleist, li laŭtegis al li iun el siaj plej gajaj kupletoj. Tiu ekridis pri ĝi tiel, ke krevis al li arterio kaj la vundkuracisto diris, ke tio estis granda felico por la paciento, kiu ĉe tio kvazaŭ faris mem al si sangeltiron.

La aŭstria ŝtatio de Born estis jam rigardata de la kuracistoj ĝin nesanegebla. Eniris nigrulo la ĉambiron, kiu estis sendita de la imperiestro Maria Terezia, por demandi pri lia sanstato. Lia fratino, kiu timis pri la beato de la liberpensulo, ekkriis: »Sinjoro Jesuo, jen prenos lin la diablo!« Pri tio Born tiel elkore ridis, ke li resaniĝis.

Malbonhumoraj homoj plej ofte estas maldikaj kaj la prauloj asertis, ke ĉe homoj, kiuj neniam ridas, jam per tio montriĝas malsano de la animo. Ke afabla rideto en la societo rekomandas, estas malnova regulo, kiu estas donita en multaj »konvenc-libroj«. La »keep smiling« de la amerikanoj same postulas ĉi tiun konvencian gajecon, kiu nature povas ridiĝi ĝis senanima malpleno.

Malnova germana proverbo avertas: »Ne ĉiuj estas amikoj, kiuj nin alridas.« Ke oni per rido povas gajni ankaŭ batalojn, pravas epizodo en la egipta militiro de Napoleono. Kiam la divizio Friants estis atakita de la araboj, li donis la ordonon: »Formi kvarangulon, la azenoj kaj la scienculojn en la mezon!« Pri tio estiĝis en la francaj vicoj tia laŭta ridado, ke la araboj forkuris. El ĉi tiu okazaĵo deduktis la prusa generalo von Bülow la instruon, ke la soldatoj ridante ataku, por malkuraĝigi la kontraŭulon.

F. W. V.

WIEN 1936

— Georgo Verda —

Estis antaŭvideble, ke la Viena kongreso altiros grandnombnan anaron el ĉiuj partoj de l' mondo. Vieno havas jam de longa tempo sian fiksitajn tradiciojn por kongresoj ĉiaspecaj, kaj antaŭ ĉio por kongresoj kun turisma karaktero, al kiuj sendube apartenas ankaŭ la niaj, la Esperantistaj. Kaj efektive al la 28-a venis pli ol 1000 Esperantistoj — nombro sufiĉe grava, se oni konsideras ne nur la ĝeneralan krizon ekonomian, kiu jam de pluraj jaroj rabas multe da brilo al la kutima pompo de niaj universalaj kongresoj, sed ĉefe la politikajn okazintaĵojn en Aŭstrio, kiuj lastatempe turnis ĉies atenton al tiu malgranda ŝtato kaj kiujn flankenŝovis iom nur la pli emocia ludo politika en Hispanio. Kompreneble do, en tiaj kondiĉoj — oni povas diri — tion, kion la kongreso atingis, ni povas kurage nomi sukceso. Eble la milo da Esperantistoj facile perdis en la dumilionia Vieno, kvankam oni povis konstati, ke ĝenerale oni tra la tuta urbo sentis la kongreson. Tion ni supozeble ŝuldas al la vere ĝojiga fakto, ke preskaŭ ĉiuj kongresanoj parolis bone Esperanton, kaj tiurilate la Viena kongreso entuziasme superis ĉiujn ĝisnunajn niajn kongresojn, por ne paroli pri la pasintjara Roma Festo, kiun vi povas nomi ĉiel, kiel vi nur mem deziras, sed ne kongreso de Esperantistoj, ĉar ĝiaj partoprenintoj grandparte havis preskaŭ nenion komunan kun Esperanto. La fakto, ke en Vieno la kongresanoj parolis — kaj kiel dirite, bone parolis — Esperanton, havas multe pli grandan signifon ol oni eble kredas. Mi devas aldoni, ke ĉi-jare ni renkontis en Vieno multajn novajn vizitaĵojn kaj tio estas tiom pli ĝojiga. La nova Esperantista generacio havas laŭdindan aspiron pri kio eble plej bona posedo de la lingvo (ĉiujn la kvalitojn, kontente ekkrus Baghy). En Vieno la lingvokomitatoj kaj balbutantoj definitive malaperis, kaj kiu enuis en la fakaj kunsidoj aŭ ne havis monon por partopreni la sufiĉe multekostajn ekskursojn, tiu trovis vere «kongresan» ĝuon en simpla babilado kun iu ajn, kun ĉiu ajn. En Vieno la lingvo vivis, sed ne la kongreso.

Sed ankaŭ la lingvo devas havi simplan fizikan ĵon, en kiu ĝi povas manifestiĝi. La kongreso havis sian sidlokon en la fame-konata imperiestra kastelo Burg. La malferma kunsido, la balo kaj la laborkunsidoj okazis en la belegaj salonoj de l' Burg, la akceptejoj troviĝis en la teretaga halo, kie svartis dum tuta tago centoj da lacegaj homoj, ne havantaj lokon por sidigi siajn senfortigitajn korpojn, ĉar en la tuta akceptejo troviĝis ne pli ol 3 benkoj kaj nur kelkaj seĝoj. Kaj mankis bablejoj! Homoj almiĝis el malproksimaj landoj kaj urboj por havi ne pli ol la modestan sed mirinde kortusan plezuron satbabilo en la bela Zamenhofa lingvo — por tiu multekosta plezuro ili ŝparis dum tuta jaro, ofte panon al buŝo avaris, pri vesto rezignis — kaj surprizite ili konstatis, ke la organizintoj tute forgesis zorgi pri ilia plej elementa kaj malmultekosta bezono: pri bablejoj! La eminentuloj sidantaj dum ĉiu kunveno sur la podio kaj la malmultaj flamiĝemuloj havis kompreneble plurfoje la eblecon demonstri sian oratoran talenton. Sed la popolo, la milkapa homamaso ne povis sufiĉe elliveri sian babilenerĝion: en la tuta Hofburg, kio ajn granda kaj impona tiu konstruaĵo estas, mankis simple ĉambrego kiu estus povinta servi kiel loko por libera kunvenado kaj senĝena babilado. Mankis bablejoj!

Do la verda popolo estis devigata ruze serĉi aliajn eblecojn kaj lokojn por babilado, kaj ĝi trovis ilin. La kongresanoj kunvenis sur la ŝtuparo de l' kastelo, disŝutiĝis kelkope tra la placon kaj ĝardenon apud la kastelo — la bezono satbabilo estis pli forta ol tiu de oportuno — kaj jam la unuan tagon la t. n. Heldenplatz apud la Burg estis posedoprenita de la esperantistaro.

Kaj fakte la kongresa vivo manifestiĝis plejparte ekster la kongresejo. Ĉar se oni konsideras, ke dum la tuta semajno okazis nur du oficialaj ne longedaŭraj laborkunsidoj kaj la tempospacon inter ili plenigis pli ol deko da plej diversaj ekskursoj, se oni, plie, pripensas, ke bablejoj tute ne ekzistis, tiam oni facile konsentos, ke la popolo efektive ne sopiris multe al la kongresejo, en kiu, kiel jam dirite, ĝi ne havis eĉ la eblecon «dece» ripozi.

Vieno — simile al bela junulino — havas la mirindan kapablon delogi fremdulon, per mistera agitigo de l' palpebroj. La ĉarmo de tiu nekutima urbo estas tiom konata, kaj la restado en la kongresejo — tiom enuiga, ke promenado tra la ravaj stratoj de tiu grandurbo prezentis samtempe du gravajn avantaĝojn: elkondukis nin el la kongresejo, kaj donis al ni la eblecon admirari la brilon kaj pompon, arton kaj kulturon, la tradicion kaj progreson, la virinojn, vinojn kaj dancojn de Vieno, la urbo de niaj revoj!

Mi jam plurfoje faris la solenan decidon, ne partopreni la univ. kongresojn, kiuj okazas en tiaj metropoloj kiel Parizo, Vieno k. s. — Sep — aŭ oktaga restado en tia urbo dispufigas sole la apetiton vidi ĉion vizitindan kaj uzi ĉi tiun vidindaĵon. Krome ne forgesu, ke por obtuzigi la esperantistan konsciencon oni ne povas komenci la tagon sen antaŭe eĉ nur mallonga t. e. almenaŭ duhora vizito en la kongresejo. Tio kaŭzas fine teruran konfuzon en ĉiuj planoj. Kiu ne vidis la verdstelulojn freneze kurantaj tra la avenuoj de la urbejo kaj avide sed rapide rigardantaj la senombrajn konstruaĵojn, monumentojn, placojn, muzeojn, preĝejojn, galeriojn, lernejojn, parkojn, kafejojn, pontojn, turojn, palacojn, kastelojn kaj bibliotekojn, por ne paroli pri la teatroj, kinematografoj kaj grandiozaj magazenoj kaj ties vitrinoj, tiu absolute ne povas reprezenti en sia imago pli precizan bildon pri kompatindaj viktimoj de turismo. Plej ofte kun gvidlibroj en la manoj ili kuris ŝvite tra la stratoj de Vieno, kvazaŭ dopingite de la malmulta disponebla tempo kaj agitate per la amasego da vidindaĵoj. La organizantoj de la sekvaj kongresoj devas nepre pensi pri tio. Se la turismo en niaj ĉiujaraj festoj okupas tiom gravan lokon, oni almenaŭ zorgu, ke niaj senhelpaj amikoj, kiuj per sia multnombra alveno kontribuas multe al la pompa karaktero de niaj kongresoj, ĝuu pli homece la voluptojn de l' turismo. Oni almenaŭ zorgu, kiel siatempe en Danzigo, ke ili ĝuu senpagan, aŭ malmultekostan (kiel en Budapeŝto siatempe) tramveturadon dum la tuta daŭro de l' kongreso. La malriĉa verda popolo neniel povas permesi al si la lukson rondveturi per aŭtoj ĉiutage dum tuta tago tra la urbo. Ili kun envio rigardas eĉ tiujn, kiujn la fortuno pridonacis per la ebleco nur tramveturi. Tio igas nin konjekti, ke la Esperantistaro ĝenerale ne estas riĉa popolo. Ni povus eĉ, plie diri, ke meza Esperantisto estas pli ol meza malriĉa. Oni efektive devas admirari la heroecan idealismon de tiuj homoj, el kiuj multaj dum la tuta jaro ofte ne satmanĝas, sed kiam proksimiĝas Aŭgusto, la monato de l' kongreso, ia malkvieto obsedas ilin kaj agitas iliajn animojn tiel longe, ĝis dank' al iu nekutima ruzajo ili iamaniere akiras la necesan monsumon por iri al la kongreso. Ne gravas ĉu tiu monsumo vere sufiĉas. Plej ofte ĝi troviĝas en la ora mezo: ĝi certe ne garantias al sia verdstela posedanto la minimumon, eĉ ne la elementan minimumon de primitiva komforto en la fremda lando kaj urbo, sed aliflanke tiu monsumeto estas tiom alta, ke oni nepre ne povas morti de malsato. Oni simple devas ŝpari, multe ŝpari. Sed la ŝparado dum E-kongreso estas absolute neebla, almenaŭ en Vieno la organizintoj videble supozis, ke la Esperantistaro ĝenerale estas sufiĉe bonhava, se ili aranĝis por ĝi tiom da ekskursoj (ofte po kelkaj ĉiutage), tiom da multekostaj ekskursoj,

Cetero el Hispanio

— G. E. Maura —

Vi longe skribis al mi, amiko Waringhien,
pri via kongresado en la afabla Vien';
mi legas viajn paĝojn sur rando de tranĉeo,
kaj via vok' el tia malproksima paseo
min tiel milde distras de l' hodiaŭ', ke jen
al mia muz' ekplaĉas vin akompani verse
tra la konfuz' de tiu komika epopeo,
kiun por mi vi penis priskribi facilserce: —
Vien', eksmoda urbo, bankrotita monarko,
palacoj kaj kazernoj, kaj tiu triumf-arko
aŭdace asertanta, sen timo al demento,
ke »La Justeco Estas de l' Regno Fundamento»;
en la Imperiestra Salon', flagita feste,
l' UEA-prezidanto degrade kondamnita
aperti la Solenan Kunsidon prolestese,
ĉar lia frako plue vojaĝis inkognita,
(tiel alloga estis la kongres-karavano!)
la baraktanta Steiner vadanta tra l' tagordo
kaj komplikanta l' kaĉon per kompetenta mano;
sed malgraŭ ĉiuj ĝenoj la gajema agordo
de samideanaro indulga al siaj mastroj;
la kongresflirtoj dece benataj de kvar pastroj,
la magra manĝ' spicita per kantoj de cigan',
la »Plena Gramatiko» levita ĝis la astroj
per furioza svingo de fluga tobogano';
la *Blanka Cevalito* kaj ĝiaj sveltaj girl'oj,
kies femurojn zorge, sen help' de teleskopo,
kontempris tiucele varbita episkopo;
l' ekskursoj multigitaj ĝis preskaŭ dudekopoj;
kaj, dum ĉi distr-avidaj, frivolaj homokirtoj
elversis sian forton en plurpartia maĉo
por lito en hotelo aŭ lok' en aŭtoĉaro,
supre, en la majesto de la Steiner-muzeo,

silenta kavernego sub gardo de gnomao,
kie mucidas libroj kaj ŝpinas araneo,
la noktaj konsilioj de l' UEA-estraro...

*

Sed kio ŝajnis ĉefe eksciti vian vervon,
estis tiu festeno da akvo minerala,
per kies penskliriga kaj korpsaniga ondo
la malavara ĉef' de »Literatura Mondo»
esperis revigligi — intenco tre morala —
de siaj plumosklovo la kadukan minervon.
Ci sidis, vi raportas, krom *Bleier* la tablestro,
da plej talentaj bardoj impona jaz-orkestro:
Belmont la patriarko, tronanta je la centro,
la juda, fajrosputa profet' *Lejzerowicz*,
Dro Kamaryt kun sia filozofia ventro,
Halina Weinstein, fajna Tanagra statueto
(al ŝi mi farus lokon volonte en mia niĉ'!),
la virta *Weleminsky*, pastrin' de Sankta Michele,
kiu, ĉe sia dika, dickensa silueto,
plej altan poezion kultadas plej fidele,
kaj tiu ronda *Helmi*, kies griza hararo
malbone kovras ardon de ĉiam juna kor',
dum la trikantanta lango kaj tikla okularo
al ĉiu bonvenigas kun petola humoro'.
— Sed vi nenion diras pri fratinetino *Hilda*:
ĉu vere vin timigis ŝia mien' malmilda?
Aŭ male, ĉu ŝi vekis tielan sentimenton,
ke en silent' orgojla vi kaŝus la turmenton?
Sance, malpli diskreta, vi pentras (tiel trafte,
ke ilin mi mem kredus ekkonti fotografe)
la mokan okulpinĉon kaj la senbruan ridon
de tiu ĉifvizaĝa, gracia, ĉarma *Totsche*,
kiu la artsekretojn aludas duonvoĉe,

ke granda parto de la kongresanoj, kiuj devis ŝpari, estis devigitaj proprariske aranĝi tiujn ekskursojn en grupoj po 10—15 personoj, kaj — ho miraklo! — la samaj ekskursoj, organizataj de nefakuloj, kun malpli da bruo, sed ne kun malpli da zorgemo, kostis ofte nur la duonon, kaj eĉ malpli ol la duonon de la oficialaj kongresaranĝoj.

Vole-nevole, la samideanoj, kies poŝo ne permesis fari multekostajn ekskursojn aŭ trafikoj tra la restoracioj kaj magazenoj preferantaj eksterlandanojn kun ŝvelaj monujoj, devis kontentigi per pli modesta pasigado de l' tempo. Ili iris — tute sen metaforo! — en la popolon. Ne nur por senpere kontakti kun ĝi, por propraokule vidi la historion de l' viena popolo, kiu antaŭ nelonge ankoraŭ katenis la scivolon de la tuta mondo, sed ankaŭ pro aferoj pli prozaj, ekzemple por trovi en iu duaranga bar'o malkarajn tagmanĝojn kaj knabinojn. La Vienaj knabinoj efektive havas ian apartan ĉarmon, sed ili ŝajnas tiom similaj unu al la alia, per siaj ĉiam kaj ĉie egalaj rideto kaj rigardo, ke oni ofte ne povis diferencigi la Mizzi de la Lizzi. Favore al tiuj Mizzi'oj ni devas ankaŭ diri, ke ili estas sufiĉe bonkoraj kaj naivaj. Tiurilate la Esperantistaj amikoj de l' viena popolo absolute ne trompigis. Ekzemple, unu el miaj amikoj, cetere Esperantisto tre konata en la alta medio de poetoj, ĉiutage ŝanĝis sian societon, t. e. sian vian kunulinon sub la preteksto, ke liaj muzoj tre ŝatas variece. Tiu ĉi preteksto, kiu en alia kazo povus servi kiel sparko de saĝo, facile pravas la grandiozan intelekton de nia verda poeto, kiu ne kompromitiĝis nur kaj sole dank' al tio, ke la ĉarmaj vienaj knabinoj simple ne komprenis lin: la poeto malbone parolis Esperanton, mi kredas, ke li estis la sola balbutanto en la kongreso.

Cetero, la vienaj knabinoj tute ne similas al la viana-

minoj el la t. n. vienaj filmoj. Neniu el la virinoj, kun kiuj mi konatiĝis en Vieno, kantis al mi iun valson de Strauss. Kaj neniu el ili enamiĝis je la unua rigardo. Ili tute ne parolis pri amo, cetere. Ilia preferata temo estis la situacio, la politika situacio, kompreneble. Ho ne! Tio ne plu estas la sama Vieno! La kruela tempo brulstampis sur ĝi sian signon. Malaperis la viena bonhumoro kaj sprito. Kaj la Danubo ne estas plu blua. Ĝi estas verda! Kaj la vienaj kotletoj ne estas plu la samaj: la vere vianan kotleton vi ricevos nur en Varsovio.

La lukso de l' paŭperizita Vieno havas jam grizan barbon kaj maljunulan ĝibon, se ĝi entute povas ankoraŭ esti nomata lukso. Ĝi estas brilo de eluzita frako kaj, plivere, vivas per la rememoroj pri la senrevena pompa pasinteco. Homoj venas al Vieno por amuziĝi. Sed eĉ en la plej belaj partoj de l' urbo malsatantaj almozuloj insiste kroĉas sin al via mantelo, petante pri monero. En la grandaj restoracioj, kies bonfamon konas la sibaritoj de l' tuta mondo, la kelneroj plendas pri la nunaj eksterlandaj gastoj, havantaj nek geston, nek guston. Vieno perdis la humoron.

Nu, sed mi ja ne venis Vienon por amuziĝi. Mi venis tien por la 28-a...

Estas tute kompreneble, ke ĝenerale la Solena Malfermo estas la signo de la komenco de l' kongreso. Sed por mi tiu signo de l' komenco estas la momento, en kiu mi ekvidas niajn amatajn verdajn maniulojn, la verdajn »ortodoksojn», kiel mi kutimas nomi ilin. Sur la Placo de Herooj, apud la kongresejo, ili aperis jam sabate matene. Estis pluva mateno, — la ĉielo akceptis nin kun tre malserena mieno — kaj niaj ortodoksoj ne ĉiuj kuraĝis montriĝi en siaj admirindaj »esperantistaj» vestoj. Tamen pluraĵ donis al ni la eblecon admiri ilin; jam je la

kvazaŭ al kor' amika li flustrus amkonfidon
(sed ja por pasiĝi li havas tro lucidon,
kaj vorte pli ol sorte kondutas li dibote).
Same al via sorĉa alvok' ŝajnas komplezi
Newell, la malfeliĉa gepatro de »aprezi«
(kiun ĉe l' mamo murdis barbara malsudano),
ĉi flegma Newell, kiu sub honora turbano
instruas la humuron al negroj de Sudano
(sed lin tropika pigro malhelpas larĝe spezi
la spriton ŝparaditan dum tiu naturbano):
kaj fine nia majstro, la bona Gargantua,
kies geni' sin fleksas al plej infana ĝojo,
frandema, voluptama, flarsperta, vinoĝua,
kranio por eterne ŝirmata de ĉizoj
sed fate konsekrita al la kronanta laŭro,
neelĉepebla fonto de l' kanto sonorflua,
kies muzik' eĥigos en la senfina daŭro,
unika Kalocsay, ĉi Koloman Unua!

*

Ho, kiel mi komprenas la sens-eks-itan ravon,
kiun vi spertis en ĉi prestiĝa kompanio,
plezuron de l' spirito, kaj por l' animo savon
el la kompromiteco de l' ĉiutaga fio!
Ho, kiel devis esti liberaj la diskutoj,
serenaj konsideroj pri l' vivo kaj la arto,
dum senrimarke fluis la oro de l' minutoj!
Ho, povi nur, sen ia suspekto aŭ singardo,
konfidi sian penson al amika silento!
Vere malofta por mi jam estis tia sento,
kaj kvazaŭ partoprenas mi mem en via ekzalto...
Jes, inter tiuj homoj egalaj en bonvolo
regis tia libero de penso kaj parolo,
trablovis tia spiro de komprena fervoro,
ke ĝin sub viaj vortoj eksentas mia koro,
amare bedaŭranta pri mia malproksimo...
Meze de tiu mondo dronanta en la ŝlimo,
sub la minacaj nuboj kaj inter la ekstondroj,
vi faris rifuĝejon el efemeraj frondoj,

oazon de trankvila kaj humana konkordo.
Feliĉaj homoj, kiuj kapablis eĉ forgesi!

*

Sed ĉu foreston mian bedaŭru mia kor' do?
Ĝis tie vin imiti ne povus mi sukcesi,
realon mi ne povus delasi ĉe la pordo.
Eĉ inter via rondo obsedus min la veo
de landoj destinitaj al baldaŭna pereoj;
tro laŭte ekribelas la fortoj de l' infero!
Por morta verko ĉie estas forĝata fero,
kaj de ronkantaj monstroj jam vibras l' atmosfero.
Kaj jam tra mia lando, mia plagata lando,
ekfajris la ŝtiparoj por brula hom-ofero.
Mi aŭdas jam la hurlojn de turmentitaj fratoj,
la venĝan helpokrion de miaj kamaradoj
kaj ploron de l' patrino ĉe ĉies tomborando...
Kiel preteri tion, kaj kiel ne supozu,
ke tra la tuta mondo tuj devas furiozi
la sama krima ŝtormo el sango kaj el honto?
Ho vi, amikoj foraj, ĉe via pacrenkonto,
ĉu tamen vi suspektis, kiel eĉcepta estas
tiu favoro al vi lasita de l' fatalo,
ke vere la finiĝon de unu mond' vi festas?
Ho baldaŭ batalontoj de la lasta batalo,
lasta, ĉar post ĝi certe nenio supervivos
el ĉio, kio igas al ni Eŭropon kara,
ĉar kun la libereco en la abismon drivos
humana idealo kaj civiliz' miljara —
vi tiam kune trinkis kalikon de l' adiaŭ.
Kiel la Girondanoj antaŭ la ekzekuto,
hierau vi festenis en amikec'; hodiaŭ
jen horo de l' disiga kaj ekstrema saluto!
La Di' nesatigebla de la milit' atendas;
en la kreskanta ombro via destino pendas.
Unu manpremi ankoraŭ, ankoraŭ unu kiso,
kaj nun, finite! Fratoj, jen venas via vico...

Talavera del Tajo, 25. 8. 36.

naŭa matene ĉe la ĉefpordo de l' kongresejo promenas kelkaj tipoj: sinjoro kun jako dekorita per kompleta sortimento de verdaj steloj; fraŭlino kun blanka silka bluzo stelo brodita sur ĝin kaj granda verda antaŭajo; sinjorino kun kurioza ĉapelo inkrustita per glimbrilanta grandega verda stelo kvazaŭ diademo. Jen la unuaj hirundoj de l' kongreso, mi pensas, ekvidinte tiujn ekzemplerojn, kaj frivole gaja transpaŝas la sojlon de l' kongresejo.

La halo estas tutplena de homa svarmo. Nekutima bruo kaj zumado certigas min, ke mi troviĝas en la ĝusta loko: en la kongresejo, kaj en la ĝusta tempo: antaŭ tagmezo de la unua kongrestago. La amaso ŝveligas, la bruo fariĝas ĉiam pli kaj pli granda. Malnovaj amikoj salutas unu la alian, premas reciproke la manojn, interkisiĝas. Rekrutoj, t. e. tiuj, kiuj unuafoje vizitas kongreson, promenas ion senhelpe tra la halo mire gapante aŭ vane serĉante ion. La simpatiaj vienaj samideaninoj oficante en la akceptejo, ankoraŭ ne eniris en la »tranco« de sia laboro. Iom konfuzitaj unuamomente ili staras senfare kaj surprizite pro tiu torentego da homoj fluantaj senĉese en la halon kaj minacantaj inuondi ĝin. Sed baldaŭ la oficistinoj vekigas el sia miro kaj komencas fervore labori. Klarigoj, rimarkoj, informoj estas donataj en ĝentila lingvaĵo kaj flua Esperanto. Sed ne ĉiam la kongresanoj estas ĝentilaj. Iu anoncas sin ĉe la oficista tablo kaj postulas tujan prizordon de lia afero, kvazaŭ li sola estus ĉi tie! Li eltiras sian vizitkarton kaj miras kolere, ke la deĵoranta samideanino ne konas lian nomon! Li estas ja la grupestro en Stultinsk! Li verkis propagandan flugfolion en ses lingvoj — kaj la fraŭlino ne konas lin. Aro-

ganteco!...

En angulo Joŝo rakontas al ĵus alvenintaj samideaninoj, kiuj ne sukcesis ankoraŭ refreŝigi sin post longa vojaĝo kaj portas ankoraŭ siajn valizojn, ke Ilo, kun kiu li havas la malfeliĉon loĝi en komuna ĉambro, senrajte okupis lian liton. Ilo siaflanke certigas, ke sur la lito estis nenio noto pri tio, kiu estas dormanta en ĝi. Hartmann, la sekretario de la venonta varsovia L. K. K. intervenas kaj faras inter ambaŭ pacon.

La alveno de prof. Bujwid el Krakovo vekas ĝeneralan atenton. Lia vizaĝo, malkaŝanta saĝon kaj senteman koron, spontanee elvokas respekton ĉe ĉiu kiu vidas tiun interesan vere eminentan homon. Karakteriza estas la granda simileco en la vizaĝtraĵoj inter li, prof. Bujwid kaj Bernard Shaw.

La »popolo« arangas la necesajn formalajojn ĉe la oficista tablo. Ĉiu ricevas grandan koverton kun la kongresdokumentoj. Tiuj ĉi »dokumentoj« konsistas el la kongresa libro, gvidlibro tra Aŭstrio kaj Vien, kaj pluraj paperajoj kun tre dube-valora enhavo. Oni fine evitu la nomon de »dokumentoj« pri reklamiloj kaj flugfolioj, kiuj preskaŭ nenium interesas.

Trarigardinte la kongresan libron, oni facile povis konstati, kiom malriĉa estas la programo de l' kongreso. Krom la Solena Malfermo nur du laborkursidoj, cetere — kvar diservoj, sennombraj ekskursoj kaj... blankaj paĝoj, kiuj plej trafe regulas la laborprogramon de l' kongreso.

Cirkaŭ tagmezo la kongresejo iom-post-ione senhomiĝas. Ankoraŭ tre lacaj de l' vojaĝo ĉiuj disiras en siajn

„ĈE LA BELA BLUA DANUBO“

— Valso de Johann Strauss —

Blua Danub'
ĉielo sen nub',
afabla seren',
ho ĉarma Vien!
Muziko per vent'
alflugas por tent',
allogas por bal'
kie trenas la sorĉa danc-torent'.
Tie lumoj mil,
en okuloj bril',
sub la lustroj
dolĉaj flustroj.
Ĉie danc-inviti',
ĉie ŝveb' kaj gliti',
ĉie gaja splito
de la facileta spriti'.

Ho dolĉa amflustret'
ĉe la danco en sekret',
ho la milda, varma prem',
sufokas la voĉon la sopira ĝem':
»Sentu, ke batas en flam'
la kor' pro la eksciti'
Donacu do jeson de am'
sen tim', sen heziti'!
Ho dolĉa amflustret'
ĉe la danco en sekret',
ho la milda, varma prem',
sufokas la voĉon la sopira ĝem'.

Ce l' son' de la fluto kaj violon'
susuras jupoj tra la salon',
jen sur ĉio roza vapor',
muzikas mem la kor'.
Nin ravas en melodi'
brilo de sunradi',
trilo de birda hor',
gajo de juna kor'.
Kaj milde ĉarma dolĉ'
kaj arde varma sorĉ',
kaj argenta nub'
kaj zum' de la Danub'.

Magie la ritmo pulsas en ni,
portas al rav' kaj al ebr'i.
Dronas la mond' en roza vual',
regas nin (Princ') Karnaval'!
Svarma rul',
varma lul',
arde brula spir':
ho dolĉa dancdelir'!
La magia ŝving',
sorĉa ring'
portas plu kaj plu
per povo de potenca f'u'!

Tiu ĉi valso ne estas ja lud',
sed ĝi estas ensorĉo kaj trud'.
en ĝi estas brul'; kaj la flam'
kuntrenas por danc' kaj am'.
Kaj se ĝi ondas ensorĉe tra l' sin',
ne rezistas junul', nek knabin',
kaj ekflugas al paradiz'
per flugiloj de l' danc' kaj kis',
per flugiloj de l' danco kaj kis'.

Plu, plu, plu,
kia dia danc', po du.
ĉe magia, pli kaj pli
dolĉa dancmelodi'!
Jam, jam, jam,
per ebr'ia danc', la am',
kiel per la sun' la flor',
ekburgonas kaj ŝvelas en kor'!
Tiu ĉi valso ne estas ja lud',
sed ĝi estas ensorĉo kaj trud',
en ĝi estas brul'; kaj la flam'
kuntrenas por danc' kaj am'.
Kaj se ĝi ondas ensorĉe tra l' sin',
ne rezistas junul', nek knabin',
kaj ekflugas al paradiz'
per flugiloj de l' danc' kaj kis',
per flugiloj de l' danco kaj kis'.

K. Kalocsay

resp. hotelojn por refortigi per ioma ripozo kaj prepari sin por la vespera festo — la solena malfermo.

Je la 20-a horo la imponega festa salono de la imperiestra kastelo (»Neue Hofburg«) estis tute plena de publiko. Je la sonoj de la Aŭstria nacia himno en la salono eniras vickanceliero Baar-Baarenfels, ministro Stockinger, prezidanto de LKK H. Steiner kaj lia »sekvantaro«. Ili ĉiuj suriras sur la podion kaj okupas siajn sidlokojn.

Tiu militistmaniera eniro de la prezida komitato, tiu marŝado de dekelkaj eminentuloj tra la salono havis tre teatrekan aspekton, kaj certe ne donis la deziritan efektan. Tio, kio devus doni al la soleno subtilan kaj altspiritan karakteron kaj agordon, ŝanĝiĝis kontraŭvole — pro malalta »enscenigo« en ne seriozan spektaklon.

En la nomo de la Aŭstria registaro s-o vickancel. Baar-Baarenfels diras bonvenon al la kongresanaro. Li diras, ke Aŭstrio speciale subtenas Esperanton, kiel ligilon inter landoj kaj popoloj. Tiuj ĝojigaj vortoj, eldiritaj de tiom eminenta registarano, havas vere grandan signifon. La esperantistaro devas ilin zorge memori. Fine la sinjoro vickanceliero per kelkaj Esperantlingvaj vortoj malfermas la kongreson.

Sekvis alparoloj de reprezentantoj de kelkaj registaroj (greka, nederlanda, bulgara, hungara, brazila kaj usona). La oratoroj parolas kore, sed koncize. Sole s-o Isbrücker, kiu havas la pasian kutimon paroli per alegorioj kaj anekdotoj, regalis la publikon per anekdoto, pri kiu neniu, bedaŭrinde, povis ridi, ĉar ĝi estas jam tro maljuna kaj pri maljunuloj ĝentilaj homoj ne ridas... Ĝi estas la anekdoto pri la gasta lingvo, trovebla en la Fundamenta Krestomatio, kaj mi ne scias, kian aplikeblecon ĝi havis en la solena malferma kunveno.

La prezidanto de l' kongreso, s-o Steiner, sentis sin tiom ekscitita, ke li multon forgesis en sia alparolo. Li menciis pri la morto de Rob. Kreuz, kies memoron la publiko honoris per ekstaro, sed li tute forgesis honori la ombron de John Merchant, la prezidinto de I. C. K. — Tio estis vere malagrabla momento kaj oni estus povinta forigi tiun malbonan impreson, se oni almenaŭ dum la unua laborokunsido estus doninta saluton al la memoro de John Merchant. Sed la kongreso havis tiom da »laboro«, ke oni entute pri tiu honora devo forgesis... Kompreneble, ne la kongresanoj forgesis, sed la prezida komitato. La kongresanoj bone memoris pri John Merchant kaj vigle komentis la neglektemon aŭ distritecon de la prezidantaro.

L' AŬTUNA VENTO

— Call Blond —

La lastaj sunflamoj per ruĝo ruste ora
kisas solecajn suprojn de la arbar' angora,
sur la foli-tapiŝo mol-kora, velk-odora
vagadas mi sencele kun vango palkolora.

Kun vango palkolora, kun koroprem' aŭtuna,
sola mi vagas sur la tapiŝo flave-bruna,
en pala oro de la arbaro flavkostuma
aŭdigas nur murmuro de l' vento triste zuma.

Kaj dum mi vagas sola en la krepusk' flamanta,
per ŝtela ĉirkaŭbrako, per flato ruze lanta
enretas mian koron la voĉo softe kanta

de ĉi muziko plenda, plena de larm', lamento,
de malesper' senpova, de peko kaj pripento:
kiun sur koroj tri-staj ludas l' aŭtuna vento...

Simbolan signifon havis la ceremonio en kiu Prof. Bujwid, lerneja kolego de l' majstro, kune kun la malgranda Ludoviko Zamenhof, la nepo de l' majstro, je la sonoj de nia himno alportis sur la podion la flagon de la Buloŝa kongreso. La standardon portis du homoj: unu, maljuna veterano, kiu al nia afero oferis multajn jarojn da netaksebla laborado, sian multvaloran subtenon de mondkonata scienculo, kaj la dua, juna knabo, reprezentanta la generacion kiu post kelkaj jaroj transprenos en siajn manojn la gvidadon de nia movado kaj de tiu generacio definitive dependos la pli aŭ malpli proksima venko de nia afero.

La humorplenan festparoladon de Leo Belmont, kiu ĉiunmomente eksplodigis ridon en la unuaj vicoj de la publiko, mi bedaŭrinde malbone aŭdis, ĉar la oratoro parolis tro mallaŭte. Lia nekontentiga sanstato ne permesis al tiu orbuŝa paroladisto montri al ni sian grandan oratoran talenton.

Mankis entute Esperantistoj el Hispanujo, Sovetio kaj Germanujo. Sed kiam la reprezentanto de la ĉeĥo-slovakiaj germanoj energie deklaris, ke la germana popolo restas malgraŭ ĉio demokrata, kaj la germanaj Esperantistoj — fidelaj al la Zamenhofa idealismo, tiam uragano de aplaŭdoj kaj vivukrioj trakuris la salomon kaj el tiu jubilo oni facile povis konkludi, kiom neŝireble kunligita kun la principoj de demokratio kaj kulturo komunehoma estas esence la Esperantismo. Ĝi estis impona kaj multsignifa demonstracio kontraŭ la barbara leĝo malpermesanta en la Tria Regno la uzadon de nia lingvo kaj la organizan vivon de niaj samideanoj; niaj gvidantoj lernu fine la tute klaran moralinstruon el tiu demonstracio. Ili fine konsciis kaj komprenu, ke greftado de ultranaciistaj ideoj sur la grundon de nia movado iutage kruele venĝos sin kontraŭ ili mem, ke ruza aplikado de falsa neŭtraleco ĉie, kie oni deziras favori ekstreman nacisonon kaj faŝismon, kaj maldelikata elturnigado kiam devas esti substrekitaj la liberala kaj demokrata karaktero de nia movado, povas fine nur malutili nian movadon mem, ĉar malgraŭ ĉiuj atencoj de pluraj eĉ eminentaj «samideanoj» kontraŭ la esenca animo de nia afero, la Esperantismo estis kaj estas grandioza movado ideo kaj socia, kun malamika sinteno al ultranaciismo kaj fondita sur la bazo de Zamenhofa idealismo. Tia almenaŭ ĝi estas tiom, kiom ĝi koncernas la t. n. neŭtralan movadon.

La solena malferma kunveno finiĝis ĉ. la 22-a horo. Ĝi postlasis nenian profundan impreson malgraŭ la tuta pompo. Mankis animo, mankis spirito, mankis entuziasmo. La amaso atendis, ke oni diros al ĝi, kio estas la Esperantismo, por kiuj celoj kaj idealoj ĝi devus batali. Ĉiam dum la solena malferma kunsido la Esperantistoj repensas al la gloraj tagoj de nia movado, en kiuj la Majstro konkretigadis ĉiujfoje sian kaj nian programon, stimulante la anaron por ideo batalado. Iuj povis al tiu programo ne konsenti, sed ĝi tamen estis programo. Hodiaŭ prez. Steiner parolis pri alia programo: pri la programo de l' ekskursoj, pri tiaj kaj aliaj biletoj. k. t. p. Malsolena soleno. Bedaŭrinde.

Mi ĝojis, kiam la malferma kunsido estis finita.

Dum tia duhora sidado, eĉ en la senkompare, impone bela festalongo, iu estus povinta morti de tado. Je nia eliro el la festalongo, en la freŝa aero, kaptis nin rava, fabela bildo: sur la nigra fono de nokta mallumo dromis la mondfama urĥodomo de Vieno en feaja lumo. Tiun-ĉi sorĉan festillumadon la Urbo aranĝis honore al la kongreso.

Kiel lasta programpunkto en la kongresa libro por sabato figuris la surprizo: la ĝeneraldirekcio de aŭstriaĵ tabakfabrikoj donacos al ĉiu kongresano skatolon kun cigaredoj. Vera surprizo estis, ke la anoncita surprizo ne estis plenumita.

La dimanĉan tagon inaŭguris kelkaj katolikaj, protestanta kaj israelida diservoj. Por ne elmeti min al la kolero de tiu aŭ alia eklezio mi decidis ĉeesti nenium el la diservoj. Sed laŭ tio, kion mi pli poste eksciis, la plej solenan karakteron havis la katolika diservo en la vidinda votivpreĝejo, celebrata de kardinalo Dro Innitzer. Pluraj fervoruloj kiuj «vivas la kongreson» precize laŭ ĉiuj detaloj de ĝia programo, ĉeestis kompreneble du, kelkaj eĉ tri diservoj. Oni, sekve, tute ne povas plendi pri malbonaj rilatoj inter la Esperantistoj kaj la ĉielo. Oni sole povus riproĉeti, ke dum la esperantistoj donas tiom multe el si al la ĉielo, la ĉielo donas tiom malmulte al la esperantistoj.

Je la 10-a matene okazis ceremonio, kiun ni vidis la unuan fojon dum univ. kongreso. Prezidanto Bastien metis florkronon sur la tombon de la nekonata soldato. Estas interese, kio inklinitis la org. komitatono al tiu arango? Eble la fakto, ke prez. Bastien estas ĝeneralo? Principe, mi tute ne estas kontraŭ tiaŝpeca demonstrado de niaj pacifistaj aspiroj, se ĝi nur estas akompanata de trafa interpretado. Sed mi opinias, ke pacifistaj demonstracioj, oni devus fari en la kongreso, en la kongresaj kunsidoj mem, sed tian klaran eldiron de niaj idealoj, de nia sociala vidpunkto, niaj aŭtoritatuloj timegas kiel fajron. Oni povus ankoraŭ — gardu Dio! — akلامي ilin pacifistoj, demokratoj, perfidantoj de l' patrujo, socialistoj, framasonoj, judoj!

La dimanĉa ekskurso al Schönbrunn, la vizito al la imperiestra kastelo kaj zoologia ĝardeno, havas — mia opinio — nenion komunan kun la kongreso, kiel ĉiuj ceteraj ekskursoj. Priskribon pri tiuj kaj multaj aliaj vidindaĵoj de Vieno vi trovos ja — kaj priskribon pli lertan — en iu ajn gvidlibro aŭ flugfolio. La tago estis varmega, la sunbakata verda homamaso soifis refreŝigon, do ĝi rifugiĝis en la ĝudonan ombbron de la Schönbrunn parko. La bela naturo sukcese efikas. Intermiksiĝis nacioj, gentoj kaj popoloj. Ekkveris junaj homoj en la bela nova lingvo. Ekbatis pli forte koroj de gejunuloj, kiujn dividis ŝajne malsamaj kulturoj, malsamaj tradicioj, malsamaj interesoj. La fundamento de l' mondo tremas? La popoloj freneze kaj furioze ekstaras unu kontraŭ la alia. Ho, tio estas verŝajne miskompreno, fabelo de malbonaj, malicaj homoj. Ĝi tie, en la ravaj anguloj de l' belega Schönbrunn la Esperantistaj gejunuloj ne volas scii pri similaj aferoj, ne volas kredi ilin. Ĝi tie parolas koro al koro, buŝo al buŝo. Ĝi-tie la granda mondo kuŝas antaŭ iliaj piedoj

kiel malnova ĉifita pilko. Okcidento kaj Oriento, sudo kaj nordo kumplektigas ĉi-tie nedisireble. El la plejprofundo de ĉi tiu memo, de ĉi tiu subkonscio elmergigas tiu kio estas la esenco de ĉi tiu vivo, de ĉi tiu estado: la homeco. Ĉu estas eble, ke ĉi tiu dividita tiom multaj baroj? Ĉu estas eble, ke vi, estona knabino, staras neligeble malproksime de la serba junulo, kiu ĉi-momente sidas kun vi sur komuna benko? Ĉu estas eble, ke la ĉarna ĉimino, promenanta en la silento de ĉi tiu arboj, ne komprenas sian francan akompananton? Ĉu ĉi tiu estas nur pozo, ĉu ŝajno sole? Demonaj fortoj penas konfuzi la klarecon de ĉi tiuj pensoj. Nigraj potencoj klopodas altenŝraŭbi la malamon kaj malamikecon inter homoj, inter popoloj kaj gentoj. La homaro ŝrumpas en konvulsiaj doloroj. Sed la resanigo venos, devas veni. Ne la tuta organismo de ĉi tiu homaro estas gangrenunita. La nigrajn potencojn kontraŭstaras potenco de sento kaj racio. Ero de ĉi tiu ĉeno estas la vera Esperantismo. Kaj vera Esperantisto estas vera paca batalanto.

La paca batalo inter la multaj verdaj ĝenuloj en la aleoj de Schönbrunn tute certe finiĝis sukcese.

La vespera prezentado de la »Blanka Ceval« estis nediskutebla la plej grandioza pozicio de la kongreso. Abstraktante de la ĝenerala valoroj de tiu mondfama opereto de Benatzky (riceco de ĉi tiu melodioj tiom popularaj kaj facile »falantaj en la orelojn«, abundo de bonhumoro en la teksto, la t. n. »libreto«), mi devas kun vera ĝojo substreki la surprize bonegan prononcon de la geaktoroj, kio kaŭzis, ke la ĉ. 1000-kapa publiko travivis unikan emocian kaj ĝuplenan vesperon. La amaso jubilis, interrompante ofte la scenojn per frenezaj aplaŭdoj. La ekstazo definitive forigis la limon inter la sceno kaj publiko. Senlima entuziasmo kaptis kaj obsedis la amason. La teatro ŝanĝiĝis en ĉi tiu nekutiman feston de la nekutima popolo: La Verda Popolo. Fine la geaktorojn mem kaptis tiu febro. Ili ne plu ludis, sed kunvivis tiom nespartitan ĝojon, tiom ekstazon. Kaj kiam post la lasta akto la uraganaj aplaŭdoj iom kvietiĝis, la herooj de ĉi tiu vespero, la membroj de ĉi tiu trupo solene promesis lerni Esperanton. Do elmontriĝis, ke ĉi tiu ludis tiel bone, tiel senĝene, eĉ ne sciante la lingvon! Tiom pli granda sukceso. Kaj mi uzu la okazon esprimi al ĉi tiu sur ĉi tiuj ĉi paĝoj en la nomo de ĉi tiu ĉestintoj la plej koran, plej sinceran dankon. Al la aktoraro kaj reĝisoro.

Kaj al la lerta tradukinto de ĉi tiu teksto, al Nikolao Hovorka, estu dirita ĉi tiu amika danko.

La brila sukceso de ĉi tiu vespero en la Raimund teatro restos ĉi tiu en ĉi tiu memo, kiel potenco manifestiĝo de la vivanta lingvo Zamenhofa.

La lunda tago estis dediĉita — laŭ la programo — al tagmanĝo kaj ekskursoj. Tiuj kiuj partoprenis ambaŭ »kongresajn« aranĝojn, opiniis, ke la ekskursoj estis pli bonaj ol la tagmanĝo. Sed pluraj aktivaj samideanoj, kiuj ne ekskursis, preskaŭ ne havis, ankaŭ tempon por tagmanĝi, ĉar ĉi tiu private kunsidis por debati dum la tuta tago pri aktualaj problemoj de ĉi tiu movado. Se la kongresa komitato tiom mal multe zorgis pri la kongresa laboro, ĉi tiu devis mem tiun eraron korekti. Unu el ĉi tiuj kunsidoj okazis sur la kastela ŝtuparo sur la Heldenplatz. Ĉeestis ĉi tiu dekelkaj konataj aktivuloj kaj ĉi tiu interesa kaj varma diskutado malkasis, kiom granda kaj ĉi tiu flankanta estas la opozicio kontraŭ la lastaj paŝoj de U. E. A. Oni decidis aranĝi ĝeneralan sturmatokon kontraŭ tiu malĝusta »politiko« de UEA, dum la morgaŭa unua laborkunsido. La apartaj paroladantoj ricevis la necesajn direktivojn kaj la taskon paroli precize en kadro de ĉi tiu temo.

Dume la amikojn de Lit. Mondo atingis la novaĵo, ke posttagmeze alvenas Vienon Kalocsay. Kaj laŭ ĉi tiu speciala invito kunvenis vespere en la restoracio de Volksgarten ĉ. 30 amikoj kaj kunlaborantoj de ĉi tiu gazeto por en ĉi tiu intima rondo kaj vere kolega agordo pasigi plezurricajn horojn. La bona vino regalita de Bleier agordis ĉi tiujn verkistojn kaj poetojn tre bonhumore. Spritaj tostoj, amika babilado alten levis la animojn kaj kreis vere liberan, senĝenan atmosferon. Similaj liberaj kunvenoj de ĉi tiu literaturistoj devas fariĝi daira tradicio dum la univ. kongresoj. Tio

estas necesa ne nur por plifirmigi la kolegajn rilatojn kaj senton de solidareco inter ĉi tiuj verkistoj, sed ankaŭ por doni al ĉi tiu realan eblecon libere priparoli la diversajn problemojn de ĉi tiu literaturo, kies normala disvolvigo estas plej fidinda pruvo pri la natura kreskado de ĉi tiu afero ĝenerale.

Ne forgesu, ke ĉi tiu finfine la Esperantismo estas esence lingva movado kaj ke la ĉefa premiso de progresado de ĉi tiu lingva movado estas kaj devas esti la literaturo de ĉi tiu lingvo. Konstanta pliriĉiĝado de ĉi tiu verkaro — kvalite kaj kvante — garantias al ĉi tiu movado fortecon kaj sekurecon.

Tial neniam tro granda estas ĉi tiu aprezado al la nediskuteblaj meritoj de la eldonejoj de Literatura Mondo, kiu per rimedoj vere modestaj sukcesis krei literaturan centron, blavi en ĉi tiu vivdeziron kaj vivkapablon, zorgi pri konstanta altigado de ĉi tiu nivelo kaj doni tiamaniere al ĉi tiu movado la plej fortan kaj plej certan apogon.

Estis jam malfrue post noktomezo, kiam ni kun plej agrablaj impresoj kaj kun bonega humoro forlasis la kunvenon.

Mardo estis sendube la plej vigla kaj laborriĉa tago de ĉi tiu kongreso kaj suzubeble pro ĉi tiu komenciĝis per diservo (en la Minoriten-preĝejo). Neesperantisto, tragarigante la kongreslibron, povus efektive supozi, ke la esperantistaro estas ĉi tiu religia sekto, kies sola afero estas diservoj kaj refoje diservoj! La kongreso en Vieno enhavis nur 2 laborkunsidojn (el ĉi tiu la dua estis nur parodio de laborkunsido), sed 5 diservojn! Por la sekvaj kongresoj mi kuraĝas proponi inversan ordon: kvin laborkunsidojn kaj nur du diservojn.

La unuan laborkunsidon, kiu precize je la 9-a matene malfermis ĝeneralo Bastien, ĉeestis ĉ. 200 personoj kiuj elmontris grandan interesecon pri la aferoj de ĉi tiu organizo. Per konciza parolado prez. Bastien prezentis la nunan situacion de UEA kaj la necesecon — laŭ la opinio de ĉi tiu komitato translokigi UEA al Londono, kie vivas ĉi tiu nuna direktoro, s-ano Goldsmith. La biblioteko estas transportata al Vieno kaj kunigita kun la ĉi tiu ŝtata Intern. Esp. Muzeo. La propaganda fako troviĝos en la lertaj manoj de komitatano Malmgren en Svedlando.

La malnova UEA staris ĉi tiu abismo. Minacis al ĉi tiu bankroto kaj disfalo. Urgis savo. La nuna komitato de UEA kredas alporti per ĉi tiu supre skizitaj decidoj radikalan helpon.

D-ro Medrkiewicz petas la parolon. Li rilatigas sin al la statuto de UEA kaj provas, ke laŭ la ĉi tiu svisa leĝo oni ne rajtas translokigi la asocion al fremda lando. Li dubas cetere, ĉu per ĉi tiu komitato sukcesos ŝpari. Li emfazas la historian kaj tradician signifon de la ĝisnuna sidloko de UEA Genevo. D-ro Medrkiewicz prezentas rezolucion, laŭ ĉi tiu la sidejo de UEA restu en Genevo.

S-ino Dresen kritikas la estraron de UEA, kiu malĉeligas al la relative grandnombra Esperantistaro de Estonio aparteni al UEA.

S-o Sapiro ne komprenas la paradoksan agon de la komitato, kiu volas transporti — eĉ kontraŭ la ĉi tiu svisa leĝo! — la oficejon al la nova direktoro en Londono, anstataŭ — kio estus pli simpla kaj malpli kara — venigi la novan direktoron al Genevo. Li substrekas la danĝeron transporti la bibliotekon de UEA en Vienon kaj kunigi ĉi tiu ĉi kun la Intern. Esp. Muzeo, kiu estas ŝtata institucio. La biblioteko tiamaniere fariĝus propraĵo de la Aŭstria ŝtato kaj la Esperantistaro, resp. UEA neniam plu havus rajton disponi pri ĉi tiu, por ne paroli jam pri la principa danĝero de politika naturo, minacanta al ĉi tiu biblioteko, kiel ekz. en Germanujo. Oni devas sobre kalkuli kun ĉi tiu eventualaĵo.

Per akraj paroloj s-o Lejzerowicz prezentas la spiritan senfortecon de UEA, al kiu mankas la idea bazo kaj kiu pro ĉi tiu perdas sian elementan ekzistojn.

Esperanto estas ĉi tiu granda socia movado, kies ĉi tiu idea karaktero devas esti deklarita, sed ne filatelista butikio, kies posedanton absolute ne interesas, kiu kaj kio estas ĉi tiu kliento. Li aludas al la kolonja kongreso en 1933 kaj demandas

kion niaj gvidaj instancoj atingis per koketado al la hitlera reĝimo? Ĉu tion, ke en la Tria Regno oni definitive malpermesis la disvastigon de Esperanto kaj fermis ĉiujn E-grupojn kaj gazetojn? Li rilatigas sin al la statuto de UEA kaj postulas forigi el ĝia membraro tiujn elementojn kiuj predikas rasan kaj gentan malamon kaj daŭre provokas konfliktojn. Li alvokas la gvidantojn de UEA sekvi la vojon montritan de Zamenhof kaj prezentas rezolucion, laŭ kiu UEA reaktualigu la Bulonjan deklaron.

Per tondraj aplaŭdoj la ĉeestantaro vigle subtenis la parolojn de Lejzerowicz, kaj denove estis pruviĝita la senkompromisa sinteno de la Esperantistaro kontraŭ la antikultura kaj antidemokrata agado de iuj elementoj en nia movado.

S-o Goldsmith, la nova direktoro de UEA, klarigas, ke la elspezoj de la oficejo en Londono estas malpli altaj ol en Genevo, li esperas eviti deficiton kaj eĉ akiri debetan saldon.

Parolas ankoraŭ prez. Bastien, kiu tamen nenion novan aldonas al sia malferma parolado, kaj oni decidas tiun tre viglan kaj interesan diskutadon prokrasti ĝis la sekva laborkunsido, ĝis vendredo. Ĉu la komitato esperis, ke ĝis tiam koaglos la fervoro de la oponantoj? Eble. Fakte estas, ke neniu el la kritikintoj ricevis respondon kontentigan. La komitato simple ignoris la oponintojn, distancumante ilin per kelkaj ŝablonaj vortoj kaj abrupte fermante la kunsidon. La estontaj pruvoj, kiu pravis.

Per tiu laborkunsido, kiu ebligis al la interesigintoj orientiĝi en la nuna situacio de UEA, la vera, t. e. labora parto de la kongreso estis likvidita. Tio, kio okazos de nun ĝis la fino, la fakaj kunsidoj en ĉambroj brilantaj de malpleno, la ekskursoj kaj denove ekskursoj, ne alportas honoron al la kongreso. Iajoĝe dum la sekvaj tagoj ekflagros ankoraŭ kongresa flameto, kiam kelkaj aktivaj gesamideanoj kunvenos en iu kafejo por pridiskuti komun-interesajn aferojn (kiel ekz. la kunveno de ĉeĥoslovakaj Esperantistoj), sed ĉiuj similaj kunvenoj estis absolute privataj aranĝoj kaj havis nenian komunan kun la kongreso. Pluraj el tiuj kunvenoj alportos sendube gravan utilon al nia movado en tiu aŭ alia loko, ĉar ĝis nun la privata iniciativo en nia movado ĉiam ankoraŭ estis pli efika ol la iniciativo de niaj ĉefaj instancoj.

Do, kiel dirite, la kongreso kiel kolektiva vivo, fakte ĉesis jam ekzisti. Eble ĝi ankoraŭ ekbrilos lastforte dum la balŝto en la festalonegoj de Neue Burg, vendrede vespere. Ĝis tiam centoj da kongresanoj, kiuj estas nek sufiĉe monhavaj, por ĉiam ankoraŭ ekskursi, nek sufiĉe aktivaj por partopreni la menciitajn amikajn privatajn kunvenojn, migris laĉaj kaj enuaj tra la strategoj de Vieno, vane perdis tempon, frapante al la pordoj de fakkunsidoj, kiuj grandparte tute ne okazis aŭ tiom tedis, ke oni nur bedaŭris sian alvenon. Kaj tamen por »finvivi« la tutan kongresan programon tiuj bedaŭrindaj kaj kompatindaj fremduloj devas pentofari en Vieno ankoraŭ 5 plenajn tagojn! Kion fari pri tiom da libera tempo? demandas min amiko, kiu konas Vienon tre bone, kaj venis tien sole por »kongresi«, por ĝui la kolektivajn agadojn esperantistan, laborkunsidojn, kiuj informus lin detale pri ĉio kio koncernas nian movadon kaj interesas lin. La kongres-ejo estas de nun jam daŭre malplena, (la kongresanoj aŭ ekskursas aŭ vagas fantome tra la urbo).

La organizantoj de la sekva kongreso nepre memoru, ke la mil aŭ dumil personoj, venantaj al la kongreso, devas havi dum la tuta daŭro de la kongreso kolektivajn okupon, kaj tiucele oni devas prepari plimulte da laborkunsidoj, kiuj vekos eĉ ili interesigon kaj plantos en ili fervoron por plua agado. Aliflanke, la kongreso devas uzi la okazon kaj organizi grandskalajn kolektivajn demonstraciojn, kiujn amaso ĉiam volonte partoprenas. Per nuraj ekskursoj (la ĵaŭda tago estis *tutplene* destinita por ekskursoj »aparte pagotaj«!) diseriĝas sole la energio de tiu amaso, kiu volas havi almenaŭ la iluzion, ke ĝi

kongresis. Ĝi estas ironio, se ne moko, kiam oni venigas el preskaŭ 30 landoj pli ol mil homojn, el kiuj almenaŭ 500 estas aktivuloj, por ĉiutage kaj foje eĉ dum la tuta tago lasi ilin admiri la certe belegajn ĉirkaŭaĵojn, kaj ilian »kongresavidon« likvidi per unu duhora laborkunsido (mi ripetas: la dua laborkunsido tute ne estis grava. Kun la revojagbiletoj en la poŝo ĉiu sole atendis la momenton, kiam la prezidanto fermos la kongreson). Per tio mi ne volas riproĉi la organizan komitaton. Ho ne, tute ne! Kontraŭe. La organiza komitato plene meritis nian dankon, nian plej koran kaj varman dankon pro la vere lerta kaj bonega organizo. De teknika vidpunkto ĉio marŝis precizege kiel horloĝo (kiel bona horloĝo, kompreneble). Kaj ne estas la kulpo de la Loka Komitato, kiu devis per ekskursoj, diserivoj kaj iluziaj fakkunsidoj fliki la programon de la kongreso. Pri la banaleco kaj malriĉeco de la kongreso absolute respondecas la komitato de UEA, kiu ja fiksis la kongresan programon.

Post mia reveno el Vieno, mi legis en gazeto de mia urbo artikolon de neesperantista ĵurnalisto, kiu observis la kongreson kaj sincere konfesis, ke ĝi tute ne havis programon! Se tia estis la impreso de homo, kiu staris flanke de l'kongreso kaj kies opinio supre menciita certe ne faras bonan reklamon por nia afero, kion tiukaze diru tiuj centoj da homoj, kiuj fervorplene elspezis multe da mono esperante travivi veran Esp.-semajnon kaj kiuj fine maldolĉe seniluziĝis!

Sabate matene en la dua laborkunsido kelkaj fervoruloj klopodis ankoraŭ daŭrigi la diskutadon abrupte interrompitan en la marda kunsido, sed sensukcese. La kongreso estis jam agonianta. Nerveze kaj senpacience oni likvidis la malmultajn punktojn de l'tagordo. Malmgren faris paroladon pri propagando, sed estis videble, ke neniu atentis ĝin. La publiko rapidis. Varsoviaj Esperantistoj faras la invitparolon por la venontjara jubilea kongreso. El privataj interparoloj ni ekscias, ke ĝi promesas esti vere jubilea festo, tamen ne sen laborriĉa programo. Hartmann, la sekretario de la LKK, promesas 5 laborkunsidojn!



Desegnaĵo de neinstruita kamparana artisto: István Buti

Sekvas dankoj, laŭdoj, deziroj kaj gratuloj. Kaj s-o Isbrücker ne povas ne rakonti ian anekdoton pri hundoj, pri kiuj la kongresanoj, malfeliĉe, ne scias, ĉu ridi, ĉar oni ne scias, kiun la hundoj reprezentas. Sed ankaŭ tiu malagrablaĵo pasas. S-o Petit, la galanta franco, dankas al la LKK, al s-o Steiner kaj liaj filoj, al s-o Frey, al ĉiuj, ĉiuj, ĉiuj. Kaj al la ĉarmaj kunlaborantinoj li enmanigas florojn kaj surbusigas kisojn.

Lastminute ni ekscias, ke nia prezidanto, gen. Bastien la antaŭan tagon fariĝis avo (ĉetere jam la kvinan fojon), kaj ke varsovia samideanino fianĉiĝis al ĉaha esperantisto en Praha. La anaro ekkantas la himnon, la prezidanto fermas la kongreson. Adiaŭiroj rapidaj, amikaj manpremoj, kelkaj abruptaj vivukrioj — kaj post duonhora la kongresejo estas malplena.

La kongreso mortis. Vivu la kongreso Varsovia!

Pasis la kongreso . . .

— Helmi Dresen —

Pasis la kongreso. La kongresanoj ree estas hejme kaj devas rakonti kaj raportiri pri la kongresimpresoj. Do oni raportas: t. n. solena malfermo en imperiestra festalono; opereto «Blanka Cevaleto», t. n. Somera Universitato; ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon de Vieno; kongresa balo; du trihoraj laborkunvenoj — ĉio same kiel ĉiujare. Tamen, laŭ la opinio de multaj, la malfermo estus impresinta pli solene, se dum ĝi oni ne estus leginta al ni programpartojn el la kongreslibro; la opereto estus pli sukcesa se la vere bonan prezentadon de la profesiaj aktoroj akompanus bona orkestro; la Somera Universitato estus pli konsiderinda, se per siaj plejpartaj kvaronhoraj «prelegoj» ĝi ne similus pli Vivan Gazeton ol Universitaton; la turismaj aranĝoj pli logus, se ili ne estus tiom multekostaj; la kongresbalo nur gajnus, se la elekto de bel-regino aŭ tute ne okazus aŭ estus aranĝita en pli atentiga kaj malpli konfuza maniero; estus pli bone por nia movado, se la laborkunveno okupus en la programo de la kongreso tiom da loko, kiom ili fakte meritas. Tute ne estas facile raportiri tianmaniere: unuflanke konscii, kompreni, kun kiaj fortostreĉoj, esperoj kaj amo por la afero la LKK klopodis doni al la aliĝintoj ĉion, kio ŝajnis al ĝi plej bona kaj prezentinda, kaj aliflanke konstati, ke ne tio estis donita kion unuavice oni volus ricevi, ke ree okazis ne kongreso, sed nur agraba, plezurita Esperanto-semajno . . .

Se dum la unua laborkunveno de la U. K. en Vieno al la estraro de UEA kelkaj samideanoj ne estus prezentintaj demandojn pri la problemoj de UEA, devigante per tio ĝian estraron doni kelkajn anemian klarigojn, ne sufiĉantaj por doni al la kongresanoj klaran kaj veran bildon pri tio, kio okazas en kaj ĉirkaŭ UEA, per kio do oni estus pleniginta la senprograman laborkunvenon? Versajne ĝeneralvorta enkonduka parolado de la prezidanto de UEA, iaj senenhavaj salutparoloj, propaganda parolado de reprezentanto de ia banurbo — jen ĉio! Dio mia! Kion do pensas la gvidantoj de nia movado, kuragante inviti nin al tia «laboro»? Ĉu ne estas malpropagando por Esperanto, ke neesperantista korespondanto de granda rusingva gazeto «Segodnja» en Riga, kiu ĉeestis la kongreson, en sia ampleksa felietono «Esperantio» ironie notas: «Kaj programo? Ĝi preskaŭ ne ekzistas. Kongreso sen programo!» kaj «Jes, programo ne ekzistas. En la t. n. programo tamen abundas ĉiaj ekskursoj, akceptoj, amuzoj, prezentadoj».

Al la novaj esperantistoj ni multe rakontas dum kaj post la kurso pri niaj Universalaj Kongresoj, tiel ke ili eksopiras viziti ilin. Kelkajn el ili — ĉu feliĉo? — fortimigas la alta kongreskotizo, aliaj aliĝas kaj vojaĝas al Esperantujo. Kompreneble, multaj el tiaj novuloj ne estas ankoraŭ veraj adeptoj de la Esperanto-ideo, ankoraŭ ili staras nefirme en la Esperanto-grundo, do estus tasko de la kongreso, de ĝiaj laborkunvenoj kun iliaj bonpripenso preparitaj programoj, traktantaj la ĉiam aktualajn problemojn de nia movado en tiu ĉi medio de spirita

internacieco, eduki ilin, ekbruligi en ili la helan flamon de la entuziasmo, por ke ili forlasu la kongreson kiel konvinkitaj esperantistoj, pretaj samkiel la meritplenaj pioniroj oferi sian energion por nia granda ideo movado. Sed, bedaŭrinde, okazas male. La nemultaj laborkunvenoj dronas, apenaŭ rimarkate, en la amuzomaro; en plej bona okazo la novulo povas konvinkigi, ke li povas paroli kun la anoj de plej diversaj nacioj, sed nun, kiam oni propagandas la arangadon de neesperantistaj turismaj karavanoj al la kongresoj, povas ankaŭ facile okazi, ke anstataŭ Esperanto li aŭdas lingvojn naciajn, tiom pli, ke ankaŭ la samlandaj esperantistoj kutimas paroli inter si preskaŭ ĉiam nacilingve. Do se tia novulo-esperantisto reĥejmigas de la kongreso, li aŭ konservas la intereson nur por la facila, amuza lingvo Esperanto aŭ — se li estas serioza homo — forlasas la movadon, senluziiginte pri ĝia seriozece.

Kaj la malnovaj esperantistoj, kial ili vizitadas la kongresojn? Ĉu por aŭdi la ĉiam ripetigantajn salutparoladojn, por danci Esperante aŭ ofte por rigardi prezentadojn, nacilingve neniam rigardotajn en la hejmlando? Ne, ŝajne tio okazas laŭ ia kutimigo, parte ankaŭ por renkonti malnovajn amikojn, alie malfacile renkonteblajn. Mi persone restis «kontenta» pri la «kongreso» ĉefe dank' al la eblo renkonti la kunlaborantojn de «Literatura Mondo». Entute meritas nian dankon s-o Bleier, kiu aranĝis kunestadon de kunlaboranto de L. M. Kolektigis pli ol dudeko — Kalocsay, Waringhien, Totsche, Newell, Lejzerowicz, Leo Belmont k. a., el kiuj multaj renkontis unu la alian unufoje persone. En ŝerca maniero s-o B. prezentis la kunvenintojn, notante ĉe tio ankaŭ la pseŭdonimojn, uzatajn de la koncerna verkisto, ekz. «konas bone Lali Blond», «intima amiko de Alex Kay», ktp. Kiom da surprizigo!

Sed ni ne deflankigu, ni ree parolu pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Estas klare, ke tiel ne estas eble daŭrigi.

Nun ni staras sur la sojlo de la kvindekjaro de Esperanto — kiel ni inde festu ĝin en Varsovio? Vane la gvidantoj de nia movado taksas tre malalte la Esperanto-popolon: ne nur la komitato de UEA devas labori, labori deziras ankaŭ la ceteraj esperantistoj, kiuj tiel multnombre ĉeestis la laborkunvenojn kaj el kiuj multaj ne havis la eblon eldiri siajn eble tre interesajn opiniojn pro tio, ke la kunvenotempo estis limigita, ĉar atendis tagmanĝo kaj turismaj aranĝoj!

Al mi ŝajnas, ke bone ni povus en niaj laborkunvenoj paroli kaj diskuti pri la organizo de nia movado, pri la metodoj kaj ebloj de propagando, pri la evoluo de la lingvo Esperanto kaj pri ĝia literaturo traduka kaj originala, pri nia gazetaro nacia kaj internacia, pri la fakaj organizaĵoj, pri AELA, pri la instruado de Esperanto kaj ĉiuj aliaj problemoj, senĉese okupantaj la pensojn de ĉiu vera adepto de Esperanto. Bonaj referantoj prezentu ideojn por posta diskutado, povanta doni utilajn

indikojn al la agantoj. Ne sufiĉas ĉi-rilataj artikoloj en la Esperanto-gazetoj — unufoje jare ni povas paroli pri niaj »doloraj demandoj«, kial do — ĉu senpripense, ĉu intence — oni senigas nin je tiu ĉi eblo?

La programo de la Universalaj Kongresoj devas esti ŝanĝota. Ĉiutage — eĉepte la ekskursan tagon — okazu laborkunvenoj kun programo, fiksota jam antaŭ la fino de la jaro, la Somena Universitato okupu sin per popularsciencaj temoj ekz. en du posttagmezoj, dimanĉon ni dediĉu al la ekonomo de la kongresurbo, unu posttagmezon okazu fakaj kunvenoj, prefere ne multnombraj, sed nepre serioze

antaŭpreparitaj, vespere teatro, koncerto, literatura vespero, halo k. a.

Ni provu foje tiel, la rezulto certe estos bona. Almenaŭ ni sukcesos atentigi la gazetaron pri Esperanto kiel kulturmovado, kio ne estas ebla en la nunaj cirkonstancoj. Jam tro longe ni klopodis impresi la ĝeneralan publikon, la oficialulojn, per la ekstera pompo de niaj ĉiujaraj Esperantaj demonstracioj, ni forlasu ĉi tiun vojon kaj sekvu la ekzemplojn de la aliaj seriozaj internaciaj kongresoj, kiuj estas taksataj laŭ la farata laboro kaj ne laŭ ekstera brilo efemera.

PAROLADO

ĉe la malferma kunsido de la Viena Kongreso

— Leo Belmont —

Mi supozas, ke mi alvenis la Kongreson por saluti vin varme en la nomo de l' Varsovia LKK, invitantan vin kore, ĉeesti en la sekvanta jubilea Kongreso, en Varsovio.

Mi supozas, ke mi alvenis, ĉar en nia tro saĝa epoko de l' teorio de relativeco Einsteina oni devas paroli singarde; estas eble, ke mi restis en Varsovio kaj la tuta Kongreso Universalala alvenis al mi. Pro tiu ĉi granda honoro kaj pro viaj klopodoj mi dankas humile.

Ĉu tiel ĉu alie — ni estas en la tre ĉarma ĉefurbo Vieno, kaj niaj poŝoj, dank' al la afabla Kongres-Komitato, estas jam ĝisfunde ŝtopitaj per elegante eldonitaj kaj tre interesaj broŝuroj pri la mirindaĵoj de l' Vieno kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj; tial permesu, ke mi, en la nomo de ĉiuj gastoj, metu liberan proponon: por ĝui inteligente, komprenante la ĉarmojn de Aŭstrio ni bezonas multon da tempo; do bonvolu *prokrasti la Kongreson* per duono da jaro kaj loki nin en sanatorio, en Burgo nova aŭ malnova — senpage kaj lukse, por ke ni oportune trastudu antaŭ la Kongreso la tutan literaturon porkongresan.

Permesu ankaŭ, al skeptikulo sepdekjara, rimarki en parentezo, ke veturi al kongresoj Esperantaj estas iom sensece. Ĉar eblaj estas nur *tri okazoj*:

Aŭ la kongreso estas efektive tia, kia mi ĝin imagis en fantazio; tiam mi ne bezonas vidi tion, kion mi antaŭvidis per la okuloj de l' imagado — ĝi estas nur ripeto. Aŭ la kongreso realiĝas iom pli malalte ol ni imagis — ne estas do lele ĉeesti en tiu kongreso, por ke ni poste disvastigu hejme malicajn ĉikanojn. Aŭ fine — la kongreso estas pli fortuna kaj pli beleĝa ol ni imagis — (certe tia estos, kiel mi jam antaŭsentas, via Kongreso) — kaj ni ruĝiĝos de honto, ke nia fantazio estas tiel senpova kaj mizera kontraŭ la realo.

Tamen, mi mem devis aperi en la kongreso — ĉar delegis min la oferema Varsovia LKK; ĉar ankaŭ vi afable invitis min, por ke mi faru festan paroladon ĉe la *interkonatiga vespero*. Jes! vi trovis min por tio predestinita, kiel Veteranon, Oratoron kaj amikon de l' Majstro.

Nu! veterano mi estas — ĉar mi disŭtigas kaj polviĝas; aŭ eble mi ne estas veterano, ĉar mi tute ne estas ano de ĉia vetero, sed nur *bonveterano!*

Se via Komitato nomas min *oratoro*, mi estas tre dankema, ĉar per tio mi rajtas paroli enue kaj sensece; vi tamen estos devigataj raviĝi kaj aplaŭdi pro afableco al la elekto de via Kongresa Komitato.

Sed pli serioza kaŭzo estas, ke mi vere estis *amiko* de nia genia Majstro, Ludoviko Zamenhof... Kaj mi alvenis la nunan kongreson por malkovri al vi lian plej profundan penson, lian misteron, lian teruran sekreton, internegan ideon de Esperanto, ĉar Li petis min, ke mi ĝin malkovru nur en la lasta jaro antaŭ la jubileo kvindekjara.

Do aŭdu! — kvankam ĝi sonos funebre kaj maldolĉe...

Jes! Zamenhof kredis je sia kreaĵo — li sciis, ke

lia lingvo estas *malfacila*; tio signifas, ke tiuj, kiuj ne povas ellerni aliajn lingvojn, ne ellernos bone ankaŭ Esperanton.

Li sciis, ke lia lingvo estas *belsona*; pro tio ankaŭ mi, maljuna avaco kun raŭka voĉo, ŝajnos al vi melodia parolulo en Esperanto. Li sciis, ke lia lingvo estas *tre klara*; ĉar kiam oni parolas pri kaprica fraŭlino, aŭ pri okkapa, t. e. *kap-riĉa* hidro — ekzistas inter ili subtila diferenco: en sonoj *c kaj ĉ*.

Zamenhof sciis tre bone, ke lia lingvo estas *riĉa*; ĉar, kiel Akademiano kaj membro de la Lingva Komitato, mi trovis kelkajn nebezonaĵojn sinonimojn... ekzemple: se ni havas la vorton *pantoflo*, pro kio ankorau la vorto *edzo!*

Tamen, la Majstro estis ne nur genia kreinto de l' Lingvo Internacia, ne nur aŭtoro de l' Himno pri *»Nova Sento«*, aŭ preĝo al *»Dio Nelsonata«*, ne nur poeto sidanta sur ore-ruĝaj nuboj, — sed estis li ankaŭ homo sobra kaj psikologo.

Kiel *psikologo*, li bonege sciis, ke vera amo, vera amikeco, vera komprenigo de animoj — plej elokvente esprimas sin per la gesto de trankvila dorloto, per la silento de buŝoj sin reciproke kisantaj, per forta manpremo, per divenado de pensoj sen ia ajn vorto. Certe *Eros* laboras sen vortaro — per saĝoj. Se junulo daŭre demandas, ĉu li povas kisi junulinon, junulino respondas kolere: *ne* — kaj foriras kaj kisas alian senvorte. La frazo: *»mi volus vin kisi«* estas senseca. Sen risko oni ricevos nenion, eĉ ne bonan vangofrapon. Kaj, se li kisis, ĉu ŝi devas demandi: ĉu ankaŭ mi povas vin kisi? — ne serĉu en plena akademio vortaro, sed kisu tuj... sen vortaj preparoj!

La membroj de *familio*, se ili estas amikemaj inter si, estas kontentaj sidante kune sen paroloj. La homoj ne amikemaj aŭ reciproke indiferentaj, devas sensece babili, por ke ili kaŝu sian malvarmon aŭ siajn sentojn malamikajn.

Simile, *se diplomatoj* komencas interparoli kaj interkomprenigi per lingvo komune diplomata (supozu: franca) — sendube okazos milito. Se la popoloj iam interkompreniĝos — kapitalistoj ĉesos dormi.

Nia majstro tion bone komprenis kaj dum sia tuta vivo li sonĝis — nature en prozo — pri milito de ĉiuj *pacaj batalantoj*. Ankaŭ en versoj, en siaj songoj pri fratigo, li montris sian malproksiman celon, dirinte: *»frat' fraton atakas sakale«*. Tiuj liaj idealoj efektiviĝis dum la milito tutmonda, en hejmaj militoj inter klasoj, parolantaj per unu lingvo — efektiviĝas nune, efektiviĝos poste.

Nur kiam la esperantistoj kaj la esperantistemuloj ĉesos paroli per lingvo komuna, sed kisas sin kaj ĉirkaŭprenos — la militoj malaperos kaj la popoloj ricevos bonan kaj dolĉan modelon de vera kunfratigo per saĝaj gutoj — ne per la vanaj vortoj eĉ de nia ŝatata kaj amata lingvo Esperanto! Tiun modelon enkorpiĝu tuj dum la interkonatiga vespero.

Vid-al-vide

— Mihály Földi —

Post la meso patro Alberto forlasis la preĝejon, pli ol unu horon promenis en la malpli homplenaj flank-stratoj kaj sur la marbordo; poste, plifortigante pri sia decido, li ekiris al la palaco de Lihtenfeld. Li anoncigis sin al Muravjev.

Kiam la lakeo malfermis la pordon antaŭ patro Alberto, Muravjev staris antaŭ la lito kaj ĝemetante streĉadis siajn membrojn. Sajne la vizito vekis lin el sonĝo. Lia vizaĝo estis malgrasa kaj flave verda, la okuloj inflame sangaj.

— Bonan tagon, patro Alberto — li salutis lace kaj malbonhumore la gaston kaj frosteme kuntiris la matenjakon ĉirkaŭ sia tendena kolo.

La monaĥo apenaŭ povis veni al li en la senorda ĉambro. Libroj, gazetoj, vestaĵoj, skatoloj de cigaredo kaj cigaro, boteloj por brando kaj vino, unuopaj kaj en pli-malpli grandaj amasoj, baris la vojon, kaj lian nazon kaj gorgon skrapo atakis la acideta aero, tanita en tabakfumo.

— Pardonu, ke mi ĝenas vin, mi ne sciis, ke tiatempes vi ankoraŭ kutimas dormi.

— Mi petas pardonon pro la malordo. Se mi estus sciinta, ke mi havos la honoron, mi zorgus akcepti vin en ĉambro konvena al via ordemo kaj pureco. Mi petas, prenu seĝon kaj ekfumu. Cigaron, aŭ cigaredon?

— Dankon, mi ne fumas.

— Iom da brando? Mi ankoraŭ havas originalan kontuŝoska-n.

— Dankon, mi ne kutimas.

— Mi vere bedaŭras, sed ankaŭ envias vin.

— Min? Kial?

— Kial ne envii? Homo, kiu scias kontentigi ĉiun sian senon per la animo. Tio estas granda afero, sinjoro. Ekzemple, mi havas multe da implikaĵoj kaj malagrablaĵoj pro miaj sensoj.

Tiu ĉi sincera komunikemo agrable surprizis patron Alberto. Li pensis, ke li devos lukti kontraŭ rezervema kaj kruele vortavara estaĵo kiu eble ŝajnigos, ke li eĉ ne komprenas la demandojn kaj skrupulojn.

— Pro viaj sensoj? — li demandis malprobe sed bonvole.

— Ho jes, sinjoro. Estas terure multe da malagrablaĵoj pri tiuj ĉi malicaj sensetoj. Ili estas konstante maltrankvilaj kaj deziras amuzon. La okuloj deziras vidi, la oreloj aŭdi, la haŭto palpi, la palato pisti delikatajn kaj kuriozajn gustojn, la cerbo konstante pensi, la korpo volas volupti. Terure!... Sed sidigu, mi petas, se vi jam estis tiel afabla kaj lacigis vin por min viziti.

Li premis la manon de patro Alberto kaj inter du libro-kaj gazet-montoj kondukis lin al granda violkolora fotelo.

— Ĉu ankaŭ vi opinias tion terura? — demandis mire la monaĥo, kiu sentis en si la disigon de tiu malamika sento, kun kiu li venis ĉi tien.

— Ho, terura! La plej granda bato, per kiu oni

*) Mihály Földi (nask. 1894) estas unu el la plej originalaj talentoj de la hungara literaturo. El lia granda romano — *Al la lando de Dio* — ni aperigas unu tre karakterizan ĉapitron, en kiu la Diablo — prezentita kun eksterordinaria aperiga realismo — kaj la Dia reprezentanto duelas por i. a. unu senkulpa homo. La kunplektingon de la realo kaj mistikismo tre klare montras la supra ĉapitro. Kiel la leganto jam komence konstato, Muravjev estas la Diablo en homa figuro.

punis min, estis tiu ĉi homa korpo. Ĝi estas pli malbona ol la infero. La infero havas siajn leĝojn, laŭ kiuj oni povas sin direkti. Tiu ĉi terura kaj ridinda homa korpo havas nek regulon, nek leĝon, nek esencon, nek destinton, se ne nur tion, ke ĝi naskiĝas kaj pereas kaj dume prizorgas, ke la malbeno de la ridindeco konservigu kaj daŭru. Estas terure, sinjoro. Min morte tedas tiuj multe da malperfektaj pensoj, kiujn scias krei la homa cerbo. Kaj imagu, mi devas sciiĝi pri ĉiuj ĉi pensoj. Mi morte malamas ĉiun plezuron, kiun povas senti la homa korpo. Kaj tiujn plezurojn mi devas trasferi. Eble plej agrablaj estas la ĉagrenoj kaj doloroj, ĉar pri ili mi povas almenaŭ rideti kaj ridi. Sed tiu ĉi tiranado de la sensoj... tiu ĉi soifo kaj malkontento... tiu ĉi paŝado samloke... tiu ĉi... tiu ĉi... ĉiam serĉi novon en la malnova kaj neŝanĝita... la nervoj!... la plezuroj kaj volupto... estas nekredeble ĉagrene kaj humilige kaj mi vere miras, ke relative tiom malmulte da homoj frenezigiĝas kaj tiel malmulte da homoj murdas, ankaŭ inter ili ja troviĝas tiaj, kiuj almenaŭ konjektas la veran sencen.

Patro Alberto atentis kun eksterordinara intereso tiun ĉi simpatian plendon: klarigis ja, ke la opinio de la timinda fremdulo pri la homa korpo tute konformas al la lia. Li rigardis, rigardis la malgrasan, preskaŭ maldikan kaj nun ĉagrene nervan estaĵon, kiun — li jam ne sciis kiel, kial — li imagis multe pli forta, potenca ankaŭ en sia korpa apero. Li regajnis sian trankvilon kaj superecon, ĉar li sentis denove avantaĝon poscdante muskolojn, malmolajn ostojn kaj, ĉefe, animan trankvilon.

— Sed, sinjoro — li diris kun milda rideto — vi forgesas, ke la homo havas ankaŭ animon.

— Animon? — demandis Muravjev kaj malestime rigardis al la monaĥo.

— Animon, per kiu li regas sin kaj kreas harmonion inter si kaj Dio.

— La homo ne havas animon — respondis koleterte Muravjev.

La monaĥo levigis. — Sed sinjoro — li kriis indigne — tio ja estas blasfemo kontraŭ Dio.

— Eh, ni ne ŝercu, ni estas inter ni! Dio kaj ankaŭ vi bone scias, ke la homo estas senanima bruto.

— Bruto?

— Jes, ja! Troviĝas inter ili kelkaj ĉarmaj, karaj, feliĉaj aŭ malfeliĉaj figuroj, kiuj en tiu ĉi fabrika produktado sukcesis tro bone kaj en kiuj nebulas palaj konjektoj pri tio, ke ekzistas pli altranga ekzisto ol ilia, ke ekzistas spirito, kies unu kaj unu radio kelkfoje falas al ili, kaj kiuj rekonas, ke ekzistas multo trans ilia ostokapo, tiel ekzemple spirito kaj Dio. Estas kelkaj homoj, kiuj konjektas tion, sed ne atingas ja pli ol la malperfektan konjekton kaj ankaŭ la vivo de tiuj kelkaj homoj dronas en la senfunda koto de la brutaro. Ĉar ĝi estas brutaro, kara Alberto, la plej aĉa brutaro!

La monaĥo malgaje balancis la kapon kaj subite li ne povis respondi.

— Pli malhonoran bandon, pli teruran societon, ol tiu ĉi homaro, oni povas trovi nenie. Doloro, mi havas la taskon viziti de tempo al tempo la regiono de la estaĵoj sur la logloko nomita Tero. Nu, ekzistas ĉiaspecaj. Troviĝas ratoj, paseroj, agloj kaj vermoj, leonoj kaj ŝafoj, fiŝoj kaj kapreoloj, floroj, arboj, vespertoj, sed ili ĉiuj estas anĝeloj bonaj kaj simplaj, kompare al la monstro nomata homo. Per kiaj teruraj ŝtels la tempon tiu ĉi brutaro jam de miljaroj. Tio estas abomena. Hodiaŭ ĝi

Aŭskultado

— Lali Blond —

En Eŭropo, dum aŭtuna
vespero en la milnaŭcenttri-
dekseca jaro de l' Savinto.

Mallumo. Nur la lampo de l' radio
ardetas kiel fajra punkto. Sidante
sur seĝo komforta mi aŭskultas voĉon
de l' muzikanta kesto, dum la ĉambro
plena de libroj — de ĉi amikaro
fidela — ĉirkaŭbrakas min per sia
ŝirmanta fermitaĉo kaj saĝa solo.
Post taglato elcerpa, tede stulta,
ofte tiel kutimas mi pasigi
vesperajn horojn; ve, malĝojriĉajn,
ek ke mi restis sola sur la tero.

Alterne pelas sin la melodioj,
ĉar se eksilentas ie la muziko,
mi serĉas tuj alian avidmane.
Muzikon, nur muzikon, eĉ ne kanton,
nur harmonion puran, tute puran
de ĉio homa. Mi elfermitas volas
la fatajn vortojn de l' ekstera mondo;
droni mi volas en sonoro-ondoj
kaj forgesigi pri la ruĝaj krioj
de l' gazetar' bulvarda, kiu ĝue
voluptas pri l' sufera homa karno.
Sed jen dum la serĉad' eksonas firma
virvoĉo kaj informas pri la taga
novaj'. Kiel se iun sorĉo-katenas
rigard' serpenta, kaj sen pov', rigide
atendas li la glitan mort-portanton,
tia torpor' inerta min malhelpas
forturni la serĉilon kaj aŭskultas
gis fino la raporton sang-haladzan.

Post la mutiĝo de l' aparat' mi iras
al la fenestro. Lante falas pluvo,
sub ĝia peze fala plumbvalo
apenaŭ spiras kelkaj teraj lumoj.
Mi gapas alekstere. Ĉi aŭtuno
kruela, sangavida sufokante
premas la gorgon. Sed ankoraŭ fruas
via triumfo, ho fruktomurdanta
flortreta aŭtuno! Ja ne ĉiun fajron
kapablas vi estingi, multaj viroj
ribel-rigardas al vi en l' okulojn:
jen en rigard' ilia: fajro de spito,
en kor' ilia: suno de printempo,
kaj varmo en la konstruanta pugno!

Vespera sonorilo

— Lali Blond —

Mi kuŝas ĉe l' fenestro ĵus antaŭ sunsubiro.
En laca pigro palas la firmamenta fono;
kruela varm' julia kun sufokanta spiro
eksidis senindulge sur domo, ajo, homo.

Jam ŝtete ekkrepuskas, fluid-argenta brilo
borderas orfan nubon ŝebantan kiel balono;
de l' fora, fier-svelta, blankvesta kampanilo
mortante al mi ondas la metal-langa sono.

Somera sonorilo! Kia dolor' senvorta
vekigas en l' animo je l' lante lula ritmo!
En koro vakse mola la kanto trist-akorda

reŝiras vundon, kiu postsangas kiel stigno:
meze de la somero kun sort-anonca ĝemo
la vibre vaga voĉo parolas pri l' pasemo...

estas tia, kia ĝi estis antaŭ du milionoj da jaroj kaj post
jarmiliono ĝi estos tute la sama, kiel hodiaŭ. Ĝi estas
maltrankvila, nesatigebla, senhonora kaj sentaŭga. Ĝi havas
sufiĉe por manĝi, sed zorgas ĉiam pri tio, ke ĝi mal-
satu. Ĝi havas sufiĉe por ĝoĝi, sed ĉiam ĝi turnas tiel la
okazojn, ke ĝi suferu. Ĝi havas sufiĉe da kaŭzoj por vivi
en paco, sed ĉiam ĝi kreas situacion por mortigi kaj
pereigi. Ĝi havas la eblon ami sin kaj sian genton, sed
ĉiam ĝi elce-bumas ion por malami. Ĝi ricevis de Dio
etan fajron el la ĉiela brilo, havas eton da menso, sed
ĝi ne uzas tion por ĉirkaŭrigardi en la mondo kaj supren-
rigardi al la eterneco, intelekti sian sorton, destinton,
lokon en la universo; ho ne! Li uzas tion por rabo,
murdo, envio, vanto, malico kaj maksimume ankaŭ por
tio, ke pligrandiĝu ĝiaj kapabloj por pereigo kaj por la
fabrikado de rimedoj, per kiuj la faro de malhonestajoj
estas pli sukcesa. Imagu, kion atingus tiaj bestoj, se ili —
de kiam ili sentaŭgas ĉi tie — okupiĝus pri la esenco,
kion ili povus fari, ili ja povus vivi senzorge... se ili
havas zorgon pri ni...

— Pri ni? — montris lin patro Alberto.

— Pri ni, jes, pri ni.

La monaĥo paŝis al li.

— Sed kiu vi estas?

Muravjev rigardis furioze en liajn okulojn.

— Mi bone scias, kiu vi estas kaj...

— Mi estas simpla dominika monaĥo, humila serv-
isto de Dio!

Muravjev gestis neglekte. — Ne gravas, kio estas via
nomo kaj kian veston vi portas. Vi apartenas al tiuj

malmultaj, kiuj havas animon kaj en kiu la animo eĉ
anonciĝas. Tia fenomeno estas sufiĉe malofta ĉi tie, inter
la homoj, sed eĉ se ĝi troviĝas malofte, ĝia graveco ne
estas tro granda, ĉar ĝia efiko radias al ne vasta cirklo.
Tion scias ankaŭ vi. Kaj ankaŭ tion vi scias, ke ankaŭ
mi scias tion. Ankaŭ tion vi scias do, kiu mi estas. Blanka
estas unu, nigra la alia. Kaj ili unuigas en la senkolora.

Lia malgrasa korpo nun etendiĝis, lia vizaĝo leviĝis
al tiu de la monaĥo.

— Cu vi scias, aŭ ne — li kriis.

Patro Alberto malgaje fermis la okulojn. Liaj ŝul-
troj malleviĝis, lia tuta korpo kvazaŭ ŝrumpis. Li repro-
fundiĝis en la violkolora fotelo, ĝemis kaj kovris la
vizaĝon.

— Kaj se vi scias — diris Muravjev — trankviliĝu
do pri tio. Tio estas via destino.

La monaĥo lace malfermis la okulojn.

— Kial vi venis ĉi tien?

— Kial mi venis? — li ripetis la demandon kaj
furioze ridis. — Kion vi opinias? Eble mi volas min
distri kaj tiom mi idiotiĝis, ke mi ne povus eltrovi dis-
tron pli belan, pli saĝan, al mi pli indan? Estas vere
ĉagrene, ke eĉ tiel rara, entuziasma homo, tia sanktulo,
kiel vi, konstante cirkulas, esploras ĉirkaŭ mi kaj serĉe
gapas, eĉ eble volas min forpeli de mia loko. Vi sciis jam
en la unua minuto, kiu mi estas kaj de semajnoj mi jam
atendas vian viziton. Kial vi maltrankvilas? Kial vi mal-
gajas? Kial vi desegnas ĉirkaŭ mi superflajn cirklojn?
Oni devas trankviliĝi pri tio. Via destino estas kredi,
preĝi kaj lumi. Mia: embarasi, pereigi, puni.

SUB MELODIOJ

— Karl Vanselew —

LA MANKO

(Germana popol-melodio: *Busserl is a schnuckerig Ding*)

Cu estas io stranga pli
Ol kiso? Certe ne!
Nek trink', nek mango, tamen ĝi
Al ni bongustas tre.

Por kio la skribista plum'
Bezonos horojn cent,
Ĝin diras unu kiso dum
La daŭro de moment'.

Kaj kvankam ludas la afer'
De buŝo nur al buŝ',
Penetras tra la kor-kamer'
La tiklo de la tuŝ'.

Nur unu mankon trovas mi
En ĝia franda ĝu':
Ke eĉ post mil kisegoj ni
Malsataj restas plu.

VAGI, HO VAGI

(Melodio de A. Neüendorff:
»Wandern, ach wandern«)

Esti vaganto
dum tuta la jar'
Kun ludo kaj kanto —
jen mia far'!
Tenante nenie,
laŭ plaĉo kaj ĝu'
De tie al tie
migradas mi plu.
Neniu min konas,
sed kie de mi
La ludo eksonas
kun kantmelodi',
Amikoj ne mankas
kaj ĝojo sen ĉes'.
Per kisoj min dankas
knabina kares'.
Buŝetoj angelaj,
ĉu scias vi pri
Okupoj pli belaj
ol tiu ĉi?
Kaj kiam iros
ĉielen mi for,
Al Petro mi diros

kun rida kor':
»Mi estis vaganto
de jaro al jar'.
Nur ludo kaj kanto —
jen mia far'!
Angeloj ridetos
kaj Petro ĉe l' pord'
Enveni min petos:
»Cio en ord'!
Transpaŝu la ŝtupon
tra porda la tru'
Kaj vian okupon
daŭrigu plu.
Car eĉ ni ĉielaj
ne scias pri
Okupoj pli belaj
ol tiu ĉi!«

NINA

(Itala kanto, melodio de
G. B. Pergolesi)

Tri tagojn mia Nina
El dormo senfina
La dolĉ-okulojn du
Jam ne malfermis plu.

Tri tagojn mian plendon
Kaj ploran atendon
Ŝi en ĉi tiu mond'
Jam lasas sen respond'.

Najbaroj, helpu kaj venu vi,
Venu al ŝi kun fluto
Kaj harpo kaj liuto
Kaj kanta melodi',
Por ke vekigu ŝi.

ELKORA DIRO

(Laŭ Heinrich Heine, melodio de
Felix Mendelssohn-Bartholdy)

Mi volus, ke tuta la forto
De l' amo el mia kor!
Kunigu en unu vorto.
La vento ĝin portu for.

Al vi kun flustra kareso
Ĝin portu la venta spir',
Por ke vi memoru sen ĉeso
La ardon de mia sopir'.

Kaj kiam vi kuŝos en dormo,
Ĝi sonu kun mara bru',
Ĝi sonu kun forto de ŝtormo
Tra viaj songoj plu.

LA FIERO

(Melodio de S. Scholtz:
Hoho, du stolzes Mädel)

»Car vi min malatentas,
Cu vi, fierulin',
Imagas, ke mi sentas
Afero grava ĝin?»

Cu eble vi ne vidas
Kaj aŭdas? En malkaŝ'!
Mi kantas kaj mi ridas
Dum via preterpaŝ'!e...

... Nur poste ĝema-spire
Mi staras en angul'!
Kaj viŝas korskopire
La larmojn de l' okul'.

RENKONTO

(Laŭ melodio de Eugén d' Albert:
La knabino kaj la papilio)

En la arbaro iris
Knabino kaj dum ŝi
De branĉo florojn ŝiris, —
Sen, ke ĝi peton diris, —
Sur ŝian ruĝan buŝon
Sin kisis papili'!

En ĉarman la orelon
»Pardonu« flustris ĝi,
»Mi havis nur la celon,
Sorbeti flor-mielon,
Kaj pensis, estas rozo
Buseto tiu ĉi.«

»Nu do — pardonon prenu
Ĉi-foje« ridis ŝi —
»Sed aŭdu, ne revenu
Kaj en memoro tenu:
Ne floras ĉiu rozo
Por ĉiu papili'!«

— Cu vi venis por puni?
La mieno de Muravjev malmole streĉiĝis, liaj dentoj
grincis.

— Mi tiel ekvipoj tiun ĉi friponan brutaron, ke la
tuta Tero ektemos! Se ili streĉiĝadas el sia haŭto, mi do
eltiros ilin el ĝi. Se ili ne scias vivi en paco, mi preparos
por ili militon. Se ili ne povas interkonsenti, mi gvidos
do iliajn pritraktojn kaj mi instruos ilin kiel kompreni
unu la alian sen sono, vorto kaj gesto, ĉar po-milione mi
deŝiros ilian kapon de la kolo kaj ĵetos en fosajon, por
ke en la morto fine ili interkompreniĝu.

— Terure!... ĝemis patro Alberto.

— Cu vi opinias tion terura, kara Alberto? Tio estas
tre malforta esprimo pri tio, kio nun prepariĝas. Car
estas pli ol terura, kio jam estas ĉi tie. Disparcelas la
fiuloj tiun ĉi etan loglokon, kie ili regas kun senlime
malica tiraneco kaj tromemfida fierado, post kiam ili for-
rabis ĝin de la aliaj estaĵoj, kiujn ili ŝrumpigis kaj krip-
ligis je floroj, plantoj, bestoj. Ili disparcelas, ili faras
limojn, elmetas flagojn; nu, bone: ili vivu en tiu ĉi stulto,
se tio al ili plaĉas, sed ili restu en siaj stultaj kaĝoj.
Tamen, ne! ili ne restas en paco. Montras moke unu al la
alia sian komikan langon, boras tunelon por eksplodigi
la aliajn, unu volas superi la alian, donas unu al la

Best-afero

alia ĉaspecan sensencan kaj senenhavan nomon kaj ili estas fieraj pri tiuj nomoj, unu diras: mi estas franco! . . . la alia frapas sian bruston: li estas germano; la tria estas anglo, la kvara ruso, la blankulo estas fiero, ĉar li estas blanka, la eŭropano, ke li ne estas amerikano . . . kaj por ĉiu el ili Macedonio estas tro malvasta. La franco devas ricevi ankoraŭ iom da tero, la anglo sentas sufiĉan trankvilon, la germano sufiĉan potencon . . . mi do zumas al ili kanteton por tiu procesio, sed pro tiu kanto ili surdiĝos kaj lernos, ke ne nur sur la tero oni povas vastiĝi per trovida uzuro kaj malhonesta nesatigeblo, sed estas abunda loko por ili ankaŭ sub la tero.

Li moke klinis sin super la monaĥo:

— Cu vi estas kontenta pri mia tasko?

— Tamen . . . murmuris malespere patro Alberto — terure, terure!

Poste, kiam iom da esperata rideto, la jena demando rompis lian malgajon:

— Sed kion kulpos mia kompatinda adepto, kion vi volas de ŝi?

— La eta Klotilda? — ridis Muravjev?

La monaĥo saltleviĝis kaj ekprenis la manon de Muravjev.

— Simpla, senkulpa infano ŝi estas. Ververe, mi edukis ŝin. Ŝi povus esti bona homo, plezuro por Dio kaj ĉiuj sanktuloj. Kial oni devas ŝin malvirtigi?

Patro Alberto sentis kun teruro la ekflamon de fajro sur la mano de Muravjev.

— Tio estas detaldemando.

— Sed parolu pri ĝi.

— Vere ne indas.

— Min tio ja eksterordinare maltrankviligas.

— Sed vi ja tion ne povas kompreni.

— Mi petegas . . . indulgu ŝin!

Muravjev subite fortiris sian manon.

— Si erarvojis al mia direkto kaj, mi petas pardonon, ankaŭ mi devas amuzi min per io.

— Kiel vi opinias tion?

— Ankoraŭ mi mem ne scias . . . sed kredu, en ŝi estas io, kio vekas eĉ la intereson de l' Diabolo, precipe, se li devas marŝi ĉi tie en hombaito . . .

Patro Alberto eklevis sian kapon kaj rektigis, kvazaŭ li predikus de predikejo.

— Kiu ajn vi estas — kaj etendante la brakon li montris al li — tio ne povas esti via tasko.

— Mi diris, ke mia amuzo . . .

— Sed tio estas kulpo!

Muravjev eklevis sian ŝultron.

— Vi konfesis, ke ekzistas homoj, en kiuj vivas animo.

— Sed tiuj neniam estas inoj. En virino neniam estas animo; aŭ, se jes, ŝi ne povas plenumi sian virinan taskon.

La monaĥo petege kunfingris la manojn.

— Tiu ĉi knabino estas mem la virga puro. Senkulpa kaj kredanta animo. Unu el la plej belaj kaj plej karaj floroj de Dio. Mi konas ŝin. Ne tentu ŝin, ne proksimiĝu al ŝi kun via terura spirito, ne malvirtigu ŝin per via terura veneno.

— Mi havas tute alian opinion pri la eta Klotilda — subridis Muravjev. — Ĉiaspeca veneno abunde odoras ankaŭ en ŝi. Povas esti, ke ŝi povas iĝi senkulpa kaj sankta, sed ĝermas en ŝi ankaŭ tre bela sovaĝbesto.

— Viaj okuloj estas teruraj!

— Ciel ŝi estas taŭga por amuzi min, eĉ . . . tiuj venenoj, kiuj ŝutigas el ŝi kun ne kredeble dolĉa parfumo, ne estas tiom senkulpaĵaj. Sed, sinjoro, certe vi ne postulas, ke mi ĉian enuu.

Pri cikonioj. Jam antaŭ jardekoj la kontraŭstaro de la cikonioj estis iom suspektinda. Tiuj antaŭe tiel diligentaĵaj birdoj komencis neglekti sian taskon kaj la iam prospera entrepreno de la infantransporto, laŭ la aserto de grandbarbaĵ, maljunaj statistikistoj, kiuj tute ne povas helpi pri tio, katastrofe falas. Oni provas motivi tiun nekompreneblan ŝanĝon per la filozofemo de la cikonioj: Kial oni alportu infanojn, se oni baldaŭ repuŝos ilin en la faŭkon de la plej kruela besto, la Milito; sed tia argumentado estas tute malforta; la tasko estas tasko kaj ni absolute atendas la pliboniĝon de la cikonia moralo.

Kvankam ankaŭ ĉi-somere mi ricevis maltrankviligan informon pri la juna generacio de la cikonioj. Ili tute simple ne obeas, eĉ kontraŭstaras. La afero okazis tiel, ke la ornitologoj deziris solvi — helpe de la longkruraj, longbekaj kulnaborantoj — unu el la plej belaj kaj mirindaj sekretoj de la tera vivo, ili volis solvi la legon de la birdo-migrado. Dek naŭ junajn cikoniojn frusomere oni transportis per komfortaj aeroplanoj el Germanujo al Anglujo. En Kent kaj Skotlando malvaraj, amikaj manoj pretigis al ili ondliniajn nestojn, ankaŭ la somero abunde prizorgis ilian stomakon kaj kiam meze de aŭgusto la 19 cikonioj ekflugis al Afriko, la ornitologoj, kvazaŭ laŭ komando, malfermis siajn notlibrojn kaj kun ekscitiĝo atendis la novaĵojn.

Dum unu semajno venis nenia sciigo. La sciencistoj elkalkulis, ke la cikonioj flugas minimume jam super la militflama Hispanujo, kiam subite kolerŝprucaj telegramoj ekzizgadis, laŭ kiuj la 19 cikonioj ekstrikis, ili somerumas en la bordregiono de Suda Anglujo kaj sin banadas. Ĝis nia gazetfermo ni ne ricevis sciigon pri ilia formoviĝo. Ne utilas pelado, bruo, krio, ĝeno, la cikonioj ne volas ekflugi en la direkto de Afriko. Ĉu eble denove la sama teorio? Ĉu ilin tudas la sangverŝo? Eh! Oni ne povas esti sentimentala, eĉ se oni estas cikonio. Bonvolu pripensi gesinjoroj Cikoniuj, ke temas pri la sankta scivolo de la scienco, pri la Scienco, kiu havas potencajn armilojn, pensu nur pri la kemio, kies gasrimedoj nepre igos vin forflugi, al la plej nigra Afriko, se vi longe daŭrigos vian pasivan ribelon. Pripensu!

Fersil

— Homon mi volas savi, junan, senkulpan . . .

Muravjev tedite turnis sin for de patro Alberto kaj prenis el granda katolo dikan, orringan cigaredon. Li ekfumis kaj, kvazaŭ laca de la parolado, duonfermante siajn okulojn, avide kaj profundspire sorbis la fumon.

— Homon oni ne povas savi, malgraŭ ĉio, ĉar ne eble.

La manoj de patro Alberto pugnigis. Li minacis.

— Sed mi preĝos kaj petegos por ŝia savo. Kaj se mi ne estas malinda por preĝo kaj favoro de la Disinjoro, mia peto estos plenumita kaj vi vane frapados la sanktan pardonon de pura animo.

Muravjev prenis de la planko grandan anglan gazeton, eksidis en la violkolora fotelo, komencis legi kaj dume per sia brulanta cigaredo bruligis fumantajn truojn en la paperon.

— Malbenita estu la intenco — kriis patro Alberto — kun kiu vi proksimiĝas al ŝi. Malbenon, malbenon . . .

Muravjev flegme lin alrigardis.

— Malbenita. Vere tiel. Tion eĉ ni ambaŭ ne kapablas ŝanĝi.

— Estu malbenita! — ripetis patro Alberto.

Muravjev kappesis kaj kaŝis sin en la gazeto. La monaĥo ankoraŭ unufoje alrigardis lin, kaj vidante, ke ĉia parolo estas nun vana, kun ekscito li rapidis reen al sia ĉelo.

El la hungara: F. Szilágyi.

Ne tiel freneza

— Roy J. Schreiber —

Fajfante gajan arion, Hektoro malpleniĝis siajn tirkestojn zorge sur la plankon. Fininte tion, li komencis paki la enhavon orde en kofron. Li estis forlasanta sian hejmurbon, Waukesha, Wisconsin.

Tra la malfermita fenestro de la ĉambro de Hektoro venis la gaja ario de rubekolo. Super la pinto de la ulmarbo en kiu sidis la malgranda kantisteto, kelkaj lanugaj nuboj estis videblaj, ŝvebantaj preskaŭ senmove en la belega somera ĉielo. La tero estis banata de sunbrilo. Ĉie, kie oni rigardis, oni povis vidi belajn roskisitajn florojn en belformaj bedoj, malfermantajn la okulojn por saluti la sunon.

Hektoro estis perfekte kompacbla kun la ĉirkaŭaĵo, ĉar ankaŭ li estis en ĝoja ekstazo. Ne nur pro la ĉarma naturo de la tago; pli ol tio. Li staris antaŭ la spegulo, tenante sian diplomon en la mano; unue li admiris sin en la spegulo, kaj poste li turnis sian atenton al la diplomo. Tiu ĉi diplomo, kiun li ricevis la antaŭan vesperon ĉe la kolegio, rememorigis lin pri la lastaj kvar jaroj de sia vivo. Kaj li parolis laŭte, kiel ĉiam, kiam li estis sola:

«Ha! Kvar longajn jarojn mi pasigis mangante de la arbo de erudicio, kaj nun mi estas elektelebla por instrui gramatikon kaj sciencan en iu ĝimnazio de la ŝtato. Nu, mi sukcesis, kaj mi gajnis ĉiajn honorojn. Nun, tiel baldaŭ kiel mi povos trovi agrablan lokon por loĝi, mi komencos verki novelon. Se mi sukcesos, mi estigos aŭtoro. Tiam mi ne devos instrui. Mi ja neniam volis esti instruisto; mi ĉiam volis esti verkisto. Mi scias, ke mi estos sukcesa; cetere, mi povos pasigi ion da tempo tiel; mi havas ja kvarcent dolarojn, kiujn mia onklo Hugo testamentis al mi.

«Kara maljuna Onklo Hugo, se li povus esti tie ĉi nun. Mi scias, kion li dirus: Mia knabo, mi estas fiera ke vi faris tiel bone, sed mi estos double tiel fiera, se vi pruvos, ke vi scias kiel uzi vian edukitecon.

«Jes, tio estas ĝuste, kion li dirus. Nu, nun mi devas forvojaĝi. Mi ne plu volas loĝi tie ĉi; mi volas aventuron. Mi loĝis en tiu ĉi urbo mian tutan vivon; tio sufiĉas. Ho! — ha! ha! ha! Jen, mi jam enpakis kaj mi ne scias ankoraŭ, kien mi iru. Ha! ha! mi scias, kion mi faros; mi blinde elektos urbon sur la mapo, kaj kie ajn ĝi estos, mi iros.»

Serĉante mapon, Hektoro malordigis la tutan enhavon de sia kofro, kiun li estis aranĝinta tiel orde. Fine li trovis la mapon kaj malfaldis ĝin sur la plankon kaj surgenuiĝis antaŭ ĝi. Tiam li prenis krajonon el sia vesto-poŝo kaj fermante la okulojn, li blinde mallevis la pinton de la kraĵono sur la mapon. Kiam li remalfermis la okulojn, li vidis ke la difinita loko estis Morta Valo, Kalifornio.

«Ho! li ekkriis, «La diablo volas havi min pli ol mi pensis; tio estas malbona. Mi provos denove.»

Kaj denove li provis tiun ĉi metadon por trovi novan hejmon. Sed je tiu ĉi fojo li mallevis la kraĵonpinton sur la Atlantan Oceanon. Vidinte la rezulton de sia dua klopodo, li ekkriis:

«Ho ve! Unue li volis bruligi min, kaj nun li volas dronigi min. Nu, mi provos ankoraŭ unufoje, sed se mi ne havos pli bonan ŝancon, mi restos tie ĉi.»

Feliĉe li havis pli bonan ŝancon: Detroit Lakes, Minnesota estis la elektita urbo. Vidante tion, Hektoro saltetis ĉirkaŭ la ĉambro kiel knabeto kaj kriegis:

«Hura! hura! Taŭga loko fine.»

Se kaŝaŭskultanto estus spioninta Hektoron, la honor-

itan gradulon de Karolo-Kolegio, li certe estus kredinta lin iomete freneza.

Nun la granda demando, «Kien?» estis respondita. Post duono da horo, Hektoro estis repakinta sian kofron: kaj post tri horoj li jam diris «Ĝis revido» al ĉiuj siaj amikoj, ankaŭ al la instruistoj kaj la dekanato ĉe la kolegio. Poste li iris al la fervoja stacio kaj baldaŭ veturis sur la vagonaro en la direkto al Detroit Lakes, kun sia kofro en la pakajara vagono.

Frue en la sekvanta mateno Hektoro estis vekita de negra portisto kaj estis informita, ke li baldaŭ alvenos en Detroit Lakes. Alveninte tien unu horon poste, li iris al la plej bona hotelo, kaj luis ĉambron.

Aranĝinte tie siajn apartenaĵojn li matenmanĝis en la hotela restoracio, kaj poste li promenis ĉirkaŭ en la urbo. Li baldaŭ konstatis, ke la urbo, al kiu la fatalo sendis lin, estas tre agrabla urbo: nek tro granda nek tro malgranda, kun proksimume kvar aŭ kvin mil loĝantoj. Krom tio, grandioza lago, nomata Detroit Lake, borderas gjan sudan flankon. Laŭ la lagbordoj Hektoro marsis hazarde ĝis tagmezo, kiam li malsatiĝis, kaj revenis al la hotelo por ĉefmanĝi.

Cefmanĝinte, Hektoro iris al sia ĉambro kaj komencis skribi per sia skribmaŝino la verkon, kiu, li pensis, famigos lin. La tutan posttagmezon li laboris kiel kastoro. Je la kvina li rigardis sian brakhorloĝon kaj diris:

«Ho ve, jam la kvina, mi devas ĉesi kaj kontroli, kion mi skribis.»

Pasiginte duonon da horo per tio li estis iomete laca kaj malsata, li demetis siajn okulvitrojn kaj iris al la restoracio. Fininte grandan vespermanĝon, li iris eksteren sur la straton kaj denove promenis suden al la lago.

Ĉe la lago, tiu ĉi aspiranta verkisto sidigis sur benko sub granda arbo, iomete malproksime de grupo sin bananta en la kvieta akvo. Tie li sidis longe, observante la subirantan sunon kaj aŭskultante la kriojn de kelkaj gabbinoj en la malproksimo. La rebrilo de la argenta lumo sur la glata akvo, kaj la silueto de la kontraŭa arboplena bordo sur la suda ĉielo emociis lin. Li decidigis veni tien ĉiumatene por bani sin solece kaj krei apatiton. Sed kiam li trovis, ke la moskitoj enamigis al li, li rapidis hejmen.

Dum la tri sekvantaj semajnoj, lia ĉiutaga vivo estis la sama kiel tio, kio estis ĵus priskribita. Laborinte tri tutajn semajnojn, li finis sian romanon, al kiu li donis la titolon «La Benita Pekulo». Korektinte ĉiun eraron, kiun li povis trovi, li dungis stenografistinojn skribi du aliajn ekzemplerojn. Tiujn ĉi ekzemplerojn li enpoŝtigis al du diversaj eldonejoj; la trian li retenis. Kompreneble, li supozis, ke el la aĉetantoj proponos unu pli multe ol la alia, kiel sinjorinoj vidantaj senutilan komercaĵon ĉe aŭkcio.

Kvankam Hektoro estis kolegia diplomito, li ankoraŭ devis lerni multon.

En la lasta semajno en Junio Hektoro faris nenion, escepte ke li legis, naĝis kaj mallaboris, kaj iris ofte al poŝtejo, esperante ricevi de la eldonistoj rian poŝton. Estis en unu el tiuj ĉi tagoj, ke li restis maldorma ĝis malfrue nokte, legante libron kaj forgesinte meti siajn okulvitrojn. La rezulto estis, ke la sekvanta tago matene li havis severan kaptoloron. Tio lin timigis, tial li demandis la hotelan komizon pri la valoro de la kuracitoj en la urbo. Tiamaniere okazis, ke li estis sciigita iri al D-ro Karlo Jordano.

«D-ro Karlo Jordano?» Hektoro demandis sin, «Ĝaj-

nas al mi, ke mi aŭdis tiun nomon antaŭe, sed kun la kapdoloro mi ne povas pensi kie.»

Marŝante laŭlonge la straton en la direkto al la oficejo de la kuracisto, Hektoro memoris, ke kiam li estis knabeto, D-ro Jordano loĝis en lia proksimo en Waukesha Wisconsin. Li memoris ankaŭ, ke tiu kuracisto havis filon, kiu havis kelkajn jarojn pli ol li, kaj ankaŭ filinon, kiu havis preskaŭ la saman aĝon kiel li. Ili estis liaj kunludantoj. Iliaj nomoj estis Karlo kaj Perla. Tiam li memoris, ke la doktoro kun la familio estis transloĝiginta al Minnesota, sed li ne sciis, al kiu urbo.

Suprenirante la ŝtuparon al D-ro Jordano, Hektoro atendis esti salutota de respektinda maljuna kuracisto kun blankaj haroj, lipharoj kaj mentonharoj. Anstataŭe, li estis surprizita, kiam lin salutis malalta, dika, belaspekta kaj amikema juna kuracisto kun malluma vizagkoloro. Tuj Hektoro rekonis lin; li estis la sama persono, kiu estis lia kunludanto antaŭ proksimume dek du jaroj.

»Bonan tagon Karlo,« li ekkriis, etendante la manon al la doktoro, »Ĉu vi ne rekonas min?«

Manpremite kun Hektoro, la kuracisto rigardadis al nia freneza heroo kaj diris:

»Mi vidis vin antaŭe, sed mi ne povas vin rekonii.«

Tiam Hektoro lin demandis: »Ĉu vi ne memoras knabeton kun ruĝa hararo en Waukesha, kiun vi nomis Heĉjo?«

»Jen!« ekparolis la doktoro, »kiel mi vivas kaj spiras, estas vi, Heĉjo Loreko. Kiamaniere vi venis tien ĉi?«

»Nu, ĝustadire, ĝuste antaŭ unu monato mi diplomiĝis en la Karolo-Kolegio. Mi ne havas hejmon, ĉiuj miaj parencoj estas mortintaj, tial mi decidis ĉirkaŭvagi, ĝis mi trovos agrablajn lokojn, kaj tie ĉi mi estas.«

(La leganto rimarkos, ke Hektoro ne rakontis al la kuracisto la metodojn, per kiu li elektis Detroit Lakes por hejmo.)

»Kian profesion vi havas?« demandis la doktoro.

»Ho, mi estas aŭtoro,« estis la fiera respondo.

»Ĉu vere, ĉu vi jam vendis iun el viaj verkoj?«

»Ne,« respondis Hektoro, »sed nur unu semajno ĵa pasis de la tempo, kiam mi sendis la unuan pecon al Eldonisto.«

»Ho, mi komprenas«, rimarkis Karlo, »nu, mi esperas, ke vi estos feliĉa.«

»Multan dankon, Karlo. Nun diru, kiel fartas viaj gepatroj kaj Perla, via fratino?«

»Nur Perla kaj mi estas ankoraŭ vivantaj.«

»Mi bedaŭras aŭdi tion, estas domaĝe. Ĉu vi jam edzĝis, Karlo?«

»Ne Heĉjo, ankaŭ Perla estas ankoraŭ fratolino. Ni ambaŭ loĝas kune en la sama dometo. Ĉu vi memoras Perlan?«

»Certe mi memoras tiun knabinecon kun la ruĝaj vangoj kaj la plektitaj haroj. Mi ĉiam portis ŝiajn lernolibrojn al la lernejo por ŝi.«

La interparolo daŭris du horojn inter tiuj ĉi du reuŝiĝintaj amikoj. Dumtempe, Hektoro forgesis ke li iam havis kapdoloron. Li ricevis inviton veni al la dometo de la kuracisto vespere kaj manĝi vespermanĝon kune kun la doktoro kaj Perla. Tion li volonte akceptis.

En lia hotelo la komizo donis al li du leterojn. Ili estis de la eldonejoj.

Unu el la eldonistoj skribis, ke li ne volas la romanon ĉar rakontoj teologiaj ne estas vendeblaj en tiu ĉi moderna epoko. Li konfesis, ke la novelo estas bonega, sed nuntempe legantoj ne plu estimas la arton; ili volas legi pri mistero kaj aventuro.

La alia, kiu verŝajne ne havis multan sagacon, proponis al Hektoro cent dolarojn kaj tre malgrandan tan-

tiemon. Estante tre senkuragiĝita de la preskaŭ senfrukta novaĵo, Hektoro akceptis la proponon de la dua eldonisto.

Vespere Hektoro iris al la hejmo de D-ro Jordano. Tie li estis enkondukita en la komfortan malgrandan hejmon. Tiam Karlo, la juna doktoro, vokis sian fratinnon Perla.

Enirinte la ĉambron, ŝi tuj rekonis lin.

»Nu, nu, nu, Hektoro Loreko, kiel vi fartas?« estis ŝiaj unuaj vortoj.

Post multa interparolo, la tri junaj personoj sidigis ĉirkaŭ la tablo kaj manĝis la bonegan vespermanĝon kiun Perla preparis. Dum ili manĝis, ili diskutis kaj interŝanĝis multajn travivaĵojn. Hektoro diris, ke li vendis sian romanon, sed li ne ricevis tiel multon kiel li esperis.

Antaŭ ol ili finis la manĝon, Hektoro konstatis, ke li estas enamiginta al Perla. Tio estis evidenta, li ruĝiĝis kiam ajn Perla parolis al li.

Estis facile por iu enamigi al Perla. Ŝi estis juna, mezalta, kaj tre bela; ŝi havis ruĝbrunan hararon, delikatan molan haŭton, brilajn avelkolorajn okulojn, kaj dentojn kiuj konvenis perfekte al ŝia nomo. Plue, tiuj ĉi dentoj estis videblaj inter du naturaj ĉerizruĝaj lipoj. Ŝia korpo, kiu estis kaŝita de deca vesto, estis ĝuste tiel bela kiel ŝia vizago. Ŝajnis ankaŭ, ke ŝi admiras Hektoron multe, kvankam li estis ne tre belaspekta. Eble, ĉar li estis tre interesa kaj ĝentila.

Fininte sian manĝon, la kuracisto estis vokita per telefono en la kamparon, por personigi la cikonion.

Kiam la doktoro foriris, Hektoro pensis, ke ne estus dece resti solece kun Perla en ŝia hejmo, tial li diris, ke ili promenu kune al la lago. Perla volonte akceptis sed antaŭe ŝi lavis la pladojn. Hektoro helpis ŝin, li viŝis la pladojn por ŝi.

Alveninte apud la lagon, Hektoro kaj Perla sidigis sur benko. Hektoro rakontis al ŝi pri La Benita Pekulo, de la komenco ĝis la fino. Perlo estis tre interesata de literaturo, do ne mankis al ili temo pri kiu paroli.

Kelkfoje la parolado de Hektoro estis tre fanfarona. Li tro ofte mencii la famon kaj la riĉaĵojn, kiujn li stre-



La Pasteur-masko de Paul Muni

has. Ŝajnis, ke tio tedas Perlan, sed ŝi diris nenion pri tio. Ŝi estis tro ĝentila por lin insulti.

Poste Hektoro komencis entuziasmi pri la beleco de la ĉirkaŭaĵo. Estis la unua fojo, ke Perla sentis sin vere ravita de la beleco, kiu ŝin ĉirkaŭis. Jam ofte ŝi sidis tie ĉi vespere, sed nun ŝajnis malsame; kial, ŝi ne sciis. Ŝi ne rimarkis ke Hektoro teksas teksaĵojn de amo por ŝin kapti kaj ke ĉio aperis pli bela tra la silkaj vortoj de la teksaĵo.

La luno estis jam delonge leviginta, kiam Hektoro, la enamiginta junulo esko:tis Perlan hejmen. Brako ĉe brako ili promenis al la pordo de ŝia hejmo. Antaŭ ol li foriris li diris al ŝi, ke li treege ĝuis la vesperon, kaj demandis, ĉu ŝi akompanus lin al la lago pli ofte. La respondo estis: »Jes.« Kiam ili diris »Bonan nokton«, Hektoro estis tentata ĉirkaŭpreni kaj kisi ŝin, sed li sin regis kaj iris al la hotelo por kuŝiĝi kun brulanta koro kaj amoŝofo.

La tuta nokto preterpasis kaj Hektoro ne dormis. Li komprenis nun, kio estis enamigi. Ĉu ŝi amas lin sufiĉe por edziniĝi? Kaj se ŝi estas lia edzino, ĉu li povos zorgi pri ŝi tiel bone, kiel al ŝi konvenas? Inter tiaj pensoj li pasigis la tutan nokton.

Matene tuj kiam lumigis, Hektoro ellitiĝis, vestis sin, razis sin, kaj iris al la akceptejo de Karlo por demandi lin, ĉu li permesas al li edziniĝi Perlan. Kiam li alvenis, estis nur la sepa; la kuracisto neniam venis antaŭ la oka. Sed la atendejo neniam estis ŝlosita, tial Hektoro eniris kaj atendis, ne sidante sed marŝante tien kaj reen nerv-malforte. Sur tablo en la atendejo kuŝis pakaĵo da cigaredoj de Karlo. Kvankam Hektoro malofte fumis, tiu-matene, antaŭ ol Karlo alvenis, li fumis preskaŭ la duonon de la cigaredoj, kiuj kuŝis sur la tablo.

Kiam D-ro Jordano eniris la oficejon, li estis surprizita trovi Hektoron tie tiel frue.

»Bonan matenon Heĉjo,« li diris, »Nu, vi estas mia unua paciento hodiaŭ. Kio estas al vi? Ĉu vi estas malsana? Ha! ha!«

Hektoro nur respondis: »Jes Karlo, mi estas malsana, tre malsana«, tiam li rugigis kaj lia vizaĝo fariĝis ornamita de malsana rideto.

»Ĉu vere?« demandis Karlo, »Ĉu vi havas dolorojn?«

»Ne Karlo, estas mia koro.«

»Kion vi diris, Heĉjo, via koro? Ha fripono, vi trompas.«

»Ne Karlo, vere mi ne trompas, estas mia koro. Mi, mi... mi enamigis al Perla.« Preskaŭ sufokiĝante, dum li parolis la lastan frazon, Hektoro nun klinis sian kapon; li hontis.

Momenton, Karlo ŝajnis stultigita, kaj poste ekridegis. Reatinginte sian trankvilecon, li diris: »Mi sciis, ke tio okazos, mi rigardis vin iomete la pasintan vesperon ĉe la vespermanĝo.

»Tiam mi havas permeson?« demandis Hektoro, denove kuraga.

»Certe,« respondis Karlo, »Se Perla diros »Jes«, mi estos kontenta. Sed via rapida laboro amuzas min.«

»Multan dankon, Karlo,« dirinte tion, li ĝoje forkuris el la oficejo pensante: Ŝi ne povos diri »Jes« unu momenton tro baldaŭ.

D-ro Jordano staris apud la fenestro, ridante kore, dum li rigardis Hektoron rapidantan al la hejmo de Perla.

Preskaŭ kurante, Hektoro iris al la pordo de la dometo kaj sonorigis la pordsonorilon. Perla tuj venis al la pordo kaj vidante, kiu la frua vizitanto estas, ŝi ekparolis:

»Ho, estas vi, Hektoro, bonan matenon. Kial vi venas tiel frue hodiaŭ matene? Kio okazis? Vi ŝajnas ekscilita.«

Hektoro ne malsparis tempon por diri »bonan ma-

tenon«, sed ekkriis: »Perla, estas io, kion mi devas diri al vi tuj.«

»Ĉu vi ne volas eniri?« demandis Perla.

Hektoro esperis aŭdi tiujn lastajn vortojn, kaj nun, aŭdinte ilin, li ne malsparis momenton, sed eniris en la dometon. Enirinte, li staris antaŭ Perla kaj diris: »Mi ne povis dormi pasintan nokton.«

»Vi ne povis dormi, kial?«

Antaŭ ol Perla povis eldiri unu vorton plu, ŝi trovis sin en la brakoj de Hektoro, estante energie ĉirkaŭpremita kaj kisata. Inter la ŝmacoj Hektoro kriis en ŝiajn orelojn:

»Ĉar mi amas vin, ĉar mi adoras vin. Mi volas, ke ni geedziĝu.«

Kvankam Perla ne rezistis lin (eble ŝi ne povis), Hektoro subite opiniis, ke li estis iomete neĝentila, tial li liberigis sin kaj rapide petis:

»Bonvolu pardoni min, mi ne volis esti tiel malĝentila, mi bedaŭras tion.«

Retirinte sin kelkajn paŝojn de tie kie Hektoro staris petanta, kaj post kelkaj longaj spiroj, Perla ridetis kaj diris:

»Ne ĉagreniĝu, mi pardonas vin, sed, ho ve, vi amin-dumas rapide. Nu, Hektoro, mi ne scias, ĉu mi amas vin sufiĉe por edziniĝi aŭ ne. Mi ŝatas vin multe, sed mi timas, ke se mi estus via edzino, mi ne estus feliĉa, ĉar vi donus vian tutan atenton al via kariero. Pro tio mi ne kulpigas vin, ĉar vi volas gajni famon. Ne, Hektoro, mi ne opinias, ke estus bone, se vi kaj mi geedziĝus.«

»Ho Perla, mi petas,« ploris Hektoro.

»Ne, Hektoro, ne, ne, ne, multfoje ne. Mi konfesas, ke mi ŝatas vin treege kiel amikon, sed estus pli bone, se vi zorgus pri via kariero; kaj eble, se vi sukcesos, mi amos vin. Ĝis tiam, ni restu ĝeamikoj.«

Kun malgranda rideto sur siaj lipoj, Hektoro iomete sarkasme diris:

»Do mi ne petas plu, sed nur atendu, mi atingos ambaŭ: la famon kaj vin. Mi estis tro rapida.«

Tiam tre ĝentile li diris »adiaŭ« al Perla kaj reiris al la oficejo de Karlo. Kiam li reiris en la oficejon tuj li estis demandita de Karlo:

»Jen, jam ree? Ĉu mi povas vin gratuli?«

»Ne,« respondis Hektoro malgaje.

»Ĉu ŝi rifuzis vin.«

»Jes, Karlo, ŝi diris, ke mi donus pli da atento al mia kariero ol mi donus al ŝi. Sed ŝi ne diris, ke ŝi neniam estigos mia edzino. Ŝi diris, ke eble, se mi atingos famon, ŝi sentos malsame rilate al mi. Mi ne kulpigas ŝin, mi estis multe tro rapida, mi scias tion... mi estis malsagulo.«

»Jes, Heĉjo, mi scias, kiel vi sentas, sed per eraroĝ oni lernas. Ne ĉesu esperi, eble ŝi ŝanĝos sian opinionon poste,« diris Karlo.

»Jen, Karlo, mi ne hontas diri, ke mi amegas Perlan, sed, ho, unue mi devos gajni famon, se nur mi sciis kiel... Jen...«

»Nu, diru plu.«

»Atendu momenton, Karlo, mi pensadas.«

»Pri kio?«

»Jen, Karlo, mi havas ideon, kiu helpos min. Ĉu vi jam aŭdis, ke multaj verkistoj, aktoroj, muzikistoj kaj tiel plu famiĝis nur post kiam ili faris ion eksterordinaran?«

»Jes,« respondis Karlo.

»Ĉu oni povas lui ĉevalojn en tiu ĉi urbo?«

»Jes, sed kial vi volas la ĉevalojn?« demandis la kuracisto.

»Atendu momenton, ĉu vi kaj Perla scias rajdi ĉevalon?«

Messiah

— Händel —

Mi scias, ke l' Savinto vivas
kaj ke tronos li ĉe la Lasta Jug'
super la ter'.

Mi scias, ke l' Savinto vivas
kaj ke tronos li ĉe la Lasta Jug'
super la ter', super la ter'.

Ja ĉi korpon mangos vermoj,
sed Dion karne vidos mi,
Mi scias, ke l' Savinto vivas,
ke ĉi korpon mangos vermoj,
sed Dion karne vidos mi,
ja vidos mi.

Mi scias, ke l' Savinto vivas.
Ĉar Krist' nun levigis el la mort':

unua frukt' de l' dormantar',
de l' dormantar',
unua frukt' de l' dormantar'.

Ĉar Krist' nun levigis,
ĉar Krist' nun levigis
el la mort':

unua frukt' de l' dormantar'.

K. Kalocsay.

Al la vespera stelo

— Wagner —

Sur teron morne la krepusko falas,
La valon ĝi per nigra tol' vualas.
Sopirus ja l' anim' je alta flug':
Ĝin nokt-teruroj premas kvazaŭ jug'.
Ekbrilas jen vi, ho plej ĉarma stelo,
El malproksim' kun via milda helo.
Forpelas ombrojn via kara lum',
Afable montras la vojon ĝi nun.

Ho kara stelo de vesper',
Mi vin salutas kun esper',
Heroldu al ŝi via flam'
Pri mia ĉiam fidela am',
Kiam ŝi ŝvebos for de l' tero
Esti angel' de l' sankta sfero.

K. Kalocsay.

Mam'zell Nitouche

— N. Hervé —

Nokte venis el festeno
Ŝi, Babe' kaj li, Kade'.
»Kristo! kia nokto-pleno!
Ni rapidu do, Babe'!
»Vi ne uzas ĝin, azenol!
Farilon, farila, farileno!
»Timas mi! — tiel Kade'.
»Ja ne mi! — tiel Babe'.

Ili kvazaŭ blinde iris,
Urgis treme ŝin Kade'.
Jen, l' aeron krio ŝiris:
»Via mon' aŭ viv'! « Ho ve,
Du rabistoj tion diris.
Farilon, farila, fariliris.
Unu saltis al Kade'
Kaj la dua al Babe'.

Unu, kiel la omleton,
Kirlis korpon de Kade',
Dua montris grandan preton
Okupigi pri Babe',
Ĝifis ŝian kolumeton.
Farilon, farila, farileton.
»Mortas mi! — tiel Kade'.
»Mortas mi! — tiel Babe'.

Okulvibre, terurite
Hejmenvenis nun Kade',
Kaj silente kaj medite
Akompanis lin Babe'.
Ekspiris ŝi invite.
Farilon, farila, farilite.
»Mi ne iros plu, Babe'!
»Ja reiros mi, Kade'!

K. Kalocsay.

»Jes, Heĉjo, ni ambaŭ rajdas ofte.«

»Bonege, nun mi havas mian planon, sed nenion diru al Perla pri tio...«

Vespere en tiu sama tago, se oni estus promeninta laŭlonge de la vojo, kiu borderas la nordflankon de Detroit-lago, oni estus vidinta tri personojn galopantajn sur ĉevalo. Du el ili estus D-ro Jordano kaj lia fratino, Perla. La tria persono estis Hektoro.

Kiam ili alvenis al la sudflanko de la urbo, ĝuste apud la lago, Hektoro galopis antaŭen. Subite, lia ĉevalo ekstaris kaj Hektoro estis jetita al la tero kaj tie li kuŝis senmove.

Perla kaj Karlo rapide elseligis kaj kuris al sia amiko. Ili trovis lin senkonscia. D-ro Jordano levis lian korpon kaj portis ĝin sur proksiman herbejon. Perla genuigis apud li plorante kaj petante:

»Hektoro, Hektoro! Parolu al mi. Hektoro, karulo. Ho Karlo! ĉu li estas mortinta?«

La kuracisto, kiu estis faranta ĉion, kion li povis, diris al Perla:

»Ne Perla, li ankoraŭ vivas.«

Subite Hektoro malfermis siajn okulojn kaj murmuris:

»Ho! mia kapo, ho! mia kapo.«

Vidinte, ke Hektoro denove estas konscia, Perla ekkriis:

»Dank' al Dio, li ankoraŭ vivas.«

»Vi ne estas vundita, Heĉjo, ne turmentu vin. Klopodu stari,« instigis la kuracisto.

Tiam Hektoro malfermis la okulojn tiel larĝe, ke ŝajnis kvazaŭ liaj okuloj estus falintaj el siaj ingoj, kaj demandis:

»Kie mi estas? Kio okazis? Kiu alportis min tien ĉi? Kiu vi estas? Kiu estas tiu fraŭlino? Kiu mi estas? kaj denove li ekkriis: Ho! mia kapo.«

Dum Hektoro babilis tiel malsage, Karlo turnis sin al sia fratino kaj diris: »Mi timas, ke li perdis sian cerbo-sanecon.«

»Ho! Kion ni faros?« demandis Perla aŭdinte tiun ĉi teruran novaĵon.

»Unue, konduku tiujn ĉevalojn ree al la ĉevalejo, dumtempe mi kondukos Hektoron al nia hejmo. Mi estas

Verkoj kaj verkistoj

La vivo de Dostojevskij

La vojo al Dostojevskij ne estas facila, sed ĝi meritas la penon, eĉ la turmentan, ĉar per tiu turmento la animo puriĝas, malpeziga. — Li vagadas en dezertaj regionoj — diras iu kritikisto — sed lia sorĉa vergo ĉiam sentas en la profundo la varman fonton de la bono. La plej morna verkisto li estas; doloro tordas nian koron, tiom humiligataj, tiom malgajigitaj estas liaj figuroj. Sed al tiu malgaja mondo radias varmo de ie, de interne: la varmo de la kompatoj kaj homamo. Simbolismo, fantastiko kaj naturalismo plektiĝas en tiuj verkoj, sed la efekto estas plena realismo eĉ tiam, kiam la rakonto atingas la plej altajn pintojn de la mistikismo.

Kelkfoje — li skribis en letero — kiel seka herbo pluvon, oni soifas la kredon, ĉar en la malfeliĉo oni pli klare vidas la veron. Mi estas infano de mia epoko, filo de la nekredemo kaj dubo, kaj verŝajne mi restos tia ĝis la estingigo de mia vivo. Kiom min turmentis (kaj eĉ nun turmentas) la sopiro al la kredo, kiu des pli fortas, ju pli multaj argumentoj estas kontraŭ ĝi.

Ne, tiu animo ne estis simpla, sed la sugestian forton de lia stranga talento indikas kaj motivas lia vivo kaj la evoluo de lia animo. Ankaŭ tio ne estis ĉiutaga.

Urbinfano li estis kaj jam la cirkonstancoj de lia naskiĝo simbolis kaj eble determinis lian vivovojon. Li naskiĝas en malsanulejo por malriĉuloj, kie lia patro estas

kuracisto. La ĝemoj kaj suferoj de mizeruloj ŝvebas ĉirkaŭ la lulilo de la estonta poeto, kiun neniu superos pri la kunsento al la mizeruloj kaj malriĉuloj. Kiel studento li vivas en la plej granda mizero, sed la mondo de la libroj lin plene kontentigas. Eble plej forte influas lin la fantoma fantazio de A. T. Hoffmann. Dudek kvar jarojn li havas, kiam li forlasas la inĝenieran profesion kaj dediĉas sin al la unua romano. *La malriĉuloj*, rakonto pri senplenuma amo de grizulo, rikoltas eksterordinaran sukceson kaj — mallaŭdojn, sed ĉiokaze sensacion. Tamen Dostojevskij ne riĉiĝas, eĉ restas longtempe bohemo, kaj, laŭ tiu modelo, mizerulo. En 1848. li multe okupiĝas kaj diskutas pri la socialismo, al kiu li pretendas por Ruslando specialan sencon, devenintan el la tieaj tradicioj. — Strange! — ĉu ne tiu ĉi principo komencas pli kaj pli graviĝi en la vivo de tiu moderna Ruslando, kie Dostojevskij ne apartenas al la tro dorlotitaj nomoj. Tiu ĉi interesiĝo pri socialismo preskaŭ estis pripagita per lia vivo. Li kaj la aliaj «konspirantoj» estis kondamnitaj je morto. Oni gvidis ilin al la ekzekutejo, donis al ili la krucifikson kisi, surmetis al ili la mortveston kaj — en la lasta minuto alvenis la amnestio de la caro, t. e. okjara punlaboro en Siberio. La konsekvencojn de tiuj minutoj la tuta posta vivo de Dostojevskij ne povis forviŝi. Sekvas epilepsiaj atakoj kaj skua transformiĝo de la

certa, ke li estos pli sana matene.

»Mi esperas tion,« ploris Perla, prenante la kondukilojn de la ĉevaloj.

Tiam la kuracisto helpis Hektoron restarigi kaj kondukis lin hejmen. Feliĉe, Hektoro iris sen kontraŭstaro. Kiam ili alvenis hejmen, la doktoro ordonis al sia fratino prepari liton por li.

Enfaldinte Hektoron en la liton preskaŭ kiel patrino enlitiĝas infanon, Karlo donis al li morfipilolon kaj sidigis apud la lito. Baldaŭ Hektoro estis ronkanta kiel brua segilo.

La sekvantan tagon matene, kiam la kuracisto vekigis, Hektoro ankoraŭ dormis. Kviete Karlo ellitiĝis kaj vestis sin, sed dume ankaŭ Hektoro vekigis, ellitiĝis rapide kaj komencis furiozi.

»Tondro kaj Fulmo!« li kriegis »Kie mi estas? Mi devas iri al mia studejo tuj por kompletigi tiun teatraĵon.«

En tiu momento Perla eniris en la ĉambron kaj vidante Hektoron deliri, ŝi kriegis:

»Hektoro! pri kio vi parolas?«

»Hektoro, Hektoro!« li rediris kolere, »Fraŭlino, ne nomu min Hektoro, mi volas, ke vi komprenu, ke mi estas Sinjoro William Shakespeare.«

La juna doktoro rapidis apud sian fratino kaj flustris al ŝi:

»Telefonu al D-ro Ferbarbo tuj, kaj ordonu lin veni tien ĉi tuj, diru al li ke estas urĝe.«

Post kvin aŭ dek minutoj D-ro Ferbarbo, maljuna cerbospecialisto, eniris en la ĉambron, en kiu Karlo gardis la frenezulon. Post duono da horo, ekzameninte Hektoron zorge, la amika kuracisto kun la griza hararo asertis, ke Hektoro estas tre cerbomalsana. Tial li konsilis, ke estus pli bone por Hektoro, se li estus fermita en la provincan frenezulejon nuntempe.

Tiu aserto ŝokis Perlان treege, sed spite tiun Hektoro estis transmovita al komforta malgranda karceron en la frenezulejo. Li batalis kiel bovo, kiam li alvenis tien; li

ne volis resti tie, sed post kiam Karlo kredigis al li, ke tio estas lia nova studejo, li ŝajnis kontenta. Li diris, ke li deziras sian skribmaŝinon.

Pro tio, D-ro Jordano demandis la gardiston ĉu estus permeseble alporti skribmaŝinon al la karceron. Feliĉe por Shakespeare, la gardisto donis permeson, kaj post unu horo la kuracisto realvenis kun la skribmaŝino de Shakespeare kaj abunda papero. Tio plaĉis al Shakespeare, tuj li komencis marteli la klavojn kiel knabeto, kiu ne povas skribi aŭ legi. Tiamaniere la aliaj lin forlasis.

Je la dua mateno, kiam Hektoro estis en la frenezulejo, D-ro Ferbarbo, la oficiala kuracisto de la hospitalo, denove vizitis Hektoron.

»Bonan matenon, Sinjoro Shakespeare. Kiel vi fartas hodiaŭ?«

»Shakespeare? — Shakespeare? Aŭskultu, maljuna buteo, mi ne estas Shakespeare, mi estas Edgar Allan Poe,« li grumblis al la kuracisto turnante sian atenton de la skribmaŝino, sur kiu li estis brue frapetanta.

»Bonvolu senkulpigi min, Sinjoro Poe,« petis D-ro Ferbarbo.

»Certe, certe mia amiko,« respondis Poe per tre milda tono.

»Ĉu vi estas okupata, Sinjoro Poe?«

»Ho, ne tre,« respondis Poe, »eble vi memoras, ke proksimume antaŭ cent jaroj mi verkis poemon, kion mi nomis La Korvo.«

»Jes, jes.«

»Jen mia kara amiko, nun mi skribas poemon kion mi nomas, La Frugilego.«

D-ro Ferbarbo rigardadis al la papero sur la skribmaŝino trans la ŝultro de Poe kaj vidis, ke tio estis vere, kion la frenezulo faris. Sed malfeliĉe »La Frugilego« estas tro malpura por esti presita tie ĉi.

La tagon post tiu, kiam la kuracisto lin vizitis, Hektoro kredis sin mem esti Victor Hugo; je aliaj tempoj li estis iu alia, kaj tiamaniere li pensis, ke li estas alia ĉiudu-

facilanima junulo: humiliĝo kaj larva kunsento. Glitveturiloj portas ilin al Siberio. Kvardek-grada malvarmo. »... Ni haltis ĉe la limo de Eŭropo kaj Azio, antaŭ ni Siberio kaj la mistera estonto, malantaŭ ni nia tuta pasinto; estis ege malgaje; mi eklarmis.« Nun: sesjara sufero en malpuro, inter ne-homajj cirkonstancoj, kiun mildigas nur la denervigo antaŭ la epilepsiaj atakoj, kaj la hospitalaj tagoj, — kaj la minado en la profundo de la mizeraj animoj. »Eĉ inter la murdintoj mi trovis homojn« — li skribas. »Mian tempon mi ne pasigis vane.« Nun ankoraŭ du pli liberaj jaroj en Siberio, en duonprimitiva urbo, kie lin konkeras amo kaj feliĉa amika rilato kaj la revivigo de la eblo legi, legi, rekompletigi sian kulturon, kio ne estis farebla en la kruela vivo de la punbarko. Kaj li eklaboras: lia plej grava verko el tiu periodo estas la »Notoj el la domo de mortintoj«, (memoroj el la pundo), sankta verko pri la homaj suferoj, misero, nigraj bildoj sur griza fono kun la varico de l' Infero, kien kurtuŝe versigas foje-foje maldika radio de la dia sunlumo. Fine en 1857 li edziĝas al la jam delonge amata virino, en 1859 li povas reveni al Petersburgo. Lia edzino mortas, li havas, pro familiaj kaŭzoj ŝuldojn, kiuj lin sufokadas.

Liaj nervoj ruiniĝas. Nun sekvas elprovo de ruletŝanĝoj: la sekvo, kompreneble, estas financa bankroto,

tage. Sed ĉiam, kiam li ŝanĝis sian nomon, li adoptis la nomon de famkonata aŭtoro aŭ poeto.

D-ro Jordano vizitis Hektoron ĉiutage, Perla neniam venis al la frenezulejo. Si diris al sia frato, ke ŝi volas memori Hektoron tia, kia li estis antaŭ ol li cerbomalsaniĝis.

Iun posttagmezon, post kiam Hektoro pasigis ses semajnojn en la frenezulejo, li donis al Karlo du manuskriptojn, unu estis nomita, »Sub la flina Maro,« kaj la alia, »La Kruco sur la Plafono.«

»Jen mia amiko, tie ĉi estas du kompletaj romanoj, ekspedigu ilin tuj al la eldonejo, «li diris triumfe.

»La deziro de via moŝto estas tiel bone kiel plenumita, mia mastro,« la juna kuracisto certigis lin, klinante sin humile antaŭ la verkisto, kaj foriris antaŭ ol iu persono vidis lin.

Lia moŝto, la idioto ŝajnis tre plaĉita de tiu ĉi komplezo.

Post du semajnoj la sekvanta artikolo aperis en preskaŭ ĉiuj el la dimanĉaj gazetoj en la lando.

FRENEZULO KIU VERKAS KIEL MAJSTRO

Hektoro Loreko, dudek-kvarjara, paciento de la hospitalo por cerbomalsanuloj en Detroit Lakes, Minnesota ĵus kompletigis du misterajn romanojn; unu estas titolita »Sub la flina Maro« kaj alia, »La Kruco sur la Plafono.«

Tiuj ĉi rakontoj estis juĝitaj de kelkaj el la plej bonaj recenzistoj en Usono, kaj ĉiu akklamis ilin mirindaj. La zorganto de tiu ĉi paciento vendis la du verkojn al eldonisto; ili estos aĉetablaj en la merkato post proksimume du semajnoj. Se la leganto estas interesata de vere bona mistero, li aŭ ŝi ne devus elasi tiujn ĉi du romanojn, ili estas ekscitoplenaj ĉiutage.

Loreko, la freneza aŭtoro, imagas sin iu alia ĉiutage: Shakespeare, Poe, Hugo, Cervantes, Dumas ktp. Li estas freneza nur de la 1-a de Julio, kiam li falis de ĉevalo kaj vundis sian kapon; de tiu tempo lia ĉefa okupo estas skribado. Li estas

sed literatura gajno: la »taglibro de ludisto.« Sed ĉio ĉi ĝis nun estas nenio: nun naskiĝas ideo pri giganta verko, pri la plej konsterna analiza romano: »Kulpo kaj puno«. Ne eble skribi nur kelkajn vortojn pri tiu ĉi libro, same kiel ne pri la aliaj grandaj verkoj, kies ĉiu meritas kaj ricevis apartajn studojn; fakte, se ni nun volas daŭrigi la biografion de Dostojevskij, ni devas konstati, ke la virakonto fluas nun en grandiozajn verkojn, — pensu nur pri la »Idioto, Fratoj Karamozoff« ktp., ĝis la morto en 1881. forpuŝas el lia mano la plumon, en tuberkulozo mortas la plej konscienca, demone inspirita verkisto de la malfeliĉuloj, kiuj feliĉiĝos. Kredis tion, kun profunda kredo, la sankta poeto de la homa animo: Teodoro Mihajloviĉ Dostojevskij.

»Se mi iam estis feliĉa, mi estis tia ne en la ebrigaĝaj minutoj de mia unua sukceso, sed kiam ankoraŭ al neniu mi montris mian manuskripton... tiam mi ankoraŭ vivis kune kun miaj figuroj, kiujn mi mem kreis... mi amis ilin, kun ili ĝojis, malgajis, eĉ kelkfoje mi ploris kun ili en sincera doloro.«

Kaj la plej granda mistero de la Dostojevskija arto, estas, ke la tutan turmentan plezuron de la kreo oni travivas dum la legado de tiuj neforgeseblaj romanoj.

F. Sz.

diplomito de la Karolo-Kolegio en Waukesha, Wisconsin.

Kuracistoj opinias, ke la cerbomalsaneco de la junulo estas nur pasema.

Nenio bezonas esti dirita pri tio, kiel avide la homoj aĉetis la librojn; la eldonejo apenaŭ povis plenumi la mendojn sufiĉe rapide. Multaj grandaj poŝtmandatoj alvenis en la poŝtejo por Hektoro; ilin D-ro Jordano deponis en la bankon en la nomo de Hektoro. Fine Hektoro famiĝis kaj riĉiĝis; estis domaĝe, ke li estis freneza.

Iun tagon, baldaŭ post kiam la noveloj aperis en la merkato, la gardisto de la frenezulejo marŝis en la ĝardeno de la hospitalo. Subite li vidis grupon da pacientoj, kiuj estis starantaj ĉirkaŭ kaŝtanarbo: ili rigardis ion sur la arbo. Lomete alarmita, la gardisto rapidis apud la grupon por vidi, kio la intereso estas. Kiam li alvenis, li vidis, ke tie sidas Hektoro sur malalta branĉo, suĉante sian dikfingron kaj zumante la arion de »La Maljuna Malglata Kruco.«

»He, Shakespeare!« kriis la gardisto, »malsupreniru, antaŭ ol vi falos kaj vin vundos.«

»Aŭskultu, filo de kurbkrura kamelo,« rediris Hektoro kolere, »mi ne estas Shakespeare, mi estas Tarzan kaj mi estas ironta al Opar.«

»Kiu ajn vi estas, mi diras denove, malsupreniru,« ordonis la gardisto severe.

»Ho! ne ĉagrenigu pri mi, mi estis nutrita de simiino sur arbo. Rigardu.«

Parolinte la lastan vorton, Hektoro klopodis salti al branĉo de proksima arbo, sed maltrafis kaj falis al la tero kun la kapo antaŭen.

»Idioto, mi scis, ke tiu okazos; se via kolo estas rompita, mi ricevos mallaŭdon.«

Sed tuj Hektoro starigis, frotis sian kapon energie per la mano, kaj diris:

»Ho ve! tio ja estis severa frapo,« tiam li rigardis la ĉirkaŭaĝon kaj verŝajne tre surprizita, li demandis: »Nu, kie estas Karlo, mi volas diri D-ro Jordano kaj Perla Jordano? Kie mi estas?«

Tiel konfuzita estis la gardisto, ke li ne povis respondi Hektoron.

EKZILITO

— L. N. Newell —

La vagonaro al Medina el-Sughajarah senfine ruliĝadis tra la varmego. Ĝi estis trapasanta dezerton, ĉar Medina el-Sughajarah kuŝas for de la Nila valo, en la nord-orienta angulo de Egiptujo; tamen, tiu dezerto ne estis la dunhava, ora dezerto de la romantikaj verkistoj, kiun oni malofte renkontas; sed roka, kruela, grize mortega infero, kiu rebatas la lumon kaj varmon al la okuloj, kaj sendas nubojn el polvo tra la fenestroj de la vagono.

Mi forjetis tedite la *Bourse Egyptine* kaj la *Egyptian Gazette*, kiujn mi estis aĉetinta en Kairo, kaj rigardis enue miajn malpurajn manojn kaj vestojn: sur ĉio polvo karba kaj polvo dezerta; eĉ inter la dentoj grincis gruzeretoj. Mi malespere ŝvitadis, kaj deziregis, ke mi ne estu promesinta viziti la esperantistojn en Medina el-Sughajarah. Kelkfoje oni ja tro oferas por la movado. Pli utile sidi hejme kaj verki entuziasmigajn artikolojn, ol fari entuziasmigajn paroladojn en apenaŭ konataj urbetoj. Mi antaŭsuferis de la nervostreĉo kaj laceco, terure oftaj en Egiptujo, kiujn kaŭzas konversado en Ĵingyo, kiun la kunparolanto nur duone komprenas.

La dua horo, la tria: kaj mi soifegas, sed ne kuragas mendi la dolĉegan gasakvon, kiun oni ĉie vendas en Egiptujo. La kvara, kaj ankoraŭ ni ruladas, senfine, seninterrompe, tra tiu griza forno. Je la kvina, subite, ni ekvidas grizan urbon, super kies tegmentoj kelkaj palmoj senespere sin klinas. Polvoza urbetoto, kun domoj duetaĝaj el grizaj kotbrikaj, kun stratoj mallarĝaj kaj, unuavide, senbutikaj. La urbetoto aspektas nefinita: ofte la dua etaĝo de la domo estas nekompeta, ĉar eluziĝis la mono antaŭ kompletigo, kaj ankaŭ la traboj elstarantaj el la plataj tegmentoj kaj muroj ŝajnigas domojn ankoraŭ konstruatajn.

Sur la perono, kie fine haltis la vagonaro, troviĝis nur du homoj portantaj eŭropajn vestojn kun fezo; mi prave supozis, ke ili estas miaj samideanoj. Unu estis granda viro, iom dika eĉ l' talio, kun ridetanta vizaĝo,

grizaj haroj, kaj malgrandaj, melankoliaj okuloj. La alia estis malgranda, kun hakila vizaĝo, blinda en unu okulo pro oftalmio, kiel teruraj miloj da egiptoj.

La grandulo sin prezentis: Ghobrial Nesim, prezidanto de la grupo. »Ni havas granda honoro de vin akcepti en nia urbo, sinjoro. Vi estas tre ĝentila.« La dua salutis min arablingve, kaj mi respondis per la konvencia »Sajdah! Ezajak?... El-Hamdulillah! Saluton! Kiel vi?... Dank' al Dio!«

Laŭ la kutimo de tiaj okazoj, mi tramarsiis la stratojn kun ili, provante samtempe aŭskulti ilin, konvene respondi, diveni laŭ kiu vojo ni devas nin turni, kaj eviti la kamelojn kaj azenojn senĝene paŝantajn meze de l' homamaso. La stratoj estas senpavimaj, faritaj el polvo kaj sablo, kaj ĉiu domano kutimas ĵeti siajn rubaĵojn kaj malpurajn akvojn sur la vojon. Plej bone estas marŝi meze de l' vojo, ĉar tie estas malpli da koto, kaj oni malpli riskas ricevi likvaĵojn sur la kapon.

Fine ni atingis la domon de s-ro Ghobrial; granda domo, luksa laŭ egipta gusto, kun muroj blue kaj rozkoloro farbitaj. Interne estis malvarmete, kaj kun longa suspiro, ĝentile kaŝita, mi ekdis sur blanka kanapo.

Nun mi ekvidis denove, kaj kiel ĉiam, ĝuis la egiptan gastamon. Vokinte servistojn, mia gastiganto insistis mem doni al mi kafon, limonadon, kukojn kaj biskvitojn. Li ripetis plurfoje la ĝentilajn salutojn, sen kiuj neniu — eĉ ne plej intimaj amikoj — renkontiĝas en Egiptujo: Kiel vi? Dank' al Dio! Vi honoras nin. Estu bonvena! Ĉu vi sanas? Ĉi tiu estas ĝojega tago por mi. Dank' al Dio!

Li parolis en ne tre korekta, sed flua Esperanto; kio mirigis min, ĉar Esperanto estas lingvo tre fremda por la arablingvanoj, kaj Ghobrial ne tre bone komprenis la anglan kaj francan lingvojn. Mi eksciis poste, ke nur lia emocia alrokiĝo al Esperanto ebligis tiun fluecon.

Dum ni surface paroladis, mi povis lin pli bone

»Respondu miajn demandojn,« ordonis Hektoro, »Kie estas mia ĉevalo? Kiel okazis, ke jam lumiĝis? Estis ĵus vespero.«

Guste tiam D-ro Jordano alvenis en sia aŭtomobilo. Li baldaŭ ektrovis, ke lia amiko denove cerbosaniĝis kaj ĝojis treege pro tio, eĉ se li devis respondi multajn demandojn por klarigi al Hektoro, kie li estis dum la lastaj du monatoj kaj kial.

Ĉar la gardisto ne havis permeson liberigi pacienton, D-ro Ferbarbo estis alvokita. Post unu horo Hektoro Loreko, kun sia skribaĵo en la mano, eniris en la aŭtomobilon de D-ro Jordano kun la juna kuracisto, por returi al la urbo. Li estis liberigita de D-ro Ferbarbo, kiu asertis, ke li denove estas tute cerbosana.

Veturante laŭlonge la vojon kun Karlo, Hektoro demandis: »Kion diras Perla, kiam vi parolas pri mi?«

»Nur malmulton, ŝi ŝajnas tre malgaja pro vi. Mi pensas, ke ŝi amas vin; ŝi certe estos feliĉa, ke vi denove cerbosaniĝis, ha, ha!«

Hektoro nur ridetis.

Alveninte antaŭ la dometon de Karlo kaj Perla, Hektoro diris: »Eniru unue kaj rakontu al Perla la novaĵon, mi eniros poste.«

La kuracisto obeis, ne demandinte kial; li eniris en la dometon kaj trovis sian fratinton en la kuirejo.

»Nu, Perla,« li diris, »mi havas bonan novaĵon por vi. Hektoro denove cerbosaniĝis.«

»Bone, bone!« ekkriis Perla, »Kie li estas?«

Guste en tiu momento, la plej terurega rido, kiun homa gorgo iam povis elfluigi, estis aŭdita. La sono venis de la saloneto, en kiun Hektoro kaŝe eniris piedpinte.

»Karlo!« kriis Perla time.

»Ne timu, mi ne estas danĝera,« ekparolis Hektoro promenanten en la kuirejon, »mi nur tiel multe alkitimigis al la freneza agado, ke nun mi pensas, ke tio estas ŝercaĵo.«

»Kion vi volas diri? Freneza agado?« demandis Perla.

»Ha! ha! Tio estis nur lertajo por atingi publikecon. Mi diris al vi, ke mi famiĝos, kaj mi faris, sed nur frenezulo povas fari tion.«

»Kanajlo, kion pensas la homoj, se ili aŭdas tion?« demandis Perla ridetante.

»Lasu ilin pensi, kion ajn ili volos, mi havas, kion mi volis...«

Elirante el la ĉambro, Karlo diris:

»Li ne estas tiel freneza.«

Solece en la ĉambro kun Perla, Hektoro ĉirkaŭprenis sin kaj demandis:

»Nu Perla, ĉu vi ŝanĝis vian opinion pri mi?«

»Jes — Shakespeare,« diris Perla ruĝigante iomete.

»Mark Twain, mia karulino, Mark Twain.«

Kaj tiam li sigelis sian promeson per kiso.

ekkoni. Li havis proksimume kvindek jarojn, sed estis energia kaj juneca. De liaj trajtoj radiis bonhumoro, digno, bonvolo al la homoj; li parolis kun la kvietita sagaco de tiu, kiu vidis malmulton, sed sian malmulton vidis klare. Mi sentis min komforta kun li, senembarasa; nure, de tempo al tempo, min maltrankviligis ia distreco, ia malgaja ombro, kiu forviŝis la rideton de lia vizaĝo.

Mi scias per lia nomo, ke li estas kopto — unu el tiuj kristanoj flosantaj sur maro mahometana. Krome, oni diris al mi en Kairo, ke antaŭ kelkaj jaroj li estis riĉulo, kiu subite malriĉiĝis pro la senvalorigo de koton. Ĝion li perdis, kampojn, kotonon, domon; lian domon, en kiu ni sidis, aĉetis lia frato, kaj permesis al li ankoraŭ okupi ĝin. Li laboris en publik-serva kompanio por salajro negranda. Da tiaj historioj oni aŭdas milojn en Egiptujo post la komenco de la krizo.

Li parolis al mi kun granda respekto, kvazaŭ al superulo. Kiam mi unue rilatis kun egiptoj, ĝin respekto ŝokis min, kaj mi volis ĝin eviti. Ĝi ĉiam metis baron inter mi kaj ili. Ĝin forigi estis tamen neeble, kaj al ĝi mi al-kutimiĝis, kiel al neevitebla ĝenaĵo. Ĝin montras la egiptoj al ĉiuj eŭropanoj, kaj speciale al instruistoj, kia mi, ĉar ĉie en la oriento la klereco estas tre honorata. Tiun ermon plifortigis ĉi-okaze la faktoj, ke mi estas konata esperantisto, kaj ke Ghobrial estas kopto, kies esperoj dependas parte de la angloj en Egiptujo.

Tiu sinteno de la egiptoj ĉiam ŝajnis al mi iom patosa; neca flatado de malfortuloj al venkita raso. Ĉe Ghobrial, tiu granda, digna, simpla homo, ĝi ŝajnis al mi pli ol ordinare — kion mi diru? »Kompataĝa« estas insulta vorto. Ĉu »malferiĝa«?

Baldaŭ li prezentis min al sia familio: edzino ankoraŭ bela, kiu parolis la francan lingvon flue, kiel ĉiuj egiptinoj de bona familio; filino dudekjara, forta, bela kaj ridema; kaj dekkvinjara filo, tro grasa sed inteligenta lerneano. Ghobrial havis ankoraŭ du filojn, unu en Londono, kiu studas la medicinon, kaj unu en Kairo, kiu studas la juron.

La du virinoj estis interesaj; en malgranda urbo, perdita meze de la polvaj kampoj kaj la dezerto, ili parolis gracie la francan lingvon, interesiĝis pri la franca literaturo, eŭropa muziko, poezio; ili neniam havis okazon preparoli sian intereson kun aliaj, sed tamen ili tenis viva tion, kion ili lernis, patrino kaj filino, en la jezuita lernejo de Aleksandrio. Tiaj virinoj troviĝas ankaŭ en mahometanaj hejmoj, sed la fremdulo neniam povas ilin alparoli; nur la koptaj virinoj renkontas aliajn virojn ol la edzo, fratoj, patro.

Baldaŭ estis tempo iri al la grupo, por renkonti la esperantistojn. Kolektiĝis, en tute senornama ĉambro, proksimume deko da viroj (tiajn aferojn neniam partoprenas la virinoj), inter kiuj oni prezentis al mi la redaktoron de la loka ĵurnalo. Mi tuj sentis, ke mi pli utile parolus en la angla lingvo, ĉar ili ĉiuj murmure interkonsilis al mia Esperanta saluto, aŭ diris ion rekte en la araba lingvo. Preskaŭ ĉiu edukita egipto pli-malpli komprenas la anglan lingvon, kvankam malmultaj kapablas flue paroli. Tamen, konata esperantisto estas ja konata esperantisto, kaj li devas pruvi, ke la lingvo estas parolebla. Mi sekrete dankis al la Cseh-kursoj, ke ili instruis al mi paroli malrapide kaj simple.

Per la ruzoj, kiujn scias ĉiu propagandisto, mi sukcesis fari paroladon, kiu ĉiu komprenis — eĉ la ne-esperantistoj; mi manpremis ĉiujn, rezistis per la helpo de Ghobrial ĉiun inviton al la hejmo de la ĉestintoj, kaj reiris kun li al lia hejmo, kie nin atendis la vespermanĝo.

Ha, tiuj egiptaj mangoj, sub kiuj la tablo preskaŭ krevas! Mi estis nenion manginta jam de la mateno, kaj

mi ne malhonoris min eĉ antaŭ la bankedo, kiun s-ino Nesim preparis por mi; ĉiam escepte de moloheja, glutena supajo el speco de alteo (mi kredas), kiun eĉ pro ĝentileco mi ne povis mangi. Ghobrial, kiel familipatro kaj gastiganto, elektis la plej bonajn pecojn de ĉio por ilin meti sur mian teleron; kaj se hazarde li trovis bonan viandopeĉon sur sia propra telero, li tuj ĝin forkis kaj donis sur mian.

Post la mango, ni iris sur la tegmenton, por ĝui la freŝan venteton, kiu nepre beligas la egiptan nokton kaj por babili komforte. Tie ĉi, per trankvila voĉo, kun manoj falditaj sur la ventro, li komencis paroli pri egipta politiko, transiris al la sorto de la koptoj sub mahometana registaro, de tio ĉi al la araba literaturo, kaj al Esperanto. Dum li parolis, mi komencis kompreni la kaŭzon de tiuj ombroj, kiujn pli frue mi rimarkis sur lia vizaĝo.

»Aŭskultu, kara sinjoro Mansell, ni havas kaj ĉiam havas mahometan registaron. Ili neniam amis nin. En la komenco ili promesis respekti nian religion, sed samtempe punfrapis ĉiun, kiu ne ŝanĝis sian religion. Tiam ili kutimis havi plurajn edzinojn, ni — nur unu; kaj nun estas dekkvin mahometanoj por ĉiu kopto. Nun estas pli bone; antaŭ la lego ni estas egalaj; sed ĉu iam kopto atingas la plej altajn oficojn?»

»Nu, vere; sed tio ŝanĝigos, kiam la Nacia Partio formos la registaron; finfine, ĝi bezonas la apogon de la kristanoj, kaj la vic-ĉefo de la Partio ja estas kopto, ĉu ne?»

»Sinjoro Mansell, mi marŝas ĉiutage sur la strato, kaj ĉiu salutas min ĝentile, ĉar ĉiu min konas en tiu ĉi urbo. Salutas ĝentile ankaŭ la mahometanoj. Sed en siaj koroj ili pensas, »El-kelb el-nasrani! Kristana hundo!« Eble, ili respektos nin estonte, sed ĉu mi povos forgesi, ke ili forprenis nian landon? Ni, la koptoj, estas la filoj de la antikvaj egiptoj, kaj ni estas ekzilitoj en nia propra patrujo.»

Mi rimarkis, ke li parolas kun ia subpremita amareco, sen ekscito, pri temo longe primedita. Kvazaŭ li serĉis longe iun, neutralulon, al kiu li povas rakonti la suferon de sia popolo. Devide la koptoj estas suspektemaj homoj, kiuj malofte kuragaŝas paroli malkaŝe.

»Sinjoro, li daŭrigis, »ĉu vi komprenas, ke mi eĉ ne havas lingvon? Ili devigis nin paroli ilian lingvon, kaj ni forgesis la koptan lingvon. Ĉu mi estas arabo? Kial mi parolu fremdan lingvon altruditane? Ĉu vi komprenas, ke mi ne volas paroli la lingvon de niaj subpremantoj? Sed kian alian lingvon mi havas? Iam mi pensis lerni la koptan lingvon, sed al kiu mi povus paroli? Eĉ multaj el niaj pastroj komprenas ĝin nur sufiĉe por legi la Biblion.»

Li silentis momente, sidante en la mallumo senmove. Super ni brilis la senombraj steloj de egipta nokto; de apuda strato aŭdiĝis el kafeja radioaparato araba muziko, en gamoj, al kiuj nia eŭropa orelo ankoraŭ ne tute alkutimiĝis... Mi ekkomprenis la konvertigon de Ghobrial al Esperanto, kaj denove miris pli la diverso de la kialoj, kiuj verbas al ni adeptojn.

»Vi estas la unua alilanda esperantisto, al kiu mi iam parolis. Vi donis al mi tre grandan gojon, ĉar mi vidas, ke la esperantistoj ne estas samaj, kiel la aliaj. Vi ne malestimas nin. Vi aŭskultas min; vi komprenas miajn ĝenojn. Vi ne estas fiera. Vi komprenas, kiom kore kaj profunde mi danĉis al mia Dio, ke li kondukis min al Esperanto. Sinjoro, Esperanto estas la lingvo de ĉiuj homoj, ĝi ne estas la lingvo de subpremantoj. Sinjoro Mansell, mi volas paroli ĉiam nur Esperanton, mi volas forgesi ĉiujn aliajn lingvojn. Mi havas korespondantojn en multaj landoj, ili skribas al mi regule, kaj mi kon-

servis ĉiujn iliajn respondojn. Ili estas miaj fratoj, pli ol miaj samlandanoj.

Kion mi povus respondi? Kiel anglo, kiel esperantisto, mi ne volis aprobi plendojn kontraŭ la registaro; mia rolo devis resti severe neŭtrala. Aliflanke, ĉu mi povus piedpremi liajn karajn iluziojn? Egipto ne povas koncepti la ŝtormojn facile vektajn de patriotismo, de ekonomia konkurenco, de nacia honoro, de blinda rasa fiereco, ŝtormojn, kiuj povas detruu la pacan laboron de la esperantistoj en unu sola nokto.

Nu, mi gurdis la kutimajn banalaĵojn de propagandistoj pri progreso, internacia amikeco, registara subteno, universalaj kongresoj. Sajne li estis kontenta; eble io en mia voĉo sciigis al li, ke mi trovas lin simpatia, ke mi konsentas kun li.

Kaj efektive mi konsentis kun li, spite mian scion, ke li troigas, ke lerni Esperanton por ne paroli sian gepatran lingvon (la araba lingvo estas jam vere la gepatra lingvo de ĉiu kopto), tio estas fantaziaĵo, kihilota absurdaĵo. Vere, ke en Egiptujo ankoraŭ estas restaĵoj de religia fanatikeco, ke la mahometanoj ankoraŭ malestimas la koptojn kaj malofte difinas al ili bonajn postenojn en oficejoj, ministerioj, laborejoj. Tamen, sub la konstanta premo de okcidentaj kulturo, inventaĵoj, scienco, la fanatikuloj perdas grade sian influon; kaj mi sciis, ke miaj mahometanaj amikoj estas tiom pacamaj kaj bonvolaj, kiom la koptaj.

Sed mi sciis ankaŭ, ke estus neeble komprenigi al Ghobrial la absurdecon de lia deziro; ke se mi rezonadus kun li, provus pliracigi lian vidpunkton, mi nur vundus lin profunde — kaj senutile; kaj eble perdis ŝatatan amikon.

Anstataŭe, mi diris, ke per Esperanto mi trovis miajn plej bonajn amikojn en fremdaj landoj; ke mi estas feliĉa, parolante nian lingvon, ĉar mi sentas min egala kun ĉiu homo; ke Esperanto instruas respekti egale la homojn de ĉiu raso kaj ĉiu religio; ke esperantistoj estas ĉie fratoj. Banalaĵoj nur parte veraj; sed kion alian mi povus diri?

Li dankis min, kvazaŭ mi estus montrinta al li grandan favoron; kaj ni iris al niaj litoj, ĉar li disponigis al mi la liton de la filo, kiu studis en Kairo.

La proksiman matenon li promeniĝis min «por saluti kelkajn amikojn, kaj por viziti la redakcejon de la loka gazeto». Marŝante laŭ la strato, li ĉiunmomente ŝvingis la manon al la fezo, kun basvoĉa «*Saidah!*» aŭ «*Salam' alejkum!*», kaj mi konstatis, ke malgraŭ sia malriĉiĝo, li ankoraŭ estas unu el la plej konataj enloĝantoj de la urbo, kaj respektata. Tamen, ni devis viziti strange graadlan nombron da oficejoj, butiketoj, domoj, sen tre klara celo. Mi baldaŭ komprenis la kialon. Ghobrial sentis la bezonon, pravi al si kaj al la mondo, ke spite sian ruinigon, spite sian rason aŭ religion, li ankoraŭ estas influhava, grava. Nu, angla instruisto, kiu multe vojaĝis, kiu faras publikajn paroladojn kaj eĉ publikigas artikolojn en gazetoj, estas grava persono en tia vilaĝeca urbo, kaj liaj amikoj partoprenas lian gravecon. Mi do faris mian eblon por aspekti grava, dignoplena eminentulo, por komplezi al Ghobrial. Sed mi ĝojis, ke ne ĉestas alia anglo por priridi min.

Tiun posttagmezon mi foriris al Kairo. Ghobrial kaj lia filino akompanis min al la stacidomo, kaj en la lasta momento lia servisto alkuris kun korbo plena je figoj kaj mangoj, ĉar la fruktoj en Kairo ne egalas la fruktojn en Medina el-Sughajarah, kaj estas terure multkostaj, kaj se vi prenas ĉi tiujn, vi ne bezonos aĉeti dum kelkaj tagoj.

De tiam mi regule vidis Ghobrial du-trifoje en ĉiu

jaro, kiam la aferoj de lia kompanio venigis lin al Kairo. Ĉiam ĝentila, ĉiam fiero pri siaj korespondantoj, ĉiam plorige dankema, ĉar mi traktis lin, kiel unu eminentulo traktas alian. Li priparolis kun mi la aferojn de sia grupo, demandis konsilojn pri legajoj, priparolis politikajn aferojn; mi rimarkis, ke lia Esperanta parolado plibonigas.

Mi do estis tre interesita, kiam li anoncis, ke li aniĝis al la universala kongreso. Ĝi okazis tiun jaron en unu el la nordaj ĉefurboj; Stokholmo probable. Mi gratulis lin pri lia longa vojaĝo, la unua ekster la limoj de Egiptujo, kaj diris, ke de nun li estos eĉ pli granda vojaĝanto, ol lia filo, kiu studas en Londono. Mi ĝojis, ke li iros al kongreso; finfine, mi pensis, li estos en senrasa mondo, kie ĉiuj homoj ŝajnos egalaj; ĝi estos la plej mirinda, feliĉa sperto de lia vivo. Tamen, mi konstatis, en mi an dubon: Ghobrial estas tiom sensperta, senprotektita, fidema; malsimila al niaj gajaj, senzorgaj junuloj, aferemaj laborantoj, aŭ durkonkaj vegetaranoj, kontraŭtabakuloj, postmarkemuloj. Mi neklare tiuis pro li kontuzojn.

El la Kongreso li sendis al mi salutan postkarton, entuziasman, sed sen detaloj. Sekve, mi ĝojis, kiam postkarto el Medina el-Sughajarah anoncis, pli frue ol mi estis supozinta, ke li vizitos min post du-tri tagoj por priparoli la Kongreson.

Certe, kiam li alvenis, li estis plena je entuziasmo; tamen, mi kredis rimarki denove tiun melankolion en liaj okuloj. Sed pri tio li nenion konfesis.

«Sinjoro, mi dankas Dion pro mia sukcesa vojaĝo, kaj mi tre bedaŭras, ke vi ne povis min akompani. Mi parolis kun personoj el multaj landoj, kaj ili ĉiuj estis tre ĝentilaj. Mi havas dek novajn korespondantojn, el sep landoj. Unufoje, mi eĉ parolis kelkajn vortojn en publika kunveno, kaj ĉiuj aŭskultis min tre atente. La esperantistoj estas tre ĝentilaj homoj. Jes, nun mi revenis hejmen, kaj mi estas tre kontenta.»

«Sed kial vi revenis hejmen tiel frue? Mi pensis, ke vi intencas viziti Germanujon kaj Francujon dum unu-du semajnoj, antaŭ ol ekvojaĝi al Egiptujo.»

«Nu, jes, tion mi intencis, sed kion fari? Post la Kongreso mi vagadis sola kelkajn tagojn, sed baldaŭ mi ne plu povis elporti la solecon, mi terure soifis al mia hejmo, do mi revenis tuj.»

«Mi bedaŭras. Tamen, vi faris belan vojaĝon, kaj ekkonis multajn homojn, kaj vi kontaktis kun multaj nacioj. Ĉu vi bone komprenis ilin? Ĉu vi havas multajn novajn amikojn?»

«Jes, multajn.» li respondis, sed kun ia necertece en sia voĉo. «Hungaroj, svedoj, francoj, germanoj, multaj. Nure, la angloj ne havis tempon por paroli, mi ne povis amikiĝi kun ili.»

Mi aŭdis senkuragan tonon en lia voĉo; evidente lin trafis ia seniluziigo. Kaj li malbonŝance provis paroli al iuj ĝejunuloj rapindantaj al kabaredo aŭ dancejo? Ĉu li malprudente haltigis iun komitatano aŭ oficianon, kiu tute ne havis tempon por amuza babilado? Mi ne sciis, kaj ne utilis demandi: pro nenio ajn li volus konfesi al mi malĝentilajco, aŭ realan aŭ imagitan, flanke de anglo; li timus min insulti. Li kutimis en Egiptujo suprenrigardi al la angloj (miaj samnaciaj estas postulemaj pri tio), kun la rezulto, ke Ghobrial pli alte taksis la amikecon de angloj, ol tiun de ĉiu alia nacio.

Mi ankoraŭ renkontas lin ofte; li ĉiam laboras pri sia grupo, korespondas kun alilandanoj, esperas iri al alia kongreso; sed mi scias, ke li devas dolore blindigi sin pri la fakto, ke eĉ en la Esperantismo estas mankoj, ke eĉ la «kara lingvo» ne ĉiam, ne tute, fratigas la homojn.



OBSERVO

CE JOLÁN FÖLDES

Meze de oktobro, nova sensacio frapis la leganton en ĉiu hungara gazeto. La romankonkurso aranĝatan la unuan fojon de la agentejo Pinker en London kun partopreno de 14 grandaj libroeldonejoj en same tiom da ŝtatoj, kaj premiatan per 4000 funtoj sterlingaj, gajnis hungara verkisto. La sensacion ankoraŭ pligrigis, ke ĉiokaze virinon distingis la juĝantaro. Ankoraŭ vive mi memoras pri la romano de Ferenc Körmendi, la gajninto de la angla romankonkurso aŭtaŭ kelkaj jaroj, kaj ankaŭ pri tiu vigla interesiĝo, kiun tiu romano vekis ĉe la legantoj de «Literatura Mondo». Mi eksciivolis do en mia propra persono kaj en la nomo de L. M. pri la gajninto Jolán Földes, verkinto de la «Strato de la fiŝkaptanta kato». Mi alvokis ŝin per telefono. Agrabla virina voĉo akceptis mian interesiĝon kaj en senpera tono donis eblon por intervjuo.

Jolán Földes loĝas sur flanko de monteto, en strato pitoreska kaj iom malzorgita. El ĉi tiu loko ŝi havas belan panoramon sur la urbon kaj la urban vivon. Ĉu ŝi elektis la loĝejon ĉi tie, ĉar ŝi volas vidi la vivon de la urbo, aŭ ŝi vidas tiun vivon tiom akre, ĉar ŝi loĝas ĉi tie, mi ne scias, sed la romantika simpleco de ĉi tiu loko estas tre konforma al la figuro, loĝejo, meblaro kaj vortoj de la verkistino. En ŝia loĝejo mi ne vidis ankoraŭ la efikon de tiuj preskaŭ centmil dolaroj de ŝiaj atendeblaj honorarioj. Simpla, malplena antaŭĉambro, iom kalva granda ĉambro, kvarmetra libroŝranko kaj granda kuŝejo, kompletigitaj per kelkaj seĝoj kaj tablo — jen la tuta establo. Ĉe la eniro, la unua impresado estas, ke la loĝejo estas iom malafabla. La tuta establo karakterizas marliĉan, iom malordeman, tamen belaman loĝanton. Mi vidas malaltan, iom hirtharan virinon, unuavide kun tute modesta aspekto. Sed kiam ŝi ekparolas, ŝiaj okuloj ekvivis kaj strange altira inteligenteco radias el ili. La senpera voĉo, la delikataj gestoj atestas pri bone ekvilibrita homa vivo.

— Kaj kiam mi sidas vid-al-vide kun Jolán Földes, la propagandisto vekigas en mi. Mia unua demando do estas:

— Kion vi scias pri Esperanto?

— Se diri la veron, mi preskaŭ estas Esperantisto — diras la verkistino. — Nome, kiam mi estis universitatano (mankas al mi nur doktoriĝo ne farita por edziĝo: mi studis filologion kaj hodiaŭ mi flue parolas preskaŭ dekon da lingvoj), mia samklasano estis knabino nomata Balkányi, kiu estis fervorega esperantistino kaj instigis ankaŭ min al la lernado (jen do, mi pensis, tiu sorĉisto Balkányi eĉ ĉi tie antaŭis min!) kaj pro ŝia instigado mi fakte tralegis lernolibron de Esperanto aŭtaŭ dek jaroj. De tiam mi komprenas ĉiun Esperantan tekston. Foje Karinyth donis al mi tradukitan novelon, dirante ke mi certe ne komprenos. Kaj pro veto mi tradukis sen vortaro al li la tutan novelon. Ankaŭ nun mi kuraĝus veti, ke post diligenta studado de du semajnoj mi kapablus paroli tute flue kaj bone Esperanton.

(Nu, bone por mi — mi pensis. — Mia intenco de konverti trovis jam konvertitan animon. Ĉu veti aŭ ne veti? — tiel staras nun la demando. Sed mi vidas el ŝia certa memfido, ke en tia veto la perdinto estus nur mi. Prefere mi rezignas!)

— Ne, ne, — mi diras — prefere mi kredas vin. Ja ankaŭ Tolstoj diris proksimume la saman post studo

dum du horoj. Sed kio estas via opinio pri Esperanto el filologia vidpunkto?

— Al mi ne plaĉas nur tio, ke en Esperanto mankas la diversaj genroj kaj ke ĉiu substantivo finiĝas per -o, ĉiu adjektivo per -a. Sed cetera la konstruon de la lingvo mi opinias tre sprita.

— Sed ĉu vi scias, sinjorino, ke unu el la multaj celoj de nia lingvo estas: doni al la unulingvuloj proksimigantan helplingvon?

— Jes, certe. En mia nun premiita romano la ĉefrolantoj ja estas tiaj «ekonomiaj emigrantoj», por kiuj Esperanto estis siatempe savo en Parizo. Tiuj homoj tre multe suferis en la fremda medio kaj nur tiuj kapablus iel enhejmiĝi tie, kiuj sciis Esperanton. Eble interesas vin, ke iam en Parizo mi farigis kelkajn vestaĵojn per hungara knabino perdinta unu krucon. En ŝia kripileco, la sola konsolo estis la societo de esperantistoj. Ŝi donacis al tiu societo sian superfluan energion, ĉiun eblan monŝparon, de ĝi ŝi ricevis la minimume necesan vivigojn, tiujn plezurojn, kiujn aliaj belaj kaj sanaj knabinoj ricevis de siaj amatoj. Sen tio eble eĉ vivi ŝi ne estus povinta en la fremda medio. Cetera mi ne scias multe pri Esperanto, mi ne interesiĝis tre funde pri la movado, kvankam kiel verkisto mi ofte aŭdis pri ĝi.

Vere konsternaj estis por mi ĉi tiuj vortoj. Mi memoris pri la nova originala romano de Emba, en kiu la ĉefrolon havas ĝuste knabino de la supra tipo. Tiu ĉi virino ekvidas per unu ekrigardo, kion ofte ankaŭ ni, movadanoj, ne vidas tiom klare. Kaj nun mi jam estis absolute certa pri tio, ke la grandan premion ricevis verko ne senmerita.

— Kaj kion vi scias pri nia literaturo? Ĉu vi opinias ĝin vivkapabla?

— Se mi konas ion el la lingvo, tio estas ĝuste ĝia literaturo, fragmentoj el ĝi. Krom la fratino de Balkányi estis ĝuste verkistoj, kiuj parolis al mi pri Esperanto. Mi pensas, pli multe mi ne devas diri al vi.

— Kion vi dirus pri la Esperanta eldono de via romano?

— Mi tre ĝojus pri ĝi, ĉar ja per Esperanto miaj vortoj venus ankaŭ en lokojn, kien per aliaj lingvoj ili ne povus iri, aŭ almenaŭ tre malfacile.*

Kaj ni parolis plu. El la kvaronhora intervjuo farigis trikvaronhora; mi sciigis, ke Jolán Földes unue verkis sociologiajn studojn, kritikojn, ŝi kunlaboris kvin jarojn en diversaj sociologiaj revuoj, ĝis fine, en sia dudekvara jaro, surprize eĉ al ŝi mem, ŝi verkis dum duona jaro la unuan romanon. Tiu romano gajnis la unuan premion de ĉi tiu el la plej eminentaj hungaraj romankonkursoj. De tiam ŝi verkas ankaŭ beletristike. La konkursoj literaturaj de tiam estas ŝia «superŝtelo». En siaj romanoj ŝi pentras ĉefe la mizerajn, senhelpajn homojn, pri kiuj neniu zorgas, kies vivo pasus senvoĉe inter la milionoj da aliaj homaj vivoj. En ŝia stilo ŝin kondukas nur unusola konsidero: simpleco kun modereco. Ŝi tre amas vojaĝi kaj se ŝi havos multe da mono, ŝi travagos la tutan mondon. Ŝi havas mirindan memorkapablon. Miajn Esperantaj vortojn ŝi tuj tradukis, sed eble plej agrable estis por mi, en la fino de la konversacio, ŝia atentigo. Mi promesis al ŝi antaŭe alsendon de Esperanto-vortaro. Ŝi atentigis, ke ŝi tre dezirus ĝin ricevi por povi legi baldaŭ la ekzempleron de «Hungara Antologio», lasita ĉe ŝi.

— Mi ne kredas, ke Jolán Földes farigos iam ajn

*) Sian, nun jam mondfaman romanon versajne eldonos L. M. samtempe kun la alilingvaj eldonoj, en februaro 1937.

»obsedita« esperantisto. Sed mi scias, ke ŝi estas infektita per la »verdad baciloj«, ke ŝi estos ĉiam defendanto de la valoro de nia lingvo, kaj ke la adiaĵe dirita »ĝis revido« apartenas ne al mi persone, sed al tiu lingvo, kiu redonis la feliĉon al multaj senhelpaj animoj.

V. Bleier

LITERATURO KIEL NEGOCO.

En Parizaj literaturaj gazetoj aperas foje-foje anonco alloga, kies titolo estas »Devenez écrivain«.

Fariĝu verkisto!

Temas pri tio, ke lerta franco organizis »lernejon por verkistoj«: efektivan kurson, kie dum kelkaj semajnoj ĉiu ajn (!!) fariĝos verkisto. Ke nenia miskompreno estu pri la noblaj celadoj de tiu lernejo, jen laŭvorte la alloga anonco:

»Fariĝu verkisto!«

»Vi havas ideojn, kiujn vi ne povas esprimi. La temo estas en vi jam maturiĝinta kaj pripensita el ĉiu vidpunkto. Vi prenas la plumon... kaj antaŭ la blanka papero vin kaptas miksa sento de premigo kaj vertigo. Vi sentas, ke via cerbo kaj la papero estas egale malplenaĵ. Ĉio, kion vi kredis ordigita en via kapo, dancas kiel ciklono ĉirkaŭ vi. Pri kio vi pensis, ke ĝi estas kaptita, tio glitas por ĉiam el la manoj.«

»Ha, kion mi faru, — vi demandas, — por prezenti, kio en mi estas? Kiel mi komencu? Kiel mi finu?«

»Kiajn turmentojn devas senti junulo saĝa kaj decidiginta, se li sentas sin kvazaŭ vive enmasonita? Pezega ŝarĝo tio ja estas en vivkonkuro.«

»La lernejo ABC — titolo vere trafa — liberigas vin el la spirita karcero; prezentas en plena valoro la naturajn ecojn kaj la akiritan kapablon. Unuvorte, ĝi ĉerpas la maksimumon de via individuo. Per la helpo de unika kaj plej moderna metodo, eĉ jam post kelkaj semajnoj vi spertos, kion al vi estos facila, kio estis ĝis nun neebla. La elekto de vortoj por la esprimo de viaj pensoj, ties ordigo kaj kunligo fariĝos ludo por vi. Ludo, kiu estas ne nur agrabla, sed ankaŭ profitdona, ĉar ĝi plibonigas vian situacion materialan kaj altniveligas vian respekton verkistan.«

»Sribu du tuj kaj ni sendos al vi nian detalan prospekton, kiu enhavas la necesajn informojn.«

Estas *plej ĉarme* en tiu stranga anonco, ke ĝi donas kompletan liston kun la nomoj de la adeptoj, kiujn tiu ĉi lernejo edukis *tiom efike*, ke ili atingis verkistajn sukcesojn. Estas bedaŭrinde, ke la valoro de la tie cititaj libroj estas tute ne kontrolebla, ĉar same kiel la titolojn de la verkoj, ankaŭ la nomojn de l'verkistoj kovras tre profunda mallumo; kaj la saman sorton havas la cititaj ĵurnaloj, en kiuj la koncernaj versoj kaj noveloj aperis. Ni rimarku, ke la aŭtoroj estas senescepte fraŭlinoj, kio — mi petas pardonon — ege suspektigas la rezulton de la lernejo.

*

Povas esti, ke tiu franca lernejo por verkistoj encerbigas al la lernantoj iom da kono kaj per tio la destinito povas ekiri sian verkistan karieron, kiel la konata lernanto de danclernejo, kiu ja povis danci, sed nur se li (aŭ ŝi) komencis de la forno. Sed la verkista kurso en Los Angeles nepre meritas eĉ inter la amerikaj stultajoj la unuan lokon. Estus ja tute ne mirinde, se la leganto ne kredus, ke io tia estas ebla, kaj li nomus simpla blufo kaj fantazio la ekziston de tiaj kursoj. Por refuti tiun supozon kaj suspekton de la legantoj, estas nepre necese la prezento de kelkaj dokumentoj, kiuj montras la literaturan nivelon de mezinteligenta amerikano.

Ĉiun honoron al la nova altvalora amerika literaturo kaj al ties legantaro, sed despli terura estas la legajo de la grandaj amasoj. Oni ja devas konstati, ke ankaŭ tiuj amasoj havas iom da kulturigemo, nur ili restis kelkajn miljarojn malantaŭ la kulturo de Eŭropo.

Tiun klerigemon ilustras arĝo de tiaspaciaj kursoj, tre multnombraj precipe en New-York.

Revuo New-yorka sendis sian ĵurnaliston al kelkaj

tiaj kursoj, kiu notis la respondojn de la partoprenantoj. Jen kelkaj perloj:

Epistolo estas la edzino de episkopo.

En la Nilo troviĝas aligatoroj kaj piramidoj.

Marteno Luther mortis en cirkonstancoj teruraj; unu bullo ekskomunikis lin.

Cromwell estis la ekzekutisto de reĝo Karlo.

Zebroj estas jam tute pereintaj kaj ilia nomo estas uzata nur por la ilustrado de la litero zo.

La akvo konsistas el duspecaj ĝin: oksigen kaj hidrogen.

Kia estas la verkista kurso en Los Angeles? Ĵurnalisto raportas pri tio.

Kiam ŝi vizitis la eminentan instituton, ĉeestis cent dudek gelemantoj, plejparte inter 45—50—70 jaroj. Maljunaj sinjoroj, maljunaj patrinoj kaj maljunaj avinoj svarmis en la ejo. Guste tiam okazis ekzameno.

La profesoro desegnis sur tabulo muron de fortikaĵo. En ties mezo estis algluita pordego el papero. Laŭ la klarigo, la pordego simbolis la sukcesan eniron en la fortikaĵon de la ĝusta verkado. Kiu volis eniri, tiu devis prezenti sian *legitimilon* t. e. la verkon de li faritan.

Se la profesoro akceptis la legitimilon, alivorte se la kreaĵo respondis al la reguloj de la instituto, la verkinto povis eniri la simblan fortikaĵon. Sed ve al li, se li ne sukcesis. Tiam li estis ekzekutita. Ankaŭ la ekzekuto okazis nur simbole. Iu entreprenemulo el la maljunaj sinjoroj senkapigis la malfeliĉulon per hakilo el kartono.

Tiel oni igis la ekzamenon varia kaj ekscita.

Sed jam venas la unua ekzameno, tio estas la unua migranto, kiu celas la fortikaĵon. La profesoro, pli ĝuste: la fortikaĵestro, postulas la legitimilojn de la migranto, kiu estis alta, malgrasa virino en flava vestaĵo kaj ruĝa ĉapelo kun grandaj verdaj orelingoj en la oreloj.

La fortikaĵestro laŭlegis la manuskripton, sed konstatis ĝin nekonvena. Do li transdonis la malfeliĉan migrantinon al la ekzekutisto, kiu al ŝi bati: plezure sur la kolon. Dum du horoj daŭris la hombuĉado. Sep lernantoj estis ekzekutitaj, kaj estis sepepe ankaŭ tiuj, kies verkoj estis sukcesegaj; eĉ tiom, ke ili povis okupi en la fortikaĵo la lokon de eminentuloj.

Unu el la verkoj tiom superis la aliajn, ke la profesoro kriis de plezuro kaj vokis fotografiston por eternigi la novnaskitan genion. La verko solvis ĵongle la temon, kiu rolis en la instrumaterialo kiel *ĝusta konstruo de drama konflikto*. Jen la ĝusta solvo: Boato estas sur la maro. En la boato sidas Ĉefrolanto kaj legas. Li levas hazarde la kapon kaj rimarkas, ke en la pinto de boato siblas anakondo. Li volas salti en la maron, sed terure! apud la boato naĝas ŝarko!!!

Restas eterna sekreto, kiel la Ĉefrolanto rifuĝis, ĉar la profesoro malpermesis la finlegon de la novelo, hurlante, ke tio tute sufiĉas, ĉar situacio pli interesa en novelo ne povas okazi.

Ni kredas, ke ĉio ĉi laŭvorte okazis kaj ankaŭ tio estas kredebla, ke la »happy-end«-oj kaj murdadoj plengigantaj la amerikajn »magazenojn«, estas la fabrikaĵoj de tiuj kursoj.

*

Sed ne ĉiu havas sufiĉe da diligento, por viziti kursojn dum monatoj, ĝis lia (ŝia) deziro plenumiĝas kaj li (ŝi) vidos sian nomon presita sub iu verko literaturo.

Ekzistas por tio solvo multe pli simpla.

Scribu la verkon iu alia; li aĉetos kaj subskribos ĝin.

La ideo estis tiom valora, ke oni fondis negocejon por renkontigi vendiston-verkiston kaj aĉetanton. Kie estas tiu kontoro? Ĝi estas, kompreneble, en Ameriko. Adreso preciza: New-York, East 49, No. 17. La raportisto de »Nouvelles Littéraires« trovis ĝin kaj konigas en la aŭgusta numero de la revuo. La titolo de la entrepreno estas »LA KONTORO DE VERKISTOJ-FANTOMOJ.«

La vorto verkisto-fantomo tute ne kovras precize la sencoon de la angla vorto »ghostwriter«. Tiu amerika vorto intencas esprimi, ke la origina verkisto nur ŝvebas, kiel fantomo, en la fono, disĝas de sia laboro, kiel animo

disde la korpo kaj sian surteran restaĵon li testamentas, kun plena posedrajto, al la aĉetanto.

En slango de la franca literaturo oni nomas ilin *nègre*. En Esperanto oni povus ilin nomi *kulio*.

La kontoro liveras ĉion: novelon, romanon, poemon, artikolon, sciencan studon, retorikaĵon, toston, konfidencajn leterojn... Ili registras entute cent dudek kunlaborantojn. Per konvenaj slipoj ili elserĉas la nomon de la verkisto, kiu havas fakscion aŭ talenton bezonatan laŭ la mendo. Ĉar ankaŭ fakuloj laboras en la kontoro. Unu komprenas la terkulturadon, alia la hemion, tria la porcelanon. Eĉ, la kontoro donas okupon ĉefeĉefe al fakuloj, ĉar talento ĝenerala troviĝas ĉiam superbezone.

La entrepreno ellaborigas ankaŭ temojn. Por tiaj okazoj ili havas registritajn homojn, spertajn en esploroj bibliotekaj. Ili elserĉas la materialon en bibliotekoj, liveras la materialon en la kontoron, kaj lerta fantomo tie ĝin prilaboras.

La honorario estas tute diversa. Ĝi varias por vorto de 1/2 centimoj ĝis 6. La verkisto pagiĝas laŭ la kvalito de la laboro. La mendanton ili trompas laŭ ties materia situacio. Ili postulas en kelkaj okazoj eĉ 40—50 dolarojn. Sed se la mendanto estas simpla burĝo, li povas ricevi jam por 5 dolaroj verkon, kiu adiaŭas mortinton.

Kiel videble, la entrepreno baziĝas sur tute reala fundamento. Ĝi estas konfidebla kaj honesta. Tiu honesteco estas bone konstatebla precipe ĉe verkoj beletristikaj. Raportisto de revuo interesiĝis pri la detaloj de la liverota materialo kaj la direktoro de la entrepreno respondis kun honesteco respektinda:

«Se ni liveras beletristikan manuskripton, ni garantias la ortografion, la interpunkciojn kaj la stilan precizecon, sed neniel ni respondas pri la literatura valoro de la verko.»

Je la demando, ĉu ili ricevas gratulajn leterojn, oni povis aŭdi la surprizan respondon, ke eĉ unu ankoraŭ ne alvenis. La mendanto hontas la negocon, akceptas la liveritan laboron, pagas, foriras kaj neniam plu li estas videbla.

Kiel fantomo...

*

Por ke ni citu ne nur ekzemplojn francajn kaj amerikajn, jen io germana. En Berlina gazeto aperis la suba anonco:

»*Verkisto mandfama* laŭ notoj, dokumentoj, personaj rememoroj pretigas en formo arta la romanon de via vivo. Ĝi estas la plej bela kristnaska donaco. Plezuro de familioj. Ĉiu povas donaci al siaj kunuloj la literaturan priskribon de sia propra vivo. Ni petas ofertojn — kun la indiko de folioj — en la eldonejon.»

Ĉu tio bezonas komenton?

JARL HEMMER: LA MATENDONACO.

Ne estas ankoraŭ longe, ke Jarl Hemmer, juna sveda poeto, atingis sukceson, vaste trans sia hejmlando, per sia romano »Gehenna«. Jam tiam li estis taksata kiel unu el la vico de la grandaj nordaj rakontistoj, sed per sia nova romano »La matendonaco«, kiu sendube superas la antaŭan je arta matureco, li liveras nun plenan pruvon pri sia poeta povo kaj konfirmas la metitajn pri li esperojn. En ĉi tiu okazoriĉa libro, kies scenejo estas la maro kuŝanta inter Finnlando kaj Svedujo, kun siaj senombraj insuloj kaj ŝeroj, rakontas Jarl Hemmer la historion de la amo de du junaj homoj — Valfrid kaj Tuva. Kiel infanoj de du malamikaj gentoj ili estas implikitaj en plej ardajn kverelojn, ĝis fine la sorĉo de granda amo venkas super malamo kaj venĝo kaj por ĉiam unuigas ilin. De frua infaneco premas ilin la pezo de kulpo, kiu postulas kontentigon kaj venĝon, ĉar iam en ŝtorma vintronokto la patro de Tuva, la lumturgardisto de Ankarŭ malatentis — kun aŭ sen intenco — la dangersignalon de la ŝiprompa patro de Valfrid kaj lasis lin senhelpe sur la najbara ŝero »Matendonaco«, elmetante lin al la frosto kaj plej kruela malsatmorto. Tiel devas Valfrid, lia filo, kvankam li jam de sia junago amas Tava-n, fariĝi venĝanto de sia gento kaj postuli de la kulpulo kontentigon.

Jubileo Andreo Cseh



En ĉi tiu somero la Esperantistaro inde festis la 25-jaran jubileon de la eminentaj verkistoj K. de Kalocsay kaj Julio Baghy.

Eble malmultaj scias, ke ne malpli grava jubileo atendas nin. Ankaŭ Andreo Cseh jam de 25 jaroj laboras en la servo de nia movado.

Ni ne bezonas tie ĉi larĝe preparoli la meritojn de Andreo Cseh, kiu senriproze laboradas por antaŭenpuŝi la movadon.

Andreo Cseh pliriĉigis nian anaron je miloj da novaj, entuziasmaj adeptoj. Lia fama metodo estas aplikata de centoj da instruistoj en la tuta mondo, vekante intereson ĉe novaj kaj malnovaj Esperantistoj.

Nun ni deziras feste rememori la fakton, ke li dum 25 jaroj senĉese dediĉis sin al Esperanto.

La Haga grupo »Fine Ĝi Venkos« festos sian 30-jaran jubileon je lundo, la 28-a de Decembro en salono de la Zoologia Gardeno, Benoordenhout 2, Den Haag. La intenco estas en la sama vespero festi la 25-jaran jubileon de Andreo Cseh kaj transdoni al li memoraĵon pri ĉi tiu grava fakto.

Ni invitas la Esperantistojn partopreni en ĉi tiu festo persone aŭ perletere. Leteroj por laŭtleĝo en la festvespero povas esti sendataj al la jena adreso:

F-ino C. H. van Voorthuijsen
Noordeindsplein 2 a, Leiden, Ned.

Tiuj, kiuj volas partopreni en la donaco (dependanta de la kolektiĝinta sumo) povas sendi sian kontribuon al la sama adreso, antaŭ la 15-a de Decembro 1936. (Poŝtĉekkonto de F-ino v. Voorthuijsen: 133.688).

La Jubilea Komitato:

F-ino C. E. van Voorthuijsen,

Noordeindsplein 2 a, Leiden

F-ino S. M. Grönloh,

Rijnkade 15, Leiden

S-ino M. C. van Nooten-van Nooten,

Jac. Mosselstr. 14 a, Den Haag

F-ino N. Rodemaker,

Westplantsoen 43, Delft

Serene

Noveleto de O. Dymow

Tamen, post daŭra batalo li estas venkita de la amo, kiu, ĉar ĝi estas pli forta ol la malamo, havas la kuracantan povon de interpacigo. En ĉi tiu streĉa agado, plena de ŝanĝigantaj homaj sortoj, troviĝas vico de okazajoj tre bildecaj kaj priskribitaj per vivaj koloroj, kiuj restas daŭre en la memoro. Tiel ekzemple la aventura saveturo, kies kuraga entreprenemo kondukas al feliĉa venko, aŭ la riskema, ruzorika fokofaĉo sia en la eterne storma maro; la belega somerfersto kun tie gaja bruo ĉe ludo kaj danco; kaj antaŭ ĉio la granda amo inter Valfrid kaj Tuva, de la unua eksento ĝis la feliĉego de la plenumiĝo. Kaj kiel veraj estas konturitaj la homoj meze de la impona pejzaĝo de la maro, kun ties ŝtormaj veteroj kaj danĝeraj aventuroj ili devas ĉiam lukti! Ili fiere kaj rekte iras tra sia kruda vivo, sen evito, sen cedo, sen kompromisoj. Kiel ajn maljustaj ili povas esti, ili tamen amas en siaj agoj la veron, kaj kie ili volas maljuston, ili faras tion tute. Fakte, ekzistas ne multaj libroj, kiuj estas atesto de tiel senrompa, belega vivoforto kiel ĉi tiu romano de simplaj homoj en norda maro. Per ĝi Jarl Hemmer riĉigis la nordan literaturon per granda verko, kiu povas esti kalkulita al la grandaj kaj restantaj laboroj de la nordo.

HERVEY ALLEN: ANTONIO ADVERSO.

Ĉi tiu libro iĝis granda sukceso kaj kun rajto. Oni foliumas en la ampleksa libro, kaj oni ne povas, ĉar oni devas funde legi; viciĝas ja delikataĵo post delikataĵo, ellaboritaj en ĉiuj detaloj kaj tamen en granda stilo kaj kun la trankvila tempmezuro de impona eposo. Majstro-verko kaj samtempe ankaŭ granda financa sukceso. Kvincent mil ekzempleroj estis venditaj en Usono sole; en Eŭropo estis certe ne malpli. Granda poeto kreis ĉi tiun verkon, plenumitan kun la preciza fideleco de fervora literaturisto, kun la spiro de vera liriko, sed ankaŭ kun la saĝeco de filozofo, kun la scio de la plej klera kulturhistoriisto kaj kun la memkompreno de plej lerta ĵurnalistoj. Sed kiu estas ĉi tiu Hervey Allen? Li, kiu ne nur ĉion povas, sed ankaŭ ĉion scias; al kiu la afrikaj praarbaroj estas same bone konataj kiel la kaktostepoj de Texas, Anglujo kaj Francujo same kiel Italujo, Hispanujo, Havanna; kiu konas ĉiun fibron de la homa koro tiel precize, kiel ĉiun floran de ĉiu klimato, kiel ĉiun beston de ĉiu zono; kiu estras la metion de ĉiu metiisto, de ĉiu scienculo, de ĉiu komercisto, de la soldato kiel de la ŝtativro; kiu perfekte kiel virtuozo formas la karakter-tipojn de la multspeca homento. Kiu estas Hervey Allen? Se la tuta afero ne estas grandega amerika bluafo, se sub la marko «Hervey Allen» ne kolektiĝis tuta aro de aŭtoroj sub la gvido de elstara kapo, ja, eĉ en ĉi tiu okazo (ne verŝajna pro la unueca stilo) ĉi tiu elstara kapo, Hervey Allen, devas esti geniuo.

Pri la titolheroo oni ne povas aserti tion. Adverso li estas nomata, ĉar «adversus casus», per malfeliĉa hazardo, li venis en la mondon, el kiu ree per malfeliĉa hazardo li foriris. Li estas do tiel nomata malbonŝanculo. Sed tia, kiu tamen plej ofte havas feliĉon. Kaj — Hervey Allen, kiu ĉion scipovas, majstras ankaŭ la lingvon de la simboliko — li devas signifi certe la simbolon de la homo entute. Malantaŭ ĉiuj konfuzaj buntaj okazajoj ŝajnas stari granda bona pesimismo, kiu supozeble per la tuta libro volis diri nenion alian ol «ecce homo, ĉiu el vi estas Adverso, ni ĉiuj pro malfeliĉa hazardo enmordiĝas, ŝajne sensence estas jetataj tien kaj reen tra ĉi tiu ĝoj-kaj suferriĉa estado, por fine, per same malfeliĉa hazardo, elmordiĝi. Senfina melankolio ŝajnas regi malantaŭ ĉi tiu abunda vivo, eĉ se la poeto rigardas la svarmadon de siaj figuroj kompare ironie. »Kaj kvankam ili tiel baraktas, io granda tamen ne rezultas. »Kun ĉi tiu koncepto akordiĝas ankaŭ tio, ke Hervey Allen ne kreis vere grandan figuron.

Kiel sociale li restas en la pli alta etaĝo de la nua klaso, tiel li restas ankaŭ psikologe en la sama nivelo. Kiel ajn vivovera, ekzemple, estas lia Napoleono. Allen tamen desegnis pli la eksterajojn, la manieron de la diktatoro, la impreson, kiun tiu faris al aliaj, ol la animon de la titano. Grandaj propre estas nur la enkorpigoj de

Post kiam en Ameriko la telefono estis inaŭgurita, en la komenca periodo ĝi tute ne funkciis senripote. La nunaj maljunuloj — bankieroj, negocoj, ĵurnalistoj — eĉ nun indigne rememoras tiujn amarajn batalojn, kiujn ili faris en siaj kontoroj kaj privataj loĝejoj kontraŭ la invento konkeranta la mondon per obstina persisto. Oni rakontas pri tiu tempo, kiel la maljuna arbaristo pri la delonge forpasinta aŭtuno, kiam li faligis urson en la denso de la arbaro.

La gvidantoj de la telefonasocio ne kuragiis montri sin surstrate, ili kaŝis sin en vilaĝoj, ekster la urbo, kiel kulpuloj, kiuj tremas antaŭ la potenco de la leĝo. La telefonistaro vivis sub la pluvego de malbenoj, tiel, ke la pli superstiĉaj post kelke da tagoj forlasis sian oficon.

La ĝenerala malkontento iom post iom iĝis jam minaca. La telefonasocio kun rapida decido establis «plendkontoron». La kontoro estis en grandega halo, kiu plenpleniĝis jam kelkajn minutojn post la malfermo. Kiuj ne povis enveni, tiuj serpentis en longaj vicoj ekstere sur la strato. La homserpento kvaroble ĉirkaŭis la konstruaĵon kaj kreskis de minuto al minuto. La homoj atendis dum horoj, ke ili povu paŝi antaŭ la promesplenan tablon.

Kaj ĉe tiu tablo, kie oni disdonis ĵuston, favoron kaj bonfaron kaj kie ĉiu povis esprimi siajn amarajn sentojn, sidis korpulenta sinjorino, ĉirkaŭe 60-jara. Laŭ sia vizaĝo ŝi similis al la carino Katerina la dua; en la neĝblanka harkrono estis amaso de harpingloj. Kun senlime milda kaj delikata rideto, sen la plej eta signo de malpacienca ŝi aŭskultis la plendon de la popolo, de la malesperaj telefonabonantoj. Ŝia majesta ekstero, ŝia pacienco, ŝia amika rigardo, ŝiaj bluj okuloj, ŝia milda voĉo efikis kiel balzamo.

— Ni esploras la aferon. Ni faros ĉion. Trankviliĝu — ŝi diris kaj oni trankviliĝis. La skurgitaj humoroj glatiĝis, oni ĉerpis novan esperon, denove alridis ilin la belo de la vivo.

— Duonhoron mi atendis je la kontakto! — plendis sinjorino. — Pripensu! Duonhoron! Ne tolereble!

— Estu trankvila. Ni aranĝos ĉion. — diris Katerina la dua.

— Mia telefono sonoris dum la tuta nokto senŝese, ĝemis alia. — Mi ne povis fermi la okulojn. Elĉerpigis mia tuta forto, mi freneziĝis!

— Ni reordigos — respondis la blankharulino kaj adiaŭis la plendanton per milda kaptesto.

Kaj tiel estis la afero en la dua, tria tagoj — dum semajnoj.

La 77-777-a plendanto paŝis al la tablo kaj deklaris: — Lincoln estis eminentulo!

— Trankviliĝu. Ni riparo: — respondis la sinjorino kun sia plej bela rideto.

— Washington ŝtelis pomon en sia infanaĝo el la fruktĝardeno de la najbaro!

— Ni esploras. Ni aranĝos ĉion — diris pace la sinjorino kaj kaptjesis.

Car la ununura kaj neanstataŭebla oficistino de la plendkontoro estis senespere — surda.

la malamo (Don Luis) kaj de la amo (Frato Francois), Adverso mem estas pli alta ordinara homo de rektima perseptkapablo. Tio ja kuŝas en la eco de la evoluomano, kiu ja bezonas senteman heroon, por havi la eblon prezenti la efikojn de la diversaj medioj. Sed sentema homo malofte estas forta. Ĉi tiu rifo, ĉe kiu eĉ Goethe mal-

sukcesis, provis eviti Allen tiamaniere, ke li venigas Ad-
verson en grandan komercdomon kaj ankaŭ alie venigas
lin en diversajn situaciojn kiuj postulas rapidan agon kaj
energion. Tiamaniere, sian heroon, denature nur obser-
vevan, li povas plialtigi al aganto, sed kiu (signife!)
fine tamen venas al mondriĝo, al meditemo kaj aktiva
helpemo. »Amu vian kunhomon pli ol vin mem!«, tio
estas la devizo, kiu nesribite staras super ĉi tiu streĉa
verko.

»Antonio Adverso« estas evoluromano. Sed unika
en sia speco pro tio, ke ĝi ne prezentas la evoluon de
la poeto mem aŭ de iu el liaj samtempuloj, sed, per
tia precizeco, kvazaŭ la aŭtoro estus ĉion vidinta per la
propraj okuloj, ĝi rakontas la travivaĵojn de juna viro,
kiu vivis antaŭ pli ol cent jaroj. La romano ludas antaŭ,
dum kaj post la franca revolucio. Don Luis, hispana
nobelo, kun sia juna edzino el angla komercistfamilio,
venas al Francujo kaj mortpikas en duelo la feliĉan
amanton de sia edzino, kiu mortas ĉe la nasko de sia
needza infano; Don Luis transdonas la infanon al mona-
hejo, kien ĝi kiel »casu adverso« alvenas. Kiel nun la
juna Adverso tie pli grandigas, venas al sia patrina avo
kaj poste en malproksimajn landojn kaj kontinentojn,
kiel li suferas sub la malamo de Don Luis kaj sub la
okazaĵoj de sia vivo, fine gajnas la amatinon de sia jun-
aĝo kaj pro malfeliĉa hazardo mortas, tio formas la en-
havon de ĉi tiu libro ampleksanta preskaŭ 1200 dense
presitajn paĝojn. Pri ŝipaferoj, marveturado, grand-
kaj etkomerco, loterioj, teatro, monahejoj, filozofio, sklavo-
komerco, sortado ĉe la primitivuloj kaj civilizuloj, gran-
daj kaj malgrandaj koruptoj: pri ĉio ebla, kio estas kaj
ne estas legebla en enciklopedioj, ni sciigas per la libro
en pleje interesa maniero. Talleyrand, Pitt kaj Fox, la
bankistio Ouvrard, Madame Georges, la hispanaj geroĝoj
kaj ankoraŭ aliaj historiaj personoj aperas, sed la romano
pleje ludas, kiel jam dirite, en pli altaj burĝaj rondo-
j. La libro estas timige bela, abundas de profundencaj kaj
mondosaĝaj rimarkoj, ankaŭ kelkfoje enhavas humoron,
okaze portas ankaŭ tion, kion oni nomas klaĉo, sed
neniam iĝas malinteresa. Ĝi ludas en la tempo de la
postkaleŝo kaj velŝipo kaj tamen oni ĝin sentas tiel mo-
derna kaj aktuala, ke eĉ la plej malema leganto estas kap-
tata de ĝia sorĉo kaj neniu scias kial. Tiel estiĝis mond-
sukceso. F. W. V.

LA NACIA TEATRO EN BUDAPEST

malfermis sian sezonon per aro de novaj verkistoj hun-
garaj. La direktoro, Antono Németh, kiu ricevis multajn
atakojn en la antaŭa jaro, klopodas freŝigi kaj modernigi
la reprezentan teatron de Hungarujo. Tamen, la origi-
nalaj teatraĵoj tie prezentataj donis okazon plie al iu aŭ
alia aktoro prui sian talenton, ol montri la talentojn de
la hungara dramo. Ferencz Táray, Gábor Rajnay nepre
estas aktoroj, kiuj trovus elstaran lokon sur iu ajn dramo-
scenejo de la mondo, sed veran kaj grandan sukceson
atingis nur du teatraĵoj de nehungaraj verkistoj.

Unu estas la »Fraŭlino Diamantrivereto«, kiun verkis
la ĉino S. J. Hsiung kaj kie prezentis sian ĉarmon kaj
neatingeblan talenton la eble plej granda hungara akto-
rino Gizi Bajor. La tuta prezento estas primitiveca kaj
naiveca. La verkistoj provis alproksimigi la ĉinan dramon
al la eŭropa kaj kvankam la reĝisoro faris eĉ la dramo
plie ian farson ol vivbildon, la publiko akceptis la verkon
plej favore. La teatrovizitantoj ankaŭ en Budapeŝt ak-
ceptas volonte la principon: »se ludo, estu ludo«. Ne-
mirinde do, ke la plej grandan sukceson atingis la du
helpaktoroj, kiuj reprezentis jen arbon, jen barilon. Jen
muron aŭ alian kulson necesan; kaj — la juna aktoro,
kiu prezentis ĉevalon kun vosto en la mano.

La direktoro en la interesiĝo de la publiko montras
ankaŭ la dua sukceso, la verko de la dano, ŝub titolo
»Kiu mi estas?«. La scenejo estas double aranĝita. Sur
la scenejo ni vidas alian scenejon, kiu prezentas la anim-
suferojn de junulo, troviĝanta en malagraba ama impli-
kajo. Ni sekvas lian tutan evoluon, ĝis — li ekdeziras la
morton de sia antaŭa amatino por ebligi edziĝon kun la

nova, riĉa virino. Tamen, la aŭtoro volas nur montri, ke
en la homo batalas bonaj kaj malbonaj intencoj kaj eĉ
kiam la malbonaj intencoj venkas, la bona spirito helpas
sincere pripentiti tion kaj tiu ŝajna venko de la diabla
okazas nur en sonĝo.

Ni prezentas sur niaj bildoj kelkajn scenojn el la
montrita teatraĵoj kun la plej interesaj figuroj.

BV.

NOVA DIREKTO EN LA FILMARTO. Se ĝis nun
ni parolis pri tia, ni ĉiam parolis pri la *maniero*, kiel
prezenti la filmojn: pri la reĝisorado. Dum multaj jar-
dekoj oni filmigis nur scenojn teatraĵajn kaj la film-
tekstoverkistoj devis fari longan vojon, ĝis ili alvenis al
la priskribo de »griza« vivo de scienculo. Mi parolas pri
la filmo »Pasteur« fabrikita de la granda filmfarejo
Warner Brothers. La filmo brile provas, ke ankaŭ ĉiutaga
vivo plena de laboro povas esti same interese filmigita,
kiel la vivo de la grandaj militistoj. Kvankam senintence
la filmo estas certe unu el la plej gravaj pacifistaj mani-
festoj, kiujn la filmarto iam produktis. Tamen malgraŭ
la intereseco de la scenigo, la filmo ne estas venkinta,
se la rolon de Pasteur ne ludus la fama franca aktoro
Paul Muni. Estas la scenigo kaj la ludo de ĉi tiu genia
homo, kio faris la filmon unu el la plej bonaj, ĝis nun
viditaj de ni. Per kelkaj gestoj, simplaj vortoj, ofte per
sola rigardo li vekas tian emocion en la animoj, kia laŭ
la ĝisnuna supozo estis vekebla nur per la morto de la
bona heroino, aŭ per alia speco de la rutina filmscenaro.
Ago estas tiu ĉi filmo kaj ni nur povas deziri, ke Warner
Brothers fabriku ankoraŭ multajn el la sama speco.

LA GERMANAJ FILMOJ en la lastaj jaroj estis
absolote neinteresaĵoj, ofte preskaŭ teruraj pro la diletan-
tismo, per kiu oni fabrikis ilin. Vere, en la antaŭhitera
Germanujo la filmistoj estis preskaŭ senescepte eksterlan-
danoj, kaj kiam ili estis forpelitaj, la germana filmpro-
dukto malaltiĝis al la nivelo de la filmprodukto de tute
malgrandaj landoj. Se certaj homoj kaj landoj bojkotis
la germanajn filmojn, ili ne perdis multe kaj multaj
homoj ne rigardis ilin, eĉ sen ia intenco de bojkoto. La
germanaj filmoj simple ne estis indaj al rigardo.

Des pli interese, ke hodiaŭ tiu cirkonstanco komencas
ŝanĝiĝi. Lastatempe ni vidis du filmojn, kiu egale bone
povus esti produktitaj en Usono aŭ Anglujo.

Temas pri la filmo, kies muziko estas la IX-a sim-
fonio kaj Händel-oratorio. Ne parolante pri la muziko
mem, kiu ja estas en si mem aŭskultinda, ni parolu nur
pri la ĉefrolantaj virinoj Maria Tasnády kaj Lil Dagover,
pri la artistino kaj pri la etulo sesjara, kiuj vere estas
artistoj. Sed al la tuta filmo mankas ja ajn tendenco
partia aŭ mondrigarda; ĝi havas sur si stampon de
la amerikanaj filmoj: »malbonuloj pereas, bonuloj beatigas«.
Sed malgraŭ tio, la filmo estas bona.

Ankoraŭ pli mirigis min alia filmo »La cezaro de
Kalifornio« kun la ĉefrolulo Louis Trenker. Ĝin fabrikis
la germana Bioscop-filmfabriko kaj mi devas nepre ak-
cepti kiel ĝian ĉefheroon — la fotografiston. Kio estas
produktebla en la filmofotografado, tio estas ĉi tie prezen-
tita. Bildoj unu post alia kun tia arta sento, kia en tiu
amaso estas trovebla tre malfacile en unu sama filmo.
Ke ankaŭ la reĝisoro kaj Trenker mem prenas sian
parton en la sukceso, estas kompreneble. Sed oni ne povas
prisilenti la enhavon kun sia realeco, historia dokumen-
teco kaj la finon — montrantan al homa progresado
paca kaj civiliza. Estas tute nekompreneble, ke tiun fil-
mon produktis la militemaj germanoj.

KARL AUGUST MEISSINGER: LA AVENTURULO DE DIO.

Ĉiu konanto de la Biblio scias, ke la 40 ĝis 55 ver-
soj de la libro de Jesaja estas heterofonaj, tio estas mal-
samnaturaĵoj: ili staras kiel pli nobla fremda korpo en sia
ĉirkaŭaĵo kaj versajne havas aŭtoron alian, lirike pli talen-
taŭ ol Jesaja, pro kio oni nomas tiun supozatan verkiston
Deutero-Jesaja, tio estas: la dua Jesaja. Kiu li estis, kie

li vivis, kion li krom tio faris aŭ skribis, restis sekreto, kiu, kompreneble, povis inciti kleran teologon, sekvi liajn spurojn, se ekzistas tiaj, aŭ verki lian tutan vivon laŭ fantazio. Tion nun faras Karl August Meissinger: Lia romano »La aventuro de Dio« estas la fikcia vivo-pri-skribo de la granda biblia poeto, kiu la verkisto nomas Sira. Pri tio povis sukcesi nur verkisto, kia Meissinger, teologo laŭ profesio, kiu okupigis, kun la studado de la Malnova Testamento, pri Luther, Augustinus, kaj ankaŭ pri skolastiko kaj pri orienta kaj germana lingvosciencoj. Li publikigis jam aron da libroj, inter ili »Luther kaj Emser«, »Leibnitz«, »Friedrich List«, »La liberigo de la tekniko« kaj »Helena aŭ la kunlaboro de Schiller« (en »Faust«). Kaj nun sekvas la »Aventuro de Dio«, kvazaŭ frukto de vivo, kiel konfeso kaj klarigo.

La historio komenciĝas en la babilona ekzilo: la judoj kutim'gis al la vivo de la grandturbo Babel, ili iĝis parte riĉaj homoj, kiel ekzemple ankaŭ la juvel-komercisto Sira. La malvasteco de la komercado ne sufiĉas al li. Li volas pli. Per siaj vojaĝoj li akiris certan teknikon pri la vojaĝoj en la dezerto kaj li uzas sian sperton por la realigo de granda ideo. Li vojaĝas al Kyros, gajnas la fidon de la reĝo de Persujo kaj petos lin, rekonduki la judojn el la ekzilo en la patrolandon. Sira realigas sian ideon kaj iĝas atestanto pri la falego de la malnova kaduka kaldea regno kaj poste, post la batalo de Sardes, kiu kostas al Krezo sian libian regnon, li farigas amiko kaj konfidulo de la mondreganto Kyros. Sed li ne plu obstinas pri sia fundamenta ideo, ĉar li intertempe rekonis ĝin eraro kaj scias: »ke la judoj ne starigos denove la regnon de la granda Davido en Kanaan...« Sed ankaŭ alion li ekkonis: la profundajn instruojn de Zarastrustra kaj la klarajn saĝinstruojn de la jonia filozofio, la veran pasadon de la mondaferoj kaj nun li scias, ke lia hejmlando perdiĝis por ĉiam.

Sed Sira ne finas en rezignacio. Li vizitas Pandabon, aŭskultas la instruojn de Budho kaj per li lernas kompreni la sencon de la historio. Unu homo, diras Budho, signifas ĉiujn. Se vi parolas kun iu homo, vi parolas kun ĉiuj, do ankaŭ kun vi mem. Kaj ĉu ne ĉiuj popoloj estas homfamilio? »Ĉiu kun propra sorto, propraj talentoj, propraj malicioj kaj eraroj, kaj tamen katenataj per la unika tragika sorto de la homosto, ke ili, por la fato de dio, estas devigataj dolorigi unu la alian. — Jes, eble pro tio, ke iun komune maledistimata membro de la sortofamilio ili devas piedpremi kvazaŭ en interkonsento, por ke guste ĉi tiu maledistimata membro montru al ili, ke la ĉefa eco de ĉiu vivo devas esti la sufero!« Tiel la sufero por Sira ricevas heroon sencon. »Jes, Klebriganto, mi volas suferi, sed trans via alta instruo: mi volas fari la suferon!« Kaj tiel Sira venas al la kompreno de la fato, kies nomo estas Diasporo.

En trankvila tendo, kun skribtabulo sur la genuoj, li komencas skribi, ĉar kantas en li. Kaj tiel estiĝas la profunde travivitaj kaj profunde trasferitaj 40 ĝis 55 versoj de la libro Jesaja, kiujn la verkisto interpretas en verva tradukajo. Juvelkomercisto, ŝtonpoluristo, orafisto, kuracisto, legisto, helpanto de la malriĉuloj estis Sira; nun li estas poeto, profeto.

Tio estas la kerno de la romano de Meissinger, samevalora kiel poezia verko kaj kiel kultura priskribo: la ĉiutagan vivon de la foraj popoloj ĝi same bildigas, kiel metale ĝi sonas en la estontecon. Nur scienculo kun poeta talento, nur poeto kun religio- kaj lingvosciencia klerco, iu, kiu konas la malnovajn tekstojn de la sumeroj kiel la hindajn kaj jomajn saĝojn, scipovis skribi ĉi tiun verkon. En la mezo staras apud Sira la ĉarma grekino Artemisia, belulino, pri kies morto oni funebras kiel pri la morto de parenco. Ni povis sekvi ĉi tie la vojaĝojn de Sira de Babilono ĝis Wadi Hauran, tra la Kaspia Pordo en la Parapanison nur suprajte, tro suprajte, despli da surprizo donos la »Aventuro de Dio« al la leganto, kiu sentos sin pli saĝa kaj milda, kaj kiu ĉe la fino volus ripeti la vortojn de satrapo Artabano: »Vidu, estis vero, kion mi tiam diris: Dio estas ne malbona poeto!« F. W. V.

Traduk-konkurso

Ni jene publikigas la rezulton de nia konkurso pri traduko de kantotekstoj (vd. en la ĉi-jara tria numero).

1. N. Hervé: el »Mam'zelle Nitouche«. Unua premio: ne aljuĝita. Dua premio: *Bonvolemlulo* (Albert Masselier, Neuilly-Plaisance). Tria premio: *Regina Coeli* (C. Rousseau, Bécon-les-Bryères).

2. Händel: el »Messiah«. Unua premio: *Tradu Kanto* (K. Kalocsay). Dua premio: *Harmonio* (Madeleine Stakinn-Vuille, Geneve). Tria premio: *Valhjo* (Jenny Weiminsky, Praha).

3. Wagner: *Lied an den Abendstern*. Unua premio: *Tradu Kanto* (K. Kalocsay). Dua premio: *Pli facile mem fari versojn ol traduki* (Julius Holzleitner). Tria premio ne aljuĝita.

4. Grieg: *Jeg elsker Dig*. Unua premio: ne aljuĝita. Du daaj premioj: *Katido* (Liv Sandberg, Bekkelaget) kaj *Plena De Espero* (Magda Carlsson). Tria premio: *Gocoro* (Georg Carlander, Ekhult).

5. Strauss: *La blua Danubo*. Unua premio: *Tradu Kanto* (K. Kalocsay). Nur unu teksto alvenis.

La tradukojn, kiuj gajnis unuan premion, ni publikigas en tiu ĉi numero. La traduko de la Grieg-kanto, bedaŭrinde, ne povas esti rigardata kiel definitive solvita. La Hervé-tekston ni publikigas en la eksterkonkurso traduko de K. Kalocsay. L. M.

KLAUS MANN: SYMPHONIE PATHETIQUE

Klaus Mann, la filo de Thomas Mann, donas plenan ateston pri sia matura forto juneca trigo, nek junece pedanteco. Klaus Mann evitas la kutimajn vojojn de la nun tiel ŝatataj biografiaj kaj artistaj romanoj. Li provas sur propra vojo veni al la ekono kaj formado de la granda rusa muzikisto Ĉajkovski, kreanto de »Eŭgeno Onegin«, de »Pique dame« kaj de tiu kolorbrua sesa, la »Symphonie Pathétique!« Ne estas bagatelo, priskribi sen la kutimaj romanstrecoj la figuron de muzikkreulo, des pli, se temas pri animo eterne ŝanĝema, suspektanta sin mem malfide, altanta, de pelata turmentaj imagoj, trosentema, ĉiam ombrita. Kaj la kuraĝa provo prosperis al Klaus Mann. Per rememoroj, survojaĝaj impresoj el la vivo-kaj artomigradoj de la fama orkestrestro kaj komponisto, aplaudita en Paris, Berlin, Leipzig, Wien, Petersburg, Odessa, Newyork, li konstruas vivan bildon pri la eksterordinara viro: lia moleco kaj infana korboneco, lia kunsento kun ĉiu doloro, kiun li provas solvi en tonoj, lia modestecko, la etaj imagoj de la granda artisto, la erupcioj de vulkana temperamento. Kaj ankaŭ la eksteraj stacioj de ĉi tiu vivo-kaj artopilgrimado surprize estas videblaj: oni ekkonas la gepatran domon de Peter Iljiĉ, la bonan patronon kun la blankaj noblaj manoj, la patron, provin-projektiston; liajn studojarojn ĉe la jura akademio, lian danĝeran ligecon kun lia malbona demono, la poeto Aŭstin, la mallongdaŭran, ridindan edzcon kun tiu malkapabla Antonina; la amiligon kun la mistera nekonatino, sinjorino von Mack, kiu donis al li renton kaj poste ĝin ĉesigis; la kortuŝan amikecon kun lia juna parenco Vladimir, kiun li plej profunde amis, kiel Beethoven sian nepon, kun la tuta, sin-elverŝa varmo de sia koro. Figuroj el la granda muzikmondo preteriras: Johann Strauss, kiu malkovris lin kiel orkestrestro en Kiew, Brahms, lia antipodo, la malĝaja Rubinstein, lia instruisto kun superdimensia memŝato, Greg, la blondulo-naivulo, la juna Nikisch, la juna Mahler, Bülow kun trajtoj signitaj de doloro. Ĉi tiuj figuroj kaj okazaĵoj estas ne nur komprenitaj kun plej delikataj sentoj, sed ili reespeguliĝas ankaŭ en la lingvo — mem plena de muzika senteco, plena de gracio kaj plena de juneco.

F. W. V.

Ni efunkciigis la servon de

UZITAJ LIBROJ

Ni vendas kaj aĉetas uzitajn, novajn, kaj malnovajn librojn. Petu oferton. Faru oferton.

Ni ŝanĝas la duplikatojn de via biblioteko.

La azeno kaj la bovo de la kripo

— Jules Supervielle —

Sur la landvojo al Betlehem Jozefo gvidis la azenon, kaj sur tiu sidis Maria: ŝi pezis malmulte, ĉar en sia interno ŝi pensis nur pri la estonto.

Kaj la bovo iris post ili, sola.

Kiam ĉi tiuj malriĉaj vojaĝantoj venis en la urbon, ili instalas sin en forlasita stalo kaj Jozefo tuj eklaboris.

— Hm — meditadis la bovo —, tamen mirindaj estas la homoj. Kiom multe ili kapablas per la manoj kaj brakoj. Jes ja, ili atingas per ili pli, ol ni per niaj hufoj kaj kruroj. Kaj nia mastro ne havas egalulon en la laboro kaj plibonigado: la kurban li rektigas, la rektan li kurbigas, kaj kion li devas, tion li faras bonhumore kaj volonte.

Jozefo eliras, poste revenas: li portas sur la dorso pajlon, sed kiam pajlon, tian vivantan, tian sunhelan, ke jam tio mem estas malgranda miraklo.

— Kio preparigas ĉi tie? — pensadis la azeno, — kvazaŭ oni faras malgrandan infanliton.

— Eble vi estos bezonataj dum la nokto — diris la Virgulino al la azeno kaj al la bovo.

La du bestoj longe rigardas unu la alian: ili provas kompreni, pri kio temas, poste tamen ili kuŝigas.

Baldaŭ malpeza voĉo vekadas ilin el la sono, tia voĉo, kiu ĵus ankoraŭ plenigas la tutan ĉielon.

La bovo levigas kaj vidis en la kripo nudan, dormantan bebon, kiun ĝi komencas varmigi per sia spiro, malrapide, sisteme, nenion forgesante.

Maria dankas per ridetanta rigardo.

En la stalo flugilaj estaĵoj iras-venas kaj tiel facile ili trairas la murojn, kvazaŭ ili eĉ ne rimarkus ilin.

Jozefo revenis kun vindo, kiun pruntedonis najbarino.

— Estas mirinde. — li diras al Maria, per sia ĉarpentista voĉo, kiu kvazaŭ tro forta estas en ĉi tiu momento. — Estas noktmezo kaj tamen estas tago. Kaj anstataŭ unu sono, tri vidigas sur la ĉielo. Sed kvazaŭ ili volas atingi unu la alian.

Tagiĝe la bovo levigas kaj atente metadas la hufojn: ĝi timas, ke ĝi vekos la etulon, surpaŝos ian ĉielan floron, aŭ faras malutilon al iu anĝelo. Kiel malfacila fariĝis ĉio, kiel mirinde malfacila.

Najbaroj venas viziti Jesuon kaj Marian. Ĉiuj estas malriĉuloj kaj portas nenion krom la radiantan vizago. Poste venas ankaŭ aliaj, iu kun nukso, alia kun malgranda fluto.

La bovo kaj la azeno starigas flanken, por cedi vojon al la vizitantoj kaj en si ili pensadas pri tio, kion diras al ili la infano, ĉar ĝis nun li ankoraŭ ne vidis ilin. Guste nun li komencas vekigi.

— Finfine ni ja ne estas monstroj — diris laŭte la azeno.

— Jes, sed nia vizago tamen ne estas kiel la lia, aŭ kiel tiu de liaj gepatroj kaj li povus timigi de ni.

— Ankaŭ la kripo, la stalo kaj la tegmento kun la traboj ne similas al lia vizago kaj tamen li ne timiĝis de ili?

Sed la bovo estas malfacile konvinkebla. Senĉese ĝi pensas pri siaj du kornoj kaj tiel ĝi remacadas:

— Kiel turmente, kiel malagrabla estas, ke mia proksimo estas tiel timiga — eĉ por tiu, kiun mi amas pleje. Ĉiam mi devas atenti, ke mi ne ofendu iun; kvankam mia sango ne estas tia, ke sen serioza kaŭzo mi atakus aĵojn aŭ homojn. Mi ne estas kolerulo, nek

krimulo. Sed kien ajn mi iras, ĉien min akompanas miaj du kornoj kaj kiu ili mi vekigas; kaj eĉ se mi estas nura sono kaj ĉion mi vidas en ia granda-granda nebulo, tiuj ĉi du montoj, tiuj ĉi du duraĵoj neniam forgesas pri mi. Kaj eĉ dum nokto mi sentas ilin sur la plejsupro de miaj sonoj.

Nun la bovon kaptis granda timo: eble ĝi venis eĉ tro proksimen al la infano, por lin varmigi. Kaj eble iel, nevole, ĝi eĉ pikos lin per la korno!

— Ne iru tiel proksimen al li, — flustris al ĝi la azeno, kiu tuj divenis, kio movigas en la menso de ĝia kamarado. — Eĉ pensi vi ne rajtas pri tio, vi ja tuj vundus lin. Kaj eble ankaŭ el via salivo vi faligos iom sur lin, ĉar neniam vi ĝin retenas kaj ĝi ne estas io pura. Cetere, kial vi senĉese salivas, se vi estas feliĉa? Gardu ĝin por vi mem. Kial estas necese, ke ĉiu rimarku.

(La bovo silentas.)

— Sed mi, tuj vi vidos, proponos al li miajn du orelojn. Ili movigas en ĉiu direkto, ne estas en ili ostoj kaj oni povas ilin kapti. Estas en ili io timiga kaj samtempe trankviliga. Io tia, kio amuzas la etan infanon kaj krome estas eĉ instrua en lia aĝo.

— Bone, bone, mi komprenas vin, ne klarigu: neniam mi diris, ke ne estas tiel. Mi ne estas tiel stulta.

Sed ĉar la azeno havis tromemfidan vizagon, la bovo ankoraŭ daŭrigis:

— Sed ankaŭ vi ne kriacu en lian vizagon, ĉar per tio vi tuj mortigos lin!

— Kamparano! — respondis la azeno.

La azeno prenas lokon maldekstre kaj la bovo dekstre de la kripo, kiel en tiu momento, kiam Jesuo naskiĝis; kaj la bovo, kiu estas granda amiko al la etiketo kaj formoj, dezirus ĉiam tiel resti. Tiel ili staras dum horoj, humile kaj senmove, kvazaŭ ili servus modele al nevidebla pentristo.

La Infano fermas la palpebrojn. Li rapidas denove ekdormi. Jam atendas lin brila anĝelo kelkajn paŝojn post lia sono, eble por diri al li ion, aŭ peti lin pri io.

La anĝelo elpaŝas vivanta el la sono de Jesuo kaj aperas en la stalo. Unue li klinas sin antaŭ tiu, kiu ĵus naskiĝis, poste li pentras belan, puran aŭreolon super la kapo de la dormanto. Kaj duan al Maria, kaj trian al Jozefo. Poste li foriras dum blindiga plumkaj flugilsusurado, kies ĉiam moviganta kaj renoviganta blanko estas kvazaŭ tajdo.

— Ni ne ricevis aŭreolon, — konstatas la bovo. — La anĝelo certe scias la kia' on. Ni du, la azeno kaj mi, ne povas multe pesi. Kaj kion ni ja faris, ke ni meritu tian humkronon?

— Vi nenion. Tio certas. Sed pri tio, ĉu ne, vi ne pensas, ke Marian mi portis ĉi tien.

La bovo pensadas en si:

— Kiel estas eble, ke ĉi tiu bela, malpeza Virgulino povis portadi ĉi tiun belan infanon?

Sed eble ĝi pensadis laŭte kaj la azeno tuj respondas:

— Estas aferoj, fileto, kiujn vi ne povas kompreni.

— Kial vi diras ĉiam, ke mi ne komprenas. Finfine, mi ja vivis pli ol vi. Mi jam laboris supre sur la monto, sur la ebenajo, kaj apud la maro.

— Eh, ne pri tio temas! — respondas la azeno. Kaj poste:

— Ne nur aŭreolo estas sur li. Vidu, bovo, mi

estas certa, ke ĝis nun vi eĉ ne rimarkis tiun mirindan polvon, en kiu la Infano sin banas. Kion mi diras? Ĝi estas eĉ ne polvo, sed io pli delikata.

— Jes — respondas la bovo, — io pli facila ol la polvo, tia, kia la lumo. Ora nebulo, kiu radias el lia eta korpo.

— Jes, jes, tion vi diras nur tial, ke mi kreu, ke ankaŭ vi vidis ĝin.

— Kio, ĉu mi do ne vidis?

La bovo tiras post si la azenon al angulo, kien, signe de adoro, ĝi metis malgrandan branĉon ĉirkaŭatan de pajleroj: tiuj ĉi pajleroj simbolas la elradiadon de la dia korpo. Jen la unua kapelo. La pajlon ĝi portis elektare. Ĝi ne kuragiĝis tuŝi tiun de la kripo: ĉar ĝi havis tro bonan guston; la bovo ĝin timis.

Tute ĝis la vespero ekstere paŝadis sin la bovo kun la azeno. Kvankam plejofte la ŝtonoj nur malfacile kapablas kompreni, ekstere sur la kampoj jam troviĝis multaj, kiuj jam sciis. Ili eĉ vidis ŝtoneron, kiu signis per la ŝanĝiĝo de ĝia formo kaj koloro, ke ankaŭ ĝi sciis, kio okazis en la nokto.

Ankaŭ la kamparaj floroj sciis, ankaŭ ilin oni devis indulgi. Tiel hodiaŭ la paŝado sur la kampo estis preskaŭ laborego, se oni ne volis fariĝi sakrilegiulo. La bovo eĉ ne estis malsata. Cetere, la manĝon ĝi trovis ĉiam pli senutila. Ĝi satigis de feliĉo.

Antaŭ trinko ĝi demandis sin:

— Ĉu tiu ĉi akvo sciis?

Pro dubo ĝi ne trinkis kaj foriris iom pli malproksimen, al malpura flako, pri kiu estis evidente, ke ĝi sciis pri nenio.

Foje senfina dolĉo kuris kun la akvo malsupren tra ĝia gorgo: se el nenio alia, el tio ĝi devis sci, ke tiu akvo sciis...

— Jam estas malfrue — pensis la bovo —, mi devintus ne trinki el ĝi.

Eĉ spiri ĝi apenaŭ kuragiĝis, ĉar eĉ la aeron ĝi rigardis sankta kaj scianta. Ĝi timis, ke se ĝi prenos grandan enspiron, eble ĝi enspiruos anĝelon.

La bovo hontis, ĉar ĝi ne estis ĉiam tiel pura, kiel ĝi volis:

— Do mi estos pli pura de nun. Ĉiam mi atentos, kien mi metos la piedon.

La azeno fartis bone.

La suno inundis la stalon kaj la du bestoj kvarelis pri la honoro, kiu el ili kovru per sia ombro la infanon.

— Ne malutilis ja iom da sunlumo, sed la azeno ja dirus, ke eĉ tion mi ne komprenas.

La Infano dormetis plue kaj foje-foje li meditis dum sonĝo kaj suprentiradis la brovojn.

Foje la azeno per sia nazo tenere flankenturnis la infanon, dum la patrino, ekstere sur la sojlo, respondadis al la demandoj de la estontaj kristanoj.

Kiam Maria revenis, ŝi ektimis rigardante sian filon: ŝi serĉis lian vizaĝon tie, kie ŝi lasis ĝin antaŭe.

Kiam ŝi eksciis, kio okazis, ŝi komprenigis al la azeno, ke ne decas tuŝi la infanon. La bovo aprobis silente, sed ĉi tiu silento havis eksterordinaran sencon. Efektive, ĝi donis al ĉi tiu silento ritmon, punktadon, nuancon. En malvarmaj tagoj facile oni povis sekvi ĝian penson, per la longo kaj formo de tiu vapor-kolono, kiu fluis el ĝiaj naztruoj.

La bovo opiniis, ke ĝi nur nerekte povas servi Jesuon; ekzemple ĝi logis al si la muŝojn de la stalo (matene ĝi kutimis froti sian dorson al iu kirlujo plena de sovaĝmielo), aŭ ĝi premis al muro la malkonvenajn skarabojn.

Kaj la azeno konstante atentis al la bruoj venantaj elektare, kaj se io ŝajnis suspekta, ĝi starigis antaŭ la enirejo de la stalo. Kaj la bovo staris malantaŭ ĝi, ke tiel ili pli bone povu kontraŭstari. Ĉe tiaj okazoj ili iĝis tiom pezaj, kiom ili nur povis: dum la danĝero daŭris, ilia kapo kaj ventro plenigis de plumbo kaj granito. Sed iliaj okuloj brilis pli gardeme ol iam ajn.

Mirante vidis la bovo, ke Maria sciis ridetigi la infanon. Jozefo, kvankam li havis barbon, same kapablis tion, ĉu per la nura ĉeesto, ĉu per tio, ke li flutis. Ankaŭ la bovo estus volinta ludi al la infano. Finfine ja eĉ ne estas tiel malfacile, oni nur devas blovi en la fluton:

— Mi ne volas klaĉi pri mia mastro, tamen mi ne kredas, ke per sia spiro li povus varmigi Jesuon. Kiom koncernas la fluton, nu, nur unufoje mi estu sola hejme kun la infano; tiam mi ne timas lin tiom. Tiam li estas nur infano, kiu bezonas defendon. Kaj bovo tamen sciis ja, ke ĝi estas forta.

Kiam ili paŝtis sin kune, ekstere sur la kampoj, okazis plurajn fojojn, ke la bovo lasis la azenon sola:

— Kien vi iras?

— Tuj mi revenos.

— Sed kien do vi iras? — furiozis la azeno.

— Mi iras rigardi, ĉu li bezonas ion? Neniam oni povas scii.

— Sed kial do vi ne lasas lin trankvila?

La bovo tamen foriris. En la muro de l' stalo estis esplortruo, kiun poste, ĝuste pro tio, france oni nomis bov-okulo, kaj tra kiu la bovo povis facile ŝtel-rigardadi.

Foje la bovo rimarkis, ke Jozefo kaj Maria ne estas en la stalo. Ĝi trovis la fluton sur benko, apud la infano, kaj tiel, ke ankaŭ ĝi povis komforte atingi ĝin per la buŝo.

— Ho, kion nun mi ludu al li — diris al si la bovo, kiu nur per ĉi tiu muzikilo kuragiĝis proksimiĝi al Jesuo. — Eble kamparanan kanton? Aŭ la marŝon de la kuraga taŭrido? Aŭ la kanton de la sorĉita vir-bovido?

Ofte la bovoj faras, kvazaŭ ili remaĉus, kvankam ilia animo kantas.

La bovo blovis malforte en la fluton kaj ankaŭ tio estas ebla, ke ia anĝelo helpis al ĝi en la muziko. La infano iom levigis, kaj per la kapo, kaj per la ŝultroj, ke li pli bone vidu. La flutisto tamen ne estis kontenta pri la rezulto. Kontraŭe, ĝi estis certa, ke neniu aŭdis ĝin ekstere. Sed koncerne tion ĝi trompigis.

Ĝi eĉ tuj fuĝis, ĉar ĝi timis, ke iu, kaj ĉefe la azeno, povas enveni kaj ĝin surprizos apud la fluto.

— Venu jam, rigardu! — diris Maria al la bovo iun tagon. — Kial vi neniam venas pli proksimen al mia infano?

La bovo kuragiĝis kaj starigis proksime al Jesuo, kiu por kuragiĝo karesis ĝian buŝon. La bovo retenis la spiron, ĉar ja nun tiu ne estis bezonata. La malgranda Jesuo ridetis. La feliĉo de l' bovo estis senvoĉa. Tiu feliĉo plenigis ĝian korpan formon tute ĝis la pintoj de l' kornoj.

La infano alterne rigardadis la azenon kaj la bovon, la azenon, kiu eble estis tro certa pri sia afero, kaj la bovon, kiu sentis sin tiel malluma apud la interne lumanta malgranda vizaĝo, kiel se lampo iradus malantaŭ malpezaj, blankaj kurtenoj, en la ĉambroj de malgranda kaj fora loĝejo.

Kiam la infano rimarkis, kiel malluma estas la bovo, li komencis laŭte ridi.

Kompatinda besto, ĝi ne vidis klare en tiu ĉi infana rido kaj senĉese ĝi dubadis, ĉu eble mokas lin la infano. Eble ĝi estu pli retenigema? Aŭ eble ĝi devus tute foriri?

Tiam la infano ree ridis, sed per tiel brila, tiel infana rido, ke la bovo komprenis: kuraĝe li povas resti en lia proksimo.

Maria kaj ŝia infano ofte de proksime rigardis unu la alian. Kaj kvazaŭ ili konkuris, kiu estas pli fiera pri la alia.

— Mi kredas, — pensis la bovo, — ke ili vivas en konstanta ĝojo. Ja neniam estis pli pura patrino kaj pli bela infano sur tiu ĉi tero. Kaj tamen, kiel serizoa estas kelkfoje la vizaĝo de ambaŭ!

Foje la bovo kaj azeno estis ĝuste antaŭ enpaŝo en la stalon. Kiam ili bone ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ pro timo, ke ili eble eraras:

— Rigardu nur tiun stelon, kiu tie sur la ĉielo venas al ni, kiel bela ĝi estas, preskaŭ ĝi varmigas mian koron, — diris la bovo al sia kunulo.

— Lasu nur trankvila vian koron. Ĝi ja havas nenian rilaton kun tiuj ĉi grandaj aferoj, kies atestantoj ni estas de certa tempo.

— Nu, kion ajn vi diras, ĉi tiu stelo venas al ni. Rigardu nur, kiel malalte ĝi iras sur la ĉielo. Kvazaŭ ĝi venus ĝuste al la stalo. Kaj sub ĝi, ĉu vi vidas, venas tri homoj, kun multaj juveloj.

Kiam la du bestoj venis al la sojlo del' stalo:

— Kion vi pensas, bovo, kio okazos?

— Multon vi demandas de mi, azeno, sufiĉas al mi, kion mi vidas. Eĉ ofte tio jam estas tro multa.

— Mi havas ideon.

— For, for, iru jam — diris al ili Jozefo el la pordo. — Ĉu vi ne vidas, ke vi baras la vojon kaj ne lasas enveni la fremdulojn?

La bestoj starigis flanken, por enlasi orientajn reĝojn.

Ili estis triope kaj unu estis nigra de plando ĝis verto: li simbolis Afrikon mem. Komence la bovo diskrete sed konstante atentis pri li. Nome, ĝi volis vidi, ĉu vere kun bona intenco venis la negro al la infano.

Kiam la vizaĝo de la nigra reĝo, kiu verŝajne estis miopa, kliniĝis super la etan Jesuon, ĝi tiel bele respugulis la bildon de l' infano, tiel pure, tiel glate, kun tiel granda humilo kaj kun tiel plena sinforgeso, ke la koron de l' bovo trapenetris granda dolĉo.

— Tiu ĉi devas esti granda sinjoro — ĝi pensis nun en si; — la aliaj du certe ne povus tion fari! Kaj post kelkaj minutoj ĝi aldonis:

— Kaj eble li estas la plej bona el la tri.

Nome la bovo observis, ke la blankaj reĝoj forŝtelis el la kripo po unu pajleron, kiun ili poste kun granda atento kasis en sia pakajo. Sed la nigra reĝo nenion forportis el la stalo.

Unu apud la alia, sur improvizita lito, kiun la najbaroj pruntedonis, la tri reĝoj dormis en la stalo.

— Kiel strange, — pensis la bovo, — ankaŭ dum dormo ili surhavas la kronon. Kaj ĉi tiu dura aĵo ja povas esti eĉ pli malbona, ol miaj du kornoj. Kaj tiuj ĉi multaj brilantaj juveloj ne lasas ilin dormi.

Sed ili dormis tiel saĝe, kiel la statuoj sur la tomboj. Kaj ilia stelo brilis super la kripo.

Antaŭ tagigo, ĉiuj tri leviĝis samtempe, per unu gesto. En sia sonĝo dum la nokto ĉiuj tri vidis la saman anĝelon, kiu konsilis al ili, ke ili tuj foriru, ne vizitu Herodon kaj ne diru al la tirano, ke ili vidis la Infanon.

Ili foriris, sed la stelon ili lasis super la kripo: ja ĉiu eksciis, ke ĉi tie okazis

Al la malgranda frat' de mia koro...

— Harriet Löwenhielm —

Al la malgranda frat' de mia koro
donaci volus mi el trezorkest'
juvelon brilan pli ol Koh-i-nooro.
Mi volus pli —
sed atestvokas Dion,
ke mi nenion havas, ve, nenion,
sed pri feliĉ' de l' frato preĝos mi.

Surmeti volas mi pilgrimantelon,
kaj post senfine longa pilgrimad'
mi genutrenos min en templohelon,
sur la marmor'
min klinos ĉealtare,
kaj petos mi senĉese, humilkar
ĝis »Tiel estu!« diros Di'-Sinjor'.

Mi frunton premos teren kaj infane
petegos: Di-Sinjoro, Cebaot!
Vi, kiu tenas ĉiun ĝojon mane,
vin petas mi:
Mi havas fraton etan —
el via riĉ' juvelon multifacetan
el ĝoj' senlima donu, ho, al li!

— feliĉon tian, ke ĝi, eĉ sentate
momenton nur, lin ravu ĝis kapturn',
sed ne permesu, ke ĝi velku sate!
Mi petas vin:
Donacu senmezure!
Sed, Dio, kiam reĝos li purpure,
ho faru, ke li ne forgesu min...

Tradukis: *Magda Carlsson.*

LA PREGO DE L' BOVO.

— Ĉiela Infano, ne ĵugu min laŭ mia timiĝinta kaj senkomprena vizaĝo. Ĉu venos foje la tago, kiam mi estos simila al malgranda moviĝanta roko?

Kaj sciu, tiuj ĉi du kornoj estas nenio alia ol nura kapornamo. Eĉ, mi konfesas al vi, ke neniam mi uzis ilin.

Eta Jesuo, ĵetu iom da lumo en ĉi tiun konfuzon kaj malriĉon, kiu mallumas en mi. Donu ankaŭ al mi iom el via delikateco, Vi, kies etaj manoj-piedoj tiel zorge gluigas al via korpo. Ĉu vi diros iam, malgranda Sinjoro, kial mi povis vin vidi ĉiun tagon, devante nur flankenturni la kapon? Se vi sciis, ho mirinda Infano, kiom dankema mi estas al Vi, ke mi nun povas genui ĉi tie en via grac-dona ĉeesto, kaj ke mi povas vivi en sama familio kun la anĝeloj kaj steloj! Kelkfoje mi demandas al mi, ĉu oni ne erarigas vin, kaj ĉu vere mi devas esti ĉi tie, apud vi: ĉar eble vi ne rimarkis, ke granda cikatro estas sur mia dorso, kaj ke sur unu mia flanko eluziĝis tufo da haroj, kio vere estas sufiĉe malbela. Eĉ se vi restus ĉe mia familio, certe vi trovus pli belan, pli bonan ol mi, ekzemple mian fraton aŭ ĉiun mian kuzon. Kaj ĉu la leono aŭ la aglo ne estus pli konvenaj?

— Silentu jam — diris la azeno, — kial vi ĝemadas tiom; ĉu vi ne vidas, ke li ne povas dormi pro via eterna remaĉado?

— Gi pravas — diris al si la bovo —, oni devas scii ankaŭ silenti, se venis ties tempo, eĉ se mia feliĉo estas tiel granda, ke ni ne scias ĝin kien meti.

Sed ankaŭ la azeno preĝis, en la jena maniero: — Selaj' azenoj, ŝarĝaj azenoj, vidu, bela estos la vivo kaj la azenidoj sur gajaj kampoj povas atendi

novajn aferojn. Dank'al vi, malgranda junulo, la ŝtonoj nun jam povas resti sur sia loko ĉe la vojrandoj kaj de nun ili ne falos, kiel ĝis nun, sur la azenojn. Ankoraŭ io. Kial propre estas tiel pena nia vojo, kial tiuj multaj deklivoj, kaj tiu eterna montgrimpado? Ĉu ne estas pli bone por ĉiu, se ĉiu vojo estus ebena? Kaj kial tiu ĉi bovo ĉi tie, kiu estas multe pli forta ol mi, neniam portas iun sur la dorso? Kial estas tiel longaj miaj oreloj, kial tiel nuda mia vosto, kial tiel malgrandaj miaj hufoj, kial tiel mallarĝa mia brusto kaj kial similas mia voĉo al la koloro de malbona vetero? Sed, ĉu ne, ĉio ĉi ne estas definitiva kaj estas espero pri ŝanĝo?

Ĉiam alia kaj alia stelo gardostaris dum la sekvantaj noktoj. Foje tuta stelarbildo. Ke la sekreto de l' ĉielo neniu rimarku, ĉiam nuboj kovris la lokon de la forestantaj steloj. Kiel bele estis vespere, kiam tiuj foraj kaj senfinaj steloj iĝis malgrandaj, tute malgrandaj, ke ili povu sin loki super la kripo, kaj kiam ili gardis en si sian lumon, la troon de sia grandeco kaj varmo, ŝutante el ĝi nur tiom, ke ili nur varmigu kaj lumigu la stalon, sed ne timigu la infanon. Tiaj estis la plej unuaj noktoj de la kristaneco: Maria, Jozefo, la Infano, ankaŭ la bovo kaj la azeno, tiam mirinde kaj tute estis si mem. Ilia propra simileco, kiu tage disemigis kaj diseriĝis inter la vizitantoj, post krepusko brilis per mirakla forto kaj certo.

Pere de la bovo kaj azeno ankaŭ aliaj bestoj petegis, ke ili povu ekkoni la Infanon. Kaj vere, iun belan tagon, kun la permeso de Jozefo, la bovo komisiis rapidan kaj bravanan ĉevalon, ke ĝi kunvoku ĉiujn, kiuj volas veni la sekvantan tagon.

Kaj la azeno kaj la bovo komence maltrankviligis, ĉu ili povas enlasi la timigajn sovaĝbestojn, la elefanton, la dromedaron, la kamelon, t. e. tiujn bestojn, kiujn iĝis iom suspektaj ilia ĝibo, rostro, aŭ cetera viand- aŭ ostusuperfluo.

Same ili antipatis al tiaj timigaj insektoj, kiaj ekzemple la skorpioj, la tarantuloj, gigantaj araneoj, vipuroj kaj ĉiuj kreaĵoj, kies glandoj sekrecias venenon, ne nur nokte, sed ankaŭ tage, eĉ en la aŭroraj horoj, kiam ĉio estas ankoraŭ pura.

Sed Maria ne hezitis:

— Ĉiuj povas enveni. Mia infano estas en sia kripo en tia sama sekuro, kvazaŭ li estus supre en la plej alta ĉielo.

Sed unuope! — aldonis Jozefo per preskaŭ soldata voĉo. — Mi ne permesas, ke samtempe du bestoj transpaŝu la sojlon, ĉar tiam la konfuzo estus granda.

Unue venis la venenaj bestoj, ĉiu kun la sento, ke ĉi tiun kontentigon oni ne povas rifuzi al ili. Ĉiu rimarkis la diskretecon de la serpentoj: ili ne kuragiĝis rigardi al Maria kaj klopodis kiel eble plej malproksimen tiriĝi de ŝia persono. Kaj ili foriris kun la sama trankvilo kaj digno, kvazaŭ ili estus nur kolomboj aŭ domgardantaj hundoj.

Krome, inter la ceteraj estis ankaŭ tiel etaj bestoj, ke preskaŭ oni ne povis scii, ĉu ili estas interne, aŭ atendas ekstere. La atomoj ricevis plenan horon, por sin prezenti unuope kaj ĉirkaŭmarŝadi la kripojn. Kiam la horo pasis, Jozefo ja sentis sur la haŭto, ke io lin pikas, do ke ankoraŭ ne ĉiu foriris, sed tamen li ordonis, ke venu la aliaj.

La hundoj tre miris: ili ne komprenis, kial ili ne povas konstante resti en la stalo, kiel la bovo kaj la azeno. Neniu sciis kion respondi al ili, tial oni nur karesadis ilin. Tiam ili foriris kun videbla danko en la koro.

Tamen, kiam ili eksentis per la odoro, ke la leono venas, la azeno kaj la bovo komencis tre maltrankviligi. Se ne paroli pri tio, ke tiu ĉi odoro penetris tra la incenso, mirho kaj ĉiu alia parfumo, kiun la tri reĝoj lasis ĉi tie.

La bovo taksis alte la grandanimecon de Jozefo kaj Maria. Tamen, ĝi pensis, ĉu lias lasi infanon, ĉi tiun malfortan etan lampon, apud besto, kies spiro povas subite estingi ĝian lumon...

La maltrankvilo de l' bovo kaj azeno kreskis ankaŭ pro tio, ke ili opiniis deca rigidigi antaŭ la leono. Ke ili ĝin ataku, pri tio ili same ne povis pensi; kiel ili ne povis ataki la fulmon aŭ la tondron. Cetere, la bovon jam malfortigis la fastado kaj iel ĝi sentis sin plie aereca ol batalema.

Venis do ankaŭ la leono, kun sia vent-kombita kolhararo, kaj kun tiel trista rigardo, kvazaŭ ĝi dirus: — Mi estas la leono, sed kion mi povas fari kontraŭ tio, mi estas nur la reĝo de l' bestoj.

Vidigis sur ĝi, ke ĝia ĉefa zorgo estas okupi en la stalo kiel eble plej malgrandan lokon, kio ne estis facila afero; kaj al neniu malutili per sia spiro, ĉirkaŭ si, kaj forgesi, dum ĝi ĉeestas, pri siaj retireblaj ungegoj kaj potencmuskolaj makzeloj. Kun mallevitaj okuloj ĝi venis antaŭen, kaŝante siajn pompajn dentojn kvazaŭ hontindan malsanon, kaj tiel modeste, kiel decas al tiu leonspeco, kiu iun tagon ne manĝegos sanktan Blandinan. La Virgulino ekkompatis ĝin kaj provis ĝin trankviligi per tia rideto, kian ŝi gardis nur por la infano. Sed la leono rigardis nek dekstren, nek maldekstren, nur antaŭ sin, kvazaŭ ĝi dirus, sed nun jam pli amare ol antaŭe:

— Kiom mi respondas pri tio, ke mi estas tiel granda kaj forta? Vi ja scias, ke mi manĝis, nur se instigis min je tio la libera aero kaj la malsato. Kaj vi ja povas kompreni, ke mi havas ankaŭ etajn idojn. Kiofoje provadis jam ankaŭ mi, fariĝi herbmangan-toj. Sed vane, la herbo ne estas por mi. Neniam mi povis ĝin gluti.

Poste ĝi klinis tiun monstre grandan kapon, kiu similis al dis-eksplozanta har-arbarego kaj kuŝigis malĝoje sur la dura tero. La malgranda hartufo sur la fino de ĝia vosto ŝajnis same trista kiel ĝia kapo, kaj tiu subita granda silento estis malbonvena al ĉiu.

Kiam venis la vico de l' tigro, ĝi steruigis sur la tero de l' stalo, ke post la multa fastado kaj mizero ĝi ŝajnis vera tapiŝo, antaŭlita tapiŝo apud la lito. Post kelkaj momentoj ĝi ree iĝis vivanta tigro, preciza, elasta kiel maŝino kaj foriris sen vorto.

La ĝirafino nurpor momento montris siajn hufojn en la pord-aperturo, kaj ĉiu opiniis, ke tio kalkulas same, kvazaŭ ĝi estus ĉirkaŭmarŝinta la kripojn. Tiel faris ankaŭ la elefanto: ĝi nur genuis ĉe la sojlo de la stalo kaj sian rostron ĝi movis kvazaŭ veran incensujon, kio plaĉis al ĉiu.

Longa-longa-lana ŝafido volis, ke oni tondu ĝin, eĉ tuj: sed oni bele dankis kaj ne tuŝis ĝian lanon.

La kangurulo nepre volis doni sian idon al Jesuo: ĝi asertadis, ke ĝi donas volonte, ke ĝi ne mankos al ĝi, ĉar ĝi ja havas ankoraŭ multajn idojn hejme. Sed ankaŭ tion ne akceptis Jozefo kaj la kangurulo reportis sian idon.

La struto jam estis pli felika: ĝi uzis la okazon, kaj kiam neniu atentis, ĝi demetis sian ovon en la angulo de l' stalo kaj poste silente foriris. Ĉi tiun memoraĵon nur en la sekvanta tago oni rimarkis. La azeno vidis ĝin unua. Neniam ĝi vidis ankoraŭ tiel grandan kaj duran ovon kaj ĝi kredis, ke ĝi estas

atesto de miraklo. Sed Jozefo klarigis al ĝi, kiel li povis: el la ovo li faris fritajon.

La fiŝoj ne povis veni, ĉar ili spiras tre mizere ekster la akvo, do anstataŭ si ili sendis la mevon kiel deputiton.

La birdoj sian kanton, la kolomboj sian amon, la simioj siajn ŝercojn, la katoj sian rigardon postlasis, kaj la turtoj la mildon kaj afablon de sia gorgo.

Ankaŭ aliaj bestoj volis veni, tiuj, kiuj estas ankoraŭ nekonataj kaj atendas, ke oni donu al ili nomon, en la profundo de l' maro aŭ de l' tero, kie ili vivas en eterna nokto, sen steloj, sen luno kaj sen alterno de l' sezonoj.

En la aero oni povis senti la animon de tiuj estaĵoj, kiuj ne povis veni, aŭ kiuj forrestis sur la vojo, de tiuj, kiuj loĝas malproksime, sur la alia fino de l' tero, sed kiuj tamen ekiris sur siaj etaj skarabpedoj, sed kiuj en tuta horo povas trairi maksimume unu metron, dum ilia vivo estas tiel mallonga, ke eĉ duonmetron apenaŭ ili povas esperi, se ili ne havas eksterordinaran bonŝancon.

Kompreneble okazis ankaŭ mirakloj: la testudo rapidis, la igvano provis iri pli malrapide, la hipopotamo gracile klinadis siajn genuojn, kaj la papagoj silentis.

Kelkajn minutojn antaŭ krepusko okazis malagrabla akcidento. Jozefo, kiu jam laciĝis de tio, ke tutan tagon malsate-soife li direktadis la marsadantojn, tretis en distra momento sur venenan araneon, kvankam ankaŭ tiu venis nur por fari salutviziton antaŭ la infano. La taŭzita kaj dolora vizaĝo de la sanktulo konsternis ĉiun por longa minuto.

Aliaj bestoj, kvankam oni atendis de ili pli multan takton, simple restis plue en la stalo: la bovo estis devigata forigi la mustelon, la sciuron, la melon kaj ankoraŭ kelkajn bestojn, kiuj ne volis foriri.

Restis tie ankaŭ kelkaj vesperaj papilioj, ĉar ilia koloro similas al la trabo de l' tegmento kaj tiel la tutan nokton ili povis pasigi super la kripo. Sed la sekvantan tagon tuj malkovris ilin la unua sunradio kaj, ĉar Jozefo ne permesis favori iun ajn, li tuj forpelis ĉiujn.

Ankaŭ la muŝojn ili alvokis foriri. Sed ili, kun sia obstino, komprenigis al Jozefo, ke ili ĉiam estis tie; do Jozefo ne povis kontraŭdiri.

La ĉielaj fenomenoj, kiuj ĉirkaŭis la bovon, ofte igis ĝin reteni sian spiron. Ĉar ĝi iom post iom kutimiĝis, kiel la aziaj askotoj, reteni la spiron, ĝi iĝis samtaŭ klarvidanto kiel tiuj, kaj, kvankam ĝi pli bone fartis en la humilo ol en la sublumo, baldaŭ ĝi havis viziojn. Sed eĉ en tiuj vizioj ĝin gvidis ia timo kaj ĝi neniam kuragiĝis imagi anĝelojn aŭ sanktulojn. Ĝi vidis ilin nur tiam, kiam ili vere estis en ĝia proksimo.

— Mi kompatindulo — pensis la bovo, kiun pli kaj pli timigis ĉi tiuj suspektaĵaj fenomenoj, — mi kompatindulo, ĉu ĉi tion bezonas mi, kiu estas nur mizera besto, aŭ eble mem la demono! Kial mi ja havas tiujn du kornojn, kiajn li, kvankam neniam mi faris malbonon? Eble mi estas ia sorĉisto!

Jozefo baldaŭ rimarkis la maltrankvilon de l' bovo, kiu maldikiĝis okulvideble.

— Kial vi ne iras vin paŝti? — li diris al ĝi. Tutan tagon vi flankumas ĉi tie ĉirkaŭ ni kaj baldaŭ vi iĝos nura osto kaj haŭto.

La bovo eliris kun la azeno.

— Li pravas, vi maldikiĝis — diris al ĝi la azeno. — Viaj ostoj estas tiel pintaj, ke sur via tuta korpo kreskos kornoj.

Karinjo

— Ture Nerman —

Gracila; eta, nur dekkvin,
la haroj: lin'.
Kaj supre blu-bluas ĉielomuslin'.
Sekvante vin
sin gimnazianoj balancas;
glacio degelas en vintrofin',
kaj dek-du ventoj dancas.

Sed trista, kun jaroj tridek-tri,
ĉeflanke mi,
la faŭno mallela, ne pensas pli
al melankoli',
pro juna ir', linharoj...
fororgesas, ke homoj ridetus pri
la tri kaj tridek jaroj.

Ne timu do! Ne, etulin'!
Rigardu min!
Ne plue okazos tia krim':
viderti vin;
nur kiam, plenkreska, iame
sen ĝeno vi scios pri vira inklin',
kiel ĝi fajras flame.

Por mi: matura florigarden'.
Ne mankas jen
la formoj kaj flirto kaj ĉirkaŭpren'
por volvi min en
mantelon de ruĝa ebrio.
Por gimnazian': via flora liptrem'
en iu ŝtupar' en Junio.

Do iru en rosfrēja jun'
sub Marta sun'
— de knabokuroj la trenum' —
surstrate kun
esper', Feliĉon trovi.
L' okulojn fermos la Maljun'
obee. (Kiel povi?)

Mi ĝemos... ne vidos, tute ne;
memoros, ke
vi estis por mi kiel blua fe',
poezi', rimkre',
kantet' el senkulp' kaj harlino,
infanbal-melodi', kiu premas ĉe
la gorgo kun ĝena obstino...

Kaj tiel, dum pasos kun susur'
la tempokur'
kaj vi maturiĝos por rab' kaj tortur'
mi staras nur
fenestre je Martaj gutsonoj
kaj dankas ridlarme al dio Natur'
pro liaj novaj burĝonoj.

Tradukis: *Magda Carlsson.*

— Nur ne parolu pri mia korno!

Kaj la bovo diris al si mem:

— La azeno pravas! Jes, vere, oni devas vivi.
Rigardu, kial vi ne ekordas ĉi tiun belan verdan
herbtufon. Ĉu vi kredas eble, ke ĝi malufilos? Aŭ tiun
alĵan. Ĉu vi imagas eble, ke ĝi estas venena? Ne, ne,
sed mi ja ne estas malsata. Kiel bela estas ĉi tiu in-
fano! Kaj tiuj lumaj figuroj, kiuj venas kaj foriras
kaj kiuj kvazaŭ spiras nur per la vibrantaj flugiloj.

Kiel bela estas tiu ĉiela popolo, ili eĉ ne makulas sin en nia simpla stalo. Manĝu, bovo, ne zorgu pri tio! Kaj ne lasu, ke vin veku ĉi tiu ĉiela feliĉo, kiam en la profundo de l' nokto subite ĝi ekiras vian oreilon, kaj ne restu tiel longe ĉe la kripo sur unu genuo, ĉar jam doloras via piedo. Via haŭto, kvankam bovohaŭto, jam tute vundigis ĉe la artikoj kaj se ĝi ankoraŭ pli vundigos, surflugos ĝin ankaŭ la muŝoj.

Iun nokton la stelarbildo de la Taŭro gardostaris super la kripo, en la mezo de granda peco de mal-luma ĉielo. La ruĝa okulo de Aldebaran flamis brile kaj belege, tute proksime. Kaj sur la kornoj kaj ingvenoj de l' taŭro pompadis grandegaj juveloj. La bovō estis tre fiera, ke tiel bone oni gardas la infanon. Ĉiu dormis trankvile, ankaŭ la azeno, kun siaj malsuprenkliniĝintaj kaj fidantaj oreloj. Nur la bovo estis maltrankvila kaj malforta, kvankam ĝi ĝojis pri la ĉeesto de tiu parenca kaj amika stelarbildo. Ĝi meditadis pri ĉio, kion ĝi oferis al la Infano, pri siaj senutilaj vigladoj, pri sia ridinda defendado.

— Cu vidas min la stelarbildo de l' Taŭro? — ĝi pensis en si. — Tiu stela, ruĝa okulo, kiu tiel brilas, ke mi preskaŭ timas; ĉu ĝi scias, ke mi estas ĉi tie? Tiuj multaj steloj estas tiel malproksime, tiel alte, ke oni eĉ ne scias, kien ili rigardas.

Subite Jozefo, kiu jam de kelkaj minutoj maltrankvile baraktadis sur sia kuŝejo, levigis levante la brakojn al la ĉielo. Li, kiu ĝis nun estis tiel trankvila en ĉiu sia movo kaj vorto, nun, meze de la nokto, vekis ĉiujn, ankaŭ la Infanon!

— En songo mi vidis la Sinjoron. Sen prokrasto ni devas ekiri. Pro Herodes, jes, pro li, ĉar li koleras Jesuon.

Maria prenas sian filon en la brakon, kvazaŭ la reĝo de l' judoj jam estus ĉi tie en la pordaperturo, kun granda buĉhakilo en la mano.

Jam ankaŭ la azeno estas surplande.

— Kaj ĝi? — diras Jozefo al la Virgulino montante al la bovo.

— Mi timas, la kompatindulo estas tre malforta. Ĝi ne povus veni kun ni.

La bovo volus montri, ke ne estas tiel. Egan fortostreĉon ĝi faras, ke ĝi stariĝu, sed ankoraŭ neniam ĝi sentis sin tiel ligita al la tero. Tiam, kvazaŭ petante helpon, ĝi rigardas al la stelarbildo de l' Taŭro. Ĝi povas kalkuli jam nur pri ĝi, por ke ĝi havu forton al la ekiro. La ĉiela taŭro eĉ ne moviĝas; ĝia okulo estas same flamanta kaj ruĝa, kaj ankaŭ nun ĝi rigardas flanke al la bovo.

— Ĝi ne mangas de tagoj — diras la Virgulino al Jozefo.

— Ho, mi komprenas, ja mi komprenas, ke oni lasas min ĉi tie — pensas la bovo. — Estis tro bele, ne povis daŭri longe. Cetere, kio igus el mi sur la vojo. Ostea kaj malfruigema fantomo. Por miaj ripoj eĉ la haŭto estas peza kaj ili havas ununuran deziron, ke ili ripozu sub la ĉielo.

La azeno nun iras al ĝi kaj frotas al ĝi sian nazon, per kio ĝi volas sciigi la bovon, ke Maria konfidis ĝin al najbarino, kaj ke ĝi havos ĉion, eĉ se ili jam ne estos ĉi tie. Sed la bovo, kun duonfermitaj palpebroj, ŝajnas preskaŭ mortinta.

Maria karesas ĝin kaj diras:

— Sed ni ja ne iras al granda vojo. Ni diris tion nur por vin ekstimigi!

— Jes ja, ni baldaŭ revenos — diras Jozefo; — kiel ni irus nun malproksimen, en ĉi tiu granda nokto!

La fendita sonorilo

— Charles Baudelaire —

Estas amare-dolĉe, dum vintronoktoj blankaj aŭskulti ĉe la fajro de treme vibra brulo la forajn rememorojn lante relevigantajn ĉe l' son' de l' sonoriloj kantantaj tra l' nebulo.

Ho sonoril' feliĉa, kun gorgo fortoŝvela, vi, spite la maljunon, kun gajfresa akcento dissendas vian krion plenan de kred' fidela, kiel soldat' maljuna, viglanta sub la tendo!

Fendita estas mia anim', kaj se enuante ĝi volas vivplenigi la noktan froston kante, ĝi ofte eksimilas per voĉo invalida

al raŭka kaj stertora vundito, forgesita sub piramid' kadavra, apud sangflaga bordo, kaj mortanta senmove en ega streĉ' de forto.

El la franca: *Lali Blond.*

Sensacio

— Arthur Rimbaud —

Dum la somervesperoj inklubaj sur vojetoj grenkampaj mi promenos tretante l' herbon mutan; revante, ĝian freŝon mi sentos ĉe l' piedoj, kaj al la vent' mi lasos bani la kapon nudan.

Mi pensos pri nenio, kaj mi nenion diros: sed am' senfine vasta inundos tra l' animo; kiel cigan' vaganta al malproksim' mi iros, tra la Natur', — feliĉa, kiele kun virino.

El la franca: *Lali Blond.*

— Estas bela stelplena nokto — diras ree Maria, — ni portas la Infanon eksteren, al la aero, li ja estas tiel pala nuntempe.

— Jes ja, nur tial — diras la Sanktulo.

Sed tio estas nur pia mensogo. Bone scias tion la kompatinda bovo kaj, ĉar ĝi ne volas ĝeni la foriantojn, ĝi faras, kvazaŭ ĝi dromus en profundan dormon. Kaj tio estas ĝia mensogo.

— Ĝi ekdormis — diras Maria. — Ni metu la pajlon de l' kripo ĉi tien, tute apud ĝin, por ke ĝi havu ĉion, kiam ĝi vekigos. Ni lasu ĉi tie ankaŭ la fluton — tre-tre mallaŭte ŝi diras ankoraŭ, — tute proksime al la ĝia spiro; ĝi amas hudi per ĝi, kiam ĝi estas tute sola.

Ili jam iras, la pordo de l' stalo ekknaras. — Mi estus devinta ĝin olei — pensas en si Jozefo, ĉar li timas, ke li vekos la bovon; sed ankaŭ nun ĝi faras ankoraŭ, kvazaŭ ĝi dormus profunde.

Silente ili fermas la pordon de l' stalo.

Kaj dum la azeno de l' kripo iom post iom transformiĝas je l' azeno de l' Fuĝo al Egipto, la bovo restas en la stalo kaj nur rigardas la pajlon sur kiu antaŭe ripozis la Infano.

Ĝi scias bone, ke neniam ĝi tuŝos ĝin: nek ĝin, nek la fluton.

La stelarbildo de l' ĉiela taŭro svingiĝas sur la Zeniton kaj per sola kornpuŝo ĝi fiksiĝas sur tiu loko de l' ĉielo, kiun ĝi plu neniam forlasos.

Kiam nelonge post la tagiĝo la najbarino venis en la stalon, la bovo jam ĉesis remaĉi.

El la franca: *L. Létinois.*

La robo de l' avino

— D. Anghel —

Blanka kiel purigita stupo estis la kapo de avino, ŝaŭmo sur maraj roketoj ŝia hararo, de neniu printempo degeligebla neĝo kovris konstante ŝian frunton.

La iama nokto transformiĝis en blankan tagon, la mallumo en lumon, en puran argenton la ebono.

Tro frue ŝi iĝis fianĉino. Kun korpo ankoraŭ eta, preskaŭ infana, ŝi paŝis antaŭ la altaron. De sub la lipia*) florkrono blanka kiel kometa vosto, sub la orfadena vualtoŝento, la silka kaptuko pendis ĝis ŝiaj kalkanoj. La longa rando de ŝia fianĉina robo desegnis zigzagajn ondojn ĉie, kie ŝi trapasis. Juna la nuda kolo kaj junecaj la ŝultroj ankoraŭ ne rondiĝintaj videblis el la lerta tranĉaĵo de l' tondilo, kiu majstre disfendis la blankan silkŝtofon.

La kurbo de l' ekbrustoj apenaŭ levetis la malgrandan veŝton. La akraj koksoj vidiĝis tra la robo. Kaj antaŭe la faldoj rigide falis malsupren ĝis la etaj piedoj, rigide kaj malgaje, kiel decas, ke ili falu laŭlonge de la korpo de vestalino.

Larga zono farita el banto, kun oraj viloj ĉe la ekstremajo, ĉirkaŭis ŝian talion kaj dividiĝis en du partojn sur la maldekstra kokso. Silka, delikate teksita poŝtuko, kvazaŭ el neĝo dumnokte falinta, vidiĝis sian orbroditan angulon.

Tiel, en la akompano de l' edziĝa gastaro, la avino transpaŝis la sojlon de la preĝejo. Jene forvaporigis la pluvo de l' argenta sonaro, kiu falis el la sonorilo de l' praturo sur tiun ĉi fianĉinon, kiel ni prikskribis ŝin. Jene aspektis la robo de tiu, kiu en tro frua aĝo paŝis antaŭ la altaron kaj klinis sian gracion kapon, ke la etenditaj manoj de l' pastro metu sur ĝin la oran edziĝkronon.

*

Poste la blanka silkrobo restis zorge kunfaldita. Blanka ŝaŭmo malaperis en la kesto, ora plektaĵo premis la kapvualon en ondon de diafana silkteksaĵo, kiu iam pendis ĉe la kapo de l' virgulino.

Konservante, kvazaŭ en ĉerko, la mezuron de tiama korpo de la virgulinaj formoj, kiuj neniam revenos, la robo dormis daŭre en la malnovega kesto plena de lavendo kaj ocino; la blanka pruvo restis forgesita, la longa orfadeno daŭre brilis, spite de jarlongoj kaj mallumo.

*

La junaga knabineto, kun mallargaj ŝultroj kaj akraj koksoj, iĝis virino. Plenaj brustoj levis la blankan kaj rozan buston, abunda sano plenis la manojn kaj rondiĝis la angulojn. La hontemaj kavetoj kovriĝis sur la vizaĝo, kaj la iama korpeto iĝis forta kaj muskolplena ĉirkaŭ la ostaro.

Unu post la alia aro da infanoj etendis palpe siajn manojn al la faldoj de l' robo, kiun ŝi nun portis; avide soifaj rozlipetoj etendiĝis al ŝiaj cicoj. La spegulo montris ŝin ĉiam alimaniere: jen kun larmoj en la okuloj, jen kun rideto sur la lipoj; nun kun serena frunto, alfoje kun malluma animo.

*

Kaj la blanka ŝaŭmrobo daŭre dormis en sia ĉerko, konservata por la morto, por la lasta vestado, por blanke eniri la mallumon dum la lasta sono, kiu dis-

blovos orajn erojn sub nigra portalo, ĉe kies sojlo gardstaras angelo kun torĉo turnita teren.

Por ŝia korpo ĝi ŝajnis nun puprobo, kvazaŭ vosto, kiu iam apartenis al alia, kaj ornamaĵo iam portata de fratino, kiu mortis delonge, aŭ floro, kiu velkis kaj falis el bukedo kolektita dum feliciaj tagoj.

Si konservis ĝin por la horo, kiam la manoj dormos palaj sur la brusto, por la momento, kiam la okuloj ne plu povos rigardi en la spegulon. Por tiu momento, kiam koketado estos vana kaj ŝi ne plu vestos sin, sed restos trankvila, ke aliaj devos ŝin ornamu

*

Ridis la filinoj kaj nepinoj, ĉar multaj jaroj pasis ĝis tiam. Jen ridis unu provante ŝian belan prujnuvalon, jen la alia la longan fianĉinan vualplektaĵon, jen la tria la belan robon mem, kiun ŝi portis kiel fianĉino. Ili ja sciis, ke ĝi ne plu taŭgas por ŝi tiom mallarga kaj eta, kia ĝi estas, ĉar la jarlongoj donis al ŝia korpo rondajn formojn, kiujn la spegulo ne konis, kiam ŝi transpaŝis la sojlon de la preĝejo.

Per sia lasta volo ŝi postulis, ke oni enterigu ŝin en tiu blanka robo, ke la nepinoj alfiksu al ŝia kapo la prujnuvalon. De ŝia kapsupro devis serpentumi la brila vualvosto.

Si pensis, ke ŝia virgulina robo denove falos malsupren ĝis la piedetoj en rigidaj kaj severaj faldoj. Kaj ŝi imagis, ke en la kverka ĉerko blanke ripozos la lipia krono super ŝia maljuna frunto, sur kiun la restintaj longaj okulharoj etendis violkoloran ombrovualon.

*

Florojn post floroj ŝutis malsupren prunaj, abrikotaj, ĉerizaj kaj persikaj arboj. Rozkoloraj kaj blankaj kiel neĝo kaj sango falis unu sur la alian la petaloj desiritaj de ventoj dum pluraj printempoj. Verdaj kiel smeraldo kaj flavaj kiel sukceso, kaj poste sangkoloraj kiel ruĝo fontanta el la tagiĝo, la supraĵaj folioj intermiksigis kun la malsupraĵaj. Resonaj pluvoroj falis, grizajn nebulojn disŝiris kaj forflugigis la branĉoj. Aro de blankaj neĝflokaj aperis kaj dance valis la fenestrojn, amasoj da jaroj disŝutigis de la arbeĝo de l' tempo kaj ankaŭ ili falis, semante diversajn eventojn sur la larĝgrandan tegmenton, kiu ombrumis la malnovan domon.

Kaj ĉiam pli malgranda, ĉiam pli muldita de la tagoj, ĉiam pli modelita de la tempo, pli kaj pli etigita de la sezonoj fariĝis tiu, kiu nun portis post si senfinan vicon da tagoj kaj noktoj, semajnoj kaj monatoj, ombroj kaj lumoj, eventoj formantaj ĉenon de blankaj kaj nigraj perloj, kiel ŝia rozario.

Lum tagon venis la morto kaj altuisis ŝin per sia senkompata mano, kaj vidante ŝin tiom eta kaj kuintirita de la morto, la genepoj rememoris ŝiajn vortojn. Nesciante per kio vesti ŝin, ili ekserĉis en la malnova kesto.

*

Blanka, velkinta de tempo, dormis la malnovega, knabina robo; kiel orplektaĵo brilis la vualtoŝento; kvazaŭ teksaĵo falinta el lacaj manoj makulis la mallumon en la kesto la delikata prujnuvalo. Kaj ĉiu peco — kiel en tiu felicia momento, kiam la juna knabineto

*) lipio = botanika nomo; lipia = citriodora.

LA ĴALUZO

— Panali Istrali —

Jes, tio ja estis bela vivo, escepte de la tagoj, kiam la patro aŭ lia filo aŭ ambaŭ abrupte envenis meze de la festo kaj tradraŝis la patrinojn, pugnofrapadis Kyran, kaj rompis sian bastonon sur mia kapo, ĉar nun ankaŭ mi partoprenis en la batregalo. Ĉar ni flue parolis la turkan, la du virinojn ili nomis *paĉauras* (putinoj) kaj min *kiĉuk pezevengh* (eta parigisto). La du kompatindulinoj sin ĵetis al la piedoj de siaj ŭiranoj, ĉirkaŭbrakis iliajn krurojn, kaj petegis, ke ili domagu la vizaĝon:

— Ne al la vizaĝo! ili kriis, je la nomo de l' Sinjoro kaj de l' sankta Virgulino, ne frapu al la vizaĝo!... Ne tuŝu la okulojn!... Indulgon!...

Ha! la vizaĝo, la okuloj, la beleco de tiuj du virinoj!... Ne ekzistas eĉ unu, kiu povus ilin egali!... Ili havis hararon orkoloran kaj longan ĝis la kruroj, haŭton blanka; brovojn, okulharojn kaj pupilojn ebone nigrajn. Ĉar, sur la rumana genealogia arbo de mia patrino sin greftis tri diversaj rasoj: turka, rusa kaj greka, laŭ la okupintoj, kiuj regadis la landon en la pasinto.

Dektrijara, mia patrino venigis en la mondon sian unuenaskiton; sed en la momento, kiam mi aperitis la okulojn, neniu kredis, ke ŝi estas patrino de tri infanoj. Kaj tiu virino, kiun indus nur karesi kaj kisi, estis, batata ĝis la sango. Tamen, se mia patro ŝin ne regalas per karesoj, tion al ŝi brile kompensis la amantoj; kaj mi neniam scias, ĉu en la komenco mia patrino perfidis unue la edzon, kiu ŝin pro tio komencis batis, aŭ ĉu mia patro mistraktis unue sian edzinon, kiu pro tio lin kokris. Ĉiokaze, la festa humoro neniam ĉesis eĉ ni, ĉar la plezurkrioj alternis kun la dolorkrioj; kaj apenaŭ finigis la batado, jam eksplodis la ridoj sur la vizaĝoj, inunditaj de larmoj.

Kutime, mi gardstaris, manganite kukojn, dum la *korteganoj* — cetera kun sinteno sufiĉe deca — turkmaniere sidadis sur la tapiŝo, kantis kaj igis la virinojn danci, ludante al ili orientajn melodiojn sur gitaro kun akompano de kastanjetoj kaj tamburino.

transpaŝis la sojlon de l' preĝejo — kvazaŭ ili estas faritaj laŭ ŝia mezuro, mirinde taŭgis por ŝi kaj denove kovris ŝin.

Fruaĝe ŝi igis fianĉino kaj jen ŝi denove estas fianĉino, kun eta korpo, kiel en la tempo, kiam ŝi estis knabineto kaj paŝis antaŭ la altaron.

En la mallarĝa ĉerko, forlasinte la malnovan keston, la robo nun denove plenumigis.

De sub la lipia florkrono kvazaŭ torento, blanka kiel kometa vosto, sub la orfadena vualto, la silka kaptuko envolvis ŝin ĝis la kalkanoj. Kaj de la kalkanoj la longa rando de ŝia fianĉina robo pendis ĝis la tero en lacaj ondoj.

Maljuna, ŝia nuda kolo kaj kompatindaj ŝultretoj, kvazaŭ ili estus tro junaj kaj ankoraŭ ne rondigitaj, estis videblaj en la tranĉaĵo de l' tondiĵo, kiu antaŭ tiom da jaroj disfidis la blankan fajon.

La kurbo de l' brustetoj apenaŭ levis la malgrandan veston. La akraj koksoj denove vidigis tra la robo. Kaj antaŭe la faldoj falis malsupren ĝis la etaj piedoj, kovritaj de blankaj ŝuetoj, kiuj signis la randon de l' ĉerko.

Larĝa zono farita el banto, kun oraj viloj eĉ la ekstremajo, ĉirkaŭis sian talion kaj dividigis en du

Mia patrino kaj Kyra, silke vestitaj kaj konsumataj de plezuro, prezentis la dancon kun poŝtuko, sin turnadis, kaprioladis, ludebriligis. Kaj, kun vizaĝo flamruĝa de varmo, ili sin ĵetis sur dikmolajn kusenojn, kaŝis la kruojn kaj piedojn en siaj longaj roboj, kaj sin ekventumis. Delikatajn likvojn oni trinkadis kaj aromaĵojn oni bruligis. La viroj estis junaj kaj belaj. Ĉiam brunaj, nigraj; ili havis elegantan vestmanieron, piniajn lipharojn, tre flegitan barbon: kaj la haroj, glataj aŭ krispaj, eligis fortan odoron de migdalo'eo moske parfumita. Ili estis turkoj, grekoj kaj ankaŭ, malofte, rumanoj, ĉar la nacieco ludis nenian rolon, kondiĉe ke la amantoj estis junaj kaj belaj, delikataj, diskretaj kaj ne tro rapidemaj.

Tre sendanka estis mia situacio... Al neniu mi ĝis nun parolis pri mia tiama turmento.

Mia devo estis gardi, sidante sur la fenestrobreto, kaj eviti ĉian surprizon. Tio ja tre plaĉis al mi, ĉar mi ĝismorte malamis la virojn de *Karakĵoi*, kiuj nin batadis. Sed en mia brusto okazis terura batalo inter mia devo kaj mia ĵaluzo.

Ĵaluzo mi estis, sovaĝe ĵaluzo.

La domo situis eĉ la fundo de vasta korto ĉirkaŭata de muroj. Estis fenestroj, kiuj frontis al tiu korto, kaj aliaj fenestroj, malantaŭe, kiuj kvazaŭ pendis super la rando de plataltaĵo superstaranta la havenon. Nur per la sola fronta enirejo oni povis eniri la domon; sed forkuri, nu, oni montris sin malpli postu'ema, kaj se la deklivo de l' plataltaĵo povus paroli! kiom da homoj ĝi vidis malsupren rulfali!

Alkroĉita al la fenestro, mi fiksas la okulojn al la lanterno, kiu lumis dum la tuta nokto super la por-do, kaj mi streĉis la orejon por aŭdi la bruon de l' rustiĝintaj pordhokoj.

Sed ankaŭ sur la interna fenestro mi volis teni okulon. Mia patrino kaj Kyra estis frenezige belaj, en sia korsajo streĉita por paŝigi la talion en ringon, kun la mamoj ŝvelaj kiel melonoj, la rika hararo maligita kaj falanta sur la nudaj ŝultroj kaj sur la dorso,

partojn sur la maldekstra kokso. Delikate teksita, silka poŝtuko, kvazaŭ farita el neĝo dumnokte falinta, vidigis sian orbroditan angulon.

Modelita de la morto, kvazaŭ sekve de stranga kaprico, la korpo, kies ŝultrojn ŝargis jarcento, reprenis sian knabinan konturon, refoje malgrandigis, la argilo denove formigis laŭ la formo de la fianĉina robo, la aro da tagoj kaj noktoj de jarcento refoje eniris la amplekson de korpo apenaŭ dudekjara. Kaj la robo de l' junulineto larĝe akceptis la maljunulinon, kiu serĉis en ĝi rifugejon, por same okupi la ĉerkon, kiel ĝi dum plena jarcento okupis la mallarĝan keston.

Jene, laŭ la sama sonorado de l' sonori'aro — ĉar la sonori'oj sonoras ĉiam sammaniere, ĉu pro ĝojo, ĉu pro malĝojo — sen akompano de edziĝa gastaro, la avino denove transpaŝis la sojlon de l' preĝejo kiel ni priŝkribis ŝin komence, en la blanka robo, en kiu ŝi paŝis kiel junulineto antaŭ la altaron. Sed nun ne por klini sian gracion kapon, ke la etenditaj manoj de l' pastro metu sur ĝin la oran edziĝkronon, sed en akompano de la tuta neparo, por sonĝi la longan kaj senfinan songon de la bravuloj, kiuj dece plenumis sian tutan devon sur la tero.

El la rumana: T. Moravia.

KRISTINA

Rakonto el sveda Caponujo de Einar Wallquist

Kristina, do estis vi! Antaŭ miaj okuloj emis mal-lumiĝi, kiam mi, dum oficistoj kaj la homoj de la bieneto ĉirkaŭstaris, esploris vian malvarman, molan korpon, kiu lumigita de sonanta petrollampo kuŝis sur la kruda lignotablo en la kuirejo de Mattis.

Dum mi unutone diktis la esplorprotokolon al la distrikta prokuroro, kiu sidis pli proksime al la pordo, la pensoj emias forlasi la mallogan oficon, kiu min okupis, por reiri al la sunplena tempo, kiam vi estis ĉe ni en la malsanulejo. La pasintan printempon, dum boaca translokiĝo, vi ja grave malsaniĝis kaj devis kun via patrino halti en vilaĝo arbarregiona. La vilaĝanoj sendis al mi sciigon pri tio, kiom vi estas mizera, malgraŭ la zorgado de via patrino, kiu certe estis bonvola sed tamen ne konvena.

La distrikta flegistino devis enpaki sin en la glitveturilon por vojaĝi al vi, kaj ŝi revenis en la malsanulejon kunportante vin, pakitan en feltoj kaj boacid-feloj.

Al mi ankoraŭ vizias via pala, malgranda kaj malsan-detruita ĵunulinvizaĝo. Vi estis tro laca por plori kaj el la malmultaj vortoj, kiujn vi konis, vi malofte balbutis ion alian ol «tjate» (akvo). Vi malgranda rampulo! Via pulminflamo maltrankviligis nin, sed vi estis brava, venkante kaj la malsanon kaj la artifikan kuraĉadon, kaj jen, iun tagon vi balbutante kuŝis en via lito, tiel dolĉa kiel brunhaŭta malhelokula laponknabino povas esti, kiam ŝi ridetas pri la tuta mondo.

Ho Kristina! Tiam estis plezure fari la rondiron kaj vidi vian malsategon, ne nur pri mango sed ankaŭ pri ĉio alia, kio povas allogi malgrandan viveman laponidon.

Iun tagon, via patrino, Elli, venis por envolvi vin en vian boacfelan pelton kaj enpaki vin en la strangan laponlulilon, kie vi kuŝis tiom nekutime lacigita. Ridanta ruzeto! Estis korpeme al ni transdoni vin. Ni ja sciis, ke baldaŭ vi forgesos, kiom amuzaj estas la varma akvo kaj sapo, pura tolaĵo kaj ĉiuj vantaĵoj de la mondo. Kaj ni sentis angoron pro la scio, kiam severan vivon vi, laponknabino, iros renkonte. Vojaĝoj en blovo kaj pluvo, ege malvarmaj tendoj; kaj infanflugado, certe bonvola, sed pri kiu oni tamen ne povas diri, ke ĝi atingis altan nivelon, sole taŭgan por la plej sendefendaj de ĉiuj, la plej malgrandaj. Vi tamen devas esti hardita por via estonta vivo migranta. Ne estas al vi permesate fariĝi, kiel niaj propraj infanoj, sentema kaj soprema.

Do vi forveturis al la ŝtormoj, furiozantaj ĉirkaŭ la nomadaj tendoj, al la kulturmentata paradizo, kiun la turistoj emas kaptadi per okuloj kaj fotografilo. Ni sentis solecon post via sunbrila rideto.

Kaj jen antaŭ mi vi kuŝis, malvarma kaj pala. Vi estis tiom bela. Via malgranda ronda korpo estis kiel keruba, en via malhela haro pendis tiom silkmole — sed via buŝo estis blua, ĝi ne ridetis, laca sufero desegniĝis

la frunto ĉirkaŭata de skarlate ruĝa rubando, kaj la longaj okuloj diable flirteantaj kvazaŭ por ardiĝi la flamsprucon de iliaj pupiloj, kiujn fajrigis la deziro.

Ofte, per sia vetamindumado al la virinoj, per sia senŝenca babilado, la invititoj sin montris ridindaj. Ekzemple unu vesperon, unu el ili, dezirante komplimenti mian patrimon, diris, ke «el la malnovaj kokinoj oni preparas bonan supon». La malfeliĉa virino, ofendita, jetis la ventumilon al lia kapo, kaj ploris. Alia invitito ekstaris kolere, donis *tifla-n* al la mallertulo kaj kraĉis al ties vizaĝo. Ili ekkaptis unu la alian ĉe la kolo, batalde distaŭzis la tutan domon, renversis la nargileojn. Tio nin ĝislarime ridigis. Por fari pacon, mia patrino donis kison al ambaŭ.

Tiaj ĉirkaŭbrakoj, tiaj kisoj, estis ĉe ŝi taŭga rimedo por rekompenci la plej diversajn aferojn. Por bela voĉo, amuza vorto, bela ludo, ŝi donis kisojn; kaj same ŝi faris por gajigi paŭtulon, forviŝi la impreson de ofenda parolo, kvietigi tro furiozan ĵaluzulon, solvi la embarason de malsaĝulo.

Kyra, siaflanke, eminentis en propra maniero. Fizike tre evoluinta ekde ŝia dekkvara jaro, ŝi aspektis du jarojn pli aĝa. Senriprenska kaj spite mokema, kun sia eta nazo iom relevita, kun sia elstara mentono, kun la du vangkavetoj, kien la dio de la amo metis du lentugojn preskaŭ simetriajn, Kyra malkontentigis siajn amatojn kaj min per siaj petolaĵoj, siaj mokoĵoj kaj ŝercoj. La unuaj deziris akiri pli multe; kaj mi, opiniis, ke tro multe ŝi donis al ili.

Oni nomis *musafir*-oj la amindumantojn, kiuj venis al ni. Kaj tiuj *musafir*-oj al ŝi kisis la manojn kaj la sandalojn ĉiuokaze. Ilin ŝi tiris per la nazo aŭ per la barbo, verŝis siropon al ili sur la karbopecojn de l' nargileoj; proponis al ili trinki el ŝia glaso kaj rompis la glason por ilin ofendi, sed revenis minuton

poste por meti la ekstremon de siaj haroj sur la buŝon de l' viro, kiun ŝi ĵus insultis...

Cio tia min kolerigis, ĉar Kyra-n mi amis multe pli ol la patrimon... Mi adoris ŝin kaj ne toleris kareson donatan de iu alia.

Mi memoras, ke iun vesperon, por pleje inciti mian ĵaluzon, ĉar la nodo de ŝia sandalo malligiĝis dum la danco, ŝi iris meti la piedon sur la genuon de iu *musafir* kaj petis, ke li ĝin religu. Vi komprenas, kia okazo estis por la ŝanculo! Li obeis kiel eble plej daŭrigante la plezuron, dum mi malferris lupajn okulojn; kaj la fripono ekpalmis al ŝi la maleolon kaj eĉ la kruron. Kaj ŝi... nu, ŝi nenion diris, ŝi toleris!... Tiam furioze, perdante la kapon, mi kriis: — La patro! Forkuru!...

Fulmrapide la du *musafir*-oj trasaltis la fenestrojn kaj malaperis en la nokto, rulkurante la deklivon. Unu el ili, greko, forgesis en sia rapideco la ĉapon kaj la gitaron, kiujn mia patrino prenis kaj jetis tra la fenestro, dum Kyra diligente kaŝis la du troajn nargileojn.

Tiu sceno estis tiel amuza, ke post la paso de l' kolero min kaptis senbrida ridi, mi falis el la embrasuro, ruliĝis sur la tapiŝo, kaj fariĝis violkolora pro spirmanĉo. Mia patrino kredis, ke mi efektive frenezigiĝis de la timo pro la alveno de l' patro; la kompatindaj virinoj boris la aeron per teruraj krioj, forgesis pri la patro, pri la diablo kaj sin jetis al mi senesperaj.

— Tute ne estas patro! mi fine povis respondi; sed mi koleris, ĉar Kyra lasis al si palpi la kruron!... Kaj mi venĝis min! Jen!...

Pro la ĝojo ili nun kriis multe pli laŭte. Ili malmole frapis al mi la sidvangojn, min kisis, kaj ni poste eksaltis en la ĉambro, kontentaj tiel kvietiĝi, ili pri la timo, mi pri eta batregalo kun karesoj.

El la franca: Henri Vatré.

ĝian kurbon kaj viaj estingitaj okuloj rakontis, ke vi estas mortinta.

*

Posttagmeze la 7-an de decembro 1933 vokis la telefonon la kuracista domo. Kun flegmo, akirita dum paso de jaroj, mi respondis, sed mi ekatentis je sono de plorplena voĉo, kiu demandis pri mi. Estis sciigo el vilaĝo survoje al la montegoj. Kaj oni rakontis al mi, ke laponinfano mortis inter strangaj cirkonstancoj. En la ofico mi sciigis al la distrikta prokuroro pri la okazaĵo kaj de la gubernia registaro ni estis ordonitaj vojaĝi al la loko por fari la necesajn esplorojn.

La mallumo dense superis la regionon, kiam ni kun la kampara helppoliciano Okvojaĝis, sed en la brila lumozono de la reflektoroj, la unuopaj negflokoj, tiom mirinde blankaj, faletante iĝis miriadaĵo da kusenoj en voj-surfaco kaj plugidigoj. Rapide ni trapasis la malmultajn mejlojn, dum la interparolado iom post iom transglitis de la okazaĵo al hejmfarata brando, ŝtelistoj kaj alio, kion estas oportune pritrakti en ĉesto de polico.

Laponkaravano, kies boacoj maltrankviligis pro la bruado de la aŭtomobilo, devigis nin halti por momento, dum tiuj pratempaj kaj modernaj transportrimedoj en nokta mallumo preterpasis unu la alian. Sude viglaj sed arkte ĉirkaŭpeltitaj, nigretaj laponoj krivokis al siaj malviglaj, kapricaj tirstestoj. Iliaj strange melodiaj vokoĵoj helpis al ili teni la boacojn ĉe la ĝusta ordo de la karavano.

Baldaŭ ni atingis la celon. La laponlanda vilaĝo tie situis ĉirkaŭata de kulturitaj kampopecoj; silento regis, escepte de hundoĵadoj. Unuopaj fenestroj estis lumigitaj en la malgrandaj, grizaj dometoj, kiuj ŝajnis kvazaŭ premitaj en la negblovaĵojn. Tie staris malhela la arbaro, kaj, sub la stelobrila ĉielo etendanta super ni sian altan volbon, la malvarmege severe mordis, kiam de la ĉefvojo, kum ties prujnaj betuloj, ni paŝis laŭ la tretpremita vojeto al la domo de Mattis.

Tie ekstere kuŝis kelkaj elĉerpiĝintaj, indiferentaj laponhundoj borĝintaj en la neĝon, similaj al nigraj lanflokoj.

Sur la perono ni forstampis la neĝon de la piedoj kaj en la vestiblo oni devis serĉi en mallumo la pordhokon por poste eniri kaj komenci la oficialan agadon.

En la kuirejo estis varme kaj krepuske. La petrol-lampo, pendanta sub la plafono, disigis flavan lumon super la maljunaj gemastroj de la domo kaj iliaj filoj, kiuj kun severaj mienoj sidis ĉe la muroj. Laŭkutime salutinte kaj formetinte la peltojn, ni sciigis, ke la vespere venintaj laponoj dormas sur boacaj feloj, transe de la fermita ĉambropordo, dormon, certe necesan, ĉar ili estis tre elĉerpitaj post la veturo de sur la montego kum la rapide migranta boacaro.

Post momenta interkonsiligo ni tamen decidis, ke oni vekos la laponojn, eĉ se tio estas senindulga. Kaj baldaŭ ni sidis, ĉiu sur sia seĝo, en la cetero senmebla ĉambro; kaj ĉirkaŭe, sur boacaj feloj, kaŭris la laponoj, lacaj, elplorintaj, malgajaj, kiaj fariĝas tiuj, kiuj post longa batalado kontraŭ krudaj naturfortoj renkontis la morton, ĉies pereiganton. La polica esploro komenciĝis. Kaj de ĝi mi rakontis la jenon.

Dolĉe mola la neĝo kovris la montegan vastajon. Facile ĝi estis forfosata de la boacoj, kiam ili sin paŝtis. Sed dum kelkaj tagoj estis degela vetero, kiu malsekigis la neĝon, kaj post tio venis malvarmege. La deklivoj kovriĝis per glaciokrusto, kiu al la boacoj malebligis la paŝadon. Kaj baldaŭ la malsato instigis la duone malsovaĝajn bestojn malsuprenkuri en la arbaran regionon.

La familo de Kristina kun sia tendo restadis ie sur

la altebenaĵoj inter »Nepsort« kaj »Svaipa«. Kiam la boacoj maltrankviligis, la posedantoj plue komprenis, ke nun komenciĝos longa migrado al la malsupra lando, kaj la svedoj, ke nun proksimiĝas la grandega, laciga, vintra vagado kun ties buĉadoj, negocoj, preĝejvizitado kaj interrilato kun la terkulturistoj en arbara kaj marborda regionoj, kunestado kun iam okazontaj disputoj, ĉar svedoj kaj laponoj estis tiom diferencaj, ke ili nur malfacile komprenas unu la alian.

Iun tagon la boacaro ekkuris malsupren laŭ la deklivoj. Oni kolektis sian malgrandan havaĵon. Kiu estis superflua, tion oni postlasis en »staburo« — ia ege malgranda magazeno, konstruita sur unusola fosto kaj neatingebla por ratoj kaj aliaj bestoj. Oni mallevis la tendojn kaj enpakis ilin kun la alia havaĵo en la akĵojn en maniero heredita de praavaj tempoj. Por la fluganta ĵet-ŝnuro la tirstestoj estis kaptataj kaj dum tumulto kaj bruo aljuntataj. Kaj baldaŭ oni tie staris eĉ sen pormomenta hejmo.

Kiam mi dum translokigo akompanis laponfamilion, tiu tempo ŝajnis al mi plej plena de malhelpo, kiam la malgranda ŝirmo, kiun oni havis, kuŝis tie kumlaĉita, kaj oni estis tute submetita al ŝtormo kaj neĝo. Sed baldaŭ la ĉarmo de la vojaĝo forpelis la melankolion.

Strange estas, ke oni ĉi tiun fojon pretiĝis por ekvojaĝo frumatene. Ordinare la laponoj pasigas la plejparton de la tago per preparoj por ekiri nur en vespera krepusko por serĉi novan konvenan tendlokon.

Kristina havis multajn gefratojn, sed la familianoj ofte malsaniĝis, kaj preskaŭ en ĉiu de la lastaj jaroj iu el ili estis enterigita en la tombejo sur la promontoro ĉe la lago »Hornavan.« Jes, oni uzis la relative bonan malsanulflegadon, kiu nuntempe estas havebla — al tio la laponoj ne estas malinklinaj — sed longa estis ofte la vojo, kaj multaj ventoj blovis la trembrilan vivoŝlamon, antaŭ ol oni atingis la helpon.

Nuntempe ne estas kiel longe antaŭe, pri kio rakontas malnova raporto de la distrikta prokuroro, kiu estas konservata en la arkivo de la ĵuĝeja domo:

»La laponoj bonfartas kun siaj boacoj kaj hundoj. Ankaŭ la kuracistoj vizitas la malsanulojn, sed la plejparto mortas per natura morto.«

Nur tri infanoj ankoraŭ restis al la familio, kaj la du, kiuj estis pli aĝaj, troviĝis en la nomada lernejo de la preĝeja vilaĝo. La alia familio, kiu akompanis, ne havis infanon. Do la malgranda Kristina estis tute sola, kiam ŝi ludis ĉirkaŭ la tendo. Tial ŝia patrino, »Ellis«, kutime ligis sonorilon al ŝia mikskolora, arĝentornamita zono, por ke la malgrandulino ne malaperu, kiam ŝi sin rulas en la negblovaĵoj. Per boacida felo kaj peco da ŝaffela kovrilo oni nun ĉirkaŭvolvis la malgrandan, rondan korpon de Kristina kaj metis ŝin en la postan parton de la akĵo, prijungiĝita per unu el la pezaj virbestoj de la patro. La karavano estis kunligita, boaco post boaco, ĉiu trenanta sian ŝarĝon, la skioj estis ligitaj al la piedoj de la laponoj, kaj rapide oni ekveturis de la montego malsupren al arbara regiono.

La veturo fariĝis peniga. La glaciokovrita tero estis malmola, kaj malmola estis ankaŭ la sidloko de la akĵo, kie Kristina nun ŝovglitis kaj ĵetiĝis tute hazarde laŭ abruptaj deklivoj, tra arbustoj kaj boskoj da pigmeaj betuloj, ĉiam malsupren, malsupren.

La patro kaj la patrino estis tute okupitaj ĉe la boacaro kaj ĉe la kapricaj bestoj de la karavano, kiuj ofte enplektiĝis per la ĵungiloj. Oni krivokis, la hundoj bojis, kaj antaŭen, nur antaŭen oni peliĝis, dum la boacaj fendufoj senĉese kraketas.

Neniu havis multe da tempo por rigardi la etulinon

en la fino de la karavano. Longa kaj malfacila estis la vojo. La mallumo ĉiam pli proksimiĝis al la lacaj laponoj, kaj nur en la vespero oni atingis la novan laponan kulturejon en plej supra pinarbaro. Tie la malsato devigis ilin iom halti. Kristina estis elprenita el la akĵo, laca kaj malsata. Kaj, ĝoja pro la liberigo, ŝi ĉirkaŭkuris sur la griza planko de la dometo, trenante la rigidan postparton de la stranga robeto, varmigiĝis ĉe la ŝtipfajro en la gizoŝtona fajrujo, manĝis kaj trinkis dezireme, kion oni proponis al ŝi.

Sed al tiuj nomadoj ne estis permesate trankviligi dum la translokiĝo. La boacaro jam forkuris kaj la laponoj devis ekiri post ĝi, lacaj, malgajaj, kvankam iomete vigligitaj de la fajro kaj mango kaj la interparolado kun la homoj de la dometo. En nokta mallumo oni daŭrigis la veturon, mejlon post mejlo, malsupren preter la torento, kie la profunde kavigitaj flankaj alluoj faris la vojon dekliva kaj malfacila.

Kaj en la lasta akĵo de la karavano la mola korpo de Kristina malindulge ĵetiĝis kontraŭ la lignaj ripoj je ĉiu ekpuŝo, kontraŭ tufajo aŭ ŝtono, kaj je ĉiu ekglito sur la glaciiginta tero.

Certe vi ĝemetis pli ol via patrino aŭdis. Kaj cetere via patrino ne havis tempon por vi, kiam la boacaro, la gardbezona trezoro de la laponoj, volis antaŭen. Viaj dormpezaj palpebroj emis fermiĝi, sed maldormi vi tamen devis, kompatinga infano, dum tiu malluma nokto, kiam ĉiu puŝplena horo devis ŝajni tiom longa, se vi estus povinta pensi pri tio. Kia infera doloro al rampulo, kia vi! Nomadinfanoj tamen devas suferi pli ol aliaj infanoj. Kaj se ili ne povas elteni sian malfacilan vivon, ili devas morti. Nur la fortaj subtenas vian genton, Kristina. Pri tio sufiĉe atestas la notoj en la pastraj libroj pri mortokazoj inter la laponaj etuloj.

Je la kvina matene oni atingis la svedan novkulturejon sur duoninsulo en la lago Ajsjaŭre. Tie loĝas konataj, bonvolaj homoj, ĉe kiuj Elli kaj ŝia familio kelkfoje loĝis, kaj nun la elĉerpitaj laponoj faris paŭzon por ripoz. Sur la glacio antaŭ la domo Elli levis sian etulon el la akĵo kaj portis ŝin en la domon, ne multe pensante pri la streĉoj de la pasinta tuttago. Tiel ja devis esti! Sed malgraŭ tio ŝi certe ne malpli sopiris je ripozo kaj paco.

La animata des pli peziĝis — Elli rakontis — kiam la malvestita Kristina ŝajnis tiom malstreĉa. Ŝi emis nur dormi, nur ploris, kiam oni proponis manĝaĵon al ŝi. Restis nun nenio de ŝia gaja humoro, nenio povis ellogi ŝian gajan babiladon aŭ igi ŝin ĉirkaŭpaŝi sur la planko. Kristina emis nur dormi, kaj la patrino metis ŝin sur la larĝigeblan liton de la domanoj, kie ŝi ripozis kelkajn horojn, dum la gepatroj kaj la aliaj kuiris sian viandon kaj kafon sur la kameno kaj poste dormpezaj manĝis kaj ripozis, kaŭrante sur la planko.

En la tagiĝo oni daŭrigis la veturon sur la glacio de Ajsjaŭre. Elli ĉirkaŭvolvis la etulon per la feloj, metis ŝin en la akĵon kaj kaŝis per la felkovrilo la orelojn por gardi ŝin kontraŭ la malvarma vento sur la lago. Vi kelkfoje plorpepis, tion la patrino aŭdis, kiam ŝi ŝikuris apud ĵetiganta akĵo, kaj de tempo al tempo ŝi ekkaŭris por rigardi, kiel vi fartas?

La malvarmo tranĉis la vangojn en la frua mateno, la boacaro glitante tretis sur la malmola glacio kaj per helpo de la nelacigeblaj hundoj la viroj tenis la bestojn kune. Cio estis frostiĝinta. La krivokoj kaj bojadoj sonis tiom strange en la cetere silenta mateno. La fendhufoj akre kraketis, dum la veturo daŭris tra la akvokoloj laŭ la direkto al granda vilago en la laŭborda arbarlando, kie la aŭroro ĵetis sian fajroruĝan brilon sur prujnajn betulojn inter profunde bluj ombroj.

Kor' mia estas bela, soleca lag' . . .

— Albert Samain —

Kor' mia estas bela, soleca lag'. Ĝi vibras se ĝin sekretaj birdoj aŭ tuŝaj branĉoj ĝenas, super ĝi flug' arĝenta de silfa svarmo siblas tra la vespero pura, kiam la floroj svenas.

Sur ĝi la lun' senliman palecon reve sternas, en ĝi l' aŭroro banas piedojn roze-brilajn, kaj apud ĝia bordo en harmoni' eterna suspiras la orgeno de l' kanoj maltrankvilaj.

El la franca: *Lali Blond.*

Somerkrepusko peza kaj flor-post-flore fala . . .

— Henri de Régnier —

Somerkrepusko peza kaj flor-post-flore fala . . .
Sur la rivero digna kaj lanta kiel jaro
kuŝas senbirda ombro de l' sveninta arbaro,
kaj nun la luno estas apenaŭ masko pala.

La amesper' malnova, jen: flor-post-flore fala . . .
Kaj ni jam pli malgajaj estas per unu jaro,
ni, ombroj, lacaj iri tra l' sveninta arbaro,
kie unu al alia ni estis sonĝo pala.

Ni vidis la someron morti, kaj jam, simile
pezegaj de bedaŭro pri l' noktoj, kiam brile
lumis la am' en sorĉo de steloj, akvoj, floroj:

jen estas ni, speguloj palaj de sonĝo sama,
malĝojaj, ĉar ja ambaŭ ni estas vivdaj koroj,
kiujn Forges' duopa ligas per mild' balzama.

El la franca: *Lali Blond.*

Sperteco

— Henri de Régnier —

Mi iris post la paro, aŭskultis kisojn ŝmacajn,
dum svelte desegniĝis la siluetoj revaj
sur la ĉiel' aŭtuma, kies koloroj pacaj
havis la perlan grizon de la flugiloj mevaj.

Kaj dum ili marŝadis en bruo de la maro
frapanta siajn ondojn al roka ring' de l' klifoj,
forestis de mi ĉia envio kaj amaro,
pripentoj kaj frostetoj, aŭ febraj vivoifoj.

Ili iris brak-en-brake, en bele sonĝa blindo,
kiun ĉi idilio kreis por efemero;
ili estis la nuntempo, mi estis la pasinto,
konanta jam la lastan parolon de l' himero.

El la franca: *Lali Blond.*

La mallonga tago venis, la mallonga tago pasis kaj, kiam la timiga mallumo jam kaŝglitis tra abruptoj kaj faŭkoj, la longa karavano, kun siaj gvidanto, lacigintaj boacoj kaj mizere malfortgenuaj homoj, atingis la vilagon ĉe la lagkolo inter Ajsjaŭre kaj Uddjaŭre.

Tie komencis tiom afable brili la lumoj de la domoj. Tie oni vidis infanojn, kiuj spiregante ŝikuris al la bordo por vidi la alvenon de la laponoj, tie ankaŭ iu kaj alia maljunulo, vestita per trikitaj, vilaj kamizoloj kaj landrapaj jakoj, alpaŝis laŭ la vojo al la akvotruo en la glacio, dum ili pensis pri eblaj negocoj per buĉotaj boacoj. Tie oni vidis la fumon leviĝi, blanka kaj rekta, el la kamena fumtubo de Mattis, dum lia edzino kuirigis la kafopaton por, nun kiel alijare, regali la preterpasantaj laponojn.

Poemoj de Sergej Jesenin

El la rusa: Hilda Dresen

Bovino

Laca jam, dentoj elfalis.
Signe sur kornoj la aĝ'.
Oni pri batoj ne ŝparis
Sur foirplac' de l' vilaĝ'.

Mus-mordetado ted-brua
Genas nun ĝis incit'.
Pensas ĝi penson senguano
Pri blankpieda bovid'.

Estis ĝi tre senkonsola
Post la forpren' de l' idet'.
Sur la palis' subtremla
Felon skuadis ventet'.

Sur poligona pajlajo
Trafos ĝin sama sortbat',
Ligos al kol' oni maŝon,
Gvidos ĝin for al buĉad'.

Ĝi senespere kaj plende
Premas la kornojn al ter'.
Logas en songo ĝin tente
Verda herbej' kaj liber'.
1915.

Tero kara . . .

Tero kara! La gren-ora
Suno sur la akvoj brilas.
La verdaĵo milsonora
Kvazaŭ sorĉo min altiras.

Jen rezed' kaj trifolio
Floras ĉe la kampolimoj.
Kaj tintadas rozarioj
De l' salikoj, monahinoj.

Super marĉo fumnubeto,
Sub ĉielo brul-odoro.
Pensoj kvazaŭ pro sekreto
Nun mutiĝis en la koro.

Mi akcepti ĉion penis,
Ĉion donis ĝojvizage,
Mi sur nian teron venis
Por forlasi ĝin fru-aĝe.

Mola neĝo . . .

Mola neĝo unua sur ter',
En la koro konvala ekbril'.
Blukandele jam stelon vesper'
Ekbruligis dum mia vojir'.

Mi ne scias, ĉu lum' aŭ malhel'?
Ĉu nun kantas la vento aŭ kok'?'
Eble flugis cignar' de l' ĉiel',
Ne neĝfloketo faladis al flok'.

Pro neĝkampoj ravigas rigard'
Kaj varmigas pro l' frosto la sang'
Nudan bruston betulan kun ard'
Forte premus mi nun al la vang'.

Ho, karega, malluma arbar'!
Ho, gajeco de l' blanka neĝkamp'!..
La saliko-trunketojn en val'
Ĉirkaŭpreni mi volus kun am'.
1917.

De l' naskiĝo . . .

De l' naskiĝo jam estas preta
Por ni ĉiuj la viv-okup',
Se ne estus mi nun poeto,
Do ŝtelist' aŭ krimul' mi estus sen dub'.

Malaltkreska knabet' malgrasa,
Heroeca dum batalad',
Ofte kun frakasita nazo
Hejmen venis mi post batad'.

Kaj al panjo klarigojn eldonis
Dento-grince la sanga buŝ':
— Ho, nenio, mi stumblis je ŝtono.
Morgaŭ ne dolorigos ektuŝ'.

Nun jam tiu bravec' mutiĝis,
Kiu tiam boladis sen ĉes',
Dum sur miajn poemojn ŝutiĝis
Ĉi nervemo kaj arogantec'.

Orkolora amaso de vortoj...
Kaj rebrilas sur ĉiu lini'
La antaŭa kuraĝo kaj forto,
La senzorga batal-pasi'.

Kiel tiam, mi estas fiera,
La braveco ne flugis for...
Jam buŝo pro bat' ekŝvelis,
Mort-vundite nun sangas kor'.

Ne al panjo klarigojn mi donas,
Al fremduloj nun krias la buŝ':
— Ho, nenio! mi stumblis je ŝtono.
Jam dum lunĉo ne ĝenos ektuŝ'!
1919.

Mi en valo iras . . .

Mi en valo iras. Sur la nuko kepo.
Ganto el glaceo sur la bruna man'.
Malproksime brilas rozkoloro stepo,
Al rivero blua — vasta panoram'.

Mi — senzorga knabo. Kion mi bezonu!
Freŝan ventoblovon mi deziras nur,
Ke resonu koro, kiam kantoj sonas,
Kaj ke ne kurbigu frue la statur'.

Ĉe dekliv' ĉevoja haltas mi dum iro, —
Viroj kaj virinoj svarmas ĉe labor'
Flustras la rastiloj, fajfas la falĉiloj,
Hej, poet', ĉu flugis via forto for?

Mi preferas teron. Kial alten naĝi!
Kaj se logas valoj, logu ankaŭ pen'.
Mi, kampardevena, kreskis en vilaĝo.
Svingu do falĉilon, fajre kaj sen ĝen'.

Ah, rastil' — ne plumo, nek falĉil' — plumingo —
Tamen versliniojn faras eĉ falĉil'.
Dum sunbril' aŭ nuboj ĝin nur forte svingu.
Ilin oni legos ĉiam kun admir'.

For kostumon anglan, ĝin diablo prenu,
Donu do falĉilon, montrós mi al vi —
Ĉu mi al kamparo do ne apartenas?
Ĉu kun am' vilaĝon ne memoras mi?

Teraltaĵoj min neniam ĝenos.
Kia ĝoj' postlasi falbe en la val'
Versliniojn herbajn dum somer-mateno,
Por ke ilin legu ŝafo kaj ĉeval'.

En linioj tiuj poezi' sin trovas.
Kaj elkoran ĝojon sentas la falĉant'.
Ĉar bovino ĉiu legi ilin povas
Kaj per varma lakto pagas por la kant'.

Ho acer' frost-trema

Ho acer' frost-trema, ho acero nuda,
Kial staras kline vi en vento kruda?

Ĉu vi ion aŭdis? Ĉu vi ion vidis?
Ĉu amuz-deziro vin ĉi tien gvidis?

Kaj vi stumble venis kvazaŭ ebrulo,
Dronis en la neĝo, rigidigis kruo.

Ah plu firmpieda ankaŭ mi ne estas,
Nokte hejmenire sur la vojo restas.

Pinon mi ekvidis kaj salikon trovis,
Pri somer' ekkantis, dum neĝvento blovis.

Ŝajnis, ke mi estas mem acer' vojranda,
Nur ne senfolia, sed kun pomp' verdanta.

Kiam oni haltigis la boacaron sur la glacio de la akvokolo, la lacajn laponojn renkontis svedoj scivolaj, esperemaj, gajaj, parolemaj. La interparolado baldaŭ komenciĝis, oni difinis la buĉotajn bestojn, kaj tiel komenciĝis negocoj, ŝnurjetado kaj buĉado, ĝuste tio, kio apartenas al la akirado de la laponaj enspezoj. Ne gravas, ke oni estas laca, kiam mono enkasigas.

Kiam la karavano haltis sur la glacio, oni maljungis la tirboacojn, kiuj nun povis libere kuri kun la ceteraj bestoj. Elli kaŭris super sia etulo, sidigis ŝin pli bone kaj trankviligis ŝin dum momento, ĉar ŝi neforte ĝemetis.

Post duoj da horoj, oni pretiĝis preni la manĝaĵojn kaj eniri la domon de Mattis, kie oni estis restonta la nokton. Ĉar nun oni nepre devis ripozi. Elli paŝis al la akĵo de Kristina kaj levis singarde la etulon. Eble ŝi dormis. Ŝi kuŝis tiom strange malstreĉa kaj malmova, tiom peza sur la brakoj de la patrino. Elli forŝovis la felkolomon. La vizaĝo estis strange pala, la trajtoj tiom estingitaj.

— Kristina, Kristina!

Elli sentis kvazaŭ fantoman premadon ĉirkaŭ la koro. Farigis subite mallume ĉirkaŭ ŝi. Elli komprenis. Kristina, la korinfano mortis...

Post la unua paralizo, Elli laŭte kriis. Homoj alvenis. Ekscititaj oni kriis unu al la alia, konsilis, konsilis, esplorpalsis. Kristina estis mortinta.

Kaj edzino fremda ŝajnis la betulo,
Ĝin mi cirkaŭprenis kvazaŭ frenezulo.
1925.

Ni nun iros . . .

Ni nun iros unu post alia
Al la land' de l' paco kaj trankvil'.
Ĉu mi same kun havaĵo mia
Min preparu baldaŭ por forir'.

Ho vi, betularoj verdetantaj!
Ho vi, ter'! Kaj ebenaj' sen lim'!
Pro la granda ar' de l' forirantoj
La angor' pliiĝas en anim'.

Tro mi en ĉi mondo ĉion amis,
Ĉiun formon de la riĉa viv',
Sin tremoloj respegule banis
En la akvoj rozaj eĉ l' dekliv'.

Pensojn en silent' mi pensis multajn,
Kantojn pri mi verkis en trankvil',
Eĉ se estis tiu mondo stulta,
Tamen ĝojis mi pri ĉiu spir'.

Ĝojas mi, ke kisis mi virinojn,
Premis florojn kuŝe sur la ter',
Ke neniam havis mi kutimon
Besto-fratojn bati kun kruel'.

Mankos tie arboj verdetantaj,
Ne susuros cignakole gren'.
Pro la granda ar' de l' forirantoj
Tial ĉiam min ekkaptas trem'.

Mankos tie nia or' sekala,
Grenokamp' ne brilos dum vesper',
Estas tial al mi homoj karaj,
Ke ni vivas kune sur la ter'.
1925.

Estis al Elli malfacilegaj paŝoj, kiam ŝi kun la infano sur siaj brakoj pene paŝis tra la neĝblovaĵoj supren laŭ la deklivo al la domo de Mattis. Ŝia funebro estis muta, ŝiaj okuloj sekaj. Tia ŝi estis, kiam mi vidis ŝin, kaŭranta sur boacfelo sur la ĉambra planko, ruinigita, frapita, kun nigraj haroj fasko pendantaj laŭ la vangoj kaj en mikskolora vesto malordigita. Lakona kaj zorgpremata ŝi pene respondis al miaj mallaŭtaj demandoj.

La edzino de alia lapono, kamarado dum la doloriga vojaĝo, helpis al ni en la rakonto, la viroj plorgemis kaj ni aliaj konsentis al tiuj amare suferantaj homoj, kiuj tamen neniel forŝanĝus sian liberan, freŝan vivmanieron, dependantan de ĉiuj veteroj, por ĉiuj avantaĝoj de la sveda kulturo en la jaro de graco 1933.

La distrikta prokuroro skribis, dum mi mallaŭte diktis:

«Oni verŝajne povas kompreni la okazajn tiel, ke la infano, pro la treege peniga kaj longedura veturo en la malmola tereno, tre elĉerpiĝis, kion ankaŭ la patrino observis dum la veturado. Atinginte la vilaĝon, kiam la akĵo haltis, la infano peze endormiĝis. Dum tio, kion montras la menciitaj eksteraj signoj, ŝi profunde mallevigis en la ŝaffelan kovrilon kaj en dormo sufokiĝis.

Kion mi atestas je honoro kaj konscienco.»

El la sveda: Hj. Dahlgren.

Meditado supre de montpinto

— A. Novakampo —

Kiel bela estis hodiaŭ matene la sunleviĝo kaj kiel belega estas nun la sunkuŝiĝo! La montoj ŝajnas en flamoj. La ĉielo estas farbita per la plej delikataj koloroj, kaj malsupre en la valo mi vidas brili la grandan lagon en la lastaj radioj de la suno. Sed la plej lastan radion sendas la suno al mi tien ĉi, en la alton. La malgranda fenestro de mia modesta ligna kabano estas tute malferrita por ricevi tiun lastan, oran saluton de la suno antaŭ la nokto. Kaj kiam la bela ora kuglo malaperos malantaŭ la montoj kaj la krepusko falos sur ilin, tiam mi eklumigos la lampon kaj komencos legi. Car ĝuste hodiaŭ mi iris malsupren, en la valan vilaĝon, apud la lago, por preni la poŝton, senditan al mi de ĉiuj partoj de la mondo kaj por aĉeti la plej necesajn provizaĵojn. Unufoje dum la semajno mi malsupreniras por tio. Mi ricevis multe da libroj, leteroj kaj ĵurnaloj. La poŝto estas nun jam de kelkaj jaroj mia sola ligilo kun la forlasita mondo. Tuj post la terura granda mondmilito, mi volis forkuri en la solecon, proksime de la naturo, for de la terura kulturo kaj civilizacio, kiuj — tiel ŝajnis al mi — naskigis, estigis la militon, por esti sola kun mia profunda malespero kaj ankaŭ por povi en paco kaj trankvilo serĉi la verajn kaŭzojn kaj rimedojn kontraŭ novaj sangaj militoj, kia la pasinta. Nun mi vivas en ĉi tiu montara soleco. Mi spiras volupte la freŝan vesperan aeron, kiu nun blovetas de la montoj. Jam la montpintoj ne estas plu ruĝaj, sed flavaj, ili iom post iom fariĝas violetkoloraj kaj fine grizaj. La krepusko mallauĉte kovras ĉion. De malproksime oni aŭdas la sonorilojn de la brutaro, forlasanta la altajn paŝtejojn. Kiel belega estis la hodiaŭa tago! Mi povus esti tiel feliĉa tie ĉi supre en la montaro! Mi povus! Sed mi ne povas. Ne, mi ne povas plu vivi nur per sentoj kaj instinktoj. Mi devas ankaŭ pensi kaj mia maltrankvila, moviĝema penso postulas eĉ la ĉefan lokon en mia vivo. Sed pensu signifas suferi: mia senlaca penso neniam lasas en paco mian animon. Dum la tuta tago tiel bela, tiel serena, sub la blua, sennula ĉielo, en mezo de tiu ĉarma, monta pejzaĝo, miaj pensoj, miaj diligentaj, ĉiam vekitaj, viglaj pensoj kruele ripetadis al mia kvietaj, pacema koro: dum vi rigardas admireme la altajn montojn kaj la bluan ĉielon, dum vi ĝojas pri tiu bela suna tago, dum vi legas viajn amatajn librojn, dum vi penas kompreni la misterojn kaj enigmojn de la jaluze ilin gardanta naturo, dum vi provas eltrovi rimedojn kontraŭ daŭra malamemo kaj malfeliĉo de la homaro, tie malsupre en la grandaj centroj de ĉiuj »alte« kulturitaj kaj civilizitaj landoj, oni fabrikas kun febra rapideco kaj diligenteco armilojn kaj batalilojn, la plej perfektajn dum la tuta ĝisnuna homa historio dank' al la rapida progresado de naturaj sciencoj kaj tekniko. Ŝajnas vere — ho, kia terure dolora konstato! — ke la kulturo mem turnas sin kontraŭ si, ke ĝi memmortigas sin. Ŝajnas, ke la spirita evoluo de homo povas atingi nur certan alton kaj poste devas, per si mem, neniigi. Kia paradokso dolora, tragedia! Ho, miaj karaj libroj, miaj solaj amataj amikoj! Vi montras al mi la dornoplenan vojon de homa scio kaj spirita evoluo, la oferecon kaj sindonon por la scio sed samtempe ĝian sen signifan lokon en tiu granda mondo. Sen vi mi ne povus plu vivi. Vi estas kiel morfino, kiu venenas la korpon sed samtempe povas konstantan deziron ĝui ĝin. Jes, kiom da fojoj mi volis liberigi min de via influo por ne plu esti devigita ĉiam pensi kaj esplori kaj pensante — mal-esperi pro la senvaloreco de la mirinda fortstreĉo de homa genio. Ju pli ni scias, des pli ĉio komplikiĝas, kaj aperas ĉiam novaj problemoj, novaj eblecoj, novaj demandoj!

Nia sciavideo iĝas ĉiam pli forta, pli malsatema, pli brulanta. Serĉante, esplorante, cerbumante ĉiam plu, ni vidas, ke nia kapableco kompreni la bazojn de la naturaj leĝoj, regantaj en nia universo, estas tiel limigita, tiel nenia, tiel ridinde senvalora kaj malgranda, ke anstataŭ kontenteco pro malkovritaj novaj leĝoj de la naturo, ni fine sentas nur malesperon pro nia sensignifo en la universo kaj kvazaŭ teruran senton de timo antaŭ tiu kolosa, por ni nesolvebla enigmo de la vivo. Kiel mi envas la primitivajn, sovaĝajn homojn! Ili, nur ili estas vere feliĉaj. Iliaj ankoraŭ neuzitaj kaj neŝanĝitaj instinktoj gvidas ilin certe tra la vivo. Iliaj viglaj instinktoj estas por ili pli forta kaj pli certa armilo ol por ni, la civilizitaj, nia pensopovo, tiel malrapide kaj malfacile akirita dum jarcenta evoluo kaj ankoraŭ hodiaŭ tiel malperfekta. Ili ne necesas cerbumi kaj ili ne havas ankoraŭ la bezonon analizi kaj pripensi ĉion kaj konstante sin demandi febre: »Kial do estas tiel en la mondo? Pro kio, por kio?« Do ili travivas la tagojn feliĉe kaj kviete, akceptante la mondordon sen ribelo, sen malkvieteco, kontraŭe, kun rezignacio. Ili vivas feliĉe! Sed ni, la tiel nomitaj civilizitaj, kulturitaj homoj, sentas la nepran, fortegan bezonon scii, ekkoni, analizi kaj esplori ĉion, ĉion! Ni luktas malsupre kontraŭ la naturo, kiu defendas siajn misterojn kontraŭ la scivolemo de la homo. Kiel en konstanta febra ekscito ni serĉas sencese, maltrankvile, ribele la vojojn al la vero, la malkovron de la universaj misteroj. La eternaj, scivolemaj demandoj de la homo: Kial? Pro kio? estas la ĉiamaj puŝiloj de homa genio, kiuj donas forton kaj paciencon por esplori la naturon, gardantan severe siajn sekretojn. Kaj ĝuste nun mi ekscias el la ricevitaj ĵurnaloj, ke unu el tiuj lastaj, ankoraŭ feliĉaj popoloj, tiel malespekte de ni nomitaj »sovaĝaj«, estas nun ankaŭ konkerita de »civilizita« lando, certe por ke oni transdonu al ĝi la »bonfarojn« de nia alta eŭropa kulturo! Jes, oni feliĉigos ĝin per la »akiraĵoj« de nia »kulturo«. Ĝi estas »sovaĝa«, oni devas ĝin »civilizi«, ĉar ĝi, malfeliĉa, ne konas ankoraŭ la plej lastajn »bonfarojn« de nia »kulturo« kaj »scienco«. Tiuj »sovaĝaj« homoj ne studis »hemion«, do ili pro tio ne scias kio estas: eksplodantaj bomboj, kio mangrenadoj, kio fajrobomboj, kio venenaj gasoj, kiuj per terura kaj rapida efiko povas neniigi dum mallongaj momentoj tutajn urbojn. Ili ne scias ankoraŭ, ke homa genio eltrovis aeroplanojn por flugi libere en la aero, kiel birdo, realigante per tio la malnovan sonĝon de la greko Ikaro, sed ĉefe, en la praktiko, nur por ĵeti de supre sur nearmitan popolon bombojn kaj sufokantajn gasojn! Do oni montris al ili tiujn bonfarojn akiraĵojn de nia »kulturo« kaj ankaŭ ili, la »sovaĝaj« estos »civilizitaj« kaj pridonacitaj per la bonoj de nia »kulturo«. Kulturo! Ŝajnas, ke oni trouzas tiun grandan vorton kaj kaj mi kredas ke, precipe, oni tute malĝuste interpretas kaj komprenas la veran koncepton de »kulturo«. Car »kulturo« signifas antaŭ ĉio: humaneco, kontraŭe de sovaĝeco, de barbareco, kiujn karakterizas vivo precipe per sentoj kaj nebriditaj instinktoj, anstataŭ vivo bazita sur humanecaj principoj kaj idealoj, akiritaj dank' al spirita evoluo. Do ankaŭ nur mensa, scienca kaj teknika evoluo ne sufiĉas por esti »kulturita«. Nepe, paralele devas sekvi evoluo de animo, de humaneco. Kiam mi trarigardas la ĵurnalojn el ĉiuj partoj de la tero kaj kiam mi legas la novajn okazaĵojn el la vivo de la popoloj, mi demandas min ĉiufoje dolore mirigita: ĉu mi vere vivas en tempo de kulturo kaj civilizo? Ĉu la »kulturo« estas nur bela utopia, himero, neniam atingebla por la homaro? Car, vere, ĉu oni povas

nomi »kulturo« ĉion tion, kion sciigas la ĵurnaloj el la ĉiutaga vivo de la popoloj? Ĉu estas signo de kulturo: febra armado en preskaŭ ĉiuj landoj de la tero, persekutadoj de malgrandaj popoloj kaŭze de iliaj religio, rasa deveno aŭ propraj kutimoj; la grandskala »gansterismo«, specialigita en raboj de infanoj de riĉaj gepatroj por elacetiigi ilin per grandegaj monsumoj, neniu de kolosaj mangoprovizoj, kiel kafo, tritiko, dombestoj k. t. p. por altiĝi ilian prezon, dum milionoj da homoj suferas kaj mortas de malsato; subteno de komerco de opio, morfino kaj de diboĉo, por eltiri de ĝi grandegan profiton; hontinda, humiliganta dependeco de kulturita virino de la kulturita viro; fine en la interrilatoj de kvazaŭ ĉiuj popoloj internacia reciproka malhelpo per limdepagoj, leĝoj, limbariloj, pasportoj, eĉ batalo kontraŭ nia, liganta ĉiujn, mondlingvo k. t. p. anstataŭ konstanta faciligo alproksimiĝi la popolojn. Kaj alilanke la maŝinoj, mirinda eltrovaĵo de la rapidege evoluita tekniko, iĝis malbeno de nia socia vivo, anstataŭ vera bonfaro, pro la avido de la industrio. Kaj post la lastaj demokratismaj, humanecaj idealoj, la nuna denove kreskanta militismo ŝajnas vere reveno al mezepokaj kutimoj kaj al antaŭa persona mallibero. Kaj kion do mi ne legis sur unu sola pago de lastesendita ĵurnalo: vere, hodiaŭ la ĉiutagaj presitaj ĵurnaloj (la gazetaro ĉiutaga), iĝas per si mem viva, pulsanta, historia kroniko de nia tempo kaj spegulas plej bone la spiriton de diversaj popoloj. Do, antaŭ ĉio, estas la sciigoj pri la politikaj kaj diplomaciaj rilatoj inter diversaj landoj, aro da hipotezoj, de supozoj, da ŝajnaj pruvoj de la ĝusteco de tia aŭ alia agado, propacaj paroladoj kaj idealoj, irantaj paralele kun febra armado. Kaj kiam oni komparas antaŭajn artikolojn pri la sama temo aŭ afero kun la lasta, aperinta en la sama ĵurnalo, oni devas miri, ke tute kontraŭaj agadoj estas, laŭcirkonstanco nomitaj la solaj ĝustaj, veraj kaj eblaj. Kaj ankoraŭ unu pruvo, ke hodiaŭ la forto fizika kaj materia estas ankoraŭ pli grava ol tiu spirita, la vera kulturo: la Ligo de Nacioj. Tiu belega institucio estis rezulto de profunda idealismo kaj humaneco de ĝia kreinto, sed hodiaŭ ĝi estas nur pasiva ilo de potenco, profito kaj de internaciaj intrigoj. Vere, la ĵurnaloj, priskribantaj la ĉiutagan vivon de unuopaj homoj kaj la rilatojn inter la popoloj, lasas en mia koro dolorplenan malgajecon, kelkfoje eĉ malesperon. Kaj ĉio tio nomiĝas kulturo: tiu miksaĵo de influoj de la plej malklera, netolerema mezepoko kun la p. e. j humanecaj tendencoj, tiu konstanta manko de logiko kaj de sekveco en kvazaŭ ĉiuj homaj agadoj! Kiel ridinde ŝajnas al mi la konvinko pri »nia kulturo« kaj la pretendo »esti kulturitaj kaj civilizitaj«. Skribante pri tiu ajn lando, ke ĝi estas jam de »miloj da jaroj« »kulturita«, oni forgesas, ke »miloj da jaroj« estas kvazaŭa momento en la tempo de daturo de la universo. Oni forgesas ke en astronomio ekzistas ciferoj kun 30 kaj eĉ pli nuloj. »Miloj da jaroj« — kiaj sen-signifaj momentoj! Ekzistas certaj religiaj, samtempe higienaj kutimoj eĉ certaj orientaj popoloj, kiuj devigas la homojn ŝanĝi perforte certamaniere la korpan morfologion, sed kvankam tiuj kutimoj ekzistas jam de multaj miloj da jaroj, tiu ŝanĝo artefarita ne influas la korpan strukturon, ĉar ĝi restis la sama ĝis nun. Cetere la tuta homa historio elmontras, ke tre multaj hodiaŭaj kutimoj, regosistemoj kaj vivmanieroj jam ekzistis en la plej malproksima, de ni jam konata, antikva tempo, sed, ke la evoluo estas trege malrapida kaj postulas tre oftan ripetadon de ĉio, por fine fari veran, daŭran ŝanĝon en la materia, morala aŭ spirita vivo de homaro. Guste hodiaŭ mi legis tre interesan novaĵon en ĵurnalo kaj tiu malgranda, ŝajne sen-signifa fakto estas ankaŭ pruvo por malrapida evoluo de homo. Do jen ĝi: oni trovis en la

El „Kanto Nova“

— Gabriele D'Annunzio —

La akvoj dormas en la plenluna nokt'
junia. Rekte super la marhaven'
la mastoj staras kvazaŭ palaj
fantaziaĵoj en bril' neĝblanka.

Per nordvento muta navigas plu
la flokaj nuboj; migras en milda pac'
la sonĝo-svarmoj. Ĉu vi sentas,
Lalla, la dian odoron maran?

Ho aŭdu! naskas nun la vekita ond'
murmuron longan; frapas en flirta vent'
flugil' de kanto. En ĉi nokto
dancas siĝenoj en lum' de luno,

dancadas, Lalla. Kanto: »Ho juna gent',
en kies viva koro kaj varma vejn'
jubilas la junj' odora,
pacas la mar', nokto belas, amu's

susuras. Blankaj nuboj sin perdas jam
tra la silento; migras en milda pac'
la sonĝo-svarmoj; ĉu vi sentas,
Lalla, la dian odoron maran?

*

Ho serpo de l' luno sinkanta,
brilanta sur akvoj dezertaj,
ho serp' el arĝent', kia sonĝo-rikolto
al bril' via milda ondumas de l' ter'.

Suspiroj mallongaj de frondoj,
de floroj, de ondoj, el bosko
elspiras al maro; nek kanto nek krio
nek sono nun iras tra l' vasta silent'.

Jugitaj de am', de plezuro
popol' de vivantoj ekdormis,
ho serp' el arĝent', kia sonĝo-rikolto
al bril' via milda ondumas de l' ter'.

(Kalocsay).

ĉirkaŭa arbaro de iu malproksima, monta vilaĝeto en Rumanujo estajon, kiu ŝajnis duonhomo kaj duonbesto, preskaŭ tute kovrita per longaj haroj. Post demandado kaj esplorado oni fine konvinkigis, ke tiu stranga estaĵo estis filino de konata tie almozpetulino, kiu dumtage lasis ŝian idon en roka kaŝejo, kaj, nature, tiu ĉiam nutris sin per fruktoj, herboj kaj radikoj, trovataj en la arbaro. Oni forprenis tiun »malfeliĉan duonsovagan estaĵon« (ekzakte, laŭ la vortoj de la ĵurnalo) de ĝia roka kaŝejo kaj portis ĝin al loka orfejo kie, je la teruro de la »civilizitaj« infanoj, ĝi baraktis kaj luktis sovaĝe kontraŭ la vartistinoj, kiuj volis vesti ĝin perforte kaj doni al ĝi kuiritan manĝaĵon, kiun ĝi rifuzis kun abomeno. Tio estas malgranda novaĵo, kiun sciigis ĵurnalo. Sed kia leciono por ni, civilizitaj! Se sufiĉas alkitimiĝi infanon al vivo meze de sovaĝa naturo en la plej malalta aĝo por igi ĝin duonsovaĝe, aspektanta kvazaŭ besto de arbaro kaj nutranta sin per krudaj radikoj kaj folioj, do, certe nia civilizo kaj kulturo ne estas ankoraŭ tre profunde enradikigita en ni. Sed, malgraŭ ĉiuj ĝis nun okazintaj terurajoj sur nia malgranda tero, la eternaj leĝoj de la mondo ne ŝanĝiĝis: ili ne estas influeblaj per la mizeraj faktoj de homa vivo! Kaj kiel ĉiam, post ĉi tiu radianta belega tago, nun stelplena nokto kovras ĉion kaj la luno

Vojaĝo de Sganarelo al Filozofujo

Unuakta komedio de Ludvig Holberg

(La unuaj 8 scenoj tradukitaj de H. Bonnevie kaj M. Muribo)

SCENO I-A.

Sganarelo (sola kun la manoj entenditaj supren):

Dankon al la ĉielo, ke fine, post tiom da klopodoj, mi venis al la sopirita urbo, kie ni intencas loĝi. Kio povas esti pli agrabla ol loĝi inter nuraj filozofoj, kie ni aŭdos nenion krom saĝo? Mi estas laca kaj senfortigita de la vojaĝo, sed imagante ke ni feliĉe atingis la deziritan celon, mi jam sentas miajn fortojn renoviĝi.

Mia sinjoro Leandro, kiu estas ekster la pordego kun la pakajo, antaŭsendis min ĉi tien por lupreni loĝejon, sed nenion mi vidas: ĉi tie estas tiel trankvile kvazaŭ estus nokto. Tio ja pravas ordon kaj bonajn morojn. Mi do devas frapi la unuan pordon, por ke mi parolu kun ĉi. (Li frapas.)

SCENO II-A

(Sganarelo. Filozofo kun longa barbo.)

Sganarelo: Jen mi vidas, ke venas ĉi. La saĝo staras pentrita sur lia frunto. Sinjoro magistro, ne ofendiĝu, se mi vin demandas, ĉu vi scias pri loĝejo por du fremduloj. (La filozofo nenion respondas, sed nur oscedas.) Sinjoro doktoro, ĉu vi eble ne atentis mian demandon? (La filozofo silentas kaj ree oscedas.)

Sganarelo: Ĉu vi eble scias pri bona loĝejo por du vojaĝantoj?

La filozofo (oscedinte trian fojon, rigardas la sunon kaj diras): Laŭ la suno nun estas la naŭa horo.

Sganarelo: Mi demandas nek pri kioma horo nek pri la suno, demandas pri loĝejo. (La filozofo oscedas kvaran fojon kaj foriras.)

Sganarelo (mokimitas lian oscedadon): Se tiu ĉi estas saĝulo, li por nenio estas utila, ĉar li ne elparolas, sed eloscedas la saĝon. Sed mi devas provi renkonti iun alian, kiu parolas iom pli multe kaj oscedas iom malpli multe. (Li frapas alian pordon.)

SCENO III-A.

(Sganarelo. Heraklita filozofo.)

La filozofo: Ĉu vi havas ion por preparoli kun mi?

Sganarelo: Mi estas fremdulo, kiu kune kun fremda sinjoro venis al ĉi tiu urbo post penplena kaj laciga vojaĝo. Ni suferis pacience ĉiujn maloportunaĵojn, kiujn kaŭzis

la vojaĝo, esperante ke... (La filozofo hurlas kaj ploras.) La larmoj, kiujn Sinjoro Doktoro verŝas, pravas vian kornoblecon kaj kompatemon, sed nun tio estas forgesita, ĉar... (La filozofo ree hurlas.) Mi diras, ke ĉio estas forgesita. Nun mi petas nur, ke Sinjoro Doktoro faru al mi la komplezon havigi al mi bonan loĝejon kontraŭ pago. (La filozofo ree hurlas.)

Sganarelo (flanken): Tiu homo ja estas same freneza kiel la unua.

La filozofo: Al kiu vi aludas per »la unua«?

Sganarelo: La unua homo, kiun ĉi tie mi demandis pri la sama afero, respondis ion sensecan, kio tute konfuzis min. (La filozofo ree hurlas, kaj Sganarelo mokimitas lin.)

La filozofo: Vi diras, ke tio tute konfuzis vin.

Sganarelo: Jes certe, ĉu mi eble povus alion, kiam... (La filozofo ree hurlas. Sganarelo puŝas lin je la postajo, kaj ambaŭ hurlas kune.) Nun vi povas havi kialon por hurli. Kiajn malbenitajn grimacojn faras ĉi tiuj filozofoj! Sed jen mi vidas alian, kiu transiras la straton. Li aspektas gaja kaj afabla. De li mi certe ricevos klarigojn pri ĉi tiu strangajo.

SCENO IV-A.

(Sganarelo. Demokrita filozofo.)

Sganarelo: Ĉu mi povus paroli kelkajn vortojn kun via sinjora moŝto?

La filozofo: Jes, plezure, tiom longe kiom vi deziras.

Sganarelo (flanken): Ĉi tiu homo ja estas tute bonmaniera. (Laŭte:) Trafis min ĉi tie strangaj okazintaĵoj.

La filozofo: Kiaj?

Sganarelo: Mi parolis ĉi tie kun du filozofoj, mi demandis la unuan, ĉu li scias pri ia loĝejo, sed anstataŭ respondi mian demandon, li oscedis kaj fine diris, ke estas la naŭa horo. Ĉu tiu homo estas tute sana je la kapo?

La filozofo: Ha, ha, ha, hi, hi, ha, ha.

Sganarelo: Jes, Sinjoro Magistro certe havas kaŭzon por ridi; mi mem ne povas ne ridi, kiam mi pensas pri tio. (Ili ridas ambaŭ kune.)

La filozofo: Sed kiam respondon vi ricevis de la alia?

Sganarelo: La alia hurlis je ĉiu demando kaj ploris kvazaŭ vipita.

jetas bluetan lumon sur la montpintojn. Mi estingas la lampon kaj rigardas admire la belogan noktan pejzaĝon. Kaj nun en ĉi tiu soleco, en ĉi tiu kvieteco kaj mallumo mi sentas min tiel malgranda, tiel nenia en la kolosa senlima universo, sed, samtempe, ankaŭ senfine malgranda parto de ĝi. Kaj tiu dependeco, tiu aparteno al la tuto donas al mi forton, esperon, kvazaŭ religian konsolon. Kaj malgraŭ mia malgajeco pri la ĉiutage sciigitaj el la ĵurnaloj novaj teruraj okazaĵoj el la homa vivo, malgraŭ mia nuna senluziigo pri la ĝisnuna kulturo kaj civilizacio homa, en ĉi tiu momento de komuna, instinkta konsento kun la tuta universa vivo mi havas la fortan kredon, ke fine — eble nur en tre malproksima estonteeco — la homa kulturo, kiu hodiaŭ estas vere nur ŝajna, laŭnoma, iĝos vere kultura, homa, universa kaj, ke ĝia misio humanigi ĉion, krei tutmondan interkonsenton de ĉiuj popoloj sur nia malfeliĉa, mizera terkuglo en komuna sento de admiro kaj humileco antaŭ tiu enigma, nekom-

prenebla por ni, senlima universo, iĝos realeco kaj vero. Kaj mi pensas nun kun admiro al tiuj nemultaj homoj el la, de mi konataj, antikvaj landoj, kiuj jam en la tiel malproksimaj tempoj pasie serĉis la veron kaj penis malkovri la misterojn de la eternaj steloj, kviete brilantaj sur alta, neatingebla ĉielo. Eterna estas la dia flamo de scideziro, brulanta en la homa koro kaj ĝi gvidos nin al evoluo kaj perfekteco. Belaj steloj, magie radiantaj sur nokta ĉielo, mondoj nekonataj, kiam, kiam do fine estos permesite al ni, humilaj, travidi la misteron de via ekzistado? Kiam do ni, mizeraj homoj, povos manĝi senpene la orajn fruktojn de la arbo de la saĝo? Kaj nun en ĉi tiu bela, stelplena nokto, solece en grandioza montara regiono, mi ekmemoras la profetajn, humanajn vortojn, diritajn de Victor Hugo en la jaro 1871: »Same, kiel ekzistas nur unu sola homaro, ankaŭ ekzistas nur unu sola popolo. Defendi ĉie homan progresadon en danĝero estas nia sola devo. Ni estas la naciuloj de la civilizacio,«

La filozofo: Ha, ha, ha, hi, hi, ha, ha, ha.
Sganarelo: Sajnas al mi, ke li estas ne malpli freneza ol la unua. (Ili ree ridegas kune.)

Sganarelo: Kiel juĝi pri tiaj homoj?

La filozofo: Ha, ha, ha, hi, hi, hi, ha, ha, cetero mi vidas el via vestaĵo kaj via tuta eksterajo, ke vi estas fremdulo.

Sganarelo: Jes, Sinjoro Magistro. Mi venas de tre malproksima lando.

La filozofo: De tre malproksima lando? Ha, ha, hi, ha...

Sganarelo: Tio ja ne estas io ridinda.

La filozofo: Por kio vi venas ĉi tien?

Sganarelo: Por interrilati kun kleruloj kaj esti instruita pri saĝo. (La filozofo ree ridas.) Ha, sinjoro, bonvolu do moderigi tiun ridadon, kaj ni parolu iom serioze kune.

La filozofo: Serioze kune, vi diras. Ha, ha, hi...

Sganarelo: Je diablo, kio do estas tio? Cesigu fine la ridadon kaj diru al mi, kie bona loĝejo estas trovebla!

La filozofo: Bona loĝejo, vi diras? (Li foriras ridante.)

Sganarelo: Ha, disridu do vian gorgon, vi bestaĉo! Unu filozofo ja ĉi tie estas pli freneza ol la alia. Tiom konfuzis min ĉi tiuj okazintaĵoj, ke mi ne scias, ĉu mi dormas aŭ maldormas. Se ĉi tiu estas la urbo de l' saĝo, mi tre dezirus scii, kion oni povas nomi frenezulejo. Nun mi bone memoru tion kaj ĉi tion, por ke mi povu raporti al mia sinjoro ĉion detale.

SCENO V-A.

(*Sganarelo. Nova filozofo.*)

(Dum Sganarelo staras pripensante, venas rapidege nova filozofo, kiu alkurante lin renversas.)

Sganarelo: Kion, je diablo, signifas ĉi tio? Kial vi agas kontraŭ mi tiamaniere? Kion malbonan mi faris?

La filozofo (levas lin je la piedoj): Ej, ej, mi prenas la piedojn anstataŭ la brakojn, milfoje mi petas pardonon. La eraron kaŭzas tio, ke mi havas tro akran vidadon.

Sganarelo: Sajnas al mi, ke kaŭzas ĝin prefere tio, ke vi estas tute blinda.

La filozofo: Sinjoro! La akra vidado, kiun la naturo donis al mi, kaŭzas, ke mi nenion povas vidi, kio estas proksima al mi.

Sganarelo: Se la naturo ne havis ion alian por doni al vi, vi devus deziri, ke ĝi estu teninta sian donon ĉe si mem.

La filozofo: Ne, sinjoro! Kontraŭe mi povas vidi, kion aliaj ne vidas. Mia akra vidado penetras ĝis la interno de la aĵoj kaj fiksis sin je la kerno, kiu estas kaŝita al aliaj.

Sganarelo: Tio superas mian komprenon.

La filozofo: Estas tamen tiel, sinjoro. Oni tial nomas min la subtila doktoro. Sed mi vidas, ke vi estas fremdulo. Por kio vi venas ĉi tien? Se mi povas helpi vin pri io, estos al mi plezuro.

Sganarelo: Mi dankas sincere. Mi unue nur volas demandi, ĉu oni ĉi tie povas ricevi bonan loĝejon por du personoj.

La filozofo: Pri tiaj simplaj kaj trivialaj aferoj mi ne zorgas, sed se vi volas scii ion en *philosophia occulta*, mi estas je via dispono.

Sganarelo: Ne, ne, mi demandas nur pri...

La filozofo: Kiel ekzemple pri la forto de l' magnet, pri la kvalito de l' animo, pri la cirkulado de l' sango, pri la ecoj de formikoj kaj kuloj, pri la interna organismo de aliaj insektoj, pri...

Sganarelo: Ne, ne, je la haŭto de l' diablo! mi demandas pri...

Tagmezo

— Gabriele D'Aunzio —

Tagmez'?' La strato longe etendas sin
antaŭen rekte, large, en blanka bril',
ĉe flanko stoploj bruligitaj;
en la flavego nenie herbo.

Nenia voĉo en la sufoka varm'
inerta; ardas nun kiel incendi'
l' aer'. Silento. Al ĉevaloj
pendas la lango en laca trolto.

Sed homoj staras kurbe nun en la kamp',
sangsvitaj, lasas baki kranion en
la brul' de l' senkompata suno,
estas sen sola gutet' da akvo,

sen pec' da pano. En la ardanta hum'
enprofundigas ĉi malespera trup'
la feron; ili sin rigardas
per estingita okul'; ne plendas.

Ja persekutas kvazaŭ malbona di'
senĉese ĉi damnitajn de vivoturment'
eterna; ili sian nukon
klinas al sulko de ter'; ne plendas.

Tagmezo, hor' de manĝoj abundaj, de
dolĉmolaj songoj. Ili enpuŝas la
brilantan feron. Ho pioĉu,
filoj, pioĉu; ripoz' ne estas.

Pioĉu, filoj: mizerikordo ne
ekzistas ja, pioĉu, ĝis spitas al
furio de la tif' la brakoj.
Filoj, pioĉu; ripoz' ne estas.

(*Kalocsay.*)

La filozofo: Aŭ se vi volas ion scii pri la animoj de la bestoj, ĉu ili estas maŝinoj aŭ vivantaj kreitaĵoj, ĉu *Nominales* aŭ *Reales* devas esti nomataj *Orthodori Philosophi*... (Dum li tiel parolas, Sganarelo alkurante renversas lin kaj ankaŭ senkulpigas sin pro sia akra vidado. La subtila filozofo tuj restarigas sin, faligas Sganarelon teren, donas al li multe da batoj kaj forlasas lin kuŝanta.)

SCENO VI-A.

(*Sganarelo. Astrologo kun lorno, per kiu li faras observojn*)

Sganarelo: Ho ve! ho ve! ĉu neniu ĉeestas kiu povas min restarigi? Ho ve! helpu mizeran trabatitan homon, kiu ne povas mem starigi sin.

La astrologo (ĉirkaŭrigardante): Kiu krias? Kuŝas ja tie duonmortinta homo. Kio okazis al vi, amiko?

Sganarelo: Bonvolu min restarigi, sinjoro. Mi falis en la manojn de malbonuloj, kiuj tiom batis min, ke miaj membroj estas frakasitaj.

La astrologo: Tio min kore doloras. Estas mia devo helpi mian proksimulon, mi petas nur iom da pacienco, ĝis mi estos esplorinta en mia astrologia libro, ĉu en ĉi tiu monato kaj en ĉi tiu tago de l' monato oni devas entrepreni ion gravan. (Li foliumas en la libro.) Ne, sinjoro, ne konvenas je la nuna tempo. Mi vidas, ke estas la dekkvara tago en la monato Morian. En tiu, laŭ astrologiaj reguloj, nenion gravan oni devas entrepreni. Se sinjoro bonvolas havi paciencon, ĝis subiros la suno, mi povos helpi vin ne malobeante astrologiajn regulojn.

Sganarelo: Tiajn regulojn neniu povis dikti krom la

diablo. Ĉu iam povas esti malpermesite helpi sian proksimumon?

La astrologo: Certege kaj estas tiel kaj povas esti.

Sganarelo: Ho ve, mi mizerulo, malfeliĉa estis tiu tago, kiam ni decidis veni al ĉi tiu urbo.

La astrologo: Ne diru tion, sinjoro. Vi venis en urbon, kie ekloĝis la naŭ diinoj de l' saĝo.

Sganarelo: Prefere diru: naŭ diinoj de Infero aŭ naŭ malfeliĉoj, ĉar...

La astrologo: Ne troferovorigu, moderigu viajn pasiojn kaj estu pacienca ĝis la vespero, tiam tute plezure mi helpos vin. Adiaŭ ĝis plue. (Li foriras.)

SCENO VII-A.

(*Sganarelo. Skeptika filozofo.*)

Sganarelo: Ho ve, ĉu do eĉ unu kompatema homo ne troviĝas en la tuta urbo.

La filozofo: Mi aŭdas ion kriptantan. Tie mi vidas kompatindulon, al kiu okazis akcidento. (Li starigas lin.)

Sganarelo: Mil dankojn, Sinjoro doktoro. Mi ĝojas, ke troviĝas honesta aŭ saĝa homo en ĉi tiu urbo de granda klereco.

La filozofo: Kio okazis al vi, amiko?

Sganarelo: Tiamaniere mi estas batita kaj malbone traktita de iu el viaj kolegoj, kiu nomis sin subtila filozofo, sed al mi li vidigis nur malmulte da subtileco.

La filozofo: Sed ĉu vi estas certa pri tio?

Sganarelo: Ĉu mi ne estus certa pri tio, kio ĵus okazis?

La filozofo: Via vidado eble vin trompis.

Sganarelo: Almenaŭ la sentado ne trompis min, tion atestas miaj trabatitaj membroj.

La filozofo: La sentado, kiu estas unu el la kvin sentumoj, povas trompi ne malpli ol la vidado.

Sganarelo: Tio ja estas malbenita sensencaĵo, vi ja mem vidis, ke mi kuŝis sur la strato kaj kriis por helpo.

La filozofo: Certes saĝnas al mi tiel, sed...

Sganarelo: Malfeliĉon al vi kun via sedo. Vi ja mem restarigis min.

La filozofo: Eble povas esti tiel.

Sganarelo: Do mi povas ja repreni mian dankdiron.

La filozofo: Eble.

Sganarelo: Eble, eble! Aŭdu, bona sinjoro Eble: Se iu agus tiamaniere kontraŭ vi, kion vi dirus?

La filozofo: Nenion alian mi dirus ol ke saĝnas esti tiel. (Sganarelo donas al li tri fortajn frapojn.)

La filozofo: Aj, aj, ĉu ne estas senhonte tiel trakti filozofon?

Sganarelo: Eble.

La filozofo: Kaj tiel rekompenci bonfarojn?

Sganarelo: Eble, eble.

La filozofo: Ho ve, mia kompatinda dorso!

Sganarelo: La sentado estas unu el la kvin sentumoj, kiu povas trompi ne malpli ol la vidado.

La filozofo: Mi tuj devas iri hejmen por ŝmiri mian dorson.

Sganarelo: Iru al la koboldoj kaj ŝmiru vian kleran cerbon; ĝi bezonas ŝmirajon prefere ol la dorso. Se mi ne atendus ĉi-momente Leandron, mian mastron, mi tuj forkurus, por ke ne okazu al mi pli multe da tagenoj. Se ni nur rapidus! Sed jen li venas. Li rievos ĉion tiel freŝa, kiel mi ĝin ricevis.

SCENO VIII-A.

(*Leandro. Sganarelo.*)

Leandro: Nu, Sganarelo, kiel progresas la afero? Ĉu vi sukcesis trovi bonan loĝejon? (Sganarelo nenion respondas, sed oscedas.) Ĉu vi ne aŭdas, pri kio mi deman-

La vulturo de l' suno

— Gabriele D'Annunzio —

Kelkfoje, dum medito aŭ revo-ŝpino,
se flagras kiel flam' l' aero sala,
se bruas tra l' silent' pinfrukto fala,
sur arbo surde siblas la rezino,

se marĉflutist' muzikas en la ŝlimo,
zumas sovaĝaven' en vasto vala,
subite mian koron, vi, fatala,
rabbaptas, igas predon el l' animo,

ho Glor', vulturo de la sun', ho Glor'!
Vi sur min saltas, tranĉas min ungire,
ĝis arda klifo, kie mi azilas.

Frontleve vidas mi kun kor-dolor'
tra l' ruĝo de l' palpebroj fermaj, mire,
ke jen de mia sang' la mondo brilas.

(*Kalocsay.*)

La kombilo

— Gabriele D'Annunzio —

Kiam la fajroj de l' sun' estingiĝis sur monto Mario,
venis la nuboj en trup' lante de l' mont' Palatin'.

Milde la spiro de vent' ilin prenas kaj trenas uesten,
kie cipresoj en vic' akiras al alto per pint'.

Mordas tiam la pint' de la nigraj cipresoj la nubojn,
kvazaŭ tra longa kombil' fluas hararo el or'.

(*Kalocsay.*)

das? (Sganarelo denove oscedas.) Mi pensas ke vi fariĝis kaj blinda kaj muta. (Sganarelo ree oscedas.) Ne staru tiel mokante min. Ĉu vi ne povas respondi mian demandon?

Sganarelo: Kion sinjoro deziras ekĉi?

Leandro: Mi demandas ĉu vi sukcesis trovi loĝejon?

Sganarelo: (rigardante la ĉielon, oscedas kaj respondas): Mi vidas, ke laŭ la suno estas nun la naŭa horo.

Leandro: Je diablo, kio estas tio? Mi pensas, ke la homo estas sorĉita. Ĉu vi ne plu konas min? (Sganarelo hurlas kaj ploras.) Almenaŭ diru al mi, kie vi estis kaj kio al vi okazis. (Sganarelo ree hurlas.) Ha, kia malfeliĉa okazaĵo estas tio! (Li ree hurlas.) Ĉu vi ne konas min, vian mastron?

Sganarelo: Mia mastro? Ha, ha, hi, hi, ha!

Leandro: Mi sentas, ke lia intelekto estas difektita.

Sganarelo: Ha, ha, hi, ha!

Leandro: Ĉu la aero de la urbo povus efiki tion?

Sganarelo: Ha, ha. Ne, sinjoro, al mi mankas nenio je la intelekto. Sed nenian certan respondon mi povas doni al la demando.

Leandro: Ĉu vi ne povas diri jes aŭ ne?

Sganarelo: Eble.

Leandro: Kion vi volas diri per via eble?

Sganarelo: Nenion gravan.

Leandro: Se vi mokas min, rezultos al vi malbono.

Sganarelo: Mi tute ne mokas vin, sinjoro.

Leandro: Ĉu tio ne estas moko, kiam al ĉiu demando vi respondas sensencaĵon?

Sganarelo: Nur saĝnas tiel al vi, sinjoro, ĉar oni ne



OBSERVO

LA BULGARA NACIA TEATRO

La slavoj ĝenerale kaj la bulgaroj speciale tre ŝatas la teatron. La bulgara ĉefurbo Sofio estas tre feliĉa en la rilato kontentigi pri tio siajn loĝantojn. En ĝia centro altas la plej granda, la plej bela kaj plej bona teatro sur la Balkana duoninsulo: la NARODEN TEATER = Nacia Teatro. Antaŭ 13 jaroj ĝi forbrulis. Por ĝia rekonstruo la bulgara nacio ŝparis nenion, faris amuzvesperojn, mon-kolektojn ktp. Ĝia rekonstruo kaj pligrandigo forglutis 120 milionojn de bulgaraj Levjoj. La gvidanto de tiu rekonstruo estis la Dresena profesoro Dülfer. En 1923, mi — kiel tiama sekretario de la bulgara konsulejo en Dresden — havis kelkajn renkontojn kun la dirita profesoro de arkitekturo. Li diris al mi: »Mi konstruis ĝis nun en Eŭropo 28 teatrojn, la Sofia estas la 29-a; 30-an mi ne konstruos!« Li tenis sian parolon. Kaj vere, li el-versis sian tutan arton kaj la bulgara Nacia Teatro fariĝis unu el la plej grandiozaj, modernaj kaj riĉaj en tuta Eŭropo, kun turnigantaj scenejoj ktp. kaj ĝiaj geaktoroj estas unuj el la plej bonaj kaj admirataj.

Ne nur Sofio, sed ankaŭ la provinco vivas kun la penso pri sia teatro. Ĉiututage la demando pri la nova administrado de la teatro, pri la novaj artistaro kaj repertuaro estas loka »regna demando« ...

Jes, la bulgaro ŝatas la teatron. Kaj jen — la malriĉa Sofio subtenas Nacian Teatron kun dramo kaj opero, Kooperativan Teatron, operetan teatron »Odeon«, Artistan Teatron, se ne paroli pri la sennombraj kinoteatroj.

La teatra vivo ĉi-jare en Sofio komenciĝis tre bone — per elektitaj teatraĵoj en ĉiuj teatroj.

En la Nacia Teatro estas plej grandsukcese kaj daŭre ludata la kvinakta teatraĵo per kiu malfermiĝis la ĉi-jara teatra sezono:

Pred Izgrev (Kara Tanas) = Antaŭ Sunleviĝo (Nigra Atanaso). Ĝian aŭtoron *Stefan Savov*, kiu samtempe estas aktoro en la Nacia Teatro kaj aŭtoro de multaj bulgaraĵaj teatraĵoj, oni varme aplaudis, ke li ĉerpis sian temon el la kompare proksima heroo pasinteco de Bulgarujo. La enhavo de dramo estas prenita el la apartaj ribeloj de la bulgara popolo por rehavigo de ĝia eklezia kaj politika libereco, ribeloj okazintaj antaŭ 120 jaroj kontraŭ la jugo de grekoj kaj turkoj.

La aŭtoro donas en sia teatraĵo ne terurajn aŭ tragediajn figurojn, sed belan lirikan poemon, kelkloke en blankaj versoj. La dramon belegi surscenigis la reĝisoro frisan Cankov, helpe de la artisto Popov kaj bonege ludis la dramatoroj de la teatro. La heroo estas la instruisto en la vilaĝo Geravna, juna orfo *Tanas* (Vladimir Trandafilov). Li varme amas sian malfeliĉan, sklavigitan kaj subjugitan patrujon, amas ankaŭ *Angelinan* (Zorka Jordanova), filinon de la riĉa *Haĝi Mano* (Krestjo Sarafov). Krom *Angelina* la instruiston amas ankaŭ alia knabino, *Janka* (P. Gerganova), juna orfino energia kaj kuraĝa.

povas fidi al la sentumoj, kiuj ĉiuj estas trompemaj.

Leandro (levas sian bastonon): Ne, jam estas tro multe.

Sganarello: Estas ankaŭ pli ol sufiĉe. Nun mi do volas paroli ion serioze kaj diri, ke estis malfeliĉa tempo kaj horo kiam ni decidis frai ĉi tiun vojaĝon. Ĉiuj ĉi tiuj komplimentoj, kiujn mi faris al mia sinjoro, estas tiel same faritaj al mi de ĉiuj filozofoj, kun kiuj mi parolis, kaj mi prezentis ilin al vi tiom varmaj, kiom mi mem ricevis. La urbo estas plena de krevklerigitaj malsaĝeguloj.

Leandro: Mi supozis, ke klereco kaj saĝeco estas nedisigebaj.

Sganarello: Efektive ankaŭ mi.

Angelinan amas ankaŭ la juna riĉulo *Nikolaki-Bejo* (G. Stamatov), bulgaro-perfidulo, amiko de la turkoj. *Tanas* defendas en la preĝejo la fraton de *Janka*, kiu legis »Patro Nia« en bulgara lingvo, kontraŭ la furioza greka ĉef-pastro kaj forpelas ĉi tiun. Pro tiu kuraĝo li estas persekutata, minacata kaj fine devigita forlasi la lernejon kaj forkuri en la Balkanajn montojn. La adiaŭa sceno en la malriĉa bulgara lernejo estas tre kortuŝa. Pasas tri jaroj. Kara *Tanas* estas jam fama vojevodo, gvidanto de bataloj kontraŭ turkoj kaj grekoj, defendanto de la malfeliĉa kaj sklavigita popolo. *Angelina* estas por li perdita — ŝi estas jam edzigitaj kontraŭvole al *Nikolaki-Bejo*, kiun ŝi ne amas, restante fidela al Kara *Tanas*. Pasas ankoraŭ kelkaj jaroj kaj Kara *Tanas* venas kun sia bando en la montojn super la vilaĝo Geravna. *Nikolaki-Bejo* ekscias pri la okazonta renkonto inter *Angelina* kaj Kara *Tanas* kaj volas mortigi ĉi tiun. Sed Kara *Tanas* lin antaŭas, lin mortigas kaj forkuras en la Balkan-montojn. En batalo kontraŭ turkoj li estas morte vundita kaj elspiras inter la nudaj rokoj Balkanaj inter la manoj de la fidela *Janka*. Nun *Janka* ekgvidas la restintajn hajdukojn al batalo ...

La geaktoroj entuziasme ludis tiun herooan teatraĵon. Ĉiuj aŭskultintoj disiris kun la impresoj, ke la teatra arto en Bulgarujo faris ankoraŭ unu grandan kaj belan paŝon sur la vojo al la perfekteco.

Dua sukcese prezentata teatraĵo en la Nacia Teatro estas *Matura = Maturekzameno*, de la hungara verkisto *László Fodor*. Ĝia enhavo, kiel vidigas ankaŭ de la titolo, estas el la lerneja vivo. La agado disvolviĝas en la fino de la lernjaro, kiam la lernantinoj forflugas por ĉiam el la klasĉambroj, kiel abeloj el siaj ĉeloj, kaj ekmarŝas en la suna tago. Per siaj pikiloj ili ne nur suĉis el la mielo de la scienco, sed ofti ŝovis ilin en la toleremajn animojn de la instruistoj: »Ili estas kruelaj, ĉar ili estas junaj«.

Kaj la instruistoj, kiuj tutan vintron disdonadis po-pece sian animon, kies sorto kunkreskiĝis ĝisgange kun la sorto de la lernant(in)oj, nun restas solaj. Ili mortas en la fino de ĉi lernjaro kaj reviviĝas en la komenco de la nova, dum septembro. Kaj kiel malbonaj lernantoj, tutan vivon ili ripetas la klasojn.

Kio do restas por ĝelernantoj kaj ĝeinstruistoj post tiu tuta studo, post la ekzameno, post la maturekzameno? — »Unu kanteto ... unu pentraĵo, kelkaj poeziaj versoj ... kiel pastista fajro en aŭtuna nokto briletas malproksime en la kampoj ... Restas la memoro, la bela malgaja memoro, kiu, fruktigita de la animo de la talenta dramaturgo, transformiĝas en la kortuŝan, karan, elegantan verkitan teatraĵon »Maturekzameno«.

La teatraĵo de Fodor estas reĝisorita de s-ro *Jakovlev*, vera poeto sur la scenejo. Ĉiuj geaktoroj ludas kun plena animo, precipe *Trandafilov*, en la rolo de la tragedia direktoro, enŝlosinta sian doloron profunde en la koro kaj gardanta sian denaskan prestiĝon antaŭ ĉiuj elprovoj; s-ino *Gerganova*, en la tiel delikata rolo de *Katja Horvat*, disversas mirindan ĉarmon en la lasta akto, kie ŝi estas en sia elemento — en belega blanka robo — vera simbolo de l'printempo; s-ino *Djulgerova*, kiel *Klotilda Saraj*, ludas kun temperamento kaj kortuŝa fideleco; s-ro *Kisimov* — la seka matematikisto, konstante persekutata de lernantino; s-ro *Andreev* — la neforgesebla milda

Leandro: Mi ne aŭdis ion alian.

Sganarello: Sed mi sentis ion alian.

Leandro: Kio do kaŭzis tion?

Sganarello: Ĉio malutilas se oni ĝin troigas. Unu glaso da vino plivigliĝas la animon; sed se oni trinkas tro multe el ĝi, la cerbo fariĝas filozofema kaj konfuza. La vento pelas la ŝipon antaŭen; sed se ĝi blovas tro forte, la ŝipo renversigas. Neniu manĝaĵo estas pli saniga ol kaĉo; sed se oni troŝarĝas la stomakon, oni povas almanĝi al si febron. Tiel same eble stas pri ĉi tiuj filozofoj, kiujn tro multe da klereco frenezigas.

Leandro: Tiamaniere ni prefere estus restintaj hejme.

Sganarello: Saĝas al mi tiel same.

instruisto de filozofio; s-ino Lambrea — la prudenta, sekrete enamiĝinta klaszorgantino kaj helpantino de la direktoro; s-roj Kodjabaŝev kaj Serbov — la »neŭtralaĵe« kolegoj k. a. La intereso al la teatraĵo estas granda, kio promesas al ĝi en nia Nacia Teatro longan vivdaŭron.

Sur *La Naĝanta Glacio* estas la tria teatraĵo ludata en la Nacia Teatro. Ĝi estas verko de ĉeĥa dramaturgo *Wilem Werner*. Tie ĉi la rigardantoj jam estas en plena kapto de aktivaj sociaj problemoj: estas malkovrata la tragedio de inteligenta familio, kiu pereas sub la frapoj de la senlaboreco. Samtempe la aŭtoro volas penetri en la ideajn diferencojn de du generacioj, malkovrante kelkajn profundajn moralajn konfliktojn inter patroj kaj filoj. La disharmonio inter ili estas la dramo de l' homaro, speciale akriĝita kaj substrekita en nia tempo. La teatraĵo de Werner estas scenoplena, aktuala, sed iom »elpensita«. Kulpas nek gepatroj, nek infanoj, sed la travivata de ili tempo, kiun unuj kaj aliaj ne scias ŝanĝi. Temas pri maljuna gimnazia instruisto, patro de kvar gefiloj, viglaj energiplenaj kaj krescoifaj, kiu restas konsternita, frapita antaŭ la klopodoj, revoj kaj rimedoj por sukceso en la vivo, kiuj movas la junan generacion. La fidela idealisto, romantikulo kaj revanto de la pasinta jarcento, kreskinta en sentimentala societa virgeco kaj sofista nur planan moralan vivtenon, nun vidas, kiel liaj gefiloj, viktimoj de kruela socia ordo, estas ludiloj sur la ondoj de preskaŭ absoluta malmoraleco.

La teatraĵo de Werner estas efektive originala kaj sufiĉe serioza por maltrankviligi la konsciencan de la nuntempa rigardanto. Ĝi estas bonege ludata en la Nacia Teatro. S-ro Masalitinov, konata majstro por la psikologia sencigo de la scenludo, scias substreki ĉiujn gravajn momentojn kaj fari la prezentadon artiste honesta. Je lia dispono estas la geaktoroj: Ges-roj Tenčev, Sneĵina, Bukjlieva, Gaŝev, Mihajlov, Kirčev, ĉiuj kun sento certa pri artistia fideleco kaj pri preciza gesto.

Srednogorski

DR. KURT JAGOW: »QUEEN VIKTORIA, (virin-vivo sub la krono.) Leteroj kaj folioj el la taglibroj de la reĝino Viktoria.

Multaj historiistoj kaj verkistoj jam okupiĝis pri la vivo de ĉi tiu reĝina virino; ŝia figuro estiĝis temo de romanoj, teatraĵoj kaj filmoj. Sed pli forta ol ĉi pri skribo kaj fantazio estas la impreso, se oni aŭdas ŝin mem en ŝiaj personaj konfeso. Reĝino Viktoria, malgraŭ la peza ŝarĝo de siaj reĝo- kaj familidevoj, ĉiam estis diligenta skribantino. Jam de ŝia frua juneco ŝi uzis ĉiun liberan horon por skribi sian taglibron; ŝi daŭre korespondis kun siaj infanoj, ĉiuj parencoj, kun siaj ministroj, kun la partigivantoj kaj elstaraj samtempuloj. Kaj nun, kiam ĉi tiuj dokumentoj venas iom post iom el la arkivoj, oni lernas koni la viktorian tempon de nova flanko: kiel epokon de granda kaj vere virineca sinjorino.

Solecaj, unutonaj infanaroj en la Kensington-palaco. Sen ludkamaradoj kaj sen indaj junamikoj. En taglibronoto de 1873, Viktoria parolas pri sia melankolia infaneco, kiu havas solan lumpunkton: la amatan onklon, Leopold I. de Belgio. Ĉiam ŝi estas ĉirkaŭata de plenkreskuloj, de maljunaj sinjorinoj, kaj ŝia plej ŝatata plezuro estas rajdi sur azeno. Ŝi estas edukata tre simple, ne ĥavas ĉambron por ŝi kaj dormas ĝis ŝia surtroniĝo en la ĉambro de ŝia patrino. Ĉar la infano estis de tre pasiva naturo, oni devigis ŝin senkulpiĝi sin ankaŭ ĉe la infanvartistino pro ĉiu malbona ago aŭ malafableco: principo, kiun reĝino Viktoria observis dum ŝia tuta vivo... Kiel juna knabino ŝi fervore kolektis aŭtogramojn kaj legis seriozajn librojn. Plej ofte historiajn, ĉar ŝi sciis, ke ŝi estas destinata fari mem iam historion. Ĝarma estas la taglibrofolio de 20. junio 1837, la tago de ŝia surtroniĝo. Je la sesa matene, ŝi estas vekita de ŝia patrino kaj akceptas la arkiepiskopon de Canterbury kaj lordon Conyngham en matenrobo, kiel ŝi intence rimarkigas. Oni sciigas ŝin pri la formorto de ŝia onklo Wilhelm IV. La lordo surgeniĝas antaŭ la juna knabino kaj kisas al ŝi la manon. Poste Viktoria vestigas sin, matenmanĝas, skribas

leterojn, akceptas lordon Melbourne, konfidas al li la pluan gvidadon de la ministaro, partoprenas sian unuan ŝtatkonsilon kaj estas okupata tiamaniere seminterrompe ĝis la deka vespere. Poste ŝi sidigas de ŝia taglibro, kaj faras jenan enskribon: »Car plaĉis tiel al la providenco, starigi min sur ĉi tiun lokon, mi ĉion faros, por plenumi mian devon por mia lando. Mi estas ankoraŭ tre juna kaj eble en multaj, se ankaŭ ne en ĉiuj aferoj, tre malsperta, sed mi estas certa, ke ekzistas malmultaj homoj, kiuj havas pli bonan volon ol mi, fari tion, kio estas bona kaj ĝusta.«

Neniam reĝantino estis al reĝinedzo tiel enamiĝinta, neniam reĝa edzeco estis tiel feliĉa, kiel ĉi tiu. Al la onklo Leopold ŝi skribas: »Mi sentas min tiel feliĉa, mi adoras Alberton. Li estas vera anĝelo kaj tiel neelparolebla bona al mi, ke tio min tute kortuŝas. Mi apenaŭ povas elporti, disigi de li, ĉar ni travivas tiel feliĉajn, ĉarmajn horojn kune.« Al ŝia fianĉo ŝi skribas mikŝante la germanan kaj anglan. En la edziĝtago ŝi sendas al li jam frumatene kelkajn liniojn: »Kiel vi fartas hodiaŭ kaj ĉu vi bone dormis?... Sciigu min, se vi, mia plej kara amata fianĉo, estas preta.« Kaj vespere ŝi priskribas en la taglibro la edziĝfeston. Ŝia fianĉin-vestaĵo el blanka silko kun larĝa »Fabel-Honiton«-puntaĵo, la turkan diamant-kolĉenon kaj la safirbruson de Albert. Ĉe la veturo ŝi observas ĉiun malgrandajn kaj la edzeca ceremonio forte impresas ŝin: »Mi sentis min tiel feliĉa, kiam Albert metis la ringon sur mian fingron.« Post la subskribo de la edziĝdokumento kaj post la gratulo en la tronsalongo ŝi fine kunvenis kun Albert en sia vestĉambro por dek minutoj. Poste ankoraŭ la granda edziĝtago kaj fine la momento de la adiaŭo, momento, kiun esprimas Viktoria en frazo, el kiu, kiel ajn simpla kaj mallonga ĝi estas, parolas ŝia tuta, granda amo: »Albert kaj mi solaj...«

Sub la gvido de lordo Beaconsfield, la viro, kiun el ĉiuj siaj ministroj ŝi plej ŝatis, kaj kiu per sia galanteza maniero havis al ŝi la plej fortan influon, Viktoria iĝis la reprezentantino de la imperia ideo. Se la figuro de la juna knabino vekis amon kaj entuziasmon, oni nun sentas respekton kaj admiron antaŭ la maljuna reĝino, kio montriĝis en impona maniero ĉe la kvindekjara kaj ankoraŭ pli ĉe la sesdekjara reĝojubilo. Ĝiam ankoraŭ ŝi portas sola la tutan pezon de la laboro kaj respondeco, ne lasas partopreni la princon de Wales. Novaj figuroj eniras ŝian vivon: lordo Salisbury, Cecil Rhodes kaj Joseph Chamberlain. La politiko ludas ĉiam pli gravan rolon. Multaj karaj kaj valoraj homoj al ŝi formortas, sed ĉiam nova juneco postkreskas. Kaj la lasta enskribo en la taglibro, naŭ tagojn antaŭ ŝia morto, montras nenian scieton pri la morto, spiras la puran pacon de homo, kies animo kaj vivo estas en bona ordo... F. W. V.

ANDREAS LATZKO: »LAFAYETTE.«

La markizo de Lafayette estas unu el la plej interesaj figuroj de la nova epoko. Kvankam li ne estas granda spirito, la tempo, en kiun li naskiĝis, pelis lin al dimensioj, kiuj en aliaj cirkonstancoj ne estus donitaj al li. Naskita en 1757, heredanto de pranobela nomo kaj granda havaĵo, li apartenas al la feŭda franca societo de la »ancien regime« kaj neniam li malkonfesas sian grandsinjorecon. Sed liaj naturaj kapabloj kaj la influo de la verkoj de Voltaire kaj Rousseau igas lin entuziasma batalanto por la subpremitoj, malaniko de ĉia absolutismo. Li iĝas frapason kaj diskutas pri grenoprezoj kaj laboristalajroj. Por li ĉio ĉi estas ne snobismo kiel por kelkaj aliaj, sed profunda bezono. Kiam la nordamerikanaj farmistoj volas sin liberigi el la subpremo de Anglujo, la dudekjara, kontraŭ la volo de sia familio, fugas de sia reĝo, de sia societo trans la oceanon, batali por la idealoj de la leviganta revolucio, por libereco, egaleco kaj frateco. Malfide akceptas la ribelantoj, butikistoj kaj bienuloj, la »generalon« en la orborderita uniformo, sed lia altruista kaj modesta personeco gajnis al li la grandan Washington kiel patran amikon, kaj ĉi tiu amikeco daŭras dum jarcentoj. Lia natura heroo sento, lia ofereco pelas lin al la plej danĝeraj lokoj: li neniam zorgas pri si mem,

FELIĈO

— Aleksandro Kuprin —

La granda reĝo ordonis venigi al si la poetojn kaj saĝulojn de sia lando. Kaj demandis ilin:

— En kio estas la feliĉo?

— En tio, — respondis rapide la unua: — ĉiam vidi la nimbon de via dieca vizaĝo kaj eterne senti...

— Elpiku al li la okulojn, — diris la reĝo indifere. — La sekvanta!..

— La feliĉo — tio estas la potenco. Vi, reĝo, estas feliĉa! — ekkriis la dua.

Sed la reĝo rediris kun amara rideto:

— Tamen mi suferas de hemorojdo kaj mi ne potencas ĝin elkuraci. Elŝiru al tiu kanajlo la naztruojn. Plue!..

— Esti riĉa! — diris, balbutante, la alia.

Sed la reĝo respondis:

— Mi estas riĉa, sed demandas pri feliĉo. Ĉu sufiĉas al vi orbloko, pezanta vian kapon?

— Ho, reĝo!..

— Vi ricevos ĝin. Alligu al lia kolo orblokon, pezantan lian kapon kaj forjetu tiun almozufaĉon en maron.

Kaj la reĝo kriis malpacience:

— La kvara!

Tiam alrampis sur la ventro homo en ĉifonoj, kun febraj okuloj, kaj ekkalbutis:

— Ho, saĝega! Mi volas malmulte! Mi estas malsata! Faru min sata, kaj mi estos feliĉa kaj gloros vian nomon en la tuta universo.

— Satigu lin, — diris la reĝo malsate, — kaj, kiam li mortos de supersatiĝo, venu al mi raporti pri tio.

Kaj venis ankaŭ duopo. Unu — fortega atleto kun rozkolora korpo kaj mallarĝa frunto. Li diris kun ekspiro:

— La feliĉo estas en la kreo.

Kaj la alia estis pala, magra poeto, sur liaj vangoj ardis ruĝaj makuloj. Kaj li diris:

— La feliĉo estas en la sano.

La reĝo amare ridetis kaj diris:

— Se mi povus ŝanĝi viajn sortojn, post monato vi, ho poeto, petegus la diojn pri la inspiro, kaj vi, ho similo de Herkulo, kurus al kuracistoj por refortigaj piloloj. Iru vi ambaŭ kun paco. Ankoraŭ kiu?

— Mortemulo! — diris fiere la sepa, ornamita per floroj de narciso. — La feliĉo estas en neŝto.

— Dehaku la kapon al li! — diris pigre la potenculo.

— Reĝo, ho reĝo, indulgu!.. — ekkalbutis la kondamnito, kaj iĝis pli blanka ol la petaloj de narciso. — Mi ne tion volis diri.

Sed la reĝo lace svingis manon, oscedis kaj diris mallonge:

— Forkonduku lin... Dehaku la kapon al li. Vorto de reĝo estas dura kiel agato.

Venadis ankoraŭ multaj. Unu el ili diris nur du vortojn:

— Amo virina!..

— Bone, — konsentis la reĝo: — donu al li centon da belegaj virinoj kaj virginoj de mia lando. Sed donu al li ankaŭ pokalon kun veneno. Kaj kiam venos la tempo — diru al mi: mi iros vidi lian kadavron.

Kaj ankoraŭ unu diris:

— La feliĉo estas en tio, ke ĉiu mia deziro plenu-miĝu.

— Kaj kion vi nun volas? — demandis malice la reĝo.

— Mi?

— Jes. Vi.

— Reĝo... la demando estas tro neatendita.

— Enterigu lin vivanta. Ha, ankoraŭ unu saĝulo? Nu, nu. Venu pli proksimen... Eble vi scias, en kio estas la feliĉo?

La saĝulo — kaj li estis la vera saĝulo — respondis:

— La feliĉo estas en la ĉarmeco de la penso homa. La brovoj de la reĝo ektemis, kaj li kriis kolere:)

— Aha! La penso homa! Kio estas la penso homa?

Sed la saĝulo — ĉar li estis la vera saĝulo — nur ridetis kompateme kaj nenion respondis.

Tiam la reĝo ordonis ĵeti lin en subteran kripton. kie estis eterna tenebro kaj kie ne aŭdeblis eĉ unu sono el ekstero. Kaj kiam post jaro oni venigis al la reĝo la prizonulon, kiu blindiĝis, surdiĝis kaj apenaŭ sin tenis surpiede, al la demando de la reĝo: — »Kiel? Ĉu ankaŭ nun vi estas feliĉa?« — la saĝulo respondis trankvile:

— Jes, mi estas feliĉa. Estante en la kriptoj, mi estis kaj reĝo, kaj riĉulo, kaj enamiginto, kaj sata, kaj malsata, — ĉion tion donis al mi mia penso.

— Do — kio estas la penso? — ekkriis la reĝo. —

Sciuj, ke post kvin minutoj mi pendumos vin kaj krabos en vian malbenitan vizagon! Ĉu konsolos vin tiam via penso? Kaj kie estos tiam viaj pensoj, kiujn vi disipis sur la tero?

Kaj la saĝulo respondis trankvile, ĉar li estis la vera saĝulo:

— Stultulo! La penso estas senmorta.

El la rusa: *Voldemar Marganidze.*

ĉiam pri la aliaj kaj li iĝas, apud Washington, liberiganto de lando, kies lingvon li apenaŭ komprenas, kies civitanoj devas resti interne fremdaj al la franca aristokrato. Kiel ne multaj, li estas eterna batalanto por ideoj kaj idealoj; oni povus vidi en li Gottfried von Bouillon — aŭ Don Quichote.

Andreas Latzko, kiu kun spiro-raba impetego rakontas la historion de ĉi tiu kavaliro sen timo kaj riproĉo, akcentas ja unuavice la altruistan heroon, sed montras ankaŭ ĉiujn liajn mankojn, ne forgesas lian malkapablon esti gvidanto de popolo kaj fondi novan ordon. La riĉa nobelo, kiu, kiel vera franco, super ĉio amas la gloron kaj la sonorantan frazon, kuraĝe batalas dum sia tuta vivo por la rajtoj de la popolo; sed tio, ke la popolo bezonas ankaŭ *panon*, restas al li nekonata. Sed ĝuste ĉi tiu kunigo de feŭdeco kaj de demokratio, de fideleco al la

hereda reĝo kaj de revolucia kaj iom teoria entuziasmo por la libereco, donas al ĉi tiu batalanto certan ĉarmon, des pli ke li neniam konscias la tragikon de sia vivo. Li staras meze de la franca revolucio, estas festata de la popolo kiel »la heroo de du mondoj«, gvidas la sinjorinojn de la vendejoj de Paris al Versailles, kaj tamen ankaŭ heroo staras antaŭ sia reĝo kaj reĝino por sirmi ilin kontraŭ la popolamaso. Por danko, li estas timata de la reĝo, de Marie Antoinette; li »la sola viro en Versailles« estas suspektata kaj malamata. Dum mallonga tempo Lafayette estas la heroo de la popolo kaj samtempe la savanto de la monarkio; sed rapide li falegas: li devas fuĝi eksterlanden pro la sangaj ordonoj de la novaj potenculoj kaj estas kaptita de la imperiestraj soldatoj kiel revolucia generalo.

Denove disvolviĝas antaŭ ni en drama prezentado la

historio de la revolucio, denove ni vidas la kubludon je vivo kaj morto: kiu hodiaŭ estas akklamata, tiu morgaŭ devas surgrimpi la puŝveturilon al la gilotino. Iu el liaj personaj malamikoj juĝis pri la rolo de Lafayette en la revolucio jene: »En nenio malbona li partoprenis, sed kio okazis por bono, tio estis lia verko.« La kvin jaroj, kiujn li pasigas en la malliberejo de Olmütz, ne povas ŝanĝi lian idealismon, lian altruismon — kaj lian Donquichottecon: kiam li fine revenas, nova viro regas en Francujo. Nun, kiam ekzistas cezaro, Lafayette plaĉas al si en la rolo de Brutus. Napoleono lin timas kaj tamen ne kuragaŝ forigi. »Ciu en Francujo estas jam konvertita, nur unu sola estas ne plibonigebla, kaj tiu estas Lafayette.« Tiel juĝas Napoleono. Strée scias desegni Latzko la batalon inter la potenculo kaj ĉi tiu ŝtate refleksebla viro. Kaj la idealisto transvas la realiston: Napoleono malaperas, dum Lafayette ankoraŭfoje levigas al decidiga granda en la julia revolucio de 1830. Louis Philippe, la ruza burĝego, akceptas el la manoj de la facilkreda naivulo la kronon de Francujo. Ankaŭ kiu scias iun pri historio, ekscios multe da novo el ĉi tiu libro.

Latzko ne apartenas al tiuj saĝaj historiistoj, kiuj tronas super justuloj kaj maljustuloj — la roloj ja rapide kutimas ŝanĝiĝi —, lia tuta kolera malamo estas ĉe la reĝeco kaj ties paladinoj, lia amo apartenas al la revolucio, kaj se li ankaŭ ne aprobas ĉiujn ĝiajn kruelaĵojn, li tamen estas preta senkulpiĝi ilin. La temperamento de poeto vidas la aĵojn kaj homojn laŭ persona lumo.

E. Lucka — F. W. V.

ERNST WURM: LA AGLINO. ROMANO.

Fuĝo el la nuntempo en la historion: ĉi tiun vojon preferas nun ĝuste la plej talentaj el la pli junaj kaj plej junaj rakontistoj. La nuntempo, kiel ajn alloga ĝi estas en siaj kontraŭdiraj problemoj, en siaj unuopaj kaj amastragedioj, ŝajnas ne esti taiga temo por la objektiva prezento de la epikisto. Ja ĉio estas ankoraŭ malklara, nedecidita: etiropa malordo, militdangero, ekonomiaj mizeroj, senlaboreco: demandoj, je kiu ankaŭ poeta intuicio ne povas doni kontentigan respondon. Pro tio estas en modo la fuĝo en la historion, kie estas pli da spaco kaj libereco. Ankaŭ Ernst Wurm, kiu superas la junulojn per la matureco de sia prezent-forto kaj per sia serioza, riĉenhava spiriteco, iras ĉi tiun vojon jam la duan fojon. La unuan fojon li rikoltis ĉe tio la tre interesan *Händlerroman* (Lia forto estis en li), ĉe kiu oni povis konstati ankoraŭ diversloke la ĝisfundajn arĥiv- kaj bibliotek-studojn, sed ankaŭ rimarkindan kapablon profundigi en la komplikan karakteron de *Händler*, en la ecaron de lia verkado kaj en la malnovanglan medion. En lia nova romano, Ernst Wurm ankoraŭ pli malproksimiĝas de la nuntempo, al Francujo de la deksepa jarcento, en la tempo de la religiaj bataloj, por priskribi la sorton de virino stranga, vireca en sia energio kaj en sia spirito. Johana, la 15-jara princino de Navarra, kiu kreskas kiel duonsovaga naturinfano en la montoj, estas venigita al la franca kortego, por esti tie edzinigita de sia reĝa onklo pro politikaj motivoj. Nun vekigas la unuan fojon la spita forto de la juna knabino, kaj malgraŭ ĉiuj kortegaj planoj ŝi edzinigas tamen al tiu, kiu ŝi amas: al Antoin de Bourbon, kiu iĝas ŝia granda senluziĝo pri amo kaj vivo. Per ĉi tiu dolora eraro la animo de la juna virino iĝas malmola, ŝi fariĝas senkondekte severkreda, kaj kiel aglino ŝi jetiĝas en la batalon por la protestanta kredo. Ŝi cerbumas, diskutas, agitas kaj estas la vera gvidantino de la hugenotoj. Finafine la aglino falas en la kaptilon de ŝia granda kruele-ruza kontraŭulino Katerina de Medici, kaj por ŝia dua venigo al la Pariza kortego ŝi pagas per sia vivo, kiun finas perfida venen-murdo. Sed per ŝia lasta forto ŝi diktas spirit-religian testamenton por ŝia filo, la posta reĝo Henriko IV., resti fidela al ŝia kredo kaj timi nenion sur la tero. La ŝtofo de ĉi tiu libro estas prenita el multaj fontoj, sed en la romano tute ne estas rimarkeblaj ĉi tiuj antaŭstudoj. La historia materialo estas artege prilaborita, multfoje libere formita; la homoj kaj konfliktoj de tiu ĉienseco al ni fora tempo

iĝas vivaj kaj interesaj per la fortplena prezento. Antaŭ ĉio, la figuro de Johana estas ellaborita kun psikologia majstreco.

F. W. V.

LEGOFRUKTOJ.

... Mi iras al la noktuzilo kaj vidas la gefratojn, kiuj milope ŝteliras tra la barilo. Ne, ne ekzistas sociala problemo. Alie ĝi ja estus solvebla. Ekzistas nur la mizero, la malriĉo. Ĝi estas ja naturego, ĝi apartenas fiziologe al la homaro kiel nekuraĉebla malsano, rezervita al la homoj kiel la kancero. La besto mortas pro malsato nur kiel dombesto de la homo. Neŝanĝebla restas la malriĉo!

... Nebulo super Berlino. Fajfoj de fabriksirenoj. Kie estas la ĉielo? Nur urbo, la mizero de urbo. Sed ĝi ekzistas, ĝi ĉiam ekzistos. Londono, Parizo, Lisabono kaj Liverpolo kaj Dublino kaj Marseille kaj Romo kaj Leningrado, Sanghajo kaj Nov-Jorko kaj Boston kaj Hamburg — kloakoj ĉie, malsato, krimoj, seksateneco, murdo.

... Kiel bela estas, saba-vespere iri tra la stratoj de mia infanaĝo, en interpreto de knabinoj sen ĉapelo kaj de junuloj en ĵerzo, de malgajaj patrinoj, kiuj tiel volonte aĉetus por la dimanĉo pecon da viando, kaj de viroj, kiuj portas la salajron en drinkejoj. Ho, ne flarigas bone ĉi tie, fiodoras. Odoras la malriĉuloj kaj la negoejoj kun la fumajvaroj kaj odoras el la ĉevalbuĉejoj. Kaj la plezurplaco jam bruas, ekflamas kino-eniroj, gramofonoj en drinkejoj bruaĉas. Mi rigardas al la palaj vizaĝoj vulgaraĵ kaj malbrilaj, avidaj kaj senesperaj. Multaj ridas — ho, ili ridas pri la plej malforta spritajo, ili estas tiel dankemaj. Mi vidas la sangomalriĉajn vizaĝojn de la infanoj, kiujn portas iliaj patrinoj. Tiel proksime ĉio estas al mi, mia koro malfermiĝas, mi amas vin, gefratoj! elpoŝaj ŝtelistoj kaj publikulinoj — jes! Rompŝtelistoj kaj aĉeteblaj junuloj kaj drinkuloj — jes! Sed mi amas vin. Mi apartenas al vi, ĉar vi bezonas iun. Kaj tamen — kion mi povas fari por vi!

Ho vi retoj kun pano en ĝi, du funtoj da terpomoj, gadokapoj por la supo, po ses pfenigoj por funto! Ho vi sopiraj virinrigardoj en viandvendejoj kaj buternogoejoj! Kaj vi infanoj, ho! antaŭ la fenestroj de la sukerajvendejoj! ... Mi sentas brulantan amon, se mi rigardas vin, flaras vin, kelkfoje prenas iun el vi ĉe la mano: »Kion vi deziras?«

Mi scias, mi vidas: ekzistas proletaro, kiu ekvivas. Ili havas propran teatron, propran koncerton, ili havas parolhorojn kaj gimnastikursojn, kantgrupojn kaj proprajn alternejojn kaj laborkomunecon, ili havas boksklubojn kaj diversajn migradojn kaj sportvojaĝojn. Ili havas laborkursojn por arto kaj scienco, kaj ekzistas laboristkoncertoj de grandaj artistoj kaj orkestro.

Ekzistas proleta junularo, kiu posedas la vivon kaj ĝuas ĝin, kaj iliaj gepatroj havas litografajojn sur la muro kaj estas en librokomunejo kaj membroj de la popolteatro. Sed ne ĉi tiujn mi opinias, ne al ili mi pensas. Mi pensas ne al la proletaro, kiu sukcesas, kiu inde vivas, prisunata de politika idealo, sed al la malriĉuloj. Al la kvina klaso. Se en iu halo sidas mil malriĉuloj: antaŭ la pordo ĉiam staras la ankoraŭ pli malriĉaj. Mi pensas al mia juneco kaj al la senombraj, kiuj la saman junecon ĉiam, ĉiam danrigas. Neniam mi ĉesas almozpeti. Neniam la patro ĉesas fordrinki sian monon kaj pereigi la familion; neniam la patrino lavi, ĝis kiam ŝi terenfalas; ĉiam la fratino refalas, kaj la frato fiaskas. Oni ne bezonas paroli pri tiuj, kiuj scias helpi sin mem, sed pri tiuj, al kiuj neniam povas esti helpata. Eĉ ne de dio. Neniu dio kuragaŝ en la malhelon de sia kreaĵo, kie la rato fuĝas al la brusto de la homo, por tie varmigi sin; kie la patrino traserĉas la forjetujon en fremdaj kortoj, por trovi por sia infano ŝimajan panon. Pri ili paroli — kiale, se oni tamen ne povas helpi ilin? Sed se almenaŭ estus amo por ili en la mondo: eble ili pli libere spiradus...

El la libro: *Mi malsatas*, romano de Georg Fink.

*
»La poezio ekzistos, kiel longe ekzistos la homaro; ĝi valoras, kiel ties plej nobla parto, ĉar la poezio estas la homa koro. Kaj dum la suno orumas la teron kaj viv-

igas ĝin, kaj dum la ĉielo vestas sin per sia plej bela bluo kaj la printempo ornamas la kampojn per floroj kaj folioj, tiel longe la homaro, kiu ĝojas pri la kanto de la birdoj, aŭskultas kun milda kortuŝo la kanton de tiuj aliaj birdoj, kiuj nomas sin poetoj.»

Antonio de Trueba, hispana lirikisto

*

Hazardo. — Sed poste mi ĉirkaŭrigardis ne nur en la juĝejo, sed ankaŭ en la mondo. Kaj poste mi demandis min: Eble la justeco estas ie aliloke? Vi rairas, ke en la juĝejo la sorto dependas de la ejo, en kiu oni procedas, aŭ, ankoraŭ pli malbone, de la stomakdoloroj de iu juĝisto? Sed se eĉ Napoleono perdis la batalon de Waterloo pro siaj stomakdoloroj? La tuta vivo estas regata de hazardo. Iu kuracisto savas vin per mirinda operacio, alia mortigas vin per injekto. Renkonti virinon en kafejo, povas kaŭzi en via vivo energian pason trans ĉiujn viajn molajojn. La sama virino povas veneni vian sangon per malsano, peli vin en delirion, donaci al vi filon, venigi al vi feliĉon, plibonigi vin. Ni iom ĉirkaŭrigardu: Dent-kuracistoj, kiu eraras en la dento, kritikistoj, kiuj ruinigas per adjektivo artiston aŭ entreprenon, inĝenieroj, kiuj erarkalkulas ĉe pezo-koefficiento — ĉu vi ĝuste postulas, ke nur la juĝisto estu justa? Sed ĉiuj maljustoj de la mondo devenas el la senfina diverseco de ĉiuj aferoj, kiuj ree rezultas el la multeco de la mondo kaj el la neatendeblaĵoj de la vivo.

La mikrado de la perfekteco kun la malperfekteco rezultigas la belecon de la aĵoj kaj vidigas la kunlaboron inter dio kaj la homoj. Al ĉiu akuzato estas destinita lia sorto, kaj ekzistas nenio, kio povus tion ŝanĝi. Kian ajn argumenton diras la advokatoj, — io neevitebla gvidas la sorton de la akuzatoj. La katizoj, pro kiuj okazas liberigo aŭ kondamno, preskaŭ neniam estas dirataj en la pledoj kaj defendoparoladoj. Prenu la kazon de grava just-eraro. De la aresto ĝis la punlaboro: kia longa serio da malfeliĉaj hazardoj. Se iu numero ripetigas dekofoje ĉe la ruleto, tio estas nenio kompare la senfina serio da hazardoj, kiuj iun malfeliĉulon venigas en la pundomon! Kara amiko, ĉio estas trompo en la mondo, ĉio teatro. La vero? Ĝi devas esti en sia fundo plej mizera afero, se sufiĉas du glasoj da konjako, por ĝin kaŝi aŭ groteskigi. Kaj la justo? Nu, ree sufiĉas du gradoj da febro; kion mi diras? ofte jam sufiĉas tro malvasta boto, por ŝanĝi pensprocedon aŭ tutan sentimenton. «Do?» «Do?» Kredi al excepta hazardo! La koincidon de favoraj hazardoj oni nomas feliĉo, la koincidon de malfavoraj hazardoj malfeliĉo. Se al tiuj hazardoj ankoraŭ alvenas la homa volo, oni parolas pri bono kaj malbono. Kaj se tiuj homoj estas juĝistoj, poste oni parolas pri «justa» aŭ «maljusta». Sed la bacilo, kiu nin venenas, la aŭto, kiu karambolas kun ni, la viro, kiu nin kalumnias, la juĝisto, kiu nin kondamnas, tio ĉio estas nenio alia ol variantoj de unu kaj la sama fenomeno: la hazardo. Ne ekzistas diferenco inter la palaco, kiu ekbrulas, ĉar du elektraj metaladenoj venis en kontakton, kaj la juĝisto, kiu sendas vin en la pundomon, ĉar inter la atesto de la trafikpolicisto, kies spirita sinteno estas la severeco, kaj la juro de la monaĥino, kiu ekzerkas la mision de la indulgo, la juĝisto havas la devon kredi al la biciklopolicisto. Ekde la unuaj jaroj de nia vivo ni povas ĉe ni mem kontroli ĉi tiun fenomenon. Esti demandata pri la edikto de Nantes aŭ pri la koncilio de Trient, signifas plialtigon aŭ plimalaltigon, gajnon aŭ perdon de unu jaro, signifas studi aŭ estiĝi laboristo, morti kiel senatoro aŭ mortiĉi en iu hospitalo.»

El la libro de Pitùgrilli: *Homo serĉas la amon.* — F. W. V.

WILLIAM B. SEABROOK: VOJJOJ EN LA GAN-GALO. William Seabrook, kiu havas bonan nomon inter la sciencaj vojaĝ-priskribistoj, vizitis ĉi-foje Okcident-Afrikan, kaj en sia interesa nova libro li parolas pri la ĝangalpopoloj starantaj sub franca administrado. Li rakontas, ke li — laŭ sia konsilo — alprenis la kutimojn de la ĝangalanoj, kune faris iliajn primitivajn ritojn, ofe-

La Negro

— Gabriele D'Annunzio —

Falas la neg' al la patrino Tero
trankvile. Kaj ricevas ĝian blankon
la Tero, kiu juste nun ripozas,
naskinte al la hom' abundajn fruktojn.

Bovisto vidas sur la ŝvitaj kampoj
la negon brili, dum li altbligas;
El lia kor' espero kaj el kruĉo
ridetas nun al li la juna vino.

Ho falu pace, neg'; defendu ĝermojn,
radikojn, kiuj donos multajn herbojn
al gregoj poste kaj al hom' la panon.

Ho falu pace, ke ĉe l' tempnovigo,
de vi nutrataj, tra l' eben' vekita,
ekkuru kiel greg' obeemaj fluoj.

(Kalocsay).

ris al iliaj dioj; tiom, ke la ĝangalaj negroj lin prenis por vera negro, kies blanka vizaĝo estas nur hazardo, ĉar alie, kiel diris tribestro: «li estas multe pli saĝa kaj nigra ol iu ajn el ni.» Tiel li povis plene proksimiĝi al la popolo de la ĝangalaj kotnest-vilaĝoj kaj povis observi ne sole eksterajn. Lia vojo kondukis de Grand Bassam, sur la Ebura Bordo, ĝis Timbuktu. Li vizitis, en akompano de juna sorĉistino, la *jafuba*-tribojn; li estis ĉe la kanibalaj *geroj*, ĉe la *mossi*-popolo, ĉe la rok-logantaj *habbe*-oj. La plej interesa estas certe la ĉapitro pri la kanibala vilaĝo, kie la maljunuloj de la tribo klarigis al li per surpriza filozofia motivado la pravecon de la hom-maĝado. Laŭ la geroj, kiuj estas animistoj, ĉio havas animon: la kokido same kiel la banano aŭ la legomo; kaj se pro tio oni ne rajtus manĝi homon, ke la homo havas animon, oni ja same ne rajtus manĝi ankaŭ kokidon, bananon aŭ legomon, kaj finfine ĉiu mortus de malsato. Seabrook petis de ili la recepton pri la kuro de la homviando; li ĝin ricevis, kaj ĝi rakontas, ke foje oni sendis al li porcion da homviando, kaj li ĝin bakis kaj manĝis... Temas pri scienca intereso, kaj — laŭ la objektiva komuniko de la scienculo — la viando estas tute bongusta. (Ĝis nun ni sciis nur, ke ĉi tiu viando estas malmultekosta kaj sufiĉe senvalora, precipe en viva stato; nu, la geroj ĝin tre altaksas, sed ankaŭ ili apreas ĝin nur kiel ramstekon). Seabrook parolis ankaŭ kun la Hugun de Aru, plej sankta homo de Okcident-Afriko. La Hugun diris tre belajn kaj tre saĝajn aferojn eĉ laŭ eŭropa mezuro. Kaj li loĝas en la supro de alta monto, retiriginte kaj modeste, kiel decas al vera saĝulo.

B. B.

KNUT HAMSUN: LA CIRKLO FERMIGAS. Ĉu nepre ĉiu homo devas «fariĝi io»? Ne! — respondas la heroo de Knut Hamsun, Abel, filo de lumtur-gardisto. Tiu «ne» li rilatigas nur al sia propra persono: li ne volas akiri adeptojn por sia individua anarkismo, kiu, ĉe la plena ignoro de la pli-malpli gravaj sociaj leĝoj, entenas ankaŭ la plej grandan kaj plej naturan sinferon. Abel lernas nenian metion plene, povas resti en nenio okupo; ne timas de malsato, de frosto. Neces-okaze li plenumas tute trankvile iom da ŝtelrompo; li havas nenian senton pri la sankteco de la propraĵo, — sed unuavice sian propran propraĵon, sian hereditan havon li disdonacas, al ĉiu ajn, kiu bezonas helpon. Fine, kiam restas por li nenio alia, li fordonas sian vivon, same silente, trankvile, senpoze, kiel siajn ceterajn havaĵojn. Kio mortigas en li la sopiron de akiro, de validiĝo, tion ni nur konjektas: verŝajne nekontentigita junaĝa amo. Tiam amon sekvas aliaj,

pli sukcesaj, pli feliĉaj, sed ili jam ne povas ŝanĝi la sorton de Abel.

Jen la temo de la romano de Knut Hamsun, kiu pentras la mondon de la norvegaj ethomoj per sia kutima, milda, nebuleta, senpera stilo, vicigante antaŭ ni tutan serion da neforgeseble desegnitaj tipoj. Lian grandecon oni ne devas malkovri. Kaj ĉi tiu romano certe apartenas al la unuaj el liaj ĉefverkoj. M. H.

LA MUZIKECO DE LA ITALA LINGVO

Estas konate, ke la lingvo de granda parto de la birdoj estas ilia kantado. La homa parolo estas ankaŭ muzika esprimo. La diferenco en la sono, en la koloro kaj en la ritmo de nia parolo devenas de interna vivo, per kiu ni esprimas tiun senton. Ju pli perfekta kaj potenco estas iu lingvo, des pli bone ĝi povas servi kiel rimedo de poezio. Cetere, notinde estas, ke ju pli riĉa je sentoj estas iu popolo, des pli varia estas ĝia parolo.

La itala antaŭeco en la Renesanco estas ŝuldata ĉefe al la riĉeco de la itala lingvo, enkondukita kaj parolata en ĉiuj kortegoj, kanaganta por la diskonigo de la itala kulturo. La itala lingvo estiĝis, ĝi ne aperis kaj ne naskiĝis subite: lingvoj ne naskiĝas, sed disvolviĝas, ŝanĝiĝante konstante de iu alia lingvo (tion komprenu fine ankaŭ la kontraŭuloj de lingvo internacia). Tiel la itala, kiel la ceteraj romanaj lingvoj, disvolviĝis de la popola latina lingvo (sermo rusticus), sub la influo de diversaj aliaj idiomoj. Unue, uzata nur en la princaj palacoj kaj de la kleruloj, poste dank' al la potenco genio de Dante, la itala lingvo altiĝis kaj fariĝis komuna literatura lingvo por tuta Italujo. Pro sia neĉerpebla popola riĉeco, pro sia artisteco, melodieco kaj muzikeco, tiu lingvo iom post iom anstataŭis la latinan kaj helpis fandi ĉiujn altoetajn figurojn de Dante, Petrarca, Boccaccio, Ariosto k. a. kiuj levis tiel alte la italan literaturon.

Dum sia disvolviĝo la itala lingvo firmiĝis en la riĉeco kaj varieco de vortoj, kiuj mankas en aliaj lingvoj. Pasante tiuj vojoj de formiĝo kaj perfektigo, la itala lingvo restis ĉiam tiel belsona, harmonia, muzika, ankaŭ ĝis nun. Notinde estas, ke eĉ vortoj de fremda deveno, kiuj estis akceptitaj kaj asimilitaj en la itala lingvo, akiris pli grandan muzikecon ol ilia lingva originaĵo. Ekzemple la meksika vorto »Xicara« (taseto) en la itala ŝanĝiĝis en »chicchera«, vorto tre melodia. La orienta vorto »sockar« en greka fariĝas »saccharon«, en latina »sacharum«, kaj en itala »zucchero« kaj de ĝi ankoraŭ la pli delikata »zuccherino«. Same tiel de la greka vorto »bambakon« en itala fariĝis la belsona vorto »bambagia«. Sufiĉas havi ioman muzikan senton por percepti la delikatecon kaj melodiecon, kiujn kaŝas ĉi tiuj vortoj. El la franca vorto »toupet« (hartufo) la itala popolo kreis unu el la plej belsonaj vortoj »batufolo«. El la franca vorto »claque« la italoj akiris la du vortojn: »chiacchiera« kaj »ciaccola«, kiuj estas mirindaj ekzemploj de onomatopeo — imita perfekteco.

La itala lingvo rajte estas konsiderata kiel unu el la plej riĉaj lingvoj rilate de siaj onomatopeoj. Ekzemple: annitrire, crochiare, friggere, grugnire, miagolare, mugolare, ruggire, squittire, zirlare; poste: battito, bomba, bombardata, schioppo, tuono, vento kaj ankoraŭ: bacio, bisticcio, fischio, gorgoglio, grido, rabbia, sibilo, soffio, sussurro, urlo, zempillo.

La itala havas tian apartecon, ke kvankam la plimulto de tiuj vortoj estas de fremda deveno, ĝi donis al ili grandan muzikecon kaj sonecon, dum la aliaj popoloj tute malproksimiĝis ilin de tiuj ecoj. Ekzemple la francaj vortoj: sifflement, gorgouillement kaj hurlement, en kiuj la finaĵo difektas la fonon. Alia ekzemplo: la itala lingvo akiris la vorton »bacio«, kiso, de la latina »basium«, donante al ĝi tian delikatecon kaj graciecon, ke oni sentas dum ĝia prononcado la kunigon de du lipoj en ama tremo. Ne tiel ĝia germana »baiser«, la hispana »beso« kaj la germana »Kusse«.

Kiel ni menciis, la itala devenas de la latina lingvo. La vorto »donna«, virino, devenas de la latina »domina« (de domus-domo), kio en la itala signifas: domomastrino.

En la franca de la sama vorto devenis la vortoj: dame, madame, demoiselle, mademoiselle; la hispano diras: dagna, dama, dancella. La itala popola idiomato konas 45 diversajn nomojn, kiuj havas la saman radikon. Esplorante tiun ekstreman riĉecon de vortoj, oni certigos facile, ke preskaŭ ĉiuj havas muzikan prononcon, ekz. donnina, donnino, donnincino, donnetta, donnetina, donnuccia, donnaccia, donnona, donniciola, donniciatella, donnacione, donnacharina, donnucciaccia, donnasio, donnaiolo, donnesco, donnescamente, doneare; dama, madama, damigella, madamigella, danzella, darmina, damuzza, damaccia, dameraia, damo, damigello, dameggiare, damerino; madona, madonetta, madonnina, madonnino, madonnone, donzella, donzella, donzello, donzello.

Kiu alia lingvo en la mondo posedas tian abundecon kaj riĉecon de vortoj kaj tian esprimecon kaj sonecon, kiu transdonas la diversajn fizikajn kaj moralajn ecojn de la virino? Kaj tio estas nur pri la derivaĵo de unu latina vorto, sed kion oni dirus pri miloj da aliaj?

Precipe riĉa estas la itala lingvo en karesaj vortoj, kiel ekz.: vecchierellino, chiesolella, catinelluccio, giovanottino, pallottolina, ghiottoncino, ladroncello, ghiottoncello, ribaldoncello ktp. Ĉu vi ne sentas la ridon, kiu kaŝiĝas en la vortoj: dottoriccio, mediconzello, pretonzello, pretazzulo, avvocatuolo, scribacchino? Precipe tipa estas la frazo: »E dopo l'abatucolo, v'ò il fratuolo, il dottorucolo, l'avvocatuolo, il mastrucolo di casa«, laŭte legata.

La itala lingvo estas do tre riĉa kaj plej muzika lingvo en la mondo. En la franca mankas la silaboj CE, CI, GE, GI, kiuj abundas en la itala (samkiel en Esperanto, kiu fiere estas komparata kun la itala), kaj kiuj, nediskuteble, donas apartan delikatecon kaj muzikecon al la lingvo.

Tiu lingvo, senmortigita de la neatingeblaj grandeculoj de la krea penso, lingvo ĉarma, riĉa, belsona kaj radia, estos ĉiam vera trezorujo de granda delikateco kaj poezieco por ĉiu, kiu volas penetri en la kvietaj kantoj kaj malkvietaj sopiroj aŭ ĝemoj de la kantisto.

Srednogorski

AL NIAJ LEGANTOJ

Malofte ni turnas nin al vi en administraj aferoj dum la jaro. Kaj por ne forpreni valorajn kolumnojn en la revuo, se iam ni faras tion, ankaŭ preferi ni uzas la formon de aparta cirkulero. Nun, je la fino de 1936 — peza kaj nuboplana jaro — ni tamen volas al vi diri kelkajn vortojn ĉi tie kaj danki la fidon, kiun vi havis al ni. Ni donis la gazeton ja nur sesfoje malakurate kaj *Lingvo-Libron* trifoje, sed tamen la ĉiĵaraj paĝoj kune faras entute 224 dum la pasintjaraj 232 paĝojn. Ni do nenion forprenis de vi, eĉ, dononte favorprezo la Jubilean *Libron de Baghy-Kalocsay*, ni donos al vi pli multe, ol en 1935. Estas tre malfacilaj cirkonstancoj, inter kiuj ni devas labori. Kaj nia peto estas al vi: fidu nin plu, sendu vian abonon kiel eble plej rapide al niaj reprezentantoj. Ni ne scias, ĉu ni povos esti akurataj jam en tiu ĉi jaro. Tio dependas ankaŭ de la tuta cirkonstancaro en la mondo. Tamen, ni petas vin, taksu laŭ sia valoro la aperon de nia gazeto kaj fidu nin. Via rapida abonpago estos la signo, ke vi komprenas plene niajn fortostreĉojn kaj se venos multaj tiaj elmontroj de la fido, ni estas certaj, ke iam ni venkos nian malsanon: la malfruon. *Estu niaj karacistoj kaj verŝu en nin la plej bonan medikamenton: la monon kaj ni fariĝos la plej akurataj kaj plej sanaj.*

Via: Literatura Mondo